

k

LITERATURA MONDO

DUA PERIODO

DUA JARO

1932

700167-2

ENHAVO

STUDOJ KAJ SKIZOJ

Baghy, Julio: Mia angulo 12, 53, 75, 136, 155,	172,
	185
» » Vizitoj	21
» » Babilado pri Parizo kaj pri la	
XXIV-a.	145
Bastein, L.: Galope tra kelkaj francaj pensuloj	123
Beraru, M.: Vojantaj pensoj	147
Bródy, Lili: Ce Goethe sur la Frauenplan	74
Eckermann, J. P.: El la »Interparoloj kun	
Goethe« (Bennemann)	68
Farkas-Fenyves, László: La grafologia karakter-	
skizo de Zamenhof	41
Forge: Esperanto, lingvo de literaturo	161
» Vizito al Stellan Engholm	117
Grosjean-Maupin E.: Ido kaj Esperanto	97
Esperanto en la PEN-klubo (Bodó)	107
Kveton, H. B.: La plej junaj ĉeĥoslovakaj poetoj	193
Lippmann, Walter: Aforismoj 137, 167,	182
Marakovic, D-ro Ljuba: La literaturo en Jugoslav-	
ujo (Lapenna)	81
Migliorini, Bruno: La akcento en Esperanto kaj	
Occidentāl	1
Sturmer, K. R. C.: El la notlibro de praktika	
esperantisto	49
Szilágyi, F.: Serĉado, lingvo, socio	76
Totsche, L.: Kalocsay kaj Streĉita Kordo 14,	31
» Al la vera vizaĝo de Goethe	61
» Piedo por literatura organizo	93
Waringhien, G.: Skizo de esperanta metriko	132
» Majstroadmira aŭ ido'kulto	177

NOVELOJ, SERCOJ, SCENOJ.

Akuraters, J.: Kiel savis sin studento Grivenieks	
(Goba)	3,
	23
Andrić, I.: El la »Ex-ponto« (Jean d'Agreve)	85
Baar, J. S.: Filo (Tonĉka kaj Vuk Echnr)	198
Baghy, J.: Ni vivas kiel la kolomboj 87,	100
Berlinski, S.: La nokto (Lejzerowicz)	184
Brecht: Nia bonfaranto (Kemény)	170
Caragiale, L. L.: Grava eltrovo (Firu)	154
Engholm, St.: Festo	47
Forge: Trioble tri minutoj	135
Frug, S. G.: La diablo-bonfaranto (Sapiro)	127
Giraudoux, J.: Preĝo sur la Eiffel-turo	
(Waringhien)	121
Hajnik, Miklós: En Weimar (Bodó)	62
Hašková, J.: La tridektri savitoj (Ginz)	202
Hamsun, Knut: Iom da Parizo (Wiesenfold)	118

Jensenová, M.: Interparolo sub arbo (Ginzová)	203
Katajev, Valentin: La tranĉilo (Sarmatov)	178
Kikuĉi, K.: La miraklo (Simomura)	148
Lajzerowicz, J.: El la verda biblio 10,	73
» La vizito de Horaĉo Serĉer	52
Lešehrad, E.: Du poemoj en prozo (Geo)	201
Maĵuranić, F.: El la »Foliaro« (Novaĉić)	83
Maupassant, G.: La ermito (Richet)	114
Newell, L. N.: Bohema tago	42
Nomberg, H. P.: Fligelman 105,	122
Petronius: La vidvino de Efezo (Knutsson)	131
Romains, J.: Prezentado de Parizo je la kvina	
vespere (Waringhien)	120
Rón, Zdenek: Venko de lumo (Hromada)	105
Sándor, Kálmán: Gaso (Parvus Piscis)	129
Schwartz, Raymond: Klaĉ... klaĉ... antaŭ	
la kongreso	113
Szilágyi, F.: La sortotragedio de Florian	29
Vachek, A.: Bona reĝo kaj sentima soldato	
(Kudrna)	167
Walch, J.: Simson (M. Bijleveld)	162

POEMOJ

Adamson, H.: Poemoj 44, 45,	183
Dresen, Hilda: Surstrate	76
Bumy, C. E. R.: Arto poezia 9,	99
Baudelaire, Ch.: Aŭtuna kanto (Waringhien)	119
Domjanić, D.: Lunbrilo (Rotkvić)	83
Dučić, J.: Suko (Kalocsay)	91
Erben, K. J.: La saliko (Lukáš)	194
Falkonbrig, G.: Poemoj	181
Fröding, G.: Poemoj (Engholm)	27
Goethe: Admono (Kalocsay)	74
» Proverbe kaj sentence (Kalocsay) 63, 64,	65
» Kantoj de Gretchen (Belmont)	67
Heidenstam, V.: Sennoma kaj senmorta (Engholm)	7
Heine: Poeto Firduzi (Waringhien)	168
Ilić, V.: La poŝtveturilo (Dugangić)	82
Johnson, W. B.: Alvoko	76
» Du sonetoj	152
Jupanić, O.: Blank-krajna balado (Modrijan)	84
» Duma (Modrijan)	86
La edzino de agao Hassan (Janjić)	89
Hovorka, N.: Knabina printempo	98
» Murdita patrino	98
» Gefratoj kunigu la manojn	150
Karinthy, F.: Mortinto (Kalocsay)	149
Kréméry, St.: Eklogo (Lukáš)	196
Machar, J. S.: Artemis (Lukáš)	199

Mazzolini, A.: Poemoj	11, 28
» Muŝeto kaj burdo	72
» Rimitaj enigmoj	126
Nekrasov, N. V.: Letero al Leo Belmont	110
Nunez, D. A.: Du poemoj	116
Schütz, J.: Sur viandbazaro (Hilda Dresen)	16
Schwartz, Raymond: La blanka kolombo	48
Simazaki, T.: La kokoso (Sisido)	120
Sutkovoj, V.: Eterne sama	46
Szilágyi, F.: Senmia mi	104
» Epitafo	104
» Vivraporto	157
Totsche, L.: Al moderna knabo	180
Villaespera, F.: La fontoj de Granada (Grua Casas)	171
Vlček, B.: Sonetoj al Helena (Hromada)	201
Wildgans, A.: Amnokto (Hilda Dresen)	102
» Profunda rigardo (Hilda Dresen)	124
» La rideto (Hilda Dresen)	164
Wolker, J.: La leterkesto (Lukáš)	202

OBSERVO.

Adamson, H.	56
Andrić, I.	94
Domjanić, D.:	94
Caragiale, L. L. (Beraru)	158
Čapek, K. (Novak)	206
Eeden, F. (Hartog)	189
F. L.: Skizo pri ĉeĥa arto	204
Gemaro, G. (Waringhien)	17
Gorkij (K. B.)	173
Grenkamp, S.: Kilometrado	36
Jelušić: Cezaro (Rotkvič)	188
Joyce, J. (Brun)	139
Kaiser, G.: Es ist genug! (K. B.)	139
Kikuči, K.: (Simomura)	157
Hauptmann, G. (K. B.)	57
Hayd (K. B.)	77
Ilić, V.	94
Jupančić, O. (Borko)	94
La hejmeniro de Casanova (K. B.)	139
Majuranić, F.	94
Nomberg, H. D. (Guterman)	110
Podesva, F.	204
Prelegoj pri la historio kaj literaturo de Esperanto (L. T.)	78
Proust-strato en Parizo (K. B.)	173
Major, J.: Pri la tendencoj de moderna literaturo en Japanujo	140
Shaw, G. B.: Too true to be good (Applebaum)	158
Strachey, Lytton (K. B.)	35
Sukceso de bona teatraĵo	190
Ysern-Alliè (Pujula)	138

FILMO (red.: Forge-Fethke)

Antaŭ la XXIV-a	107
Filmobservo	55
Filmsteloj kaj Esperanto	186
Kion ni faris en Parizo	187
La filmmanuskripto	13, 54

DISKUTO.

Belmont: Korekto de grava ofendo	109
E. G.: Ĉu originala aŭ tradukita literaturo	18
Kalocsay, K.: Letero al s-ro Bennemann	207

Loti, P.: Pri neŭtra gramatika sekso	156
Szilágyi, F.: Korekto de korekto	137

RECENZOJ.

Andersen: Fabeloj (Totsche)	159
Ariŝima: Senbedaŭre amo rabas (Totsche)	96
Baghy, J.: Publika letero pri la reorganizado (Lejzerowicz)	78
Barbarus, J. Horizontoj (Szilágyi)	19
Bergman: Tra sovaĝa Kamĉatko (Parvus Piscis)	175
Bertrana: Barbaraj prozaĵoj (Totsche)	39
Cujuki: Stala biblio de samuraismo (Szilágyi)	111
Drezen: Skizoj pri teorio de Esperanto (Kopar)	111
Engholm: Homoj sur la tero (Totsche)	160
Firu-Pragano: Rumana bonhumoro (Szilágyi)	59
Genthon: La pentroarto en la malnova Hungarujo (D — ő)	95
Goethe: Romaj elegioj, La taglibro (Waringhien)	174
Göhl: Ausführliche Sprachlehre des Esperanto (Kopar)	159
Iŝihara: Verda karto (Totsche)	96
Jamamoto: En la nebulo (Szilágyi)	111
Jerušalmi: Eksiĝo (Szilágyi)	112
Kalocsay: Eterna bukedo (Waringhien)	37
Kalocsay-Waringhien: Parnaŝa gvidlibro (Benne- mann)	191
Kloepfer: Vagabondo kaj sinjorino (Szilágyi)	112
La konfliktoj en Manĉurio kaj Sanhajo (Szilágyi)	158
Merchant: Kompatinda Klem (Totsche)	57
Millan: Mia poezio (Totsche)	96
Nash: Miniaturoj (Totsche)	58
Papini: Historio de Kristo (Jobo)	57
Prus: La vizio. La veŝto. (Totsche)	142
Roe: Lando de arĝenta akvo (L. T.)	58
Romanov: La mistero. Unu horo. (Totsche)	142
Schwartz: La stranga butikoj (Sturmer)	36
Smogorzewski: Pol-Pomeranio (Szilágyi)	112
Szilágyi: Az Eszperantó nyelv (Bodó)	58
» Trans la Fabeloceano (Sturmer)	95
Toscani: Rakontoj por geknaboj (Totsche)	96
Totsche: De paĝo al paĝo (Waringhien)	141
Vondel: Gysbreght van Aemstel (Totsche)	19
Etaj recenzoj:	59, 79, 96, 112, 142, 175
REVUE DE REVUOJ (Totsche)	34, 108

ILUSTRAJOJ

Babić	103
Bečić	101, 105
Berlevi	43, 52
Cézanne	24
Cermák	207
Darell	165, 169, 175
Eisenschitz	153
Gennaro	3, 4, 5, 6, 8, 10, 11, 12, 14, 15
Gutfreund	193, 203
Hegedušić	108
Krahl	125
Labat	163
Manes	206
Manaut	173
Marcoussis	25
Matisse	25
Modigliani	26
Obrovski	198
Ogniss	155
Ozenfant	24

Oudot	151
Picasso	35
Stanislao-Grabowski	29, 30, 31, 37
Stursa	197
Svabinsky	195, 200, 205
Ysern-Allié	115

BILDOJ, PORTRETOJ

Adson	22
Akuraters	21
Amann, Betty	186
Chevalier	55
Dietrich, Marlene	55
gesinjoroj Engholm	117
Forge	117, 161
Fritsch, Willy	13

Goethe (bildoj de la Goethe-numero) 61, 66, 69, 70 71	
Grosjean-Maupin	97
Harvey, Lilian	187
Jannings, Emil	56
Komensky-Comenius	204
Macdonald, Jeannette	55
Migliorini	1
Pariza kongreso	146, 147
Schwartz	113
Titolpaĝprojektoj	190, 191
Under, Marie	22
Waringhien	177

MUZIKNOTOJ

Kalocsay: Kanto de vagabondo (Kalocsay	50, 51
» Amkanto (Thegze-Gerber)	179





En Esperanto la regulo estas unika: ĉiuj plurvokalaj vortoj havas la akcenton sur la antaŭlasta vokalo.

Neniu dubo en la akcentado; sufiĉe malmultaj ekzemploj de akcentoj, kiuj frapas vokalon malsaman ol en la naturaj lingvoj. Certe, Italoj kutimas en sia lingvo akcenti *facile*, kaj ne *facile*, sed ankaŭ lernante francan lingvon ili devas lerni ke oni akcentas *i* kaj ne *a*. Kvankam do en la vortoj *nacio*, *okulo* ktp. la akcento falas sur vokalojn malsamajn ol en la samdevenaj vortoj en la naturaj lingvoj, la metodo mem tute ne estas arbitra: en lingvoj kun fiksa akcento kiel la franca, la ĉeĥa, la pola, grandaj serioj da vortoj ricevis akcenton malsaman ol en la devenaj lingvoj.

Ni vidu nun kion faris Occ. por konservi naturecon. (Tiu el miaj legantoj kiuj ne havas duonhoron por elspezi, povas ĉesigi la legadon: la afero estos multe pli longa kaj komplikita ol oni rajtus atendi de lingvo tiel facila kiel fanfaronas ĝiaj adeptoj).

Jen la reguloj (laŭ oficiala gramatiko: *Occidental, die Weltsprache*, Stuttgart 1930, p. 79):

1. Oni akcentas la vokalon antaŭ la lasta konsonanto: ekz. *fórme*, *famílie*, *ávie*, *doctór*, *formár*, *formánt*, *formát*.

2. La pluralfiniĝo *-s* kaj adverbfiniĝo *-men* havas nenian influon sur akcentado: ekz. *fórmes*, *famílies*, *ávies*, *doctóres*, *sólmen*, *generálmen*.

3. La sufiksoj *-bil*, *-ic*, *-im*, *-ul* ne ricevas akcenton: ekz. *durábil*, *eléctric*, *grammática*, *régul*, *stébula* (= *stimula*?), *últim*.

4. En esceptaj okazoj la akcentado estas montrata per akcentosigno: ekz. *idé*, *númère*, *qualité*.

T. e. tri reguloj, kaj senombra serio da esceptoj, ĉar la kvara estas regulo kiu taŭgas nur por *pasive* legi la lingvon; por uzi ĝin skribe aŭ parole, t. e. *aktive*, oni devas ĉiufoje lerni ne nur la vortformon, sed kion s-ro de Wahl decidis pri la akcento.

Ni vidu nun ĉu per tiom da reguloj Occ. atingas naturecon kaj facilecon.

Bonvolu legi tiun ĉi vortserion:

parocos
publicos
omnicos
espritos

Parócos: bone. Strange, tamen: en la lingvoj, kiuj posedas tiun ĉi vorton en la sama signifo kiel Occ. t. e. »parohestro«, ĝi havas la akcenton sur *a*:

la vortakcento ne estas do tiel natura. Ne gravas: daŭrigu.

Publicos. Ne, ne! ne lasu vin forĝvidi de franca *public*, de germana *publik*; kaj *Republik*, de rusa *publičnij*...: apliku la trian regulon, ne forgesante la duan. Bone, bone: *públicos*. Daŭrigu.

Omnicos! Ne, ne: vi eraris. La vorto ne havas la sufikson *-ic*: ĝi estas kunmetaĵo de *omni* kaj *cos*, kun la signifo *ĉio*. Oni devas do legi *omnicós*, kaj oni povas skribi laŭ aŭtoritataj ekzemploj *omnicos* aŭ *omni-cos*. Ĉu vi komencas iomete ŝviti? Ne, ne, kara leganto: vi nur ekkonstatis la avantaĝojn de la »naturaj« artefaritaj lingvoj. Daŭrigu.

Espritos. Ne! vi miskomprenis. Vi pensis pri pluralo de *esprit*, sed la pluralo de *esprit* estas *esprits* aŭ *esprites*, kaj ĉi tie, kontraŭe, vi havas sufikson *-os*: t. e. spritplena, *esprítos*. Ĉu tio estas iom malfacila? Ĉu vi diras ke, ĉar en Occ. ekzistas skribakcento, oni povus ĝin uzi unu aŭ dufoje? Jen kvina ekzemplo, kaj vi havos skribakcenton: *amícos*.

Amícos? sed ŝajne neniu en Okcidento kaj verŝajne ankaŭ en Oriento prononcus malsame, eĉ se li ne vidus skribakcenton!

Ni lasu la ŝercon, kaj ni demandu nin, ĉu post tiaj ekzemploj la Occidentalistoj rajtas riproĉi al la Esperantistoj, ke ili igas la lingvon malfacila pretendante altrudi al ĝi nenaturajn regulojn, embarasigan kirason... En parto de la lingvo tiel esenca kiel la akcento Occidental estas senkompare pli malfacila ol Esperanto, kaj malgraŭ tio ĝi ne fariĝas pli »natura«.

Ni ekzameni pli detale la tutan aferon.

La unua regulo diferencigas de la unika Esperanta regulo ĉefe kiam estas du vokaloj ĉe la fino de la vorto: tiam en Esperanto la unua ricevas la akcenton, dum en Occ. la akcento estas repuŝata al la antaŭa silabo.

En Esperanto tio konservas en kelkaj vortoj la internacian akcenton (*astronomio*, *teorio*, ktp.) dum en kelkaj aliaj la internacia akcento estas ŝanĝata (*nacio*, *vizio*).

En Occ. la roloj renversigas: sed oni atendus ke la 4-a regulo intervenas, reaplikante la internaciecon. Kontraŭe ing. de Wahl volis uzi tiun oportunecon kiel eble plej malmulte, kaj rezultate grandaj vortserioj havas neinternacian akcenton, arbitre kaŭzitan de la akcentregulo: *astronomie*, *energie*, *heresie*, *hypocrisie*, *ironie*, *periferie*, *telefonie*, *teorie*, *Utopie* ktp. (t. e. *astronomie*, ktp.)

La nenatureco de tiu akcentregulo rezultas ankaŭ de la fakto ke, kie la akcentosigno estas uzata, ĝi aspektas internacie kiel superflua, kaj ĝi ofendas ĉefe Britojn: jen vortoj kiel *muséo* aŭ *Messia*, jen eraroj aŭ arbitraĵoj kiel la diferenco inter *hebreo* (sen skriba akcento, *pron.* hébreo) kaj fariséo (en *Deutsch-Occidental Wörterbuch* de Gär, Reval 1928); jen stumpigo de internaciaj formoj, kiel *idé*, *livré*, *troké*, kiuj havas la formon *idea*, *livrea*, *trachea* (aŭ *idee*, *livree*, *trachee*) se oni ne devus eviti la finan vokalgrupon.

Arbitran akcenton, ne kuracitan per la 4-a regulo, ricevas ankaŭ vortoj kiel *aeronaut*, *caut*, *hydraulic*, ĉar Occ. por savi la internacian ortografion ne markis la duonkonsonantan valoron de *u*, kaj tial devas faligi ser ĝin la akcenton (prononcu *kaüt* ktp.).

Laŭ la regulo, la akcento falas sur la lasta vokalo de vortoj kiel *anatom*, *filosof*, *paroc*, *dialog*, ktp. Tio

donas al la lingvo ritmon, »stilon«, similan al la Esperanta. Sed subite jen vorto kiel *episcop* kiu interrompas ĝin. La aŭtoro de Occ. kredis oportune sekvi la internacian akcenton: sed la popoloj kiuj akcentas en sia lingvo same *philosophos* kaj *episkopos*, t. e. ne nur la Grekoj, sed ekz. la Hispanoj, devos lerni parkere la »escepton«. Eĉ pli malfacile estos memori ke, laŭ sia *Radicarium*, Occ. adoptis *hypérbol*, sed *parabol* (t. e. *paraból*): tute kaprice. Same kapricaj estas la akcentoj de *cólera* »holero« kaj *colera* »kolero«: la Italoj bezonas nur memori ke ili estas kontraŭaj ol en sia lingvo, kaj denove laŭdos la perfektan »naturecon« de Occidental.

Sed eble la kulminon de la kaprica akcentado oni vidas en la serio de adverboj, prepozicioj kaj konjunkcioj, kiujn Occ. adoptis de la latina lingvo: *támen*, *quáncam* (bone), *super*, *forsan* (t. e. *supér*, *forsín*: kial do?), kaj fine *interim* (t. e., laŭ la tria regulo, sed kontraŭ ĉiu internacieco, *intérim*).

Ni jam vidis unu el la maloportunaĵoj, kiuj rezultas de la dua regulo: t. e. ke oni bezonas scii, por ĝuste akcenti vorton, ĉu ĝi estas pluralo aŭ ne: la vorto *cortes* povas esti pluralo de *corte* kun akcento sur *o*, aŭ adjektivo »ĝentila« kun akcento sur *e*. La Hispanoj havis ĝis en la pasinta jarcento similan regulon; sed fine la Hispana Akademio akceptis la regulon, ke *-s* ne influas sur la akcento, kaj distingis *cortés* de *cortes*. Ni konsilas al aŭtoritatoj de Occ. funde studi la evoluon de la hispana ortografio: ili eble trovos ion por lerni.

La tria regulo evidente celis eviti skribakcenton en la plej komunaj vortoj internacie akcentitaj sur la antaŭlasta silabo. Ni ne diskutu pri la elekto: laŭ franca (kaj parte germana) modelo oni estus povinta, ekz., lasi akcenton al la vortoj en *-ic*, akceptante ke oni prononcu *public*, *fabric*, ktp. kun akcento sur *i*. Tiel tranĉinte, oni devas tamen redoni la akcenton, kaj tial uzi akcentosignon, por vortoj kiel *amic* (*amico*), *formic* (*formica*), vera pugnofrapo por niaj okuloj. Pugnofrapo por okcidentalaj (ne Occidentalistaj) orleoj estas la prononco de *radica appendice*, *matrice*, *felici*. Sed restas la grava dubo ĉu oni devas prononci tiujn vortojn *rádica*, *appéndice*, *mátrice*, *féllici* aŭ *radica*, *appendice* ktp. Kvankam la koncepto de »sufikso« en Occ. estas nebula afero, la fakto ke oni skribas *formic*, *formica* ŝajnas konformi la unuan prononcmankon: *-ic* certe ne povas esti konsiderata aktuala sufikso (ĉar *formica* ne derivas de *formar*!). Verdire oni ankaŭ trovas *filice* kun skribakcento en la *Radicarium* de Wahl, kio ŝajnis konfirmi la duan interpretmanieron: tamen la vortaro de Gär skribas simple *felice*... S-ro de Wahl ofte riproĉis d-ron Zamenhof, ke li tranĉis Gordajn nodojn anstataŭ ilin solvi, kieli li faris: ŝajnas tamen, ke survoje li forgesis solvi kelkajn...

En internacia lingvosento la sufikso *-ic* estas paralela kun *-id*: tial oni miras trovante ke *-id* ne repuŝas akcenton, kaj ke oni devas prononci kun akcento sur *i* *acid*, *calid*, *frigid*, *lucid*, *celluloid*. Same, lerninte ke oni devas prononci *durabil*, *stabil*, *possibil* kun akcento sur la antaŭlasta vokalo, oni miras trovante *simil*, *futil* ktp. kun akcento sur la lasta.

Eĉ pli malagrable estas la regulo pri *-im*, kiu evidente celas ĉefe la superlativojn (*altissim* ktp.): ni konstatas la saman haŭson kiel ĉe *-ic*: *Radicarium* skribas *ánim* kaj *sublim*, dum la verko Occ., kredeble pli ĝuste, skribas *anim* kaj *sublim*. Bonvolu, post tio, legi *estima*, *regime*, *pantomima*: ĝis nun mi ilin trovis sen skribakcento: ĝis ŝango ni legu do *éstima*, *régime*, kaj eĉ *pantómima*.

Laŭ Cosm. VIII, p. 165 ankaŭ la finaĵo *-um* estas senakcenta; kaj tio devigos skribe akcenti *costúm* *parfúm*.

Ni ŝparos al niaj legantoj la priskribon de la malfacilaĵoj, kiujn donas la kunmetitaj vortoj (ekz. *undeci*, *necu*, legotaj *úndeci* kaj *necú*), ĉefe ĉar mankas reguloj kaj la ekzemploj estas ofte kontraŭaj inter si (I).

Se vi kredas, post tio, ke vi perfekte konas la akcenton de Occ., vi eraras. La tri reguloj, kaj la esceptoskatolo elĉerpigis; sed kiel ĉe jonglisto, novaj mirindaĵoj elsaltas el aliaj tirkestoj de la gramatiko. Bonvolu legi la vorton *incaut*. Ĉu vi kredas ke oni devas legi, laŭ la grafio, akcentante *i*? Ne. Ĉu, laŭ la internacieco, a? Ankaŭ ne. Do restas la plej stranga kaj maloportuna akcentado, tiu de *u*. Same, trovante *infam*, *impur* vi devos akcenti ne la unuan silabon, sed la duan. Efektive, laŭ Occ., la prefikso *in-*, kiam ĝi havas negativan valoron, devas porti skribakcenton, kiu ne havas valoron akcentan, sed simple ortografian.

Simile, kvankam la gramatiko silentas pri tio, oni kutime skribas *dí*, *dá*, *fá* en la signifo »diras«, »donas«, »faras«; mi ne bone scias ĉu ankaŭ por aliaj unusilabaj verboj kaj iliaj kunmetaĵoj, ĉar la ekzemploj oscilas (*il descri*, Cosm., VIII p. 88; *il prosci*, Cosm., VIII, p. 100).

Ĉu estas necese konkludi? Ne, nur konstati ke ankaŭ s-ro de Wahl, faris la samon kion jam spertis la antaŭaj lingvokreantoj (kaj kion, laŭaserte, nur li evitis): »li donis al vortoklaso regulon kiu ne estas konforma al ili, do arbitra metodo« (Cosm., VII, p. 193).

Se ankaŭ Esperanto bezonis konvencion, ĝi tamen aplikis regulon senkompare pli simplan, pli facile memoreblan, pli konforman al leĝoj kiujn kelkaj gravaj naturaj lingvoj sekvis en sia evoluo, do al leĝoj »naturaj«. »Ju malpli lingvo ŝargas la memoron de la parolantoj, des pli facila ĝi estas« (Occ., p. 138).

Bruno Migliorini

(1) Eble kelkaj optimistoj trovas, ke mi iom tro subtile kritikis formojn, kiuj eble estas nur preseraroj. Sed ili evidente ne konas la akrecon, per kiu la Occidentalistoj kritikis erarojn pri *o* anstataŭ *k*, aŭ pri akuzativo en la Esp. gazetaro (Cosm., No 5, p. 25, No 17, p. 60; Cosm., VII, p. 81), konkludante ke Esp. adoptis nenaturajn regulojn. Ni povus, se tio ne estus tro teda, citi dekojn kaj dekojn de eraroj en la Occ. lernolibroj kaj gazetoj (*revenú*, sed *revenues*, Cosm., VII, p. 103; *r.vúe*, sed *revue*, Cosm., VIII, p. 9; *númere*, sed *numere*, Occ. p. 183, ktp. ktp.), kiuj estas nepre konsekvenco de la nenaturaj kaj komplikitaj reguloj de akcento.

Kiel savis sin studento Grivenieks

— J. Akuraters —

I.

Johano Grivenieks, filo de bienposedanto, kvankam, kiel moderna homo, li kredis nek je Dio, nek je diablo, laŭ la malnovaj tradicioj estis konfirmata en malgranda vilaĝa preĝejo kune kun aliaj gejunuloj. Tio okazis en la somero, kiam li finis mezlernejon en distrikta urbo kaj preparis sin por studi en la universitato de Riga.

La familio al kiu li apartenis, ne estis granda, sed riĉa je latvaj kamparanaj virtoj, laborema kaj sufiĉe riĉa...

Ili estis nur kvar: la ambaŭ ĝemaljunuloj kaj frato kaj fratino. Fratino de Johano, etinjo, tri jarojn pli aĝa ol li, estis gaja, bona kaj laborema knabino. La bieno ne estis granda kaj la tero ne tre fruktodona. Estis nur ĉirkaŭ okdek akroj en altestaranta loko kun pin- kaj betularbaretoj sur lagobordo. Sed la amo de la familio al la tero, la labortradicioj kaj diligenteco donis al ĉiuj sufiĉe bonan ekziston. Travivinte la teruran tempon de mondmito, kiam la infanoj estis ankoraŭ malgrandaj, bieno Grivenieks nun ekriĉiĝis kaj jaron post la jaro dungis poŝtiston kaj laboriston. Ĉiuj faris la grandajn, malfacilajn laborojn kun ĝojo.

Maljuna Grivenieks edukigis Johanon en mezlernejo. Li revis studi terkulturadon, por fari la negrandan bienon floranta paradizo kaj montri sciencajn akirojn al ĉiuj kamparanoj de la ĉirkaŭaĵo.

Johano Grivenieks post la fino de la mezlernejo ankoraŭ unu jaron pasigis hejme por perlabori rimedojn por siaj studadoj en Riga, ĉar pli grandan kapitalon oni ne povis kolekti de la malgranda mastrumaĵo. Por li tio ne estis malfacila, ĉar en li zumadis juneco, kiel blua maro kun revokronoj, — bordoj ĉi tie ne estis.

La estonta studento estis heredanta de siaj laboremaj kamparaj antaŭuloj kaj ankaŭ de sia patro belan korpon, bonan sanon, sed kiom stranga tio ankaŭ estu — senteman, mildan knabinan animon, impresblan kaj plenan de fantazio. En lia vireca vizaĝo estis okuloj klaraj kiel tiuj de knabino, profundaj kiel al poeto. La forte formitaj vizaĝtrajtoj rememorigis energian viron: nigregrizaj haroj kiel monto kovris la nigrajn brovojn. En liaj manoj estis jam virforto kaj en la tuta korpo multe da sana arbara kaj kampara malvarmeto.

Sed kiam Johano Grivenieks prepariĝis forveturi al Riga, li eksentis malĝojon. Irante tra kampoj aŭ en varma somero falĉante fojnjon en lagogolfoj, li ofte rigardadis malproksimen, kie en angulo de betularbareto, en dukilometra distanco, kaŝis sin najbara bieno. Kaj tie loĝis lia amikino Viktoria... kaj ankaŭ amikino de lia fratino, — kompreneble. Ilia amo estis tiel interplektita kun la frua infanaĝo, ke estis malfacile disigi ilin unu de la alia. Nur kelkfoje, kiam la juna knabino, kiu estis nur du jarojn pli juna ol Johano Grivenieks, ekridetis al li en soleco, ekmoviĝis en li varmega sangondo, ebrügante la animon kvazaŭ per malproksimaj fabellandaj mirindaĵoj. Tiam li havis tian senton, ke universo kaj mondo kaj vivo estas dividitaj en du partojn: en unu flanko staris la mondo, en la dua Viktoria kun siaj belaj harbukloj, altkreska, gracia figuro kaj floranta buŝo. Ankaŭ en ŝi estis animo de vilaĝa domo, bela, profunda kaj mirinda kiel la naturo de Latvio. La juna korpo odoris je

kamparaj floroj, tero, sumo, kvankam Viktoria, vekigante por la vivo kune kun revolucio kaj popolo, portis en si jam la monddoloron. Ankaŭ ŝi preparis sin por naĝi en la grandaj akvoj — t. e. studi en Riga, ĉar tie fluis la vivo de la popola spirito, la tuta nova mondo.

Dume ili vivis, kiel floroj en varma laga akvo, ne sentante, kiel forkuras tagoj, ĉar ili estis feliĉaj. Ili legis belliteraturon, debatis pri ĝi kaj sentis en si ion fermenti... Tio estis la venonta vivo, kio kolektis la fortojn por si.

Kiam la varma somersuno ekpaliĝis kaj venis septembro, Grivenieks devis forveturi. Viktoria, kompreneble, havis okazon tiutage viziti lian fratinton Elinjon, kaj fine ili estis solaj post la pomarboj en ĝardenangulo. Viktorio ridetis ĉifoje strange kaj rigardis en la okulojn de la juna studento. Nur kiam li per siaj malmolaj manoj premis ŝian kapon al si por kisi, kvazaŭ adiaŭante, ŝi rapide metis siajn manojn ĉirkaŭ lia kolo, ektemis kaj forkuris, kvazaŭ ŝi estus ion ektiminta.

La patrino preparis multe da kamporiĉaĵoj por nutraĵo en Riga, blankajn lintukojn, kolorigitan litkovrilon kaj littolajon. Johano ja devis vivi pli simple kaj iafoje veturi hejmen por preni nutraĵon. La patro bonvole kaj kun fiero donis la kolektitajn kvincent latojn, kaj akompanita de ridetoj kaj spritaĵoj de ambaŭ knabinoj, li forveturis en malfrua vespero...

La sekvan tagon Johano Grivenieks estis jam en Riga. Sian havaĵon li donis veturigi per manveturileto al la antaŭurba strato, kie li jam antaŭe luis ĉambreton. Post unu semajno sur lia kapo estis jam blanka studenta ĉapo kun ora diabla kruco. Li estis terkultura



La pastro kun la breviero

studento en la universitato. Lia koro estis vigla kaj hela, kaj li sentis sin tiel libere en ĉi tiu vivfludo, ke li ne rimarkis, kiam mallumiĝis la siluetoj de bieno Grivas kaj la helaj sunoplenaj harondoj de Viktorio. Li estis en alia mondo...

II.

Tamen montrigis, ke la ekzistado en la ĉefurbo ne estas tiom simpla kaj malkara, kiel oni hejme estis kalkulinta. Kiel ajn ŝpareme li ja vivus, li bezonis centlatojn monate, se li ankoraŭ volis viziti teatron aŭ operon aŭ iafoje studentajn vesperojn. Grivenieks subite sentis, ke por li estas necesa nigra vesto, ĉar en sia griza vilaĝa vesto li povis viziti nur lecionojn.

Sed ĉi tio estis bagatelo. Li donos lecionojn, laboros ie kiel oficisto, se estos necese. Laboro tamen ne estis tiel akirebla, kiel ŝajnis, kaj tial Grivenieks devis labori en iu kontoro por malgranda salajro... Li eĉ ne havis tempon por viziti dum Kristnasko siajn gepatrojn. Li pasigis mizeran vivon, kian havas malriĉaj vilaĝaj studentoj, plenaj de forto, kuraĝo, sed eterne forigitaj de pli vasta societo.

En la dua jaro iu lia amiko varbis lin por korporacio. Nun venis novaj elspezoj, sed la korporacio havis bonan pasinton — ĝiaj filistroj estis gravaj ŝtatoj — kaj tial li havis grandan esperon por estonto... Kaj kiam Grivenieks jam studis la trian semestron, oni lin invitis, laŭ rekomendo de iu konata kamarado, kiel edukiston kaj privatinstruiston al riĉa industriista familio. Lia devo estis — prepari la 13-jaran solfilon Gundabo en kelkaj sciencoj kaj sekvi lian laboron en lernejo kaj dum libertempo.

Kun ĉi tio la materiaj cirkonstancoj de studento Grivenieks tuj ŝanĝiĝis. Li devis loĝi en ĉi tiu riĉa familio en aparta ĉambro. Nutraĵoj li ricevis de la mastra tablo, loĝis en lia societo kaj ricevis sufiĉe grandan sumon monate kiel salajron. Li eksentis kaj avide enspiris la ebruiĝan aeron de Riga. Kune kun tio novaj sentoj plenigis lian vivon kaj tute lin disigis de tiu mondo, en kiu li pasigis sian infanecon kaj



Sudanano

forlogis de tiuj homoj, kiuj ĝis nun en lia memoro staris firme, kiel statuoj. Okazis tio malrapide, iom post iom.

Kiam li laŭ invito de sinjoro Sala venis en lian loĝejon, enlasis lin bela ĉambristino kaj petis lin atendi ĝis kiam la sinjorino akceptos lin.

Grivenieks sidigis sur peza leda divano en la atendejo kaj vole nevole ekrigardis la bele garnitan loĝejon, tapiŝojn, pezajn seĝojn, pentraĵojn. La unuan fojon li vidis tian riĉecon. Li sentis sin maloportune en sia simpla vesto; li mankaresis sian densan hararon, kiu staris senorde sur la frunto kaj turnis en la fingroj sian malnovan studentan ĉapon.

Kaj tiam oni vokis lin.

Enirante apudĉambron li ekvidis belan sinjorinon en libera hejma vesto kaj kun perla ornamaĵo ĉirkaŭ la kolo. Al li ŝajnis, ke ŝi estas ankoraŭ juna, sed jam kun rondaj kaj fortaj korpoformoj. Ŝi estis sinjorino Sala, kiu deziris konfidi al la studento la edukadon de sia solfilo.

»Ĉu vi estas sinjoro Grivenieks?»

»Jes, estimata sinjorino!»

»Kian aĝon vi havas?»

»Mi estas dudekjara.»

»De kia regiono?»

Grivenieks diris la distrikton.

Kaj ĉiuj demandoj estis detalaj, kiel ĉe juĝisto. Vidante lian vilaĝanan nekaŝblan ĝenigemon, la sinjorino ekridetis kaj same ridetante rigardadis la viz-aĝon, okulojn, manojn de la studento; kvazaŭ taksante. Kaj fine ŝi deklaris la ĉefkondiĉojn.

»Mia edzo invitis vin por preparoli la edukadon kaj instruadon de mia filo. Vi estos en mia dispono. Sinjoro Sala estas tiel okupata en sia entrepreno, ke li pri hejmaj aferoj zorgi ne povas. Vi ĉie kaj ĉiam devos obei min. Mi pensas, ke ni komprenos unu la alian. Sed vi devos defendi ankaŭ mian opinion, se tio estos bezona, ĉar mia edzo malmulte komprenas la edukadon. Kion vi opinias?»



Tribestro

Si ekridetis, sed li ne komprenis kial.

Grivenieks estis dankema al ŝi pri la malkaŝemo.

»Mi tute konsentas, estimata sinjorino. Mi penos...«

Li sentis, ke de sinjorino Sala venas ia stranga ordonanta forto kaj li timis rigardi en ŝiajn okulojn. Ŝi havis kuraĝajn, verdepalajn okulojn; ili similis rigardojn de Meduzo. »Bone, sinjoro Grivenieks! Ni, do, povas komenci jam morgaŭ. Vi loĝos ĉe ni en via ĉambro. De la kvara ĝis la sepa horo vi helpos al Gundabo prepari lecionojn. La cetera tempo estas je via dispono, escepte la tagojn, kiam vi akompanos lin al glitveturejo aŭ promenos.«

Si metis unu piedon sur la alian, prenis malgrandan cigaredujon kaj proponis ankaŭ al Grivenieks. Kiel stranga tio estis — li devis rifuzi, ĉar li ne fumis! Kiaj antipodoj ili estis!


»Ho, kiel moderna vi estas!« ridis ŝi. Vi ne rekonas iajn ajn tentojn? Sed iom post iom vi alkitimigos... Do, — ŝi rapide levigis, »ĉio estas en ordo! Mi atentos vin morgaŭ. Nun ĝis revido.«

Si staris tute proksime al la studento kaj donis kisi la manon tiel libere kaj volonte, ke liaj lipoj tuŝis ĝin pli forte ol ordinare. Ankoraŭ foje li vidis la okulojn de Meduzo kaj post tio li restis sola.

La ĉambristino jam atendis en la antaŭĉambro kun la mantelo kaj bastono... La junipera bastono el la arbaro de bieno Grivas! Grivenieks ekhontis iomete, sed la knabino gaje ekridetis, eble divenante, ke la studento nun estos hejma homo.

Kiam studento Grivenieks venis sekvantage, la tuta familio de Sala estis kune ĉe la manĝotablo. La mastro, industriisto kaj komercisto Sala, havis pli ol kvindek jarojn; li estis altkreska, kun blondaj haroj, senhara nuko kaj malvarmaj, helaj kvazaŭ akvozaĵ okuloj. Li estis korekta, fiera pri siaj manieroj, sed ankaŭ silenta kaj meditema. Li estis unu de tiuj, kiuj ne rapidas, sed certe atingas sian celon. Ne kalkulante la domon en Riga, li havis pli ol dek milionojn da latoj.

La solfilo Gundabo estis malgrasa kaj altkreska knabo, kiun oni edukis laŭ germanaj burĝmanieroj. Li scipovis fari saluton, kiel dresita bubo laŭ militista



Boksisto



La trejnisto

maniero kunfrapante kalkanojn, estis silentema, sed dorlotita. Li sidis apud Grivenieks ĉe la tavolo.

La sinjorino, apud sinjoro Sala, hodiaŭ estis bela. Ŝiaj moderna vesto, perfekta frizaĵo, manoj ornamitaj per ringoj, karaj ornamaĵoj en onditaj haroj kaj profunda rigardo kvazaŭ sternis ĉiujn. Ŝi rigardis al Grivenieks malvarmete kaj ordone, kaj li sentis, ke ŝi lin sugestas. Sajnis, ke ia diableto ridas en ŝiaj lipanguletoj, sed ĝi tuj malaperis.

La paroltemo unue estis la studento. Li nun devis rakonti pri sia familio, pri kamparo, pri laboroj kaj celoj. Post tio oni mallonge pridiskutis la okupon kaj edukadon de Gundabo kaj post la tagmanĝo sinjoro Sala tuj foriris kaj ne revenis eĉ al vespermanĝo.

Sed anstataŭ li estis tie juna sinjorino — fratino de sinjorino Sala — fraŭlino Dreimanis. Ŝi estis pli altkreska, pli juna ol sinjorino Sala, vigla kaj elasta kun stranga splensento. Ŝi estis de tiuj tipoj, kiujn la studento vidis en dancsalonoj, nur pli eleganta kun grandstila silka vesto. Ŝi havis lipojn, ruĝe kolorigitajn kiel mumio, harojn tranĉitajn »a la garconne,« kaj malgrasajn, longajn manojn...

Ŝi rigardis la studenton per akra rigardo, sed ŝajnis esti malvarma.

Nur post la vespermanĝo, kiam oni priparolis tagajn okazintaĵojn en socio, fraŭlino Dreimanis nerimarkite sidigis ĉe piano kaj ion ekludaĉis, kiel lernantino, kaj post tio transiris al konata valso, kiun ŝi ludis diversvariacie.

»Ho, kiel tio plaĉas al mi,« ŝi diris kaj levis la kapon ekridetante al Grivenieks.

»Ĉu vi dancas modernajn dancojn?« demandis ŝi kvazaŭ ordonante.

»Mi lernas, mi lernas,« mensogis li, por ne esti tro malmoderna.

Evidentiĝis, ke la fraŭlino konas en la korporacio multajn junulojn kaj ekinterestigis la studenton pri diversaj intimaj bagatelaĵoj. Sin ĝenis nenio.

»Olga... ĉu ne estas la tempo por vi foriri?« demandis sinjorino Sala.

»Bone, sed sinjoro Grivenieks akompanos min

ĝis mia hejmo. Estu tiel afabla,» ŝi furnis sin al la studento.

»Bedaŭrinde, sinjoro Grivenieks hodiaŭ ne havas la tempon,« diris la sinjorino malvarme kaj signoplene rigardis la studenton, kiu staris kiel inter du fajroj, »ni devas preparoli la edukplanojn de Gundabo.»

»La edukplanojn?« ironie diris fraŭlino Olga gracie kaj signoplene kuntirante sian rubandon sub la genuo. »Mi havas neniajn planojn, mi vivas de unu okazaĵo ĝis la alia. Sed tiukaze — ĝis revido!« Ŝi ekludis ian fokstrotmelodion, salutis per kapklino kaj ne adiaŭante foriris, sed la rigardo, kiun ŝi dediĉis al sia fratino, estis plena de ardo kaj stranga akreco. Grivenieks ne komprenis kion signifas tia sceno. Tion li komprenis poste...

Sinjorino Sala sidigis sur la bruna leda apogseĝo kaj montris per gestoj la seĝon kontraŭ si. La studento eksidis. Denove li sentis la strangan, nekomprenblan sorton, kiu radiis el okuloj de la sinjorino. Ŝia spirado estis nenormala. En la okuloj brilis profunda ardo. Ili ekparolis. En la domo ekestis profunda silento; odoris parfumoj...

III.

Studento Grivenieks jam tri semajnojn plenumis siajn devojn de privata instruisto en la familio de Sala. Grandan penon de li tio ne postulis. Gundabo lernis nek tro bone, nek ankaŭ tro malbone. Nur dum la vesperoj, kiam li estis libera de ĉio, li serĉis sian lito en sia ĉambro kaj unu penso ĉarmis lian koron: sinjorino Sala. Stranga neklara timo, stranga dolĉa sento logis lin al ŝi. Kelkfoje ŝi petis lin legi al ŝi ian novelon el ĵurnaloj aŭ gazetokazintaĵojn. Tio okazis precipe dum vesperoj, kiam Gundabo estis en sia ĉambro kaj laboris kaj sinjoro Sala estis ien foririnta kun siaj amikoj.

La sinjorino susurante per sia silka vesto sidigis en apogseĝo apud kameno kaj invitis Grivenieks.

Ĉiufoje ŝia strange sugesta rigardo, intima rideto, soifoplenaj lipoj kaj tuta ŝia konduto allogis la junan studenton per stranga forto. Sinjorino Sala estis bela, diable bela... Parfumoj ĉiam akompanis ŝin. Dum festenoj, kiuj okazis ofte, ŝi estis ĉiam ĉirkaŭita de sinjoroj, parolis nekomprenblajn sofismojn, sed subite tra ridoj ŝia rigardo restis fiksitita al la korpo de Grivenieks kaj penetris en lian vizaĝon per tia intenseco, ke tute nevole li rigardadis la sinjorinon kiel ensorĉita.


Ŝi, ŝajne, komparis la freŝan, junan korpon, fortoplajn muskolojn kaj junecon de la vilaĝa studento kun la elegantuloj de Riga. Ŝia rigardo persekutis lin ĉiomomente kaj kvazaŭ diris: ĉio estas vana — vi ne forfuĝos de mi!

Ofte en societo post teatro aŭ opero ili iris, por danci ie ajn, al fiodorantaj kafejoj, keloj, en akre violkolora aŭ fajroruĝa blindiga brilo kaj kriaca cinika zumado de muziko, kie ili pasigis horojn, trinkante, dancante kaj montrante kiom konataj kaj riĉaj ili estas. Fraŭlino Drejmanis, kiu akompanis ilin kaj ŝatis multe danci, prenis manon de la studento kaj fortiris lin en negrodancon.

»Kio okazis al vi?« flustris ŝi. »Vi estas pala kaj pensema. Kiam ni veturos al Arbarparko?«

Ŝi blovis parfumitan cigaredfumon en lian vizaĝon kaj per duonfermitaj lipoj kvazaŭ vokis lin. Ŝi estis ruĝa, bela kiel sorĉistino, kun akra ebrügema rido de sorĉistino.

Sed la rigardo de sinjorino Sala tenis studenton Grivenieks en tiaj momentoj kaj li eksilentis... Ŝi



Negrino

ŝajnis al li pli alloga ol sorĉistino, — ŝi ja estis la diablo mem.

»Ĉu vi havas nenian dancon por mi?« demandis ŝi. »Ĉu vi opinias, ke tio estas tro konvena? Ni iru!«

»Pardonu — mi volonte — li kvazaŭ petis pardonon kaj ili dancis — ili — du nekunigeblaj fortoj.

Ŝi ebrüigis la studenton per sia varmo kaj vikleco. Ebrügante ŝi rigardis en lian vizaĝon: ŝiaj manoj tiris pli proksimen la junan grandegulon. Ŝi iĝis facila, kiel aero kaj varmega kiel suno. Ofte li sentis, ke lin ekregas stranga ebrio; li fermis la okulojn, spiris kiel en malsano. Kiel en malbona sono li vidis la dikan korpon, flegman vizaĝon de sinjoro Sala, likvorbotelojn kaj fajrojn... Kaj mistika timo ĉirkaŭprenis lin kaj li sentis ke strangaj tremantaj manoj sufokas lin. Ekzumis pinarboj kaj betuloj de lia patra hejmo, ie ekridetis fratino Elinjo kaj — — Viktoria. Li trinkis likvoron kaj deziris ebrüigi sin: li sentis, ke fraŭlino Drejmanis forte premas lian piedon kaj ridetas per ruĝaj lipoj, sed en la sama momento la mano de sinjorino Sala prenis lian manon sub la malgranda tablo kaj invitis lin danci. Li ne plu havis forton por kontraŭstari...

Revenante hejmen en malfrua nokto sur la ŝtuparo Grivenieks sentis, ke la sinjorino ordone kaptis lian manon kaj varma spiro fluas en lian vizaĝon. Peze spirante sinjoro Sala surgrimpis la du ŝtuparojn... Al li ĉio estis indiferenta. Li vivis en la mondo de ciferoj kaj profito.

Post du tagoj vespere alvenis fraŭlino Olga kun siaj parfumitaj cigaredoj: ĉar sinjorino Sala ne estis hejme, ŝi sukcesis forkonduki Grivenieks al kino kaj de tie al dancejo. Dum la vesperoj li ja estis libera... La nova vivo ebrüigis lin. Li renkontis amikojn, kantis, ridis, dancis, kaj fine ili iris al iu privata loĝejo, kie mastrumadis fraŭlino Olga. Kiam ili trinkis ci-fratecon, Grivenieks devis kisi Olga'n, sed tio ne estis simpla amikeca kiso. Olga bruligis lin kvazaŭ per fajro. Li sentis en siaj manoj la varmigitan aeron de Riga,

Sennoma kaj senmorta

Derner von Heidenstam

Neptunsanktej' de Pestum staris preta
en rozĝarden', kaj tie sidis vir'.
Ĉe lia ŝultro la edzin' ripozis,
dum ŝiaj manoj restis ĉe ŝpinil'.
Ŝi aŭdis ŝalmojn soni sur la monto,
sur kiu urbaj porkoj paŝtis sin,
kaj poste ŝi ĝojege al li flustris
dum ŝiaj fingroj ludis per la lin':
»Pleniĝas mia kor' de granda ĝoj'.
La hom' min kondukonta al haven'
de Naksos kreis tiun belan templon
kaj senmortiĝis per la entrepren'.
Sed ŝia edzo serioze diris:
»Pli bone, diru: kiam mortos ni
post kelka tempo, kiel nia nom',
la templo same staros tie ĉi.
Ĉu la artisto pensas dum inspir'
pri l' laŭdo kaj pri la aplaŭda bru' ?
Ne, la okul' rigardas nur internen
ekstera mondo ne ekzistas plu.
Kaj vee plori volas la poet'
malsukcesinte en la memesprim',
sed volas kisi ĉiun verson, kie
enestas pure, tute la anim'.
En tiuj versoj estas lia viv'.
Li serĉas senmortecon en valor'
de sia verk', sed ne en sia famo,
kaj lia nomo estas la labor'.
Homero eble estas nura mit'.
Kaj tamen, vere estas tiu hom',
ni aŭdas kiel lia koro batas,
kaj Iliado estas lia nom'.

Ekstaris li por iri for, sed nun
subite kaptis ŝi mantele lin
kaj murmuretis kun kaŝita rido
ekrigardante haste, ŝtele lin:
»Sur la kolono staras via nom':
Se viaj vortoj venas el la kor',

martelon prenu do el la ilaro
kaj el la ŝton' la nomon haku for: «
Li turnis sin, rigardis ŝin severe
Sed ŝi atentis jam pri la faden'
kaj per la man' preparis novan linon
atente rigardante al haven'.
Subite li sin turnis for de ŝi
kaj prenis martelegon je l' tenil'
per tia forto, ke la fingrartikoj
blankiĝis vakse. Falis la frapil'.
El la kolon' fajrer-kaskado ŝprucis,
kaj pluv' de akraj splitoj kun ekbru'
sur la ŝtuparon falis. Sed la templo
de nun ne portis lian nomon plu.
Kaj kun kriet' sin ĵetis de l' spinil'
nun al piedoj liaj la edzin'
kaj sur splitar' de lia fam' genuis,
kaj diris, dum ŝi ĉirkaŭbrakis lin:
»Ne esprimebla estas nun la ĝoj'
kun kiu iros mi al hejma dom':
Ĉar milobligis nun grandeco via:
Pestuma templo estas via nom': «
Vespere ŝipo kun naksosa flag'
fornaĝis jam, sen vent' en la velaro,
kaj glitis for en ardon de la sun',
kuŝanta sur spegultrankvila maro.

Kaj Pestum iĝis verda erikej',
dum poste pasis jaroj mil kaj mil,
kaj en la ombro de la templorestoj
paŝtista ŝalmo sonas en trankvil'.
Neniu scias nomon de la majstro,
sed rigardante al la templopint'
vi reve vidas tuj la konstruiston,
ĉar ĝi vidigas ĝojon de l' kreint'.
Li estas kiel kara bonamik',
kiu distance ŝajnas jam konat',
kaj estas samĝojan' kaj estas frat'.

El la sveda: *Stellan Engholm.*

frenezan liberecon, la rapidan forbruligadon de la vivo,
la rafinitan senmoralecon kaj facilanimecon, kiuj flirt-
adis super la ĉefurbo, kiel reganta standardo de la
nuna epoko.

Kun peza kapo li frumatene revenis hejmen.
Kaj tiam li ektremis...rememorante sinjorinon Sala.
Jes, ĉu li ne estis sklavo ?

Ridetanta juna ĉambristino, vestita en facila nokta
vesto, frotante la dormon el okuloj, malfermis la
pordon.

»St...« ŝi signifoplene diris, kokete ridetante.
— »estu pli silenta; la sinjorino ankoraŭ ne dormas.
Ŝia kapo doloras...«

Grivenieks balancante sin en strangaj timoplenaj
antaŭsentoj ekdormis tamen dolĉe, kiel oni dormas en
junaĝo post balo...

Kiam li sekvanttage revenis de la universitato,
estis jam tagmezo. Sinjorino Sala kaj Gundabo sidis
ĉe la tablo. Sinjoro Sala ne alvenis. La studento kisis
la manon de la sinjorino, sed ŝi estis neordinare silenta
kaj neparolema. Ŝiaj okuloj briletis malice. Multfoje
ŝi respondis malafable kaj faris akrajn rimarkojn al
la filo, kvazaŭ ŝi ne vidus la studenton.

Post la tagmango, kiam la servistoj forprenis

la mangaĵojn, la sinjorino diris al Grivenieks;

»Bonvolu resti. Mi devas paroli kun vi.«

Grivenieks sidigis kaj ekrigardis ŝin. Ŝi estis
bela. La nokto pasigita en maldormo kaj kapdoloro,
ŝajnis, nur pligrandigis ŝiajn sorĉaĵojn. Ree li estis
malforta kaj malkuraĝa.

»Sinjoro Grivenieks... Pasintnokte vi revenis tro
malfrue... Mi ne volas prediki al vi moralon. Vi estas
studento, kaj la juneco ŝatas ĝojon. Sed ne forgesu, ke
vi ankaŭ estas edukisto de mia filo. Kaj por mi ne
estas egale, kion oni parolas pri vi en la societo. Ne
miskomprenu min, sinjoro Grivenieks. En korporacio,
klubo, dancejo — mi ne kontraŭdiros eĉ vorton...
tie vi povas amuziĝi, kiom vi volas. Vi ja ne plu estas
knabo. Sed ŝajnas al mi, ke vi vizitas ankaŭ privatdom-
ojn. Kaj tion mi ne povas permesi al vi...«

Grivenieks tre miregis. Kiel do ŝi tion scias?
Ĉu, vere, Olga tion jam diris al ŝi?

»Kompreneble, vi havas liberecon. Sed mi havas
miajn proprajn regulojn kaj principojn. Vi devos,
sinjoro studento ĉesigi la interrenkontojn kun mia
fratino, fraŭlino Olga, aŭ forlasi la edukadon de mia
filo. Mi nenion volas al vi altrudi. Elektu! Mi havas
miajn proprajn kialojn kaj principojn. Mi ne postulas

tuj de vi la respondon. Vi povas fari, kion vi trovos pli bona. Sed pri mia regularo mi ne volas rezigni... Kaj nun mi petas vin, iru al laboro kun Gundabo. Ĝis revido!»

Si rigardis lin per sia strange brilanta rigardo kaj fiere kaj elegante foriris.

Grivenieks sidis sola kaj meditis. En li ribelis la tuta fiero de kamparana filo... Foriri! Kaj tuj! La monon li ricevos de siaj gepatroj kaj finos la studadojn kiel sendependa viro, sed ne kiel servisto de ĉi tiu milionula familio.

Sed la argente-griza barbo de la patro, la kurbiginta korpo de la patrino aperis en memoro. La detruitaj tegmentoj de la patra domo dum mondmilito... la grandaj ŝuldoj... Ĉu vere li, sana, juna kaj forta homo, laborigos por si siajn karajn gepatrojn? Plena de pensoj li iris al sia lernanto kaj komencis la lecionon... Neniu devas scii pri tio, neniu. Dume ekzistas la eterna mondordo, ne estas liberaj homoj, estas nur servistoj... Bone. Poste, kuŝante en sia ĉambro, li sentis sin kiel verdanta kverko, kiun ĉirkaŭas lupulo kaj argente-grizaj araneaĵoj. Neordinara, nevidita, netravivita! Kia diferenco estas inter simpla ĉambraĉo kaj belege garnita salono; inter malriĉa tagmanĝo kaj la nuna vivo! Neniu povas eviti tion, kio devas okazi. Li ekdormis en la mola lito, varma ĉambro kaj pensis pri la kapitulaco al vivo... ĝis kiam li mem estos la reganto de la vivo.

En la sekvinta tago okazis malgranda festeno. Venis la pli proksimaj amikoj kaj parencoj, kelkaj studentoj. Mankis nur Olga... Kaj sinjoro Sala for-estis jam kelkajn tagojn.

Sed sinjorino Sala estis tre afabla. Ŝi kondukis al Grivenieks tiel, kvazaŭ ĉio estus forgesita. Ŝi eĉ ridetis kaj koketis. Kaj la studento denove sentis la strangan timon kaj ion terure misteran, kiam sinjorino Sala preterpasante karesis lin per sia rigardo. Li estis ankoraŭ kvazaŭ infano, kiu apenaŭ ion sentis, naive, senorde kaj nekomprene.

En malfrua nokto la kompanio forveturis post dancado, kantado kaj trinkado. La domo subite eksilentis. Nur la floroj ankoraŭ bonodoris en vazoj kaj parfumo ŝvebis en ĉambroj. La fajroj estingiĝis. Enirante sian ĉambron Grivenieks renkontis la sinjorinon en koridoro. Ŝi ŝajnis esti ekscitita. La pezaj harokrispoj malorde ĉirkaŭis ŝian kapon. En la lipoj estis malluma ruĝeco de sango. Li sentis dum unu momento ion fatalan.



Mauro



Bano

»Bonan nokton!« li salutis.

Sed ŝi metis al vi varmegan rigardon kaj foriris. Kiam Grivenieks sidis sur sia lito kaj preparis sin por dormi kaj ankoraŭ pri io revis, la pordo mallaŭte malfermiĝis kaj antaŭ li staris sinjorino Sala. Ŝi estis vestita en facila, nigreta nokta vesto kaj venis silente kiel la sorto. Komence al Grivenieks eĉ ŝajnis, ke li vidas fantomon — tiel subite ŝi aperis.

»Ĉu mi ne ĝenas vin? Kiel mi vidas, vi ankoraŭ ne dormas. Mi ankaŭ ne...»

Li serĉis kion respondi.

»Ĉu vi koleras al mi, sinjoro Grivenieks?« ŝi demandis pli kaj pli mallaŭte.

»Kial?« diris li rigardante ŝiajn nudajn manojn, kiuj aperis el sub la plejdo. Sed en la sama momento ŝiaj manoj forte ĉirkaŭprenis lian kolon kaj io bonodora, neordinara, sufoka premiĝis al li. Ĝi estis la korpo de sinjorino Sala. Li sentis ke ŝiaj fingroj vagadas en liaj haroj kaj karesas lian kolon.

»Karulo, kiom malsaĝa vi estas. Mi longe turmentis min; nun mi ne plu povas suferi. Ni ne plu konflikto kaj ne disiĝu...«

Grivenieks ne estis bone informita en ĉi tiu afero, en kiun lin forlogis la dorlotita sinjorino. Siajn fortojn li konservis en sia juna korpo ne nur por ĝuo kaj maldiligenteco kaj ekscitemaj songoj, sed por laboro, batalo por estonto. Kun vilaĝaj knabinoj li kisadis nur en maloftaj momentoj de ĝojo, kaj sole nur Viktorian li sentis en siaj manoj adiaŭante.

Nun li sentis, ke li estas kiel malforta infano, kiu devas la unuan fojon kapti la malpermesitan pomon. La floranta beleco kaj tro parfumita korpo de sinjorino Sala ebrigi lin kiel forta vino. Li konfuziĝis, penis sin liberigi kaj aŭdis flustri amovortojn. Kaj kien ajn li turnis sin, ĉie liaj lipoj renkontis la buŝon de sinjorino Sala. Kvazaŭ falante en profundan abismon, li forte ĉirkaŭprenis sian regantinon...

Blindigante la straton per siaj reflektoroj preterkuris ien malfrua nokta aŭtomobilo...

(Fino sekvos) El la latva, kun aŭtora permeso:
A. L. Goba

Arto poezia

— C. E. R. Bumy —

Dua ĉapitro

Se la unuan legis vi ĉapitron,
Kaj tamen volas vi ĉirpigi citron,
Do venu, streĉu viajn aŭskultilojn,
Ke bone vi komprenu la konsilojn.

Unue, se vi volas skribi version,
Ne kredu, ke la tutan Universon
Vi devas ŝanĝi nun per unu fojo.
La karavano malgraŭ hunda bojo
Pluiras : ĉu vi konas la proverbon ?
Do, super pov' ne streĉu vian cerbon.
Ĉar se vi al ĝi troan ŝarĝon taskas,
La mont-akuŝo — sole muson naskas.
Ne serĉu konvulsie *novajn* temojn.
Se vi rigardas la majstro-poemojn :
Apenaŭ ili havas temon tian.
Kiun aliaj jam antaŭe iam
Abunde ne priskribis — tamen, ili
En nova lumo ŝajnas al ni brili.
Ne diras mi, ke vi dum versokreo
Rifuĝu de ekpenso kaj ideo.
Sed, ne forgesu, ke ne la sentenco,
Eĉ ne la simpla kaj vulgara senco
Ja estas, kiu en la versoj gravas.
Sed, — ke la penso *formon* nun ekhavas.
Mi ne parolas pri la form' ekstera,
Sed pri la form' interna kaj mistera,
Per kies pov' la fuĝaj sent' kaj penso
Ekkreskas, centobligas en intenso
Kaj iĝas korpo, kiel pens' de Dio
Fariĝis mondo per la estu-krio.
Jes, poemnasko, en formfando pura,
Ja estas mondo-kre' miniatura,
La versoj, estu kia ajn la kerno,
Alblovas nin per spiro de eterno.
Dum, se la formo estas lama, plumpa.
Eĉ plej potenca penso iĝos stumpa.
Do — estu via strebo kaj fiero
Ne »kion«, sed »en kia maniero«.

Due, vi devas vortojn simple plekti,
Ne volu do kun granda pen' elekti
Vort-ĉenojn nekutimajn. Jes, precipe
En Esperanto, havu ĉefprincipe,
Ke ju pli lude oni vin komprenas,
Atenton, korojn des pli vi katenas.
La sentoj flugu en la alt' senbara,
Sed via stilo estu klara, klara !
Frazerojn ne disjetu, ĉar, finfine,
Vi Esperante skribas, ne latine,
Kaj la latinoj ĝuis ĉe Horaco,
Sed oni nun forĵetas kun grimaco
La versojn, kiuj havas ne vort-ordon,
Sed vort-malordon. Do, evitu tordon
De viaj frazoj. Se l' leganto devas
Cerbumi pene, ĝis li elricevas
La sencon, kaj montriĝas post kompreno,
Ke ĝi ne estas inda je la peno,
Ne laŭron, sed mallaŭdon vi meritas :
Vi poezion nian kompromitas.
Do — viajn versojn fajlu sen ripozo,
Ĝis ili fluos, kiel bona prozo.

Per tia klara, senkomplika stilo
En diafane komprenebla brilo
Aperos eĉ simbolo plej vuala.

Rifuĝu de la bela fraz' banala,
Kiel de pesto ! Estas tiaj frazoj
Por ĉiuj eblaj kazoj kaj okazoj
En ĉiu lingvo. Kaj per pen' malgranda
Ja eblas il'n plekti en girlanda
Sinsekvo, ĝis volumo ! Bela distro !
Nive'lo : libro de amleteristo.
Parolu do nature kaj senpimpe,
Sed trafe, forte, kerne, eĉ se simple.
Ne uzu epitetojn superflujajn,
Banalajn, ŝtopajn, plumpajn kaj enuajn.
Sed, se vi uzas, ili nin surprizu,
Kaj freŝan sencon frapan mobilizu !
Poste, ne komparadu senutile.
Komparon oni trovas ja facile,
Sed ĝi ne estu pimpa ornamaĉo,
Kiel mallerta ŝminko sur vizaĝo.
Komparo vera brilas kvazaŭ torĉo
En nokto, kaj per elementa sorĉo
Lumigas al ni, kion vi, precize,
Sur tuta paĝo klarigadus grize.
Kaj se komparon tian vi enplektas,
Do estas bone, se vi ĝin respektas,
Kaj vi ĝin ne forpuŝas tuj malŝpare,
Por ke vi novan kaptu jam ĉehare.
Komparo via brulu plu en kaŝo,
Kiel sub cindroj brulas la ardaĵo,
Ĝin per komparo nova ne sufoku,
Eĉ, poste ĝin por nova viv' revoku.
Magie ĝia rememor' aperas,
Se ĝi post longe ree ekfajreras.
Se al *abismo mara* vi komparas
La amon, kaj tujsekve tie staras,
Ke ĝi tra l' koro *pikis per ponardo*,
Vi, kara, estas tre konfuza bardo.
Ne skribu : »antaŭ celo el la selo
Mi falis, ĉar ŝirigis mia velo.«
Nek diru : »La potenca fera dento
De l' tempo, kiu tiom da torento
De larmoj jam sekigis, donos nepre
Balzamon al ĉi vund' brulanta febre.«
Nek : »Li iniciatis la fajrerojn,
Kiu de tiam kreskis en riveron
Tiel grandegan, ke sub ĝia ombro
Eĉ nun ripozas granda homonombro.«
Ĉar se komparoj pluraj interluktas,
Ja tio sole *bildkonfuzon* fruktas.
Kaj klare montras tia bildkonfuzo
Pri la malvera, malsincera uzo
De la komparo. Oni klare vidas,
Ke la poeton nur la *rimoj* gvidas,
Ke ne la forto de la fantazio,
Per la bildkrea povo de vizio,
Sugestis la komparon al animo,
Sed ĝi nur lamas post trovita rimo,
Trenante la postajojn sur la tero,
Malsane pro la manko de sincero.
Jes. Se l' komparo ne sub sorĉo tenas
Mem la poeton, kiu ĝi katenas ?

EL LA VERDA BIBLIO

— J. LEJZEROWICZ, LÓDZ —

Antaŭ kelkaj jaroj mi publikigis en Heroldo kelkajn ĉapitrojn el mia »Verda Biblio«. Hodiaŭ mi denove prezentas du aliajn ĉapitrojn el la traktato pri Festoj. Mia »Biblio« havas tiun mirindan econ, ke efektive ĉiu povas legi ĝin (krom blinduloj): kredanto kaj ateisto, piulo kaj bigotulo k. t. p.

Festoj

Ĉapitro I.


1. Jen estas la festoj, kiujn mi starigas por vi. 2. Eterna interligo inter mi kaj vi estu tiuj festoj. 3. Tagoj de spiritleviĝo ili estas, verŝas ĝojon en la koron kaj homan animon noble inspiras. 4. Goju, ĝoju — mia verda popolo — kun timpanoj kaj tamburoj eliru en la stratojn. 5. Viaj virgulinaj (junaj kaj maljunaj) blankverdajn robojn surme. 6. Kaj eĥo portigu tra la stratojn, sur la vojoj de Genevo jubilo aŭdiĝu. 7. Tia estas la volo de Kruco, mia sinjoro en Genevo. 8. En la oka monato de la jaro, en la unua semajno de tiu monato, festu la Feston Universalan. 9. Dum sep tagoj altigadu vian spiriton kaj en la oka tago disiru. 10. El ĉiuj anguloj de mia mondo kunvenu kaj ripozu ĝojplene. 11. Memoru, ke la *sabato de l' jaro* ĝi estas por vi: *ne faru ian laboron en tiuj tagoj!* 12. Kaj jen estas la faroj, kiujn vi darfis fari en tiuj tagoj; por altigo de l' spirito kaj agrabligo de l' tempo ili servu al vi: 13. Babili en viaj sepdek naciaj lingvoj — ĝi estos por vi memoraĵo pri la lando Babela, el kiu mi elkondukis vin per forta mano kaj etendita brako. 14. Disdonadi subskribojn, fotografi kaj ekskursi. 15. Kaj viziti vidindaĵojn, brui en la stratoj, marŝi (dek kilometrojn en ĉiu horo). 16. Kanti, danci kaj ami. 17. Ĉio-ĉi estas donita al vi por via vivo kaj feliĉo. 18. Sed *laboron* ne faru en tiuj tagoj, ĉar ĝi iĝos abomeninda por mi. 19. Memoru, ke festo de *neniofarado* ĝi estas — la *sabato de l' jaro*. 20. Se venos al vi viroj, kiujn mi ne sanktoleis, kaj per dolĉaj vortoj alparolos vin: »Aŭskultu, mia popolo! 21. Svitante ni pilgrimis ĉi-tien, manĝon al buŝo avaris. 22. Ne estu do perditaj tiuj tagoj de l' vivo kaj laboron benitan ni faru ĉi-tie«. 23. Vi forpelos ilin el mia tendo, ĉar falsaj profetoj ili estas. Mi ne sanktoleis ilin. 24. La dolĉeco de iliaj paroloj estas kiel la lango de serpento. 25. Malfidon ili volas semi en viaj koroj, malesperon planti en viaj animoj — ŝtonumu ilin.

Ĉapitro II.

1. Okazis en la naŭa jaro post la malfeliĉo de Helsinki. 2. Kiam Johano la Ko-Mercanto estis reĝo en Esperantujo kaj dika peza Kruco premis lian kolon. 3. Kaj venis Krakovon mia verda popolo, el dekoj da landoj ili venis. 4. Kaj jubilo sonis en la stratoj, jubilo ĝojiganta mian koron.

5. Kaj la triboj, kiuj alpilgrimis, estis: 6. Poloj, britoj kaj svedoj. 7. Kaj germanoj, italoj kaj ĉeĥoj, kaj Danziganoj multnombraj. 8. Kaj francoj, bulgaroj kaj hispano. 9. Hungaroj, rumanoj en naciaj vestoj. 11. Entute sepcent dudek judoj el tridek ok landoj. 12. Kaj estis granda ĝojo inter la muroj de Krakovo.

13. Kaj venis tri viroj de tri flankoj de la mondo. 14. De oriento, de nordo kaj de okcidento. 15. Kaj la nomo de la unua viro, kiu venis de oriento, estis Junio Pagi. 16. Kaj la nomo de la nordulo estis Andreo Apud, kaj la tria, kiu venis de okcidento, nomiĝis Kafo Alt. 17. Junio Pagi estis profeto. El orienta Budapeŝto li venis por averti la popolon. 18. Andreo Apud estis apostolo. En la norda Skandinavujo li konvertadis milojn da idolanoj. 19. Kaj kronikisto estis Kafo Alt, kiu venis de okcidento, el Kolonjo. 20. Kaj la tri viroj kunvokis la popolon, kaj la popolo venis ĝoje kaj jubile (ĉar ĝi tre ŝatis la tri virojn). 21. Kaj kiam la tri viroj aperis antaŭ la popolo, la entuziasmo fariĝis freneza kaj senĉesa. 22. Senfinaj estis la aplaŭdoj kaj vivukrioj ĝis la profeto, etendinte sian manon, silentigis la popolon. 23. Kaj Junio Pagi, la profeto, tiu kiu venis el la orienta Budapeŝto, faris terurajn okulojn kaj ekparolis la orakolon, dirante: 24. Malfermu viajn orelojn, popolo kompatinda kaj malŝtopu viajn cerbojn! 25. Ĉar mi utilajn parolojn volas flustri en viajn orelojn kaj oleon de saĝo verŝi en viajn kapojn. 26. Vidu: abeloj scias ordon kaj konas sian reĝinon, Sed mian popolon mordas kaoso.



Virino

Poemoj

— Alessandro Mazzolini —

Trieto

Maljunaĝa traduko de junaĝaj poemoj.

Malgaja nokto

Ho, Strigo, venu krei ĉe l' fenestro!
Sencela estas mia vivo-vago,
la senreviĝo estas mia estro.

Rompita la pafarko, kaj la ŝnuro
ŝirita kaj senpinta jam la sago
kaj ĉiuj revoj estas en forkuro.

Ho, via nokta kri' melankolia
konformas nun al laca koro mia

revanta pri l' estinto kun sopiro
kaj »sen esper' vivanta en deziro«.

Gaja mateno

En milda horo, kiam oriente
heligas la ĉielo pro l' aŭroro,
aŭskultas mi kortuŝe kaj rav sente,

la ĉarman, ĝoje trilan najtingalon,
dum Suno, per la radiar' el oro
disigas ĉirkaŭ mi la noktvalon.

Benata estu, frua sunradio!
Naturon vekigantan benu Dio!

La Najtingalo kantas: En Espero,
en Pac', en Amo estas nur la Vero.

Al la Maro

Mistera Maro, sorĉa mar' safira!
Vi centobligas mian vivon vere,
vi logas min per rava fort' altira.

Ĉu l' kor' de l' malfeliĉa poetino
Saffo vagadas tra l' ondar' mistere?
Ĉu sorĉeinojn kaŝas via sino?

Kial vi sanon al la sango donas,
kial mi en ekstazo ĉe vi dronas?

Kio altiras min al via pura
profund' mistera, fea Mar' lazura!

27. Bovo fosis kavon kaj mem en ĝin falis,
Lingvon klaran ricevis mia popolo kaj pereas en
dezerto de malkompreno.
28. Ne estu »viktimoj« de tiuj, kiuj krias »Hura«
Kaj ne »dancu, marionetoj«, ĉar vin atendas
»infero«.
29. Lernu saĝon en mondo, de la paganaj popoloj,
Kiuj svarmas sur tero, kiu scias por kio?
30. Ĉu mi prudenton ne donis al vi, popolo obstina,
Sed vi en la maron ĝin jetis, malzorgis viajn
bezonojn.
31. Bombaste vi nomis vin popolo, sed kiel vi regas vin?
En via nomo fariĝas aferoj, kiujn vi ne konas.
32. Forĵetu la ĵugon de tiuj, kiuj vin erarigas
Kaj elektu por vi gvidantojn, al kiuj vi fidos.
33. Kaj kiam li finis, fariĝis denove bruo kaj ek-
tondris aplaŭdado. 34. Ĉar la paroloj trafis iliajn
korojn kaj heleco malfermis iliajn okulojn.
35. Tiam starigis Andreo Apud, la apostolo de l'
nordo, kaj alparolis la popolon. 36. Kaj denove
tondra aplaŭdado obtuzis tra la aero. 37. Kaj
Andreo Apud etendis siajn manojn, la okulojn al
ĉielo turnis kaj ekparolis, dirante:
38. Ĉu vi estas feliĉaj? 39. Kaj la popolo ekstaze
respondis: Jes, ni estas feliĉaj. 40. Andreo Apud
daŭrigis: Mi gratulas al vi.
41. Kaj la popolo pie flustris: Amen.
42. Kaj Andreo Apud instruis jene:
43. Vi aŭdis, kion diris la profeto kaj vi bone notis
liajn parolojn. 44. Jen li prezentis al vi hodiaŭ
la vivon kaj la morton, liberecon kaj malliberon,
la lumon kaj mallumon. 45. Elektu do la vivon,
ĉar mia vivanta popolo vi estas, kaj elektu la
liberecon, ĉar ĝi pli valoras ol ĉiuj poŝtkartoj de
Lihtenŝtejno, kaj elektu la lumon por ke vi vidu.
46. Kaj jen mi estas sendita por pruvi per signoj
kaj mirakloj la verecon de l' orakolo, kiun diris
la profeto. 47. (Kaj la apostolo etendis siajn
manojn al la popolo, montris ke ili estas mal-
plenaj, kaj li diris:)
48. Rigardu, rigardu, jen mi havas malplenajn man-
ojn. Kio estas en la mano?
49. Kaj la popolo respondis ekstaze: en via mano
estas nenio.
50. Tiam Andreo Apud eksvingis la manon kaj subite
en ĝi aperis ruĝa objekto.
Kaj li demandis: kion vi vidas nun en mia mano?
51. Kaj la popolo respondis ekstaze: En via mano
estas la ruĝa kato!
52. Tiam Andreo Apud metis la ruĝan katon en bluan
skatolon, kaj ĉiuj vidis, kiel la blua skatolo mal-
kreskas ĝis ĝi iĝis tre eta kaj li metis ĝin en la
buŝon.



Nigra parizanino



Knabinportreto

53. Kaj Andreo Apud demandis : Kio estas en mia buŝo !
54. Kaj la popolo entuziasme respondis : En via buŝo estas la ruĝa kato !
55. Tiam Andreo Apud, la apostolo de l' nordo, turnis la okulojn al ĉielo kaj etendinte la manojn diris :
56. Rigardu, rigardu : en mia buŝo ne estas la ruĝa kato.
57. Kaj dirante tion, li komencis tiri el sia buŝo senfine longajn rubandojn brilantajn per mil koloroj de la ĉielarko. Kaj granda frustrado kaj mirado iris tra la popolo.
58. Kaj la popolo flustris ekstaze : Senfine longaj rubandoj, senfine longaj rubandoj !
59. Post tio Andreo Apud prenis alian, akvokoloran skatolon, ekfrapetis sur ĝin per fingro, kaj subite el la akvokolora skatolo elsaltis verda objekto.
60. Kaj Andreo Apud demandis, dirante : Fidanta popolo ! Kio estas ĝi ?
61. Kaj la popolo respondis ekstaze : Ĝi estas la verda azeno !
62. Tiam Andreo fermis la okulojn, etendis la manojn al la popolo, kaj ekvokis : Fidanta popolo ! Rigardu, rigardu : nun venas tre grava demando. Ĉu vi estas ruĝaj katoj ?
63. Kaj la popolo respondis ekstaze : Ne. Ni ne estas ruĝaj katoj, sed ni estas la verdaj azenoj.
64. Kaj beatigis la mieno de l' apostolo kaj li diris : Fidanta popolo ! Mi gratulas al vi.
65. Kaj la popolo respondis ekstaze : Amen.
66. Post ĉio-ĉi la apostolo rajde sidiĝis sur longan ruĝan krajonon kaj akompanata de nigraj objektoj, ruĝaj katoj kaj flavaj hundoj li ekŝvebis en la nebulojn.
67. Tiuj-ĉi signoj kaj mirakloj okazis antaŭ la okuloj de la tuta popolo. Kaj la kronikisto Kafe Alti fidele notis ĉion, kion li vidis. 68. Por ke ne forgesigu la signoj de vero en la verda popolo.

MIA ANGULO

— JULIO BAGHY —

La ĉiela infanaro petoladas, pilkludas kun la nubkusenoj kaj molaj lanugoj falas sur la teron. Sub la paŝoj de la homoj gaje ridas la freŝa neĝo. La ĉiela blanko inspiras pacan senton kaj en ĉiu domo porfeste vestas sin unu ĉambre por forgesi pri la kruda realaĵo ; ke el la senmakula ĉiela lanugo iam fariĝos koto griza sur la tero. Forgesigi kaj luli la lacan animon per efemera iluzio, per plej alta sopiro de miljaroj kaj nutri la formorte brilantan fajron de espero pri harmonio !! Optimismo ŝvebas en la aero, pio vibras en la animoj, psalmo flugas for el inter la lipoj kaj la homoj montras sin gefratoj — por momentoj. Subite en la mezo de la Vivdezerto aperas malgrandaj oazoj : ornamitaj abietoj. La homoj ĉirkaŭstaras, kun ĝojlarmaj pensoj rigardas la palpebrumantajn kandellumojn kaj dividas sian egoismon ; vekigas donacemo en ili. . . Mi dezirus esti nun milionulo, almenaŭ por tiu ĉi tago, por ke mi povu disipi kaj kontentigi mian donacemon . . . For de mia familio, for de la hejmlando, en fremda urbo de norda lando mi staras sur la strato kaj mi atendas la aŭtobuson. Mi estas invitita por la vespera soleno al familio . . . Mi ekiras por varmigi min ĉe fremda fajrujo. Miaj pensoj vagadas ie malproksime, kie eble en tiu ĉi momento rememoras pri mi miaj ĝematoj : mia larmokula edzino kaj mia fileto, atendanta la donacojn de la Jesueto. Ĉi tie la abieton portas la »Kristnaska Maljunulo«. Nur la kutimaj diferencas, la tendenco, efiko estas samaj . . . Jes, la samaj por tiu, kiu en propra hejmo festenas, sed ne por tiu, kies okuloj nur vidas, sed ne rigardas. Mi vidas la abieton antaŭ mi, sed mia rigardo serĉas la kandellumojn de fora abieto. Mi aŭdas la gajan ĝojon de infanoj, sed mia koro aŭskultas neaŭdeblan ĝojkriojn de mia fileto. Abieto, oazo en la Vivdezerto, nun via konsolo ŝajnas esti dorna karesado por mi. Bildoj el pasinteco desegniĝas antaŭ mi kaj mi forgesas pri ĉio ĉirkaŭ mi . . . El la sinforgesiĝo rekonsciigas min bonkora alparolo : »Ĉu vi estas laca, sinjoro?«. Rideton mi trudas al la lipoj kaj hontas pri mia malatento, per kiu senvole mi ŝovis melankolian humoron en la ĝeneralan serenon. Mi aŭskultas la viglan interparoladon, faritan en lingvo nekonata de mi, mi ridas kun la ridantoj pri tute nekomprenitaj ŝercoj kaj mi sentas, ke mia rido rikaniĝas kaj mia mieno fariĝas rigida masko, de kiu mi ne povas liberigi min . . . Honte, dolore honte, sed tiel dece ! La vagabondo de l' mondo ne povas resti sola por libere plori . . . La vagabondo estas ofte sklavo de la homa boneco, donacita al li sub kristnaska abieto kaj tiun plej valoran donacon rekompenci per pesimistaj pensoj estus abomeninda maldanko . . . Vagabondo, ridu tra la larmoj, por ke neniu rimarku, ke via animo frostotremas ĉe la kandellumoj kaj ke pro soifo suferas vi ĉe la abia oazo !



XI. Pius



LA FILMMANUSKRIPTO

La plej grava fundamento de la filmo estas la manuskripto, la scenario. En la naskiĝa periodo de la unuaj filmoj la reĝisoroj havis la manuskripton en la kapo, poste ili notis la agadon sur siajn manumojn, kaj kiam tiuj ĉi ne sufiĉis, en malgrandan notlibron — kaj tiel iom post iom kreiĝis la filmmanuskripto, kiu ŝanĝiĝadas kaj pliperfektigas konstante, samgrade kun la evoluo de la filmtekniko. Kiam oni hodiaŭ enpaŝas en la filmlaborejojn, oni rimarkas sur speciala tablo dikan kelcentpaĝan manuskripton, en kiun krom la maŝinskribitaj scenoj estas margene skribitaj multaj notajoj de la reĝisoro. La manuskripto en sia nuna formo estas produktajo de multaj kapoj, kiuj en multsemajna komuna laboro elcerbumis kaj formis ĝian enhavon. La nuna sonanta filmo postulas la precizan fiksadon de la sceno (optika agado), de la dialoga parto, de la muzika kaj akustika agado — krome la teknikajn rimarkojn koncerne la aparatomojajn ktp.

Multaj homoj pensas, ke ili estas naskitaj filmpoetoj. La dramaturgoj en la grandaj filmfirmaoj, kiuj esploras kaj kontrolas la amase proponatajn filmmanuskriptojn, povus rakonti groteskajn fabelojn pri la diletantaj laboraĵoj, kiaj elkreskas el la cerboj de filmavidaj junuloj, kinofrenezaj knabinoj — eĉ kuiristinoj kaj kamenpurigistoj! La grandaj ĵurnaloj, kiuj de tempo al tempo aranĝas publikajn konkursojn pri bonaj filmideoj, ĉiam denove disvastigas la opinion en la publiko, ke ĉiu homo povas esti filmverkisto. Tiu ĉi opinio estas erara.

Tamen — povus okazi, ke iu homo vizitanta kaj studanta tre ofte filmojn en la kinoteatroj havas taŭgan ideon, la fundamentan elirpunkton por la posta filmlibro. La procedo de la naskiĝado de la finforma filmlibro havas multajn etapojn kaj ĝi komenciĝas preskaŭ ĉiam per la t. n. »exposé«, sinoptika skizo de la filmo. Tio ĉi skizo ampleksas ĉirkaŭ 6—8 maŝinskribitajn paĝojn kaj donas la ĉefan agadan linion, la muzikajn kaj akustikajn eblec-

ojn de la filmo. La »exposé« estas la bazo por ĉio kio sekvos poste. Estus por komencanto tute sensece verki dikan manuskripton kun detale ellaborita scenaro, neniam li sukcesus emigi dramaturgon tralegi tian dikan libron. La sinoptika skizo rapide informas la firmaon pri la ideo, temo, agado, ĉefaj rolantoj, muzikaj eblecoj kaj — kio estas plej grava — ĝi permesas al la firmao proksimuman kalkuladon de la kostoj de la filmo. La mono ludas en la produktado gravan rolon, kelkaj temoj estas produkteleblaj per malpligranda monsumo, aliaj temoj postulas pli altajn, ofte fantaziajn kostojn. Laŭ tiu ĉi rilato oni tute ne povas kompari la filmmanuskripton kun romano. La prezoj por presado de romano restas ĉiam la samaj, sed la kostoj por filmigo de scenario estas treege malegalaj! Ne estas do mirige, ke la filmigo de manuskripto ne estas facila afero kaj ofte la plej bona ideo ne trovas intereson ĉe la filmistoj.

La sonanta kaj parolanta formo de la hodiaŭa filmo plimalfaciligis la situacion por la filmverkisto. Dum la muta periodo de la filmo estis la unua postulo: optika moviĝo de la bildo! Hodiaŭ la dialogo kaj la sinkrona muziko ludas gravan rolon en la kreado de la manuskripto, en la elekto de la temo entute! (daŭrigota)



Willy Fritsch

K. Kalocsay: Streĉita kordo

— Ludoviko Totsche, Budapest —

Grandaj eventoj ofte okazas en silento. Kiam lastan somerfinon kune aperis tri Kalocsay-verkoj, laŭ ekstera sensacio tiu ĉi volumo ludis la plej modestan rolon. Ja kompreneble, la Rimportretoj vekis la naturan scivolemon de nia publiko, kiu same avidas pri intimaĵoj de siaj verkistoj, kiel ĉiu publiko sur la mondo: la volumo Lingvo Stilo Formo kontentigis tiujn, kiujn interesas lingvaj kaj poetikaj teorioj: ke ili estas multaj kaj ke la libro estas bonega en sia speco, tion pruvas la brila sukceso. Sekve ne estas mirinde, ke unu el la recenzistoj pritraktis la Streĉitan Kordon nur *pretere*, menciante, ke dum verkado de pli grava verko (Lingvo Stilo Formo) Kalocsay eldonigis ankaŭ poemlibron! Grandaj eventoj okazas foje eĉ kontraŭ prisilento!

Sed tie kaj tie ĉi, en proksimaj vilaĝoj aŭ malproksimaj ĉefurboj, kelkaj homoj, ankoraŭ impresablaj per la voĉo de l' Belo, subite ekatentis: okazis io ankoraŭ ne ekzistanta en nia lingvo kaj literaturo, okazis io *nova*: poemlibro, kiu meritas, ke oni lernu Esperanton nur povi ĝin legi, poemlibro, kiu pridonacis nin per kristale evoluinta poezia lingvo: poemlibro, kies apero apertas novan horizonton por nia literaturo: la epoko de l' diletantismo definitive dronis en la pasinton.

La apero de Streĉita Kordo estos unu el la plej gravaj datoj de nia estonta literaturhistorio. Sed nun?

»Versojn oni ne aĉetas...«

Malmultaj estas la verslegantoj kaj multaj estas la epistoj, kiuj — eĉ se ili ŝatas versojn nacilingvajn — ne oferas la ne tro grandan penon, kiu estas bezonata por legi en nia lingvo pli altnivelan literaturon. Do ne estos malutile, se mi iom pli detale konigos tiun ĉi libron. Mi ne volas fari sekan analizadon — ĉu oni povas analizi poemon sen ĝin murdi? — mi volas nur surmontri la belecojn antaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ estas tro timemaj por legi Esperantan poemlibron. Pri tio mi sentas min iom rajtigita, ĉar mi havis la feliĉan okazon esti inter la unuaj, kiuj ekkonis tiujn ĉi poemojn, inter la unuaj, kiuj aŭdis ilin, laŭlegatajn per tiu individua, velura voĉo, kiu impresas, kvazaŭ ĝi venus ne el la gorĝo, sed el la koro. (Kalocsay estas sendube la plej kompetenta interpretanto de siaj poemoj.) Se nur unu el la legantoj de tiuj ĉi linioj iĝos eĉ preni en manon tiun ĉi ĉefverkon de nia poezio, mia laboro ne maltrafos sian celon: kaj se al unu el tiuj, kun kiuj fratigas min la adoro de l' Belo, miaj linioj malkaŝos belecon senrimarke preterpasitan: mi sentos min feliĉa.

La verkon komencas la sentitola

PROLOGO.

Grandioza uverturo! Kun la jam trankviliginta rezigno de l' matura viro la poeto rigardas sian verkon iom fremde kaj indiferente. La rilato inter la poetoj kaj siaj verkoj similas al tiu inter patro kaj filo: la patro generas ilin el la plejesenco de sia memo, konstruas ilin el la karno kaj sango de sia animo kaj kiam prete forŝiriĝas de li la verso, samtempe ĉesas ilia kuneeco: la verso komencas vivi sian propran vivon. Kaj okazas, ke ili post jaroj foje renkontiĝas kaj jen, la patro trovas sian idon tiom plenkreskinta, tiom fortiĝinta, ke li preskaŭ ne rekonas lin!

Ĉu sentojn tiel povis mi ekzili,
Ke min ne tuŝas jam ilia trem' ?
Ĉu tiel povas mi min malsimili,
Ke sen kompren' mi miras pri poem',
Kiun mi kantis iam larme, sange ?
Ho, jes ja, tiel estas, eĉ se strange.

Kun la duba supereco de l' filozofemo, kiun la aĝo kunportis, la poeto dissendas la trilantajn tintojn de l' kordo trostreĉita de l' ŝaŭmanta Juno: kaj en tiu momento lin plenigas ia liberiga sento: forjetante sian pasinton, sian estintan memoron kiel balaston, li kreskigas al si flugilojn por leviĝi al ĉiam pli altaj regionoj.

La libro dividiĝas en sep ciklojn. La unua titoliĝas:

EBO DE L' FORTA VOKO

Tiu ĉi ciklo enhavas la esperantismajn poemojn de Kalocsay. En ili li montriĝas disĉiplo de Zamenhof, kaj en la koloro de la poeta voĉo, kaj en la fiksado de siaj idealoj. Kaj vere, neniu povas esti poeto en Esperanto, kiu ne fermis la zamenhofan *fortan vokon* profunden en la koron. Kio la Fundamento por la lingvo, tio estas la poemoj de Zamenhof por la esp.-a poezio. Kaj kiel freŝe impresas la leganton la ĉi temaj versoj de Kalocsay post la senanima muelado de senvivaj, diletantaj zamenhofiadoj de fuŝpoetoj! Eĉ kie li ankoraŭ ne majstras la materion per la pli posta supereco (Jam kreskas la semo!), kia evoluo, kia pliperfekto de l' formo kontraŭe al la ĝistiama »verda poezio«! En tiuj ĉi poemoj la esprimiloj de l' poeto estas ankoraŭ modestaj, sed jam ankaŭ ĉi tie montriĝas la fortaj flankoj de l' pli posta Kalocsay. Ekzemple en la supre menciita poemo li jam brilas per sukcesa ekfino de l' verso, kapablo ne tre ofta ĉe poetoj kaj tre karakteriza pri Kalocsay:



Nudo

»Kaj via stel' per sia verda hel'
Paligos ruĝan lumon de la Marso!«

Kompreneble la esp-a vivo konsistas ne nur el himnoj, ĝi havas ankaŭ siajn *amarajn horojn*. Al tiuj horoj ni dankas unu el la plej fortaj kaj sincertonaĵoj poemoj de nia literaturo. La poeto sopiras je eho, kompreno, koro: kaj ofte li trovas nur la kolektan manion de korespondemuloj, la harfendadon de ĝisostuloj kaj la plej doloran: la indiferentan nekomprenon. Poeto sen popolo! Sed la amara horo flugas for triumfe

»La Forta Vok', en ĉiuj regionoj,
Resonos en la kor' de junaj legionoj.«

Ĉi tiu ciklo enhavas ankaŭ poemojn ĉizitajn kun brila tekniko. Kaj, ĉar ili fariĝis la plej konataj kaj popularaj versoj de l' poeto, ne estas mirinde, ke multaj prezentas al si Kalocsajn, kiel nuran lingvoĵongliston. Nenio estas pli falsa, ol tiu ĉi opinio! Se la leganto ne lasas sin narkotigi per la timige perfektaj armiloj de l' moderna verstekniko, li ĉiam trovas ĝuon ankaŭ por la intelekto, ne nur por la orelo. Sufiĉas, se mi aludas la potencon, prafortan *Kongresan Runon* aŭ la parencteman »La renkonto de kantoj«. Estas en la ciklo du poemoj, kiuj videble ambicias la ludon pri la formo: la *Sonorilludo* kaj la *Versoj leoninaj*. Sed ĉu sen ili ne estus multe pli-malriĉa nia poezio? Se mi volas neesperantiston konvinki, ke la tiel nomata »artefarita« lingvo kapablas por poezio, mi laŭtleĝas unu el tiuj ĉi versoj. Kaj la nekredema Tomaso ĉiam konvertiĝas!

Se mi legas tiujn ĉi versojn, ĉiam venas en mian kapon ideo pri juna knabo, kiun surprizas la noveco de l' impresoj pri sia propra korpo: liaj membroj malkaŝas por li miraklajn revelaciojn, li provadas ilin, eĉ en la plej fantastaj gestoj. Estas nia lingvo, kiu sin provas en tiuj ĉi versoj, tial ĝi ĝojas tiom pri sia korpo, la formo. Sed tiu ĉi korpo jam fermas ensorĉite la magian trezoron: la animon de l' poeto!

»Fari kastelon el oro de revoj, sopiroj de l' koro
En la aera lazur' estas belega plezur'!
Brilas per suno la muroj, ĝis nuboj atingas la
turoj,
Cambrojn en luksa ornam' iras Estrino, la am'.«

La ciklon finas soneto: *Th. Cart mortis*. Pri ĝi s-ro L. N. Newell diris en sia recenzo: »poemo laŭmenda kaj nepersona.« Mi ne povas konsenti tiun juĝon. Per kelkaj simplaj, sed koncize efikantaj vortoj sentigas al ni tiuj ĉi 14 linioj, kion la »Granda Veteran« signifis al nia movado. Kaj la tutan tratekasas la varma funebro de l' kompata ĉagreno. La finaj tercinoj tiel perfekte »e'sonas«, kiel ĉe Heredia-sonetoj:

»Konfuzo kaj senhelpe ni ĝemas sub ĉi plago.
Sed por animoj grandaj la mort' ne estas fin'!
Li pasis, ve, li pasis, sed restis lia Ago!

Super la tomo ŝvebas, kaj plue gvidos nin
Du praaj malamikoj, kiujn sub verda flago
Mirakle li pacigis: Liber, kaj Disciplin'!

LA ENFALINTA MINO.

Kapricaj humoroj de l' juna viro, kiu falas jen en la malhelajn abismojn de l' splena pesimismo, jen en la plej sunĝojajn jubilojn de l' beata vivjesado.



Lumefektoj

Juneco kaj mondĉagreno! kiom ofte ili jam renkontiĝis en la poezio! Sed la voĉo de l' »enfalinta mino« diferencas iom de tiu de la antaŭaj generacioj: ĝia pesimismo estas pli objekte motivita. La leganto aŭskultas al la voĉo de generacio, kiu vidis kaj mem partoprenis la mondmiliton. Kaj krom la versoj, en kiuj la poeto per petolaj rimoj ludas pri la ne troserioza individua ĉagreno, troviĝas poemoj, en kiuj ekvibras pli forta kaj dolora tono: tie la lingvo kaj esprimo fariĝas pli simpla, memvole rezignante pri la iloj de l' ekstera efiko, ambicante impresi nur per la masiveco de l' ideo mem.

La ciklon enkondukas *Iras abiturient'*..., eta ĉefverko de forma perfekteco, vivfreŝa rememoro kaj flirtanta fantazio. Kiu iam, forlasante la senzorgajn kaj senkonscie feliĉajn jarojn de l' studenta vivo, ekstaris sur la sojlo de l' Vivo tiom multpromesa kaj por momento ririgardis kaj subite sentis, ke la rozkolora memfido de l' junaj muskoloj iĝis iom malcerta pro la dubo, ĉu vere al monto kondukas la plua vojo aŭ al deklivo: tiu fermas tiun ĉi poemon, kiel trezoron en la koron!

Junajn virojn ofte obsede atakas la deziro: vagi malproksimen, sola, dejetante ĉiun katenantan ligilon. Kutime tio estas natura kaj malespera lasta provo por eviti ĉies komunan sorton: la filistrecon. Se la okuloj jam malfermiĝis kaj la idealismajn revadojn de l' junulo la realo jam vundis morta, ektriumfas la spleno:

»Rezigni pri ja vana lukto
(Feliĉon ankaŭ venk' ne portos),«
(Maldolĉa kanto)

»Kiom utilas ja, al kiu plaĉas,
Ke, jen, mi estas bona, kiel pano,
Kaj mi sekigas, aŭ min mus' formaĉas?...«
(Ribeletto)

La juna temperamento facile glitas en kontraŭajn ekstremojn. La melankolian senluziigon sekvas spito, la spito rezultigas ian amaran, perfortan ĝojon, kiun elinterne protektas la natura inklino de l' juna korpo al la optimismo. El tiuj miksitaj radikoj elburĝonis la *Kanto de vagabondo*, unike freŝa floro de nia liriko. Kalocsay mem muzikigis ĝin kaj jen nova surprizo! Lia *prothec* diversforma genio malkaŝas al ni novan flankon: li estas talenta komponisto. La *Kanto de vagabondo* meritas la plej vastan disvastiĝon ĉe nia publiko ne tre kutimigita al bonkvalitaj originalaj Esperanto-muzikaĵoj.

Ĉu oni restas hejme, ĉu oni travagas duonan mondon, la fina konkludo estas la sama: oni devas veni al la nerifuzebila rekono, ke ĉiu neeviteble kaj definitive *sola* devas fari la vojon de la lulilo ĝis la ĉerko:

»Ĉu en ĉambreto, dum vespersilento,
Aŭ eĉ en la tumulto de l' popol',
Subite ne atakis vin la sento,
Ke estas vi en sol', en surda sol' ?«

La ciklon fermas du impete forttonaj poemoj. Liberaj versoj: nenia kateno, nur foje-foje aperas modeste kaŝigemaj rimoj. La *Homo*: potenca himno al la sinjoro de l' Tero, al la triumfa subjuganto de l' metalo, akvo, vento, fajro, al la timinda ordonanto de l' maŝinoj, al la dolĉvoĉa kantisto de sonoraj melodioj, al la venkinto de l' Vivo kaj... krevantaj son-oriloj, ĉifoniĝintaj vortoj al la murdisto, al la *jalinta* anĝelo kaj laca rifuĝo al la senkulpeco de l' naturo, al la

»...tragika muteco de l' ŝtonoj.«

AGLO KAJ KOLOMBO.

Pasiaj amkantoj plenaj de juna ardo. La tuta entuziasmo, la sindona adoro de l' unuaj amoj pulsas en tiuj ĉi versoj. Laŭ la forma ellaboro ili ne estas tiom perfektaj, kiom la pli postaj ampoemoj. Plurfoje la forto de l' pasio estas tro impeta kaj subpremas la artiston. Plurfoje la poemoj estas tro personaj, la artisto ne levas ilin al la nivelo de komune homa interessfero. Sed ankaŭ ĉi tie ravas nin la eleganta delikateco de l' esprimo, la facila kaj flua ruliĝo de l' ritmoj, la intensa, sed deca erotiko. Ankaŭ ĉi tie ni trovas brilajn pecojn, mi menciuj nur la lastan, la kanton pri la sorĉa, sonorila rido de l' amatino:

»La ĝoj' en mi jam estas vekiganta.
Infan' ankoraŭ, sed infan' giganta:
Destinis lin la Sorto por miraklo!
Jam, se atakos la dolor' inside,
Per eta man' li ĝin sufokos ride,
Kiel serpenton en lulil' Heraklo!«

(*Ridu, kara*)

KORPRINTEMPO.

Maja idilio! Festa posttagmezo de urbano. Saltante jubila vivĝojo pro la libera freŝa aero, la herba verdo, la ĉiela bluo kaj... pro la printempa amoj. Triumfa panegiro de l' troplena Juno. La naturon Kalocsay rigardas per la avide malsataj okuloj de l' urba intelektulo, kiu la ne tre oftajn okazojn de l' ekskurso al la verdo ĝuas kiel ferion: ferion inter la griza monotoneco de l' vivo en la ŝtonarbaro. Dum ferio ni ĉiuj iom reinfaniĝas, des pli, se la maja amo dolĉigas ĝin. Kaj kio okazas, se du infanoj kunferias? Ludo! Ĉar la homo nur dum ludo povas esti feliĉa

Sur viandbazaro

— *Johannes Schütz* —

Premite tablo apud tablo staras,
aŭdiĝas ina insultad' kaj rid',
de l' uktegmentoj neĝ' surkapen falas,
briletas sun' matena kun rigid'.

Jen trapafitajn ko'ojn tetroj havas,
jen pendas urogalo de stanget',
rigardo vitra de lepor' vin trafas,
paf-difektita estas la pied'.

Perdrikoj tie kuŝas kunligite,
sub tuko ŝirma jen anser-amas' —
tra la okuloj ĉo' apeti'e
eniras buŝon jam dum preterpas'.

La tablojn ŝarĝo tro abunda premas,
ĝi elmetiĝis kvazaŭ por parad':
vendlokoj je penĉantaj bestoj plenas,
sur blokoj — freŝaj porkoj por hakad'.

Tendenaĵ pecoj jen aparte kuŝas,
kaj jen virŝaf', senhelpa laŭ aspekt',
rostaĵ-tranĉaĵoj sur la tabloj ruĝas,
en kest' — bovinokapoj por elekt'.

Jen kvazaŭ rostroj — grasaj ŝafovostoj,
jen lard-amasoj, pretaj por distranĉ',
marĉandas ie malriĉul' pro ostoj,
el kiuj fari supon por tagmanĝ'.

Intest-restaĵojn petas almozulo,
grasajon la drinkejo-pocedant' —
ke nokte ĝin elvommu diboĉulo,
post kiam manĝis li en troa kvant'.

El la estona: *Hilda Dresen*

kaj la infanoj pli bone konas la vojon al la feliĉo... Knabaĝaj rememoroj vekigas en la poeto: forgesitaj ritmoj, delonge ne aŭditaj kantoj. La ritmo kaprice ŝanĝiĝas, la rimoj petole interplektiĝas: ludas ankaŭ la verso. Esperanto ankoraŭ neniam sonoris kun tia plena formarto: tamen samtempe kun tia facileco kaj fleksemo, kun tia preteco kaj samtempe kun tia senartifikeco. Unua kaj unika trezoro estas la lingvo de l' *Maja idilio*, unue ekparolas en nia lingvo la naive simpla kaj infana Carmo.

Duopa psalmo: sentempa senvelka preĝo de ĝeamantoj. Plena de moderna maltrankvilo pro ebla elreĝo en la estonto kaj klasike greka harmonio kaj pureco de l' formo. Ĉiam renoviganta, ĉiam nova provo por eternigo de l' Sento, por haltigo de l' Minuto.

La unuaj kvar cikloj enhavas la pli fruajn poemojn de Kalocsay. (Escepte kelkajn pli malfruajn.) Ili respregulas la junan poeton. Nun la vojo gvidas al ĉiam pli profundaj temoj kaj al ĉiam pli altaj suproj.

(*Daŭrigota.*)



OBSERVO

GAETAN DE GENNARO

La bildoj de la nuna numero estas de G. Gennaro.

Gaetan de Gennaro (pr. ĝenaro) estas juna itala pentristo vivanta en Parizo, kies sincera kaj lojala talento renkontas pli kaj pli la meritan sukceson. Lia specialaĵo estas la portreto, kiun li traktas kun sprita sed tamen konscienca verve. Lia maniero estas novklasika; li ne kredas necesa, ke liaj modeloj estu nerekoncblaj. Simple, kun bela ekvilibro li montras al ni realon iom idealigitan, aŭ, plibone, stiligitan. Liaj verkoj estas karakterizataj per strangeta, nepreciza, fora rigardo, kiun li donas al preskaŭ ĉiuj siaj modeloj: oni nomis lin la pentristo »de la interna rigardo«. Jen kial liaj portretoj kaŭzas al ni impreson pri ekmiro, surprizo, neatenditeco.

Trarigardante la fotojn enhavatajn en tiu ĉi numero, oni rimarkos facile la preferon de la artisto por la negroj. Al S-ro Bresle, kiu demandis lin pri tiu punkto, li respondis, en privata letero: »mi opinias, ke la muskolaro reliefigas pli bone sub la nigra karno, kaj la haŭto mem, elasta kaj lubrikita, faciligas la flekseblon de la penikado... Ekzistas negroj bronzkoloraj, olivverdaj, kupraj, sienflavaj (1) kun violaj rebriloj, kaj ceteraj... Mi multe ŝatas la studon de la nigra raso. Tion kaŭzas pure plastikeca altiro. Mi amas ankaŭ la praavan esprimon de tiuj homoj. Al mi plaĉas traserĉi la fundon de ilia mistero, sed, kiam mi estas antaŭ modelo, ĉu nigra, ĉu blanka, mi evitas la morbidecon (2).«

Gennaro laboras rapide, laŭ la unua inspiro. Kelkaj horoj sufiĉas al li por ordigi kaj centriĝi la pentrotajn, skizi, meti la kolorojn. Li faras nur unu skizon por ĉiu tolaĵo.

En tiu pentristo, kiu kurioze miksas modernecon kaj klasikecon, la sencoplana altiro al la nigruloj denuncas en li tiun ŝaton por la ekzotikaĵoj, tiun malsanetan amon por la strangajoj, kiu kuŝas en la fundo de preskaŭ ĉiuj artosentemaj animoj.

Laŭ Valentin Bresle (3) resumis:
G. Waringhien.

LIBROJ PRI PATROJ KAJ FILOJ. La antagonismo inter patroj kaj filoj, junuloj kaj maljunuloj, estas tre malnova, ŝajne eterna temo de la literaturo. Ĉiu nova generacio sin trovas kontraŭ la alia generacio kaj havas sian literaturon, kiu, en la formo de l' plenumiĝo de sopiro, pravigas kompreneble la junulojn. La antagonismo

1. Havanta la koloron de la »terra di Sienna«.
2. Svelmola delikateco de la karnoj.
3. La kliŝojn por tiu artikolo afable disponigis al ni s-ro Valentin Bresle, direktoro de la revuo »La Mercure Universel«, 204 rue Solférino, Lille, France.

de la du generacioj eble neniam estis tiel akra kiel nun kaj pro tio ne estas hazardo, ke el la libroprodukto de la lasta duonjaro venas antaŭ nin per unu fojo tri libroj kun tiu ĉi problemo, tri seriozaj kaj literature valoraj libroj.

La unua estas la romano de *Vardis Fisher*: »*Dark Bridwell*«. Inter la plej nova angla libroprodukto estas grava okazaĵo la apero de tiu ĉi romano. Novan paradizon volas krei *Charles Bridwell* laŭ siaj sopiroj kaj imagoj, kiam li ekrestas en la praarbaro de *Idaho* kaj komencas tie sian vivon, penan kaj riĉan je brutalajoj. Libera vivo. Li murdas, se necese, li ŝtelas, se necese por la primitivaj vivbezonoj kaj li tenas en sia potenco la edzinon kaj filon, sentas sin feliĉa kaj vidas realigitajn siajn strangajn fantaziaĵojn. Kontraŭ lia perforto estas vana la sopiro de la edzino al alia mondo kaj alia vivo. Subpremite kaj turmentite ŝi devas rezigni. Sed la filo heredas ne nur de la patro, sed ankaŭ de la patrino. Li heredas la brutale sovaĝan forton de la patro, sed ankaŭ la sopirojn kaj imagojn de la patrino, pri pli bela, pli pura, pli bona vivo. La plenkreskinta juneco kontraŭiras la maljunan forton. Kaj Zed, la filo, fine detruas ĉi tiun artefarite kreitan paradizan pravivon kaj ekstermas la patron. La angla verkisto prezentas en koloraj kaj riĉaj bildoj tiun ĉi strangan familian vivon, kun ĝiaj jen belaj, jen sangaj eventoj.

Same la antagonismo de patro kaj filo donas la problemon al la nova romano de la plej serioza angla verkistino: *Virginia Wolf*. La titolo de la nova romano estas: »Ekskurso al la lumturo«. Patra perforto kontraŭ alidir-ektaj sopiroj de l' familio. La ekskurso mem al la lumturo foje ja vere projektigis, ĝin decidis patra volo, sed intertempe venis malbona vetero kaj la ekskurso prokrastigis. Pasis jaroj. La patrino mortis; ŝiaj beleco kaj varma koro jam ne mildigas la severan puritanecon de l' patra rego, mortas ankaŭ la du fratroj kaj la plej juna filo plenkreskas. Tiam fine realiĝas la ekskurso al la lumturo. Kvazaŭ simbole: en la antagonismo inter patro kaj filo: la venko de l' volo kaj sopiroj kaj vivforto de l' filo: kiam la boato vere ekiras al la lumturo. La romano mem propre rakontas la historion nur de du tagoj. Tiun de l' prokrasto kaj tiun de l' realigo. Sed sur la horizonto de tiuj ĉi du tagoj sentiĝas ĉio okazinta dum tiuj longaj tempoj, ne nur en eksteraj okazaĵoj, sed en la konfliktoj de maljunuloj kaj junuloj.

Kun la problemo de juneco kaj maljuneco aliĝas kiel tria al la supraj la verko de *Martha Ostenso*: *Akvoj sub la tero*. Tiu ĉi norvegdevena nordamerika verkistino en tekniko kaj voĉo estas proksime parenca al la antaŭa verkistino. Kaj parenca ankaŭ en la emo de simbolismo. Sub la tero, sub ĝia dura kaj rigida krusto, senĉese fluas la akvoj kaj, kiu fosas iom pli profunden, tiu riskas, ke sovaĝa kaj eksplodanta geĵiro alfrapas. Evidente la plej juna filino el la sep estas, kiu, kvazaŭ geĵiro, trarompas la rigidecon de l' patra volo. La romano konsistas el ok partoj. Inter ili la unua kaj la lasta ĉapitroj havas la nomon de la heroino de l' romano: *Charlotta*, kaj la interaj ses la nomon de la ses fratinoj. *Charlotta*, kiel plej juna fratino, vidas unu post la alia, kiel alvenas en sia plenkresko ŝiaj fratinoj al la ekflagro de siaj virinaj kaj homaj deziroj, kiel ili ekflugas, sed renkontante la puritanajn leĝojn de la severa kaj pia patro, ili refalas tien, de kie ili ekiris. La instruo de la sorto de ses fratinoj ŝildas la impeton kaj forton de la sepa, kiu fine scias sin teni kontraŭ ĉiu. Si estas la sola, destinita por libero, ŝi do atingas ĝin.

Karlo Bodó

DISKUTO

ĈU ORIGINALA AU TRADUKITA LITERATURO ?

En nro 4. de Literatura Mondo estis publikita artikolo de Lejzerowicz sub la supra titolo. La aŭtoro subtile, tamen insiste penas pensigi al la legantoj, ke nuntempe por Esperanto valoras nur tradukita literaturo. Koncerne la originalan literaturon li rekomendas dume atendi por nedifinita tempo. »Se efektive Esperanto iom pli poste kondukos la homaron al nova kulturo, tiam versajne ankaŭ por ĝia originala literaturo malfermiĝos nova horizonto.« diras la aŭtoro. Estus granda eraro kontesti la signifon de la tradukita literaturo, sed diri, ke por originala literaturo ankoraŭ ne venis la tempo, estas ne malpli erare.

Koncerne la tradukojn ĝenerale plejmulto de lingvistoj havas certan opinionon. Mi citu unu el ili. Jen kion parolas prof. Mladenov en sia verko »Enkonduko en la ĝeneralan lingvosciencon« : Kiu volas efektive kunesti spirite kun la grandaj genioj de la Parolo, tiu devas legi la poemojn de Homero, la »Divina Comedia« de Dante, la dramojn de Shakespeare la Faŭst-on de Goethe ktp. en originalo. Ĉiuj ĉi verkoj estas netradukeblaj ! Aserti la malon signifas ne koni la fundamentan antinomion de la lingva agado... « (Heroldo de Esperanto 1930. nro 37.)

Sendube ĝi estas troigo, sed certe estas vera, ke plej bona traduko neniam povas transdoni al la leganto ĉion, kion donas la originalo. Kaj esp-istaj tradukoj (malgraŭ, ke Esperanto estas plej fleksebla kaj perfekta el la ekzistantaj lingvoj) ankaŭ ne estas esceptoj el tiu regulo. Tial solvante la problemon, kion preferi : originalan aŭ tradukitan literaturon, oni neniuokaze povas neglekti tiun cirkonstancon. Krome oni ne devas forgesi, ke tiuj grandiozaj kreaĵoj, pri kiuj parolas s-ro Lejzerowicz en la fino de sia artikolo, tuj post sia agnosko estas tradukitaj en naciajn lingvojn, en kiuj ĉiuj esp-istoj (se li nur ne estas negro, indiano aŭ papuo) ĉiam povas legi ĝin.

La esperantistaro ne estas nacio, sed oni ĝin povas konsideri kiel popolon, kiel ian ampleksan unuon. Estus interese scii, kiu do popolo, kiu nacio fieras pri tradukita literaturo ? En kiu ŝtato uzas la plej bonaj literaturistoj propran, sed nur por transdoni produktojn de fremda propran, sed nur por transdoni produktojn de alies kreado ?

S-ro Lejzerowicz tute pravus dirante, ke ekzemple hungaroj, germanoj, poloj kaj ĉeĥoj vivas en malsamaj sociekonomiaj kaj vivmanieraj cirkonstancoj, havas malsaman kutimon kaj parolas malsamajn lingvojn. Sed tio tute ne necesigas, ke ĉiu nacio verkante ian artverkon, nepre devas sin turni al la fantazio aŭ prediki antagonismon kaj malamon kontraŭ fremdaj popoloj. Ĉu la literaturo sin okupas sole pri tio, ke ĝi primokas »mankojn« de la loĝantoj post la limoj de la koncerna ŝtato, idealigas la patrujon aŭ ŝvebas en superteraj sferoj ? Nenio malhelpas al ĉiu verkema nacio, posedanta Esperanton, ĉerpi la temojn el la reala vivo (ne forsendante siajn heroojn al la landoj de l' Fantazio aŭ en la epokon de Nerono) kaj tamen krei verkojn ne ofendajn al aliancianoj. Per kio do tia literaturo diferencos de la literaturo tradukita el fremdaj lingvoj ? Evidente nur per malpli granda talenteco. Estas sendube, ke verkoj, similaj al la cititaj de prof. Mladenov, perloj de naciaj literaturoj mankas kaj eble ankoraŭ longe mankos en la esperanta originala literaturo. Sed tio ja estas tute natura. Naciaj literaturoj evoluis dum jarmiloj. Sed jetu la rigardon

al la historio de ajna popolo kaj vi vidos multegon da senutilaj, batastaj verkoj, kiuj ne havis valoron eĉ por sia epoko. Kiom da laboro estis elspezita antaŭ ol ekaperis pli-malpli valoraj verkoj, antaŭ ol ellaboriĝis stiloj. Kion do oni postulu de la juna esperanta literaturo, kiu ankoraŭ eĉ 50-jarojn ne ekzistas ?

Tial, ŝajnas al mi, ne rajtas s-ro Lejzerowicz s'arigi jenan demandon : »Ĉu niaj plej bonaj, plej kapablaj plumoj devos sian tutan energion streĉi por krei en la plej bona okazo ion tre mezkvalitan — dum grandiozaj kreaĵoj de mondkonataj majstroj simple petegas, ke oni traduku ilin en nian belan, gracion lingvon ?«

Mi opinias, ke ne nur valoras, sed eĉ necesas streĉi la fortojn por unuatempe doni ion, eĉ tre mezkvalitan. La vojo al perfekteco estas komplika kaj malfacila. Se el sub la plumoj de niaj originalaj verkistoj nun aperas nur verkoj mezkvalitaj, ni ne devas tiel pensi, ke ankaŭ estonte ni ne havos majstrajn verkojn. Originala esperanta literaturo havas bonan estontecon. Ĝi povas kaj devas utiligi atingajojn de la literaturoj naciaj. Ĝi devas ensorbi ĉion plej bonan, kaj eviti tiujn erarojn, kiujn faris la naciaj literaturoj dum la longa procezo de evoluo. Ni devas atingi tion, ke la literaturo esperanta havu siajn majstroverkojn, kiuj estu indaj tradukiĝi en naciajn lingvojn. La originala esperanta literaturo devas fariĝi egalrajta kompare al la literaturoj naciaj. Per tiu vojo nia lingvo plej rapide pruvos sian vivkapablon, sian rajton por la ekzisto. Esperanta movado estas lukto, lukto kontraŭ skeptikismo, diletantismo, konservativismo. Estas malbone, resti pasiva en ajna lukto ; tio — krom tre maloftaj esceptoj — kondukas al malvenko.

Kion do proponas fari s-ro Lejzerowicz ?

»Ĉe la maro ripozi, en la revoj nur krozi
Kaj atendi pli bonan veteron«

Atendi ĝis Esperanto estos »oficiale« agnoskita. Nur tiam — liaopinie — malfermiĝos pli vastaj horizontoj por la originala esperanta literaturo.

Nu, tia atenda politiko ĉi-okaze ne taŭgos. Ni mem devas malfermi kaj vastigi tiujn horizontojn ! Ni devas krei propran literaturon, kiu laŭ la kvalitoj ne estu malpli alta, ol la literaturoj naciaj. Ni devas aspiri, ke el Esperanto oni traduku en lingvojn naciajn.

Kaj tio ne estas utopio, ĝi estas realaĵo de ne tro malproksima estonteco. »Abismoj« de J. Forge estas tradukita al lingvoj finna kaj ĉina. Ĉu tio ne estas brila sukceso ? Ĉu tio ne estas plej bona propagando por nia lingvo ?

DO :

Kreo de propra originala literaturo, propraj majstroverkoj, havantaj internacian valoron, jen estas — ŝajnas al mi — la misio de Esperanto.

E. G.

NIA TITOLPAGO

Kiel niaj legantoj vidas, en la konkurso venkis la titolpago nro III. Jen la preciza rezulto de la voĉdado :

Titolpago I. : 12 voĉoj. Titolpago III. 68 voĉoj

Titolpago II. : 44 voĉoj. Titolpago IV. 23 voĉoj.

Tiel do pri la ĉijara titolpago ne estas responda plu nia unuflanka modernemo, ĝi estas elektita, per tute demokrata vojo, de nia legantaro mem.

RECENZO



Ciujn librojn, ricevatajn en du ekzempleroj, ni recenzas. Unuope ricevatajn librojn ni nur mencias. — La recenzoj esprimas nur la opinion de la recenzinto kaj ne tiun de la redakcio. Pro tio la redakcio tre volonte publikas interesajn kontraŭopiniojn, koncerne kiun ajn aperintan recenson. — La libroj, ĉi tie menciataj kaj recenzataj, estas haveblaj ĉe la librofako de nia eldonejo.

JOOST VAN DEN VONDEL : GYSBREGHT VAN AEMSTEL. Tragedio. El la nederlanda tradukis : Ir. J. R. G. Isbrücker. 82 paĝoj. Eldonejo : Zutphen-W. J. Thieme & Cie, 1932. Prezo sv. fr. 4.40

Joost van den Vondel, la »Princo de la nederlandaj poetoj«, (1587—1679) estas la plej elstara verkisto de la nederlanda literaturo en la XVII-a jarcento. Li verkis multajn dramojn sub la influo de la klasika latina literaturo kaj de la franca dramo. Pleje sukcesis lia »Lucifero«, grandioza koncepto kiu inspire efikis je Milton. Kun *Gysbreght* oni inaŭguris la novan teatron en Amsterdam en la jaro 1638. Tiu ĉi tragedio temas pri sanga, plie legenda, ol historia epizodo de l' nederlanda mezepoko. Kiel modelo servis al li la rakonto de Vergilius pri la sieĝo kaj okupo de Trojo. Kaj estas interese : dum lego oni ricevas la impreson, ke Vondel havis pli fortan talenton por trankvila epika rakontado, ol por scenigo de dramaj situacioj, kvankam oni devas rekonii, ke kelkfoje — precipe en la kvara akto — tuŝas la leganton la vento de l' tragikaj eventoj. Komprenible la konstruo de l' dramo estas ankoraŭ primitiva, akcesoraĵoj, kiel : enkonduka monologo, horo, anĝelo Rafael kiel »deus ex machina« ne mankas.

Cu *Gysbreght* estas tia verko, kies tradukon nia literaturo nepre bezonis? Mi ne kuraĝus respondi per nepra jeso. Mi pensas, ke »Lucifero« (se temas pri klasika verkoj) pro sia internacia temo povus pli intensan interesigon vekii ĉe nia publiko. Kaj per tio mi ne volas kontesti la kvaliton kaj valoron de *Gysbreght*, kiu certe havas sian nemalgrandan signifon en la literaturhistorio kaj lingvoevoluo de Nederlando. Sed estas certa fakto, ke ekzistas dupecaj literaturaj valoroj : internaciaj kaj nure naciaj. Kiel ekzemplon mi mencias nur la nomon de Schiller, kiu havas tute alian pezon en la internacia literaturhistorio, ol en la germana. Aŭ kontraŭe : Byron kaj Shelley estas eksterlande pli konataj, pli aprezataj, ol en Anglio. Kaj tio ja estas natura. *Gysbreght* por la nederlanda leganto certe donas tiajn rememorojn pri la nacia pasinto, ĝia arkaika lingvo tian ĉarmon, tiajn asociaciojn, tiajn *imponderabilia*, kies estetika validiĝo perdiĝas por la eksterlanda leganto. Laŭ mia opinio nia publiko preferus konatiĝi kun moderna verko, kiu pli proksime staras al ĝia pensosfero. La legantoj de klasikaj tragedioj reduktiĝas je ĉiam pli kaj pli malmultnombra grupo.

La traduko de *Gysbreght* estis neordinare kuraĝa ago, ĉar la tasko estis ekstreme malfacila kaj rekompence la tradukinto povis kalkuli nur je malmultnombra publiko. En la antaŭparolo s-ro Isbrücker prezentas siajn principojn sekvatajn dum la tradukado. Inter aliaj li diras : »Mi opinias, ke klasika nacia verko decas esti tradukata en klasikan Esperanton.« Tiun ĉi principon mi trovas nepre sekvinda kaj mi povas nur ĝui la lingvon de la esperantigita *Gysbreght*, vere klasika Esperanto, ĉerpita el la plej kristale puraj zamenhofaj fontoj de nia lingvo. Sed mi pensas, ke la versteknikaj principoj de l' eminenta tradukinto estas iom rigide konservativaj. Laŭ mia opinio moderna verstekniko tute ne malutilas al la

klasikeco de iu verko, eĉ ĝi iom malgrandigus la distancon inter la verko kaj la leganto. S-ro Isbrücker severe evitis la rimoidojn kaj tio rezultigis, ke liaj rimoj estas brile puraj, sed ili ofte ripetigas kaj monotone efikas. La personaj pronomoj ludas tro grandan rolon en la rimaro de l' verko kaj kelkfoje troviĝas eĉ nuraj adasismoj. La sukcesa tekniko de l' traduko nekontesteble pravas, ke la tradukinto facile estus povinta eviti ilin, se li ne estus perfortinta siajn rigorajn principojn.

La nomon »Mario« mi uzus en la formo »Maria«, kiel en la Biblio-traduko. »Mario« impresas kiel itala virnomo.

Nia literaturo ricegis per grava verko. Estas tasko de nia publiko rekonii tion.

Ludoviko Totsche

JOHANNES BARBARUS : *Horizontoj*. El la estona : Hilda Dresen. Eldonis : Esp. Asocio de Estonio en Tallinn. 1931. 78 p. Prezo : 6 respondkuponoj aŭ egalvaloro

Johannes Barbarus estas interesa poeto : muzikanto de novaj tempoj : »For liron, la mucidan ! La fanfaroj, — trumpetoj estas nia muzikil' — for la dormantojn, maturiĝis bakanaloj, — ekŝvelas koro arda jam pro maltrankvil !« Poeto de fanfaroj, arda maltrankvilo, grandurba ŝajna, sistema anarkio, zigzagoj kaj geometrio, harmonio kaj revolucio ; lia naturo estas tipe moderna — eslorema kaj esplorinda fenomeno ! Poeto, kiu »sovaĝe sopiras forŝiri sin de virina subtileco. Originala, ne ĉiutaga muziko : melodiocifonoj el la neforviŝebla infanĝo, miksitaj al la ritmigita bruo de la grandurbo.

»Al la tero ligita mi — ja per radikoj sentas min, — sed per branĉoj streĉitaj mi — alten etendas min.« La alta horizonto, al kiu la branĉoj sin etendas, estas malpli limita ol la tero, kien niaj radikoj ligas nin, tamen ni ne povas liberigi nin en la aeron, en la mondon de muziko kaj geometriaj puraj formoj. Se oni tion komprenus, Barbarus plej volonte dirus ĉion, diritan en la libro, per muziko, aŭ geometrio, ĉar ili ja estas sendependaj de la tera ligiteco. Li estas revoluciulo, sed kun multa optimismo kaj sereneco. Eble unu el la plej talentaj kaj konsciaj revoluciaj poetoj, kiu ne volas ŝajniĝi sin pli kruela, ol li estas. Mi opinias, ke li estas pli proksima al la *Gironde* (se nepre necesas, estu sango), ol al la partio de la jakobinaj ĉapoj. Kvazaŭ li serĉas la vojon de la revolucia evoluo.

Li ne povas nei, ke, malgraŭ ĉio, la vivo estas bela (eble ĉar novaj ebloj en ĝi kaŝiĝas) : »De malsupre muziko sonadas — polifona, ravoplena ario, — trama kaj aŭta Avemario. — Ho, surduloj, mi vin kompatas !« Reziĝne li konstatas, ke la mondo estas fermita, tamen, li ne volas trabori la ĉielon : »Realo — nur iluzi', — sed ĝi fariĝu realo jam !« Bonege li konas sin kaj la homon kaj liaj konstatoj estas ekzaktaj, tamen poeziaj.

Hilda Dresen estas unu el niaj plej bonaj poemtradukantoj — tion ŝi ree pruvus per ĉi tiu libro. Sia formpretenco preskaŭ ĉiam triumfas pri la malfacilaĵoj, kiun la kapricaj rimoj kaj ritmoj de la originalo prezentis al ŝi. Eble ĉi rigideco de esprimo estus riproĉebla, kiu en ĉi tiuj tradukoj pli sentiĝas, ol en la Under-tradukoj. Sed plejparte ŝi tre bone prezentis en Esperanto ĉi tiujn virtuozaajn polifoniaĵojn.

F. Szilágyi.

NOVSPECAN PROPAGANDILON eldonis Eld. Societo Esperanto, Stockholm, Svedujo. Ĝi konsistas el malgranda mondatlaso, »La tuta mondo sur 1/4 landkartfolioj«, uzata de diversaj firmoj kiel reklamilo. La eldoninto aldonis propagandan tekston pri Esperanto kaj vendas ĝin je prezo de sv. kr. 0.35. Ĝi estas vendata kiel mondatlaso, ne kiel propaganda broŝuro esperanta. Ĝi tamen servas kiel propaganda broŝuro.

REDAKCIA POŝTO

Nepublikotaj manuskriptoj :

Noveloj, observoj, teatraĵoj k. s. :

Kial la kaŝtanoj havas la signon de la hufo de ĉevalo ; La virinoj el Stavoro ; La preĝado ĉe la indianoj ; La unua de majo (traduko) ; Princo Jozefo Poniatowski ; La mortanta kamparano ; La kuracisto kaj la morto ; ha blua papilio ; El taglibro de frenezulo ; Fabelo ; Nacia propagando ; La fragmento ŝirita el ies koro ; Ombroj ; Kiel Mark Twain plibonigis ĉetablajn moretojn de la Usonanoj ; Ĉiu al sia propraodoro ; Transplantitaj Ŝerc-oj ; Genezo de Ideo ; La du princinoj ; La eliksiro de la felico ; Rakonto el la malproksima oriento ; Ŝiaj larmoj ; Dudek tagoj da Napoleona vivado.

Dudek tagoj da Napoleono vivado.

Poemoj :

Penso en tago nebulema ; Subita penso / La eterna refreno ; La korvo de E. A. Poe / Febra nokto ; Aŭtumar-mario / Mia kredo / La ĝojo estis nur momenta ; Formortis rid' ; Amaro horo ; Ĉe lago ; Sunleviĝo ; Per sufero kaj laboro / Venu kun mi / Floreto / Por kio ? ; Ĉu estas ebla ? / Serajlkanzono ; Donacante bukedon / Patriotismo Internacia / Kaliopa / Vulzio ; Interkompreno ; Rivero / Fanfaroj / Malsaga ago ; Sorto / *** ; Kanto de Tunguzo ; Ventego de Puŝkin / Siniedo ; Reviga vespero / Angoro ; O, olesy / Amo ; Ne demandu / Ost-rava ; Kiu anstataŭos min / For la negativismo /

Korekto

En nro 10. sur la paĝo 227, dua kolono, de supre la kvara linio enhavas gravan, miskomprenblan preseraron. Bonvolu legi tiun linion jene :

vokalo, kiun selvas vokalo aŭ nur unu konsonanto

Abonantoj en la unua periodo. S-ro De Boes, Ronse proponas, ke ni eventuale pretigu taŭgan bindaĵon ankaŭ por la unua periodo, por tiuj, kiuj havas ĉiujn numerojn, sed ĝis nun ne bindigis ilin. Ni volonte farus tion, se ni scius, ke ekzistas sufiĉa nombro da abonantoj, kiuj deziras havi ĝin. Ni do petas ĉiujn interesigantojn, skribi al ni. Ni povas liveri tiajn por ĉ. 0.30 dolaroj po bindaĵo.

S-ro Saaltink, Arnhem. Se vi ne ricevas iun numeron, bonvolu reklamaci plej malfrue du semajnojn post tiu dato, kiam devis aperi la koncerna numero. Postajn reklamaciojn ni ne plu akceptos.

S-ro Fejér, Debreczen, s-ro Homar, Brod. Viaj abonoj estas ricevitaj.

S-ro Surnikowski. La 10-an numeron vi certe ricevis intertempe. Pluaj numeroj en tiu ĉi jaro ne estas. Legu

pri tio nian redakcian sciigon en nro 8. (al sro Ginz, Praha)

S-ro Degen, Sembach. Ni plenumas vian peton.

S-ro Narita, Nagoja. Intertempe ni ekspedis al vi la 1-an kaj 2-an numerojn, do via nun sendita abonumilo validas nur ĝis oktobro 1932. inkluzive.

S-ro Brian Price-Heywood. Via abono finiĝas per la nro 2. 1932.

S-roj Bofill kaj Jansson. El via rento post depreno de abono 1932. + bindaĵo restas ankoraŭ po P. 7.— Kion ni sendu al vi ?


Nia nova abonprezo

estas fiksata en dolaroj nur pro ĝia stabila valoro. Kompreneble ni kaj niaj reprezentantoj akceptas egalvaloron en la mono de la koncerna lando, laŭ la kurzotabelo de la tago de ekspedo flanke de la abonanto.

Bonvolu do noti : Tutjara abono dol. 1.80, duonjara dol. 1.—, kvaronjara dol. 0.60. Opa numero dol. 0.20.

Junulo deziras korespondi kun klera junulo aŭ junulino el Sovetio. Sendu viajn leterojn al Ludoviko Speth, München, St. Martinsplatz 9. III. b/Gietl, Germanujo, por junulo.

Tiel malfermu la tubon !



Responda redaktoro: Karlo Bodó

Redaktoroj: Francisko Szilágyi kaj Ludoviko Totsche

Ĉefkunlaborantoj: J. D. Applebaum (Liverpool), A. Behrendt (Berlin), P. Bennemann (Leipzig), M. Beraru (Bucuresti), J. Berger (Köln), M. Blassberg (Krakow), S. Bartha (Budapest), Helmi kaj Hilda Dresen (Tallinn), R. Eichenbaums (Jelgava), Miloš Lukáš (Trnava), Jean Forge (Bydgoszcz), S. Grenkamp Kornfeld (Paris), Parvus Piscis (Budapest), R. Hromada (Praha), Teo Jung (Köln), I. Yurista (Czesztowowa), S. Kamaryt (Bratislava), E. Knutsson (Malmö), I. Lejzerowicz (Lodz), W. Lippmann (Leipzig), Petro Furu (Bucurest), T. Morariu (Cluj), L. N. Newell (Paris), P. Nylen (Stockholm), H. Seppik (Tallinn), Jan van Schoor (Antwerpen), Kenelm Robinson (London), K. R. C. Sturmer (London), R. Schwartz (Paris), Leono Zamenhof, Felikso Zamenhof, Lidja Zamenhof, E. Wiesefeld (ĉiuj en Warszawa), Zahari Zahariev (Sofia).

Avorto: Manuskriptojn la redakcio ne redonas. La rajton, fari en ĉiu ensendita manuskripto stilajn korektojn la redakcio rezervas por si, se la verkiinto aŭ tradukinto anticipe ne protestas. Por la publikitaj artikoloj, faritaj por la rubriko Observo, L. M. pagas sen klišo 10.— pengojn, kun la prunta alsendo de necesaj klišoj 15.— pengojn. La kostojn de la klišosendo kovras LM.

La redakcio akceptas nur unuflanke maŝinskribitajn artikolojn kun sufiĉe larĝaj margeno kaj liniaj interspacoj. Eŝepte tamen estas akceptataj manuskriptoj kun *desegnitaj* aŭ tre klare skribitaj literoj.

VIZITOJ

JULIO BAGHY

Ĉiufoje, kiam mi transpaŝas la limon de lando, nekonata de mi, kaptas min deziro konatiĝi kun ĝia kulturo kaj kun unu aŭ du el ŝies kulturantoj. Ne sole la estimo al la naciaj kulturvaloroj, sed ankaŭ la scivolemo de la esperanta verkisto soifas en mi je novaj impresoj kaj je fremdaj opinioj pri nia lingvo kaj pri ĝia movado. Do, simpla reciprokeco estas la ĉefa motivo de mia ĝojo, kiam trafas min la granda honoro, ebliganta la okazon viziti kaj intervjui kolegojn kaj koleginojn, kies nomojn laŭmerite famigas la amo de iu popolo kaj kies verkoj, kiel juvelgemoj, estas alte taksataj en la literaturo de nacio.

Mia ĝojo estas granda, sed ĝi ŝanĝiĝas je stranga timo, kiam mi ekiras al la renkonto. Ĉiupaŝe vekigis en mi duboj pri la rezulto de la vizito, kiam mi pensas pri tio, ke mi, taglaboristo de literaturo, kies lingvo — preskaŭ sendefende — estas elmetita al moko kaj indiferenteco de dubantoj, mi prenis kuragon por frapeti ĉe la pordo de verkistogigantoj, kies potenco baziĝas sur la preso kaj ĝenerala ŝato de tuta nacio.

Jes, jes, ni esperantistaj verkistoj estas timemaj, ĉar ofte ni havas dubon pri la ekzisto de nia legantaro, pri la vivanta konscio de la esperantistaro kaj estas momentoj en nia vivo, kiam nia laboro ŝajnas al ni *donkijhota* batalo. Nia talento displitiĝas en cent farotajtoj, diversspecaj kaj diversgravaj, kaj ni ofertas nin sur la ŝtiparo, farita de ni mem, por allogi kaj inspiri per nia pereco novajn fortojn, novajn entuziasmajn, eĉ fanatikajn adeptojn. Ne pensu, ke tio ĉi estas riproĉa plendo. Se mi havus cent vivojn, ĉiujn cent mi volonte forbruligus sur tiu ŝtiparo, ĉar granda konsolo kaŝiĝas por mi en tio, ke mia plenumita tasko povos fariĝi ŝtupo por tiu, kiu venos post mi kaj ĉar mi estas konvinkita, ke nia vivanta lingvo iam havos vivantan popolon, kies kulturo alportos valoron por la homaro. Mi firme kredas, ke niaj alvenontaj literaturgigantoj havos famon, ŝaton, kies radikoj etendiĝos ĝis la kompreno de ĉiu popolo. Tial ne grave, ke nun timotremas la koro de niaj kulturelaboristoj antaŭ la pordo de la naciaj verkistogigantoj kaj pro modesteco ilia lango mallerte balbutas la intervjuajn demandojn...


Tiaj pensoj zigzagas en mia kapo, kiam kun samideano Talivaldo Indra mi proksimiĝas al la laborejo de *Janis Akuraters*. Ne sole lia nomo, sed ankaŭ kelkaj el liaj verkoj estas konataj de mi dank' al la esperantaj tradukistoj. Mi scias, ke li apartenas ne nur al la plej altŝatataj verkistoj de la latvoj, sed ankaŭ al la iam persekutitaj pioniroj de la latva nacia kulturo kaj liberecbatalo. La faktoj, ke li estis arestita de la iama rusa reĝimo kaj suferis jarojn for de sia patrolando, en kies nuntempa libera evoluo sama li havas altsignifan rolon, vekis en mi profundan respekton, kiu prave motivas mian kortremeton... kortremeton ĝis la reciproka manpremo. En tiu momento, kiam li rigardas al miaj okuloj kaj mia rigardo surprizite ripozas sur liaj bonkoraj trajtoj, mia kortremo ĉesas... Longan duonhoron ni interparoladas pri la moderna latva literaturo, pri la graveco de la teatroarto en la pasinteco kaj en la estanteco, pri lia verkista agado kaj iom post iom skiziĝas antaŭ mi bildo de vivo, plena de diligenta kaj inspirite plenumita laboro.

Dekvoluma poemaro, dekduo da teatraĵoj, aro da romanoj kaj rakontoj. Tre modeste li parolas pri sia agado, sed fariĝas multe pli elokventa en la konigo

de siaj kolegoj. Li citas nomojn kaj per trafaj vortoj karakterizas iliajn signifon kaj gravecon el vidpunkto de la nacia kulturkreado. Li vekas en mi nekontentigeblan interesigon. Jes, nekontentigeblan, ĉar niaj latvaj gesamideanoj ankoraŭ ne riĉigis nian esp. literataron per la eldono de *Latva Antologio*. Nu, sed ni esperu!

Mi mencias, ke en la esperanta lingvo mi konatiĝis kun noveloj liaj kaj poste mi parolas pri nia literaturo, pri la laboro de niaj verkistoj kaj tradukistoj. Kun videbla miro li atentis pri miaj vortoj. Lia mieno ĉiam pli sereniĝas kaj afable li dediĉas sian foton kun latvaj salutvortoj al *Literatura Mondo*. Ĉe la adiaŭaj momentoj mi demandas lian opinion pri Esperanto. Senpoze kaj senhezite li respondas. En la respondo reliefigas parteto de nobla animo, kiun la jaroj ne katenis al ŝtoniginta konservativismo. Jen liaj vortoj: »La nacioj bezonas kiel eble plej multe da rimedoj por la proksimiĝo kaj Esperanto estas unu el ili. Mi opinias, ke via laboro estas utila por la ĝenerala progreso de la homaro.«


Tallinn. Alia lando, alia ĉefurbo. Ne tiel brua, ne tiel moderna kiel Riga. Nuancon de mezepoka ĉarmo donas al ĝi la altaj turbhavaj muroj, kiuj ĉirkaŭas la la antikvan parton de la urbo. Kurbaĵoj kaj stratoj. Mi admiras la lertecon de la aŭtobusŝoforoj. Jam pasis semajnoj, de kiam la unuan fojon mi vagadis tra tiuj ĉi stratoj, sed kiel la unuan fojon ankaŭ nun surprizas min la ŝento; tiu ĉi urbo ne estas fremda por mi, la homoj ŝajnas al mi jam delonge konataj kaj ĉiupaŝe mi renkontas la intimecon de kufimita hejmo. Ĉu pro la lingva parenceco, konstatita de filologoj? Tute ne! Tiu parenceco por mi ne ekzistas, ĉar eĉ unu vorton mi ne komprenas el la ritmorica parolo de la estonoj. La lingvo estas kaj restos por mi nekonata. De ie, el la fundo de la animo radias al mi tiu varmo, kiu stampas la veran paren-



ĉecon. Mia rigardo emociite karesas la helblondajn harojn de la infanoj, admiras la ĉielbluon de la okuloj, la gracion de la pintaj nazetoj, la sunan rideton de la lipoj, kiuj senvorte parolas pri senpeka petolemo. Atente mi rigardas al la vizaĝo de ĉiu stratpasanto kaj ĉiam la sama penso incitas mian fantazion: mi konas ŝin... mi konas lin... sed de kie? Ne grave! Mia koro pleniĝas je profunda simpatio kaj danko, ke for de mia propra hejmo mi trovis parencon neston...

... La matena prujno grincas sub niaj paŝoj. La suno jam pasas super la kapoj, sed la frostoj ne lasas degeli la blankan saluton de la proksimiĝanta vintro. Hilda Dresen, mia ŝatata estona kolegino kaj mi rapidpaŝe klopodas ĝustatempe atingi la hejmon de Arthur Adson kaj Marie Under, geedzoj kun komunaj zorgoj en la vivo kaj du memstaraj, diversdirektaj steloj de la estona nacia literaturo. Ni parolas pri ilia afabla invito kaj ni konsentas pri pasigo de duonhora ĉe ili, ĉar estas ne dece ĝeni longe la gesinjorojn. Finfine ili ne estas ja esperantistoj, eble ili eĉ ne simpatias al nia movado. Tiel mi ekscias, ke nia tre modesta Hilda Dresen, la plej fervora tradukanto kaj doninto de tuta poemkolekto de Marie Under al la esp. literaturo, ankoraŭ ne konas persone la poetinon. Jes, tiu esperanta-verkista kortremeto... Ni staras jam ĉe la pordo kaj sonorigas. Nur duonhoron!... Jes, nur duonhoron!

Sinjoro Adson malfermas la pordon de la antaŭĉambro kaj salutas nin kun tia vervo, kiu rememorigas al mi la flamkorajn sudlandanojn. Sinjorino Marie Under staras ĉe la sojlo de la salono kaj ŝia mano, etendita por sincera manpremo, ŝia dolĉe ridetanta mieno kaj ŝiaj afablaj vortoj tuj degeligas tiun prujnon, kiu surstrate gluiĝis sur nia koro... Nur por duonhora... pardonu pro la ĝeno, sed... vere granda honoro por ni...! Nur tiaj frazeroj eligas el ni en la antaŭĉambro, kie niaj invitintoj klopodas helpi nin en la forigo de la surtutoj. Komprenoble ni ne lasas helpi al ni. Kaj post momento en la ĉarma intimeco de la salono komenciĝas konversacio, dum kiu la invitoj forgesas pri la jurita duonhora... La temoj varias: kongreso de la Pen-Klubo en Nederlando, naciaj literaturoj, rememoroj pri Budapeŝto, vizitita de la famaj geedzoj, novaj tendencoj en la beletristiko,



teatroarto, reciproka informiĝo pri finitaj kaj farataj laboroj.

Mi forgesas la celon de mia vizito, restas en mi la intervjuaj demandoj, nur tion mi sentas, ke renkontis sin homoj, en kies animo flagras parenca fajro kaj denove mire mi konstatas: mi konas ilin ambaŭ, mi konas ilin jam delonge, mia respekta amo al ili vivis en mi jam antaŭ la konatiĝo persona... Mi parolas kaj parolas. Interpreto apenaŭ estas necesa, ĉar ilia diverslingva scio faras la tradukon superflua... aŭ eble ne pro tio. Eble la vera kaŭzo troviĝas en tio, ke la rigardoj, la sentoriĉaj mienoj pli elokvente esprimas la sentojn kaj pensojn ol la diritaj vortoj...

Sinjoro Adson gastame malfermas botelon da Tokaj-a vino kaj la konversacio fariĝas pli intima kaj nia vizito pli ol *duhora*... Ni invitas ilin al baldaŭ okazonta esperanta festo, sinjoro Adson invitas nin al la unua prezentado de sia nova dramo »La kvar reĝoj«. Li verkas poemojn en sudestona dialekto, sed dum la lastaj jaroj li dediĉis sian talenton por verki historiajn dramojn. Unu el liaj plej populare ŝatataj dramoj temas pri la amikeco kaj amo de F. Kreutzwald, la unua estona poeto, al estona poetino L. Koidula. La teatraĵo profunde kaj inspirite surscenigas la misteron de animoj, amantaj kaj komprenantaj unu la alian malgraŭ la kvardekjara aĝodiferenco kaj la emocio, kiun la verko vekas en la publiko kaj la favora kritiko, kiu alte taksas la verkon, montras, ke sinjoro Adson estas majstro en sia arto...

Ĉu mi parolu pri Marie Under? Nenece. Sia arto estas jam konata de la esperantistoj, kiuj legis kaj povas legi ŝiajn dolĉe melankoliajn poemojn en talentoplena interpretado de nia poetino Hilda Dresen. Mi nur bedaŭras, ke la puraniman rideton de la poetino oni povas reproduki nek per litero, nek per foto...

... Por esprimi sian simpatian al Esperanto kaj al ĝia literatura organo ili afable dediĉis ĉi tiujn fotojn kaj perskribe sendis al mi la subajn liniojn por Literatura Mondo.

»La uzado de Esperanto estas grava sur ĉiu kampo, kie du homoj, ne komprenantaj reciproke la

Kiel savis sin studento Grivenieks

— J. Akuraters —

IV. (Daŭrigo.)

Sinjinoro Biruta Sala estis la homo, kiu multe estis ĝunta de la arbo de sciō. Ŝi estis la dorlotita filino de riĉaj gepatroj, kaj jam antaŭ la mondmilito ŝi ĉarmis sinjorojn de la plej alta socio en Riga, kiel fervora romantikulino kaj senseme varma naturo... Kiam la edzo kun sia fabriko forveturis Peterburgon, ŝi pasigis tie siajn tagojn malproksime de la teruraĵoj kaj zorgoj, dancante kun gvardiaj militestroj kaj laborante en bonfaraj organizaĵoj kaj Ruĝa Kruco. La freneza Kaŭkaza princo Miraŝvili instruis al ŝi la amarton en stilo de sudanoj, sed tio kostis al li multe, ĉar pro duelo, kies kaŭzo estis Biruta, li devis foriri al batalfronto. Fine kiam fondiĝis la virina regimento, la latva burĝa grandsinjinoro iĝis flegistino kaj ne konis por si iajn ajn limigilojn. Sia edzo laboris en diversaj intendantaj organizaĵoj; la mono venis torente: sed la malgrandan Gundabon edukis ŝia patrino. La edzo estis kapabla komercisto, ŝatis hazardludojn, ĉasadon, diboĉojn, sed la edzinon kvazaŭ ne vidis kaj tio donis al ŝi kialon vivi sian propran vivon.

Nun post la mondmilito, kiam Biruta estis jam pli ol tridekjara, ŝi malŝparadis la kolektitajn milionojn por eksterlandaj vojaĝoj, amuzaĵoj kaj intimaj amikoj, kiujn ŝi havis en Riga multajn. Kiam ŝi ekvidis la plenan de naturaj fortoj, mildan kaj naŭvan Grivenieks, kun lia bela figuro, ŝi ĉion forgesis — ŝi volis akiri lin kaj akiris... Neniu, neniu povis kontraŭstari ŝiajn dezirojn. Sia fratino ne plu kuragiis viziti gesinjorojn Sala.

»Ho, se vi sciis,« ŝi flustris al la studento dum intimaj momentoj, — »ŝi ja estas kokainistino, ŝi venenus vin. Ĉiutage mi timas skandalon. Sed ĉe mi vi estas en sendanĝero. Mi scipovos defendi mian honoron kaj — amon. Vi ja amas min?«

Neatendante la respondon ŝi forprenis la vortojn de Grivenieks per kiso, en kiu, ŝajne, interplektiĝis ĉiuj voluptaj sorĉistinoj. Tio estis varmega trinkaĵo por la malvarmeta filo de kamparano. Li konfuziĝis, batalis kun si mem, la unuajn noktojn li pasigis sen dormo, kvazaŭ li estus farinta mortigon aŭ krimon, kiun ĉiuj ekscios kaj li devos suferi de hontiga puno. Li firme decidis diri al sinjinoro Sala, ke sufiĉas, kaj li intencas foriri en sian solecon kaj malriĉecon, por reakiri sian liberecon. Li turmentiĝis kiel Raskolnikov,

pri kiu li multe pensis. Sed kiam en la oportuna momento eksusuris la silko de sinjinoro Sala kaj varma spiro karesis liajn vangojn, manoj ĉirkaŭprenis liajn ŝultrojn, li silentis. En li ekflagris, kiel terura flamo, retenanta forto kaj al li ŝajnis, ke ĉi tiu diablino igas lin satano, kiu ne povas ekzisti sen pasioj kaj infera fajro.

Komence iliaj renkontiĝoj estis mallongaj, ĉar la tuta domo observis ilin. Sed ne vane sinjinoro Sala lernis en la flirtlernejo de la Peterburga societo. Ŝi scipovis ĉion arangi sukcesoplene kaj kun takto kaj esti detenema kaj oficiala en societo, ke la studento povis nur miri.

»Amato, ĉu vi deziras, ke ni renkontiĝu morgaŭ post la teatra prezentado. Mi havas kialon kaj eblecon.«

Aŭ donante al li matengazeton, subite ŝi diris: »Jen la matengazetoj, sinjinoro Grivenieks.« Kaj flustrante per ordona tono, kiel Megero, mallaŭte aldonis: »Je la deknua horo!«

Tio signifis ĉion. Kaj li, obeema kaj senvola, venis je la fiksita tempo kaj sindone me malfermis siajn manojn. Sia rigardo de Meduzo paralizis lian volon. El vivoplena kampara junulo li iĝis nervema, sentema urba dando, kiu aliformiĝis tiel, ke li ofte demandis sin: ĉu li vere estas Johano el bieno Grivas, tie el kamparoj de Vidzeme?

Lia vizaĝo paliĝis kaj malgrasiĝis. Li avide fumis kun sinjinoro Biruta. Ofte li pasigis noktojn en korporacio kaj en drinkado, dezirante kvazaŭ forfuĝi de io aŭ forgesi. Sed en la plej gaja momento li subite ekvidis la okulojn de sinjinoro Biruta; ili konsternis kaj allogis lin; li ekremetis kaj eĉ ne respondis la alvokojn kaj demandojn de siaj amikoj.

Baldaŭ la amikoj ekrimarkis lian grandan aliformiĝon. Anstataŭ braveco kaj naŭvaj popolskercoj, estis indiferenteco, meditemo...

»Aŭdu, vi estas enamiginta,« kriis iu ĉe lia orelo. Grivenieks rigardis lin malvarme kaj vekigis.

»Stultulo!« li insultis kaj drinkis senĉese. Li volis ĉion forgesi.

Li nun povis vivi ekster la domo dum tutaj noktoj. Sinjinoro Sala nur ekridetis. Ŝi sciis sian forton. Ŝi instruis al li novajn kaj novajn sorĉaĵojn kaj li sentis sin ĉiuhore pli firme ligita per ĝis nun nekonataj kaj nekompreneblaj tentoj. Eĉ tage, aŭskultante

gepatrajn lingvojn, komencas interŝanĝi siajn pensojn senpere aŭ par distance (lastokaze ne estas necesaj eĉ du homoj, se unu el ili estas libro).

Pere de Esperanto senteble pliproduktivigis sian laboron kaj afergvidadon la Ligo de Nacioj, ĉiuj kongresoj kaj konferencoj de politikistoj, sciencistoj, verkistoj, profesiuloj kaj ĉiuj fakuloj.

Esperanto kiel lingvo de turistoj kaj vojaĝantoj pruvas siajn gravecon kaj utilecon ĉiuhore, sur ĉiu kilometro, eĉ ĉiu paŝo.

Pere de Esperanto — kies internacia influo kaj disvastiĝo igas egalaj al tiuj de la mezepoka latina lingvo kaj kiu pro siaj facileco kaj demokrateco estas superanta ĝin — ekhavas spiritajn interrilatojn la anoj de plej malproksimaj popoloj. Oni nur traduku, ekz. laponan fabelon aŭ laponan sopirkanton kaj la indiĝeno de Java, parolanta la saman lingvon, tuj ekhavas kontakton kun sia ĉepolusa frato.

Esperanto estas preta servi al ĉiuj popoloj de la mondo kaj ĝi transpaŝas ĉiujn doganmurojn.

Okaze de tia Pan-monda laboro estu salutata Literatura Mondo!

Arthur Adson.

»La plej bona pruvo pri la graveco de Esperanto estas la malnova rakonto pri la malsukceso de la konstruado de la Babela turo. Se tiutempe estus reginta komuna lingvo, ne estus estiginta malpaco de lingvoj kaj malpaco de ideoj, sed pro la interkompreniĝo la turo estus finkonstruita kaj — la mondhistorio eble estus tute alia.

Miaj personaj spertoj pri la utileco de Esperanto estas konataj al ĉiuj legantoj de Literatura Mondo: pro ĉio, kio el miaj verkoj estas tradukita Esperanten, mi ŝuldas dankon al la esperantistoj.

Marie Under.

lecionojn, li sentis, ke en lian vizaĝon fluas fortaj esencoj de la sinjorina vesto, kaj kiel drinkulo dum ĝuado, li malfermis la okulojn.

Kiam proksimiĝis printempo, li preskaŭ forgesis la vojon al la universitato. Li forgesis, ke li devas fari ekzamenojn. Ĝis nun li ilin faris laŭdinde. Nur lia vesto nun estis nova kaj pli luksa; en poŝtuko bonodoris odekolono; li iris revante; en liaj okuloj estis facila laceco kaj sopiro. Li plu ne hontis; li sciis, ke li estas kultura homo, maturiĝinta kaj prudenta. Sed kun teruro li ankaŭ sentis, ke li iĝis senvola, ke nerompeblaj ligiloj sufokas lin, kelia volo estas venenita per ia ebrüiga dolĉeco kaj kuŝas en li, kiel Samsono en malliberejo, kun elpikitaj okuloj.

En tiaj momentoj li kuris tra bulvaroj kvazaŭ volante forfuĝi de io, sed li trankviliĝis nur kiam li ekvidis la belan kaj allogan figuron de sinjorino Sala kaj sentis ŝin kiel opion, al kiu li revenis kun tremanta koro, plivastigitaj naztruoj, avido enspirante ĝin kaj dronante en ĝia ebrüigo.

Sur la skribotablo jam kuŝis du leteroj de Viktoria kaj kelkaj de la fratino. Al ili li ne respondis. Li ne havis plu pri kio skribi. Al li ĉio iĝis fremda. Kune kun tio li iĝis pli sola kaj pli silentema. Lia vivoplena spirito ekvelkis.

Sinjorino Sala havis kaŭzon ĉiam teni la studenton bonhumora kaj tuj rimarkis lian novan animstaton.

»Kio okazis al vi? Kial?»

Grivenieks rigardis ŝiajn lipojn, sed ne ekridetis, kiel dum la unuaj tagoj.

»Tion ni devas ĉesigi...«

»Kion?»

»Ĉion,« li firme diris. »Ni devas hipokriti, mensogi, trompi. Tion mi ne plu povas toleri. Kio okazos al ni finfine? Oni iam ĉion malkovros...«


La sinjorino nur ekridetis. Malkovro por ŝi estis nenio. Momento — ĉio. Sed ŝi baldaŭ sciis kion fari.

»Bone, ankaŭ mi sopiras pli grandan liberecon. Ĉu vi volas, ke ni forveturu?»

»Kien?»

»Jes, suden. La kuracisto konsilos al Gundabo kuracon en alia klimato. Mi, kompreneble, akompanos lin, kaj vi veturos kiel instruisto... Ni estos liberaj, ni ne havos ian ajn gardiston. Ho, vidu, mia amato, mi ĉion povas fari por vi. Kion vi ankoraŭ volas?»

Grivenieks kun teruro pensis pri tia eblaĵo, kiam



A. Ozenfant (el 1925)

(Deformado kaj konstruado)



P. Cézanne,

(Deformado)

li estos fordonita al ĉi tiu diablino kaj eĉ unu momenton ne povos esti libera.

»Ne, ne,« li seke respondis.

»Jes, jes, amato — ni estos liberaj,« ŝi flustris, spirante per sia volupta buŝo en lian vizaĝon, kaj la juna filo de vilaĝano kvazaŭ ebrüiĝis, sentante sian malforton. Li volis forkuri, levigi, forpuŝi ŝin, sed la neforigebla narkotaĵo ebrüiĝis lin kiel ĉiam.

Renkonsciiginte li sentis en si silentan timon kaj sopiron. Sajnis, ke devas okazi io neevitebla, kiu ruinigos lian verdan vivorevon kiel nigra tempesto.

Sed sinjorino Biruta ĉiutage ondiĝis antaŭ li, kiel plena kaliko, en kiu estas kunmiksita morto kaj vivo. Ŝi floris pli bele ol iam ajn, car ŝi havis nur unu celon kaj unu revon — amon kaj pasion. Kaj kiam en la mangoĉambro, kie ĉiuj jam atendis ŝin, ŝi venis susurante per silko kaj ebrüigante per siaj esencoj, per sia elasta korpo kaj stranga ardo sur plenaj lipoj, studento Grivenieks, nerigardante ŝin, sentis ŝian nevenkeblan forton, paliĝis, mallevis malrapide la kapon kaj interrompis la paroladon kun siaj kunuloj. Meduzo, diablino, Venero — ĉio estis en ŝi kune... kaj ankaŭ venena serpento. Ofte, estante sola, aŭ promenante sur stratoj, Grivenieks estis fieraj kaj libera, kaj decidis foriri por montri sian forton. Sed ĉio malaperis en la ĉeesto de sinjorino Sala. Kiel bone estus, pensis li, se ankoraŭ estus monaĥejo, kien li povus rifuĝi. Sed monaĥejo ne estis, nur li mem iĝis monaĥo, kiu kantis himnojn kaj oferis sin kontraŭ sia volo, kiel sklavo al alloga hetajro. Riga donis al li sian mortotrinkujon, dolĉan kaj fortan.

V.

Sinjorino Sala ne forveturis eksterlanden, ĉar alvenis la printempo kaj baldaŭ la somero. La lernejoj oni fermis, kaj gesinjoroj Sala transloĝiĝis al marborda somerloĝejo, kie ĉio estis preparita por somera vivo. Ĝi estis blanka kastelo en la plej bela loko kun floranta ĝardeno kaj zumantaj altaj pinoj. Transloĝiĝis nur la sinjorino, Gundabo kaj la instruisto. Sinjoro Sala, kiel kutime ĉiuj, kiuj estas okupitaj per financaj operacioj, restis en Riga, alveturante nur sabato por pasigi la dimanĉojn ĉe la maro.

Nun ili estis pli solaj kaj la sinjorino ne hezitis eluzi ĉi tiun cirkonstancon. Ŝi ne plu rekonis iajn ajn ŝimigilojn kaj eĉ spitis al ĉiuj, kiuj ion rimarkis.

Aŭdante la potencan zumadon de pinoj kaj bruegon de la maro dum ventotagoj, Grivenieks rememoris la betularbarojn sur la montetoj de Vidzeme kaj sopiroj ekregis lin. Kiaj belaj nuboj tie kuŝis en

ĉiellazuro kaj kiel floris akvolilioj en la lago, kiel zumadis kanoj. Io sankta kaj nobla plenigis lian animon kaj li volis foriri. Sed io per ordonema mano retenis lin. Kio okazis al li, kio ligis lin? Ĉu li estis malsana? Tiajn demandojn li ofte ricevadis el sia hejmo. Sed li, kiel grandulo, kuŝis, ensorĉita de malbona diino, sur fremda insulo kaj ne aŭdis eĉ siajn korbatojn.

Sed venis iu nokto, kiam li rigardis ĝis la profundo de la nigra abismo kaj komprenis, ke al li minacas — morto. Li ekvidis la abismon. Estis jam julio. Tilioj ekfloris. Irante hazarde sur bulvarde en Riga, kien, akompaninte sinjorinon Sala, li estis alveturinta, li komprenis la malproksiman sorĉecon de florantaj arboj kaj iĝis maltrankvila. Io vekigis en li, kiel foje dum jaro vekigas ĉiu floro, kiu serĉas la sunon.

Okazis festeno, kaj alveturis en la somerloĝejon ankaŭ sinjoro Sala kun sia amiko kaj kelkaj sinjorinoj. La nokto pasis gaje. Vino brilis de la palaj fajroj de lampoj, sed ekstere verdeta matenruĝo kuŝis super pinoj kaj maro.

Estis kantoj kaj dancoj, ŝercoj kaj dusencaĵoj. Sinjoro Sala sidis rigardante siajn kunulojn per glaciaj okuloj kaj rakontis sensencajn anekdotojn. La sinjorino sidis inter Grivenieks kaj li kaj ofte ŝi frapadis sian vinglason al la iliaj. Sia rigardo, plena de ebrio kaj pasio, diris al la studento ĉion jam konatan. Ĉio estis en stranga ebruiĝo. Sed la koro de Grivenieks akre doloris. Li restis sobra, kvankam la vino estis dolĉa.

Kaj kiam en frumatena horo la gastoj foriris, li direktis sin al sia ĉambro. En ĉi tiu nokto li estos sola... Silento ĉirkaŭis la somerloĝejon; li jam ekdormis, kiam io tuŝis lian ŝultron. Ĝi estis sinjorino Sala... Kun liberaj haroj kaj brusto, malseketa buŝo ŝi sidis sur la litrando. Ŝi aspektis en la matenruĝo kiel fantomo.

»Kion vi volas?« li demandis timigite. »Foriru, foriru, malprudentulino!«

»Mia loko estas ĉi tie. Mi volas esti ĉi tie,« ŝi diris kaj klinis sin al la studento.

»Sed kompatu! Tio estas frenezo! Via edzo...«

»Mia edzo... Li tute ne ekzistas por mi. Kian

aferon mi havas kun ĉi tiu ebria senenergiulo... Ĉu vi timas lin? Pri tio mi volis ĵus paroli. Diru nur unu vorton kaj li plu ne...

»Kio? Kiu ne plu...? Kion vi parolas?«

»Li ne estos. Tio estas mia afero. Kaj ni foje povos senĝene vivi.«

»Kion signifas ĉi tio?«

Li saltis el la lito kaj sentis sur sia frunto malvarman ŝviton. Ĉu ŝi parolis en ebrio?

»Trankviliĝu, vi, granda infano! Mi opinias, ke sinjoro Sala povas ankaŭ ne revekiĝi. Li ofte dormas eĉ sur sia ŝtuparo en Riga, revenante hejmen. Same kiel veturigisto. Li povas ankaŭ ne vekigi, — tio estas ĉio...«

Ŝi rigardis per sia profunda verdeta rigardo, en kiu ŝajnis ardi inferfajro. Sed la nuda ŝultro kaj brusto elspiradis varmegan vivardon. Ŝajnis, ke ŝia tuta korpo estas volvita en fajro. Diablino — li rememoris malnovajn fabelojn kaj stranga timo ekregis lian animon. Li forte forpuŝis ŝiajn manojn kaj sentis, ke li mem tremas.

»Ne timu, amato,«-ŝi jam parolis tute familiare.

»Vi nenion devas fari. Pri tio zorgos mi. Nun li dormas tiel, ke la horoj apartenas al ni... Sed kelkaj pluaj gutoj kaj li ne plu levigos. Kiel mi malamas lin, dum vi estas ĉi tie... Vidu... Malgranda porcio, sed certa. De tio dependas tuta nia vivo...«

Ŝi nun tenis en la mano malgrandan boteleton plenan de flaveta fluidaĵo. Ŝi aspektis kiel lady Makbet, kiu ĉiujn siajn pasiojn ofertas al sia idolo. Al Grivenieks ŝajnis, ke li vidas fantomon. Songo, nenio pli! Li frotis sian vizaĝon per mano, sed ne povis vekigi.


»Al mi ne plaĉas amo sen danĝero. Ĝi bezonas maldolĉecon... morton... Kaj sciu: — sekretoj plejforte unuigas la homojn. Tial silentu kaj amu min... Ne, neniu havu la kuraĝon stari inter ni! Tiu devas morti. Diru, ĉu vi volas, ke li mortu? Diru! Kaj ne timu. Neniu kaj neniam ekscios tion... Ni forveturos. Ni ne pensu pri vivozorgoj... Kaj krom tio — ni taŭgas unu por la alia. Mi ne forlasos vin...«

Ŝi flustris kvazaŭ ion prisorĉante. El malproksima ĉambro en la alia fino de la koridoro venis ronkado de sinjoro Sala. Fantomboro! Al Grivenieks ŝajnis, ke io sufokas lin kaj premas lian spiron.

»Foriru, foriru,« li flustris ordone, prenis la sinjorinon ĉirkaŭ la ŝultroj kaj puŝis el la ĉambro.



L. Marcoussis (el 1911)
(Deformado kaj konstruado)



H. Matisse,

(Deformado)

»Foriru! Hodiaŭ MI ordonas al vi! Ni parolu morgaŭ!«

»Diru nur unu vorton kaj ĉio estos kiel vi volas,« diris ŝi serĉante lin por kisi.

»Foriru!« li jam premis ŝiajn ŝultrojn kvazaŭ per premiloj kaj malĝentile elpuŝis ŝin el la ĉambro. Ŝi foriris facile balancigante kiel fantomo tra la koridoro — preskaŭ sen vesto kaj ĉiam ion flustris. La studento rapide ŝlosis sian pordon.

Io kuŝis sur la planko ĉe liaj piedoj. La ruĝa silka ŝalo, kiu estis ĉirkaŭ ŝiaj ŝultroj, estis glitinta sur la plankon... En duonlumo ĝi aspektis kiel sango-makulo. Mistika timo kaptis la studenton — li ja ne estis superŝtita, tamen ŝajnis ke iu jam estas mortigita kaj la tuta domo estas plena de sango kaj mortaero. Li malfermis fenestron kaj kun ĝuo enspiris la pinodoron. La maro murmuris kvazaŭ ion rakontante. Ho, Dio! Eble morgaŭ li jam estos kunkulpa en la mortigo. Krimulo, malliberulo!

»Dank' al Dio! Li ankoraŭ estas viva! For el ĉi tiu infero, kie ĉi tiu diablino lin enŝlosis. Li ja estas libera, juna, sendependa! For, nur for!

Li kunvolvaĉis la ŝalon kaj forĵetis ĝin malproksimen en la ĝardeno, kie ĝi restis pendanta sur arbusto kiel brulanta timigilo. Post tio Grivenieks rapide vestis sin. En lia brusto aperis stranga ĝojo, ke li ankoraŭ povas moviĝi kaj vivi. La mantelon li metis sur la manon kaj prenis la malnovan bastonon. Post kelkaj minutoj li jam estis apud la maro. Palruĝaj kaj helaj kiel stano, kuŝis la vastaj akvoj. Freŝa malvarmo venis de la bordo. La ebriiĝo estis for kaj la koro ĝojis. For, nur for. Li rigardis post sin. Neniu sekvis.

Li iris kaj rapidiĝis nesciante kien. Sed ŝajnis, ke ĉio estis nur terura sonĝo kaj nun li vekigis. Li iris multajn horojn kaj finfine trovis sin sola sur marbordo apud maldensaj fiŝkaptistaj domoj. La suno staris jam alte, sed li ne atentis la tempon... Jes, nun li estis libera kaj resanigita. Kia feliĉo! Kaj kvazaŭ respondante al malproksima voko, li ĝaje kriis: jes, jes, mi iras! Per la unua marborda trajno li veturis al Riga.

Estis ankoraŭ frua mateno, kiam Grivenieks eniris sian ĉambron ĉe gesinjoroj Sala. Lin enlasis la maljuna servistino, kiu gardis la domon somere. Stranga timo denove ĉirkaŭprenis la fortan filon de kamparano, kiam li iris tra la ĉambroj. Li havis tian senton, ke tie post la kurtenoj aperos sinjorino Sala por ebriigi lin per siaj esencoj, manoj kaj pasioj, kiel per peza mortigilo.

Dum kelkaj minutoj estis kolektitaj la libroj kaj la malnova ĉemodano. Li fuĝis kiel krimulo liberiginta el malliberejo kaj en malfrua posttagmezo vekigis en la malnova kampara stacio inter montetoj de Vidzeme... Li estis hejme.

VI.

Grivenieks restigis siajn sakojn en la stacidomo kaj ekiris sur la kampara vojo. La suno mallevigis ruĝa kaj varma de taga irado. La spiro de kampoj ĉirkaŭprenis lin per sia freŝa aromo, kampoj, pinoj, betuloj kaj arbaretoj. Ĉe la suda horizonto kolektiĝis densa nebularo kaj strietendiĝis super la kampoj kiel potencaj anĝeloflugiloj, kiujn orumis rebrilo de vesperruĝo. Dolĉa trankvilo kaj herbeja aromo ĉirkaŭprenis lin. Estis tre facile iri la silentan vojon, kiu nerimarkite levigis supren sur la montoj super silentaj domoj. Kiaj maturigintaj kampoj, herboplenaj herb-



A. Modigliani

(Deformado)

ejoj! Jam de longe Grivenieks ĉi tie ne promenis. La koro brulis en stranga mildeco, sed la animon ombris, kvazaŭ nigraj nuboj, la tuta travivaĵo.

Estis sabatvespero. De herbejoj veturis laboristoj... Knabinoj venis kun rastiloj sur ŝultroj kaj kantis; fraŭloj portis falĉilojn. Trifoliamasoj freŝe kunmetitaj hejmece levigis sur kampoj; sur herbejoj bonodoris falĉita fojno. De malproksime milde fluis bruoj. La bojado de hundoj venis kvazaŭ el lagoprofundejo; henis ĉevaloj post la monteto; malproksime knaris veturiloj. Ĉe la horizonto rebrilis fulmo; ie estis somera fulmotondro. Sur montetoj levigis verdbluaj siluetoj de kverkoj kaj silente staris betularbarĉetoj odorante per siaj molaj ombroj. Al Grivenieks ŝajnis, ke li revenas hejmen de malproksima mondvojaĝo, plena de ĉagreno kaj granda ĝojo samtempe. La koro fandigis de mildeco, kiam li pensis pri renkontiĝo kun siaj gepatroj kaj fratino.

Li iris malrapide, enspirante kampodoron. La suno estis subirinta. Tra kampoj malrapide iris varma somera nokto. Kiam li atingis la hejmon, estis jam profunda nokto. Liajn paŝojn ekaŭdis Paŝao, la hejma hundo, kaj laŭte bojante kuris renkonte al li, saltante ĝis la brusto de Grivenieks. El la domo eliris blanka figuro — Elinjo.

»Bonan vesperon!« Grivenieks deprenis sian ĉapon.

»Johano, Johano! Panjo, Johano estas hejme!« ŝi ekkriis kaj ĉirkaŭprenis lian kolon.

La studento sidigis sur la malgranda balkono ĝardenflanke. Ĉirkaŭ li estis floroj kaj bonodoro. En la pomujoj jam pendis maturaj pomoj. En la stalo estis aŭdeble, ke ĝemas kuŝantaj bovinoj maĉante.

La patrino venis el la ĉambro por saluti la neatenditan gaston. Ŝi estis dormanta kaj tial vestis sin facile. La patro ne estis hejme.

Oni eĉ ne sciis kiel akcepti lin. Sed la studento petis ilin, ne maltrankviliĝi.

Li sidigis sur la ŝtona ŝtuparo de la balkoneto.

Poemoj*

— Gustaf Fröding —

Gazelo

La mondon mi rigardas tra la krado.
Ne povas mi, ne volas for de l' krado.
La vivo bolas — kia bela vido!
Kaj jetas ondojn supren al la krado.
Alloge kaj dolore-ĝoje rido
kaj kantoj sonas al mi tra la krado.

Folioj brilas de printempa viv',
malhelaj staras pinoj sur dekliv',
odoro freŝa venas tra la krado.
Kaj sur la golfo, kia brilotrem',
en ĉiu guto estas bela gem'.
Aspektas grandioze tra la krado.

Jen svarmas are ŝipoj kaj velantoj
kun kornmuziko kaj kun gajaj kantoj,
al mont' kaj valo homoj migras for
por gaja festo en printempa glori'.
Mi volas, devas for de tie ĉi,
potence vivo vokas min kaj mi

ne volas sufokiĝi post la krado.
Sed vane frapos mi kaj vane skuos.
La malnovegan, senkompatan kradon
neniam, ho neniam mi detruos.
Fiksita estas en mi mem la krado.
Rompiĝos sole kun mi mem la krado.

La mondo

Maron movis uragan'.

Griza ondarulo ruliĝis sen ĉes'.

»Homon forŝiris la mar', kapitan!«
Ĉu jes?

»Vi povas lin savi ancor', kapitan'.«
Maron movis uragan'.

»Snuregon ni jetos ancor' kun sukces'.«
Ĉu jes?

Griza ondarulo ruliĝis sen ĉes'.

»Li dronas — nun estas li for, kapitan'.«
Ĉu jes?

Maron movis uragan'.

* El: *Frödings samlade skriften* (Verkaro de Fröding).
Eldono: alb Bonniers förlag. Kun la afabla permeso
de la eldonejo.

La fratino metis antaŭ lin malgrandan benketon, kiun ŝi kovris per blanka lintuko. Post tio ŝi alportis bak-
aĵojn kun butero kaj kazeo kaj kruĉon kun dolĉa, an-
koraŭ varma lakto.

Li manĝis kaj rakontis kaj demandis. La pro-
funda silento aŭskultis. Kelkfoje malproksimaj fulmoj
lumigadis la horizonton. Malgrandaj bufoj saltadis
preter la balkono sur ĝardenoĵetoj kaj kvazaŭ kun
miro rigardadis, kiel manĝas la studento.

»Estos pluvo,« diris la patrino, — »jen, saltadas
bufoj!«

»Preparu nun, Elinjo, liton por Johano en la
ĉambro,« diris la patrino.

Sed aŭdante, ke sur la grenejo estas freŝa tri-
folio, Johane deziris tie dormi.

Vintra kanteto

Malĝojas, malĝojas, malĝojas la kor',
pro frostoj tremas steloj en nokta, nigra hor',
la mond' estas frost' kaj malĝojo.
La homoj jen luktadas en blanka neĝo-mar',
kaj falos, frostmortos sur voj' la migrular'.
Ho, kien vi kaj kien tiu vojo?

Kaj ili vidas lumon en malproksima lok',
rapide ili kuras al la silenta vok'
por trovi bonamikojn en domoj
kaj batas ĉiun teren dum la konkura bru',
kaj endormiĝas poste kaj ne vekigos plu.
Ne estu senkompataj, ho homoj!

Priarta teorio

Mi pentradas, donna Bianka,
tiel, ĉar ĝi plaĉas plej al mi.
Je demando, donna Bianka,
diru: »Tio plaĉas plej al li.«

Kaj pedanto Salamanka
certe diras: Mankas pentra bril',
mankas skolo, donna Bianka,
en la art' de Juan, mankas stil'.

Kun hezito flank-al-flanka
en la viv' li ĉiam vagas for,
ĉiun tempon, donna Bianka
same ŝatas la senhejma kor'.

Vivo sana, sano manka
lum', mallumo, rido, plora ĝem'
tute same, donna Bianka
ĝojon donas al pentrista em'.

Realism' kaj romantiko blanka
estas ambaŭ en artaĵ' de li.
Unuecon, donna Bianka,
tie senrezulte serĉus ni.

Al pedanto diru, donna Bianka
ke tiele plaĉas plej al mi,
Estas ĉe pedant' kompreno manka
por gracia arabesklini'.

El la sveda: *Stellan Engholm.*

Li lavis sin kaj prenis de Elinjo kusenon, blank-
an lintolon kaj diverskoloran tukon por kovri sin kaj
surrampis tra la malfermita pordo. En la trifolio estis
odoro de suno kaj floroj. Silento milda kaj pro-
funda kiel la eterneco, kovris la kampojn, kaj ankaŭ
la studenton, kaj li ekdormis en profunda dolĉa dormo,
kian li neniam estis ĝuinta en Riga post orgioj kaj
diversaj pekoj.

Sed frumatene ŝajnis, ke Elio mem veturas per
fajroveturilo. La tempesto disjetadis blankajn fajrojn
kaj pluvego falis torente, refresigante soifantajn kamp-
ojn. Al Grivenieks ŝajnis, ke la fulmo persekutas la
pasian diablinon, kiu en formo de sinjorino Sala en-
sorĉis lian animon... Ne, ŝi ne plu estis. Ŝi ne povis
logi en la regno de naturo, fulmo kaj kampoj. Ĉar

Poemoj

— Alessandro Mazzolini —

Nokta sunhorloĝo

Dormis graf' dum tempo multa,
nun pri l' horo li scivolis,
kaj al la servisto stulta
li parolis :

»Sur la sunhorloĝo doma,
Sam, rigardu do, kioma ?«

»Grafa moŝto — Sam rediris —
mi ĝin vane okulumas,
ĉar la suno jam subiris
kaj mallumas.«

»Ho, vi, vera bruto kampa,
Vidu ĝin ĉe lumo lampa !

Fino de avarulo

Jen lasta hor' de l' avarul' malpia.
La pastro diras al li dum prezento
de peza krucifikso el arĝento :
»Rigardu tion ĉi ! Jen savo via !

Grandega estas la boneco Dia !
Plenigu vian koron do la sento
de la sincera, pura, vera pento,
»Spes mea, Christe« diru ! La alia,

latinan lingvon tute ne sciante
pripensas : »Krist' ? Spesmilo ? La rilaton
mi ne komprenas.« Sed, ĉar li konstante

cerbumas pri l' profito kaj utilo,
li diras : »Havas la arĝent' rabaton,
do kontentiĝu per duonspasmilo.«

tie regis nur Dio, suno kaj trankvilo.

Konvinkiginte, ke li vere estas en sia hejmo kaj ne apud sinjorino Sala, li denove profunde kaj dolĉe endormis kaj vekigis nur kiam la somera suno forte ardis super la kampoj.

En antaŭtagmeza dimanĉa silento, vento zumadis en la ĝardenarboj. Grivenieks ekaŭdis voĉojn en la korto malsupre.

»Viktoria, Viktoria, Johano alveturis !« vokis Elinjo al la gastino en la korto. Ceterajn vortojn li ne aŭdis, sed sentis, ke li ruĝiĝas, nekomprenante kial. Ree ili parolis pri li.

»Tie supre, en la nova trifolio ! Rigardu kion li tie faras. Estas la tempo por leviĝi. Iru kaj tiru lin je la piedoj por ke li vekigu. Certe, li estas lerninta en Riga longe dormi,« daŭrigis denove la fratino. Klara voĉo respondis kaj mallaŭte ekkrakis la ŝtuparo. Li tuta ekstremitis, sed en sekvanta momento en la vaste malfermita pordo aperis Viktoria, hela, brilanta kaj ridetanta, iom hontema, sed plena de ĝojo. Al la studento ŝajnis, ke li reviviĝas, kaj Viktoria forigas ŝtonon de lia tombo. La koro ekĝojegis, kiel liberigita torento.

Dum momento ekbrilis la penso, ke ĉi tio jam foje okazis. Eble li estis Peer Gint el fabelo, aŭ iu alia, katenita per inferaj sorĉaĵoj, kaj tie venis la suno... Ĉu ŝi estis Solvejg aŭ Laimdota*) aŭ princino el »Mil kaj unu noktoj« ? Ne, ŝi estis io pli grava. Neniam kaj nenie tio ripetigis. La kampo kaj arbarprincino de Vidzeme kun sunkrono sur la kapo kaj kun okuloj de Dia lago.

»Bonan matenon !« ŝi laŭte diris kaj donis la manon. Kiel bela ŝi nun estis. La studento ekflamis de ĝojo.

»Viktoria, bonan matenon, bonan matenon !« li respondis kaj kovris la okulojn per la mano. Lin sufokis ĝojo, ĉagreno, feliĉo.

Ŝi sidigis en trifolio tute proksime de Grivenieks kaj ekrigardis lin homteme ridetante. Siaj piedoj estis nudaj, kaj ŝi portis facilan somerveston.

En la brunete-flava vizaĝo ridis lipoj kiel rozkolora mateno. Kaj la delikataodoro de virina korpo, sen esencoj, ebruiĝis la studenton, kiel en sonĝo. Kiaodoro ! Kiel dolĉa devas esti la trinkaĵo, se la kaliko tiel bonodoras. Kaj la unuan fojon li ekkomprenis la sorĉaĵon de virina korpo, — la sorĉaĵon, — kiun li neniam estis sentinta kaj kompreninta en la ebruigaj esencoj kaj pasiaj manoj.

Sia brusto timeme ondiĝis sub la facila vesto, kiam ŝia malmola kaj malgranda mano tuŝis la manplaton de la studento salutante...

Ilia interparolado estis mallarkaga, be'la kaj delikata kaj, kisinte ŝiajn malvarmetajn lipojn, en kiuj estis multe da juna kaj varma forto, Grivenieks prenis la knabinon en la sinon, atenteme, kvazaŭ ŝi estus lia propra vivo.

»Viktoria, Viktoria, kial mi alveturis ? Por preni vin kun mi ! Mi forveturos nur kun vi, aŭ neniam plu. Post du jaroj mi finos la kurson kaj tiam ni loĝos nur ĉi tie. Neniaj diablinoj kuraĝos sekvi nin.«

»Estu pli silenta, Johano, oni tie povas nin aŭdi,« ŝi flustre diris kaj premis sin al Grivenieks.

»Aŭdu ĉiuj ! Nun mi scias, kion mi bezonas,« kaj li metis sian nigretan belan kapon en ŝian sinon, en la sinon de l' savantino kaj de l' eterna virineco...

Ili sidis nun en la malfermita pordo, unu apud la alia. De sur la monto estis videbla la vasta kamparo kun nigre-verdaj betularboj kaj domoj. El la korto, vento portis odoron de florantaj tilioj : kriis birdoj en laŭta gojo kaj bluis la cielo, ornamita de tempes'oj. Kreskantaj, altaj kaj blujaj nuboj naĝis potence en la vasta ĉiellago, facile, kiel pensoj de Johano Grivenieks...

Li firme tenis la manon de Viktoria, ĉar delasi ĝin ŝajnis al li droni denove en la inferon...

Hirundoj sidis en vico sur la gruo de la putokaj pepis facilan somerkanton.

Kiel bone estas ekkomenci sian vivon denove, pensis Grivenieks, aŭskultante la varman kaj facilan spiradon de Viktoria kaj la ĝojan ritmon de ŝia koro.

(Fino)

El la lava, kun aŭtora permeso :

A. L. Goba

* Laimdota : heroino de latva poemo.

La sortotragedio de Florian

— Francisko Szilágyi —

I.

La sortotragedio de Florian estas tre melankolia historio... Sed eble vi ne konas mian amikon?

Florian estas unu el la plej simpatiaj buboj; nu li iomete forlasis jam la bubarojn, sed li estis mia kunulo en la lernejo kaj... tiuj kelkaj jaroj vere ne gravas, ni estas kaj estos ĉiam junaj, ĉu ne Florian? Sed Florian, tiu ĉi ĉarma rondvizaĝa idealo de la filistroj hodiaŭ estas okulfrappe melankolia. Mi ankoraŭ ne diris, ke Florian antaŭ kelkaj jaroj edziĝis kaj de tiam li malaperis el mia amika rondo, kiun de tago al tago pli malgrandigis la ĝenerala krizo, la maldungiĝo de kelkaj, la zorgoj, la edziĝoj kaj aliaj malbonoj, pri kiuj nun mi ne volas paroli. Kial? Ĉar antaŭ mi staras la malfeliĉa Florian kaj lia malfeliĉo povas forgesi ĉion alian. Lia afero tute ne estas bagatela! Ne, li ne perdis sian bonan postenon, li havas rilatan trankvilon en la financaj aferoj, sed...

II.

... sed Florian, ne ploru... parolu, kio okazis al vi? Ĉu via edzino estas malsana? Sed ne ploru! Ĉu ŝi mo...

— Bovo vi estas — respondis Florian kaj mi ĝojis pro la trankviliga respondo.

— Parolu, parolu, Florian! — mi instigis la amikon.

— Do, mi parolos kaj vi povos vidi, ke ne nur la antikva vivo produktis sortotragediojn. Mia tragedio estas la plej funebra atenco de la subaj aŭ supraj potencoj kontraŭ senkulpa homo. Sophokles ne havis fantazion prizonĝi ion similan kaj Aischylos...

— ... ploreĝus, se li aŭdis vian tragedion.

— Jes! — diris Florian.

— Florian, parolu, ne murdu min per viaj longaj paŭzoj. Ĉu vi estas eble sekreta, moderna dramverkisto? Mia kara, parolu do!

III.

— Ĉu vi scias, ke mia edzino forlasis mian domon?

— Terure! Sed, kial?

— Pro tiu Sabo.

— Ĉu via edzino amis sinjoron Sabo?

— Sed kion vi pensas, hontu!

— Mi pensas, ke vi freneziĝis. Kiu estas tiu Sabo?

— Ankaŭ mi scias nur malmulton pri li. Li estas provinca ĵurnalisto, kelkfoje li vizitas la ĉefurbon, antaŭ kelkaj jaroj li estis en Parizo kaj li tre ŝatas la trinkaĵojn, en kiuj estas forta alkoholo.

— Kaj...?

— Mi ne komprenas vin — diris mia amiko — kion vi volas per tiu ĉi stulta »kaj«. Mi diris jam ĉion pri li, kion mi scias.

— Mi esperas, ke tamen vi freneziĝis kaj ne mi. Florian, provu paroli kompreneble!

— Do bone, mi parolos, sed ne plu embarasu min per viaj stultaj interdiroj...

IV.

— Lun belan tagon; antaŭ tri semajnoj mi iris malrapide kaj meditante hejmen. La apudbulvarda strato estis tute blanka, neĝeroj faladis dense, bele, rave, kiel... sed tio ne gravas... la neĝo falis kaj la blanka, mola, brila tapiŝo kovris la trotuaron. En la moleco de la vintro la strata vivo obtuziĝis, la bruo forfluis, ĉio eksonis tra sordino kaj la tuta tagmezo estis stranga, senversajna, ĉarma. Kaj mi pensis, ke la preterpasantoj, kies ĉifonojn

kovris la brilantaj neĝeroj, eble forgesas la ĉifonojn pro la blanka brilo, ĉar ili ridetis, kiel mi mem ridetis al la petolaj, tiklaj neĝlanugoj. Miaj pensoj aperis same obtuze, kiel la tuta ekstera, mondo kaj en tiu ĉi pastela momento aperis en mia mondo la figuro de Steĉjo Sabo.

Li estis afabla sinjoro, juna persono, kiu ĝuste en la momento de mia unua renkonto, malhavis la certan aplombon, kiu cetere karakterizas la ĵurnalistojn. Kvankam lia aspekto ne respegulis la maturan ekvilibron, mi ne supozis, ke tiu ĉi balancira figuro de la vintra tagmezo ekirigos sortotragedion, kian prizonĝis nek Sophokles...

(... nek Aischylos — mi diris.)

Sinjoro Sabo marŝadis iomete malrekte, li fajfis petoletar kanton kaj lia vojo similis al tiu de la hundoj, kiuj same zigzage, malŝpareme uzas siajn piedojn por proksimiĝi al la aktuala celo. Kaj krome tiu ĉi neĝkovrita trotuaro. Oni ne povis aserti, ke sinjoro Sabo ne trinkis dum la nokto, eĉ... Li puŝis min, poste li zorgeme frotadis sian surtuton, kvazaŭ mi estus pesta, aŭ eble li timus alian epidemion, kiun mi evidente havas. Mi forrapidis. Sed li estis la delegito de la nigraj potencoj kaj alkriis min:


— Haltu! — poste — Bitte, mein Herr! — Monsieur! Domine... Sinjoro, ĉu vi ne parolas esperante?

Vi scias, ke mia plej reagema punkto estas Esperanto. Mi haltis. La fatalo proksimiĝis. Steĉjo venis kun brila vizaĝo:

— Mi estas Steĉjo Sabo, ĵurnalisto el K... kaj ebria hipopotamo...

Min memoroj ekkaptis. La junulo ŝajnis simpatia tra la nebulo de la ebrieco kaj tra la vualo de la vintra tago. — Ho, juneco, ho la juneco...

— Vere mi ĝojas — mi respondis.



Stanislao—Grabowski

(Negcometria konstruado)

— Nu vidu, vi estas mia plej kara amiko. Venu kun mi.

Ni ekiris brak-enbrake.

— Kie vi estis? — mi demandis.

— Vi eraras, mi ne estis, mi estadis.

— Pardonon, kie vi estadis?

— Sed tion mi jam forgesis.

Mi ne volas rakonti al vi tute detale la interesan dialogon, kiun kelkfoje plivigligis la bonhumoraj preterpasantoj, sed vere mi amuziĝis bone kun Steĉjo, kiu estis brava bubo, kaj li aspergis malavare la trezorojn de sia zigzagvoja spirito. Li rakontis al mi, ke li amas belan fraŭlinon, ke li estis en Parizo, ke li estas ĵurnalisto kaj ebria hipopotamo, ke li amas ankaŭ min kaj li volas min kisi, ke ni devas estis fratoj. Perforte li tiris min al iu subpordego kaj tie li solene ekparolis:

— Jen ni estas fratoj. Kaj nun ni duonigos miajn havaĵojn. Kiom vi havas?

— Mi havas nenion — mi diris — kaj vi?

— Ankaŭ mi same — li respondis melankolie — Tamen... donu al mi tion... (Mia nomkarto falis al la tero.)

Ni ŝanĝis nomkartojn. Steĉjo havis mian nomkarton.

Tre malfacile mi povis forlasi lin, li volis min kisi, eble centfoje. Li ne volis min adiaŭi, ĉar la adiaŭsaluto estas la plej malgaja io en la homa vivo... Fine li tamen foriris kaj mi povis rigardi finfine la balanciĝantan, iom post iom malaperantan figuron de mia nova frato.

V.

Mia nova amiko malaperis kaj mi, facilanima homo, tute priforgesis lian ekziston. Post kelkaj tagoj mi forvojaĝis al la provinco, aranĝi miajn oficialajn aferojn. Poste mi revenis kaj ĝuis la plezurojn de la revido post la unua foresto de mia juna edzino.

Sed nun mi devas paroli pri tio, kion faris dume la delegito de la nigraj potencoj. Tion ne li rakontis al mi, sed mi povis konkludi ĉion, ĝis lia alveno en mian ĉambron.

Steĉjo denove vizitis kelkajn popolamuzajn institutojn, kie oni povas forgesi la tagajn malbonojn kaj li denove primeritis la titolon: ebria hipopotamo. Eĉ, ĉio-kaze li superis sin mem kaj ĉirkaŭ la noktomezo li havis nur tiom da konscio, ke li transdonis lian nomkarton al iu bonkora preterpasanto, petante lian bonvolon. La afero okazis en la proksimo de mia loĝejo kaj la afabla bonkorulo gvidis lin al mia loĝejo, ĉar kompreneble, lia nomkarto estis la mia, kiun mi lasis ĉe li facilanime, okaze de mia interfratiĝo. Tiel proksimiĝis la sortotragedio al mia silenta litĉambro. Steĉjo alvenis kun fremda apogo kaj subteno kaj tiel obstine li montradis mian nomkarton, ke la domzorganto lasis lin enveni, eĉ li montris la pordon de mia loĝejo. Post kelkaj minutoj li jam estis en mia loĝejo...

(Atendu, atendu — mi interparolis — kiel li povis eniri tra la pordo?)

— Denove tiuj stultaj demandoj — diris Florian — mi jam diris al vi, ke sinjoro Sabo ne estis homo, li estis superhoma delegito de la supraj, aŭ subaj potencoj. Mi ne scias, kiel li envenis, eble la hazardo — la patrino de la historio — helpis al li — eble li havis bonan ŝlosilon, eble ni lasis malslosita la pordon, aŭ li venis tra la ŝlosiltruo, mi ne scias, sed fakte li estis jam en la apuda ĉambro kaj...

VI.

Tiun vesperon ni malfrue enlitigis kaj la dolĉa sonĝo rapide surflugis miajn okulojn. Mi havis belan sonĝon. Mi jam ne povas rememori, kio okazis, sed mia edzino kaj mi havis flugilojn kaj ni petoladis en bela



Stanislao—Grabowski

(Negeometria konstruado)

ĝardeno, do estis tute tolerebla sonĝo, kiam en la mezo de la paradizo mi vekigis, ĉar la pordo knaris forte, minace kaj simile al la trumpeto de la lasta prijuĝo. Samtempe aperis lumstrio. La lumstrion kaŭzis, ke mia amiko lumigis la alian ĉambron kaj tie li senvestiĝis dece.

Sed ĉion ĉi mi ankoraŭ ne sciis, mi sciis nur tion, ke la pordo eknaris, ne kompetente kaj estis embarasa lumstrio kaj en la radio de la lumstrio aperis ne tro konfidinda persono — en pantaloneto laŭ la plej nova modo de Ghandi. Mi ne estas malkuraĝa homo, tamen la sango frostiĝis en mia vejno. La fatalo proksimiĝis al mi. La nokta gasto faris kelkajn paŝojn tien kaj reen — mian gorĝon premis teruro, mia edzino dormis dolĉe. Fine li alvenis mian liton kaj la vira kuraĝo revekiĝis en mi. Perforte mi forŝovis la palpantan manon.

— Sed lasu, kion vi faras — demandis konata voĉo.

Mi eklumigis la ĉambron kaj mi ekkriis, rigide pro la surprizo.

Jes, li estis Steĉjo, li senĝene okupis en la sekvinta minuto la duonon de mia lito. Li ne havis tro klarigeman humoron, tamen li sukcesis veki per sia ne tro diskreta konduto mian edzinon. Si ege miris, pro la duobligo de la viroj en la litĉambro, demandis sekvis demandojn kaj la respondoj ankaŭ de mia parto estis iomete konuzaj. Okazis aludo pri stranga interkonatiĝo, pri frateco, poste Steĉjo konfesis, ke antaŭ kelkaj tagoj ni trinkis kune kaj ŝi aludis pri iu belulino... Versajne la bona bubo eraris.

Kaj mia edzino diris:

— Vi mensogis al mi! Vi diris, ke vi vojaĝas al la provinco! Ho, mi malfeliĉa!

Mi balbutis. Mia edzino ploris. Steĉjo dormis trankvile kaj nevekeble.

La sekvan tagon nenio klarigis, ĉar la disputo daŭris dum la tuta nokto en la diversaj ĉambroj kaj lokoj, kien mi sekvis mian fuĝantan edzinon. Si kredis nenion el miaj vortoj. Ni disputis ĝis malfrua mateno kaj kiam ni revenis en la litĉambron, Steĉjo jam malaperis tiel sekrete, kiel li venis. Nur unu el la ŝtrumpoj kaj kelkaj korkoj perfidis lin. La delegito de la superaj aŭ subaj potencoj plenumis sian devon, kaj li jam foriris. Kaj mia edzino forlasis min, ŝi volas vidi min neniam plu, min la alkoholiston, la diboŭlon, la friponon, la portanton de aliaj samvaloraj, elokventaj titoloj. Kaj mi ne povas kontraŭfari. Mi ne povas kontraŭstari mian oferiĝon, mi mortos, kiel viktimo de antikva sortotragedio, la viktimo de la subaj aŭ supraj potencoj. Ĉu mi ne ploru?

— Sed jes! — mi diris.

Li ploris. Ankaŭ mi havis larmojn en miaj okuloj.

K. Kalocsay: Strecita kordo

— Ludoviko Totsche, Budapest —

(Daŭrigo.)

Se ni foliumas la Strecitan Kordon, iom post iom formiĝas en ni la impresoj, ke ni ne legas poemojn hazarde apudmetitajn, sed ke ili kontinuas unuece. Ankaŭ la cikloj estas tiel ordigitaj, ke ili donas al ni la bildon de ĉiam pli larĝhorizonta evoluo. *La eĥo de la forta voko*: unua renkontiĝo inter la poeto kaj Esperanto, entuziasma ardo al la Nova Sento, amara senluziigo, denova fido. *La enfalinta mino*: sopira rememoro sur la sojlo de l' Vivo, en du poemoj (Se ekbrulus..., Silente, nigre...) fulme ekbrilas kaj forvelkas amo juneca, ilin sekvas la maldolĉaj kantoj de l' trompiĝo, spleno, individua mondĉagreno, poste spita sinturno al la »farsa rimo«, al la »ĝojsafideto« loĝanta en la koro, sed ree refalo en la solon, en la ĉagrenon, dum la senteman koron de l' trista poeto ektuŝas la komuna sorto (Homo, Ve). *Aglo kaj kolombo*, *Korprintempo*: nova amo, nova feliĉo. Sed la poezio de l' feliĉa amo estas unu-sona, ĉiu verso volas finiĝi per la rimo: Mi vin amas! Tio estas neevitebla kaj tial la poeto rezignas pri plua priakanto:

»Cu skribi pri l' am' papere,
Per aĉa inko? Ja prefere
Sur neĝo de viaj ŝultroj brilaj
Per fajro de lipoj maltrankvilaj.«

La rigardo de l' poeto nun direktiĝas al la ekstera mondo. Komence la fenomenoj de tiu ĉi nova sfero resonigas kordojn en la interna mondo, en la animo. La poemo pri senespera amo de l' popoloj en aleo ekfrapas melankoliajn akordojn. Sed la poeto jam traktas la temon iel *elektstere*, iel superce: kun la objektiveco de l' artisto.

La sekvantaj poemoj anoncas plenan fortunigon de l' interna mondo. Hi raportas pri serĉado de temoj, vojoj, formoj, pri elprovado de ĉiam pli perfekta verstekniko. Ne estas do mirinde, ke inter ili regas la soneto, la formo plej malfacila, do plej avidinda. Pure parnasaj poemoj estas la sonetoj pri la jarsezonoj. Ĉi tie uzas Kalocsay la elizion de l' adjektivo (en la tuta libro nur unufoje):

»Last horojn nun vivas la granda Naturo«, eble por praktike suriri la vojon, kiun li aliloke konjektas tiu de l' estonto (Lingvo Stilo Formo). La soneton *Printempo* mi trovas iom laca, precipe pro la ne tre sukcesa finiĝo. La aliajn tri mi opinias perfektaj pecoj. La soneto *Mondhavano*: grandioza panoramo pri tondranta spirego de moderna Babelo, kolosa vizio pri homformikoj perdiĝintaj en la haoso de l' teknikaj mirakloj, kaj fine apoteozo pri la trankvilo de l' kampoj, kun tia forto de l' esprimo, ke la finaj versoj longe elsonoras en la senfinon:

»Persekutate kvazaŭ de nevidebla skurĝo,
Skuate de la febro de senkompata Urĝo,
Kuradas ili: perdis la benon de l' Trankvilo...«

Dum lace pro la vido mi fermas la okulojn:
Mi vidas: en sunbrilo sur freŝajn terobulojn
Kun gaja fajfo paŝas kampulo post plugilo.«

La vojaĝo al Finnlando inspiris la poeton pri du poemoj. En la ĝisnunaj versoj la naturaj bildoj ne estas fiksitaj al certa loko, ili restis ĝeneralaj. Sed en

tiu ĉi versoj la poeto starigas antaŭ niajn okulojn realan pejzaĝon. *Wallinkoski*: gvidas al la pinborderita mondo de l' finnaj akvofaloj. La poeton irantan laŭ la bordo de rivero superregas la legenda atmosfero de l' mirinda ĉirkaŭaĵo: sur la trankvilaj ondoj de l' rivero aperas vizio, Väinämöinen sidas en boato, la blonda Aino ridas sur la bordo, la aeron dolĉe tramigras la ama kanto, la sensoj luliĝas en sorĉan songon... Subite la ritmo ŝanĝiĝas, la pacajn trokeojn anstataŭas brutalaj anapestoj anoncanta la proksimiĝon al la akvofalo. Kaprice saltanta ritmo, riĉa frapado de duraj rimmarteloj prezentas al ni la miraklon de l' naturo. *Sur la Saimaa*: la Saimaa estas rivero, kiu kunligas la mil lagetojn de l' finna lagomondo, sur la lagoj estas insuloj, post la insuloj ree rivero, poste ree lago kun insulo... Kaj se vi staras sur la antaŭo de l' ŝipo, vi vidas, ke

»... en la blua helo
Lagon kisas la ĉielo«,

kaj vin atakas la neniam satigebla deziro: serĉi la fabelan landon de feinoj: la landon de l' feliĉo. Feliĉa esprimo de l' eterna nostalgio al la nova, nekonata kaj ĝuste tial mistera kaj altira:

»Eble tie, sur ĉi bela
Insulet' la bord' fabela
Nin atendas, ĝuste nin...«

En tiu ĉi ciklo kun brila armilaro ekparolas la ironio de l' poeto. *La kripla Pegazo*: akre, senindulge kaj sprite vipas la fuŝpoetojn, tiom oftajn en la movado. Dum ĉi tie Kalocsay celis nepre komikan efekton, la *Veoj pri la asonanco* enhavas iom da persona amaro. Ĝi estas dediĉita al certaj kritikistoj, kiuj — eble pro nura lingvoteoria vidpunkto, eble pro individua malŝato — volas toleri en Esperanto nur purajn rimojn kaj estante surdaj al la poeziaj kaj lingvaj belecoj de la Kalocsay-poemoj, serĉas la kaŭzon de sia surdeco en la rimoj de Kalocsay. Kompreneble la poemo brilas per la plej perfektaj puraj rimoj!

En la *Ezopa fabelo* ni retrovas la konsekvence



Stanislaw—Grabowski

(Negeometria konstruado)

kondamnan sintenon kontraŭ la militarismo. Anstataŭ la malespere dolora kaj profete entuziasma tono de l' junago, la viro vestas sian prijuĝon en la simplan, ironian mantelon de l' fablo. Ĉiu lernolibro devus enhavi tiun ĉi juveleton de nia literaturo.

La paralelaj sonetoj: *Familiopatro*, *Maljana fraŭlo* kun kruela reflektoro jetas lumon sur ambaŭ sortojn. Sed la parnasan *impassibilitè* jam trakolorigas ia kompatema kunsento. Kalocsay nur provizore estis adepto de l' parnasa skolo, li alproprigis ilian kulton al la formarto, sed rapide preterpasis ilin. La transiron al temoj pli proksimaj al la sentimenta vivo de l' poeto vojsignas la *Tragedieto*: sur batalkampo trafas etan birdon la *stulta kuglo* kaj la soldatoj, kiujn krudigis la senfina batalo, per subita ekfulmo de l' kompatemeta demetas la malgrandan korpon en tombeton:

»Jen kuŝas kantisteto en la heroa mort'!»

Kalocsay amas la infanojn. Kiam li parolas pri ili, lia lingvo survestas ian ĉarman tenerecon. Kaj li estas bonokula observanto. Kiam li prezentas la *Infanojn ĉe montrofenestro*, ili staras antaŭ ni en sia plena realo, kun siaj infanaj ĉagrenoj kaj spitoj. La poemo estas tre konvena por deklamado. Kaj ĉi tie mi volas noti, ke preskaŭ ĉiuj Kalocsay-poemoj estas sukcese deklameblaj, se inteligenta artisto eksperimentas per ili. Jam estas tempo, ke ni aprezu niajn valorojn! Se iu kontraŭjetos, ke nia publiko rekrutiĝas ĉefe el ankoraŭ neperfektaj esp.-istoj, por kiuj kelkaj el tiuj ĉi poemoj eble estus malfacile kompreneblaj, mi povas respondi nur: unue ni ne tro malalte taksu la lingvokonon de nia publiko (moda malsano nuntempe!), due ni kutimigu la neperfektulojn al la ĝuo de la pli alta, do memkompreneble pli malfacila literaturo.

La koron de l' poeto trafis la antaŭvento de ia eksterordinara feliĉo. En la obsedo de tiu mistika stato li iĝas pli perceptema por la sorto de la aliaj. Li hontas pro la senpovo, kiam li vidas la *Palan Procesion* de l' grandurbaj knabinoj destinataj por kor- kaj vivĝojmuelaj horoj en la fabrikoj kaj kontoroj. Nun per majesta himno sin turnas la poeto al la *Patrineco*. Kiu ajn nacia literaturo rajte povus envii Esperanton pro tiu ĉi poemo! La poeto venis tiel proksimen al la kompreno de l' knabinaj sentimentoj kaj eĉ de l' knabina korpo, kiel tio entute eblas por viro. Nek unu superflua vorto, nek unu pli malforta linio, nek unu pli pala bildo troviĝas en tiu ĉi senmakula panegiro. Ĝi estas verkita per perfekta preteco de l' artisto, sed ĝia voĉo estas pura kaj simpla, kiel tiu de l' Biblio. La enteksita soneto estas aparta ĉefverko:

»Mallerte sian ŝarĝon sub la koro
Ŝi trenas time, kun ŝirmanta brako...
Komika vid'... Sed super ŝi, el oro,

Mi aŭreolon vidas en imago.
Jen iras kontraŭ tempon de do'oro
Heroineto de la Sesa Tago.«

AHASVERO DE AMO.

La tuta ciklo formas *unu* poemon, en ĝi estas rakontita la historio de *unu* amo. Post la spritaj prologoj la heroo de l' poemoj plendas pro la malvarmiĝo de sia amo. Vane uzas la amatino sian plej potencon armilon, la larmon, vane alarmas denove la printempo, la heroo devas konfesi, ke ankaŭ lia amo ne evitis la komunan sorton de ĉiu amo: la enuon. Li ribelas kontraŭ tiu ĉi fato:

»... Kial la am', se ĝi ne povas
Eterne daŭri?»

Sed jam ĉesas la hezito, li rapide decidas la disiĝon. Nun subita ŝanĝiĝo de l' tono, la libera malligiĝo de l' koro elvivas sin en laŭtaj jubiloj. La heroo jetas sin en la diboĉajn plezurojn de l' libere elektitaj ĝuoj, sed baldaŭ li konsternite rimarkas, ke li ree estas katenita. Kun la sento de furioza senpovo li turnas sin kontraŭ la amo, lia subjuganto, kontraŭ la virino, la eterna malamiko. Kaj obsedas lin infera venĝemo: la virginan purecon li volas treni al la amgeheno, por ke:

»... Vizaĝo via ĉasta
Iĝu virinvizaĝo kun peka mark' de l' Scio.«

Sed venĝo ne helpas la propran malfeliĉon. Kun similita ironio, sed kun interna envio li rigardas la feliĉon de tiuj, kiuj saĝe kontentiĝas pri la konstruita nesto. Li sentas sin malbenita Ahasvero, destinita por

»Konstrui neston, sed neniam nesti.«

Lin tentas el la pasinto la bildo de l' feliĉo, kiun li mem disŝiris, sed vane:

»Sur mia koro staras skribo nigra:
Lasciate ogni speranza, voi ch' entrate.«

Novan ekflamon de l' karno sekvas la pripento. La *bona amo* kvazaŭ varma talaro lin ŝirmis kontraŭ la furiozo de l' mondo kaj li perdis ĝin... Kun sincera pentofaro, kiel la disipa filo, li revenas al la amatino, ĉar li rekonis, ke sole la kunfandiĝo en la pura amo povas alporti la savon, la liberiĝon, li rekonis, ke *unu* estas pli multa ol la *multo*.

Ĉu tiu ĉi *happy end* estas la definitiva solvo de l' problemo? Ĉu la amo ne signifas ĉiam nur katenagon? Ĉu Budho ne venis pli proksimen al la solvo, kiam li predikis la forturniĝon de ĉiu amo: El la amatino devenas la sufero, el la amatino devenas la timo: kiu tute forŝiriĝas de l' amatino, tiu ne suferas, ĉar kion li timus? La problemo, kiel ĉiuj eternaj problemoj havas plurajn solvojn. La poeto per la nesuperebla perfekteco de l' matura artisto prezentis la sian. Kalocsay estas sendube la plej profunda amkantisto de nia poezio.

EBRIA EKVATORO.

La animo de l' poeto, plena de individua feliĉo, vastiĝas por surpreni la ŝarĝon pri la sorto de l' homaro kaj universo. Tiu ĉi ciklo atingas tian altan gradon de l' poeta esprimpovo, tian filozofan profundon de l' sublima Penso, ke ĝi levas la poeton el la kadro de unu literaturo. Tiuj ĉi poemoj estas ne nur la perloj de la Esperanta poezio, ili viciĝas al tiuj, en kiuj la genioj de l' homaro priesploris la esencon kaj destinion de l' Homo kaj Mondo. Sentempaj kaj eternaj kiel iliaj temoj eternaj, ĉi tie ili fandiĝas en eternan formon. Kaj, kiel la plej profundaj akvoj, ili estas mirinde klaraj kaj, kiel la paraboloj de l' Biblio, nesupereble simplaj. Ilia kompreno estas ludo por inteligentaj esp.-istoj: kiuj sufiĉe bone konas la lingvon, por tiuj estas bezonata nur atenta lego. La tuta mondpercepto de l' klera, eksterordinare inteligenta poeto estas densiĝita en tiujn ĉi poemojn. Kaj ĉi tie mi devas iom paroli pri tio, ĉu la pli supera intelekto, la multflanka erudicio malhelpas la sugestan forton de l' poeto? Multaj parolas kun prefera mencio pri la tiel nomataj »sovaĝaj genioj«, kiuj ne estas »librovermoj« kaj kiuj obsedkaptas la leganton per la kruda forto de sia *denaska pragenio*. Nu, laŭ mia opinio, se oni de pli proksime ekzamenas *tiujn sovaĝajn geni-*

ojn, kiuj vere estas genioj, oni ĉiam trovas sur la fundo de ilia poezio nekontesteban kulturon pariĝantan kun la denaska talento. Estas certe, ke la Kalocsay-poemoj malkaŝas al la leganto ne nur poeziajn kaj lingvajn belecojn, en Esperanto ankoraŭ neniam renkontitajn, sed ili donacas al la intelekto la ĝojon de pure spirita plezuro. Estas certe, ke Kalocsay estas nia plej inteligenta kaj klera poeto.

La kritiko ne multe atentis tiujn ĉi poemojn, unu el la recenzistoj menciis ilin, kiel poemojn kun »iom da kosma enhavo«. Ankaŭ al la pli larĝa publiko ili ankoraŭ ne trovis la vojon. La kaŭzon de tiu ĉi fenomeno mi trovas en ia konservativa malprogreŝemo. Oni kutimiĝis al la brila teknika riĉeco de l' pli fruaj poemoj kaj oni staras senkomprene antaŭ la nova tono, antaŭ la ŝajne pli simpla vesto. La rimoj modeste kaŝas sin akcentante ankaŭ per tio la pli superan gravecon de l' direnhavo. Sed la simpleco ne signifas samtempe la malfortigon de l' esprimovo. Eĉ kontraŭe! Ankoraŭ neniam sonoris lia nobla bronzo kun tia plena kaj potenca voĉo! Liaj »liberaj versoj« estas konstruitaj kun la plej rafinita arto. Sed la formo estas severe submetita al la servo de l' nuda kaj vera penso. La artisto rezignis pri la popularaj iloj de l' ekstera efiko kaj jen, la penso, la kerno de l' poemo mem fariĝis formo! La naskiĝanta ideo ne plu serĉas la konvenan korpon, sed Ideo kaj Formo prete elŝiriĝas el la utero de l' poeta animo, la Formo obee sekvas la konturojn de l' Ideo...

Nun ni rigardu de pli proksime kaj aparte ĉiujn el la ok poemoj, kiuj formas la ciklon.

Ekstaze: la Katenoj memvole malfermiĝas, la Ligajoj aŭtomate defalas, la liberiginta Memo jubile fandiĝas en la Unikan Ĉion, perdas sin mem, sian volon, por trovi ilin en la Volo Eterna, kiu vivigas la universon. Potenca panteista psalmo: festa feliĉo de l' sinofera solviĝo en la savantan *Pan*.

Diboĉe: facila ĝojkanto al la suna triumfo de l' mateno, soleca ekhalto inter la ŝtoniĝinte grizaj rigardoj de l' urbaj viroj, virinoj, rapidantaj al la ĉiutaga jago:

»homoj rapidas
en ĉies nazo: ringo
en ĉiu ringo: fadeno
kaj la fadenojn tiras
Sorto Mono Intereso«

Neniu rigardas por ekkapti la kison de l' suno, neniu sendas ekmiran, rekonan saluton al la aliaj: plenda akuzo kontraŭ la ŝtona kulturo de l' urba civilizo.

Vizio sur la ponto: iun vesperan someron la poeto staras sur la mezo de l' ponto, la obtuza murmuro de l' urbo dronas en la vesperan krepuskon, la monotona ruliĝo de l' ondoj haluciniĝas antaŭ lin la senliman Tempon, kian la rivero indiferece trafluis. Sub la apenaŭ eltenebla pezo de l' Eterno kaj Senfino la eta memo malfermiĝas al la terura Drivo de l' Jarcentoj, kiuj nun torentas tra lia jam preskaŭ dissolviĝinta kadro... Konvulsie li kaptas al la fera ponto-krado por resavi sin en la estanton,

»en mian... jarcenton... mizeran...«

Demande: konsternita, impeta demando meze de l' tumulta svarmo de l' vivo, subita konsciĝo pri ia

mistera dualismo de l' memo, nekomprena, elekstera rigardo pri siaj agoj, pri si mem, pala, duba konjekto pri ebla ekzisto de ia kosma Spirito...

Spite: akra sinturno kontraŭ la *Pan*, rifiĝa ribelo de l' *mi*, apoteozo de l' atomo pasema, de l' *homo*, kiu per sia momenta ekzisto pridonacas la indiferecan, mortan materion per la koloraj briloj de sia eterne soifa, eterne malfermita Okulo.

Efemere: en tiu ĉi giganta odo ni retrovas la temon de l' antaŭa poemo, sed kun profunde tragikaj konturoj, kun silueto projekciita en la senfinon, la neniam estingebla deziro al la senmorteco manifestiĝas ĉi tie kun elementa forto. Ne *Pan*, la senpersona -- do senpova eĉ en sia stulta potenco -- minacas ĉi tie la memon per avida engluto, sed la pasema, bagatela *mi* triumfe vastiĝante donas al ĝi vivon kaj sencon!

»...ho mia penso, belege freneza sago kiun mi
pafas

en la malhelbluon de l' Nokto, ke ĝi flugu meteore
kaj kun fajre triumfa ekbrilo anoncu ĉe l' sojlo
de l' Senfino:

Jen mi sendita de homo!«

Sed ve! vanas la ekstazo, vanas la venko! marŝas la terura, senindulga, nehaltigebla aro de momentoj (ĉu vi rimarkis, la kruela, martela frapado de l' dura, monotona ritmo per kia koloriga efiko sensigas ilian neeviteblan, fatgravedan ĉeeston kaj pason?) kaj manĝas kaj murdas la efemeran triumfon, kaj el la estonto elnigras la nepra certeco de l' fina momento... Ho! nur unufoje ekkapti, haltigi nur unu el tiu ĉi precize marŝanta armeo por deskui

»la ĉenojn de l' tirana Temp'«,

por pleniĝi per sentoj la obstine malluman materion, por freneze beatiĝi en la ebria danco de l' atomoj, por iĝi senco de l' leĝoj universaj... Kaj post la ĝis-eterne streĉita pliigo de tiu ĉi unika momento jam estos indifereca la neniĝo, la kruela reakcio de l' blindaj fortoj...

Por tiuj, kiuj trakomprenis ĝian tutan signifon, tiu ĉi grandioza poemo estas la zenito de la ĝisnuna Kalocsay-poezio.

Freneze: decida militdeklaro al la surda, blinda egoismo, fortvoĉa alvoko por fratiĝi en la komuna sorto, por rimarki, adori la belecojn de l' tera vivo, por festi la liberigintan ĝojon de l' homo, kiu per la sklavigo de l' maŝinoj sin liberigis de la premo de l' laboro, alvoko por Universa Festo, dum kiu la poeto

»kun mortbrakuma, mondbrakuma gesto,
ebria ekvatoro, ĉirkaŭprenas la Teron.«

Duope: monumenta epilogo, inda al la verko. Denove seniluziĝo, denova konvinkiĝo pri la vanteco de ĉia ideala klopodo, denova rifiĝo al la »mondvalora Bagatel'«, la amatino, sed la fortikiĝinta fido de l' poeto jam transsaltas la abismojn de l' pesimismo: lia profunda saĝo ĝuste en, la atoma feliĉo de l' duopo konjektas la ĝermadon de ia naskiĝanta Novo:

»En mondfluido plena de amara sal',
Jen ni: komenca molekulo de kristal',
Kaj ĉio, ĉio, jen, kun diamanta bril'
Metiĝas ĉirkaŭ nin! Kaj kun facetoj mil,
Kolorojn ravajn radiante en dispers',
Kreigiĝas ĉirkaŭ ni kristala Univers'!«

REVUO DE REVUOJ

Nia gazetaro ne povas oferi multe da loko por la literaturo. Tamen en kelkaj pli gravaj revuoj ni trovas sufiĉe viglan literaturan rubrikon, sed ankaŭ en aliaj. ne tiom vaste konataj propagandaj gazetoj aperas kelkfoje novelo aŭ poemo, ĉu originala, ĉu tradukita, kiu meritas, ke oni atentigu pri ĝi la publikon. Pro la troa displitiĝo de l' Espa gazetaro, la publiko ne estas en la situacio: observi ĉiun valoran literaturaron, kiu dise aperas, ĉiun novan talenton, kiu ekparolas unue en iu propaganda gazeto. Sajnas al ni ne malutile, se de tempo al tempo (kvaronjare) ni raportos pri la literaturaj eventoj de la Espa gazetaro al nia legataro, kiu estas certe la plej kompetenta literatura publiko en Espujo. Komprenoble ni ne preterlasas ankaŭ lingvajn rimarkojn, se ili ŝajnas necesaj. Kelkfoje ankaŭ pritraktinda vidpunkto de iu recenzo donos temon al ĉi tiu raporto.

Ankaŭ al la verkistoj estos simpatia la nova rubriko, mi esperas. La espista verkisto ofte estas simila al preleganto, kiu parolas en la mikrofonon: la mikrofono ne peras la plaĉon aŭ malplaĉon de l' aŭskultantoj, ankaŭ al la voĉo de l' espista verkisto ofte neniu respondas. Ke tio efikas paralizante, ke la verkisto bezonas la eĥon, ĉu simpatiantan, ĉu kritikeman (tiu ĉi lasta ofte alportas pli sanan rezulton), tion ĉi rekonas, kiun la Muzo kutimas honori per sia vizito. Nia rubriko ambicias iĝi perceptema eĥo de ĉiu espista talento, kiu eklumas sur la Espa firmamento.

Tia esploranta observado estas agrabla okupo por la kritikisto. Ĉiu kritikisto flegas en la fundo de sia koro la esperon, ke foje li malkovros unue genian novan verkiston aŭ poeton... Kaj mi kontesas, ke la sama espero instigis min akcepti la taskon de tiu ĉi kvaronjara raportado...

ESPERANTO (UEA) (novembro, decembro). Interesa raporto pri vizito al Gandhi. — Kuraĝa kritiko de Stroele pri la Nekrasov-traduko de Eugeno Onegin. Mi plene konsentas la vidpunkton de la recenzisto: »Por transigi al alia lingvo, idee kaj forme, tian artaĵon, estus necese posedi la genion de l' aŭtoro, kaj ĉe tiam refari en lingvo kun tute malsama strukturo, alian ĉefverkon.« Tute prave! Sed mi ne povas pravigi la pesimismen de s-ro Stroele rilate al la eblo de perfekta Espa traduko de tiu ĉi Puškina ĉefverko. Oni nur legu en la Eterna Bukedo de Kalocsay la *leteron de Tatjana*, por ke oni povu konvinkiĝi pri la eblo de traduko egalranga al la originalo. — Du lerte tradukitaj Goethe-epigramoj reprezentas la poezion. La tradukinto: Franz Döring. Ni vidu unu el ili:

Saĝo.

Eĉ se heroo mem kontentas,
Liganon tamen li aspiras;
Kaj se venkito tre prudentas,
Li kun venkinto tuj konspiras.

La decembra numero enhavas brilan tradukon de Kalocsay: profunde melankolian poemon de la granda rumana poeto, Mihail Eminescu. — Komika rakonto de Rabelais: *La ŝafoj en maron*, en la verva interpreto de Edmond Privat tre amuzas la leganton.

HEROLDO DE ESPERANTO (novembro, decembro). Certe la plej signifa literaturo, kiu aperis dum tiuj ĉi monatoj sur la paĝoj de Heroldo, estas la novelo de la flandra verkisto Reimond Stijns: *Lia filo*, en la senriproĉa traduko de Jan van Schoor. Bone viditaj, trafe pentritaj figuroj, simpla, sed esprimforta lingvo distingas la novelon, kiu temas pri maljuniginta, iom trinkema muzikisto, kies filo fariĝis fama muzikestro de la duko de Saksujo. — F. Cesarini skribis interesan artikolon pri la historia kaj literatura rolo de la nobla korpoparto: la nazo. — Impresan *Epizodon* de M. Spektor tradukis el la juda lingvo S. Guterman. — *La ĉina hundeto* de E. W. Hartmann (tradukita de Heinrich Fahnl) estas neĉi-

taga groteska temo rakontita per facila, amuza stilo. — Kun intereso oni legas la rutinajn recenzojn de Max Butin, L. K., precipe lia detala analizo pri la Lingvo Stilo Formo de Kalocsay estas tre atentinda. — Mi ne scias, kiu eltrovis la »sensupersignajn tekstojn«, sed estas certe, ke tiu ĉi nova manio (ĉu vere nova?) estas la plej kurioza, la plej ridinda io, kio iam aperis sur la paĝoj de Esperanto-gazetoj. Ĉu oni hontas la supersignojn? (Sed ĉu aliaj lingvoj, kiel ekzemple la franca, aŭ la ĉeĥa ne havas samajn aŭ similajn supersignojn?) Fine ni vidos tekstojn sen la plurnombra *j*, aŭ sen la *n* de la akuzativo. La japanoj aperigos tekstojn sen la litero *i* ĉinoj sen *r*, finnoj sen *b, d, f, g*. Fine ĉiuj forlasos el la lingvo, kio ne konvenos al lia persona gusto! Kara ĉefredaktoro Jung! mi estas certa, ke vi eltrovos pli spritajn amuzilojn por kelkaj plenkreskintaj suĉinfanoj!

RIVISTA ITALIANA DI ESPERANTO (oktobro, novembro, decembro). Tiu ĉi lerta propagand-gazeto aperigas la plej gravan eventon de l' Espa poezio: de numero al numero ĝi publikigas la Dante-tradukon de Kalocsay. Cetera la Rivista ne aperas de la unua de januaro. Ĝin anstataŭas la dusemajna »L' esperanto«.

POLA ESPERANTISTO (novembro, decembro). Ĝi malavare donas lokon por literaturoj. Ĝi faras viglan propagandon por la Espa libro. Pleje impresis min du ĉapitroj el »Anhelli«, simbola poemo de Juljusz Stowacki en la traduko de Lena.

ESPERANTO PRAKTIKO (oktobro, novembro-decembro). De januaro ĝi ĉesis kiel aparta gazeto kaj fandiĝis en la Germanan Esperantiston. Ĝi enhavas tekstojn precipe por perfektigo de komencantoj. Kun laŭdo estu menciata skizeto de Kenelm Robinson: La narcisismo. La unuaktaĵo de H. Boucon: Esperanto en la Kastelo, ne tre plaĉis al mi.

GERMANA ESPERANTISTO (novembro, decembro). Karl Minor, en sia recenzo pri la Rimportretoj de Kalocsay, rimarkis en la libro nur la fotojn!

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (oktobro-decembro). Interesaj artikoloj por fakuloj.

SVENSKA ESPERANTO TIDNINGEN (novembro, decembro). Tiu ĉi lerte redaktita, bele presita gazeto enhavas nenion por literaturamantoj, sed entuziasme propagandas por la Espa libro.

AMERIKA ESPERANTISTO (novembro-decembro). Bela eksterajo, bonega papero, tekstoj por komencantoj.

LA SUDA KRUCO (novembro). Leginda kritiko de Robo pri la »Tridek jarojn en la ora nordo«.

FLANDRA ESPERANTISTO (novembro). Kvankam ne tre valoras, tamen legindas la novelo de la bulgara N. Teodorov-Fol: Patologia okazo, tradukis H. Krestanof.

BELGA ESPERANTISTO (novembro). Detala libro-katalogo, iom surfacaj recenzoj.

LA MOVADO (decembro). La francoj scias spici per spritajoj ĉe propagandajn tekstojn kaj informojn!

OOMOTO INTERNACIA (decembro, januaro), **OOMOTO** (oktobro). Ili enhavas artikolojn, kiuj povas interesi la simpatiantojn de la Oomoto-movado. Ni notu la poemeton de Simon Frantz: La homo estas la reĝo de la mondo!

LA JUNA BATALANTO (novembro). Artikolo pri Dostojevski.

SKOLTA BULTENO (decembro). Ĉu la artikolantoj de tiu ĉi simpatia gazeteto ne intencas lerni la ĝustan uzon de l' akuzativo?

Pri aliaj revuoj kaj gazetoj mi raportos en mia sekva Revuo.

L.T.



OBSERVO

LYTTON STRACHEY †

Antaŭ ne longe mi legis la germanan tradukon de lia eseolibro: *Geist und Abenteuer*, en kiu li donas en tiom profunda, tamen en tiom facila mikso la historiojn de la tera pilgrimvojo kaj spirita aventuro de Voltaire, Shakespeare, Stendhal, Gibbon, Macaulay kaj Carlyle — kaj nun mi legas la konsternan sciigon, ke li mortis. La plej aminda kaj nuntempe eble plej saĝa kritikisto de Eŭropo. Mi ne legis libron nuntempe kun pli granda ĝuo, ol lian; mi kvazaŭ enviis de mi ĉiun jam legitan paĝon, mi ŝparis ilin, por ke restu el ili ankaŭ por la venonta tago, por posta tempo, kiel eble longe. Kaj nun, enpensigante pri li, mi rememoras la Gibbon-artikolon, en kiu la morton de la granda historiisto jene priskribas Strachey kun emocia ironio:

»La maljuneco proksimiĝis, Gibbon trograsiĝis, ekhavis podagron, kutimiĝis al la komforto de sia Lausanne-a villo. La franca revolucio furiozis en tiuj regionoj, kiujn, se li volis vojaĝi, li devis travojaĝi. Li tamen ne hezitis. Per sia vetura kaleŝo li evitis la batalantajn taĉmentojn kaj atingis Anglujon en bona sano. La stranga, eta, ronda figuro veturis al Bath kun granda anima feliĉo: la vojaĝo havas tiel agrablan kaj freŝigan miksaĵon de la komforto kaj moviĝo, ke, se ĝi ne estus tiom multekosta amuzo, li volonte vojaĝadus ĉiujare kelkajn mejlojn, precipe en Anglujo... Gibbon vizitis en Bath sian duonpatrinon, tre maljunan sinjorinon, kiu lin adoras super ĉio. Dek tagojn konstantege ili estas kune kaj en dolĉa duopo po tago dek horojn li babilas kun ŝi. Poste li veturas al Athor al lordo Spencer, kun kiu li pasigas feliĉan matenon en la studado de antikvaj presaĵoj. Poste ree al Londono, kie lin atingas ia malbonfarteto. Ne danĝera, eta ŝvelaĵo sur la malsupra korpo, kiu estas tiom karakteriza *insouciance* de la saĝulo kaj scienculo de la 18-a centjaro, ĝi maltrankvilige ŝvelis pro nezorgo, bezonis kuracon, — ne restis alio, oni devis lin operaci. La operacio sukcesis, ŝajnis, ne estas danĝero: »Kaj ankoraŭ foje, laste, okazis, ke Mr. Gibbon manĝas eksterdome, ankoraŭ foje, laste, oni povis lin vidi, kiel kun sia kutima maniero li babilas kaj amuzas la societon, kun levita montrofringro dum parolo, por ke post ĉiu bonsukcesa rimarko li batu sur sian tabakujon. Sed la malsano denove atakas lin — ho, nenio, ne estas serioza afero! La granda homo kuŝiĝis en liton kaj pensadis pri tio, kiom li povos ankoraŭ vivi — li estis kvindek ses jara —, li povas vivi certe dek, dekdu, eble dudek jarojn. Li manĝis kokidon, trinkis tri glasojn da madeira-vino. Tamen estas ja bela la vivo — »Je suis plus adroit« — mi jam eĉ ne estas tiom senpova — li diras kun sia stranga rideto al la franca lakeo, kiam la deviga neceso de l' momento lin pen-irigas el la lito, poste li denove rekuŝiĝis en la lito. Ion sensencan li murmuradis antaŭ sin, boris sin inter la kusenojn, ekdormis denove, poste perdis sian konscion — por eterne.«

Do, laŭ la saĝa Strachey, la morto de la granda Gibbon estas nur transiro de la komforta vetura kaleŝo, rapidanta sur la glata angla vojo, al komforta katafalĝo

kaj de tie en la tombokavon muntitan de plena angla komforto. La morto apartenas en la vivon, ĝi estas vivfunkcio — ĝi ne havas patoson, kiel ankaŭ la vivo ne havas. Ankaŭ la revekiĝo por la trumpeto de la Lasta Juĝo estos certe komforta, senpatosa streĉiĝo... Kiom mi nun ŝatus lin demandi: »Diru, vi, kiu jam scias, la morto do estas vere nur iom da kokidviando, glaso da madeira-vino, kaj poste la *eta neceso*, kiu la korpon, irantan al la eterna neniiĝo, ankoraŭ foje pelas el la lito, poste iom da murmuro, eta dormo, eta vekigo kaj ree dormo, el kiu ne estas vekigo plu? Diru, Lytton Strachey, mortinto de la Hierau, ĉu ankaŭ via propra morto estas same tia komiko-tragika, senpatosa, ordinara vivfunkcio, kia estis la antaŭ-cent-jara morto de Gibbon?«

Se Strachey ne volas kontraŭdiri la verkon de sia tuta vivo, li devas respondi per tomba jes la demandon, ke jes, jes ja, li konsideras ankaŭ sian propran morton tiel gaj-malgaja epizodo, kiel tiun de Gibbon, kiel antaŭ si kaj post si la morton de multe multaj milionoj da homoj.

Ĉar vere, la fundamento de la mondrigardo de Strachey estas, ke ĉia homa grandeco, kiun inter niaj samaĝuloj eble li komprenis pleje, kaj ĉia homa beleco, pri kiu plezuri neniu povis tiom, kiom li, ĉia pasio kaj sufero, kies valoron li mezuris plej akurata inter ĉiuj, ĉio, kion la vivo produktas, estas nur bobelo ŝvebanta sur la surfaco de l' ekzisto... ĉio admirinde abomena kaj ĉio respektinde morala, digno kaj vulgara, genio kaj ŝulto, bono kaj malico, estas nur pasemaj simptomoj, kiujn, eĉ se ili estas tiom ege geniaj poetoj aŭ scienculoj, en poezio kaj kritiko, egale — atentis nur la rigardo de efemera homo.

Jen la deveno de la ironio de liaj libroj, ĉu li rigardu Shakespeare, ĉu Voltaire. Sed, kiel en la supra citaĵo ni vidis, lia milda moko, lia ironio ne signifas cinikan superemon. Kiu, konante la grandecon, tamen tiel travidas ĝin, tiu povas esti nur ironia. Kaj Lytton Strachey estis tia el la plej bonaj. Tamen, lia solida ver-amo ne lasis, ke sian ironion li perdu en Wilde-a paradoksa ludo — ke li ŝutu nur la brilant polvon de l' moko en la blindigitajn okulojn de siaj legantoj, kiel Shaw —, ke li pruvu nur por la pruvo kaj ke li refutu nur por la refuto, kiel la senfrukta sagaculo de l' logiko, Chesterton.



P. Picasso

(Deformado kaj konstruado)

Lia ironio estas nura malgaja humilo, humilo antaŭ la realo, kies postsignojn tra la animo de la plej grandaj homoj li sekvas kun netrompebla certeco — kaj malgajo pro la diserigo de la rekonitaj plej valoraj formoj de l' realo.

Karlo Bodó

KILOMETRADO. (la moderna arto)

La estanteco estas pli komplika ol la estinteco. La hodiaŭo pli ol la hieraŭo. Ĝi estas kiel gelateno, aŭ hidrargo, ofte kiel longa makarono, kiun oni ne scias sendifekte engluti. Ne ĉiuj estas majstroj, ne ĉiuj — italoj.

La provo: klasifiki la modernan arton estas malfacila, same kiel klasifiki la Esperantan Paneŭropon. Facile palpebla, malfacile kaptebla.

Tamen, ia klasifiko estas necesa, kvankam, kompreneble, ĉia klasifiko povas havi nur relativan, pragmatikan pravon. Detala klasifiko, pro la multeco de la direktoj, bezonus cetere multajn, multajn paĝojn, minimume centpaĝan oficialan protokolon.

Tamen, helpe de analiza mikroskopo kaj la daltonismo de l' sintezo, oni povas malkovri la komunan kuŝejon de l' moderna arto. La saĝon (mikroskopon kaj daltonismon) mi ĉerpos por ĉi tiu improvizita artikoleto el diversaj verkoj de mia kolego Jan Brzekowski, specialisto pri ismoj.

La plej ĝenerala klasifiko laŭ kronologia progreso estas la jena :

1908—1918 : kubismo ;

1920—1926 : dadaismo ;

1926— : la tempo de kristaliĝo de certaj valoroj.

La apero de la novaj movadoj (ismoj) en la arto elvokis komence reagon kontraŭ la tradicio. El tio rezultis la opinio, ke la nova arto neas la pasintecan kaj forstrekas eĉ tion, kio estas nediskuteble valora. Tiu opinio ne ĝustas. Kiel la pasinta arto rezultis el antaŭaj epokoj, same ankaŭ la nova rezultas el evoluo. Sed ĝi turnis sin for de la greka arto, kiu sola ĝis tiu tempo estis remaĉata en Eŭropo. Ĝia metamorfozo bazigis sur aliaj artoj : sur la egipta, asiria, negra ktp.

Krome, ni ne forgesu, gravan rolon ludis la progreso de la fotografio. La fotografaparato atingis la idealon de naturfideleco. La celo de la estetika agemo ne povis esti ĝia imito. En la penetrado do oni komencis serĉi aliajn valorojn, ol la kiel eble plej fidela simileco al la figurita objekto. Oni klopodis reliefigi la plastikajn valorojn de l' objekto per *intenco* deformado. Oni trovis multajn ekzemplojn en la primitiva arto (negra kaj azteka) kaj en la karikaturo. Tio ĉi estas karakteriza por la ekspresionismo, postkubistaj skoloj kaj eĉ por la dadaismo. Dank' al la multaj eblaj kombinoj, la deforma pentrado produktis senliman gamon de formoj, kies eksterordinara riĉo estas ankoraŭ nun prilaborata kaj esplorata.

Jen la distingeblaj etapoj de la deforma pentrado :
Impresionismo : dekomponado de sunradio, deformado de la koloro.

Cezanismo : nomo donita al la skolo de Cézanne : deformado de perspektivo, resuma simpligo de linioj kaj koloroj.

Kubismo : deformado de volumeno.

Ekspresionismo : troa deforma akcentado de formo kaj linio, resuma densigo de la naturfenomenoj.

Dadaismo : enkonduko de la plastikaj valoroj de deformado en la kampon de l' intelekto kaj psiko.

Surrealismo : daŭrigo de l' dadaismo, inspirita de simbolismo kaj neoplastikismo.

Ĉiuj ĉi ismoj pli-malpli deformas la naturon, deformas ĝin *intence*, por akcenti aliajn valorojn : anstataŭ observado la *abstraktadon*, anstataŭ objektiva *prezento* la plej subjektivan *esprimon*, dinamikan efekton, perfortan streĉon, formeksplodon kaj krome, anstataŭ la neligiteco skemigan ligitcon.

*

RECENZO



Ĉiujn librojn, ricevitajn en du ekzempleroj, ni recenzas. Unuope ricevitajn librojn ni nur mencias. — La recenzoj esprimas nur la opinion de la recenzinto kaj ne tiun de la redakcio. Pro tio la redakcio tre volonte publikigas intersajn kontraŭopiniojn, koncernantajn iajn aperintajn recenzojn. — La libroj, ĉi tie menciataj kaj recenzataj, estas haveblaj ĉe la librofako de nia eldonejo.

LA STRANGA BUTIKO. Originala poemaro de Raymond Schwartz, kun multaj ilustraĵoj de Raymond Laval. Formato 15.5×11.5 cm. 128 paĝa. Kun dukolora kovrilo. Eldono de la aŭtoro. Ĝenerala deponejo : Esperantista Centra Librejo Paris 6-a, 11 rue de Sèvres. Prezo fr. fr. 12+30%.

En la Plena Vortaro oni metis neologismon kiu ŝajnis al mi pli necesa ol multaj, la vorton 'humuro', kun signifo 'originala kaj milda gajameco, speco de ŝerco, precipe ĉe la anglaj aŭtoroj, laŭ kiu la verkisto elmetas serioze kaj science satirajn burleskaĵojn.

Nu, sen akcepti plene la difinon, mi konsentas, ke al multaj anglaj verkistoj apartenas la talento : verki librojn, kiuj elvokas ridadon, kelkfoje konvulsian ridadon, per burlesko kaj ankaŭ per satiro : sed mi ĉiam pensis, ke speciale sur la kampo de satira humuro estas dotitaj multe da francaj verkistoj, kaj certe delikatan ironion de plej ridiga speco oni trovas ne nur en libroj de la majstroj, ekz. Anatole France, sed ankaŭ en la noveloj de la semajnaj gazetoj, kaj en la varietoj de la provincaj francaj urboj. (En Parizo mi vidis precipe nur spektaklojn.)

Kaj ĉiam mi ĝojis, ke en nia kulturo de Esperanto ni posedas verkiston prezentantan al ni humuron de plej alta kvalito, kiu, ĉu prave aŭ malprave mi kredas ĝin esence latinida, estas ege necesa por kulturo internacia. Tiel ankaŭ mi ĝojas nun, ke la nova poemaro de Raymond Schwartz ankoraŭ pravigas min en mia admiro kaj dankemo al li. Legante ĝin, mi ricevis ne nur la feliĉecon kiun donas al mi lia satira humoro kaj lia ŝajne neelĉerp-ebla provizo de ŝercoj, sed la senton de mensa kontento, de mensa ĥonstato, kiun, de tempo al tempo, kapablas doni al ni verko, kiu ŝajnas atingi perfektecon en sia ŝfero.

Mi ne volus pretendi, ke ĉiuj poemoj havas same altan kvaliton. Efektive, kelkaj el ili apenaŭ indus la represson el diversaj gazetoj. Sed tiuj kelkaj neniel povas

Ekzistas tamen alia, nedeforma tendeco: tendenco, kiu konstruas. Ĝi esploras la esencajn, neŝangeblajn formojn de objektoj en iliaj plej simplaj aperigoj. Iom post iom tiuj geometriaj elementoj ĉesis esti rigardataj kiel geometriaj ekvivalentoj de l' objektoj : ili fariĝis aŭtonomaj elementoj de la konstruado. La geometria deformado de la gitaro ĉe Picasso fariĝas plastika formo, ekzistanta sendepende de l' objekto, de kie ĝi originis. Per analizo kaj dekomponado oni sukcesis krei plastikajn konstruojn en abstraktaj formoj.

Post kubismo kreiĝis aliaj ismoj, kiuj ankoraŭ pli akcelis la ideon pri la konstruado de la t. n. abstraktaj elementoj. Jen ili : purismo, superregismo (suprematismo), neoplastikismo. Kaj fine oni rimarkas ankaŭ pli-proksimiĝon al la naturobservado, sed kun la utiligo de la ĝisnunaj konkeroj : ĉi tiun direkton, pro ĝiaj severe komponaj klopodoj oni nomas *neoklasikismo*. Kaj ni devas menci la *literaturan simbolismon* en la arto.

Ne necesas aldoni, ke ĉiuj ĉi tendencoj, la deforma kaj konstrua kaj la literatura simbolismo ofte renkontigas kaj intermiksiĝas.

S. Grenkamp.

forpreni la valoron de la ceteraj. Inter miaj preferoj mi menciuj kelkajn: la poemo *Orango* montras tiun terecan fantazion, kiu ravis min multfoje en la verkoj de Schwartz, *Sibilla Orakolas* enhavas, en ŝerca formo, tiom da historio el la movado, kiom povus enteni tuta ĉapitro de doktoro Privat, *Lamentado* rave pikas la tendencan de multaj verkistoj al enkonduko de literaturaj neologismoj, *Laŭ Vidpunkto de Heliko* estas science senbaza, tiel oni informas min, sed literature ege amuza, *Pri Somero* enhavas parodion de bona kvalito. Ĉiuj poemoj, senescepte, pravas ke la aŭtoro havas majstran kapablon jongli kaj ludi per nia lingvo, kaj eĉ nur de tiu lingva vidpunkto la legado de lia nova verko estas preskaŭ devo de ĉiu maturmensa Esperantisto.

Intence mi devas diri: maturmensa. Multo el tiu ĉi verko ne taŭgas por tiuj, kiuj ĝuas ankoraŭ la revojn de mensa juneco; sed la legantoj de *Literatura Mondo* supozeble estas maturmensuloj, kaj, leginte la verkon, scios taŭge pruntedoni ĝin al siaj amikoj kaj amikinoj laŭ la etikoj de sia medieto.

Persone, mi dankas pro la nova libro; ne nur pro la plezuro kiun ĝi donis al mi, sed pro ĝia valoro por nia kulturo. Mi kredas, ke la humuro estas esenca afero en la vivo, tiom necesa, kiom la serĉado de belo, kaj kiu konsentas kun mi, tiu rapidos aĉeti la novan verkon de Schwartz, kaj vicigi ĝin inter niaj plej bonaj verkoj de belliteraturo.

K. R. C. Sturmer.

K. KALOCSAY: ETERNA BUKEDO. 260 tradukitaj poemoj el 22 lingvoj kaj de 111 aŭtoroj. 352 pĝ. 20x13.5 cm. Sur peza holanda senligna papero, en arta duonleđa bindo. Eldonis: Literatura Mondo, Budapeŝt. Prezo kun afranko dolaroj 2.42.

Oni ĵus sufiĉe diskutis en tiu ĉi revuo pri la kompara valoro de tradukoj aŭ originalaĵoj en Esp-o. Iuj konsideras, ke nia lingvo estas ankoraŭ juna, ke ĝi bezonas esti prilaborita kiel fleksebligita per konsciencaj tradukoj de altstilaj verkoj: nur tiaj entreprenoj povas liveri al nia lingvo la necesan stokon da vortoj kiel parolturnoj, riĉigi nian literaturon per la ĝusta esprimo de delikataj aŭ sublimaj pensoj: pruve ili montras la esencan rolon, kiun ludis en franca lingvo la traduko de Plutarĥo fare de Amyot, en la germana tiu de la Biblio fare de Luther; ili akcentas, ke Zamenhof mem indikis la vojon, zorgante pri la traduko de multaj diverslingvaj ĉefverkoj, kiel precipe fajlante tiun admirindan *Biblion*, kiu devas esti la manlibro de ĉiu esp-a verkisto.

Kontraŭe aliaj opinias, ke sen rekta verkado Esp-o ne povas akiri la naturecon, la vervon, la stilliberecon de la naciaj lingvoj; pli bone estas posedi mezkvalitajn verkojn, kiuj klare pravas la vivantecon de la lingvo, ol tradukojn de eble perfektaj originaloj, sed kiuj estos ĉiam fremdaj al ĝia spirito:

Ne granda mia glaso, sed ĝason mian mi uzas!
Sajnas al mi, ke tro absolute elmetita, ĉiu el tiuj du tezoj estas falsa, kiel ofte, iliaj aŭtoroj pravas pri tio, kion ili asertas, kiel malpravas pri tio, kion ili neas. Certe la unua zorgo de la unuaj esp-istoj estis provizi sian literaturon per pli kompleta kolekto de tradukitaj ĉefverkoj: kiel ni ĉiuj konfesos, ke nun tiu kolekto estas ankoraŭ tre mankhava, eĉ, ke partoj de ĝi estas preskaŭ senvaloraj kiel postulata reverkigo. Nia devo estas do sekvi la ekzemplon de la Majstro, kiel daŭrigi tiun pacan konkeron al alilandaj belajaĵoj. Sed ni ne devas forgesi, ke tiu laboro ne havas en si mem sian celon, ke ĝi utilas nur por prepari vortojn, stilon, modelojn al la originalaj verkistoj, ke ni devas kuraĝigi tiujn — se nur ili havas ian talenton —, kiuj jam de nun ne timas provi tiun gravan taskon: krei rekte en Esp-o beletrajn verkojn. Se en la antaŭmilita epoko estis tro frue por esperi, ke tiuj originalulaj penoj havos konsiderindan frukton, nun la normala kiel fekunda evoluo de la lingvo obligas la ŝancojn por efektiviĝi tiujn revojn.

Jen, ekzemplo mirinda klarigas mian penson, kiel montras, kiel la trezoroj akiritaj per tradukado povas esti uzataj por la originala verkado. Antaŭ kelkaj semajnoj

aperis la *Streĉita Kordo* de Kalocsay, laŭ mia opinio la plej bela, la plej korprena, la plej majstra poemaro en nia lingvo. Kiel ĵus elpensis de la sama aŭtoro *Eterna Bukedo*, poeziaj pecoj de 111 aŭtoroj, tradukitaj el 22 lingvoj. Nu, kiam mi unuafoje legis *Streĉita Kordo*, kvankam pluraj el tieaj poemoj estis jam de mi konataj, mi miris antaŭ la neatenditeco de tiel perfekta kiel subita poezi-miraklo. Sed la eksplikon mi trovis en la dua libro: nur per konstanta kiel humila laboro de tradukisto akiris al si Kalocsay tiel nervan verson, tiel streĉan lingvon, tiel lertan rimuzon. Certe la riĉo de l' metaforoj, la delikato de l' pensoj estas pure liaj, sed la sciplenan manieron, kiel li esprimas ilin, li ŝuldas al la longa kiel pacienca ekzercado super malfacilaj fremdaj tekstoj.

Unu el la plej rimarkindaj akiroj, kiujn li faris en tiu kampo, estas la larĝa, fortefekta ritmo de la aleksandro; li estas la unua, kiu uzis tiun belan verson en gravemaj poemoj, kiel la soneto pri la morto de Th. Cart:

En la okuloj tremas funebra larmobrililo...

De la franca kiel pola literaturoj li pruntis ĝin, kiel donis al ĝi en Esp-o veran civitraĵon. Estas ja interese sekvi la etapojn de tiu prunto. Komence, li observis severe la jambecon en la dua hemistiko, kiel tio trudis al li foje dolorajn inversiojn, kiel en tiuj versoj:

Si min komprenas plene — ĉi diafana koro,

Ve! sole por si ĉesis *problem'* esti fatala...

Sed poste li rekonis, ke oni povas allasi la horjambon (-oo-) tiel bone en la komenco de la dua hemistiko, kiel de la unua. Kiel nia poezio posedas tiel verson sufiĉe flekseblan, kun tiuj kvar formoj:

(regula) Al mar' alia blua, de briloj radiata...
(komence horjamba) Diru, ĉu via koro ne tiras for, Agata...
(meze horjamba) Ne estas servistino, kun post dir' tiela...
(dufoje horjamba) Fari valoran verkon, plenan de tim kaj ĉarmo...

Oni povus teorie trovi kvinan per la uzo de la stumblo en la dua hemistiko, sed tiun licencon Kalocsay evitis en tiu ĉi libro. Verson, kiu tekstis unue:



Stanislaw-Grabowski

(Negeometria konstruado)

Post ŝipoj glitadantaj tra l' amara ondar'...
li korektis poste per :

Post ŝip' glitanta tra la amara abismar'...

Sed mi opinias tiun severecon troa : la stumblo en la aleksandro plaĉas al mi, se ĝi ne estas tro ofta ; ne malpli ol en la deksilabo.

Ci tiun version li tradukas per kvinjamba, kun meza, lokvaria rezuro, permesante al si komencan horjambon k finan stumblon, laŭ la tri sekvantaj skemoj :

(regula) Ĉe la enir' kaj kulpojn ekzamenas...

(horjamba) Kiam al la ruino ili venis...

(stumbla) Kaj kiel sturnoj en temp' de malvarmo...

Per tiuj du harmonie konstruitaj versoj k per la normala serio de la kutimaj versoj, konsistantaj nur el jamboj, trokeoj aŭ amfibrakoj, Kalocsay tradukis plej diversajn poemojn laŭ plej diversaj teknikoj, penante konservi, krom senco k rimo; ankaŭ la originalan ritmon. Preskaŭ ĉiam li sukcesis, dank' al sia lerteco, al sia kono de ĉiuj eblecoj de nia lingvo, al sia aŭdaca uzo de poeziaj koncizigoj k neologismoj. (1) Mirinda estas lia fideleco. Mi

prenos nur unu ekzemplon, ĉar ĝi ŝajnas al mi karakteriza. Bone konata estas la lido de Heine :

Ein Fichtenbaum steht einsam
Im Norden auf kahler Höh.
Ihn schläfert ; mit weisser Decke
Umhüllen ihn Eis und Schnee.

Er träumt von einer Palme,
Die, fern im Morgenland,
Einsam und schweigend trauert
Auf brennender Felsenwand.

De tiu mallonga sed sentplena poemo mi konis jam tri tradukojn : jen tiu de Zamenhof :

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵo ;
Glacia kaj neĝa tavolo
Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Gi songas, ke palmo gracia,
En unu dezert' orienta,
Eterne pri lando alia
Malgaje sopiras silenta.

Gi estas, laŭ la kutimo de Zamenhof, pli adapto ol traduko. La jamb-anapestan ritmon de Heine li anstataŭigas per amfibraka ; li rimas ĉiujn versojn, dum en la originalo rimigas nur la paraj ; k tio devigas lin uzi adasimon (altaĵo-tolaĵo). Li ne observas la alternon de inaj k viraj finaĵoj. Pri la senco, li ne redonas la ripeton de »Einsam«, kiu estas la kerna vorto k la esenca ideo de la poemo. Fine li tute ne tradukas la lastan version, kiu tiel arte kontrastas kun la 4a.

La dua traduko estas de Sro Döring :

Abio attleviĝas
Sur norda mont' izola ;
Ĝi dormas, dum ĝin kovras
Glaci' kaj neĝo mola.

(1) Pri tiuj du lastaj punktoj mi ne volas insisti, resendante la scivolemajn al la prelego »Evoluo de nia poezia lingvo«, kolektita en la samaŭtoro »Lingvo, stilo, formo«. La en tiu ĉi libro uzitajn neologismojn mi ĝenerale aprobas, krom *bisso* k *Gallo*, anstataŭ kiuj oni jam uzis *bisuso* (Verax) k *Gaŭlo* (id.). Tiuj duoblakonsontantaj vortoj ĉiam ŝajnos en nia lingvo neasimilitaj fremdaĵoj. Pri *cico*, kreita de Kalocsay por signifi »mampinto« kun karesa nuanco, la formo estas maltaŭge elektita, ĉar ĝi malbele sonas, k ankaŭ memorigas tro la germanan *Zitze*. La internacia formo estus *tito* aŭ prefere *teto* (Germanika : *titte*, Irlanda *did*, Angla *teat* — pr. : tet-, Franca *tette*, Itala *tetta*, Hispana *teta*) ; sed restas la malfacilo, ke en preskaŭ ĉiuj tiuj lingvoj, la vorto estas uzata nur por bestoj.

Gi songas pri la palmo,
Staranta en orient'
Sur roko sunbrulanta,
Funebre, en silent'.

Jen kelka plibonigo. La tradukinto konservis la virajn rimojn en la dua strofo, sed ne en la unua, kiun celere li rimas per proksimumoj : izola devus kvalifiki la abion, ne la monton (ĉe sur izola monto povas stari multaj abioj) ; *mola* estas neelvokiva k neutila »keĵlo«. La ritmon de l' originalo li aliformigis, ŝanĝante l' varian kadencon per severe jamba skando. Rilate la sencon, li forlasis en la dua strofo la »Einsam« pri kiu li jam faris kontraŭsencan en la unua. Mi ne parolas pri nuancoj, kiel la tro reliefigita *attleviĝas*, aŭ la neĝusta uzo de la artikolo en *pri la palmo*.

La tria traduko estas de Zanoni (Sro Pillath) :

Pinarbo staras sola
En nordo, sur nuda altaĵ'.
Gi dormas ; el neĝ' kaj glacio
Ĝin kovras blanka litaj'.

Songadas ĝi pri palmo
Ĝemanta en orient',
Soleca, sur arda deklivo,
En maldolĉega silent'.

Gi estas nete supera al la antaŭaj, k pli ekzakta pri ritmo k rimoj ; sed ĝi konservas la Zamenhofan adasimon, iom mildigitan, vere, per la sameco de la apogkonsontanto. koncerne la sencon, *litaĵo* estas malmulte poezia, *ĝemanta* estas malpli ĝusta ol *sopira* aŭ *funebra* ; la aŭtoro konservas feliĉe la ripeton *sola-soleca*, sed, kiel la aliaj, li inversias la du lastajn versojn, rompante la delikatan simetrian inter la du strofoj.

K nun, jen la traduko de Kalocsay :

Pinarbo staras norde
Sur kalva mont', en sol'.
Gi dormas (1) ; glacio, neĝo
Ĝin kovras per blanka tof'.

Kaj songas ĝi pri palmo,
Kiu en suda land',
Sola, funebra, mutas
Sur arda, altroka rand'.

Ties ritmo estas tiel fidela, ke oni povus kanti la tradukon laŭ la muziko komponita por la originalo. K malgraŭ tiu fideleco, nenia forlaso, nenia aldono : strikta k alĝustita vesto. La paraleleco de la du strofoj estas kontente respektata en la finaj versoj : *dormas* respondas al *mutas* kiel *blanka-tol* al *arda rand'*.

Oni ekskuzu mian iom pedantan komparon, sed, ĉar temas pri traduko, necesis trarigardi almenaŭ unu ekzemplon laŭ plej etaj detaloj antaŭ ol elpaŝi kun preciza juĝo. K oni komprenos laŭ la supra studeto, kian talenton postulas tiu traduka procedo. Ne ĉiu povas ĝin apliki, ankaŭ ne ĉie ĝi estas aplikebla. La lingvoj, efektive, ne estas ĉiuj egale koncizaj : se la traduko el la franca, germana, itala aŭ pola povas, dank' al la uzado de plej koncizaj parolturnoj, preskaŭ ĉiam konservi la saman nombron da silaboj, kiun havis la originalo, tio ne estas plu ebla kun la angla, ekzemple. Kalocsay brave ne kapitulacis, k malgraŭ ĉiaj malhelpoj persistis traduki en ekzakte sama ritmo la *Korvon* de Poe k la *Odon al la Okcidenta vento* de Shelley. Sed antaŭ la *Nokta Renkonto* de Browning li konfesis sin venkita, k devis pliiĝi la silabnombron de sia verso. Tiaj kuraĝaj provoj ne estas senutilaj, sed ili montras klare la neblon traduki »laŭsilabe« anglan poemon. Se li savigis senvunde de la terura *Korvo*, pro sia lertmoveco, tamen li perdis kelkajn harojn sub la furioza blovego de la *Okcidenta Vento*. La trudo de la kvinjamba devigis lin ekzemple traduki »leave« per »branĉo«, anst., »folio«, k tio bedaŭrinde mis-

(1) La teksto liveras : *songas*, kredeble pro preseraro.

formas plurajn versojn. Lavenontaj tradukistoj ne obstinu do en tiu sisifa laboro, k elektu, anstataŭ la tro strikta kvinjamb, pli taŭgan ses- aŭ sepjambon. Kvankam oni ofte provis traduki plej ekzakte Sekspiron en la francan, neniu eĉ eĉ havis la ideon uzi por la versaj partoj la francan deksilabon, kiu tamen ritme respondas al la angla kvinjamb : ĉiuj uzas la plilongan aleksandron. Ni faru same en Esperanto. Ekzistas la alia rimedo, montrita de Kalocsay en sia postparolo : konservi la saman ritmon k pliigi la nombron de la versoj : sed ĝi kondukas al tiu senverva, senspina k senenhava kvinjamb, kiu floras tro ofte en la Zamenhofa Hamleto :

Kiun ni vidis jam la duan fojon...
Ke ĝi forjetu sian obstinecon...
En la momento, kiam tiu stelo...
En tiu sama loko, kiel nun...
El kia kaŭzo tiu rapidado... ktp. ktp.

versoj, en kiuj estas nur po du esprimivaj vortoj, ĉirkaŭitaj de vanta gramatika balasto. Tiu dua procedo, ĉar pli rutina, favoras la malstreĉon k, se licas diri, la vortlakson. La unua, male, eble pli eksterkutima, instruas la densecon de la stilo k drastecon de la verso. Mi kredas, ke ne dubas la elekto.

Sed kial paroli plue pri ritmo, k procedoj k teorio ? Kial difekti nian plezuron per vana cerbumaĵo ? Ni prenu la libron k legu, en kiu ajn paĝo. Ĉie ni admiros. Jen kolekto el la plej belaj floroj de la Eŭropak Azia literaturoj, kolekto senprecedenca en nia historio. Kiam en 1896 Grabowski, al kies memoro estas dediĉita tiu ĉi verko, publikigis la »Liro de Esp-istoj«, li intencis doni internacian antologion : sed li devis voki al sia helpo almenaŭ 18 kunlaborantojn, kaj tamen liveris ion tre mankhavan k neperfektan. Hodiaŭ, sola, Kalocsay donas al ni dikan libron, kiu entenas preskaŭ ĉiujn poemojn konatajn k amatajn de kulturita homo. Li avertas, ke li ne pretendis fari per sia elekto valorjuĝon pri la tradukitaj verkistoj aŭ lingvoj. Tre certe, sed tamen estas interese, por koni liajn preferojn, iom esplori la enhavtabelon ; ni vidos, ke li tradukis el la hungara 33 poemojn de 6 aŭtoroj (1179 versoj) ; el la franca 34 poemojn de 16 aŭtoroj (699 v.) ; el la germana 23 de 6 aŭtoroj (699 v.) ; el la angla 24 de 9 aŭtoroj (619 v.) ; el la itala 14 de 6 aŭtoroj (487 v.). Inter la aŭtoroj prezentigas precipe Petoefi, Baudelaire k Verlaine, Goethe k Heine, Sekspir, Dante k Carducci. Se ni almetas grekan k latinan literaturojn, ni havos ideon pri la vasteco de lia kulturo k la diverseco de liaj gustoj. K pri lia *bunta* scivolo atestos traduko el Li Tai Po, Kikaku, Tagore aŭ Semper. Ĉio tio konsistigas majstroverkon, en kiu ĉiu legonto trovos plej ŝatatajn perlojn de sia propra literaturo, k miros, ke sub la esp-a formo, ili ne perdis sian belon. Ĉu Goethe mem ne estus aminta tiun »Simila« (verdire, mi preferus : »Simileco«) ?

Super pintoj pendas
Silent.
Vi apenaŭ sentas
Spiron de vent'
Sur arbfoli'.
L' arbar' ne resonas jam trilon.
Baldaŭ — trankvilon ! —
Kusos ankaŭ vi.

Ĉu Verlaine ne agnoskus tiun »Aŭtuna Kanto« ?

La velksezon'
Per violon'
Gemo-sona
Vundas ĉe l' kor'
Min per langvor'
Monotona.

Sufoka nun
Kaj pale, dum
Tintoj horaj,
Memoras mi
Kaj ploras pri
Tagoj foraj.

Mi vagas, jen
Zigzagas en
Vento forta,
Kun svena fal',
Simile al
Branĉo morta.

Same perfektaj estas la tradukoj de tiu Baudelaire, kiun oni volonte kredus netradukebla. Post tiuj pruvoj oni ne rajtas pridubi plu la poeziecon de nia lingvo, kiam ĝi estas forĝita de vera poeto.

Teme pri tia monumento, kiu devas esti la biblio de ĉiuj poezilernantoj, k la preĝolibro de ĉiuj versamantoj, ridinde estus gravmiene recenzi pri bagateloj, papero, bindaĵo (tre klasika, kiel konvenas al la enhavo), preseraroj (malofteĝaj pri literoj : mi notis nur *netraduebla* pĝ. 263, sed oftaj pri apostrofoj), fantazia ordigo de la poetoj, kiu malfaciligas la serĉon ktp. Tamen pri la lingvo, kiu estas ĉiam tre klara k klasikstila, mi volas signi nekorektan parolturnon, almenaŭ dufoje troveblan : »senti, ke la Tempo kiel flugas« (pĝ. 263) — »Montru, ke mi harojn miajn kiel ligu« (pĝ. 275). Mi ne scias, el kia lingvo Kalocsay tiris tiun monstron, sed en Esp-o estas neeble subordigi la saman verbon al du malsamaj konjunkcioj ; oni devas diri : »senti, kiel la Tempo flugas« — »Montru, kiel mi ligu...« Apenaŭ akceptebla estus la greka maniero : »senti la Tempon kiel ĝi flugas«, sed tute ne tiu sekvo : ke... kiel... Ĉetere tiun eraron rimarkos nur ia seka gramatikisto, kiel mi — k eĉ mi devis batali kontraŭ la sorĉado de la magiisto...

Estas antikva k bela kutimo en Anglujo, solene elekti inter la poetoj tiun, kiu ŝajnas plej bone respuguli la nacian menson, k porti plej alten la gloron de la patra lingvo. Se ekzistus ia Esp-ujo, se Esp-a popolo k Esp-aj Institucioj estus alio, ol nuraj vortoj, mi kredas, ke pri tia elekto oni ne hezitus, k kiel laureat-poeto de Esp-o estus unuvoĉe aklamita la majstro de »Streĉita Kordo« k »Eterna Bukedo«, Kolomano Kalocsay.

G. Waringhien.

PRUDENCI BERTRANA : Barbaraj prozaĵoj. El la kataluna tradukita de *Jaume Grau Casas*. 59 paĝoj. Eldonejo : Ferdinand Hirt und Sohn, Leipzig Prezo Mk. 0.80 + 10%.

Tiuj ĉi prozaĵoj ne estas noveloj. En ili okazas preskaŭ nenio. La verkisto kun akurata observkapablo pentras scenojn el la vivo de simplaj kamparanoj. La aŭtoro nomas tiujn ĉi skizojn »barbaraj« kaj la nomo trafe karakterizas ilin pro la preskaŭ kruela akreco de l' reflektorlumo projekciita sur la figurojn. Tamen tiun ĉi krudecon mi trovas intenca artista procedo, el sub kiu mi eksentas la varmon, la kompaton de l' verkisto, per kiu li sintenas al siaj temoj, figuroj. El la tri pecoj prenitaj el la volumo »Barbaraj prozaĵoj« pleje impresis min »La forlasita vojo«. Ĝi estas preskaŭ spektra vizio pri vojo, kiu iam estis ĉeflinio de l' trafiko, de komercistoj kaj banditoj kaj kiu dronis en forgeson. La vojaĝanton nekontraŭstareble obsedas la fantomoj de l' pasinto, en la tuta bildserio vibras ia nervoza streĉo, kiun la leganto trovas parenca al tiu de la Poe-noveloj.

Krom la tri skizoj la libro ankoraŭ enhavas fragmentojn de pli longa novelo : »Josafat«. Ĝi estas pasia kanto de la karna amo, verkita per neĉiutaga sugestia forto. Sed la tradukanto kial ne aperigis ĝin plene en aparta volumo ? Jam definitive forpasis la tempo, kiam oni ankoraŭ povis regali nian publikon per »fragmentoj«.

La stilo de l' traduko estas bona... Kelkaj rimarkoj. La tradukanto alterne uzas la radikformojn *sugesti-* kaj *sugest-*. Mi ne trovas nepre necesa la uzon de ambaŭ formoj, sed se oni jam uzas... (pere de anglaj esp-istoj *sugest-* penetris en nian lingvon), mi nuancigus ilin jene : *sugestii* : trudi al iu iun penson (en hipnoto), *sugesti* : sinonimo de *proponi*, *konsili*, *rekomendi*. En la esprimoj : »iu terura herezo«, »iu timiga fatalismo« *iu* estas malĝuste uzata anstataŭ *ia*. La uzon de la neologa vorto »sekvestri« mi ne trovas necesa. »Konfiski«, »rekviri« bone

taŭgas por la esprimo de l' sama ideo. (Magistrate konfiski ion.) Sed en la traduko ĝi eĉ estas erare uzata: »... bandoj de rabistoj harditaj kaj kruelaj, kiuj sekvestris, rabis kaj mortigis laŭplaĉe.« Tie ĉi mi uzus »kaperi« aŭ »predi«. »Mortigi« anstataŭ »mortis« mi volas kredi preseraro. Ĝenas ankaŭ la trouzo de la sufikso ad.

Ludoviko Totsche.

La GRANDA OFICIALA LIBRO PRI LA POLUS-TRAGEDIO DE ANDRÉE, »Per balono al la Poluso«, fariĝis tre granda sukceso. De la tuta eldono restas nur ĉirkaŭ cent ekzempleroj, kiujn la eldonejo Eld. Soc. Esperanto, Stockholm, Svedujo, konservas por la estonteco.

ĈU LA TUTMONDA ESPERANTISTARO POVAS EFEKTIVIGI SENARMILIGON? Cirkulero, eldonita de la Pacifista Unuiĝo. Bonega pruvo pri la apliko de Esperanto en la pacifista movado.

KONVERSACIA GAZETO. LA ENIGMOJ. Eldonejo: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto.

Utilaj tekstoj por enkonduki novajn esp-istojn en la esp-istan vivon kaj por ekzerco de la lingvo.

REDAKCIA POŝTO

Nia filmrubriko pro teknikaj kaŭzoj aperos nur en la marta numero. Bonvolu pardoni tion al ni.

Al niaj ajablaj helpantoj. Ni presis novajn grandformatajn kvarpaĝajn prospektojn dukolorajn, kiujn tre volonte ni sendas al ĉiu, kiu deziras helpi nian propagandon.

Preseraroj en la januara numero. Malgraŭ plej zorga korektado, en la januaran numeron enŝoviĝis du gravaj kaj tre miskomprenigaj preseraroj. Ili estas en la artikolo »Al la leganto«. Bonvolu korekti. En la unua kolono, desupre la 13-a vico sonas ĝuste: »ke ni ne laboris malbone en la ĵus pasinta jaro. En la 30—31-a vicoj anst. »ridiĝintaj« bonvolu legi: »rigidiĝintaj«.

Neologismoj, netroveblaj en la Plena Vortaro

aprezi = ĝuste taksu

bobelo = sapveziko

bunta = multkolora

dura = malmola

eseo = literatura studo

evento = (grava) okazaĵo

K, k, = kaj

lido = speco de ĉefe germanaj poemoj (lied)

odekolono = kolonja akvo

simuli = ŝajnigi

Kien sendi monon por abono kaj libroj?

Al niaj reprezentantoj

- Austrio:** Rudolf Foltanek,
Wien, I. Herrengasse 2—4. Poŝtkonto nro 19.704
- Aŭstralio:** L. E. Thomson, Pymble N. S. W.
Tallangetta, Church str.
- Belgujo:** Belga Esperanto Instituto *Antwerpen*,
Kleine Horndstraat 11. Poŝtkonto nro 1689.58.
Flandra Esperanto-Instituto. *Kcrtrijk*,
Marckesteeweg 18, poŝtkonto no 196906.
- Britujo:** Alec Ventura,
Mitcham, (Surrey) 42 Hawkes Road.
- Bulgarujo:** Centra Librejo »*Esperanto*«
Sofia str. Maria Luiza 38.
- Cehoslovakio:** *Hradec-Kralové*. Otto Sklenčka.
- Danujo:** Iosek, sro L. Friis *Aabyhøj*, Frodesvej 21.
- Estonio:** Helmi Dresen, *Tallinn*, Poŝtkest 6.
- Francujo:** Saŭ Grenkamp Kornfeld, *Paris*, 14 e, 117.
Bd Jourdan poŝtkonto nro Paris C. 1052—01.
- Germanujo:** Poŝtekkonto de Vilmos Bleier,
Berlin 138084
- Hispanujo:** Ferdinand Montserrat,
Barcelona, str. Provenza 75, 2—3a
- Italujo:** Itala Esperanto Centro *Milano*, Galleria
Vittorio Emmanuele II. 92.
- Jugoslavujo:** Sudslava Esperanto Servo
Zagreb, Primorska 11.
- Latvio:** A. Libers. *Jelgava* »Jelgavas Audums«
- Nederlando:** Leo Moreau,
Arnhem, Raapopsche weg 55. poŝtkonto nro 13848.
- Polujo:** Halina Weinstein, *Warszawa*, str. Leszno 99
Izrael Lejzerowicz, *Lodz*, Skwerowa 20.
Poŝtkonto nro w. P. K. O. 68273.
- Rumanujo:** Esp.-Instituto Rumana, *Cluj*, str. Bravilor 15
- Svedujo:** Förlagsföreningen Esperanto,
Stockholm, 1. Fack 698 Poŝtĝirokonto nro 578
- Svisujo:** Nova Esperanto Grupo, sro Hans Pfiffner,
ST. Gallen C. Gallusstrasse 34.
- Japanujo:** Japana Esperanto Instituto *Tokio*, Uŝig-
omeku, Sin' Ogaŭamaĉi III.
- Usono:** Amerika Esperanto-Instituto.
Madison, (Wis.) Sherlock Hotel

Nia nova abonprezo

Bonvolu noti: Tutjara abono dol. 1.80, duonjara dol. 1.—, kvaronjara dol. 0.60. Opa numero dol. 0.20.

Responda redaktoro: **Karlo Bođó**

Redaktoroj: **Francisko Szilágyi kaj Ludoviko Totsche**

Ĉefkunlaborantoj: J. D. Applebaum (*Liverpool*), A. Behrendt (*Berlin*), P. Bennemann (*Leipzig*), J. Berger (*Köln*), M. Blassberg (*Krakow*), S. Bartha (*Budapest*), Helmi kaj Hilda Dresen (*Tallinn*), Stellan Engholm (*Nyberget*), Jean Forge (*Bydgoszcz*), Petro Firu (*Bucurcst*), S. Grenkamp Kornfeld (*Paris*), Parvus Piscis (*Budapest*), R. Hromada (*Praha*), Teo Jung (*Köln*), I. Yurista (*Czesztohowa*), S. Kamaryt (*Bratislava*), E. Knutsson (*Malmö*), I. Lejzerowicz (*Lodz*), W. Lippmann (*Leipzig*), Miloš Lukáš (*Trnava*), Alessandro Mazzolini (*Fano*), T. Morariu (*Cluj*), L. N. Newell (*Paris*), P. Nylén (*Stockholm*), Jan van Schoor (*Antwerpen*), Kenelm Robinson (*London*), K. R. C. Sturmer (*London*), R. Schwartz (*Paris*), L. E. Thomson (*Pymble, Aŭstralio*), G. Waringhien (*Lille*), Leono Zamenhof, Feliksi Zamenhof, Lidja Zamenhof, E. Wiesenfeld (ĉiuj en *Warszawa*).

Averto: Manuskriptojn la redakcio ne redonas. La rajton, fari en ĉiu ensendita manuskripto stilajn korektojn la redakcio rezervas por si, se la verkinto aŭ tradukinto anticipe ne protestas. Por la publikitaj artikoloj, faritaj por la rubriko *Observo*, L. M. pagas sen kliŝo 10.— pengojn, kun la prunta alsendo de necesaj kliŝoj 15.— pengojn. La kostojn de la kliŝosendo kovras LM.

La redakcio akceptas nur unuflanke maŝinskribitajn artikolojn kun sufiĉe larĝaj margeno kaj liniaj interspacoj. Escepte tamen estas akceptataj manuskriptoj kun *deseĝnitaj* aŭ tre klare skribitaj literoj.

LA GRAFOLOGIA KARAKTERSKIZO DE ZAMENHOF

— LÁSZLÓ FARKAS—FENYVES, Budapest —

Multaj atribuas eĉ nun superhomajn kapablojn al la grafologo, imagante lian arton ia mistera, kabalisma »sorĉado«. Estas sendube, ke la skribanalizo postulas talenton, inventemon kaj kombinivan povon, sed ĉi tiujn propraĵojn la grafologo povas utiligi nur helpe de la rezultoj de la scienca skribesploro. Por ilustri la sciencan skribesploron, ĉi sube ni prezentas la procedon pri la analizo de skribo, kaj poste la tiel observitajn karaktertraĵojn ni kompletigos per la individuaj trovaĵoj de la grafologo.

Varsovio 2/14 1932

Estimata Sinyaro!

Respondon je via demando kaj rimarkoj
ki trovos en la libro »Respondoj
al la societo», kin estas eldonita post
4-5 semajnoj je ĉiu akzo en la ukas
de ĉi ĉi por via bona volo
Kun estimoj
Lopplomb

La ĉi supra skribo devenas de la mano de Zamenhof. La unua impresado dum la rigardo de la skribo determinas la grafologian *valornivelon*: ĝi estas individua, kolora, travivita skribo, do la opajn skribtraĵojn ĝenerale favore ni prijuĝos. La evidentaj propraĵoj, la dominantoj de la skribo estas: *senreguleco, ligiteco, rapido kaj malforta plumo-premo*.

La senreguleco de la skribo montras multflankecon de animo, sed samtempe ankaŭ senharmonian sentaron. La *ritmo* de la skribo (individuaj literplektadoj, simpligitaj skribelementoj) igas nin konkludi pri intensa vivo: liaj sentoj forte reagis je liaj eventoj kaj travivaĵoj. Krome ni povas vidi en la skribo delikatan sentemon, viglemon kaj potencon agdeziron.

El la *ligiteco* de la skribo ni povas konkludi unuavice pri spirita kapablo. Li havas eksterordinare akran perceptivon, logikan kaj disciplinitan cerbon. La opaj literplektadoj estas la signoj de bona observkapablo, spirita memstareco kaj kritiko. La liniokonduko kreas kombinon de fadenaj kaj arkadaj formoj (m kaj n) el kio oni povas konkludi pri streĉitaj nervoj kaj enfermiĝemo. La opaj arkadformoj, aparte, montras persiston kaj tenacon.

La *grandeco* de la skribo estas normala, do li estas memkonscia, sed ne arogema. La grandigo de la opaj litertraĵoj (r, g, j) esprimas la enhavriĉon de la senta vivo, sed samtempe atestas ankaŭ pri animaj problemoj kaj penaj meditoj.

La granda *rapido kaj ligiteco* de la skribo estas la projekcio de spirita kapablo: celkonscio, produktemo, mensa fekundeco. La *granda rapido kun arkada liniokonduko* montras intelektan persiston, tenacon, eĉ, en kelkaj rilatoj, fanatikan fidelon al principoj. Fiksinte por si celon, li povas koncentrigi sian tutan energion, li administras sin kun bona kapablo

de trarigardo kaj kun kontentiga organiza forto. La plumo-premo estas facila kaj proporcia, kio estas signo de spirita vigleco, kritika sento kaj pli altranga inteligento.

La larĝeco de la skribo estas normala, la malplenaj lokoj inter la vortoj estas proporciaj, montrante memkritikon kaj disciplinitecon. Li estas energia, agema, produktiva en laboro.

La tre antaŭenklinita skribo pravas, ke li forte reagis je siaj travivaĵoj, siajn impresojn li zorge konservas, kion lastan konfirmas ankaŭ la forvagantaj malsupraj litertraĵoj.

La skribo estas dekstren-ira, la linioj havas konstantan direkton al la dekstra margeno, atestante pri granda laboremo, kaj samtempe pri vasta kontakto kun la ekstera mondo.

La skribo estas ĝenerale simpligita, individua. Superfluaĵoj ornamaj mankas (majuskloj!), la aŭtoro do havas realan vivkoncepton kaj klopodas, sen pozoj kaj eksteraj efektoj, pri senpereco kaj senartifikeco.

La interlinioj estas ordigitaj, projekciante la sistemon de lia penso-mondo: li povas akre distingi, disponas pri vasta trarigardkapablo. La dekstra margeno estas sendecida, el kio ni povas konkludi pri certa senpercepteco en materialaj aferoj.

La literoj estas plejparte individuaj, modifitaj, do ili devenas de pli altranga intelekto (L, K, s, g, n, r). La antaŭenklino de la majuskloj malkaŝas ĝentilecon, socialan inklinton. La finoj de la vortoj estas pli malgrandaj, ol la kutimaj trunkliteroj: ĉi tio estas signo de kombinkapablo, kaj signo de akra perceptemo.

La ĝisnunaj konstatoj donas la spinon de la skribanalizo. Komprenible, la tiel elfositaj karaktertraĵoj estas en si mem ankoraŭ senordaj kaj prezentas nur sekan, krudan kaj mankhavan karakterbildon. Se ĉi tiujn konstatojn ni grupigas, kaj ilin ni kombinas kun la spertoj de la grafologia praktiko, kaj kompletigas per la individuaj, intujaj trovaĵoj de la grafologo, ni havos la sekvan, unuecan, koloran karakter-skizon:

Homo vastkoncepta, disponanta pri neĉiutagaj spirita kvalitoj. En lia vivaranĝo la intelektaj faktoroj unuigas kun lia enhavriĉa sentmondo en feliĉa harmonio: li estas vastperspektiva, li povas transrigardi siajn vivcirkonstancojn. Li estas ĉiufibre laborema kaj kreema, liaj streĉitaj nervoj instigas lin por konstanta produktado. En sia laboro li estas ekstreme produktiva, en la intereso de siaj celoj li subpremas siajn nervozajn inklinojn, li estas devkonscia, liaj vivkonceptoj estas korektaj.

Lia spirita vivo estas ordigita. Li estas inventema, memstara, havas fekundan menson kaj fortan logikecon. Celkonscia, en intelektaj sferoj persista kaj tenaca, ofte ĝis fanatismo, sed lia akra kritika sento retenas lin de troigoj. Por siaj celoj li povas koncentrigi sian tutan energion, li administras sin kun akra trarigardkapablo kaj kontentiga organiza forto. Memkonscia, sed neniam tromemfida aŭ tropretendema. Li havas akran konceptkapablon kaj vastan intereso-sferon. Realema, tute sen dogmoj kaj antaŭjuĝoj; sociaj eksteraj aĵoj kaj vantaĵoj lin ne logas.

Senpera, sed ĉi tiu ekstera senpereco kaŝas senteman, enfermiĝeman animon, ĉar je komunikado,

plena ekmondo de sia senta vivo li estas ema nur kun malmultaj homoj, li ne volas ŝargi aliajn per siaj problemoj. Lia sentomondo estas riĉa, je siaj travivaĵoj forte li reagis, siajn impresojn zorge li konservas gardante, liaj individuaj, koloraj observoj donas apartan enhavon al lia vivo. Lia sociala sento estas alte evoluinta, volonte li helpas. Li estas treege bonvola,

plena de sento, de amo, en liaj agoj lin direktas liaj sentoj, tiel, ke en materialaj aferoj ofte li estas cedema kaj humana je sia propra malutilo.

Generale, per ĉi tiu skribo ni ekkonas maloftan, grandskalan, valoran homon, kiu pli multe produktis, ol kiom li povis atendi de la vivo kaj multe pli multe donis, ol kiom li ricevis kontraŭvalore.

Bohema tago

L. N. Newell, Paris

La studento malrapide malfermis unu okulon kaj metis la pinton de la nazo ekster la litkovrilojn; kaj tuj ĝin retiris. Frostas ankoraŭ ĉi matene; li kuŝis kelkajn momentojn rigardante sian spirovaporon levigantan al la plafono, ĝuante la varmon de la lito.

Tre kontente li pensis pri nenio. Nenio... nenio... kiom bela estas nenio... nenio estas nenio; vere. Subite li saltsidiĝis sur la lito; diablo! kioma horo estas? Li time rigardis la horloĝon. Gi estis bela horloĝo, donaco de parencoj en lia hejmlando malproksima kaj aspektis, se oni ne tro atente rigardis, kvazaŭ el oro. Gi fruis dek minutojn po tago: utila trajto ĉe horloĝo de tiu, kiu devas levigi frue. Bedaŭrinde, li neniam aŭdis ĝian sonoron matene kaj dormis ĉiam preter la levigo-horo; ĝia speciala merito do ne multe utilis.

Gi montris naŭan kaj duonon. Infero kaj diabloj! Li malfruos denove ĉe la unua prelego en la Sorbono. Li faris konvulsian movon, kvazaŭ por salti el la lito: tiam paŭzis. Tamen, tamen, ĉu ne estas libertempo hodiaŭ? Malrapide la bela penso grandigis lian koron, tiel ke li forgesis eĉ la malvarman aeron ĉirkaŭ siaj ŝultroj. Jes, vere, marŝalo de Francujo mortis kaj hodiaŭ oni enterigas lin. Benata estu tiu marŝalo! Oni dekretis libertempon unutagan. Oni ne bezonas esti pacifisto por deziri la morton de ĉiu marŝalo kaj generalo en la mondo!

La studento rapide refalis kaj kuŝis sur la maldekstra flanko. Nu, necesas levigi, tamen; oni ne povas dormi kiel porko tutan tagon. Li konsultis sian stomakon; tio ankaŭ konsilis la paŝon necesan por matenmango. Li turnis sin kaj kuŝis sur la dekstra flanko, kaj fikse rigardis la malhelajn murojn de la ĉambro, la polvokovritan plankon; bedaŭrinde, ke la dommastrino estas tiom mallaborema — sed kiam oni pagas nur cent kvindek frankojn monate, oni ja ne kuraĝas plendi. Li rigardas la morman fornon, kiu nenion entenis de kiam li ekluis la ĉambron; kaj per natura flugo de l' penso, li rigardis tra la altaj fenestroj la grizan, neĝogravedan ĉielon. Ankoraŭ pli malvarme!

Li serĉis kialon por ne levigi... sed ne trovis. Do jen, jam li sidas sur la rando de la lito, penseme okulumante siajn pantoflojn pacience atendantajn. Hezito ne utilis; li saltis al la nuda planko kaj rapidege surmetis la pantoflojn, kaj staris momente, aŭskultante. Nenia sono, krom la majesta tiktakado de la horloĝo; do la dommastrino jam foriris al sia ĉiutaga laboro. Li povus kredi, ke tuta Parizo mortis, aŭ perdiĝis sub dika neĝtavolo. Kun tiro de la ŝultroj li iris en la malgrandan kaj malpuran kuirejon kaj plenigis kaseroleton per akvo. Tiam fivortis; li denove lasis la alumetojn en la litĉambro. Tremante kaj sin ĉirkaŭbrakante, li susure paŝis al la apudlita tableto, kiu portis la kandelon kaj libron kiuj provizis la lastan

regalon antaŭ dormo nokte, prenis la alumetojn, kaj reiris al la gasforno en la kuirejo. Bruliginte, li komencis akriĝi sian razilon; li troigis siajn movojn por varmigi sin samtempe. Liaj pensoj vagis al la hejmo trans kvar landlimoj; kiom varme estis tie! Kiom bone malsupreniri la ŝtuparon en la mangoĉambron, kaj manĝi ĝis sato kun konataj, amataj vizaĝoj! Ah! eble estas letero. Li rigardis ĉe la ekstera pordo de l' apartamento; ne, ne estas hodiaŭ. Kiam li trovos oficon, post fino de l' studoj, li plenigigos tiun fornaĉon, ĝis ĝi ne povos spiri; diablo! oni bezonas tutan jaron por revarmiĝi!

Bolas la akvo; bone. Li plenigis tason kaj portis al la granda spegulo de sia vestoŝranko. Trempinte la penikon, li komencis ŝmiri la vizaĝon, kun volupta sento ĝuante la varmon de l' akvo. Nun li iomete malpli tremas; bone, ĉar oni facile tranĉas al si la oreton, sin ruzante, kiam oni tremas pro glacia aero.

Li rigardis sian vizaĝon tre serioze en la spegulo. Kurioza tipo; fine, estas io simpatia, en kelkaj pozoj. Li komencis sapumi, kaj altigis la nazon. Nu, jen, tiel li havis mienon iom impresan; jes, sed ne estas bone alpreni tian sintenon kiam oni estas malriĉega kaj samtempe ne scias obeigi eĉ kelneron... Eble tiel, jes tiel, kun la kapo klinita antaŭen, la okuloj larĝe, melankolie malfermitaj, jes, tiel li aspektas — nu, interese. Subite li ekkonsciis pri siaj agoj, moke kurbigis la lipojn al sia reflektito, tremrapide alprenis la razilon kaj entuziasme skrapis.

Denove la ĉiutaga problemo: ĉu lavi sin per varma akvo aŭ malvarma? Li estis stariginta por si spartanan regularon, por sin hardi; kaj inter ili troviĝis la tre firma regulo, lavi sin ĉiam per malvarma akvo, eĉ dum la plej malvarma vetero. Sed... sed ja kostas nenion, kaj li hodiaŭ ne povos pasigi la matenon en varma aŭlo de la universitato. Li reveme portis kuveton, sapon, dentbroson kaj dentpudron, kaj mizere maldikan viŝtolon, al la ŝtona trogo de la kuirejo; tamen, ne estas bone cedi sin al la luksemo, almenaŭ, ne ĝis kiam oni havos sufiĉe da mono por kontentigi sian deziron. Ankoraŭ profunde pripensante la problemon, li mehanike, nekonscie, plenigis kaserolon per akvo kaj bruligis la gasforon. Vidinte sian agon li ridetis rezigne... Li ĝoje trempis la manojn en la varma akvo, kaj komencis lavi sin. Kion diris la angla poeto pri »la beno de l' varmega akvo«?

Preskaŭ varma, krom ĉe la piedoj, li sekigis sin, kombis la harojn, kaj zorge prenis la pantalonon de inter la matracoj. Necesas akrobataj pozoj por demeti la pijamon kaj surmeti la pantalonon tiel, ke la ekstremoj ne tuŝu la polvon sur la planko; sed li sukcesis. Li kritike rigardis sian kolumon; eble oni povos porti ĝin ankoraŭ pluan tagon? Ne estas tre malpura, kaj cetere, li ne devos montri sin hodiaŭ al la profes-

oroj. Lastan semajnon la tollavo kostis pli ol dek frankoj; tiun ĉi semajnon necesas ŝpari.

Vestinte sin, li admiris en la spegulo la faldon de la pantalono; kaj sin turnis al la plej grava ero de la matena ceremonio: la matenmanĝo. Li portis la lakton, aĉetitan hieraŭ vespere, al la kuirejo, kaj denove bruligis la gason sub la kaserolo. Dum la lakto varmiĝis, li pecigis panbuleton kaj metis en tasegon; kaj poste surverŝis la bolintan lakton. Sidinte ĉe la tablo, kaj apoginte lernolibron pri la romana juro kontraŭ la kruĉo, li komencis manĝi. Li manĝis malrapide, plengustumante ĉiun buŝplenon aprezeme: ja ne estos plua manĝo ĝis la vespero. Fininte la manĝon, li provis ankoraŭ studi, sed ne povis atenti la legaĵon: li tro tremis de la malvarmo.

Kun suspiro,* li levigis, surmetis la ĉapelon kaj palton, kaj eliris, zorge ŝlosante la eksteran pordon. Nun malsupren, unu, du, tri, kvar, kvin, ses etaĝojn. Ĉe ĉiu etaĝo la peza bruo de la urbo pliläutigis, kaj li aŭdis la akran trumpetadon de la taksioj. Li kriis »Bonan tagon, sinjorino!« al la pordistino, kaj jam staris sur la strato. Parizo havis sian kutiman matenan aspekton. Fluis kantete pura akvo ĉe l' randoj de la vojo, tiel ke la subaj ŝtonoj prenis siajn naturajn helajn kolorojn, kaj faris frapan kontraston kun la kota trotuaro. Estis nigra vento, kiu silente kaj rapide ŝtelis la varmon; la ĉielo subpremis la teron. La domoj ŝajnis kunpremi sin por trovi iom da ŝirmo kontraŭ la vento.

Kien? Unue al la Panteono. Li elektis punkton sur la granda placo de kiu li povis vidi samtempe la Panteonon, la preĝejon St. Etienne-du-Mont kaj la longan flankon de la biblioteko Ste. Geneviève. Tre baroka, tiu St. Etienne-du-Mont, tre jezuita, iom tro emfaza, sed gaja, fiera, kurbe bela, eĉ sub la ombranta maso severa de l' Panteono. Kaj la renesanca gracio de la biblioteko memorigis lin pri la suno de Italujo. Jes, li pravis, venante al Parizo; esti ĉirkaŭita de tiaj belaj valoras la malvarmon, la nesufiĉan mangadon, eĉ la solon. Li staris por aprezi la scenon, sed la vento ponardis lin, kaj li formoviĝis, profundigante la manojn en la poŝojn.

Li paŝis en tiun perditan vilaĝon, kies centro estas la placo kie renkontiĝas la strato Descartes kaj la strato de la Montagne Ste Geneviève: vilaĝo antikva, vivoplena, malriĉega. Li rigardis la dommastrinojn susurirantajn en pantofloj al butikoj, kun pensoj kuncentritaj je ŝparo.

Kioma horo? La dek-unua kaj dek-kvin. Ankoraŭ kvardek-kvin minutojn ĝis kiam li povos permesi al si tason da kafo. Li komencis marŝi malrapide, sed denove haltis. Ja kien? Nu, al la Sejno, ni vidu ĉu ankoraŭ estas inundo. Pasante la kafejojn, li forturnis la kapon, por ke la tento eniri ne estu tro forta. O plumbopieda tempo, kial oni diris, ke vi flugas? Vi eĉ ne rampas... Ah, jen la Sejno, kaj Notre Dame revanta pri siaj jarcentoj kaj pri sia ne plu komprenata belo. Tiu kirliĝanta, grize-verda akvo — kiom kruela, malvarma! Kiel la homoj povas ĝin preterpasi, eĉ ne rigardante kun tremeto? Li forturnis la okulojn, kaj komencis trafoliumi la librojn de la librovendistoj de la kajo, sed sen granda intereso, sciante, ke li ne povos aĉeti. Se oni amas librojn, estas malbone rigardi ilin kun poŝoj malplenaj.

Ĉu eterno komenciĝis? Estas ankoraŭ nur dudek antaŭ la dekdua. Ankoraŭ dudek minutoj: dudek

* Suspiro: senvoĉa ĝemeto de rezigno aŭ sopiro.



Berthe

Portreto

eonoj, dudek abismoj en la tempo, ĝis kiam li povos eniri lokon kie estas homa varmo.

Li tiris ĉirkaŭ si pli strikte la palton, kaj klake paŝis sur la ponton. Se li marŝos al Parvis Notre Dame, al la Châtelet, trans la riveron denove, tiam laŭ strato Monsieur le Prince (kiom ĝia nomo memorigas pri tiu helkolora teksotapeto, kiu estas la historio de Francujo!) en la ĝardenon de la Luxembourg, kaj de tie laŭ bulvardo St. Michel, li alvenos al la kafejo de la Sorbonne proksimume je tagmezo. Eble li tie renkontos konaton de l' universitato; estus bone babilu super bonodora kafo.

En la kafejo estis la kutima aro da studentoj: junaj, fanfaronemaj, kiantaj aforismojn por solvi ĉiujn problemojn de l' universo. Estis tie neniu de li konata, sed rekompence estis varme, viglige. Li mallevis sin sur remburitan benkon kun suspiro, kaj mendis la sopiratan laktokafon. Li metis alumetojn kaj cigaredojn sur la tablon, kaj atendis: la sibarito estas metodema pri siaj plezuroj, kaj la studento neniam bruligis sian cigaredon ĝis post la unua gustumo de l' kafo. La kelnero tinte starigis la glaseton, kun miriga lerto jetverŝis unue kafon, poste lakton. La studento kirlis zorge, pie gustumis, kaj atentis la revenan guston sur la palato. Li ja estis sibarito. Nun la cigaredo. Li prenis unu el la cigaredujoj; ekzamenis; elektis la pli firman ekstremojn; kaj metinte inter la lipojn, almetis brulantan alumeton. Li ensuĉis ravite la fumon kaj tenis en la pulmoj, kun duonfermitaj okuloj; elspiregis, kaj rigardis la levigantan nubon. Ah, jen ĵurnalo, okazo por ekzerco pri la franca lingvo; li legis atente.

Je la dua kaj duono li eksentis sin nekomforta; ne plu estis eble sidi senzorge, profundiginta en la legaĵo. Li levis la rigardon, kaj renkontis la akuzajn okulojn de la kelnero, kiu ne aprobis homojn kiuj sidas preskaŭ tri horojn super unu glaso. La studento rapideme trinkis la lastan malvarman guton de la kafo, metis frankon kaj duonon apud la teleron, surmetis la ĉapelon, kaj eliris sur la bruon bulvardon. Li sentis sin varma,

Poemoj

- Hendrik Adamson -

Rezigno

Ne frapu sur koro, fermita la pord'
kaj vana la peno, iru for, iru for!
Mi longe atendis, sed, laca ĝis mort'
nun ĉesis, forgesis, iru for, iru for!

Varmege mi amis, doloris la kor'!
ĝi plu ne doloras, iru for, iru for!
mi plendis pril' sorto kun larmoj kun plor'.
nun ĉesis, forgesis, iru for, iru for!

Mi vokis, mi ludis, disŝirigis la kord'
la harp' disrompigis, iru for, iru for!
furioze batalis mi kontraŭ la sort',
nun ĉesis, forgesis, iru for, iru for!

Ne veku pasinton; ho, kia tortur',
se ĝi revivigos, iru for, iru for!
Ne frapu sur koro, fermita la pord'
kaj vana la peno, iru for, iru for!

Amekstaz'

Kisu min, mordu min,
amu ĝis morto min,
eble vi morgaŭ min
ne amos plu.

Eble vi lasos min,
baldaŭ forgesos min
kaj ne permesos min
vin ami plu.

Ho, ĉi-tiu hor'
de volupt', ador',
kune ĝoj', dolor',
gaja rid' kaj plor'.
Verva amfervor'
ĝis ekkrev' de kor'
kaj post ĝi langvor',
dolĉa rememor'.

Nin luladu anĝeletoj
kaj bruladu kandeletoj
hele, brile,
vi eksonu, gajaj triloj
de amkantoj,
por dormigi geamantojn
en nokthoro,
kor' ĉe koro.

Nin vizitu, sonĝo ora,
ond' de flora
bonodoro...

Ŝi

Hararo via sukceso,
okuloj nigraj agat',
fajreroj en ili rubenoj
kaj lip' el karn' de granat'.

Manetoj sen dub' alabastraj,
unĝet' kvazaŭ rozpetal',
briletas vi astr' inter astroj,
el plej multekosta metal'.

pli esperema; sed la penso pri la kvin horoj inter
nun kaj la vespermanĝo ombris lian menson.

Per marŝado rapida kaj malrapida, per rigardado
en butikofenestrojn, per observado de la tipoj sur la
stratoj, per meditado pri la belsonaj kaj memorplenaj
nomoj de la stratoj Parizaj, per kvaronhoroj pri kiuj
li poste memoris nenion, li sukcesis pasigi la tempon
ĝis la sesa kaj duono; kaj tiam li permesis al si la
lukson, demandi sin, en kiu lando li vespermanĝos.
Eble en la rumana aŭ la hungara restoracio; la pladoj
estas grasaj kaj varmigaj. Eble en la ĥina — ne, oni
bonege manĝas, sed por unu persono la kosto estas
iom alta. Eble en la rusa ĉe la supro de la strato St.
Jacques; tie oni povas aŭskulti belajn rusajn kantojn
ludatajn per gramofono, kaj la borŝto estas rava. La
pola proksime de la Luxembourg estas ankaŭ multe-
kosta; tiu ne taŭgas. Ĉu la bulgara en la strato
Monsieur le Prince? Aŭ la rusa vegetarano en la strato
de la Montagne Ste Geneviève? — tiu estas malkara,
pura kaj kvieta; sed ne, hodiaŭ li nepre deziras iom
da viando. Ĉu la itala... tamen, ĉu tiu vegetara, kiu
kostas nur kvar frankojn, kaj kie ne estas kelneroj?..

Li marŝadis, pensante pri la elekto; surprizite
rimarkis, ke estas la sepa dek, kaj ankoraŭ li ne estas
elektinta. Nu, necesas decidi; kiun iri? kiun iri? Nu,
la rusa; li ekpaŝis. Tamen, tiu estas je fiksita prezo,
kaj en tiaj restoracioj oni preferas rapidajn gastojn.
Do, estu la rumana; estas tie varmiga manĝo.

Horon kaj duonon poste, li trankvile paŝis denove

en la kafejon de la Sorbonne, kun la mieno kaj kon-
tenta menso de bone nutrita grafo.

Li mendis kafon, ekfumis la trian cigaredon de
la tago, kaj eltiris el la poŝo la Eneidon, kiu nun,
post tuttaga portado, taŭgis al lia humoro. Li profund-
igis en la ondanta tondro, la fatala marŝo de la latina:

Tamen ĉielo turniĝas kaj el Oceano levigas
Nokto, per ombro densega vindante poluson kaj teron,
Kaj artifikojn Mirmidajn: tra urbo Trojanoj vagadas,
Poste silentas; kaj membrojn lacetajn penetras dormado,
Kaj militaro Arguja samvice sur ŝipoj elvenis
Jam al Tenedo, vidata sub luno amike silenta:
Bordon ĝi iris konatan. Dum fiamon levigas ĉefŝipo
Reĝa, Sinono, de diaj fataloj savita maljustaj,
Trabojn malfermas abiajn, Danaojn en ventro kaptitajn
Liberigante. Tuj ilin al lumo redonas ĉevalo
Monstra...

Subite li vekigis; oni parolas al li — kio estas?
Tiam li rimarkis, ke la virino sidanta ĉe la tableto
argumentas kun la kelnero pri la pago, kaj en rapida
franca lingvo petas la subtenon de la studento.

»Pardonu, fraŭlino, mi ne aŭdis — vi komprenas,
mi ne tre alktumigis al via lingvo — mi estas ali-
landano...«

Rigardinte lin serioze, trankvile, ŝi sin turnis al
la kelnero, kaj daŭrigis la argumenton. La studento
provis reiri al Trojo:

Poemoj

— Hendrik Adamson —

Ĉu ni

Arbaroj plenaj je piceoj,
en kapoj mankas la ideoj.

Bonege kuras la kasistoj,
la kankroj »ruĝaj« kaj »faŝistoj«.

Londone-densaj la nebuloj,
lingvistoj luktas kun reguloj.

En parlament' ekzercoj boksaĵ
kaj' paroladoj paradoksaĵ.

Malsato regas ĉe l' verkistoj,
sen trust' produktas nur ĉerkistoj.

Al profeto

La mond' deliras sangebria,
pretiĝas nova fratobuĉ' ;
profet', ne ĵetu perlojn viajn
al porkoj ; via dev' — la fuĝ', —
dezerto viajn pensojn scias,
se vi predikas, ŝtonoj krias.

Preferu vian liton sablan
al kiu ajn alia lit'
kaj la mizeran manĝotablon
al tablo de la sibarit',
li longe antaŭ mort' jam putras,
laŭ vol' de Di' vin korvoj nutras.

Sur via korp' la simplaj vestoj
neniom cedas al purpur' ;
vizitas milde vin la bestoj,
alproksimiĝas kun murmur' ;
dum homon ŝiras hom' per dentoj,
indulgas tigroj vin, serpentoj.

Sed iam ankaŭ hom' komprenos,
ke li naskiĝis por fratam' ;
nur tiam via temp' alvenos
por ke ekbrulu vorta flam',
nur tiam via pov' sin montros,
subite via voĉ' ektondros.

Gis tiam — preĝo kaj silento,
atendu, — aliĝas mond',
ekkaptos nepre homojn pentoj,
ekregos nepre homojn hont',
eksonos ĉie larmaj ploroj
kaj por semad' pretiĝos koroj.

Cim'

Cim', cim', ĉi mordas min
sen hont', sen tim',
cim', cinika cim'.

Cim', cim', mi kaptos cin,
dispremos cin,
cim', cinika cim'.

Estis momento ĉi kiam unua dormeto komence
Donon dankindan de dioj en homojn enigis mizerajn.
Jen al mi, antaŭ okuloj, subite Hektoro aperas
Songe, fortege malĝoja, kaj larmojn verŝanta multegajn ;
Tiel li estis do, kiam duopaj lin trenis ĉevaloj,
Sanga je polvo kovritan, per liaj piedoj ŝvelintaj,
Kiujn rimeno traboris...

Ne eblas ; la ĉarmo forflugis. Li ekrigardis la
fraŭlinon, kaj trafis ŝin rigardanta lin. Li rimarkis
rapide, ke ŝi portas felan palton, estas juna, pala kun
ombroj sub la okuloj, diskrete ŝminkita, havas brunajn
harojn.

»Tiuj kelneroj !« ŝi diris ; »ili ĉiam tro postulas.
Vi parolas france ?«

»Jes, meze bone, kaj komprenas bone se mi
atentas.«

»Nu, vi tre baldaŭ mastros ĝin. Vi estas
studento ?«

»Jes, fraŭlino.«

»Mi bone konas la studentojn. Mi estis la amik-
ino de studento alilanda, ĝis antaŭ ses monatoj. Sed
li finis siajn studojn, kaj reiris al sia hejmo.«

Li sentis al ŝi grandan dankemon : unua dum la
tago ŝi parolas al li homece. Liaj okuloj karesis ŝin,
ridete.

»Do, vi eble nun estas iomete sola ?«

»Jes, antaŭe mi ĉiam estis kun li — nun mi
estas sola. Li devis reiri ; sed li ne tre bone traktis
min. Li proponis doni al mi dek mil frankojn, sed mi

volis dudek mil — oni devas vivi. Li rifuzis, sed de
tempo al tempo li sendas al mi iom da mono.«

»Kio estas via profesio ?«

La studento ruĝiĝis ; li sentis subite, ke eble tiu
demando estas maltakta. Sed ŝi respondis tute trankvile.

»Mi estas kudristino — sed mi ne laboras nun.
Oni ĉiam devas labori sub virino, kaj tion mi ne povas
toleri. Vi komprenas ? — la virinoj amas piki unu la
alian, kaj kiam estas tro multaj en profesio, oni ne
povas argumenti. Ne, tion mi ne ŝatas.«

»Do, ĉu vi — ĉu vi permesas demandon ?...«

Kiel vi sukcesas subteni la vivon ?«

»Ŝi ete tiris la ŝultrojn kaj grimacetas ĉarme.

»Nu, mia studento kelkfoje sendas monon. Mia
ĉambro kostas nur cent dudek frankojn monate. Mi
vivas. Sed la iometo da kapitalo, kiun mi havis, eluzi-
ĝas ; necesas io. Do mi kelkfoje konatiĝas kun sinjoro,
sabaton aŭ dimanĉon — nur sabaton aŭ dimanĉon, vi
komprenas — kaj eĉ ne ĉiusemajne. Kion vi volas ?
Aliaj faras, kaj mi estas tre zorgema, kaj tre diskreta.
Mi neniu ĝenas. Kaj ĉiudumonate mi vizitas la kurac-
iston — ĉiam la ekzameno estas negativa.«

Ŝi rigardis lin demande, ne trude. Denove li
sentis al ŝi absurde, freneze dankema : iom da intimo,
iom da homa kontakto, propono de amikeco — kom-
erca, eble, sed... sed, nu, tamen, ŝi proponas doni
sin, kaj neniu povas fari tion sen varmo ĉe la koro.
Li subite deziregis kunecon kun ŝi, kunparolon, kun-
marŝon ; ne plu la sola vivado, estus iu kun kiu kom-
enti la pasantan horon, la legaĵon, la homojn.

Eterne sama

— V. Sufkovoj —

1928.

Vi, kara, min vizitis
En loko malproksima,
En hele suna tago,
Kaj mi atendis vin,
Amike vento glitis,
Vin, milda kaj intima
Realo de l' imago,
Mi vartis en la sin'.

... Ĉu povas la krajono,
Ĉi lignopeco' senviva,
Rakonti ĉiujn vibrojn
De mia juna kor' ?
Ĉu povas monotono
De verso nesentiva
Plenigi paĝojn librajn
Per dolĉa am-sonor' ?

Ni, kvazaŭ geinfanoj
Liberaj kaj peto'aj,
Kuradis sur vojetoj,
Sidigis ĉe la mar',
Dum sur ĉiel' nubetoj
En ĝojaj karavanoj
Lanugaj, plume molaj
Sin miris en ondar'.

Kaj poste, en vespero,
Ekbrilis sorĉe luno
Sur nigre blua pluŝo
De l' fora firmament'.
Malvarma ĝia sfero
Nin, en la dolĉa kuno,
Aspergis per la duŝo
De hela bril-torent'.

Ni paŝis brak-en-brake
Ĉe detruita muro,
Sed en la kor' ĝardeno
Ekĝermis de l' junag'.
Sub la piedoj krake
Gemploris gruz-susuro,
Kaj ŝajnis ĉi promeno
Feliĉa am-vojaĝ'.

Ni poste longe sidis
Silente, man-en-mane,
Dum pulsas niaj koroj
Laŭ sama ritm-akord',

Kaj nin la pensoj gvidis,
Torĉantaj talismane,
Al miraj landoj foraj
De nigramara bord'.

Dum la plej ĉas'a kiso
Sigelis nin ĉe l' buŝo,
Sen fulma sent' volupta,
For de pasia flam' :
Mi sentis : eta miso,
Nur unu falsa tuŝo
Jam estos romp' abrupta
De nia pura am'.

Kaj tion ni evitis.
Ni ne transpasis sojlon,
Nek levis la kurtenon
De sur diin' Venus'.
Ni for de l' ter' gravitis,
Ŝi serĉis nur konsolon,
Ŝi serĉis nur subtenon
Sur mia juna brust'.

Kaj mi ? ja mia sorto
Eterne estas sama :
Sufero por animo,
Por ne amiva kor'.
Eterna teda sporto
Per pilko — am' senama,
Raket' — intim' kun limo
En la senreva plor'.

Min tutan mi ne donas
Al ama paroksismo,
Mi, tro senenergia
Kaj tro senvola hom',
Nur haltas kaj rezonas
Starante ĉe l' abismo
Kaj en decid' racia
Min ĵetas al fantom'.

Kaj mia tuta vivo —
Nur pala fantomaro,
Nur vaksa panoptiko
Kreita de l' imago'.
Alud' al efektivo,
Premanta song' — koŝmaro
De deliranta psiko,
Akir' por ĉies sag'.

Kia ironio : li eĉ ne havas sufiĉe da mono por bone manĝi ! Se ŝi scius, kiom malriĉa li estas, ĉu ŝi ankoraŭ ridetus tiel amike ? Li esploris ŝiajn trajtojn — la klarajn grizajn okulojn, la buŝon iomete tro larĝan, la iel bonkoran esprimon — kaj li kredis, ke jes.

Li konsciis korpon ĉe sia flanko, kaj suprenrigardante, vidis studentinon iomete konatan.

»Hola ! Estas vi ?«

»Jes, jen mi : ĉu bone marŝas ?«

La virino ĉe la tablo levigis kviete, milde, kaj estis maltrudeme forironta. La studento haltigis ŝin per gesto, kaj proponis la manon. Ŝi premetis ĝin.

»Ĝis revido, fraŭlino ; eble ni denove renkontiĝos

tie ĉi.«

»Eble ; ĝis revido.«

Ŝi ridetis, provante nei sian ekziston per persista nerigardado al la studentino.

La studento turnis la okulojn al la bruanta hom-amaso sub la ŝvebanta fumo ; parolis kelkajn frazojn banalajn, kaj eliris sur la bulvardon. Estis mallume : la kafejoj plejparte jam fermigis. La bulvardo estis preskaŭ senhoma, kaj la vento glacie penetris eĉ la plej dikan palton.

Kun tremeto, kaj malluma penso pri la varmo kaj kuneco forlasataj, li sin turnis maldekstren, al la placo de la Sorbonne. Ĉe la angulo estis malhela, senforma amaso, kaŭranta flanke de rubujo. Preter-

FESTO

— STELLAN ENGHOLM —

Estas ĉirkaŭ tagmezo de la tago antaŭ kristnasko, kiam la maljuna Aleksandro forlasas la hejmon por iri al la stacidomo. Sur la strato inter la longaj domvicoj glitsaltas infanoj kaj veturas per sledetoj kaj faras la glitigan neĝon ankoraŭ pli glacieca kaj perfida. Aliaj venas el la arbaro kun kristnaskaj arbetoj sur sledetoj aŭ sur la ŝultroj. Tien kaj reen kuretas virinoj kaj knabinoj, jen kun ŝarĝo de paketoj el la butikoj, jen kun akvositeloj de la puto, jen kun plenbrako da ligno el la lignejo.

Sed la kristnaska vigleco malmulte interesas Aleksandron. Momente li restas antaŭ sia pordo kaj ankoraŭfoje rigardas sian horloĝon. Poste li butonas la jakon ĝis la mentono, firme premas sian solidan bastonon kaj ekiras.

La vojo, polurita de plandoj kaj sledetoj, ne estas konvena por maljunaj kaj rigidaĵoj kruroj. Atente kaj kun maljunula zorgo li metas siajn piedojn sur la plej sekurajn lokojn, dum li samtempe serĉas taŭgajn apogpunktojn por la bastono.

Post dudekminuta irado tra preskaŭ tuta Torento li atingas la stacidomon.

La trajno ankoraŭ ne alvenis, kaj la junuloj, kiuj pro manko de aliaj plezuroj aŭ pro manko de aliaj interesoj fidele atendas la alvenon de ĉiuj vagonaroj, ankoraŭ restas antaŭ la domo. Ili fumas, babilas kaj rigardas la preterpasantojn kun esploraj kaj pli malpli malicaj rigardoj, serĉante okazon por pika spritaĉo.

Antaŭ multaj jaroj ankaŭ Aleksandro apartenis al tiuj atendantoj. Verdire ili ne atendis ion, almenaŭ ne alvenantajn pasaĝerojn. La seninteresa kaj ĉiutageca vivo tedis ilin, kaj en liberaj horoj ia subkonscia sopiro igis ilin serĉi la akompanion de similuloj kaj lokojn de pli granda aktiveco. Tiel la stacidomo fariĝis ilia kutima renkontejo, same kiel en miloj da aliaj malgrandaj kaj negrandaj lokoj.

Nu, la vizitoj al la stacidomo ne estis tute senrezultaj, kvankam la valoro de la rezulto eble povus esti diskutibla. Iam li tie pli intime kontaktiĝis kun Vilhelma, kaj tio malplioftiĝis lian postenadon ĉe la stacidomo kaj post la edziĝo li tute ĉesigis la junulan kutimon.

La jaroj pasis, kaj iom post iom li komencis rigardi la vivon kaj la homojn kun la senaspira rigardo de maljuniĝanta homo. Kiam li okaze preterpasis la junulojn ĉe la stacidomo, li kelkafoje ekpensis pri sia propra juneco. Ŝajnis al li, ke li nun kom-

prenas la aferojn de la vivo pli bone, ol kiam li mem staris tie. Tiuj junulaĉoj ne atendas iun, li pensis, tamen ili atendas ion. Ili atendas, ke la vivo donu iun aŭ alian favoraĵon al ili, kaj ĉar pli konvena loko ne estas trovebla, ili iras al la stacidomo por renkonti la feliĉon. Nu, bonŝanĉon. Iun tagon iu Vilhelma certe renkontos ankaŭ vin.

Aleksandro staras sur la perono, komparas la tempon de la stacia horloĝo kun tiu de sia propra kaj rigardetas al la apudstarantoj per malfortaj kaj preskaŭ senesprimaj okuloj. Li aspektas maljuna kaj kaduka, tamen li ankoraŭ konservas iom da certa digno kaj belteniĝo.

En siaj junaj jaroj li estis soldato ĉe ĉefurba regimento. Li estis bela viro kaj heroo de bataloj kaj bataloj. Li zorge atentis pri sia teniĝo, plie pro propraj inklinoj ol pro la instrukcio. Nun li ne pensas plu pri tiaj vantaj aferoj, sed la iama soldato ne tute malaperis. Ankoraŭ lia dorso estas rekta kiel tiu de juna oficiro, ankoraŭ la blankaj lipharoj estas virece suprentorditaj, kaj ankoraŭ li povas iri belparade kiel antaŭ tridek jaroj. Sed la esprimo de fiero kaj junula vigleco antaŭ longe malaperis. El lia vizaĝo kaj liaj movoj parolas nur la trankvilo kaj humileco de la maljunaĝo.

Fine akra signalo tranĉas la aeron, kaj oni aŭdas la bruon de la alvenanta trajno. Post minuto ĝi haltas apud la stacio.

Lia vido ne estas bona, kaj tial li preferas resti tie, kie li estas, sed nur malmultaj eliras la vagonojn, kaj baldaŭ li ekvidas tiun, kiun li atendas kaj iras renkonte al ŝi. Ankaŭ ŝi rimarkis lin kaj jam de ioma distanco alvokas lin.

— Tien ĉi, paĉjo! Bone, ke vi venis, ĉar mi havas iom da pakaĵo.

Kaj kiam li estas apud ŝi kaj etendas la manon por saluti, ŝi daŭrigas:

— Bonan tagon, bonan tagon, mi ne povas preni vian manon, vi vidas ja, ke mi havas eĉ ne unu fingron libera. Jen miaj du valizoj, prenu ilin, kaj ni iru. Tiun ĉi pakaĵon vi verŝajne ne volas porti?

La lastan frazon ŝi ridparolas, sed en seka tono, kaj per la dekstra mano, kiu tenas malgrandan valizon, necesuĵon kaj revuon, ŝi faras geston al sia maldestra brako, kie kuŝas infaneto, tute envolvita en lankovrilo.

Aleksandro ne respondas. Dum momento li rigardas la belvestitan knabinojn, sed lia rigardo estas mal-

pasante, li rimarkis, ke estas maljunulino, malpurega, kun gluaĵoj haroj falantaj kaj strioj de maljuneco kaj malpureco sur la vizaĝo. Ŝiaj vestoj estis nuraj ĉifonoj. Ŝi tenis en la manoj difektitan statueton de Sta. Johano d' Arc el gipso; ŝi larme rigardadis ĝin, kaj ŝajne ne konsciis la mondon ĉirkaŭ si. Li kaptis la vortojn, »Bela Johano, mia kompatinda Johano, vi kompatinda...« — kaj ŝi kisis la statueton.

Lia brusto premiĝis; estis io malmola en la gorĝo. Do, eĉ tia estaĵo, tia kompatindaĵo, povas kompati, trovas ion dorloteblan — tiu, kiu mem bezonas senfinan kompaton?

Li palpserĉis en la poŝo, kaj trovis tri frankojn; reiris kelkajn paŝojn kaj donis al ŝi la monon, zorg-

ante ne tuŝi ŝian malpuregan manon. Ŝi nenion diris, sed rigardis lin per nevidemaj okuloj.

Pli malpeze li pluiris, marŝante rapide al la domo. Kiom, do, da mizeruloj estas: sen hejmo, sen fajro, sen manĝo, sen kunulo — sed ĉu sen kunulo? Tiu ĉifonaĵo ja havas sian Stan. Johanojn, duone diino, duone pupo, sed kunulo. Kaj la kompatilo en ŝia voĉo!

Li grimpis la ŝtupojn de la domo triope: tia ekzerco iom varmigas. Lia ĉambro ŝajnis eĉ pli malvarma ol la strato. Li rapide senvestiĝis sin, kaj enlitiĝis. Memorbildoj de la virino en la fela palto kaj la maljunulino en la ĉifonoj dancis en lia cerbo; kontraŭ sia kutimo, li ne povis legi. Li blovestiĝis la kandelon, kaj kuŝis rigardanta la mallumon.

junule laca kaj senviva. Poste li klinas sin, prenas la valizojn kaj ekiras antaŭ ŝi.

La junuloj rigardas ilin kun vigla kaj malica intereso. Ili ekfluŝtras kaj ĵetas kelkajn vortojn post ilin, sed Aleksandro ne aŭdas, kion ili diras. Kiam ili venas al la alia flanko de la stacidomo, la filino subite haltigas lin.

— Ĉu vi estas freneza? Vi volas hejmeniri piede? Tion la ideto ne toleras, krome la valizoj estas pezaj.

— Sed kial ne? La valizoj ne estas tro pezaj por mi, kaj la infano estas bone envolvita. Cetere ne estas malvarme. Ni povos pli bone uzi la monon.

Sed ŝi ne atentis pri liaj kontraŭdiroj. Per manĝesto ŝi alvokas aŭtiston, kaj post momento Aleksandro sidas apud ŝi en aŭtomobilo.

Kiam ŝi iom komfortigis al si la lokon sur la sidejo, ŝi tuj komencis babili.

— Ĉu vi povas imagi, mi preskaŭ preterveturis la stacion! Mi legis en tiu ĉi revuo, kaj la rakonto estis tiel interesa, ke mi tute ne atentis pri la stacioj. Nur en la lasta momento mi ekvidis, ke mi estas hejme. Urĝege mi devis pretigi min por eliro, kaj pasaĝero helpis min pri la valizoj.

Kun bonvola mieno ŝi montras la revuon al li.

— Ĉu vi ne legas tiun ĉi revuon hejme? Veraj rakontoj el la vivo estas la plej interesa legaĵo. Kelkfoje mi preskaŭ devas plori, kiam mi legas. Kaj la plej bona estas, ke tiuj rakontoj estas absolute veraj. Ili ne estas tiaj fantaziaĵoj kiel la romanoj de la veraj verkistoj.

Sed Aleksandro ne montras intereson por la revuo, kaj li eĉ ne respondas al ŝi. Ankaŭ ŝi eksilentas. Ŝia vizaĝo komencas esprimi maltrankviligon, kaj ŝajne ŝi hezitas pri la paroltemo.

— Sed patro, kial vi tiel persiste silentas? Ĉu vi koleras al mi? Mi ja estas tiel malfeliĉa, kaj mi ne povas helpi, ke... Diru do almenaŭ ke vi ne koleras al mi.

Aleksandro turnis la vizaĝon al ŝi, kaj velka rideto ludis sub liaj soldataj lipharoj.

— Ne, ne, knabino, mi ne estas kolera.

— Nu, do estas bone. Mi ja estis malsaĝa knabino, sed farita afero estas farita. Kaj certe vi komprenas. Mi memoras ankoraŭ viajn rakontojn pri via junaĝo kaj viaj tiamaj aventuroj. Do vi certe bone konas, kiaj estas la viroj.

— Nu, nu, ni ne parolu pri tio nun, diras Aleksandro kaj ŝajnas vekigi el siaj pensoj. Ĉu vi scias, ke ankaŭ via fratino estas hejme? Ŝi venis hieraŭ. Ja ne nur ŝi, kompreneble, ankaŭ la edzo kaj infaneto.

— Kion vi diras? Mi tre ĝojas renkonti ilin! Ŝia venis ja preskaŭ samtempe kun la mia. Kvankam ŝi estis pli bonŝanca kaj povis edzinigi. Mi preskaŭ devos honti, kiam mi renkontos ŝin. Mi venas ja sola, nur kun mia ideto. Kaj kiom longe ili restos hejme?

Aleksandro ree ŝajnis enpensigi, tamen li donis respondon.

— Ili ja venis por kristnaska vizito. Sed verŝajne dependas de la cirkonstancoj. Li ja estas senlabora, gajnas iom da mono per okaza fotografado, li vendas ankaŭ librojn kaj virinajn subvestojn. Sed certe tio ne donas multan monon. Nun li diras, ke Toronto certe estos bona kampo por li. Kaj tial ili eble restos pli longe.

Li silentis momente. Poste la velka rideto ree ekludis sur liaj lipoj.

La blanka kolombo

— Raymond Schwartz —
Paris

Sed kial li sarkadas ĉiam en sterko.
(El iu recenzo)

Ĉu estis songo aŭ memtrompo?
Mi kuŝis meze de narcisoj
Kaj interŝanĝis kun kolombo
Naivajn pensojn kontraŭ kisoj.

Kon'akte kun la pluma frato
Mi povis jam min improvizi
Kantisto pura de l' beato,
Francisko II-a de Asizi.

Beata, kiu migras blinda
Sur la damnita mondinsulo,
Duoble ŝajnas viv' vivinda
Al simplanima narcisulo!

Ho bela estas al okulo
De l' blanka birdo nia tero;
En ĉiu part' de molekulo
Miraklo pulsas aŭ mistero.

Kaj kulturante la mistikon
Pri la tutmonda harmonio
Mi himne kantis amkantikon
kaj vidis pekon en nenio:

Ĉu jaluzulo? — Li modestas.
Ĉu avarul'? — Ŝparema tipo.
Kaj kolerulo simple estas
En Dia mano forta vipo.

Knabinoj de sekretaj stratoj,
Vi portas la Venusan mirton;
Samariane al homfratoj
Vi podetale cedas virton!

Kaj dum persiste mi konstatis
Nur bildoflankon de l' medalo
La homoj moke min kompatis:
»Jen l' idioto de l' kvartalo!«

Mi ne plu flugos birdodigene
Tra nerealaj paradizoj,
Ĉar la kolombon mi rezigne
Konsumis kun printempaj pizoj...

— Vi ja komprenas, knabino, ke ni ne havas tre komforte, kaj ke ne estos tiel bone, kiel oni povus deziri. Mi estas jam maljuna, kaj mia salajro estas malgranda. Cetere ofte mankas laboro, estas ja tia tempo. Kaj viaj fratoj havas laboron nur tri tagojn posemajne. Vi komprenas...

En la hejmo — kuirejo kaj unu negranda ĉambro — regis vigla vivo. La maljunulino staris apud la forno, gardante la kafpoton kaj samtempe elverŝante senĉesan fluon da konsiloj pri infanzorgado al la juna edzino, kiu provis trankviligi sian kriantan infanon. La tri filoj de Aleksandro sidis sur la sofo,

El la notlibro de praktika esperantisto

— K. R. C. Sturmer, London —

Malsato de niaj originalaj verkistoj. Estas sufiĉe klare, ŝajnas al mi, ke niaj originalaj verkistoj devos dum longa tempo malsati rilate al la enspezo el sia verkado. Kial? Estas simpla afero. En nacia lingvo oni povas gajni monon per du fakoj en la verkado: aŭ oni povas verki popularajn librojn por granda popolo, en distra humoro, aŭ oni povas imponi per elstaranta talento, tiel ke multaj personoj legas viajn verkojn pro scivolemo aŭ kultura snobismo. Neniu mallaŭdu la snobismon, kiu havas grandan utilon; estas tamen fakto, laŭ mia opinio, ke por ĉiu leganto de Bernard Shaw, Thomas Mann, aŭ Andre Gide, kiu havas veran aprezo-kapablon, troviĝas ses legantoj kiuj legas ilin nur tial, ke iliaj amikoj parolis pri ĝi, ke la gazetoj raportas pri ĝi, ke ili ricevos per ĝi la povon diskuti pri ĝi en sia propra rondo. Do, fakte, amaso da personoj, nekapablaj aprezi Thomas Mann, tamen kiel aĉetantoj enspezigas al li monon kaj ebligas, ke li povu daŭre verki por la kelkaj, kiuj vere aprezas lin.

Sed en nia Esperanta kulturo tiu snobismo tute mankas, kaj mankos dum longa tempo. Neniu aĉetas verkon de Kalocsay por povi paroli pri ĝi en sia rondo, neniu aĉetas novelaron de Baghy, ĉar oni atendas, ke informita homo konas almenaŭ iome la verkojn de la hungara verkisto. Ne, kiu aĉetas verkon de Kalocsay aŭ Baghy en la nuna tempo, tiu estas sincera literatur-amanto, leganta por propra plezuro, scianta, ke li povos paroli pri la verko nek en sia Esperantista rondo, nek en sia ĉiutaga medio. Kaj la pordistraj romanoj de Jean Forge, kie troviĝas ilia popolo?

La snobismo helpas al niaj tradukoj — oni povas fanfaroni al siaj amikoj, ke oni legis *En Okcidento Nenio Nova* ankaŭ en internacia lingvo.

*

La verkisto kaj la mondpolitiko. Interesa intervjuo en la franca literatura gazeto «Nouvelles Littéraires», kun la Eŭropa verkisto Stefan Zweig. Oni diskutas pri la rolo de la verkisto en nia hodiaŭna mondo. Lefevre skribas: «En ĉiuj landoj, tiom en Francujo, kiom en aliaj landoj, ni havis en la pasinta jardeko postmilita literaturon de egoismo kaj sinekzamenado, literaturon depriman kaj malsanan kie oni trovas nenion el la profundaj sentoj de la homamaso... en ĉiu el tiaj libroj oni kunestas *krizon individuan*, oni ne sentas la mondan krizon.»

Pensigaj vortoj por niaj verkistoj de Esperanto. Mi povas pretendi, ke en *Por Recenzo!* mi ne montris mankon de atento al la aferoj de la mondo; sed tian mankon oni eble povus defendi — ĝin defendus iu nuntempa verkisto de Esperanto, kiu ŝajne plej ekskluzive havas intereson nur pri la individuo, kvankam fakte

troviĝas malmulte da personoj havantaj tiom fortan intereson, kiom li pri mondaj aferoj. Oni povas certe subteni la vidpunkton, ke la literaturo devus okupiĝi nur pri la individuo, ke sur tiu kampo ĝi povas plej utili.

Mi evitas la temon, ĉu literaturo ia ajn utilas, ĉar tio nin kondukus al la demando, ĉu hona penado ia ajn utilas.

Zweig mem pledas por »aktivismo« de la hodiaŭaj verkistoj, sed ne por la politika aktivismo. Li prave skribas, ke oni povas politiki en du manieroj, kaj ke la unua, tiu de la profesia politikisto, kiun praktikas la diplomatoj kaj ŝtatministerioj, estas fakte neebla al la krea artisto, ĝi prenas tutan lian forton; sed la ne-taŭgeco de la krea artisto al la politiko de l' kulisoj ne malhelpas al li preni parton en la politiko, kiu konsistas en la klerigo de la homaj ideoj kaj konceptoj.

»Kiel homo de agoj, li eble malsuperas«, skribas Zweig. »kiel homo de la intelekto li ĉiam konservas sian rangon.« Zweig plue atakas la specialistojn de financo kaj ekonomio kiuj fuŝis la aferojn de la mondo, kaj la ankoraŭ popularan ideon, ke verkistoj estas homoj revemaj kaj naivaj. »Nur kelkaj junaj fraŭlinoj konservas tian ideon. Ne ekzistas granda verkisto sen granda inteligenta — ĉu Wells, ambasadoro de la angla penso, ne komprenas la mondpolitikon pli bone ol la ambasadoro angla en Tokio?... la romanisto kiu estas denaska realigisto, kiu estas dotita per la povo konstrua, ĉu li subite iĝos seninteligenta, senpova, antaŭ la realeco?« Kaj Zweig aldone citas el Valéry; »La Eŭropa penso ĉiam superis la Eŭropan politikon.«

Mi plene konsentas, ke verkistoj estas escepte inteligentaj kaj ke registaro el ili estus kredeble pli inteligenta en mondpolitiko ol niaj ĝisnunaj registaroj; sed tia registaro neniam povus veni nature. Por iĝi granda verkisto oni devas havi ian »sincerecon« — mi uzas la vorton ĉar mi ne konas pli bonan por mia celo, kvankam fakte la vorto estas tre diskutinda — ian sincerecon kiu en sia naturo estas nepra baro al kariero en la ordinara politiko de ministroj kaj diplomatoj. Tion mi diras, kvankam mi kredas, ke kariero de ministro, kune kun ĝia necesa »nesincereco«, estas ne malpli honorinda ol tiu de granda verkisto.

Do, tial ke ne estas supozeble ke la verkistoj perforte prenus la forton sur tiu kampo, restas por ili nur tiu dua politiko de klerigo. Kaj jen la demando: ĉu ili havas la devon tiel okupi sin?

El niaj verkistoj de Esperanto ŝajnas ke nur Baghy eble jese respondus. Mi mem sentis min devigata en la animo esprimi tre profundan konvinkon pri »plej granda krimo en la nuna mondo«: sed estonte mi volus silenti: bedaŭrinde, mi eble ne povos.

fumis cigaredojn kaj aŭskultis elokventan prisocian paroladon de sia bofrato kaj la muzikon de la unuaklasa gramofono, kiun li ĵus aĉetis kaj nun demonstraciis al ili, samtempe kun la parolo.

Kaj ankoraŭ pli granda fariĝis la bruo, kiam Aleksandro kaj la ĵus veninta filino aliĝis al la societo. La ĉambro estis plena de la zumado de demandoj kaj respondoj, mirkrioj kaj erupcioj de la pli molaj sentoj en la virinaj koroj, kaj la plej novaj miaŭaj kantoj el Ameriko preskaŭ dronis en la tumulto.

Kiam la kafo estis trinkita, la junaj virinoj komencis esplori kaj kompari la infanojn unu de la alia,

la junuloj bruligis novajn cigaredojn, kaj la juna edzo ree ekokupis sin pli serioze pri la gramofono kaj la sociaj problemoj.

— Jen, bopatro! Jen estas alia disko! Tiu moderna muziko eble ne tre plaĉas al vi. Sed jen estas io speciale por vi! »Marŝo de la Unua Reĝa Regimento!« Mi aŭdis, ke vi iam servis tie. Do, bopatro, ni revoku la tempojn pasintajn.

Sed Aleksandro jam ekstaris kaj prenis sian ĉapelon. Li skuis la kapon kaj respondis:

— Mi devas iri por haki lignon. Ni bezonas brulaĵon por la festotagoj.

Obscenhumuro. Mi estas edukita en medio nepruda sed kiu tamen forte tenis sin al principoj enhavantaj idealigon de la ĉasteco kaj la menspureco, kaj malŝaton al la obsceno; ĝis la aĝo dudek-du mi restis en tiu ideologio; al ĝi mi ŝuldas multe da belo.

Hodiaŭ, preskaŭ dudek-naŭjara, mi komplete ŝanĝiĝis: ŝajnas al mi ke la obsceno similas al la alkoholo; spite multajn esceptojn, mi trovas ĝenerale ke la plej simpatiaj homoj, la plej bonkoraj kaj admirindaj homoj, modere sin servas per ĝi, el bona kvalito kaj en ĝusta kvanto. Mi trovis pli da mensa malsaneco inter pruduloj ol inter obscenuloj, (taksante min nek unu, nek la alia) kaj kvankam en la teorio mi ankoraŭ admiras tiun, kiu estas malnaŭva kaj tamen malŝatas la obscenon, en la praktiko mi tro ofte trovas ke li estas homo »psiĥe malsana. Ofte mi havis sub mia influo proletajn knabojn de tre inteligentaj kaj simpatiaj specoj, kaj se en aĝo dek kvin ili montris emon al obsceno, mi dubis pri ilia mensa saneco: se en aĝo dek ok ili ankoraŭ ne montris iomete tian emon, se ilian menson ankoraŭ plenigis malkaraj romanoj pri detektivoj kaj vojaĝoj al la luno per mirindaj kaj strangaj aparatoj — tiam mi estis absolute certa pri ilia malsaneco mensa, kaj tro ofte mia timo pruviĝis per seriozaj simptomoj.

Mi konfesu, ke al mi persone naŭzas ĉia bilda obsceno, kaj mi defendas nur la parolan k. literaturan sferon.

Mi konfesu ke la latinan sintenon al la virino mi ĝenerale trovas naŭza; sed mi dubas ĉu virinoj en mia lando, havante pli da respekto, havas pli da feliĉo, ĉu la knabinoj en mondo de »Al Torento« estas pli feliĉaj ol knabinoj en mondo de »Verdkata Testamento«, kaj kred-eble mia naŭzo estas restaĵo el falsa ideologio kiun sep jaroj de praktika vivo elbatis el mi iom post iom. La »respekto« por la virino ankoraŭ multe predikata en Britujo hodiaŭ estas tro ofte senvalora respekto por ŝia korpo kiun akompanas neniam vera respekto por ŝia animo.

*

Kompreno. Ekzistas tro multe da ĝi. La popolo mortigas kaj ŝtonbatas iun artiston nur kiam ĝi komprenas lin: ĝis tiam li vivas sekure. Ĉiuj malpacoj inter geamikoj okazis pro troa kompreno. La granda plinombriĝo de eksedzigoj kaj eksedzinigoj okazas pro la pligrandiĝo de la interkompreno. Estas bone, ke nia civilizo forpasos en la manojn de barbaroj: barbaroj ne havas grandan komprenon, kaj sufiĉe bone eltenas la vivon.

*

Chastity and Purity. La unua el tiuj vortoj estas bone tradukebla en Esperanton, sed mi neniam trovis kontentigan tradukon por la lasta. Mi kredas, ke en Esperanto ĝi ne ekzistas, ĉar ke la koncepto pri »purity« estas, se ne ekskluzive brita, certe propra al la nordaj rasoj.

Mian aserton mi bazas sur sama kredo kiel mi bazis mian aserton ke »Al Torento« de Stellan Engholm ne povus veni el la plumo de verkisto slava aŭ latinida, kvankam mi nun kredas ke eble ĝin povus esti verkinta hungaro — juĝante laŭ simileco en multaj rilatoj al angla ideologio de la verko de Babits, »La Cikoni-Kalifo« kaj ankaŭ kelkrilate de »Printempo en la Aŭtuno«.

La fakto restas, ke ankoraŭ hodiaŭ en Britujo idealoj pri ĉasteco kaj mensa pureco ne perdis sian influon, kiu estas rimarkebla ofte eĉ ĉe tiuj, kiuj ne tenas sin al tiaj idealoj. Ili ankoraŭ influas min, kiu venis intelekto al la konkludo, ke la ĉasteco kaj la »menspureco« estas spiritaĵoj idoloj. Mi kredas, ke en pli sudaj landoj ili ne multe influas, ke en aliaj landoj oni komprenas naivecon, kaj

Kanio de

K.

Tempo di marcia, allegro.

La polv' sur mia plando :
Jen estas mia lando.
Kaj lito mia : ĉies ter',
Kovrilo mia : la vesper'.
Birdar' al mi deĵoras
Per amuzanta hor',
La nuboj min priploras,
Se tuŝas min dolor',
Hej, hola! Kia granda ĝoj' :
Facila vag' sur landa voj' !

Mi vagas preterfluge,
Sencele kaj senjuge,
Kaj al knabino, al amik'
Neniam ligu min radik' !
Radiko ja profunde
Penetras en la ter'
Kaj ĝi ŝirigos vunde.
Ni ŝparu pri l' sufer' !
Hej, hola! Kia granda ĝoj' :
Ensola vag' sur landa voj' !

En blu' de malproksimo
Sin banas la animo,
Dum inter prema ĉambra lim'
La koron kovras ranca ŝim',
Filistro-invalido.



Vagabondo

Kalocsay

Do putru en la niĉ' !
Mi saltas el la sido
Kriante pro l' feliĉ,
Se vokas min por granda ĝoj',
Por nova vag' la landa voj'.

Ĉu lumas sort', ĉu nigras,
Mi prifajfante migras.
Kaj kiam kontraŭ la stomak'
Malsato venas por atak' :
Dum la s'omak' eksonas
Grumblante, kun riproĉ',
Mi primon fajfe donas
Al ĝia basa voĉ'.
Hej, hola, kia granda ĝoj',
Eĉ la malsat' sur landa voj' !

Kaj se pleniĝis listo,
Kaj venos la Falĉisto :
Post mi edzino kaj infan'
Ne ploros orfe kaj sen pan' :
Mi falos en la neĝo :
Adiaŭ, bela vag' !
Kaj la primorta preĝo
Nur estos korva grak'.
Anoncos poste hunda boj'
Kadavron sur la landa voj'.

komprende maturecon, sed ne komprende la koncepton, ke iu povas esti malnaŭva kaj tamen eviti senafekte, pro principo, la mensan kaj materialan mondon spegulitan en la libroj de Raymond Schwartz. Sed fakte mi konis junulojn kiuj neniel estis naŭvaj nek pruduloj, kiujn vere naŭzis la verkoj de Schwartz. Nur kelkajn tamen.

*

»Capelino«, »gebanado«. Knaba lernanto mia antaŭ kelka tempo volis uzi la formon »ĉapelino«, kaj mi informis lin ke tion oni ne povas diri, ke »in« povas aplikigi nur al vivanta estajo, kaj tiel plu. Tamen antaŭ kelkaj tagoj s-ro M. C. Butler tute propravole parolis al mi pri tiaj vortoj, »ĉapelino«, »ĉemizino«, sugestante ke en parolo ili estas pravigeblaj de kelkaj vidpunktoj. Diablo, jes ! Kial ne ? Almenaŭ mi provos ilin.

Unu el la malmultaj plezuroj de originala verkisto estas la konscio ke li povas influi lingvon kontrolatan en la teorio de Lingva Komitato kaj lernolibroj. Ĉiam ĝis nun oni laŭdis mian verketaron pro la manko de neologismoj kaj novaj formoj, kaj mi sentas min tiom pli rajtigita iom eksperimenti. Mia konservativismo devenas ne tiom de konservativismo, kiom de manko en mia prilingva intereso ; por mi Esperanto estas lingvo por esprimi min kaj mian pensaron, kaj mi uzas ĝin en la formo ekzistanta. Tamen kelkfoje venas al mi la ideo ke ekzemple »knabino« estas multe pli bela ol »fraŭlino« kiel sendependa vorto, kaj ke la duobla senco de la vorto »respond« estas sensenca ; same nun venas la ideo, ke mi eksperimentos pri »strumpino« kaj »ŝuino«. Sed neniam mi influos nian lingvon kiel iu Baghy aŭ Kalocsay.

*

»Etoso«. En eseo en mia kurso s-ro J. F. O'Conor, kiu neniam legis mian difinon pri la vorto en *Por Recenzo* ! skribis pri la »etoso« de iu libro. Kvankam mi persone limigis la vorton por signifi la animon de iu loko, ŝajnas ke oni povus bone etendi ĝin, kvazaŭ por la germana »Stimmung«. Oni povus paroli pri la paca etoso de la familio Brown, aŭ la malameca, eni-ea etoso en sia propra oficejo.

Multe vojaĝis angla vorto uzita proprasignife de katolika pastro kaj transdonita al mi pere de sinjoro Sullivan !

*

Belo kaj Intelkto. Lastan nokton mi bablis ekster la Popola Universitato kun iu alia el al instruistoj, kiam subite knabino venis el la pordo kaj eniris luksan aŭtomobilon kiu tuj forkondukis ŝin.

»Diablo !« diris mia kumparolanto, ŝerce. »Jen du instruistoj kiuj pretiĝas al marŝado, kaj jen iu suboficistino ekveturas per luksa aŭtomobilo !«

»Vidu, do, mi redonis,« ekzemplon de la graveco de l' belo super la graveco de l' intelekto !« Ni ambaŭ ridis.

*

»Ĉu Katino ?«. Hieraŭ iu ano de la burĝa, sportamanta, lukskluba klaso asertis al mi ke la funda diferenco inter la seksoj restas tio, ke ĉiu virino entenas la kapablon esti katinece malica, kaj multaj viroj ne. Ŝajnas al mi, ke tiel ne estas ; sed povas esti, ke mi vivis en mondo de escepte katinecaj viroj.

*

»Internacia Frateco.« Guste kion oni celas per la frazo ? Jam de longe mi havis scivolemon pri tio. Ĉu ĝiaj uzantoj volas vidi inter la nacioj tian rilataron, kia kutime ekzistas inter fratoj ? Apenaŭ ili povus esti tiom grandaj malamikoj de la tutmonda paco !

La vizito de Horaĉo Serĉer

— J. Lejzerowicz, Łódz —

Lastan dimanĉon neatendite vizitis min sinjoro.
— Mia nomo estas Horaĉo Serĉer — prezentis sin al mi la gasto kaj ne demandante, ĉu mi estas libera, li sidigis kaj ekparolis :

— Kiel vi vidas (li montris siajn grizetiĝantajn harojn), mi estas maljuna kaj malnova esperantisto...

— Do — mi interrompis — vi povas paroli kun mi esperante...

— Nu, mi estas verdire malnova esperantisto, sed mi ne parolas esperante. Vi scias ja, sinjoro, la ĉiutagaj devoj kaj zorgoj. Laboro, laboro, laboro. Neniam oni havas tempon por lerni nian sanktan lingvon. Kvankam tio estus por mi tre facila afero. Mi parolas germane, pole, france, ruse kaj angle. Krome mi legas kaj komprenas italan, hispanan kaj ĉeĥan. Iam mi ankaŭ »flaris« la hungaran, sed ne ellernis ĝin. Sed neniam lingvon mi tiel flame ekamis kiel la esperantan. Ĝi estas belega lingvo, genia kreaĵo! Kaj tiel simpla, tiel facila! Sed ve, la tempo neniam permesas al mi bone ellerni ĝin. Mi ĝin bonege komprenas, sed ne parolas. Vi komprenas : mi ne ekzercas, ne konversacias. Sed mi legas. Mi abonas Heroldon, Literaturan Mondon kaj estas membro-abonanto de UEA.

Mi deziris interrompi, sed s-ro Serĉer faris manĝeston, kvazaŭ volante diri, ke li tuj finos, kaj li daŭrigis :

— Do kiel vi vidas, mi estas malnova esperantisto. Iam, antaŭ dudek jaroj mi multon faris por Esperanto. Mi estis konata tra la tuta mondo, eminentulo. Se vi foje vizitos la Esperanto-societon en Porkinsk, vi vidos tie mian portreton pendanta en la kancelario. Mi tie estis prezidanto, gvidis multajn kursojn kaj varbis por Esperanto eĉ du profesorojn de la tiea universitato. Sed en la movado oni forgesis min. Kiel kutime. Mi ne postulas laŭdon, nek rekonon. Gardu Dio! Mi laboris kaj ankoraŭ nun laboras por ideo kaj idea laboro ne havas prezon.

Denove mi deziris demandi, kia estas la celo de lia vizito, sed denove la gasto faris tiun manĝeston kaj daŭrigis :

— Tuj mi finos, sinjoro. Kvankam mi estas jam, kiel vi vidas, malnova esperantisto, mi tamen restas ankoraŭ plena de entuziasmo por nia alta ideo. Ah!

mi tute ne povas kompreni niajn nunajn junajn esperantistojn. Por ili Esperanto estas klara, memkomprenebla afero. Ili venas nun al nia movado kaj ne imagas, kiamaniere ĝi fariĝis. Mi, kiu memoras la unuajn jarojn de nia afero, mi entuziasmiĝas ankoraŭ pli kaj infane kortuŝiĝas, vidante kiel grandan vojon ni jam estas farintaj. Sed ili, la junaj, neniam estas kontentaj : jen tio, jen tio ĉi ne plaĉas al ili. Kaj ili havas plej strangajn projektojn. Hallo! — mi ĉiam pensas en mia koro — karaj infanoj, havu paciencon, ne rapidu. Ankaŭ Romo ne konstruiĝis en unu tago. Niaj eminentuloj jam zorgas pri tio, fidu al ili. Kaj por vi sufiĉas fari tion, kion ili sugestas al vi. Mi mem jam dum multaj jaroj cerbumas, kiel trovi radikalan rimedon, kiu rapide kondukus nin al la celo, sed tio ne estas tiel facila afero. Revizionismo, parlamentaj kongresoj — ĉio-ĉi estas naivaj ideoj. Kion vi volas? Ĉu la ĝisnuna agadmaniero estas malbona? Vidu, jam 45 jarojn ni aplikas ĝin, ĉu do la rezultoj estas nekontentigaj?

Li interrompis por momento, ekspiris profunde, kaj plue parolis :

— La venko de Esperanto dependas nur de la amasoj. Ni devas penetri en la popolon. Kiel mi diris, mi jam de multaj jaroj meditas kaj cerbumas pri tio, kiamaniere trovi la vojon por rimarkinde kreskigi la nombron de nia anaro. Mi analizis plej diversajn, multegajn rimedojn, kaj preskaŭ jam volis rezigni, kiam neatendite en mia cerbo eklumis genia ideo dank al la lasta bulteno de la Pariza organiza komitato.

Li alŝovis sian seĝon pli proksimen al mi, dismetis siajn manojn sur la tablon, kaj kun pli laŭta voĉo ekparolis :

— Sinjoro, ĉu vi legis la lastan numeron de la Geneva Esperanto? Ne? Vi ne legis ĝin? Do tuj prenu ĝin kaj tralegu la bultenon de la Pariza organiza komitato!

Li elpoŝigis la gazeton, metante ĝin antaŭ miajn okulojn.

— Legu — li kun ekscito parolis. Jen, legu : »Komisiono por rilatoj kun kongresaninoj«. Kaj re-kaptante la gazeton, ŝvingante ĝin en la mano, li kriis nerve :

— Sinjoro! Nun la problemo estas solvita! Nun nia venko estas certigita! Mi gratulas al vi!

Kun stranga, mistera flamo ekbrilis la okuloj de mia gasto. Mia edzino, kiu troviĝis en la apuda ĉambro, terurita per la krio de s-ro Serĉer, enkuris kaj pala de timo demandis : kio okazis?

La gasto rapidpaŝe proksimiĝis al mia edzino, kaptis ŝian manon en la sian kaj ŝvingante la gazeton alte en la alia mano, li kriis :

— Sinjorino! Fine ni venkis! Post kvardek kvin jaroj de senlaca laborado fine estas trovita la genia rimedo, kiu trudos nian lingvon al la tuta homaro!

— Eble nenormala? — flustris al mi mia edzino.

— Ne timu, sinjorino — respondis s-ro Serĉer — mi estas tute sana kaj tuj mi detale ĉion al vi klarigos.

Triope ni sidigis al la tablo kaj s-ro Serĉer komencis.

— Profunda saĝo ŝprucas el la proverbo : ni viroj regas la mondon, sed la virinoj regas nin. Ni esperantistoj neniam atentis la grandiozan potencon, kiun kaŝas en si la virinaro. Nur la pariza komitato konceptis



Berlevi :

Knabino.

tion. En Parizo oni zorgos dum la kongreso pri bonaj, interesaj kaj agrablaj rilatoj kun la kongresaninoj. Oni klopodos, ke ĉiu verdstelulino trovu tie sian destinon kaj destiniton. Mi proponas eĉ starigi tie specialan dumkongresan svatoficejon. Tiamaniere neniu ŝanco perdiĝos. Kaj la ago de la Pariza komitato devas fariĝi devizo por la tutmonda esperantistaro. Ĉiu esperantisto antaŭ la edziĝo prezentas al sia fianĉino unu kondiĉon: ŝi devas ellerni esperanton, sen tio li ne edziĝos. Same ĉiu esperantisto jam edziĝinta prezentas la saman kondiĉon al sia edzino. Imagu, kio sekvas el tio: ĉiuj fraŭlinoj el la tuta mondo rapide lernos esperanton. Ĉiu volos tiamaniere trovi la destinon de sia koro kaj vivo. En niaj kongresoj la komisionoj por rilatoj kun la kongresaninoj estos inundataj de laboro. Mi eĉ proponas, ke la paroj, kiujn kunigos tiu komisiono, festu s'an geedziĝon dum la kongreso. Tiamaniere ni kontribuos ankoraŭ unu gravan solenon al niaj universalaj kongresoj. Ni almilitos tiamaniere la tutan mondon: ĉiuj fraŭlinoj lernos Esperanton, ĉiu patrino sendos sian filinon al niaj kursoj. Kaj niaj kongresoj? Sinjoro! dekmiloj da fraŭlinoj flugos al niaj kongresoj. Kaj vi scias ja, kie estas knabinoj, ne mankos junuloj. En daŭro de 2—3 jaroj la tuta mondo estos esperantigita.

Li ekspiris profunde kaj daŭrigis:

— Ĉu vi ankoraŭ dubas nun, ke la pariza komitato kaptis la genian ideon? Sinjoro, vi skribas ja en la gazetoj, do publikigu ĉi tiun aferon kaj insiste petu, ke ĉiu esperantisto kaj societo senprokraste sendu gratulon al Parizo. Nun komenciĝas nova epoko en Esperantujo! Ni venkis, fine ni venkis!!

Li finis. Svitogutoj aperis sur lia frunto kaj la misteraj fajreroj plue brilis en liaj okuloj.

— Sinjoro Serĉer, mi turnis min al li, ĉu vi havas edzinon?

— Jes.

— Kion do via edzino opinias pri tia genia ideo?

— Ho, ŝi ĉiam asertas, ke ŝi perdas la prudenton pro mia esperanto, ke ŝi estas jam komplete freneza — diris s-o Serĉer kvazaŭ hon'el'ante.

— Kaj ĉu vi jam provis prezenti al ŝi kondiĉon, ke ŝi lernu Esperanton?

— Jes. Mi provis.

— Kaj?

— Tiel freneza mi ankoraŭ ne estas — ŝi respondis al mi.

MIA ANGULO

— JULIO BAGHY —

Iam mi pensis, ke la virino akre diferencas de la viro. Precize jam mi ne rememoras pri la bildo, kiun mia fantazio pentris pri ŝi sur la streĉitan blankan tolon de mia animo. Nur tion mi scias, ke mi zorge elektis la plej delikatajn kolorojn kaj la preta bildo ornamis la altaron de mia koro. En sufoka incensfumo de la unua amo vagadis mi kaj miaj lipoj psalmopie ripetadis: Virino, reĝino de la Vivo, en vi enkorpiĝis ĉio bela kaj nobla. Vi surtere forgesita rideto de la Kreinto, dispersu la ĉielan lumon, donitan al vi. Virino, kristala pokalo de la Bono, verŝigu el vi la mildigo de suferoj!... Ho, mia bildo sklavigis mian animon, sed foje... foje subita printempa pluvo forlavis la bildon kaj kun terurstreĉitaj okuloj mi rigardis la — nuran tolon. Nur grize malpura tolo restis kaj la templo de mia sino ne havis plu altarbildon.

Mi elektis novajn kolorojn. La peniko de la fantazio, inspirita de la senluziĝo, aperigis inan monstron. La reĝino de la Vivo fariĝis ĉiesulino de la naturo. Sur ŝiaj trajtoj vibris la monahine vestita voluptemo kaj sur ŝiaj lipoj flirtadis alloga promeso de diablo. Sia figuro prezentis la orumitan sojlon de la infero... Ho, mia bildo teruris min, sed mia animo ebrie jubilis pro sintortura vengemo ĝis... ĝis foje neatendita somermeza tempesto forlavis la tutan bildon kaj mi rigardis denove nur la tolon, la makulitan tolon.

Mi rekonsciigis pri mia maljusteco. Perlarme mi purigis la tolon blanka, neĝpure blanka por pentri novan bildon, por aperigi la veran portreton de la virino. Mia animo, saturita de la plej noblaj sentoj kaj inspirita de profunda kompreno, kreis novan bildon, pompe riĉan en koloroj. En la trajtoj mankis ĉio reĝina, ĉio ĉiesulina. Sia rigardo respegulis harmonian egalecon. Nur korpe ŝi montris diferencon de la viro. Miraklofara bildo, inda por la altaro de la vira koro, ĝi fariĝis. Ĉiutage mi pilgrimis al ĝi. Sia rideto, plena de pardona komprenemo, alportis nutran sukcon el la fonto de inspiro. El ŝiaj delikataj fingroj radiis patrina boneco, ŝiaj manoj fratingeste etendiĝis al mi por helpi en la laboro, por forviŝi la larmojn de suferoj kaj ŝiaj blankaj brusto kaj brakoj promesis kunulinan sinforĝenon kaj... kaj foje aŭtuna nebulo ekkuŝis sur la bildon. La zorge metitaj koloroj kunfluis, la farboj degutadis de sur la bildo kaj antaŭ mi staris en ora kadro la — malplena, malpura tolo.

La pento pri mia naiveco, pri ĉio, kio pasis kaj la kortaŭza ĉagreno inspiris min je nova pentrado de la virino. Mi elektis krudajn kolorojn por aperigi ŝin kiel malamikon de la viro. La nova kreaĵo ne montris plu mildecon, nek komprenemon. La gesto de la manoj, la sinpropona pozo elokventis pri la enkorpiĝinta hipokriteco, sed en la trajtoj de ŝia vizaĝo mi rekonis ne kunulino, destinitan por helpo, nur konkurantino en la batalo por venki kaj ĉiam venki per kiu ajn rimedo, per kiu ajn armilo. La bildo montris ŝin tia, kiu aspiras ne egalecon, sed superecon; ne harmonian kunvivadon, sed absolutisman regadon. Kiel timiga vizio pri la fora kaj morna estonteco reliefigis la nova figuro de la virino: la enkorpiĝinta egoismo... Mi metis ĝin sur la altaron ne por adori ŝin, sed por teni ŝin antaŭ mia rigardo kaj por konstante nutri mian malkonfidon kaj... kaj iun tagon la vintro ŝtelis ŝin en mian animon. Silente ekneĝis. Blankaj lanugoj kovris la tutan bildon kaj mi forgesis pri ŝi, pri la malamo, pri la larmbanitaj suferoj, pri la kotmakulitaj revoj. Indiferenteco ekgermis en mi. Dum la animmuela meditado pri la vivo la degelanta neĝo forlavis la bildon kaj subite mia rigardo renkontis denove nur la — malplenan tolon.

Mi ekridis kaj ridis kiel saĝperdinto. Kia kaj kio estas vere la virino? Ĉu ŝi estas eterna ŝanĝiganta bildo, kiun la vira animo pentras per efemeraj koloroj ĉiam sur la saman tolon aŭ ŝi estas la malplena tolo, mem, kiu bezonas kolorojn kaj artistan penikon por havi almenaŭ momentan valoron? ... Mi ne scias. Mi perdis la emon pentri novan bildon pri ŝi. Sur mia paletro la farboj nedistingeble miksiĝis. Nur terkolorajn nuancojn mi trovas sur ĝi. Kion fari? Estus plej bone trapiki la tolon per la peniko kaj pendigi sur ĝin la paletron mem. Ĝi almenaŭ montrus tion, kio vere ekzistas: la haoson pri la virino... Jes, estus plej bone lasi ĉion, sed... sed la tolo estas malplena, la peniko de la fantazio vole-nevole eklaboras kaj metas la nuancojn de la grizo unu apud la alian. Ĉu iam la nova bildo definitive siluetiĝos sub la peniko? Mi ne scias kaj mi ne kredas... Eterna pentrado.





LA FILMMANUSKRIPTO

Ne estas ia dubo pri tio, ke la optika flanko de la filmo restas ĝia ĉefa elemento, ke la parolo kaj sono estas apudaj akcesoriaĵoj — tamen jam intime ligitaj kun la moviĝanta bildo.

La parolata vorto, la dialogo hodiaŭ estas adaptata en preskaŭ ĉiu filmo, alproksimigante ĝin al la formo de l' teatro. Ankoraŭ ekzistas plej ofte disonancoj, strangaj malakordoj, kiujn kreas la parolo. Ĉar la dialogo ĝenerale estas la malamikoj kaj malhelpanto de l' agada rapideco, ĝi ne permesas sufiĉe la rapidan ŝanĝigon de la scenoj — kaj jen estas la tasko de la filmverkisto saĝe kaj sprite interplekti la parolon kun la sceno. La dialogo neniam haltigu la agadon, sed kontraŭe estu elemento antaŭenpuŝanta. La dialogo devas esti fiksata precize en la filmmanuskripto antaŭ ol la reĝisoro kun sia stabo eniras la filmlaborejon. Same la alilingvaj variantoj devas esti fiksataj antaŭe, por kio necesas lingvaj spertuloj, kiuj ellaboras la tekstojn kaj ŝanĝas tiun aŭ alian parton, kiu ne respondas al la idearo de la koncerna lando.

Simile la kanto ludas tre gravan rolon en la filmo, precipe en la filmoperetoj kaj komedioj. La komponistoj de la »sezonaĵ danckantoj« startigas siajn melodiojn pere de la sonantaj filmoj, kiuj popularigas tiujn »dancantojn« tra la tuta mondo. La eldonejoj de muziknotoj same profitas de tio kaj precipe la gramofondiska industrio pli ekfloris sekve de la sonanta filmo, kies melodioj incitas la publikon al aĉeto de la koncerna disko. Tiun ĉi fakton kompreneble la filmverkisto devas priatenti, la temo devas doni al la komponisto eblecojn kaj okazon por kreado de tiaj kantoj. La filmverkisto — plej ofte sklavoj de la publika gusto — devas sekvi la dezirojn de la fabrikistoj, kiuj preskaŭ neniam priatentas la vorton »arto«, sed ĉefe kaj ĉiam la vorton »negoco«.

Speciala ĉapitro estas la filmigo de romano aŭ teatraĵo. La filmfabrikistoj treege ŝatas filmigi librojn, kiuj havis sukceson. La opinio ke oni facile entiros la legintojn en la kinojn, estas tute prava. Krome la filmfabrikistoj opinias, ke libro presita ja ĉiokaze prezentas ian

valoron, ĉar la romano ja trapasis jam la cenzuron de la eldonistoj, de homoj ja ankaŭ sufiĉe saĝaj kaj negocspertaj, — dum originalaj filmmanuskriptoj prezentas en sia maŝinskribita formo ankoraŭ nenion konkretan kaj plej ofte entenas ian tendencon al risko!

La transformado de la romanmanuskripto en filman formon estas malfacila tasko. Multaj filmverkistoj asertas ke verkado de originala filmmanuskripto estas pli facila ol transformado de romano, ĉar ofte la sukcesaj romanoj enhavas malmulte da optika agado. Ofte estas malfacile redukti la agadon de kelkcentpaĝa libro al la rubando de duhora filmo. La dialogojn oni plej ofte ne povas transpreni en ilia roman-formo. La enhavo ofte devas esti ŝanĝata laŭ filmaj vidpunktoj. Kelkaj figuroj devas forfali, novaj devas kreiĝi. Tamen oni devas gardi la linion de la libro, proksimiĝi al la spirito de la aŭtoro.

Ofte okazas, ke la firmo dungas kelkajn verkistojn por la kreado de la filmmanuskripto. Ili ofte malpacigas inter si, la firmo dungas novajn filmskribistojn, kiuj denove ŝanĝas tion, kion kreis la aliaj. Venas la aŭtoro, kiu akre protestas, kaj ofte tiuj miskomprenoj finiĝas per procesoj. Ĉio ĉi ne favore influas la manuskripton, kaj la legintoj de la romano ofte ne rekonas poste la romanon de sur la ekrano.

La cirkonstancoj, en kiuj naskiĝas hodiaŭ filmmanuskripto, estas tre malfacilaj kaj kaosaj. La individuo de l' aŭtoro, gardata absolute en la romano aŭ teatraĵo, perdiĝas en la komplikita maŝinaro de l' filmindustrio. Bedaŭrinde — ĉar nur flanke de la aŭtoro povas veni novaj ideoj, kiuj levos la filmon sur pli altan nivelon. Plej ofte la spirito regas la maŝino — ne inverse! La filmmanuskripto estas kaj restas la fundamento de ĉiu filmo, kaj nur el la manuskripto povas elkreski la arta filmo, kiam ni ĉiuj tiom aspiras!

Ni presas ĉi sube parton el la filmmanuskripto »Mr. Tot aĉetas mil okulojn«. La formoj de la manuskriptoj estas diversaj, kaj tiu ĉi formo ankoraŭ ne estas la fina. Ĝi estas kvazaŭ la bazo, la komuna planko, sur kiu komencos eklabori en kuna laboro la scenaristoj, dramaturgoj, komponistoj, reĝisoro kaj operatoro. Sed ni esperas, ke ĝi donos ian imagon pri la hodiaŭa filmmanuskripto. Kiam oni filmigos tiun ĉi romanon, ni revenos al la temo »filmmanuskripto«.

Filmmanuskripto

„Mister Tot aĉetas mil okulojn“

(Fragmento)

EN LA »CASINO-BAR« :

- 1.) La aparato glitante malrapide montras la altan trinktablon kun la miksisto kaj la verŝknabinoj kaj la gastojn, sidantajn sur altaj seĝoj.

Dum malproksima ĵazmuziko, babilantaj kaj ridantaj voĉoj aŭdiĝas —

- 2.) ekhaltas la aparato! Kaj vidiĝas granda: la kapo de kokota virino, suĉanta per pajlero perlantan trinkajojn. Si ekridas ebrige kvazaŭ en subita rememoro, babilante al najbarino fumanta cigaredon:

»Hahaha! Stranga viro tiu amerikano... imagu, li furitis kun mi dum tuta vespero... kaj kiam mi volis ĉirkaŭbraki lin, li subite repuŝis min, montris vizaĝon de

mortema malesperulo, ĵetis al mi monbileton kaj foriris! Haha!«

- 3.) La dua virino, kies nuda brako kuŝas sur vira ŝultro:

»Stulta, vi ne sciis trakti tiun amerikanon! Malsaĝa, lasas forgliti tian riĉegulon... Ĉu vi ne vidis? Liaj poŝoj ja estis plenplenaj de monbiletoj...«

- 4.) La unua ebria virino, levante la ŝultrojn:

»Li estas tro komplikita... ĉiuj plendas pri li... li estas riĉa, sed samtempe malfeliĉa, oni diras... haha!... malfeliĉa... riĉa kaj malfeliĉa... hahaha...!«

La bildo malklariĝas kaj transiras en novan:

NOKTA STRATO:

- 5.) Aperas malklara granda: la kapo de Mr. Tot, migranta malrapide laŭlonge de solega nokta strato.



Marlene Dietrich



Maurice Chevalier



Jeanette MacDonald

Dum ankoraŭ aŭdiĝas pli kaj pli malproksimiĝante la mokrido de la ebria virino kaj ripete la vortoj: »riĉa kaj malfeliĉa... hahaha!»

- 6.) Aperas pli klara: la seriozega kaj malserena vizaĝo de la amerikano. Liaj okuloj rigardas fikse en la mallumon.

Dum la mallaŭta ĵazmuziko transiras en melankolian, malgajan violonludon de tangomelodio...

- 7.) La amerikano ekhaltas. Dum momento li staras sendecide kaj ne sciante, en kiun direkton sin turni. De malproksime brilas la moviĝantaj reklamlumoj de granda strato. Li rigardas tien, fine li turnas sin por iri al tiuj lumoj.
8.) La aparato akompanas la marŝantan amerikanon laŭlonge de la domoj. De tempo al tempo preterpasas strata lanterno.

La muziko fariĝas hezitema, motivo de danĝereco subite aperas en ĝi —

- 9.) Ĉar jen ekhaltis la aparato! Kaj dum la amerikano paŝas plu, preskaŭ elirante la bildkadron, la aparato iom turniĝas kaj
10.) staras antaŭ doma enirejo, en kiu vidiĝas silueto de viro! Singarde sin elŝovante el la malluma niĉo lia pala osteca vizaĝo postrigardas la amerikanon.

Kaj dum la muziko preskaŭ eksilentas —

- 11.) Granda: Dro Kivikas! Li rigardas senmove en la direkton de la iranta amerikano. Super lian palan vizaĝon ekkuras mistera triumfa rideto. Lia malgrasa longfingra mano levas enpense la cigaredon al la lipoj. Li malrapide elbuŝigas la fumon. Kaj denove rideto ludas ĉirkaŭ liaj lipoj.
12.) Nun li singarde turnas la kapon, kvazaŭ li volus esplori la terenon —
13.) Post tio li ekpaŝas kaj sekvas rapide la amerikanon.

Kaj dum la muziko p'i'aŭtiĝas —

- 14.) La amerikano pli kaj pli proksimiĝas al la lumoj de la granda strato, kies bolanta nokta vivo fluas renkonte al li. En singarda distanco sekvas lin Dro Kivikas.

La muziko pli kaj pli ilustras la noktan bruon de la strato. Kaj

dum tiuj akraj tonoj transiras en la logajn voĉojn de cigana orkestro —

ANTAŬ KAFEJO NOKTE:

- 15.) Vidiĝas tra la granda fenestro de la kafejo, tra diafanaj kurtenoj, tra cigareda fumo: ĝia interno! Publiko ebripetola, la orkestro, kurantaj kelneroj.
16.) Kaj Mr. Tot, staranta sendecide, sed kvazaŭ logata de la muziko. Tiel li enpaŝas fine.
17.) Granda: la ŝtona vizaĝo de Dro Kivikas, kiu rimarkis tion precize!

FILMOBSERVO

R. Siodmak: STÜRME DER LEIDENSCHAFT

Nova Jannings-filmo: Ventegoj de l' pasio! La rakonto pri la krimulo Bumke kaj lia amafero. Emil Jannings en la rolo de primitiva besthomo, bonkora, kvieta sed samtempe danĝera kaj terura — se oni lin incitas aŭ trompas. Sekse ligita al virino, erotika servutulo, senbrida en sia pasio kaj blinda samtempe en sia vengemo. Figuro, kian li kreis jam en multaj filmoj. Li restas la sama malnova aktoro, kia ni konas lin: Jannings kaj lia ludo restas la sama, la sama — tamen unika kaj bonega!

Apud li — la virino — logantino Anna Sten. Jen fine elsaltas ŝia talento, kian ŝi montris en la rusaj filmoj! Kulmina aktorina talento, rasa virino, kian oni amas kaj malamas samtempe. Cu merito de la reĝisoro, kiu ŝin gvidis?

Tiu ĉi reĝisoro Siodmak, ankoraŭ antaŭ 1-2 jaroj nekonata reĝisoro asistanto, juna sinjoro kun okulvitroj subite staras en la unua vico inter la reĝisoroj. Certe — lin helpas la bonega teknika aparataro kaj fakularo de la UFA, sed estas kelkaj scenoj majstre faritaj. Guste la scenoj, en kiuj la tekniko ne ludas gravan rolon. Ekzemple la interparoloj inter la krimalkomisaro kaj la krimulo. Atmosfero streĉanta la nervojn. La dialogo triumfas...

La manuskripto tre lerte konstruita. Plena de erotiko, plenplena de pasioj kaj bestaj senteksplozoj. La agado moviĝas treege proksime preter la kio. Nur la brila tekniko savas kaj tenas la temon sur la nivelo de l' elportebleco. Ĉiumomente ekfaŭkas la abismo de l' fuŝ-artajo. Tamen — la kino-kaĉo estas bone preparita, oni povus ĝin nomi artfrandaĵo. Ĝi gustos sendube al la publiko!...

La reĝisoro Siodmak fariĝos certe artisto-reĝisoro, kiam li elektos pli altnivelan temon. F.

Ĉu la tekniko venkos Esperanton? (artikolo en la decembra numero). Sed kio pri diverslingva aŭskultantaro? En Egiptujo kutime la kinejoj havas apud-ekranon, sur kiu aperas la tekstoj (titoloj) en du lingvoj, krom la lingvo sur la ĉefekrano. Pli grandaj kinejoj havas du apud-ekranojn kaj uzas kvin diversajn lingvojn samtempe por titoloj (franca, angla, araba, itala, greka). Sed kiel paroli samtempe en 5 diversaj lingvoj! Ĉu niaj kinejoj adaptu oreajn aŭdigilojn kiel ĉe iuj internaciaj konferencoj? Ĉu teknike estas eble tiel disaŭdigi sonfilmojn samtempe en diversaj lingvoj?

Samideane C. M. C. Port Said.

Kiam ni Esperantistoj fariĝos modernaj? Kiam ni uzos modernajn propagandilojn? La filmo estas la plej potenca propagandilo. Mi tute aprobas la ideojn esprimatajn en via artikolo «Kiam ni havos nian Esperantan filmon?» Precipe plaĉas al mi la ideo pri la «aktualaj semajnoj» kaj por mi tute ne estas kompreneble, kial ni ne prientlas tian bonegan propagandilon?!

Ni faras ĉiujare grandan multekostan internacian kongreson, sed la homoj apenaŭ ion aŭdas pri ĝi. Se la aktualaj filmsemajnoj raportus ĉiujare pri la kongreso, la publika opinio (milionoj da homoj!!) estus multe pli favora al nia afero. Kiu kulpas? Kiu organizaĵo devas okupi sin pri tiu ĉi gravega demando? I. C. K., K. R. aŭ U. K. (Universala Kongreso) ???

J. Wozminsky (Polujo).



Emil Jannings



OBSERVO

HENDRIK ADAMSON. Antaŭ nelonge ekverkis Esperante la estona poeto kaj verkisto Hendrik Adamson, pri kiu diris foje la konata estona verkisto Friedebert Tuglas, ke kelkrilate al li apartenas kulminaj atingajoj en la estonaj poezio kaj prozo. La kreado de H. Adamson estas spontana kaj okaza kaj sentiĝas tial ofte fragmenteca. La vivo tro elrelegis lin per sia bagatelemo, forte impresante lian verkadon. Pro lia troa sentemo al la nuda realeco de la vivo ĉi ties krudeco kaj senkompateco lasis detruajn postsignojn en lia animo. La fundamenta temo de la verkoj de Adamson estas intimelegia rilato al la mondo kun certa inklino al humoro.

Entute aperis tri poemaroj de Hendrik Adamson. El ili la unua »Mulgilando« (1919) estas plena je amo al ĉi tiu distrikto en Estonio, lis hejmloko, dum la dua »Homo« (1925) tuŝas profunde la vivproblemon. La tria poemaro »Tajdo« (1931) montras rec, ke Adamson estas poeto de sentoj profundaj, scipovanta kunfandi esprimojn de moderna poezio kun popolecaj dirmanieroj. Lia unua novelaro »Verda lacerto« (1925) estas unu el la plej originalecaj en la tuta estona literaturo. En la »Orblonda junulino« (ankaŭ 1925) estas troveblaj multaj personaj trajtoj, dum »Ĉe ora tagiĝo« (1928) prikantas junecajn rememorojn de la verkisto.

Hendrik Adamson ŝatas verki en sia hejmloka dialekto: nun, lerrinte Esperanton, li ekverkis ankaŭ en lingvo internacia. Ni sincere ĝojas, ke ni povas nomi lin unu el la fervoraj adeptoj de la lingvo, sed entute de la granda ideo de lingvo komuna por ĉiuj popoloj.

GERHART HAUPTMANN: ANTAU SUNSUBIRO.

La nova teatraĵo de Gerhart Hauptmann, kiun nun prezentis la Berlina Deutsches Theater, eĉ ne konsiderante la varmegan atmosferon de l' premiero, okupos tute certe sian lokon en la vico de la klasikaj verkoj de la germana literaturhistorio. Kiuj ĉeestis el la membroj de la pli aĝaj generacioj la neforgeseblan vesperon de la teatro de Reinhardt: tiuj certe revagis pense en la perspektivon de preskaŭ kvardek jaroj, kiam al la teatraĵo »Antaŭ sunleviĝo« de la juna Hauptmann ili aplaŭdis kun entuziasmo simila al la hodiaŭa. Eble oni povus rigardi simbolo ĉi tiujn du staciojn de la fenomenaj poeta kariero: la kritikistojn ja — de la plej ekstrema maldekstro ĝis la ekstrema dekstro — hejtis la sento: de ne simpla premiero estis atestanto tiuvespere la invitita publiko de l' Deutsches Theater.

Unuflanke sepdekjara viro, aliflanke deknaŭjara knabino — la historio de tiaspeca amo malofte finiĝas per *happy end*. La ŝtatkonsilanto de Hauptmann perdas sian edzinon kaj tiu ĉi perdo minacas per plena anima ruiniĝo. Tiam li renkontiĝas kun la knabino kaj tiu ĉi renkonto de aŭtuno kaj printempo profunde ekskuas ambaŭ. La viro volas reakiri eble per la lasta ekflagro de sia subiranta vivenergio la jam perditajn enhavon kaj sencon de sia vivo: kaj la knabino — ne ventanima, rigardanta nur eksterajojn, sed profunde pensema kaj profunde sentema animo — vidas fatan ordonon en tiu ĉi renkonto. Estus malfacile konstati: kiuflanke estas pli forta la amo. Sed la knabino, kun sia deknaŭjara kapo decidis en si pri ĉio kaj pri ĉiu. Se mi ne povos

esti la lia — ŝi diras mallaŭte kaj sen ĉia patoso — mi mortos. Tria vojo ne ekzistas ...

Sed la viro mortas. Ne en eksterordinara maniero, sed laŭ la ordo de l' naturo. Kaj tiamaniere kovras delikata nebulo la fareblan demandon : ĉu ili jam havis pli proksiman rilaton unu kun la alia. Hauptmann ne respondas la demandon. Kaj estas ja bone. Ĉar kiel ajn sonus la respondo : tiu ĉi nebulo estas pli poezia kaj pli delikata. Kaj ĉiu anstataŭas ĝin, per kio li volas.

Jen unu parto de la teatraĵo : la ama tragedio. La alia parto estas nomebla eble familia dramo. Kiel defilas la tuta «ama» familio de la sepdek jara viro, por malhelpi la novan geedziĝon. Laŭdire nur pro amo, sed el sub la surfaco troe tro trabatas sin la materiala intereso, la tremo timo por la hereda ĉasaĵo. Tiu ĉi familia dramo havas scenon, pri kiu oni povas kaj oni devas mediti, sendepende de la teatraĵo. La viro havas filon, kiu naskiĝis siatempe inter grandaj malfacilaĵoj. Post tre grava operacio oni kredis, ke li eĉ ne restos viva. Kaj tiam la patro prenis en siajn brakojn la novnaskiton, karesadis ĝin, kaj oni kvazaŭ povas diri, ke la kapon, deformitan de la operaciiloj, li refaris denove normala. Kaj la filo nun volas uzi eĉ la helpon de la leĝo kontraŭ sia dua kreinto. Kaj li volas pruvi, ke en la cerbo de sia patro estas troveblaj gravaj difektoj. — Li havas sian cerbon dank' al sia patro, kaj nun li kalumnias la cerbon de sia patro ...

La poeto parolas en la tri aktoj de la *Vor Sonnenuntergang* kaj nenie sonoras tiu ĉi voĉo fa'se aŭ lace. Tre domaĝe, ke mi devas raportii pri la nova verko de Hauptmann nur per la skribitaj paperaj tri aktoj. Ĉar devis esti aparta travivaĵo, kiam la vortoj de la sepdekjara poeto ekvivigis sur la scenejo de la Deutsches Theater.

Karlo Bodó

RECENZO



Ĉiujn librojn, ricevatajn en du ekzempleroj, ni recenzas. Unuope ricevatajn librojn ni nur mencias. — La recenzoj esprimas nur la opinion de la recenzinto kaj ne tiun de la redakcio. Pro tio la redakcio tre volonte publikigas intersajn kontraŭopiniojn, koncernantajn iajn aperintajn recenzojn. — La libroj, ĉi tie menciataj kaj recenzataj, estas haveblaj ĉe la librofako de nia eldonejo.

HISTORIO DE KRISTO de *Giovani Papini*. 575 paĝoj. Prezo : Broŝ. 13 sv. fr. Bind. 16.20 sv. fr. Eldono : A. Paolet. S. Vito al Tagliamento.

Ĉiam aktuala, neniam elĉerpebla temo estas la vivo kaj filozofio de la Nazaretano, kies martirmorto sur la kruco signifis novan aŭroron por la homaro. La legendaro kaj historio, la Bibliaj kaj apokrifaj evangelioj starigas lian gigantan spiriton antaŭ la okulojn de generacioj dum du jarmiloj kaj... kaj la homoj eĉ hodiaŭ ne komprenas aŭ ne volas kompreni lin. Tre strange, kvankam lia spirito vivas inter ni kaj lia majesta simpleco ĉiutage inspiras la homojn por vera fratiĝo, tamen oni vole nevole konstatas, ke certagrada miskompreno vualas la klaran percepton pri li kaj pri lia instruo. Kristo savis la mondon, sed ofte ŝajnas al la meditante, ke la mondo ne deziras saviĝi. Kial? Certe pro diversaj kaŭzoj. Kio okazus, se ĉiu homo havus sanajn okulojn? Verŝajne la optikistoj baldaŭ fermus siajn butikojn. Sed la okuloj estas divers-

povaj, do sekve ankaŭ la okulvitroj havas diferencajn ecojn. Ofte okazas, ke ĝuste la oficiale rekomendita binoklo efikas malbone kaj la uzanto iom post iom perdas por el la vido la akrajn konturojn de la rigardata objekto. Tiukaze li flankenŝovas la binoklon kaj provas vidi per propraj okuloj... Tia ĉiutaga tragedieto okazis al mi en mia 13-a jaro. Mi devis flankenmeti la okulvitrojn por ne nur rigardi, sed ankaŭ vidi tiun spiriton, je kiu mi sopiris kun mia soifa infana animo... kaj sen okulvitroj ĉiupaŝe en la vivo mi renkontis la fenomenojn de tiu Krista spirito, kiun nur nebula, tro enkadrigita mi vidis tra la oficialaj vitroj. Kaj tiuj korkaresaj renkontoj konstante ripetigas, sed preskaŭ ĉiam ekster la limoj oficialaj. La Krista spirito vivas, la Krista spirito ne lasas sin entombigi aŭ kateni, sed Ĝi libere movas sin sur la tuta tero kaj ne toleras, ke Ĝi estu privilegio de religio, raso aŭ kontinento. La Krista spirito estas la sola inspira konsolo por tiuj, kiuj kun malfermitaj okuloj devas vivi en la mondo de la haoso.

Kun tiaj pensoj mi prenis en la manon la verkon de Papini kaj mi legis, legis, sed tre malmulte mi travivis. Mi sentis miajn okulojn lacigitaj de la oficiale rekomenditaj okulvitroj kaj la ĉiutage renkontatan Kristan spiriton nur nebulece mi povis trovi en la longaj parafrazoj. Vole-nevole mi devis sperti, ke la ĉiam aktuala kaj neelĉerpebla temo tamen superis la talenton de la verkisto, kiu cetere estas bonega stilisto, majstro de la plumo. Eble la stilisto kaj ne lia talento kulpas pri tio, ke mi ne rekonis pleniluzie la mildajn trajtojn de Kristo, la eterne vivanta. Li aperis antaŭ mi troornamita, liaj paroloj ŝajnis esti saturitaj de ia oficiala digno de Senditoj kaj ofte mankis el li tiuj senartifika modesteco kaj sincerekora spontaneeco, kiuj iam formis lian plej individuon allogecon kaj kiuj havis forton post lia morto krei novan mondon. Mi diris, ke ofte, sed feliĉe ne ĉiam, ĉar tie, kie ne sole la rutino de la virtuozo, sed ankaŭ la inspirita artisto aperigas lin antaŭ la leganto, la verko montras siajn altajn valorojn, kiuj faris ĝin mondfama.

La apero de la 575 paĝa libro en Esperanto estas salutinda, ĉar ĝia traduko ĝenerale bone impresas, estas flua kaj kelkloke per elegantaj parolturnoj riĉigas la lingvon. Ĝi certe fariĝis konsiderinda valoro en la religia literaturo de Esperanto, ĝi alportos utilon el diversaj vidpunktoj por la leganto kaj krome ĝi havas ne malatentindan propagandan valoron en nia movado. Mi kore gratulas la eldoninton por la impona eksterajo de la libro, la nekonatan tradukinton por la granda laboro, konsciencie kaj entuziasme farita, ankaŭ la verkiston por la verko mem. Bedaŭrinde ĝia antaŭparolo, treege interesa el certa vidpunkto, ofte malhelpas dum la legado de la verko, en kiu oni ofte renkontas moralan instruon en la tono kaj stilo de la antaŭparolo. *Jobo.*

JOHN MERCHANT : KOMPATINDA KLEM. 90 paĝoj. Eldonejo : The Esperanto Publishing Co. Ltd. London. 1931. Prezo : broŝ sv. fr. 1.60, bind. sv. fr. 2.50.

Nemultpretenda verko, kaj se oni legas ĝin kiel tian, oni trovos ĝin simpatia, amuza rakonto, kiu neniam enuigas la leganton. Temas pri riĉa angla junulo, kiu dum vojaĝo al la Helsinki-a mondkongreso konatiĝas unufoje kun la «granda mondo». Carmaj, humoraj epizodoj de l' ŝipveturo, la tumulta svarmo de l' diversnaciaj esp-istoj, postkongresa vojaĝo al Stockholm, Berlin, Amsterdam formas la unuan, pli longan parton de l' libro. La duan parton okupas okazaĵoj post la reveno al Anglio: historio de juneca amo, komplikita per konkuro de rivalaj fabrikisto-familioj, sed kun la kutima *happy end*. Evidente tiu ĉi dua parto estas la pli sukcesa, la fluo de l' rakonto en ĝi estas la plej vigla, la plej turnoplana. Sed ankaŭ la unua parto kapablas teni vigla la interesigon de l' leganto. Oni bedaŭras nur, ke Merchant rigardas per la okuloj de ŝablona *globe-trotter*, kiu memoras pri la dumvoja marmalsano, pri la diversaj, sufiĉe oftaj, altabligoj kaj mangadoj, pri kelkaj okulfrapantaj kuriozaĵoj (ekzemple pri groteska aventuro en finna banejo), do

pri la eksterajoj. Multe pli interesus min romano, kiu kondukas la leganton ne nur en la eksteran kadron de Esperanto-kongreso, sed kiu kapablas sensigi ĝian specialan atmosferon, (tamen senteb'lan, ankaŭ en la Merchant-libro, sed nur surface,) romanon, kiu malkovrus al ni la psikologiajn efektojn de tia internacia rendezuo.

Sed Merchant ne ambiciis tian verkon. Se mi bone divenis, lia celo estis: doni konvenan, amuzan legajon en la manon de la esp-ista junularo, legajon, kiu per sia facila lingvo, iom seka, sed bonvena humoro kutimigos novajn adeptojn al la lego de Esp-aj libroj, samtempe ĝi iom konigos al ili la esp-istan vivon. Kaj Merchant sukcese solvis sian taskon. Mi rekomendas la libron al la atento de kursgvidantoj por progresintoj.

Pri la stilo de Merchant mi povas diri nur, ke ĝi estas senriproĉe agrabla. Tamen mi devas noti, ke li malĝuste uzas la esprimon »edziĝo de virino« anstataŭ »edziĝo kun virino«, aŭ »edzinigo de virino«. La uzo de »unu« kiel nedefinita artikolo mirigas en Merchant-libro.

Ludoviko Totsche.

G. D. NASH: »MINIATUROJ«. 58 paĝoj. Eldonejo: The Esperanto Publishing Co., Ltd. London 1931. Prezo: sv. fr. 2.50.

FAKTOJ: En la libreto mi trovis la jenajn vortojn (mi citas ilin en la kazo, en kiu la aŭtoro ilin uzas): *geamantuloj, viv-sanec', patrego, oretar', salutegon, nekonvinkitulo, enbankuve, estimatulino, stultulaĉo, gloses-tonteco, ĝojamikeco, junemec', honestulin' korŝiritulino, esperiĝu, mond-vivemec', senteco, foresteco*. La aŭtoro uzas la *el* prepozicion en tre strangaj kunmetoj, ni vidu kelkajn: *Elkisindaj, elterura, elsc.anta, elsaturado, elsenkuraĝigite, elforiro, elklarigo, elsimpliĝos, elsaniĝantaj, eloleumita, elkompreni, elforgesitajn*. Inter aliaj ni legas: »la viajn gefratojn«. La sufikso *ec* estas uzata proksimume 60 foje, plejparte tute sen bezono, nur por »rimi«. Pli ol 150 rimparojn mi trovis nuraj adasismoj, do ne rimoj! Ekzemple ni vidu la »rimojn« de la poemo (naŭversa) »La donaco«: terceton-festeton-trijaruleton, pensado-versofarado-ĝojado, plorĝemegon-benegon pupegon. Mi trovis tiajn strofojn:

»Nune kapablas festi mi
Duoble novan ĝojemecon.
Reviviĝinto, — donis vi
Al mi ĝojrevivecon!»

»Gegastigintoj miaj tre bonkoraj, —
El viaj don-esprimoj de amec',
(Car nemeritaj nepre pli trezoraj.)
Unu min elplenigis per ĝojec'.»

»En unuj tagoj — tro bone ni spertas
Ke ĉio maligas — nemo bonstatas.
Pri tio neniu profeto avertas,
Nek iel al io la kaŭzo rilatas.»

»Tiam li portis lignan fosileton
Sed, — dum fuŝad' de ofta transloĝec', —
Perdis, kaj nun ni vidas nur truelon.
(Tute ne ĝenas lin la pereec'.)«

Mi esperas, ke miaj legantoj pardonos tiujn ĉi citaĵojn, sed mi trovis necese, ke *per ili* mi klarigu mian juĝon pri la libro. Mi pensas, ke ĉiu plua karakterizado pri la lingvokono kaj poeta esprimovo de l' aŭtoro estus superflua, la supre cititaj faktoj ja mem parolas... Tamen oni devas rekonii, ke en kelkaj poemoj ni vidas nekontestebajn signojn de poeta talento, kelkfoje la temo de l' poemo atestas pri poeta sento, poeta ekvido. Kelkfoje oni sentas la tenton korekti poemon, kiu meritis definitivon ellaboron. Ĉar en la nuna formo tiuj ĉi versoj ŝajnas esti nur provadoj verkitaj por la propra skribtablo-kesto...

DEMANDOJ: Kiu estas responda pri tio, ke tiuj ĉi versoj en sia nuna formo venis antaŭ la publikon? Ĉu la aŭtoro ne opinias, ke antaŭ publikigo de versvolumo estus konsilinde preni bonan lernolibron kaj ellerni la lingvon? kaj poste multe legi niajn plej bonajn poetojn kaj nur post ĉio ĉi ekverki proprajn poemojn? Kaj antaŭ publikigo peti konsilon de kompetentulo? (En Anglio ja estas multaj eminentaj esp-istoj!)

Ĉu la eldonejo ne havas kompetentan lektoron, kiu povus doni fidindajn konsilojn pri la elekto de l' eldonotaj libroj? Ĉu la eldonejo ne vidas, ke per la eldono de tiaj provadoj ĝi malutilas al la afero de l' Esp-a libro, al siaj propraj negocaj interesoj kaj al la veraj interesoj de l' aŭtoro mem?

KONKLUDO: Mi devas eldiri la verdikton, je kiu esp-istan kritikiston devigas nur ekstrema neceso: mi ne povas rekomendi ĉi tiun libron.

Ludoviko Totsche

VINGIE E. ROE: LANDO de ARGENTA AKVO. Tradukita de Edward S. Payson. 48 paĝoj. Eldonejo: Esperanto Asocio de Nordameriko. 0.50 dol.

Facila poramuza rakonto. Literatura valoro: nulo. Flua stilo. Riproĉinda estas kelkfoja superflua uzo de l' sufikso *ad*, la uzo de l' verbo *ĉagreni* anstataŭ *ĉagreniĝi*.

L. T.

DRO F. SZILAGYI: AZ ESZPERANTÓ NYELV, 16 könnyű leckében, illusztrációkkal (La Lingvo Esperanto, en 16 facilaj lecionoj, kun ilustraĵoj). Hungarlingva eldono. Formato: 23×15.5 cm. 40 paĝa. Eldonis: Literatura Mondo, Budapeŝt. Prezo, kun ŝlosilaldono: 1.50 pengoj.

Amuze instrui estas la celo de tiu ĉi nova lernolibro por hungaroj, kaj trafoliomante, oni konvinkigas, ke ĝi plene atingas sian celon. Ĝi konigas al la komencantoj la elementojn de la gramatiko (nur la nepre necesan materialon!) kaj per lerte kunmetitaj ekzercoj kaj demandoj tuj kondukas la lernanton en la Esp-an konversacion. Pro tiu ĉi proreco la libro konvenas prefere por *parola* instruado, por memlernantoj estus necese aldoni suplementan kajeron kun traduk-ekzercoj kaj ŝlosilo.

La lernantoj certe rapide ekŝatos tiun ĉi lernolibron, ĉar ĝi kiel eble plej multe faciligas la laboron de l' lernanto. Ekzemple la unua leciono enhavas nur internacie konatajn vortojn, uzatajn sensange ankaŭ hungare, ilin kompreneble la komencanto tuj rekonas; mi mem, ekzemple, havis momenton, kiam subite mi ne sciis, ĉu esperante, aŭ hungare mi legas. Kaj la aŭtoro ĉiam sukcesas trovi ŝercon, anekdoton, kanttekston (li inter la unuaj rekonis la valoron de l' metodo: kantigi la lernantojn), per kiu li faras amuza la instruadon kaj revigligas la eble iom laciĝintan atenton de l' lernanto. Apartan kaj sufiĉe ne aprezeblan valoron de l' libro reprezentas la vere spritaj desegnaĵoj, kiuj ilustras la gramatikajn klarigojn de l' aŭtoro. La lernantridante komencos la laboron: ĉu estas imagebla pli multpromesa uverturo? (Kaj ni ne forgesu, ke la ŝercoj, spritaĵoj de l' libro ne apartenas al la kutimaj, antaŭdiluviataj ŝablonajoj de l' lingvolibroj: tute ne, ili estas modernaj, aktualaj, kelkfoje ili eĉ ne senas aludojn je sociaj eventoj kaj fono.) La libro estas samtempe varbilo: ĝi ne lasas sola la ellerninton, sed klopodas tuj varbi lin por la societa vivo kaj por la Esp-a literaturo. Ni devas saluti la libron, kiu, per sia senpera voĉo kaj facile komprenebla teksto kvazaŭ streĉas la interesigon kaj sciivolon eĉ de tiuj, kiuj eble sen serioza lerna intenco foliumas ĝin.

La senriproĉa eksterajo, la bona papero nur altigas la ĝuon de l' leganto. Ĝia apero signifas aperon de tre multaj novaj esperantistoj.

Karlo Bodó.

P. FIRU KAJ S. PRAGANO: RUMANA BONHUMORO EN ELEKTITAJ RAKONTOJ. (Eld. S. Pragano, 62 p.)

Libro, kiu tre plaĉas al mi; titolo, kiu ne plaĉas. La sendube bonegaj noveloj, skizoj aŭ estas karakterize rumanaj (— satiroj), sen bonhumoro, (eĉ vipe amaraj), aŭ preskaŭ pure bonhumoraj, sed ne speciale rumanaj. La eminentaj satiroj de Carageale kaj Creanga radias la plej internan nacian aromon, kiu estas ĝuinda kaj ĝuenda. Sed ne malpli plaĉa estas la sana »gamin«-ridego de Herz. La traduko estas vigla kaj inteligenta; same la elekto de la verketoj estas tre kontentiga, sed la antaŭparolo estas tro skiza kaj sen klarigoj pri la aŭtoroj.

F. Szilágyi.

GRAMATIKOJ KAJ VORTAROJ. L. Turno: Kompletny podrecznik jazyka Esperanto. — L. Turno: Slownik Esp. — Polski, Polsko — Esp. (Eld. dr L. Dreher, Krakow Prezoj: 1Z. 1.25 kaj 1.—) — Roublof: Cours Proletarien d' Esperanto. (Eld. Ekrelo, Leipzig. Prezo: GM 1.—) — H. Rikand: Eesti Esperanto Sõnastik. (Eld. Tamverki Esperanto Kirjastus, Haapsalus. Prezo: So. fr. 1.—)

La pola gramatiko de Turno (72 p.) estas taŭga por sololernado. Malpli por grupo. La vortaro de la sama aŭtoro enhavas ĉ. 1700 radikojn.

Pri la bona gramatiko de Roublof ni jam parolis ĉe la rusingva eldono.

La estona vortareto estas tre belaspekta (174 p.) kun ĉ. 7500 estonaj vortoj kaj signifoj.

SIRKALENDARO POR 1932. Praktika mur- kaj tablo-kalendaro kun semajnfolioj. La nunjara kalendaro estas multe pli valora ol la pasintjara. Ĝi enhavas utilajn indikojn, artikolojn, poemojn, pli ol 100 anekdotojn, spritaĵojn, ridigajn preserarojn, humorbildojn (ĝi estas precipe dediĉita al la bonhumoro) kaj amason da bonaj konsiloj por esperantistoj, parte en formo de sentenco, ekz.: Toleremuloj estu ja ni, ĉiam laboru en harmoni! — Ĉu britoj, francoj, germanoj — ni estu samideanoj! La kalendaro kostas, kiel murkalendaro, gmk. 1.50; kiel tablo-kalendaro, kun metala submetajo, gmk. 3.20. Eldonejo »Heroldo de Esperanto«, Brüsseler Str. 94. Köln, Germanujo.

Viaj amikoj — la libroj. ILUSTRITA KATALOGO DE HEROLDO. Eldono 1931/32. Utila gvidilo tra la eldonaĵoj de Heroldo. Preskaŭ ĉiu estas prezentita per bildo kaj detaleta priskribo, tiel ke elekto estas grave faciligita al la aĉetemo de taŭga Esperanta libro. La ilustrita katalogo estas presita sur bonega papero, ĝi ampleksas 24 paĝojn kaj kovrilon kaj estas senpage havebla de la eldonejo »Heroldo de Esperanto«, Brüsseler Str. 94. Köln, Germanujo.

KATALOGO DE LIBROJ. Numero 8, Novembro 1931. 48-paĝa katalogo (32+XVI paĝoj) enhavanta liston de ĉiuj libroj haveblaj ĉe Heroldo, krome la kondiĉojn de liverado, tarifon de la ĵurnalo »Heroldo de Esperanto«, mendilojn ktp. Ricevebla senpage de la eldonejo »Heroldo de Esperanto«, Brüsseler Str. 94. Köln, Germanujo.

ESPERANTO-SIGELMARKOJ EN 12 LINGVOJ. Sigelmarkoj kun propagandoteksto en la lingvoj angla, ĉeĥa, Esperanta, franca, germana, hispana, hungara, itala, nederlanda, pola, serbo-kroata kaj sveda. Trikolore presitaj. Ĉiu lingvo en aliaj koloroj. En folioj po ok markoj temantaj pri radio, trafikoj transoceana, aviada, fervoja kaj aŭtomobila, sporto, turismo kaj internacia komerco. La tekstoj rilatas kun rilataj vinjetoj. 10 folioj (80 markoj) de unu lingvo kostas germ. mk. 0.55 100 folioj kostas germ. mk. 4.40, inkl. sendkostoj. Eldonejo »Heroldo de Esperanto«, Brüsseler Str. 94, Köln, Germanujo.

HEROLDO DE ESPERANTO, la semajna sendependa ilustrita organo de la Esperanto-movado, aperas de post la nova jaro en pli grandaj formato kaj amplekso, kaj

kun aro da regulaj aldonoj: Lingva Kritiko, monata revuo por lingvaj demandoj (direktoro: Prof. B. Migliorini, Roma); La Bela Mondo, monata paĝo por turismo, banoj ktp.; Nia Revueto, dumonata organo por la Esperanto-junularo; La Strigo, paĝo pri literaturo kaj arto; Humoro, Distro, Ludo, paĝo por distrado; La Anteno, radiopaĝo; Sur la kvin linioj, paĝo pri muziko; La Regno Virina, paĝo por virinoj. Estas atentinde, ke »Heroldo«, kiu jam en sia dektria jaro aperas regule ĉiusemajne, en tiel malfacila tempo kiel la nuna kuraĝas entrepreni konsiderindajn plibonigojn. La eldonejo »Heroldo de Esperanto« (Brüsseler Str. 94. Köln, Germanujo) sendas al ĉiu petanto senpagan ekzempleron de la pliperfektigita gazeto.

LA LUMO ORIENTA. Nova kvaronjara organo de la Japana Budhana Ligo Esperantista (Takakura-Kaikun, Rokujo-Takakura. Kioto. Japanujo) Jara abonpago kun kotizo al la Ligo sv. fr. 2.50. Celoj: Internacia diskonigo de Budhismo per Esperanto kaj disvastigo de Esperanto en budhana kampo. Kun budhismaj terminoj. Kaj ne ĉiam korektaj tekstoj.

P. B.

NIA POŬTO

S-ro Wellner, Valga. Vian abonon ni ricevis siatempe. Pardonu la erare senditan alvokon.

S-ro Krumins, Riga. Via abono alvenis siatempe, sed pro nia eraro ne estis registrita. Nun ni jam sendis ĉion al vi. S-ro Kazoks ricevas la gazeton ĝis la 3-a numero pro tio, ĉar li postulas de la *malnova* L. M. naŭmonatan abonon. Ni ĉiam kun plezuro legas viajn leterojn, ĉar ili estas tre spritaj kaj... pravaj. Kial vi ne provas ion verki?

S-ro Holger, Holbak. Dankon pro viaj bondeziroj. Bedaŭrinde nur 5 abonantoj petis bindilon por la unua periodo, ni do devas prokrasti pretigon.

S-ro Bonde, Falun. Ni konfirmas la ricevon de sv. kr. 5.— por bindiloj. Pri tiu por unua periodo legu supran respondon. Bonvolu dume disponi pri la restintaj 2.50 kr.

S-ro Degen, Leipzig. Vi sendis por abono 7.— mk. Sed la abonprezo estas § 1.80 = 7.50 Bv. okaze transendi la diferencon.

GRAVA KOREKTO! Pro bedaŭrinda eraro kelkaj klišoj en la 2-a numero de 1932. ne estas ĝuste subskribitaj, pro kio ni petas la pardonon de la pentristoj kaj de la legantoj.

Sur paĝo 26 la subskribo devas esti: *Hans Arp* (Negeometria Kontruado) kaj ĝi devas esti turnita.

Sur paĝo 31 la subskribo devas esti *P. Picasso* (Deformado kaj konstruado)

Sur paĝo 35 la subskribo devas esti Stanislaw Grabowski.

NEOLOGISMOJ:

Bohema: artiste facilanima, senzorga en malriĉo
etoso: animo de loko

kiĉo: artfuŝaĵo

koŝmaro: songteruro

morna: prema malhela

premiero: unua prezentado de teatraĵo

sibarito: ĉstreme komfortema, molkorpa, ĝuema

tenaca: obstine rezistema, elaste eltenema

SCIENCA GAZETO

ESPERANTA

Nova popularscienca gazeto kun la supra nomo estas eldonata tute en Esperanto kun la sekvantaj celoj:

1. Utiligi Esperanton por disvastigi popularan sciencon en la tuta mondo.

2. Krei kampon kaj rimedon por utiligi Esperanton por praktikaj celoj, tiel indikante propagandante Esperanton.

3. Kunligi ĉiujn esperantistojn kiuj interesigas pri sciencaj temoj.

La unua numero aperos ĉirkaŭ la 1-a de febr. 1932, kaj ni faros ĝin en la komenco dumonata kun la promeso ĉiumonatigi ĝin kiel eble plej baldaŭ sen plialtigo de la abonprezo.

Jara abono unu dolaro.

Pro numero du respondekuponoj.

Popularsciencaj artikoloj estas bonvenantaj.

Sendu abonpagojn, artikolojn kaj komunikaĵojn al

AMERIKA ESPERANTO INSTITUTO

Madison, Wis., Usono.

El Eŭropo al LITERATURA MONDO, Hungarujo

UJ ESZPERANTÓ NYELVTAN

magyarok részére

LA SIMPLA ESPERANTO

tanfolyamok és magántanulók részére

írta

dr Szilágyi Ferenc

35 illusztrációval

teljes gyököszótárral

Ára P 1-50

A legolcsóbb és legjobb eszperantó nyelvtan

Tanítóknak egy mutatvány-

példányt 1.— P-ért küld a

LITERATURA MONDO

kiadóhivatala Budapest, IX., Mester-

utca 53, V. 7.

Telefon: 380—84

APERIS!

APERIS!

TRANS LA FABELOCEANO

Novelaro de
Francisko Szilágyi

128 paĝa, ilustrita, sur belega papero.

Broŝurita Uŝa dolaroj 0.60

Bindita Uŝa dolaroj 1.—

Aldonu 10% por sendkostoj

Eldonas: **Literatura Mondo**, Budapest, IX.,
Mester-u. 53. V. 7. — Ricevebla ankaŭ ĉe niaj re-
prezentantoj kaj ĉe la seriozaj librovendistoj.

LA PENTROARTO

en la malnova Hungarujo

estas la titolo de la kristnaska surprizo de Literatura Mondo

LIBRO KUN 96 TUPAĜAJ

ILUSTRAĴOJ!

Sur peza kreto-papero!

**KUN 72 PAĜOJ DA KLARIGA
TEKSTO!**

FORMATO 25×18.5

EN LUKSA DUONLEDA BINDO!

Ĝi estas la plej bela libro en Esperantujo!

Prezo 3.— usonaj dolaroj + 10% por sendkostoj.

Ne forgesu rekomendi ĝian aceton al la via urba
publika muzea aŭ belarta biblioteko al pentroartaj
Institutoj! Vi faros per ĝi la plej bonan propagan-
don en tiuj randoj!

Mendu ĉe LITERATURA MONDO BUDAPEST,

IX., Mester-u. 53. V. 7.

HUNGARUJO

aŭ de niaj reprezentantoj kaj de la
seriozaj esperanto-librovendistoj.



Li estis unu el la plej miskomprenitaj homoj. Pli ol duoncentjaron vivtenis sin la legendo pri la figuro de ekstreme egoista, frostĝentila, hommalama kaj hommalestima maljunulo, ĝis fine penetremaj esplorantoj de l' Goethe-verkaro elfosis la dokumentojn, kiuj nekontesteble pravas, ke la legendo estis nur legendo. Al la vivo de l' elstaraj reprezentantoj de l' homaro la postepoko alĝuas imagitajn historiojn, tio ja estas natura, en tio manifestiĝas la scivolo de l' amaso kontraŭ la privata, *homa* flanko de l' genio. Kaj ĉu estas mirinde, ke tiu ĉi scivolo ne ĉiam estas bonvola? La amashomo ne povas pardoni al iu, kiu kreskis pli alta ol li. Estas do kompreneble, ke la fantazio de l' nuna homo, se temas pri Goethe, pleniĝas per malprecizaj, parte aŭ tute malveraj notoj, anekdotoj, kiuj vualas la ankoraŭ nun ombrojetantan silueton de tiu ĉi giganta Homo.

Kio klarigas la sekreton de la Goethe-sfinkso? Emil Ludwig volas ĝin solvi tiel, ke li dividas la potencan spiriton de l' titano je demono kaj genio. Lia demono pelas lin al la sensaj ĝuoj, al la potenco, al ĉio, kio kapablas lin kapti en la reto de l' normala homa vivo, kaj lia genio savas lin ĉiam kaj liberigas lin por plenumi sian nemorteman taskon. Mi sentas tiun ĉi dividon arbitra, falsa. Ĝuste lia genio pelas lin per demona forto, ĝuste lia genio ne lasas lin longtempe ĝui la rapidajn momentojn de l' feliĉo, ĝuste lia genio igas lin oferi lian vivon, lian personecon al la celo: al la plena manifestiĝo kaj eterniĝo de la genio. En la lastaj jaroj de sia vivo jam ne vivas la homo Goethe, sed nur la genio-Goethe, el kiu forvelkis ĉiu persona sento kaj rilato, al kies ekzisto donas sencon sole la grandioza tasko: la finigo de Faust. Kelkajn semajnojn post la finita laboro li mortis. La maljunulo nur tiel povis konservi sian vivon por la laboro, ke li evitis ĉiun emociion, kiu estus endanĝeriginta lian vivon kaj per tio malhelpinta lian laboron. »Mia sopiro, ke la piramidon de mia ekzisto, kies fundamento estas donita kaj sur firma bazo, mi levu kiel eble plej alten, superas ĉiujn aliajn kaj eĉ ne toleras, ke mi forgesu ĝin. Ne licas al mi malfruiĝi, jam multaj jaroj premas miajn ŝultrojn, eble meze de l' laboro rompos min la sorto, kaj la babela turo restos stumpa. Almenaŭ oni diru, ke ĝi estis aŭdace planita.« Se ni plene trakomprenas la heroecon, la superhomecon de lia fortostreĉo kaj vol-

energio, ni ne staras senkomprene antaŭ la antikve rezigna, sola frazo, per kiu li forige akceptis la sciigon pri la morto de sia ununura filo: »Mi scias, ke mi generis morteman filon!« Kaj li returnis sin al sia laboro kun la vortoj, kies titana tragiko tempeste tremskuas nian animon: »Und so, über Gräber vorwärts!« (Kaj tiel, super tomboj, antaŭen!)

Ni ne povas pli inde enkonduki nian nunan numeron, dediĉitan al la centenario de Goethe, ol per liaj propraj vortoj; vortoj, kiuj refutas la alian legendon, ne malpli stupidan kaj ne malpli popularan, pri la *klasika* verkisto, kiu ĝuste pro lia klasikeco jam ne plu legeblas en nia »moderna epoko«. Ho, kiom malproksime ni estas de la moderneco de Goethe! — Do ni aŭdu la vortojn de Goethe, kiuj kondukas nin al pli fidela kono de kelkaj trajtoj de lia vera vizaĝo...

*

Ĉiu sufero enhavas ion dian: ĉar, ĝis ĝi estas sufero, ĝi devas esti ankaŭ eltenebla, kvankam malfacile kaj pene. Por homo, kiu sub ĝi sterniĝas aŭ kiu tute ne sentas ĝin, ĝi ne estas plu sufero.

*

La pasioj estas mankoj aŭ virtoj, nur pliigitaj. Niaj pasioj estas veraj feniksoj. Kiam la malnova forbrulis, tuj leviĝas la nova el la cindroj.

*

Certe la plej sentema naturo povas iĝi la plej malvarma kaj dura: ĉar li devas ĉirkaŭigi sin per dura kiraso por certigi sin kontraŭ malmildaj kontaktoj, kaj tiu ĉi kiraso ofte iĝas ŝarĝo eĉ por li mem.

*

Eltenita malagrablo havas ian propran ĉarmon.

*

La genio ŝajnas al mi ĉiam kvazaŭ kalkulmaŝino: ĝin oni ekturnas kaj la rezulto estas ĝusta: ĝi ne scias kial? aŭ kiel?

*

La homo venas en la mondon morale same nude, kiel korpe, kvankam pli malfrue en tiu ĉi senco. Tial estas lia animo tiom sentema kontraŭ la ekstera vetero, kvankam li iom post iom kutimiĝas al ĝi ĝis certa grado.

*

Verdire »vivi« ne signifas multe pli, ol multon »postvivi«.

*

Oni devas ĉiam transformi, renovigi, rejunigi sin por ne resti stagne.

*

La duonscio malhelpas la scion. Ĉar ĉiu nia scio estas nur duonscio, do nia scio ĉiam malhelpas la scion.

*

Por nova vero nenio estas pli malutila ol malnova eraro.

*

Oni vivas bone nur, se oni forgesas, ke oni vivas.

*

En Weimar

— Miklos Hajnik —

La ĉambro de l' hotelo estis establita per tiaspecaj mebloj, kiajn en mia infanaĝo mi vidis en la loĝejo de mia avino, en la Fortikaĵo de Buda. Kaj tiel do konata estis al mi la ĉirkaŭaĵo en Weimar, kvankam mi ne konis eĉ unu homon. Mi ne tre sciis, kiel mi venis tien kaj pro kio mi loĝas tie jam tri tagojn? Sed tiomloke mi jam vojaĝadis sen ia kaŭzo kaj sen ia celo, ke al mi vere neniam venis en la kapon: cerbumi pri tio, kial mi estas ĝuste tie kaj ne aliloke? ... Car ie ja oni devas esti, dum oni entute devas esti.

Sed nun, ĉi tie en Weimar, ne estis tute tiel, kiel antaŭe en Parizo, Genua, Firenze, Venezia, Fiume, Kassa, Klagenfurt, Luzerne, Budapest, Milano aŭ München. Tute stranga urbeto estis tiu ĉi Weimar: tian mi ne vidis ankoraŭ. Mi ja apenaŭ kuraĝis iom eliri el la hotelo: ia tute fremda sento min kaptis, kiam kelkfoje mi promenis en la urbo. Oni tre gapiis al mi, fingre montradis sur min kaj tion mi ne ŝatas. Kaj tiel mi prefere restis en mia ĉambro.

Kial mi ne vojaĝis plu? ... Car min retenis ia tute stranga interesiĝo. Aŭ ĉu eble timo ĝi estis? Nome, mi sentis tute certa, ke ĉi tien neniam plu, inter neniaj cirkonstancoj mi povos reveni, se iam de tie ĉi mi jam foriris. Kaj adiaŭi ion por eterne estas ĉiam malagrabla. Mian senton de libero ofendas la penso, ke ekzistas loko, kien neniam plu, inter neniaj cirkonstancoj mi povas reveni.

Kaj krome: tre interesa estis tiu ĉi urbo. Pacaj stratetoj, antikvaj domoj, homoj en multkoloraj vestoj, la blankperuka arĥiduko kaj arĥidukino. Kvazaŭ en Biedermeyer-opereto trapromenus la scenejon viro en moderna blua vesto, ĉiritaĵ ŝuoj kaj pajloĉapelo.

Oni frapis la pordon de mia ĉambro. Kaj la pordisto enpaŝis kaj mallerte, profunde sin klinis — tio min sur-

prizis, ĉar ĝis nun oni sufiĉe ignoris min ĉi tie — kaj solene anoncis:

— Sinjoro Kroeuter demandas, ĉu vi emas lin akcepti?

— Kiu estas tiu sinjoro Kroeuter? — mi demandis. La pordisto rigardis min mirante.

— Ĉu vi ne bonvolas koni la sekretarion de Lia Ekscelenca Moŝto?

— Bone, — mi diris — diru al li, ke mi atendas lin.

Kvankam mi eĉ ne konjektis, kiu povas esti tiu Lia Ekscelenca Moŝto, kies sekretario min vizitas?

Post momentoj paŝis en mian ĉambron unu el la operetfiguroj promenantaj en la urbo. Li surhavis violkoloran redingoton kaj blankan pantalonon, nigrajn bantajn ŝuojn, papagverdajn ŝtrumpojn. Kolombogrizan cilindroĉapelon de nekutima formo li tenis ambaŭmane antaŭ sia stomako. Tri paŝojn antaŭ mi li haltis, iom klinis sin kaj ceremonie komencis:

— Mi estas Kroeuter, la sekretario de Lia Ekscelenca Moŝto sekreta konsilanto Johann Wolfgang von Goethe.

— Mi tre ĝojas, — mi diris — mi tre ĝojas.

La sinjoro sekretario momenton paŭzis, dum suspekto li rigardis min. Poste li daŭrigis:

— Laŭ la komisiono de Lia Ekscelenca Moŝto mi havas la honoron peti la sinjoran moŝton, bonvolu honori lian hodiaŭan vesperon per vizito.

— Mi tre ĝojas, — mi diris — kaj mi sentas min tre honorata. Nepre mi iros, se intertempe ne venos io alia al mi en la kapon. Ĉi tio do estas en ordo, sinjoro Kroeuter, mi tre dankas. Nur unu demandon: diru do, sinjoro sekretario, kiel ekpensis Lia Ekscelenca Moŝto, ke li min invitos. Li ja ne konas min kaj ne tre povis min vidi.

Veninte en la societon, la ŝlosilon de l' koro oni tuj elprenas kaj enpoŝigas: kiuj ĝin lasas en poŝo, tiuj estas stultuloj.

*

Ŝajnus, ke la filo neniloke evoluas pli bone, ol en la proksimo de la patro. Tute ne! ... tio estas ĉarma patra eraro: la patro konservas ĉiam specon de despota rilato al la filo, kies virtojn li ne rekonas, kaj pri kies mankoj li ĝojas: tial jam la antikvuloj kutimis diri, ke la filoj de l' herooj iĝas sentaŭguloj, kaj mi sufiĉe larĝe ĉirkaŭrigardis en la mondo por tion klare rekonu.

*

Verdire la homo estas destinita efiki per ĉeesto. La skribo estas misuzo de la lingvo, silente por si mem legi estas trista surrogato de l' parolo. La homo al la homoj efikas ĉiom, kiom li povas, per sia personeco, la juneco plej forte al la juneco, kaj ĉi tie burĝonas la plej puraj efikoj. Kaj jen kiuj la mondon vivigas kaj nek morale, nek korpe lasas elmorti.

*

Oni povas kaj devas nek demeti, nek malkonfesi siajn ecojn. Sed oni povas ilin formi kaj doni al ili direkton.

*

Se iu volas skribi klaran stilon, antaŭe estu al li klare en la animo: kaj se iu volas skribi grandiozan stilon, li havu grandiozan karakteron.

Neniel oni fuĝas de la mondo pli certe ol per la arto, nek kroĉiĝas al ĝi pli certe ol per la arto.

*

Kiu la muzikon ne ŝatas, tiu ne meritas, ke oni nomu lin homo: kiu nur ŝatas ĝin, tiu estas nur duone homo, sed kiu praktikas ĝin, tiu estas tuta homo.

*

Ofte la artistoj ŝajnas al mi kiel patroj kaj patrinoj, kiuj generas vere ĉarmajn infanojn, sen ke ili sciis, kiel tio okazas?

*

La milito vere estas malsano, kie la sukaj destinitaj por servi la sanon kaj vivtenon, estas uzataj por nutri ion fremdan kaj kontraŭnaturan.

*

La franco de l' kapo ĝis la piedo estas same homo kiel la germano.

*

Se kuraĝa homo per propra vivdangero iun savas, ĉu tio ne estas morala ago?

Laŭ mia opinio: ne! Sed se timema homo superregas sian timon kaj faras la samon: tio estas morala ago.

*

La homoj devus miri nur pri tio, ke homo havas ankoraŭ virtojn. La pekoj estas memkompreneblaj.

La sinjoro sekretario tre embarasiĝis pro tiu ĉi simpla demando.

— Mi petas — li diris pardonpete, — mia tasko estis nur, ke vin mi invitu en la nomo de Lia Ekscelenca Moŝto. Lia Ekscelenca Moŝto ne donis al mi permeson, ke mi komuniku al vi la cirkonstancojn de la invito.

— Sed sinjoro Kroeuter, — mi diris — ne estu tiom ceremonia kaj ne parolu tiom diplomate. Mi permesis al mi fari al vi simplan demandon, kiun vi povas simple respondi. Vere, nenia ŝtatsekreto estis en tio, kial invitis min Lia Ekscelenca Moŝto. Nu, ĉu ne? Eĉ, mi opinias, miaparte tiu ĉi demando estas plene rajta. Ĉar ja, se min, kiel tute fremdan homon, iu distingas per invito, mi nepre havas rajton interesiĝi: dank' al kio min trafis tiu ĉi distingo? Bonvolu do min informi pri la anticipaĵoj de tiu ĉi neatendita invito, tiom pli, ĉar alimaniere mi ne havos eblon akcepti la honorantan inviton.

La sinjoro sekretario fariĝis ankoraŭ pli embarasa.

— Mi petas, — li komencis — sinjora moŝto, ŝajnas, ne konas la ĉi tieajn cirkonstancojn kaj la mond-faman signifon de Lia Ekscelenca Moŝto. Nome ĉi tie ĉiujare travojaĝas centope la plej eminentaj fremduloj, la plej grandaj geniuloj kaj famuloj de la kulturmondo kaj ankoraŭ al neniuj venis en la kapon rifuzi la inviton de Lia Ekscelenca Moŝto. Ili ja venis ĉi tien por lin vidi kaj ili rigardis plej granda distingo havi la honoron, ke Lia Ekscelenca Moŝto akceptis ilin. Kaj ĝuste vi...

— Nu jen, sinjoro sekretario, — mi diris — ĉu ne, mi pravus, kiam mi interesiĝis pri la anticipaĵoj de l' invito? Ĉar tiu ĉi »ĝuste vi«, jen kio perfidis ĉion. Ĉi tio malkaŝis, ke ankaŭ vi ne trovas komprenebla kaj natura la inviton de tute fremda homo. Nu, ĉu ne? Bonvolu do mallonge klarigi, kial venis ĉi tio al Lia Ekscelenca Moŝto en la kapon?

Kaj mi aldonis akcente:

— Tiom pli, ĉar alimaniere ĝuste mi estos, kiu rifuzos la inviton de Lia Ekscelenca Moŝto.

— Mi petas, — ekparolis la sinjoro sekretario post longa hezitado — se sinjora moŝto certigas min, ke tiu ĉi interparolo restos tute inter n' kaj vi ne aludos pri ĝi antaŭ Lia Ekscelenca Moŝto eĉ per unu vorto, mi diros al vi.

— Mi certigas vin pri mia plej plena diskreto, — mi deklaris solene.

Tiel estis, mi petas, — li komencis fine — ke la atveno de sinjora moŝto vekis grandan sensacion. Vi bonvolas scii, malgranda urbo estas tiu ĉi Weimar. Kaj cetere, la fantazia vesta maniero de la sinjora moŝto, mi opinias, faras komprenebla tiun ĉi sensacion.

Senvole mi trarigardis min. Blua vesto estis sur mi, nigraj laĉaj ŝuoj, nigra kravato, nigraj ŝtrumpoj, pura kolumo: vere, pli diskrete mi ne estus povinta min vesti. Kaj ĝuste tiu ĉi operetfiguro, sin vestinta en papagaj koloroj, trovas min sensacia?...

— Kaj krome, — daŭrigis la sinjoro sekretario — vi neglektis ĉiujn ĉi tie. Mi petas, tio ne estas kutima ĉe ni. Ĉi tie estas kutime, se fremdulo alvenas, kiu sin opinias io, ke tiu metas sian vizitkarton ĉe la arhiduko kaj ĉe Lia Ekscelenca Moŝto. Poste, se oni invitas lin, li ĝojas, kaj se oni ne invitas lin, nu... Li povas trankvile promeni en la urbo, li povas iri en la teatron, li povas fari, kion li volas, ĉar lia afero estas en ordo kaj neniuj miras pri lia restado. Ĉe ni, mi petas, tio ĉi estas kutimo...

— Estas en ordo, — mi diris — mi komprenas... Kaj nun mi jam trovas tiom pli nekomprenebla la inviton de Lia Ekscelenca Moŝto. Ĉar, ĉu ne, pri tiu, kiu sin ne submetas al la kutimoj kaj etiketo, oni ne

Proverbe kaj sentence

— Goethe —

La »Nia Patro« — bela preĝo pia,
Ĝi helpas en mizer' kaj misdestin'.
Tamen, se iu preĝus »Patro Nia«,
Je l' nom de Dio, lasu preĝi lin.

*

Ja pli facile estas kronon plekti,
Ol kapon indan por la kron' elekti.

*

Ne estus pli da korĉagren',
Ol esti sola en Eden'.

*

Mil muŝojn mi vespere murdis pene,
Kaj tamen unu vekis min matene.

*

La homo ege pigra, sibarita,
Se flugas al bus' kolomb' bakita,
Fiere kaj indigne ekprotestus,
Se ĝi ne lerte distranĉita estus.

*

Vestu bele stangon ajnan,
Havos vi fraŭlinjon ŝajnan.

*

»Vi ne efikas, ĉio stagne staras.«
Trankvilo per rekonos:
En marĉo ne faras
Ringojn la ŝtono.

*

Mi la amason ne malŝatas,
Ĝi al mi plaĉas, se ĝi batas.
Ĝi estas tiam respektinda, vere.
Sed juĝi ĝi sukcesas tre mizere.

*

Pro kio al ni Dio tiom karas?
Ĉar li neniam nian vojon baras.

*

»Ekkonu vin!« Sed — kion mi ricevos?
Se mi ekkonos min, mi fuĝi devos.

Jes, kvazaŭ mi al maskobalo venus,
Kaj mian maskon oni tuj deprenus.

Ekkoni la aliajn — tion provu,
Por ke vi ilin flati, aŭ piki povu.

*

Tuj decidu li pri l' ago,
Jen la brava hom' sen dub',
Li sin ĵetas al la lago,
Por rifuĝi de la pluv'.

*

La stultulaĉon
La sortfavor' ne savas.
Se pluvas kaĉon,
Kuleron li ne havas.

*

Naskiĝus certe edukitaj idoj,
Se la gepatroj estus edukitoj.

Tradukis: K. Kalocsay

Proverbe kaj sentence

— Goethe —

*

Kial vi vin de ni forbaras,
Ignoras nian opinionon?
Ne por vin plaĉi mi verkojn faras,
Sed ke vi lernu ion.

*

La amikoj.
Ho, ne lamentu pro la plagoj,
Ja post la plej malbonaj tagoj
La vivon oni ree gaje ĝuas.

Hiobo.

Parolo via ŝajnas moko.
Se jam fritita la ezoko,
Kiom ĝin helpas, ke l' rivero fluas?

*

Min ne malplaĉas la amaso.
Sed se ĝin kaptas embaraso,
Ĝi vokas tuj, por bridi la Satanon,
Friponon kaj tiranon.

*

Se pekis vi, ne senu tro malĝojon.
Eraro montras al la am' la vojon.
Se vi en via propra peko dronas,
Volonte la aliajn vi pardonas.

*

»Vi pensas pri l' senmorta viv'.
Sed ĉu vi povus ĝin motivi?«
Jes, certe. Jen la ĉefmotiv':
Sen ĝi la hom' ne povus vivi.

*

Akceptu tiel mian vivinion,
Kiel mi gvidas, zigzagmaniere.
Aliaj ja eldormas la ebrion,
La mia — staras surpapere.

*

»Diru, ĉu vi eĉ ne respondas
Al tiuj, kiuj vin atakis?«
Diru ĉu do vi volus paŝi
Sur lokon kien oni...

*

Ni.

Freneza bub', konfesu nun sen kaŝ',
Vin oni trafis ĉe l' erara paŝ'.

Li.

Jes, sed mi ĝin riparis, sciuj!

Ni.

Kaj kiel?

Li.

Laŭ manier' de ĉiu.

Ni.

Sed kiel do vi tion faris?

Li.

Per nova peko mi eraris.
Pro ĝi la homoj tiel ĝojfrenezis,
Ke la malnovan ili tuj forgesis.

Tradukis: K. Kalocsay

kutimas zorgi. Kaj precipe estas nenia kaŭzo lin inviti.
Sed tiel tamen pro kio faris tion Lia Ekscelenca Moŝto?

— Tion ankaŭ mi ne komprenas, — respondis simple la sinjoro sekretario. — Lia Ekscelenca Moŝto havas kapricojn. Eble tial...

— Sed entute kiel eksciis Lia Ekscelenca Moŝto, ke mi estas tie ĉi en Weimar kaj ke mi entute estas sur la tero, se licas demandi?

— Mi petas, li eksciis. Guste ĉar vi iris-venis ĉi tie en tia stranga, nekutima vesto... Mi petas pardonon, sed mi devas diri, ke tie ĉi vin ĉiu opiniis frenezulo. Ankaŭ mia modesta persono. Kaj kiam ĝuste sub niaj fenestroj vi promenis, mi montris vin al Lia Ekscelenca Moŝto, kiel kuriozaĵon. Kaj Lia Ekscelenca Moŝto atente rigardis vin kaj diris ion tute nekompreneblan. Nome li diris, ke tiu ĉi fremdulo — tio estas vi — estas por li revelacio el alia mondo. Jes, Lia Ekscelenca Moŝto diris, ke el iu nekonata kontinento, aŭ eble fremda stelo vi falis ĉi tien en Weimaron kaj li nepre volas paroli kun vi.

— Do, ĉi tio estas sufiĉe nekomprenebla, — mi diris. — Sed nun mi jam komprenas, kial invitis min Lia Ekscelenca Moŝto? Mi volis ekscii nur ĉi tion. Mi tre dankas vin, sinjoro Kroeuter. Nepre mi havos la honoron hodiaŭ vespere ĉe Lia Ekscelenca Moŝto.

Mi tagmanĝis, poste mi longe dormis. Kiam mi vekigis, jam vesperigis. Mi rapide min levis, lavis, kombis; brosis mian veston kaj ekiris. La pordisto klarigis, kiel mi povas trovi la domon de Lia Ekscelenca Moŝto.

Kaj baldaŭ mi estis tie.

En la pordego staradis maljuna servisto, kiu kondukis min supren, en la ŝtuparejo, kiun ornamis gipsaj kopiaĵoj de antikvaj statuoj.

La servisto malfermis pordon kaj mi venis en grandan salonon, en kiu estis neniu. Sed jam, post mi, ekstere, en la ŝtuparejo, aŭdiĝis vigla babilo kaj paŝoj, signante, ke alvenis pli granda societo. Mi hezite staris en la salono, kiam enpaŝis viro ĉirkaŭe kvardekjara, sin prezentis, ke li estas Goethe kaj petis min, ke mi sidigu. La pordo malfermiĝis kaj viroj, virinoj envenis, kun bona humoro kaj vigle, ridante. Kiam ili ekvidis min, ili subite eksilentis, kaj signifplene rigardis unu la alian. La juna Goethe min prezentis al ĉiu, dirante konsciencie la rangon antaŭ ĉiu nomo, ĉiu estis konsilanto, tion mi memoras. Aŭ interna sekreta, aŭ aŭlika, reĝa aŭ regna konsilanto, sed ĉiu estis konsilanto. Riemer, Zelter, Vogel, Schmidt, Rehbein: tiaspecajn nomojn ili havis.

Teon ili servis poste. Sinjorino, kun agrabla eksterajo, ĉirkaŭe tridek-tridekkvinjara, estis la dommastrino, ŝi ne estis seninteresa virino, kvankam jam iom velkinta. Ĉiam pli kaj pli novaj gastoj alvenis, la interaj pordoj de l' salonoj malfermiĝis kaj la salonoj iom post iom pleniĝis.

Mi sidis silente en angulo kaj gapadis. Nun mi jam ne sentis min fremda kaj ne estis nekutima eĉ la stranga vesta maniero de la homoj, kio sur la strato estis tiom surpriza al mi. Ĉar tiel, kiam mi trarigardis la salonojn, mi havis la certan senton, ke mi ĉeestas maskan festvesperon. Kaj tiajn mi jam vidis multe en mia vivo.

Cetere ja ĉeestis tie bonedukita societo kaj ŝajnis, ke tiu ĉi domo estas establita por similaj festvesperoj. Atentemaj lakeoj, bona priservo, ĉio abunde. Komfortaj foteloj kaj seĝogrupoj en la anguloj de l' salono, tiel aranĝitaj, ke oni povis aparteni al la societo tie sidanta, aŭ povis sidi ankaŭ tute aparte. Oni povis babiladi,

sed kiu volis, tiu povis ankaŭ silenti. La plej multaj ŝajnis koni unu la alian kaj ĉirkaŭ mi estiĝis vigla konversacio.

Subite, tute sen transiro, silentiĝis la gaja murmuro. Mi surprizite suprenrigardis kaj tiam mi ekvidis sur la sojlo altan, maljunan sinjoron, sur kiu oni povis vidi, ke li estas neĉiutaga homo. Li estis en nigra frako, tute sen ordenoj, nur sur lia maldekstra flanko brilis granda arĝenta stelo apartenanta al ia grandkrucio. Lia krispa, griza, jam ne tro densa hararo, alsupre kombite, ŝajnis ankoraŭ pli blanka sur lia okulfrape bruna haŭto. Sur lia vizaĝo nuraj profundaj, interesaj sulkoj, kiuj distiriĝis en modesta rideto. Tiu ĉi modesto iom ŝajnis esti en groteska kontrasto kontraŭ la italeca, kvazaŭ sovaĝa ekfulmo de liaj nigraj okuloj.

Li venis antaŭen, malrapide, irante al ĉiu, manpremanante, ŝanĝante kelkajn vortojn kun ĉiu. Kiam li atingis min, mi stariĝis kaj restis estimplene staranta. Lia filo paŝis al ni kaj prezentis min al sia patro. Ni manpremis. Li interesiĝis, kiel mi fartas en Weimar kaj tuj li aldonis, ke li esperas, ke mi pasigos ĉi tie agrablajn tagojn. Kaj li jam iris plu. Mi residiĝis sur mian lokon kaj pace manĝis el la granda telero da anserhepatpateo. Nome ĝin mi tre ŝatas kaj ĝin de longe ne manĝis. Kaj cetere ĝi estis bonega, farita kun fungo. Atenta lakeo verŝis por mi ankaŭ vinon, ĝi estis tre bona Niersteina kaj eminente harmoniis kun la anserhepatato.

Dume Goethe trapasis la salonojn kaj jam venis returne. Kaj li malaperis denove sur tiu pordo, kie li estis enpaŝinta.

La lakeo portis al mi boneksteran kremorton. Mi ĝuste preparis min por ĝia inda akcepto, kiam alpaŝis mia tagmeza vizitanto, sinjoro sekretario Kroeuter kaj diris mallaŭte, ke Lia Ekscelenco tre petas min, ke mi faru la komplezon, iri al li por kelkaj minutoj.

Kaj jam iris antaŭ mi la sinjoro sekretario, montrante la vojon. Kaj mi paŝadis post li. Mi estis iom eks-citita, ĉar mi memoris, ke mi tute ne legis ĉion de Goethe, kaj, kion mi legis, eĉ tion mi jam de longe forgesis. Kaj ĝenerale la verkistojn ja malagrabla tuŝas, se iu ne konas iliajn verkojn. Nu egale. Nun mi ja ne povas ilin subite tralegi! kaj cetere, tion mi ne devas malkaŝi.

Ni paŝis en ĉambreton, kiu ŝajnis malhela post la brila lumino de la salonoj. Nur du kandeloj lumis. Cio estis ruĝa en tiu ĉambro, ruĝa kiel husara pantalone: la tapiŝo, la kusenaj seĝoj kaj la komforta kanapo. La muron ornamis kadritaj desegnaĵoj kaj en la angulo staris eta fortepiano.

Dume la sekretario paŝis en la apudan ĉambron. Kaj post momento staris antaŭ mi Goethe. Li proponis lokon al mi sur la kanapo kaj sidiĝis kontraŭ mi sur apogseĝo.

Kelkajn momentojn estis tia silento, ke eĉ la kraketo de la brulantaj vakskandeloj fariĝis aŭdebla. Goethe rigardis min kun streĉitaj okuloj. Poste li plurfoje karesis sian fruntan per tremanta mano, kostis videblan forto-streĉon al li repreni firman teniĝon. Fine li ekparolis kun altrudita rideto:

— Mi petas vin, pardonu al mi, maljunulo... Sed min kaptis malgranda svena atako, kio ne estas miriga en mia aĝo. Kaj krome, mi devas konfesi, mi sentas min tute strange en via ĉeesto. Nome mi havas la kons-ternan senton, ke vi ne estas tia vivanta homo, kiaj estas ĉi tie, ĉirkaŭ mi...

— Ho; mi petas, — mi diris — tiurilate mi povas tute trankviligi Vian Ekscelencon. Bonvolu preni mian manon, mian pulson.

Proverbe kaj sentence

— Goethe —

Bone, se en silent' vi pure nestas,
Sen zorgo pri l' tempestaj krioj.
Ju pli vi sentas, ke vi homo estas,
Des pli similas vi al dioj.

*

Adoru fajron dum cent jaroj — poste
Enfalu: ĝi vin manĝos haŭte-oste.

*

La pura rimo — jen plezur',
Sed pli valoras pura penso,
Plej nobla don' de l' homa menso,
Ol ĉiu rima pur'.

*

»De l' majstroj ĉiam mi min forfermis.
Imiti estus al mi honto.
Jes, ĉion de mi mem mi lernis!
Nu, ĝi aspektas laŭ la fonto.

*

De l' patro estas la statur',
Serioza vivsistemo,
De l' panjo: gajo de l' natur',
Kaj ĝoja fabelemo.
Flamis la av' por dama bel':
Tio min ofte pikas.

Avinon ravis or', juvel':
Tra l' membroj ĝi ja tikas.
Se l' elementoj do sen dub'
En miks' ne divideblas,
L' original' de l' tuta bub'
En kio do videblas?

*

Sciencon, arton posedante
Oni havas religion.
Sed tiujn du ne posedante
Oni havu religion.

*

La ĉarmaj junaj kapoj estas
Ja ĉiuj el la sama ras'.
Min kiel sian majstron festas,
Sed iras laŭ la propra naz'.

*

Se l' virinoj amas kaj malamas,
Tio pompas, prave ni aklamas.
Sed je ili juĝas kaj rezonas,
Tio ofte tre mirige sonas.

*

Havaĵ' perdita — iom perdita.
Vi devas ekpensi,
Per nova kompensi.

Honor' perdita — multo perdita,
Per glor' tuj kompensi,

Kaj devos la homoj alie pri vi pensi.

Kuraĝ' perdita — ĉio perdita.
Prefere esti nenaskita.

Tradukis: K. Kalocsay



Frankfurt a. M.

La laborejo de la juna Goethe en la gepatra domo (Werther, Goetz, Clavigo).

Kaj mi etendis al li mian brakon.

— Mi dankas, — li diris. Kaj li jetis teruritan rigardon sur mian etenditan brakon. — Mi kredas vin. Mi ja ne diris en tiu senco. Mi kredas ĉion. Sed mi ne povas min helpi kontraŭ la sento, ke vi ne estas tia vivanta homo, kiaj ni, kiuj ĉestas. Vi estas iu, kiu aŭ estas, aŭ estos. Mi ne scias certe.

— Car Via Ekscelenco tuŝis tiun ĉi demandon, — mi ekparolis — espereble vi ne rigardos min altrudulo, se ĉirilate mi klopodos servi al vi per iom da klarigo. Kaj tiel licu diri, ke via bonega juĝkapablo ĝuste orientis Vian Ekscelencon ankaŭ nun. Nome mi vere sufiĉe diferencas de la ceteraj ĉestantaj gastoj, kiuj venis el Berlin, Dresden, Paris kaj London. Car mi venis ĉi tien el mil naŭcent dudek du.

— Mil naŭcent dudek du. . . — murmuris Goethe. — Preskaŭ post cent jaroj. . .

Li rigardegis min kvazaŭ fantomon.

— Kaj kiel vi venis ĉi tien? Kial vi venis? — li demandis raŭke.

— Tion mi mem ne scias, — mi diris trankvile. — Sed se vi bonvolos permesi, mi kuraĝos fari estimplanan rimarkon. Nome mi vidas, ke Vian Ekscelencon kaptas teruro je mia vido, kio ja estas tre komprenebla, ĉar devas esti eksterordinare konsternite, sidi kontraŭ homo vivonta post cent jaroj. Sed permesu al mi esprimi mian modestan opinionon, ke de mia parto la sama teruro estus same motivita, ĉar por mi ja povus esti same konsternite, sidi kune kun antaŭ-cent-jara homo. Kaj via situacio en tiu ĉi punkto estas eĉ multe pli favora, ĉar ja Via Ekscelenco estas hejme, en la propra domo, viaj sekretario, gefiloj, genepoj, ĉiuj estas ĉi tie en via proksimo kaj escepte min, vi estas inter viaj samepokanoj. Dum mi kontraŭe estas tute sola ĉi tie el mia speco kaj mi ne tre scias, kiamaniere mi sukcesos iel reiri hejmen.

— Vi pravas, — li diris, ankoraŭ ĉiam tremante. — Mi ja ne komprenas, kiel vi povas resti tiom trankvila?

— La klarigo estas tre simpla, — mi respondis. — Ĉar ja mi nun certe scias, ke mi estas eĉ Via Ekscelenco, kiu estas unu el la plej grandaj geniuloj de l' mondo kaj sekve tiu sincera respekto, kiun mi sentas al Via Ekscelenco kaj tiu plezuro kaj honoro, ke mi ekhavis donace la personan interkonatigon kun Via Ekscelenco, tute ekvilibras kaj paralizas tiun hororon de l' nekutimeco, kiun povas en mi fari la elfalo el la Ordo de l' Tempoj. Kaj antaŭ ĉio mi havas la honoron direkti la atenton de Via Ekscelenco al tiu cirkonstanco, ke tia

interjarcanta renkonto, kia nun estas la nia, estas kiel eble plej rara fenomeno, sekve, mi opinias, estus pli ĝuste, se ĉi tion ni uzus por la bono de ni ambaŭ, ĉar mi ne scias, ĝis kiam povas daŭri tiu ĉi nia babilo. Kaj mi ja kredas, ke Vian Ekscelencon povus nepre interesi, kio okazis dum la centjaro sekvanta la agadon de Via Ekscelenco, tiom pli, ĉar ja Via Ekscelenco havis epokofaran influon al la spirita vivo de tiu ĉi sekvanta — tio estas por mi jam pasinta — centjaro. Kaj mi havas la honoron rimarki ankaŭ tion, ke min tre interesas la persono de Via Ekscelenco. Ni do ne malŝparu la tempon per la sekco de tiu demando, kiel estis eble al mi resalti cent jarojn, ĉar ja tiu ĉi demando nun tute ne estas grava, cetere ĝi eĉ ne estus solvebla por ni. Sed ni eluzu tiujn kelkajn minutojn, dum kiuj ankoraŭ estas tenebla tiu ĉi eksterordinara siato.

— Vi pravas, — li murmuris. Kaj poste li reveme ekridetis: — Sed nun jam miaj nervoj ne estas taŭgaj por tiaj animskuoj. Cetere. . .

Li rektigis. Kaj sur lian vizaĝon revenis tiu majesta trankvilo, kiun antaŭe mi vidis sur li, ekstere, kiam li trairis la salonojn. Kaj li ekparolis:

— Ja propre tio, kio nun okazas al mi, neniom estas pli stranga, ol kio ĝis nun okazis kaj de nun povos okazi. Ni ĉiam vivas ja inter sekretoj kaj misteroj, ni ne scias, kio okazas ĉirkaŭ ni kaj en ni, kiaj estaĵoj kaj potencoj direktas nian vivon. Propre eĉ la plej etaj okazaĵoj de la ĉiutaga vivo ne estas pli kompreneblaj, ol tiu ĉi neklarigebla vizito. Sed ilin ni jam ekkutimis vidi kompreneblaj.

— Kaj tio, ke mi estas tie ĉi, estas same tiel komprenebla, — mi prenis kuraĝon aldoni. — Sekve, mi opinias, Via Ekscelenco nun jam havas nenian kaŭzon esti ekscitita pro mi.

Goethe aprobe kapbalancis. Li enpenis, poste subite vigle demandis:

— Vi do konas min? Do ankaŭ en via epoko, post cent jaroj, vivas mia memoro?

— Jes. Via Ekscelenco estas ankoraŭ ĉiam unu el la plej grandaj homoj de la mondo, en la okuloj de la vere kulturaj homoj.

— Kaj kiu estas la alia? — Demandis Goethe kun streĉita interesiĝo.

— Shakespeare.

Goethe modeste ekridetis:

— Mi opinias, estas troigo, min starigi apud Shakespeare.

Kaj poste enpenisinte li aldonis:



Frankfurt a. M.

La granda akceptejo en la Goethe-domo.

— Cetere... Eble mi estus povinta fariĝi io simila al li. En miaj pli junaj jaroj estis en mi ia demona forto, kiu vere estis kapabla krei. Sed tiujn jarojn, la vere produktajn jarojn, bedaŭrinde mi malŝparis per tio, ke mi penadis pri la bagatela administro de eta princlando. Granda kulpo estis, mi sentas kaj konfesas.

— Se licas diri mian modestan opinion, ankaŭ mi kredas, ke Via Ekscelenco faris neripareblan kulpon kontraŭ vi mem kaj kontraŭ via krea forto per tio, ke por ioma burĝa riĉo, vanto kaj senvalora kariero vi malŝparis vian plej belan aĝon.

Li surprizite rigardis min. Poste li diris malvarme, fiere:

— Tre severa kritiko. Vi, sinjoro, estas ankoraŭ junulo, vi ne scias ankoraŭ, ke en la vivo oni ne faras tion, kion oni scias kaj al kio oni havas emon, sed tion, kion oni devas.

— Jes, — mi respondis modeste — ĉi tion mi ankoraŭ ne scias...

Kaj nun la interparolo ĉesis por kelkaj momentoj. Goethe ŝajnis ofendita. Tiu mia netolerebla naturo, kiu ne emas preteri eĉ la plej etan kulpon de alia homo, subite superregis en mi. Kaj mi diris kun akra voĉo:

— Mi kuraĝis esprimi sincere mian modestan opinion. Kaj Via Ekscelenco ofendiĝis. Mi opinias, ke tiaspeca malforto estas neinda al efektive eminenta homo.

Lia vizaĝo ruĝiĝis, liaj kuntiritaj nigraj okuloj kolere palpebrumis:

— Notu por vi, juna homo, ke al tia tono mi ne estas kutimiĝinta! Cetere, se vi repensas, vi mem rekonos, ke tio, kion vi faris, estas la plej granda malĝentilo. Mi ja, eĉ pro mia aĝo, meritas ke...

— Mi petas, — mi prenis kuraĝon rimarki kun same akra voĉo — se Via Ekscelenco paŝas sur tiun ĉi vojon, mi vere ne povas sekvi tien Vian Ekscelencon. Ĉar se Via Ekscelenco rifuĝas malantaŭ vian aĝon, rangon kaj prestiĝon, mi estas devigata foriri, ĉar, laŭ mia opinio, el tia senegala interparolo mi povas havi nek instruon, nek plezuron.

Kaj mi stariĝis.

— Restu, mi petas, — li diris kun pli cedema voĉo. — Sed mi devas rimarki, ke vi...

— Mi petas, — mi interrompis senpacience — eble ni ne pasigu tiujn ĉi karajn momentojn per mia modesta persono? ... Min interesas nun Via Ekscelenco.

Goethe rigardmezuris min kaj poste diris malafable: — Do demandu!

— Antaŭ ĉio mi volus formi por mi klaran bildon pri la vera grandeco de Via Ekscelenco. Ĉar Via Ekscelenco en nia epoko estas starigita sur piedestalon kaj sekve estas malfacile alirebla. En la lernolibroj Via Ekscelenco estas prezentita, kiel geniulo nepre feliĉa, plejeble subtenita de ĉiuj eksteraj cirkonstancoj, kiel genio, perfekte ekvilibrata, havanta ian statuan sensentecon, en kiu oni povas riproĉi maksimume, ke li eble estis tro fiera, ne sufiĉe homa. Ĉirilate oni ĉiam kontraŭmetas Vian Ekscelencon al Schiller kaj la simpatio de la lernejmajstroj estas okulfrape ĉiam ĉe la flanko de Schiller.

— Kion nun vi diris, — komencis trankvile Goethe — post tio kaŝiĝas multe pli, ol kiom vi pensus. Do la malnova malamo, kiu min persekutas de jardekoj, estos vivanta eĉ post cent jaroj! Dum mia tuta vivo mi estis splito en la okuloj de l' sentalentaj homoj. Komence oni min proklamis senmorala, poste tra jaroj oni klopodis min ĉiamaniere senkuraĝigi, oni mistaksis miajn verkojn, prisilentis, ignoris min. Por miaj plej bonaj verkoj mi ne trovis eldoniston. Nun, ke fine oni ne povas min ataki kaj deklari sentalentulo, ĉar tion oni rekonis, ke mi

Kantoj de Gretĉen El la Faust de Goethe

I.

Vi dolorriĉa,
Al malfeliĉa
Vizaĝon klinu kun favor'.
Glav' en la kor'.
Kun mil dolor'
Kun ĉagren' mil
Rigardas morton vi de Fil'...

Al Patr' vi plendas
Vi ĝemojn sendas
Supren kun dolor-trem'
Pri Li vi petas, pri vi mem...

Kiu do sentas,
Kiu atentas
Doloron de kor' senkonsola...
Kiel mi tremas,
Sopiras, ĝemas,
Ĝin scias nur vi — nur vi sola!

Reen mi iras
Dolor' disŝiras
La koron — vee, ho vee!...
Ĉie sur voĵ'
Solec' malĝoj'...
Mi ploras, ploras ree...

II.

Sur miaj fenestroj matene
Florpotojn rosigis mi plene
Per larmoj, antaŭ ol mi
Ĉi florojn ŝiris por vi...

Unuaj briloj de la sun'
Eniris mian ĉambron nun
Kaj mi jam sidis sur la lito
En la ĉagreno kaj medito.

Vi vidas, mankas al mi fort'...
Ho, savu min de mort'
Savu de malhonor'...
Vi dolorriĉa
Al malfeliĉa
Rigardon sendu kun favor'...

Tradukis: **Leo Belmont**

scias verki, do, oni malkovras en mi karakterajn difektojn. Ke mi estas fierega, egoista, envia, ĵaluza pri la junaj talentuloj, senreligia kaj malbona patrioto. Cetere ĉi tio estas la plej nova akuzo kontraŭ mi. Ĉar dum la Napoleonaj militoj mi ne skribis kontraŭ la francoj. Sed kiel mi estus povinta verki kun malamo, se mi ne malamis la francojn? Kvankam mi tre ĝojis, kiam fine ili forportis sin de nia kolo. Sed kiel malamam mi — ja por mi la civilizacio estas la plej granda valoro — la plej kulturitan nacion de la mondo?

— Do Via Ekscelenco mem konfesas, ke eĉ en la plej malfacilaj tempoj vi havis simpatian al la malamikoj de via patrujo? — mi demandis. — Respektive tiuj atakoj, kiuj atingis ĉirilate Vian Ekscelencon, ne estas

El la „Interparoloj kun Goethe“

— De Johann Peter Eckermann (1792—1854)

Iutage en la komenco de Junio 1823 enmigris tra la pordo de l' urbo Weimar (vajmar) viro laŭaspekte iom pli ol tridekjara, kun longaj haroj transpendantaj la kolumon, kun inteligenta vizaĝo kaj helaj okuloj. Al la skribisto ĉe la pordo li donis sian nomon: Johann Peter Eckermann (ĉerman) el Winsen. Tornistro premis liajn ŝultrojn, kaj bastono helpis la lacajn piedojn, kiuj estis portintaj la migranton dum du sunvarmegaj semajnoj ĉi tien el lia norda hejmgregiono proksime de Hamburg. Car veturilon li ne povis pagi, la malriĉa filo de malriĉa migranta portvendisto. El la mizera kabano de l' gepatroj li nur iam kaj iam eniris lernejon, kaj en sia 14-a jaro li nur malsufiĉe scipovis legi kaj skribi. Sed la natura inteligenteco de l' knabo havigis al li favorantojn, kiuj ebligis al li pli bonan klerigon per privata instruo; kelkajn monatojn li vizitis ankaŭ pli poste gimnazion, preskaŭ du jarojn helpe de stipendio eĉ la universitaton. Flanke de tiuj neregulaj studoj li diligentege instruis sin mem per legado kaj interparoladoj. Li eĉ riskis baldaŭ debuti en la poezia arto per volumeto da lirikaĵoj kaj per artscienca traktajo. Ambaŭ li sendis al Goethe petante kelkajn rekomendajn vortojn de la fama poeto, por ke li trouvu pli facile eldoniston. Goethe respondis per malmultaj

nemotivitaj.

Goethe nun malŝate rigardmezuris min. Kaj poste malvarme diris:

— Mi ne scias, kiu vi estas kaj ĉu vi havas imagon pri tio, kio estas: poeto? ... Nu, mi do estas tio! Kaj nur tio! Jes, la poeto devas ami sian patrujon. Sed lia patrujo ne estas ia politika formaĵo, partio, kliko, raso, sekto aŭ provinco. Lian patrujon formas lia poezia forto kaj ĉio bela, nobla kaj bona apartenas al ĝi, kie ajn ĝi estu kaj devenu de kiu ajn kreaĵo de Dio... Kaj mi povas al vi diri, ke tre multan amaron oni faris al mi per tiuj ĉi stultaj akuzoj! Germana verkisto: germana martiro! Sed cetere, ja ĉie nun estas tiel. En Anglujo same, kiel en Francujo. Kiom da doloro, turmento devis toleri Molière, Rousseau, Voltaire! Kaj Byron-on la samaj hipokrituloj elpelis el Anglujo kaj pelis en la morton! Kvankam la kulturo de Anglujo kaj Francujo staras malproksime super nia malriĉa, malgranda germana kulturo! Kion mi suferis, tion krom mi homo ankoraŭ ne suferis. Kvazaŭ ne estus sufiĉa por mi sola tiu superhoma lukto, kiun mi devis lukti kun mi mem, ĝis fine naskiĝis unu el miaj verkoj!... Multege mi suferis. Dum okdek jaroj mi ne havis entute eble dek kvar tagojn, kiam mi fartis tolereble. Sed egale! Eble eĉ ne mi estas la kulpa pri tio, nek la homoj. Estas fuŝita tiu ĉi tuta Eŭropa mondo kaj tio faras ĉion. Ni vivas mizerajn tempojn. Kaj tra generacioj la vivo fariĝas ĉiam pli malica kaj kruda. La malamo, la malbonintenco nekompreneo kaj tiu Eŭrope disvastiĝinta ĝenerala tendenco, kiu artefarite klopodas densigi la barojn inter homo kaj homo, fine povas fariĝi nur fatala katastrofo, kiu nenigos eĉ nian malfortan kultureton, kaj erikejo kaj sovaĝa dezerto kovros la terojn, kiujn dum trimil jaroj ni konkeris por ni per niaj pli noblaj talentoj. Ha, cetere! Eĉ bedaŭri mi ne povas ĉi tiun civilizon kuregantatan en pereon, tiom malbela, malica, naŭza ĝi estas.

Goethe subite eksilentis. Li trakaresis sian sulkan vizaĝon. Kaj poste li lace rigardis min, kun senanimaj okuloj.

— Ĉu vi deziras ion ankoraŭ demandi?

afablaj linioj, kaj tiuj donis al Eckermann la kuraĝon, viziti kaj vidi la majstron persone. Tio okazis la 10-an de Junio 1823: kaj tiu tago estis por ambaŭ viroj la komenco de reciproke profitiga kunlaborado, kiu finis nur la morto de l' majstro. Goethe donis al la juna amiko direktivojn por liaj studoj kaj superŝutis lia preskaŭ ĉiutage per la trezoroj de sia saĝo. Sed Eckermann repagis: li ordigis liajn manuskriptojn; li helpis ĉe la redaktado de la lastaj grandaj verkoj; per prudentaj demandoj kaj pli-malpli kaŝitaj admono li eĉ instigis la maljunulon al laborado, tiel ke Goethe ekz. la duan parton de »Faŭsto« verŝajne ne estus finverkinta sen la senĉesa delikata antaŭenpuŝo de sia juna asistanto.

La »Interparoladoj kun Goethe«, kies manuskripton la majstro mem grandparte legis kaj aprobis, estas treege meritplena verko de Eckermann. En tiu libro li montras la poeton en lia domo, en societoj, ĉe promenveturoj ktp, kaj li notis abundon da admirindaj paroloj de lia saĝo pri la plej diversaj problemoj el vivo, scienco, arto kaj politiko, kiuj sen tio estus falintaj en la abismon de forgesiteco.

Malgrandaj provoj ĉi-sube veku en la legantoj la

Mi jam nenion havis paroli kun li. Li ja transiris eĉ min laŭ la estonto. Mi sentis, ke tiaj bagatelajoj, kiajn mi povus rakonti al li pri la jardekoj sekvintaj lian morton, povas esti propre tute seninteresaj por li.

— Mi havas nenion por diri, — mi diris. Kvankam tiom mi estus volinta lin demandi, kio estas lia opinio pri la netradukebleco de lia poemo: »Über allen Gipfeln«, kiu en iu literatura revuo estis temo de diskuto post 90 jaroj — tio estas antaŭ 2 jaroj. Sed nun, post ĉi tio, kiel mi povus veni kun tiaspeca demando... Kaj cetere, estas preskaŭ certe — ke li estus havinta la saman opinion, kion mi.

En la apuda salono iu komencis ludi fortepianon. Goethe rektiĝis.

— Ĉu vi aŭdas? — li demandis min. — Ludas Schmidt registara konsilanto. Beethoven... Belega...

Lia vizaĝo ekbrilis. Kun streĉita atento li aŭskultis la muzikon.

— Belega... — li murmuris.

Poste — ĉe la fino de l' muziko li lace kuŝiĝis kaj fermis la okulojn.

— Ĉu Via Ekscelenco malbone fartas? — mi demandis ektiminte.

Nenia respondo.

Kun rapidaj paŝoj mi iris al la pordo de l' salono. Kaj mi malfermis la pordon.

En la salono estis neniu. Mi trakuris la ĉambrojn: nenie iu. Mi revenis en la malgrandan ĉambron al Goethe. Sed la apogseĝo estis malplena. Mi kuŝiĝis sur la ruĝa kanapo kaj atendis.

— Sŝŝ! — mi aŭdis subite. — Silentu, infanoj! Ne eniru al li.

— Sed enestas mia Ĉimpi-libro!

— Vi vekos lin, Elinjo. Vi scias ke tiam paĉjo koleras...

— Sed kial li dormas ĉiam? Ĉu tio estas patro? Mi bezonas mian Ĉimpi-libron!

Mi kubutapogis min sur la ruĝa kanapo kaj elkriis:

— Vi povas enveni, Elinjo, mi jam ne dormas.

El la hungara: Karlo Bodó.

deziron al konatiĝo kun la tuta verko. Ĝi estas tradukita en tre multajn lingvojn.

(Diskreteco).

20-a de Julio 1831. — »Iuvespere mi promenis kun bonkonatulo en la ĝardeno de kastelo, kiam neatendite ni rimarkis ĉe la fino de l' aleo du aliajn personojn el nia rondo, sinjoron kaj sinjorinon, kiuj trankvile babilante iris unu apud la alia. Subite iliaj kapoj kunkliniĝis, kaj ili donis al si reciproke koregan kison. Poste ili daŭrigis iri laŭ sia unua direkto, kaj tre serioze ili pluinterparolis, kvazaŭ nenio okazis. »Ĉu vi vidis tion« kriis mia amiko kun mirego. »Ĉu mi fidu al miaj okuloj?« »Mi vidis«, respondis mi, »sed mi ne kredas ĝin!«

(Pri amo kaj intelekto).

2-a de Januaro 1824. — »La amo tute ne interrilatas al la intelekto. Ĉe juna virino ni amas tute aliajn aferojn ol la intelekton. Ni amas ĉe ŝi la belon, la junon, la piksercemon, ŝiajn kapricojn kaj — Dio scias, kion pli! Sed ŝian intelekton ni ne amas. Ŝian intelekton ni respektas, se ĝi estas brila, kaj per ĝi knabino povas multe gajni antaŭ niaj okuloj. La intelekto eble ankaŭ taŭgas por nin firmteni, kiam ni jam amas. Sed la intelekto ne kapablas ardigi nin kaj vekti pasion.«

(La polico kaj la infanoj).

12-a de Marto 1828. — »Por ekkoni, kiel statas ĉe ni, mi nur rigardas en nia kara Weimar tra la fenestro.

Nun, kiam la kara printempa suno logas la infanojn el la domoj, por ke antaŭ la pordoj ili ludetu kun samaĝuloj, mi vidas ilin ĉiam ĝenitaj, kvazaŭ ili ne estus certaj kaj timus la alvenon de iu polica potenculo. Iu knabo knaligu la vipilon aŭ kantu aŭ krii — tuj policano estas sur la loko, por tion malpermesi al li. Ĉio ĉi havos la efikon, jam frue malsovaĝigi la karan junularon, elpeli ĉiun originalecon kaj ĉiun senbridecon, tiel ke fine postrestos nur — la filistro!«

(Internacia malamo).

14-a de Marto 1830. — »La internacia malamo estas plej forta kaj plej arda sur la plej malsupraj ŝtupoj de la kulturo. Sed ekzistas ŝtupo, kie ĝi tute malaperas, kie oni staras kvazaŭ super la nacioj kaj kie oni sentas feliĉon kaj suferon de sia najbara popolo, kvazaŭ ili estus renkontintaj onin mem.«

(Pri diletanteco).

21-a de Januaro 1827. — »Guste tio estas la karakterizaĵo de la diletantoj, ke ili ne scias pri la malfacilaĵoj, kiuj estas en iu afero, kaj ke ili ĉiam volas entrepreni ion, por kio ili ne havas la fortojn.«

(Konstrui, ne ruinigi).

24-a de Februaro 1825. — »Se ion malbonan mi nomas malbona — kion do utilas tio? Sed se mi eĉ ion bonan nomas malbona, tiam mi multe malutilis. Kiu intencas bone efiki, tiu neniam mallaŭdu; li neniel atentu

Frankfurt
a. M.



La Goethe-
domo

la malĝuston, sed nur faru ĉiam la bonon. Ĉar la ĉefa afero ne estas ruinigi, sed konstrui ion, pri kio la homaro povas senti puran ĝojon».

(*Koncentri, ne distri*).

24-a de Februaro 1824. — »Ĉie en la akademioj oni traktas tromulton, tre multe da nenecesajoj. Krome la diversaj docentoj tro vastigas siajn fakojn, multe pli ol taŭgas por la bezono de iliaj aŭskultantoj. En antaŭa tempo kemio kaj botaniko estis traktataj kiel akcesoraj partoj de la medicino, kaj tio sufiĉis por medicinisto. Sed nun kemio kaj botaniko fariĝis memstaraj, nesuper-rigardeblaj sciencoj, el kiuj ĉiu postulas tutan homvivon, kaj oni volas ilin kunaltrudi al la medicinisto! Tio ne povas bonefiki; unu fako estos neglektata aŭ forgesata pro alia. Kiu estas prudenta, tiu rifuzas ĉiujn malkoncentrajn pretendojn; li limigas sin je unu fako kaj fariĝas kapabla por unu.»

(*Pri la tasko de l' poezio*).

24-a de Septembro 1827. — »Ĉiuj poetoj verkas, kvazaŭ ili estus malsanaj kaj la tuta mondo lazareto. Ĉiuj parolas pri suferado kaj mizero sur la tero kaj pri la ĝojoj en la transa mondo. Malkontentaj ili jam estas kaj unu pelas la alian en ankoraŭ pli grandan malkontentecon. Tio estas vera misuzo de la poezio, kiu estas ja vere donita al ni, por forigi la malgrandajn disecojn en la vivo kaj por fari la homon kontenta pri la mondo kaj pri ilia stato. Sed la nuna generacio timas ĉiun veran fortunon.»

(*Forto de l' agado*).

17-a de Februaro 1832. — »Kia bono do estas en ni, se ne la forto kaj la emo, la medion de la ekstera mondo tiri al ni kaj devigi ĝin al servo por niaj pli altaj celoj. Dum mia longa vivo mi efektivigis kaj faris kelkion, pri kio mi eble povus min glori. Sed se mi volas paroli sincere: kion propran mi havis escepte de la kapablo kaj emo por aŭdi kaj vidi, por distingi kaj elekti kaj por vivi la aŭditaĵon kaj viditaĵon per iom da spirito kaj reprodukti ĝin per iom da lerteco? Mi nepre ne suldas miajn verkojn nur al mia propra saĝo, sed al miloj da objektoj kaj personoj ekstere de mi, kiuj por ili prezentis al mi la materialen. Venis stultuloj kaj saĝuloj, klarpensaj kaj malvastspiritaĵoj, infanoj, junuloj kaj maturaĵoj maljunuloj: ĉiuj diris al mi, kion ili sentis, kion ili pensis, kiel ili vivis kaj agis kaj kiujn spertojn ili kolektis: kaj mi havis nenion por fari krom kapti kaj rikolti tion, kion aliaj semis por mi. Finfine estas tute senenca esploro, ĉu iu havas ion el si mem aŭ de aliaj, ĉu li agas per si mem aŭ per aliaj. La ĉefa afero estas, ke oni havu grandan volon kaj lertecon kaj persistecon, por agi laŭ ĝi; ĉio alia estas malgrava.»

(*Pri eterna vivo*).

4-a de Februaro 1829. — »La kristana religio estas potenco per si mem, per kiu la falinta kaj suferanta homaro ĉiam denove levigis. Koncedante al ĝi tiun ĉi efikon, oni jesas, ke ĝi estas supera al ĉiu filozofio, kaj de tiu ĝi ne bezonas apogon. Same ankaŭ la filozofio ne bezonas la aŭtoritaton de la religio, por pruvi certajn tezojn, ekz. tiun pri ĉiama vivodaŭro. La homo kredis la nemorteblojn; li havas por tio la rajton, ĝi estas laŭ lia naturo kaj li darfis fidi al religiaj promesoj. Sed se la filozofio volas preni la pruvon por la nemorteblo de nia animo el legendo, tiam la pruvo estas malforta kaj ne tre konvinka. La konvinkigo pri nia daŭrado devenas por mi el la nocio de l' agado; ĉar se mi ĝis mia fino senripoze agadas,



Pluraj sonoj al mi malagrablas, sed plej abomene
 Tedas min bojo de hund', ŝiras ĝi en la orel'!
 Estas sola hundet', kies bojon mi aŭdas kun ĝojo,
 Jes, min ĝojigas per boj' hundo de mia najbar'.
 Ĉar ĝi je mia knabin' ekbojis, kiam ŝi kaŝe
 Foje ŝteligis al mi: preskaŭ perfidis ĝi nin.
 Nun, se ekbojas ĉi hund', mi ekpensas ĉiam: ŝi venas.
 Aŭ mi pensadas pri l' temp', kiam ŝi venis al mi.

Goetje (K. Kalocsay): Roma Elegio

tiam la naturo havas la devon, doni al mi alian formon de ekzistado, kiam la nuna ne plu povas elteni mian spiriton».

(*Pri la utilismo*).

20-a de Februaro 1831. — »Estas laŭ la naturo de l' homo, rigardi sin kiel la celon de la kreado, ĉiujn aliajn objektojn nur laŭ la rilato al si kaj laŭ la grado, kiom ili servas kaj utilas al li. Li subigas la mondon de l' vegetaĵoj kaj de l' animaloj, kaj forglutante aliajn kreitaĵojn kiel konvenajn nutraĵojn li ekkonas sian dion kaj gloras ties bonecon, kiu tiom patre zorgis por li. Li forprenas de la bovino la lakton, de la abelo la mielon, de la ŝafo la lanon: kaj atribuant al tiuj aĵoj utilecon por si, li kredas ankaŭ, ke por tio ili estas kreitaj. Li ne povas imagi, ke ĉe la plej malgranda herbo ne estas por li; kaj se ies utilon li nuntempe ankoraŭ ne ekkonis, li tamen kredas, ke ĝi estontempe certe malkovriĝos. Kaj kiel la homo pensas ĉi rilate, tiel li pensas ankaŭ ĝenerale; kaj li ne preterlasas, enporti sian kutiman pensmanieron el la vivo ankaŭ en la sciencoj kaj ankaŭ ĉe la diversaj partoj de organismo demandi pri ties tasko kaj utilo. Tio eble taŭgos kelkan tempon, kaj ankaŭ en la sciencoj li eble povos sukcesi tiel. Sed tre baldaŭ li renkontos fenomenojn, kie tia malvasta rigardo ne sufiĉas kaj kie, sen pli alta starpunkto, li implikiĝos en amaso da kontraŭdiroj. Tiaj utilismanoj diras ekzemple: La bovo havas kornojn, por defendi sin per ili. Sed mi demandas: Kial la ŝafo ne havas kornojn? kaj kiam ĝi havas: Kial ili estas ĉe ĝi volvitaj ĉirkaŭ la orelojn, tiel ke ili neniel povas utili al ĝi? Sed alia afero estas, se mi diras: La bovo sin defendas per siaj kornoj, ĉar ĝi

havas ilin. La demando pri la utilo, la demando: por kio? estas tute ne scienca. Iom pli progresigas nin la demando: Kiel? Ĉar se mi demandas: Kiel la bovo havas kornojn? tiam kondukas min tio al la rigardado de ĝia organismo kaj samtempe min instruas, kial la leono ne havas kaj ne povas havi kornojn. La utilismanoj opinius perdi sian dion, se ili ne plu darfus adori *tiun*, kiu donis al la bovo la kornojn, por ke ĝi defendu sin. Sed al *mi* oni permesu, ke mi adoru *tiun*, kiu en la riĉo de sia kreado estis tiom granda, ke post milspecaj bestoj li faris ankoraŭ unu estajon, kiu entenas ilin ĉiujn: la homon! Oni adoru plue *tiun*, kiu al la brutoj donas ilian manĝaĵon kaj al la homo manĝaĵon kaj trinkaĵon, kiom ajn li volu ĝui. Sed *mi* adoras *tiun*, kiu en la mondon metis tiom da produkta forto, ke — se nur la miliona parto de ĝi fariĝas vivanta — la mondo svarmas de kreitaĵoj, tiel ke milito, pesto, akvo ne kapablas pereigi ĝin. Tiu estas mia dio!»

(Poeto kaj patriotismo).

Komence de Marto 1832. — »Kiam poeto volas politike efiki, li devas fordoni sin al iu partio: kaj se li faras tion, lia poeteco estas perdita. Sian liberan spiriton, sian senpartian superrigardon li devas adiaŭi kaj kontraŭe surmeti la ĉapon de l' malvastspiriteco kaj de blinda malamo. Ĉar li estas homo kaj civitano, la poeto amos sian patrujon. Sed la patrujo de liaj poeziaj fortoj estas la bono, la noblo kaj belo, kiuj ne estas ligitaj al iu lando aŭ provinco. Kaj kion volas diri tio: Ami la patrujon? Kion volas diri: patriote agi? Se poeto dum sia tuta vivo penadis, kontraŭbatali malutilajn antaŭjuĝojn, forigi filistrajn opiniojn, klerigi la spiriton de l' popolo, purigi ties estetikan senton, kaj nobligi ties sent- kaj pensmanieron: kion pli bonan li faru pli? Kiel li agadu pli patriote? — Mi malamas ĉiun fuŝagadon kiel la pekon, sed precipe fuŝadon en ŝtataj aferoj, ĉar el ili sekvas por miloj kaj milionoj nur malfeliĉo. Mi scias, ke en la okuloj de certaj homoj ĉiu mia agado estas rigardata kiel nenio, ĝuste pro tio, ĉar mi rifuzis, enmiksi min en politikajn partiaferojn. Por esti laŭ la gusto de tiuj homoj, mi estus devinta fariĝi ano de jakobena klubo kaj prediki murdadon kaj sangverŝadon!»

(Pri la libereco).

18-a de Januaro 1827. — »La libereco estas stranga afero: ĉiu povas facile havi sufiĉe da ĝi, se li scias esti kontenta, se li scias trovi ĝin. Kaj kion utilas al ni abundo da libereco, kiun ni ne povas uzi! Se iu havas nur tiom da libereco, por sane vivi kaj praktiki sian profesion, tiam li havas sufiĉe da ĝi, kaj tiom povas facile havigi al si ĉiu homo. Krome ni estas liberaj nur sub certaj kondiĉoj, kiujn ni devas plenumi. La liberigo ne konsistas en tio, ke ni ne volas agnoski ion estantan super ni, sed ĝuste en tio, ke ni respektas ion, kio estas pli alta ol ni. Ĉar dum ke ni respektas ĝin, ni levas nin supren al ĝi: kaj per nia honorigo ni elmontras, ke ni mem portas en ni tion pli altan kaj ke ni indas, esti samrangaj kun ĝi.»

(Pri liberaleco).

3-a de Februaro 1830. — »Dumont estas modera liberalulo, kio estas kaj estu ĉiuj prudentaj homoj kaj kio estas ankaŭ mi mem kaj en kiu sencio agi mi penis dum longa vivo. La vera liberalulo klopodas, per la rimedoj estantaj al lia dispono efektivigi tiom da bono, kiom ajn li povas; sed li gardas sin de la intenco, tuj pereigi per fajro kaj glavo la neeviteblajn malperfektajn. Li penas, per saĝa progresado iom post iom forpremi la publikajn malbonstatojn, sen pereigi samtempe

per rimedoj perfortaj ankaŭ egalan multon da bono. En tiu ĉi malperfekta mondo li kontentiĝas tiom longe je la bono, ĝis kiam la tempo kaj la cirkonstancoj favoras, por atingi la plibonon.»

(Pri aristokratio kaj demokratio).

15-a de Julio 1827. — »Oni ĉiam multe parolas pri aristokratio kaj demokratio. La afero estas tute simple jena: En junaĝo, kiam ni posedas nenion aŭ almenaŭ ne scias ŝati trankvilan posedadon, ni estas demokratioj. Sed kiam dum longa vivo ni akiris posedadon, ni ne nur deziras, ke ĝi estu certigita; sed ni deziras ankaŭ, ke niaj infanoj kaj nepoj trankvile ĝuu tion, kion ni akiris. Tial en maljunaĝo ni ĉiam estas senescepte aristokratioj, eĉ se dum la junaĝo ni emis al aliaj opinioj.»

(Devo de ŝtatano).

25-a de Februaro 1824. — »La mondo ne kapablas kontente trankviliĝi: la grandsinjoroj ne volas garantii, ke misuzo de la potenco ĉesos; kaj la amaro ne konsentas, en atendado de iom-post-ioma pliboniĝo kontentiĝi pri mezbona stato. Se oni povus fari la homaron perfekta, tiam ankaŭ perfekte bona stato estus ebla; sed sen tio okazos eterne ŝanceliĝado transen kaj maltransen: unu parto suferos, dum ke la alia bonstatis; egoismo kaj envio kiel malbonaj demonoj viglos, kaj ne ĉesos la batalo inter la partioj. Do plej prudente estas ĉiam, ke ĉiu praktiku sian profesion, por kiu li estas naskita kaj kiu li lernis, kaj ke li ne malhelpu aliulon, praktiki la sian. La ŝuisto restu ĉe sia botoŝtipo, la kamparano malantaŭ la plugilo, kaj la princo sciui regi — ĉar ankaŭ tio estas metio, kio devas esti lernata; kaj neniu ĝin pretendu, kiu ne scipovas ĝin.»



Frankfurt a. M. Saalgasse
Maldekstre la domo, pri kiu la juna advokato
Goethe gvidis sian unuan kaj lastan proceson.

(*Pri revolucioj kaj revolucio.*)

4-a de Januaro 1824.— »Estas vere : mi ne povis esti amiko de la franca revolucio ; ĉar ĝiaj terurajoj staris tro proksime antaŭ mi kaj indignigis min en ĉiu tago kaj ĉiu horo, dum ke ĝiaj bonfaraj sekvoj tiutempe ne estis jam videblaj. Mi ankaŭ ne povis resti indifera vidante, ke en Germanujo oni celis, intence provoki tiajn scenojn, kiuj en Francujo estis la sekvoj de urĝa neceso. Same malmulte mi estis amiko de tirana arbitro. Estis ankaŭ mia nepra konvinko, ke pri ĉi granda revolucio ne la popolo estas kulpa, sed la registaroj. Revolucioj estas tute necblaj, se la registaroj estas ĉiam justaj kaj ĉiam atentaj, tiel ke ili antaŭcedas per laŭtempaj plibonigoj kaj ne obstinas tiom longe, ĝis l' o necesa estas eldevigata de malsupre. Nu, ĉar mi malamis la revoluciojn, oni nomis min amiko de tio, kio ekzistas. Sed tiu tito'o estas tre dubenca, kaj mi energie rifuzas ĝin. Mi ne estus kontraŭ ĝi, se ĉio, kio ekzistas, estus laŭindega, bona kaj justa. Sed ĉar apud multe da bono samtempe ekzistas ankaŭ multe da malbono, tial »amiko de l' ekzistanta« signifas ofte ne malpli ol »amiko de l' malmoderniĝinta kaj malbona.« Sed la tempo estas ĉiam progresanta ; kaj la homaj aferoj havas post po kvindek jaroj alian formon, tiel ke institucio, kiu en la jaro 1800 estis io perfekta, jam en la jaro 1850 eble estos kadukaĵo.

(*Biblio, eklezio kaj religio.*)

11-a de Marto 1832.— »Por rigardi bibliajn aferojn ekzistas du vidpunktoj : unue la vidpunkto de kvazaŭ praa religio, la vidpunkto de la pura naturo kaj racio, kiu estas de dia origino. Ĝi restos eterne la sama ; ĝi daŭros kaj validos, dum kiam ekzistos diosentemaj estaĵoj. Sed ĝi estas nur por elektituloj kaj multe tro alta kaj nobla, por fariĝi ĝenerala. Due ekzistas la vidpunkto de la eklezio, kiu estas pli laŭhoma. Ĝi estas kaduka, ŝanĝebla kaj ŝanĝiganta ; sed ankaŭ ĝi daŭros, kvankam en eterna transformiĝo, dum kiam ekzistos malfortaj homaj estaĵoj. La lumo de senpera dia revelacio estas multe tro pura kaj brila, tiel ke ĝi ne estas laŭ la naturo de la malfortaj homoj kaj netolerebla por ili. Jen la eklezio aperas kiel bonfaranta peranto, por mildigi kaj moderigi, por ke estu helpate al ĉiuj kaj por ke multaj sin sentu bone. Ĉar en la kristana eklezio regas la kredo, ke ĝi estas la postulo de Kristo kaj tial havas la povon, liberigi de la ŝarĝo de l' homa peko, tial ĝi estas tre forta potenco. Kaj konservi por si tiun potencon kaj tiun respekton, certigi per tio la domon de l' eklezio, tio estas la ĉefa vidpunkto de la kristana pastraro. Tial la pastroj malpli multe demandas, ĉu tiu aŭ tiu libro de la biblio kaŭzus grandan klerigon de la spirito kaj ĉu ĝi enhavas instruojn de alta moralo kaj de nobla homa naturo ; pli gravaj estas en la libroj de Moseo la historio pri la unua peko kaj la ekesto de la bezono de savanto, plue en la profetlibroj la ripetata monro al tiu savanto, la atentata ; kaj la evangelioj havas la taskon, montri lian efektivan aperon sur la tero kaj lian morton sur la kruco kiel kompenson de niaj homaj pekoj. — Cetere ĉu falsa? ĉu malfalsa? tio estas rilate al bibliaj aferoj tre strangaj demandoj. Kio estas malfalsa, se ne l'o tute bonega, kiu harmonias kun la plej pura naturo kaj racio kaj servas ankoraŭ hodiaŭ al nia plej alta evoluo ! Kaj kio estas malfalsa, ne l'o absurda, vanta kaj malsaĝa, kiu ne portas frukton, almenaŭ ne bonan ! Se la malfalseco de biblia libro estus decidenda laŭ la kriterio, ĉu ĝi transdonas al ni nepre verajon, tiam oni povus en kelkaj punktoj pridubi la malfalsecon eĉ de la evangelioj ; ĉar Marko kaj Luko ne skribis laŭ propraj intuo kaj sperto sed nur malfrue laŭ buŝa tradicio, kaj la lasta, Johano, nur en sia plej granda aĝo. Tamen mi rigardas

ĉiujn kvar evangeliojn tute malfalsaj ; ĉar en ili efikas la rebrilo de majesteco, kiu eliris de la persono de Kristo kaj kiu estas de tia dieco, kia l'o dia iam ajn aperis sur la tero. Se oni demandas min, ĉu estas laŭ mia naturo, dediĉi respektan adoron al tiu diaĵo, tiam mi diras : nepre ! Mi klinas min antaŭ ĝi kiel antaŭ la dia revelacio de la plej alta principo de la moralo. Se oni demandas min, ĉu estas laŭ mia naturo, adori la sunon, mi ree diras : nepre ! Ĉar ĝi estas ankaŭ revelacio de l' Plejalta kaj eĉ la plej grandioza, kiun la teranoj kapablas percepti. Adorante ĝin, mi adoras la lumon kaj la ĝeneran forton de Dio, per kiu sola ni vivas, moviĝas kaj ekzistas kaj la plantoj kaj bestoj kun ni. Sed se oni demandas min, ĉu mi emas klini min antaŭ osto el la dikfingro de l' apostolo Petro aŭ Paŭlo, tiam mi diras : ne ĝenu min kaj restu for de mi kun viaj absurdajoj ! — En la statutoj de la eklezio estas tre multe da malsaĝo. Sed ĝi volas regi ; kaj tial ĝi bezonas malinteligentan amason, kiu subiĝas kaj estas preta, esti regata. La alta kaj riĉe dotita ekleziularo timas nenion pli ol la klerigon de la malsupraj amasoj. Al ili ĝi ankaŭ malpermesis la studon de la biblio, tiom longe, kiom iel estis eble. Ĉar kion malriĉa ano de kristana paroĥo pensus pri la princa pompo de riĉe dotita episkopo, legante kontraŭe en la evangelioj pri la malriĉeco kaj mizero de Kristo, kiu kun siaj disĉiploj humile iris piede, dum ke la princa episkopo preterbruas en kaleŝo tirata de ses ĉevaloj !

(*Pri mahometana religio kaj filozofio.*)

11-a de Aprilo 1827.— »Kiel bazon de la religio la mahometanoj donas al sia junularo la konvinkon, ke al la homo nenio povas okazi, kio ne estas jam delonge antaŭdecidita de ĉi dio ĉioreganta. Per tio la ĝejnuloj estas sufiĉe provizitaj kaj trankviligitaj por la tuta vivo kaj bezonas preskaŭ nenion pli. Mi ne volas esplori, kio vera aŭ malvera, kio utila aŭ malutila eble estas en tiu instruoj ; sed finfine io el tiu kredo kuŝas en ni ĉiuj, ankaŭ sen ke oni ĝin instruis al ni. La instruoj de la kristana kredo : »Eĉ ne pasero falas de sur tegmento, sen ke via patro scias !« elfluis el la sama fonto kaj montras al providenco, kiu ne forgesas eĉ l' on plej malgravan kaj sen kies volo kaj permeso nenio povas okazi. — La instruadon en la filozofio la mahometanoj komencas per la dogmo : Ekzistas nenio, pri kio oni ne povus aserti la malon ! Tiel ili ekzercas la intelekton de la ĝejnuloj, postulante kiel taskon, ke ili eltrovu kaj elparolu la kontraŭan opinion al ĉiu starigita aserto ; kaj el tio devas sekvi granda lerteco en rezonado kaj parolado. Kaj post kiam de ĉiu starigita tezo la kontraŭo estas asertita, ekestas la dubo, kiu do el la du opinioj estas la vere vera. Sed en dubo oni ne emas restadi ; ĝi pelas la spiriton al pli detala esplorado kaj ekzamenado ; kaj se tiuj estas perfekte farataj, tiam elfluas el ili la certeco : kaj ĝi estas ja la celo, en kiu la homo trovas plenan trankvilon. Vi vidas, ke en tiu instruoj mankas nenio kaj ke ni kun ĉiuj niaj sistemoj ne pli multe progresis, ke entute neniu povas pli multe progresi.«

Paul Bennemann, Leipzig

Muŝeto kaj burdo

— Alessandro Mazzolini —

Jen, en la aranea reto
Kaptita estas la muŝeto,
Sed granda burdo ĝin trapasas
Facile.
Ĉe l' homoj — nu, ĉu ne okazas
Simile ?

EL LA VERDA BIBLIO

— J. LEJZEROWICZ, LÓDZ —

(Kelkaj piuloj petis min malkaŝi la misteron, kiel kreigis la verda lingvo. Ĉi sube mi malkaŝas do la Misteron de Ĝ' genezo.)

Ĉapitro I.

1. En la komenco Schleyer kreis Volapükon. 2. Kaj Volapük estis senforma kaj kaosa, kaj mallumo estis en ĝi. 3. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris: Estu lumo. Kaj fariĝis Esperanto. 4. Kaj la Senkorpa Potenca Mistero vidis la verdan lingvon, ke ĝi estas bona. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero apartigis la Verdajn Lingvon de Volapük. 5. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero nomis la Verdajn Lingvon eterna tago, kaj Volapükon nomis nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno — unu tago.
6. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris: Estu firmaĵo en la lingvo. 7. Kaj Li kreis tiun firmaĵon. 8. Kaj Li nomis la firmaĵon regula akcento. Kaj estis vespero, kaj estis mateno — la dua tago.
9. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris: kolektigu la gramatikajn regulojn en unu lokon, kaj aperu la forta grundo. Kaj fariĝis tiel. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero nomis la fortan grundon Fundamento. Kaj Li vidis, ke ĝi estas bona. 10. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris: La Fundamento kreskigu verdaĵon, kiu naskas ĝojon, kaj ĝi kreskigu vortaron kiu donas laŭ sia speco radikojn kies semo estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj fariĝis tiel. 11. Kaj la Fundamento elkreskigis verdaĵojn laŭ sia speco: verdan lingvon kaj verdan movadon, kaj vortaran arbon, kiu havas radikojn, kies semo estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero vidis, ke ĝi estas bona. 12. Kaj estis vespero, kaj estis mateno — la tria tago.
13. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris: Estu lumajo en la ĉiela formaĵo por apartigi la verdan lingvon de mallumo. 14. Kaj ĝi estu lumajo por lumi super la tero. Kaj fariĝis tiel. 15. Kaj Li faris la grandan lumajon por regi la mondon. 16. Kaj Li starigis ĝin sur la ĉiela firmaĵo por ke ĝi lumu sur la teron. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero nomis la lumajon Verda Stelo. 17. Kaj Li vidis, ke ĝi estas bona. 18. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvara tago.
19. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris: la Vortaro aperigu movigantaĵojn, vivajn estaĵojn, kiuj fleksebligas la lingvon. 20. Kaj Li kreis la afiksojn, kiujn aperigis la vortaro, la sufiksojn kaj prefiksojn laŭ ilia speco. 21. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero vidis, ke ĝi estas bona. 22. Kaj Li benis ilin dirante: fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la vortaron (kaj tial la afiksoj tiel multiĝas ĝis nun). 23. Kaj estis vespero kaj estis mateno — la kvina tago.
24. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris: la vortaro aperigu rampaĵojn kaj vermojn kiuj turmentu la mondon. 25. Kaj Li kreis la neologismojn kaj ĉiujn malfacilajn vortojn, laŭ ilia speco, por eterna turmento de la novaj verduloj. 26. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris: Ni kreu potencon aferon, ke ĝi estu la akso de la lingvo kaj regu la gramatikon. 27. Kaj Li kreis la akuzativon. En formo de la finaĵo N li kreis ĝin. 28. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris al ĝi: fruktu kaj

- multiĝu kaj plenigu la verdan lingvon, kaj regu super ĉiuj ceteraj reguloj de la Fundamento. (Kaj depost tiam ĉiuj verduloj uzas la akuzativon en troa abundo). 29. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero diris al la mondo: jen Mi donis al vi ĉiuj regulojn de la Fundamento. Ĝi estu por vi sanktaĵo. Kaj fariĝis tiel. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis vespero kaj estis mateno — la sesa tago.
30. Kaj estis finitaj la Fundamento kaj Radikaro kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj. 31. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero finis en la sepa tago sian laboron, kiun Li faris, kaj Li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun Li faris. 32. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis, legante la originalan literaturon, kiun Li faris kreante.
 33. Tia estas la naskiĝo de la Fundamento kaj Radikaro, kiam ili estis kreitaj. 34. Kaj la Potenca Senkorpa Mistero kreis la Verdajn Lingvon el Prudento kaj Logiko, kaj Li enblovis en ĝin spiron de vivo, kaj Esperanto fariĝis Vivanta Lingvo.
 35. En sep tagoj estis kreata Esperanto, kaj por eterna memoro la Verda Popolo festas ĉiujare la universalajn kongresojn dum sep tagoj.

Ĉapitro II.

1. Kaj okazis post multaj jaroj, kaj sur la franca tero aperis mago. 2. Kiu venis adorklinigi antaŭ la Verda Stelo kaj disvastigi la verdan lingvon. 3. Kaj lia nomo estis Bo-frunt. 4. Kaj li estis unu el la multaj fervoraj apostoloj de la verda afero, kaj ĝuis seriozan fidon inter la verda popolo. 5. Kaj okazis, ke la satano tentis lin, igante lian koron fiera kaj jaluzia. 6. Kaj Bo-frunt ekpensis en sia koro: 7. Mi konstruos lingvon, kiu disvastigos tra la tuta mondo, kaj mi akiros al mi gloron kaj potencon. 8. Kaj mi atingos la supron de Ĝ' ĉielo, superos la saĝon de Ĝ' Sinjoro. 9. Kaj li laŭfaris idiomon, kiun li nomis Ido. 10. Ĉar ido de la verda lingvo li volis fari ĝin. 11. Kaj la Sinjoro mallevigis por vidi la faron, kiun faris Bo-frunt. 12. Kaj la Sinjoro diris: jen estas unu popolo kaj unu lingvon ili ĉiuj havis. Kaj jen, kion tiu (kies nomo estis Bo-frunt) komencis fari.
13. Ni mallevigu do kaj konfuzu lian lingvon, 14. kaj fariĝis granda konfuzo inter tiuj, kiuj kreis Idon. 15. En mallonga tempo fariĝis el ĝi multaj, multaj lingvoj kaj unu homo ne komprenis la alian. Ĉiuj ekbatalis inter si, dirante: mia lingvo estas la vera lingvo. 16. Tial oni donis al tiu loko la nomon Babel, ĉar tie la Sinjoro konfuzis la lingvon de Bo-frunt. 17. Sed la verdan popolon la Sinjoro elkondukis el la lando Babela kaj kondukis ĝin en la landon Babilon, ĉar ili havis unu klaran lingvon.
18. Jen estas la generaciaro de Ido: Ido havis la aĝon de kelkaj jaroj kaj naskigis al ĝi Esperantido. 19. Kaj Esperantido naskis Occidentalon, Idiom Neutral kaj Interlingua. 20. Kaj al ili naskigis Neo Latin kaj Anglic por eterna malhonoro. 21. Kaj multaj aliaj ĝis la nuna tago kaj ĝis la fino de ĉiuj tagoj. 22. Ili ĉiuj vivas efemeran vivon, ĉar ili estas polvo kaj refariĝos polvo.

Admono Goethe

Kioa do la hom' pretendu ?
Ĉu li en trankvil' sin tenu,
Kaj sur io kroĉe pendu ?
Ĉu li pelu sin kaj penu ?
Ĉu masoni do loĝlokon ?
Vivi nur sub tendo ŝirma ?
Ĉu konfidi sin sur rokon ?
Tremas ja eĉ rok' plej firma.
Unu tion, dua malon.
Ĉiu serĉu kion fari,
Ĉiu serĉu kie stari.
Kaj starant' — evitu falon.

Tradukis : K. Kalocsay

Ĉe Goethe sur la Fraŭenplan

Weimar, aprilo.

Ne, tiu ĉi urbo ne apartenas al la pasinto, kaj eĉ ne al la fremdul-trafiko, — tio ne povas iĝi pasinto, kio apartenis al Goethe. Estas la dimanĉo de pasko, brilega, viva, milkolora paska dimanĉo : Gretchen-oj kun blondaj harplektoj iras al la preĝejo kaj festvestitaj metilernantoj fumas cigaredon antaŭ la sukerajejo ; parko da aŭtomobiloj ĉirkaŭ la muzeo, promenantoj maljunaj geedzoj sur la bordo de la Ilm, fotografaj maŝinoj venantaj de malproksima kaj loka soldata orkestro, malnovaj kasteloj kaj moderna villodistrikto, maljunaj veturigistoj en tratingaj malhelbluaj jakoj apud la malnovcaj veturiloj kaj brunaj ledbenkoj en la neĝblankaj, etaj, fabelaj tramveturiloj, memortabuloj kaj firmotabuloj (advokato *Wagner*, librovendejo *Wieland*, ŝuisto *Schiller*), posttagmeze sporta festeno kaj vespere Goethe-memorifesto en la preĝejo Herder, gepatra hejmo kaj muzeo, kvincent jara preĝejo kaj vendodomo Tietz. Ne regas la pasinto kaj ne regas la nuno ; la vivo regas ĉi tie, la vivanta, memoranta kaj venont-rigardanta vivo, la sensistema, konfuza, riĉa vivo. Jam ne trafas tio, kion Herder diris siatempe : »*Weimar ist ein Mittelding zwischen Hofstadt und Dorf*« — ĝi jam ne plu estas kortega urbo kaj ne vilaĝo kaj ne transiro inter ĉi ambaŭ, ĝi jam estas karaktero. Ankaŭ la loko, sur kiu oni konstruis tiun ĉi urbon, estas tia, kvazaŭ Goethe estus asistinta al Dio, kiam Li kreis ĝin kaj efektive li ja asistis : li projektis la parkon, li plantis la arbojn sur la bordo de la Ilm, li aranĝis kaj li konstruis, kolektis kaj disjetis, alportis bildojn kaj statuojn, projektis meblojn, havis personan rilaton kun ĉio en la mondo : kun mineralo kaj kreskajo, muziko kaj teatro, Romo kaj Parizo, barometro kaj fortepiano, cifero kaj litero.

*

Tiu ĉi estas la urbo de Goethe kaj la vivo, plena de infanoj kaj floroj, librovendejoj kaj meblomagazenoj. Dekalkulinte la kelkajn bazarojn, kie oni vendas Goethe-salujon kaj Goethe-notlibron kaj Goethe-aŭtoplaketon kaj Goethe-poŝtukon, ĉi tiujn dekalkulinte, ĉiu vendejo estas neordinare bongusta kaj delikata, preskaŭ nobla kaj arta de la portaloj ĝis la varoj. Eĉ ne unu misgustan pecon mi vidis ĉi tie, nek unu misgustan virinan ĉapelon, nek misgustan meblopecon. (Vere ja, ke ĉiloke oni estas tre kompetenta pri mebloj.) En la montrofenestro de ĉiu vendejo estas ia Goethe-koncernajo kaj iu el la kapkopioj de Goethe skulptita de Klauer: la juvelisto elmetis

Goethe-vizitkarton, apud ĝi atestletero de iu germana profesoro pri la aŭtentikeco de l' vizitkarto, en la montrofenestro de l' panisto Goethe-saketoj, en kiujn oni pakas la biskviton kaj super malgrandaj, blondaj plekt-kukoj la surskribo : Gretchen-Zöpfe 10 pfennig. En la montrofenestro de florvendejo apud korbeton da violo oni metis paperon, surskribo : favorata floro de Goethe. En la montrofenestro de la kvarcentjara gastejo Weisser Schwan, apud la domo de Goethe, kiun ofte vizitis la societo Goethe-Schiller, ni vidas tablon riĉe metitan de malnovaj porcelanoj, sur ĝi menuokarto, riĉa kaj abunda menuokarto, foje ĉi tiun finmanĝis gesinjoroj Goethe dum iu solena okazo. La asocio Armbrust elmetis la man-pafarkojn de Goethe kaj Schiller, la papervendisto elmetis la mortanoncon de Goethe.

Gestern Vormittags halb Zwölf Uhr starb mein geliebter Schwiegervater, der Grossherzogl. Sächsische wirkliche Geheime-Rath und Staatsminister

JOHANN WOLFGANG VON GOETHE
nach kurzem Krankseyn, am Stickfluss in Folge eines nervös gewordenen Katharrhalfiebers.

Geisteskräftig und liebevoll bis zum letztem Hauche, schied er von uns im drei und achzigsten Lebensjahre.

Weimar, 23. März 1832.

Ottilie, von Goethe, geb. von Pogwisch, zugleich im Namen meiner drei Kinder, Walther, Wolf und Alma von Goethe.*

La placon, kie staras la domo, oni nomas Fraŭenplan. La fenestroj rigardas al la placo, sur la placo malnova verda puto kaj malnovaj domoj, ruĝaj kaj verdaj domoj, bluaj domoj kaj rozkoloraj domoj, — tiuj kelkaj novaj konstruaĵoj inter ili neniom fuŝas la bildon. Bela, nobla kaj simpla unuetaĝa domo, propre duetaĝa, ĉar oni metis fenestrojn ankaŭ en la tegmenton, unu vicon da fenestroj, kiel ĉe la ceteraj burĝaj domoj de la tiamaj tempoj. Kvindek jarojn loĝis ĉi tie Goethe, antaŭe li nur luis la domon kaj kiam la princo ĝin donacis al li, li transformis ĝin laŭ siaj projektoj. Li projektis la vastan ŝtuparejon helverde pentritan, kie li starigis la statuojn en la niĉojn, kiujn li akiris dum la Italia vojaĝo, gipsajn kopiojn de antikvaj statuoj. Sur la unua etaĝo la flava ĉambro, kie oni aranĝis la festenajn tagmanĝojn, la blua muzikĉambro, akceptaj ĉambroj. Ni restu ĉe tio, kion ne entenas la Baedeker kaj kio kaptas nin ĉi tie pli ol ĉio : kion hodiaŭa, kion *moderna* estas tiu ĉi loĝejo. Blankaj ŝrankoj estas tie ĉi, kiujn li projektis, tute malaltaj ŝrankoj kun nuraj tirkestoj, en kiuj li havis desegnaĵojn kaj gravuraĵojn. Kvazaŭ akurate la samajn ŝrankojn mi vidis pasintsemajne en Berlin en moderna mebloekspozicio. La »Führer« montras ion kun mistera rideto, pri kio ĉiu miras : disŝovebla blanka pordo kunligas la du ĉambrojn, disŝovebla moderna blanka pordo, kiajn fiere montras la loĝantoj de la modernaj villoj. Goethe proj-

* Hieraŭ antaŭtagmeze, je la duono de la dekdua horo mortis mia amata bopatro, la grandprinca sekreta konsilanto kaj ŝtatministro Johann Wolfgang Goethe post mallonga malsaneco pro sufokiĝo sekve de kataara febro kiu fariĝis nervoza. Forta en spirito kaj amplena ĝis la lasta spiro, li forlasis nin en sia 83. jaro. *Ottilie*, von Goethe, nask. von Pogwisch, samtempe en la nomo de miaj tri infanoj: Walter, Wolf kaj Alma von Goethe.

ektis ankaŭ ĉi tiun. Speguloj... (Foje en Berlin sinjorino diris ion tre delikatan pri la speguloj de Goethe, ŝi diris ke ekzistas speguloj, kiuj montras nin pli malbelaj. ol kiaj ni estas, kaj ankaŭ, kiuj montras nin pli belaj. En la speguloj de Goethe oni sin vidas pli bela.) En la loĝejo estas nenia odoro de pasinto. El la fenestroj oni vidas al la placo, kie florante ondas la paska dimanĉo, nur la fenestroj de l' laborĉambro kaj dormoĉambro rigardas al la silenta, dormanta marta ĝardeno. Tiu ĉi laborĉambro tute diferencas de la riĉa kaj eminente nobla karaktero de l' loĝejo, — kruda kaj severa ĉambro estas ĉi tiu, la rabotitan tablon nur la tempo faris glata, en la ŝranko: peze binditaj libroj, sur la skriba pupitro: mineraloj kaj inkujoj kaj malgranda, rusta, rompita spegulo, en kiu oni jam ne estas bela. Ne, tie ĉi ne licis esti bela, tie ĉi oni devis labori, tien ĉi nur la tri plej bonaj amikoj povis enpaŝi, tie ĉi li ne estis afabla dommastro, sed sinama kaj grumblema verkisto, kiu jetadis siajn poŝtukojn en kadukan, altpiedan kanokorbon (Ankaŭ la kopiaĵoj de tiu ĉi korbo estas elmetitaj en la montrofenestro de korbvendejo, kun la surskribo: poŝtukojo de Goethe, taŭga kudrokorbo). Barometroj kaj tabeloj, plano de ĝardenaj laboroj por la printempo de la jaro 1832., en telero nigra tero por analizo, ne estas pentraĵo, ne estas tapiŝo, ne estas kurtenoj sur la fenestroj. Ununura eta statuo estas ĉi tie, opale brilanta eta busto: *Napoleon*. En tiu ĉi ĉambro li okupis sin pri kristaloj kaj kreskajoj, optiko kaj geologio kaj etnografio kaj estas tie ĉi lensoj kaj desegniloj kaj mezuriloj kaj tergloboj kaj tabeloj kaj kalendaroj. Apud ĝi la malgranda ĉambro, kie li dormis kaj kie li mortis en la granda apogseĝo je la dudekunu de marto 1832.

Ne, ne estas muzea silento en la domo kaj ne haltis la horloĝoj en la momento de l' morto. La domo estas plena de homoj kaj en ĉiuj ĉambroj iras la horloĝoj, akurate, fideble, se tiel plaĉas: simbole. Ne haltis la horloĝoj en la momento de l' morto, kiel ne mortis ankaŭ ilia mastro: ĉie li vivas en tiu ĉi domo kaj ĉie li venas renkonte al vi, sed ne kiel fantomo, sed kiel vivo kaj realo; lia giganta ombro jetiĝas sur la nekulturitajn martajn terojn, sur kiuj ondadas la dimanĉa brilo, ĉi tie li iradis tra kvindek printempoj kaj rigardis la ekkreskintan herbon, pensis teron en la manon kaj enpensiginte disfingrunis ĝin, ĉi-voje li iris al la virinoj, kiujn li amis kaj kiuj plie amis lin, al la homoj, kiuj lin konis, sed kiujn li plie konis kaj mi kredas ke nur en lia urbo povis okazi, ke la malgranda knabo, kiun mi demandis: kie estas la Landesmuseum, enpaŝigas la kuglojn, per kiuj li ludis kaj atentigas min, ke, se sur la parteroj mi enrigardos post la tolomuron de la Goethe-kolektajo, mi vidas la Rodin-statuon, ĉar cetero ĝi nun ne estas videbla pro la Goethe-ekspozicio.

Lili Bródy

MIA ANGULO

— JULIO BAGHY —

Antaŭ nelonge mi ricevis leteron pri poetiĝo de mia sesjara fileto. Por forpeli la tedan malliberon de la ĉambro dum pluva posttagmezo li faris kvinstrofan poemeton, kompreneble ne skribe, ĉar li ankoraŭ ne konas la arton de la litterskribo. La titolo estis: »Kantu la printempo«. Temis pri vekigo de la naturo, pri rideto de la kampoj, pri festa sinvestado de la arboj kaj ankaŭ pri la petolado de la paska leporeto, alportanta dolĉajn donacetojn. La ripetiganta rekantaĵo estis: »Kantu, kantu printempo bela«.

Mi scias, ke en lia poemeto mankis la severa ritmo

kaj rimoj ne ornamis la infanaĵn versojn, tamen mi sentas, ke ĝi estis plena de pura poezio, ĉar ĝi erupciis el infana kredo. Ĝi similis al la unua floreto de virga kora humo, en kiu la Nekonato jetis ĝian semon. La kanto de la infankoro estas riĉa en revoteksitaj sonĝoj kaj en naiva pompo... Pro emocio mi ekklarmis... Fileto mia, ankaŭ mi, kiel infano, ekkantis la unuan fojon pri la printempo. Ĉu ĝi pepetis pri la atendado de la printempo aŭ ĝi himne laŭdis la burĝonadon, mi ne rememoras?! Egale. Nun vi kantas sopirplene kaj kun via kanteto el multmiloj da infanaj animetoj flugas la preĝa voko: »Kantu, kantu printempo bela!«

Inter miaj haroj ekbrilas kelkaj prujnotuŝitaj. La Vivo plugis profundajn sulkojn en la humon de mia koro, sed la milito kaj la postmilita vandalismo dekumis la revoflorojn de mia kampo. Tamen en ni restis io: *Li ĉiama atendado de la printempo*. Tra landoj mi vagadas, al animrivelaj rigardoj mi kroĉas mian rigardon, kaj mi atentis: ĉu purpurigigas jam la horizonto? Ĉu vekigas la konscio de homo pri sia propra valoro? Mi memoras pri vi, fileto kaj pri la nova generacio, kiu korsire vokas la printempan tagigon. El mia animo eliĝas dolore, vee, larmbanite la krio: »Kantu, kantu printempo bela!«

En trouzitaĵ ĉifonoj kun frostotrema animo ni ĉiuj atendas la *veran* printempon. Ni atendas kaj plendas pri ĝia obstina malfruigo. La nebulo de la haoso regas. En tiu nebulo erarvagas la *Homo*, tiu *Homo*, kies tasko kaj celo estos krei novan epokon. Kie Li estas? Ĉu ankaŭ Li sensukcese serĉas la vojon en la korblindiga nebulo? Ĉu Li neniam alyenos estante fantazikreita figuro de la turmentitaj animoj? Ho, kion mi donu por vi, fileto kaj kion ni ĉiuj postlasu por niaj gefiloj?! La nuna generacio estas mizera, prirabita kaj eĉ ĝiajn sonĝojn nenige mokas la furiozanta egoismo. Kion ni respondu sen mensogo al la centmiloj da infanaj animoj, kantantaj plenespere: »Kantu, kantu printempo bela!«

Aŭskultu, fileto mia! La koro de via patro parolas. Aŭskultu vi ĉiuj, karaj animetoj, atendantaj kaj kantantaj! Amanto de la *Homo* parolas al vi. Mi rigardis en la profundon de miaj kunsuferantoj kaj tie jam purpurigigas la aŭrono de la printempo. La Nova *Homo* dividite preparas pli belan estontecon por vi. Mi vidis kaj vidas la vizagon de la Nova *Homo*. Kora lumo heligas ĝin. Celhava persisto radias el Lia rigardo. Lian volon hardas la haoso de la nebulo: la stertora helpkrio, la sunvoka veado, la sakra preĝo kaj la hipokrita pio, la ĉiutage malhonorigata idealismo, la mortdanco de la malprudento. Tiuj monstraj ombroj, fantomantaj en la nebulo, timigas nur nin, sed ne la Novan *Homon*, kiu dividite vivas en la koro de la suferantoj. Preparigas la nova etiko de la paca epoko. Plenespere voku la printempon kaj kantu, kantu! La semoj de la Nova *Homo* trovas perfekte plugitan humon kaj la burĝonado jam komenciĝis. »Kantu, kantu printempo bela!«

Ne demandu pri la vojo! Neniu konas ĝin. La Vivo estas milvizaĝa kaj milionkapa. En la haoso la individuo ne povas orientiĝi. Sed ne timigu vin, ke la homanan kanton akompanas eksplodoj de grenadoj, sangaj mortkrioj, ĉar la malprudento plugas kaj la veo semas. Ne naŭzu vin, ke dum enterigo de pacapostolo pintiĝas bajonetoj paradaj al la ĉielo! Mortotimon de la agonianto montras tio. Rigardu ĉirkaŭen! La celperditaj oratoras pri interfratiĝo kaj malarmado, sed samtempe konstruas buĉmaŝinojn, fabrikas vivsufokajn gasojn. Nur pro timo! Pro timo! Ĉu pereos la mondo? Ne! Ne! Ne! *La volo de la Nova Homo venkos la haoson sen pereigo de la mondo*. La Tero fariĝos unueca patrujo de la homaro. Sed pri la vojo... pri la vojo ne demandu! Neniu konas ĝin, ĉar nun regas la nebulo de la haoso, kaj nur en la koroj psalmas melodio de »Kantu, kantu, printempo bela!«

Jes, kantu printempo bela! Je via sorĉo ekfloros la narkotita idealismo, pompan veston prenos al si la animo, dispersos vivdonajn radiojn la kora varmo kaj super la nebulo kreiĝos tia harmonio, kiun venki ne

povos la plej komplikaj buĉmaŝinoj, nek sufoki la mortigaj gasoj. Ne, ĉar la monstroj de la nebulo naniĝas sub la potenco de la Nova Printempo, kies mateniĝo jam purpuras en la homa intelekto. Ho, fileto mia kaj vi infanaj koretoj, jam kantas la printempo! Milionoj aspiras al la altoj. Milionoj preparas por vi pli belan estontecon. Milionoj migras for el la nebulregata regiono supren al la pintoj. Milionoj jam konscias, ke la nebulo estas surteriĝinta nubo kaj super ĝi la suno viviga, kor-karesa brilas. Supren do al la pintoj! Ni estas homoj, ni rajtas vivi, ni rajtas bani nin en la sunradioj, ni rajtas ebruiĝi de la lumo kaj inspirite de la Justeco, Kompreno kaj Amo ni rajtas deklari al niaj gefiloj: Via printempovoka himno estas aŭskultita kaj en la koro de viaj gepatroj jam kantas, kantas la printempo bela.

SERCADO, LINGVO, SOCIO*

Konstatinte, ke la lingvo estas interligilo, socia fenomeno, ni devas rekoni, ke oni povas ĝin same influi, kiel ĉiun socian aperaĵon. Kaj ke ĉi tio ne estas nura teorio, sed io provebla per faktoj, tion montras inter aliaj la hungara lingvoreformo, kiu ĉirkaŭ 1801. renovigis la lingvon, tiutempe ne sufiĉe esprimkapablan, per novaj vortoj, novaj sufiksoj, vortmallongigoj. (La jarnumero en la libro de Drezen (1901) eraras ĝuste 100 jarojn. Gena preseraro.)

Oni ne povas kontesti, ke en la historio de la mond-lingvo regas la samaj leĝoj, kiuj difinis kaj difinas la formiĝon de la homa socio. La historio de la homaro havas diversajn periodojn, al kiuj apartenas diversaj malkovroj, iom post iom transformantaj la homan vivon. La homo serĉadas la pli perfektan vivon kaj la historio de la socio estas rakonto pri la pli kaj pli racia kontentigo de la bezonoj homaj.

Mi diras pretere, ke ni, nunaj homoj, havas la subjektivan erarsenton, ke nia vivo estas pli grava, pli signifa, ol la ĝisnuna vivo de la homaro. Sed tiu ĉi sento certe ĉiam ekzistis, ĝi estas la ĉiama lokomotivo de la homa evoluo, ligita tamen al la relparo de la reala progreso.

Do, la socia ordo ŝanĝiĝas, evoluas. Kaj la homo, en sia periodo, esploras kaj trovas la plej konvenan vojon por marŝi antaŭen al la kontentigo de siaj aktualaj bezonoj. La antaŭenmarŝo renkontas novajn bezonojn kaj novan serĉadon. La tria sistemo, en sia aktuala epoko, estis la plej konvena socia sistemo, kaj la formiĝo de la ŝtatoj nekontesteble okazis laŭ la neevitebla vojo de la evoluaĵ leĝoj.

Kaj nun? Se mi provas min forŝiri de tiu subjektivismo, kiun la memsento neeviteble trudas, mi eble povas pensi, ke la rapida febro de la nuna homo estas troa, sed eĉ kun la plej singardema konsidero oni devas konsati, ke la novaj bezonkontentigoj estigis nun, ĝuste nun, novajn bezonojn, kaj ĉi tiu jarcento, vidanta nian efemeran vivon, alportos novajn formojn de la homa vivo.

Jen vero, kion ni devas ne forgesi! Antaŭ kelkaj monatoj mi legis vere bonegan modernan fabelon, kies aŭtoro — bedaŭrinde — ne mi estis (ĉar volonte mi fierus pri ĝia aŭtoreco). Tiu fabeleto bonege karakterizas certan kategorion de homoj, kiu nur *poste* emas konstati, ke okazis io. En la fabelo temas pri sro X. privatoficisto, kiu, laborante de mateno ĝis vespero, matene ege rapidas en la kontoron kaj nur vespere havas tempon legi la matenan ĵurnalon kaj sciigi pri la hieraŭaj okaz-

ajoj. Tiel okazas de jaro al jaro. Foje okazas io vere grava kataklismo: la mondo pereas. Sed nia X. sciigas pri tio nur la postan vesperon, ĉar matene li ne havis tempon (kaj kutimon) legi la ĵurnalon.

Do ni ne rajtas fermi la okulojn antaŭ la fakto, ke la novaj ebloj, inventoj kaj malkovroj naskis jam ĝis nun novajn situaciojn kaj en la utero de la novo sin kaŝas la embrio de la naskiĝonta Morgaŭ. Ni devas konformiĝi al la direkto de la evoluo kaj serĉi la plej taŭgajn vojojn, kiuj gvidas nin al ĝi plej certe kaj glate, tio estas, *kiuj ne disipas la energiojn*.

La ŝancoj de la internacia lingvo kuŝas en la evoluo de la socio. La lingvo formiĝas laŭ sociaj bezonoj, kaj novaj bezonoj naskas novajn manierojn de kontentigo. La vojo, de la bestaj homhurloj ĝis la internacia lingvo, estas same longa, kiel tiu de la primitiva tribsistemo ĝis la moderna mondekonomio. La opaj fazoj de la internacia lingvoproblemo akre montras ĉi tiun paralelecon. (Pri tiu frapanta paraleleco Drezen parolas malmulte.) Mankas sufiĉa loko por detale pritrakti nun ĉi tion, sed se ni ĵetas subitan rigardon al la historio, okulfrapa estas la fakto; ke la ideo pri la internacia lingvo ondringas sur la surfaco de la homa cerbo jam ĉe la komenco de

Surstrate

— Hilda Dresen —

Vintra vespero, malvarma, malfrua.
Jam duondormas la urbo senbrua.
Sur la ĉielo flagradas kandeloj,
Brulas kun bril' miriadoj da steloj.

Sonas la aŭtosignaloj obtuze,
Brilas reklamoj nun malpli amuze.
Sonoriletoj de glitveturilo
Gaje tintadas en nokta trankvilo.

Estas pli vive ĉe stratoanguloj:
Strabas explore la viraj okuloj.
Ili inviton cinikan atendas,
Manon kun peto senhonta etendas.

Oni ekhaltas, parolas, demandas,
Kaj sub la steloj afere marĉandas,
Tranĉas aeron ekrid' abomena,
Kaj mallumiĝas ĉiel' steloplana.
(1928)

Alvoko

— W. A. Johnson —

Dio! Kial mia koro
Ne kapablas trili kante,
Kiam ĝi en sia kaĝo,
Devas danci jubilate?
Kial ĝia pura ĝojo
Preamsufoke devas muti,
Atendante lamajn vortojn,
Kiu povas nur balbuti?

Dio! Nur havante voĉon,
Ne plu ŝvelus ĝi dolore —
Amo, ploro, kaj indigno
Elverŝ ĝus laŭhumore.
Ne plu ĝiajn vokojn fuŝe
Interpretus la esprimo,
Kaj solecon ĝian rompus
Ehoj el la malproksimo!

* E. Drezen: Historio de Mondlingvo. Eldonis Ekrelo, Leipzig. Prezo mk. 7.—+10%.

la nuna historio, sed ĝi konkretiĝas nur kiam la sociaj bezonoj komencas sentigi kaj submotivi ĝian gravecon. En la mezepoko kaj en la komenco de la nova epoko, kiam la amasoj estis ankoraŭ posedatoj de la servutaj potencoj kaj la plejparto de la homoj ne povis ŝanĝi sian lokon pro teknikaj kaj politikaj kaŭzoj, ankoraŭ ne ekzistis la bezono de la internacia lingvo. La distanco nomata nun kilometro signifis en la mezepoko eble centoblan distancon pro la manko de teknikaj iloj, kaj pro la nesekureco. Tamen, tuj, jam kun la unuaj signoj de la ĝenerala transformiĝo, naskiĝas la konkreta formo de la internacia lingvo, krea — laŭ la aktualaj bezonoj — unue kiel nur skriba sistemo; poste oni komencas serĉi paroleblajn sistemojn, kiuj tamen ne prosperas, ĉar ankoraŭ ne estas aktualaj; ĝenerale ili estas lingvoj aprioriaj, kiuj ne apogas sin al la ekzistantaj lingvoj, sed naskiĝas el la nenio. Fine venas kun la aktuala bezono de la teknika kaj socia evoluo la nuna internacia lingvo, Esperanto, kiu certe estos forta fundamento de la socia kaj senta internaciigo. Pri la flankaj sistemoj, miksaĵoj kaj pri la absurdaj planoj pri la internaciigo de naciaj lingvoj mi nun ne volas paroli, fakte Esperanto naskiĝis en la plej aktuala momento kaj, kiel Drezen trafte konstatas, la ebleco de ĝia libera, demokratia evoluo donis kaj donas al ĝi senfinan perspektivon. Kompreneble, la vojo de la estonta evoluo ne estas tute simpla. La restaĵoj de la estinto ne estas forviŝeblaj, kion karakterize montras la diversaj teorioj pri internaciismo en naciismo, aŭ naciismo en internaciismo. Tamen, la bezono jam ekzistas kaj eĉ pli forte ekzistas. En la nuna periodo oni bezonas helpan lingvon, sed, se la homaro atingos la pli grandskalan evoluon de socia kaj monda ordo, pli ol verŝajne venos la tempo de la universala lingvo, ĉar la estonto devas baziĝi sur la principa fundamento: atingi por la homaro la plejmulton per la plej malmulta peno. Laŭ la vortoj de Drezen, la lingvo internacia kvazaŭ ensorbos la tutan esencon, ĉion valoran el la lingvoj naciaj. Koncerne la rilaton inter Esperanto kaj la estonta universala lingvo, Drezen opinias, ke ĉi lasta kreskos el la nuna Esperanto. Tiu ĉi deklaro estas ĝusta, sed iomete ĝenerala. La aŭtoro, kiu donacis al ni tiom valoran fonton sciencan pri tiu ĉi temo, ĉiam konceptas siajn dirojn plej koncize kaj logike, sed en tiu ĉi punkto li nur skizas, verŝajne, ĉar la studado de ĉi tiu problemo bezonus novan ampleksan verkon.

Entute la libro de Drezen estas ĝisfunda kaj alt-nivela, krome ankaŭ mankokompensa en nia lingvista literaturo. Nur kelkfoje mi konstatis, ke la propagandisto Drezen superregis la scienculon, sed la ĝenerala impresio: utilo kaj plezuro.

F. Szilágyi.



OBSERVO

HAYDN. La 31-an de marto festis la mondo la ducentan datrevenon de la naskiĝo de Jozefo Haydn. Dum tiu ĉi tago ĉie en la mondo, kie vivas muzikamantaj homoj, oni citis kune kun la nomo de la aŭstra Haydn la nomon de malgranda hungara urbo; el la biografio de Haydn oni ja ne povas ellasi, ke unu el la plej grandaj poetoj de la moderna instrumenta muziko vivis kaj laboris tridek jarojn en *Kismarton*, kiel kortega orkestrestro de la fama hungara princo Miklós Esterházy. Tie ĉi, sur la okcidenta parto de Hungarujo, li pasigis

la plej grandan parton de sia vivo, de tie ĉi li konkeris iom post iom Vienon, Londonon, Germanlandon, Parizon, — la tutan mondon.

La arta evoluo de Haydn, kvankam estas la plej malrapida, tamen la plej certa inter tiuj, kiujn konas la historio de l' muziko. Lia individuo laŭgrade malvolviĝis. Sed kun ne malpli plena forto, kiel tiu de la plej grandaj muzikistoj.

En niaj oreloj resonoras la fama basa ario pri la pluganto, kiu gaje rapidas al la kampoj, kulturi la teron, semi la grenon, kiun la humo fidele kaŝas en sia ĝermiga sino. En la spegulo de l' muziko li montris al ni unue en intima proksimo la *naturon* kaj la *homon*, kiel la *infanon* de l' naturo. Kaj li portis en nian proksimon ankaŭ la nevideblan Kreinton de tiu ĉi belega realo, kiu kreis por bono, belo kaj feliĉo siajn kreaĵojn. Haydn sciis trasenti la tutan grandecon de l' Kreo, li ja recitis en sia imago la gigantan Mallumon kaj Nenion, el kiuj ia nemezurebla potenco vokis je floranta vivo la miraklan ĉefverkon de l' mondo.

Dio, Naturo kaj Popolo, jen la sankta triunuo de la arto de Haydn. Pri tio ĉi li verkis sian plej grandan ĉefverkon, kiu estas unu el la plej potencaj kreaĵoj de l' muzika literaturo, la oratorion *Jahreszeiten* (Sezonoj). El tiu ĉi neŝanĝebla triunuo neniam forŝiriĝis lia individua vivo. Kvankam li tute ne estis la eterne kontenta etburĝo, tiu ĉiam ridetanta »patro-Haydn«, kio lin imagas liaj supraĵaj konantoj. Tra krudaj mizeroj, amaraj humiliĝoj li devis por si rompi vojon. Kaj tre bone li konis la persekutan viron de l' pasio, la bruligan sopiron, la noktojn — kaj li sciis, kio estas la »soleca horo«. Sed en la plejprofundo de lia animo tiujn ĉi fajrajn pegazojn de lia individua vivo jungis nedisŝireblaj kondukiloj al tiu trankvile, certe ruliĝanta veturilo, sur kiu pasas la Naturo kaj la Popolo, kaj kies nevidebla veturigisto estas la Ĉiopova mem.

Supre, en la *Walhalla*, loĝas la dioj, malsupre, en la mallumo de Nebelheim la Nibelungoj, inter ĉi tiuj du — meze — sin trovas la »Mittelgart«, la tera mondo de l' homo. Jene kantis la antikvaj germanoj. Laŭ kia melodio? Ni ne scias. Sed ni scias, ke la poezio de la barbaraj nordaj melodioj transiris en la kulturitan kanton de l' Sudo kaj kreis el ĝi unu el la plej grandaj ĉefverkoj de l' kulturo: la *germanan muzikon*. La kanto sonis nun jam pri aliaj altoj kaj profundoj. Supre ekbrulis la mistika stelo de l' Kristanismo, sur la malaperinta vojo de l' Walkuroj galopis la rajdantoj de l' Apokalipso, poste sur la ruinoj de Walhalla konstruiĝis la »firma fortikaĵo« de l' reformacio; kaj malsupre malfermiĝis nova imperio de l' mallumo, la faŭko de l' infero kun teruraj monstroj rikanis al ni, anstataŭ la avida Alberich jam tentis la diablo de Luther. — La loĝanto de l' Mittelgart venkis la novajn transcendaĵajn potencojn, konstruis sian novan metafizikan hejmon. En la muziko de liaj lukto kaj kredo ja renoviĝis ĉiuj praaj febro, pasio kaj vizio de la antikvaj germanaj luktoj kaj kredoj, sed samtempe ĉiam pli pure kaj majeste formiĝis la figuro de la luktanta kaj kredanta homo mem: tiu giganta germana homidealo, kiu, en la muziko de *Bach*, per ĉiu arda doloro kaj jubila ĝojo de l' vivo, venkis la inferon kaj skermis la ĉielon. Kaj preskaŭ samtempe, kiam en la animo de Bach ektrumpetis la triumfaj trombonoj de la Gloria en la h-mol-meso — en aŭstra urbeto naskiĝis la infano, super kies lulilo jam brilis la sereno de la paco de Dio, kiu kliniĝis al la tero, sur kiu liaj prauloj tiel firme staris, por kisi kaj brakumi tiun, en kies potenca artista individuo vek-iĝis je imperativa konscio kaj plenfloure disbranĉiĝis: la muziko de l' Mittelgart. Kia fekunda vivo — donaco

de l' ĉielo. La plej brila optimismo ludis kun li gajan, aŭ eĉ petolan ludon kaj kvazaŭ ludante li kreis tute novan sonoraran mondon, en kiu la diversaj blovaj kaj kordaj instrumentoj, tamburoj, trumpetoj, violonoj, libere, senĝene ĝojas pro siaj propraj sonoj, respondadas aparte aŭ fore unu al la alia, kiel la birdoj en la maja bosko. »Kreo« estis tiu ĉi Haydna simfonio vere, muzika kreo de ĉio, kion la majstro, staranta sur la zenito de sia krea forto, prikantis en la oratorio *Schöpfung*.

La sorĉo de l' eterna harmonio havis plurajn grandajn muzik-magojn: Josquin, Palestrina, Mozart... Sed ni ne konas similan al Haydn, en kiu la imperio de l' realo, konservante sian tutan teran pezon, tiom ĉestas en la interna, pura harmonio de l' animo. Nin kaptas la profunda transspiritigo de lia »tera harmonio«. Tia harmonia tera vivo ekirigas la homon, rigardantan en la altojn, ne por apokalipsaj bataloj, sed nur... preĝi. Nun galopas tra la tuta mondo kaj tra ĉiuj epokoj — tiu Haydna veturilo, per kiu la Naturo kaj la Popolo, la »Kreo« mem, faras sian triumfan eniron en la eternan imperion de la germana muziko. Kaj la nevidebla veturisto?

La nevidebluloj tre ŝanĝiĝis eĉ de tiam. Kien perdiĝis la piaj Haydnaj kredoj? Sed la »Mittelgart«, ekflorinta en la Haydna muziko, pluflores, ĝi estas nia patrujo kaj hejmo ankaŭ nun, kaj tiuj grandaj kaj venkaj bataloj, kiuj ekiris de la »naŭa« simfonio ĝis la »Meistersinger« en la imperio de l' muziko, ĉiuj lokis sian piedon sur tiu ĉi floranta patrino tero, sur la Haydna »Kreo«. — Generacioj staris firme sur la solidaj fundamentoj de lia arto, la danko de l' generacioj salutas la ducentan datrevenon de la naskiĝo de Haydn.

K. B.

PRELEGOJ PRI LA HISTORIO KAJ LITERATURO DE ESPERANTO. Atentindan novaĵon signifas tiuj ĉi prelegoj, ĉar unupartite ilin aranĝas la City Literary Institute de Londono, (la urbo oficiale pagas la preleganton), aliparte la persono de l' lektoro, S-ro K. R. C. Sturmer, ja mem garantias pri la nivelo kaj valoro de la prelegoj. La nun dissendita programo de la tria trimestro promesas riĉan materialon. La priliteratura parto de la prelegoj temos pri la literaturoj de Bulgario, Estonio, Katalunio, Hungario kaj Japanio; apartan preparolon ricevos kelkaj gravaj verkoj, kiel *Eterna Bukedo* (Kaloessay), *Jarmiloj pasas* (Haefker), *Historio de Kristo* (Papini) k. t. p. Okazos diskutigaj pritraktoj pri la recenzado, pri la nova kritiko, pri la tendencoj de la nuna eŭropa literaturo. La londonanoj certe profitos la okazon aŭskulti tiujn ĉi interesajn prelegojn.

L. T.

Neologismoj, netroveblaj en la Plena Vortaro

darfi = havi permeson

disipi = ma'ŝpare disŝuti

dura = malmola

lazareto = mi'ita hospitalo

limonado = trinkaĵo el citronosuko

nano = nenormale malgranda estaĵo

nocio = koncepto, e'emen'ta kono

pigra = maldiligenta, mallaborema

portalo = eks'eraĵo de butikoj

sakri = blasfemeti, ne intencante ofendi Dion

stupidita = malriĉa en spirito

villo = somerumdomo

RECENZO



Ciujn librojn, ricevitajn en du ekzempleroj, ni recenzas. Unuope ricevitajn librojn ni nur mencias. — La recenzoj esprimas nur la opinion de la recenzinto kaj ne tiun de la redakcio. Pro tio la redakcio tre volonte publikigas interesajn kontraŭopiniojn, koncernantajn ijn aperintajn recenzojn. — La libroj, ĉi tie menciataj kaj recenzataj, estas haveblaj ĉe la librofako de nia eldonejo.

PUBLIKA LETERO PRI LA REORGANIZADO. Memorando al la Esperantistaro kaj al ĝiaj gvidantoj, de JULIO BAGHY. Eldono de Hungarlanda E-Societo. 24 paĝoj. Prezo: unu poŝta respondkupono.

En tiu-ĉi Publika Letero nia senlaca pioniro Julio Baghy prezentas studindan projekton pri reorganizo de nia movado sur bazo demokratia. Konstatinte la truhavan strukturon de nia nuna organizo, kies ĉefaj eraroj troviĝas en manko de senpera decidrajto de la esp-ista »popolo« kaj en manko de sana bazo financa, Baghy proponas reorganizon laŭ jenaj principoj: 1) Kontribui al la Universalaj Kongresoj plej altan suverenecon en la movado tiel, ke la kongresoj fariĝas la vera leĝdona parlamento de nia movado, 2) Krei stabilan fiskan bazon por la movado en formo de oficiala esp-ista depago. Ĉi-ambaŭ principoj estas la primitivaj nekontesteblaj kondiĉoj de ĉiu racia politika organizo, el kiu sekvas aliaj gravaj avantaĝoj: 1) La senpera kontaktigo de la esp-istoj kun la movado per la oficiala depago, donanta la t. n. rajton de aktiveco (t. e. voĉdonrajton dum la elektoj de ofic. delegitoj al la parlamenta kongreso), 2) Solida financa fondo (kaj fonto), kies enspezoj — dank' al la oficiala depago — atingos laŭ Baghy la sumon de 241.000 ŝv. fr. en periodo trijara (se oni kalkulas la proksimuman nombron de aktivaj esp-istoj je 100.000).

La ĝeneralaj trajtoj de tiu projekto estas tiel klaraj kaj logikaj, ke ĉiu serioza samideano facile konsentos pri ili, eĉ se oni pri kelkaj aliaj detaloj havas malsaman opinion. Ekz. krom la oficialan depagon, kiu estu konscia devo por ĉiu aktiva esp-isto, Baghy ankoraŭ proponas starigon de monofera fondo, kiu imitus la roman Petrogroŝon. Nu la ideo pri monoferoj certe ne konformas al la nunaj konceptoj. Serioza universala movado, kiel la nia, ne povas ludi oficialan filantropion. La E-movado devas posedi sian fonton de normalaj enspezoj, kiujn sole povas garantii oficiala konscia depago, kompensanta la paganton per rajtoj de aktiveco.

Neniu serioza esp-isto, studanta la nunajn rilatojn en nia movado, pridubas la necescon de ĝia reorganizo. Se oni komparas la projekton de Baghy kun aliaj tiurilataj projektoj oni nepre konsentos, ke tiu de Baghy estas la sola ebla bazo por diskuti kaj efektiviĝi la reorganizon, kiun oni ĝenerale forte aspiras. Mi rekomendas do la tre interesan broŝuron de Baghy al la serioza atento de ĉiu aktiva samideano.

I. Lejzerowicz.

M. KIDOSAKI: ZAMENHOFA LEGOLIBRO (Eld. Japana Esperanto Instituto: 146 p.

Zamenhofaĵoj, pie kolektitaj kaj en la dua parto de la libro: legajoj pri Zamenhof. La tuta libro estas modela legolibro ĉu el ekstera, ĉu el interna vidpunkto; tamen sola riproĉo: eksterordinara riĉeco en preseroj.

F. Szilágyi.

NYCKEL TILL ESPERANTO (Slosilo de Esperanto). Laŭ la normoj de I. C. K. eldonita de Eldona Societo Esperanto, Stockholm. I. 9-a eldono, 100-a—120-a milo.

En malpli ol du jaroj vendinte 20,000 ŝlosilojn, la sveda eldonejo esperantista reeldonis ĝin en 20,000 ekz. La nova eldono estas tute novkompostita kaj presita per klišoj. La vortaro estas iom pliriĉigita. La nova ŝlosilo donas tre agrablan impreson pro sia klara preso kaj bona papero.

120,000 ŝlosiloj en la sveda lingvo, jen bona pruvo pri la multa laboro farita por nia afero.

NOVAJ REVUOJ. 1.) Scienca Gazeto Esperanta (Eld. Amerika Esp.-Instituto, Madison, Wis. USA) 2.) Revuo de etnografio, folkloro kaj turismo. (Eld. T. Kovács, Rákosszentmihály, Hungarujo.)

Abonprezo por la unua 1.—dolaro jare (6 n-roj) por la dua po ekzemplero 0.50 P. Haveblaj ambaŭ ĉe Literatura Mondo, specimeno por unu respondkupono.

Kun granda ĝojo mi tralegis la januar-februaran numeron de la nova, amerika revuo. La redaktoro bone elektis la artikolojn, kiuj estas sciencaj kaj samtempe interesaj ankaŭ por la laikuloj. Esperanto estas determinata por tiaj celoj, kiujn la nova gazeto servas. El la riĉa enhavo mi mencias la interesan geografian artikolon pri la insulo Paskuo de Sepulveda Cuadra, la popularan legaĵon pri la kaŭĉuko de Coleman, la artikolon de Rikov pri la antikvaj finnoj, la priskribon de la Kongodanco en Piratujo ktp.

Same bona estas la ideo de la due menciita revuo, kiu ankoraŭ nun estas nur litografita, sed espreble plenkreskos. La artikoloj estas interesaj. Speciale plaĉis al mi la freŝe verkita lirika priskribo de F. Rudolf. (En Svabujo.)

F. Szilágyi.

STENOGRAFA KONKURSO. Fluganta Skribilo anoncas stenografan konkurson per la sistemo Duployé Flageul. Interesiĝantoj skribu al Sro P. Flageul, 9. BD. Voltaire, Issy-les Moulineaux, Seine, Francujo.

KUO MIN UNIVERSITATO eldonis interesan flugfolion kontraŭ la japanoj. La kvarpaĝa flugfolio per interesaj faktoj klopodas pruvi la pravon de la ĉinoj kaj estas nova dokumento pri tio, kiamaniere oni povas uzi esperanton en internaciaj rilatoj. La flugfolion sendas al ĉiu senpage Kuo Min Universitato, Canton, Ĉinujo.

JOSEF ZAUNER: DER WEG ZUR EUROPA-PARTEI. (Der Ausweg USE.) 32 paĝoj. Prezo 0.12 dolaro. Eldonejo: Libro, Strada Lonovici 1. Timiŝoara-Temesvár, Rumanujo. Germanlingva broŝuro de la pioniro de la USE-ideo. Jen sekvas la programpunktoj de USE (Unuigintaj Statoj de Eŭropo): 1. Kreo de ju pli grandaj ekonomiaj teritorioj. 2. USE enhavu ankaŭ Britujon kaj Ruslandon. 3. Vasta aŭtonomio por la ŝtatoj, provincoj kaj urboj. 4. En USE unuecaj, do komunaj estas la mono, la armeo, la dogana kaj ekstera politikoj. 5. Por Eŭropo la oficiala lingvo estas Esperanto.

PROTOKOLARO PRI LA XI-A KONGRESO EN AMSTERDAMO 2—7 AUGUSTO 1931 DE SAT. (Eld. SAT, 23. Rue Boyer, Paris; 110 p.) Plena protokolaro de la XI-a SAT kongreso, kiun kompletigas la diversaj raportoj, laŭ kiuj estas konstatebla, ke la asocio laboras energiplene inter la malfacilaj cirkonstancoj kaj bataloj. La interesan portokolon povas ĉiu havigi al si por 0.50 sv. frankoj.

F. Szilágyi.

ELDONAĴOJ DE EKRELO. 1.) La krizo. Iom el la aktuala politiko. (24 p. Prezo: 0.15 GM.) 2.) H. M. Ĥrma: Ĉe abismo. Rakontoj. (46 p. Prezo: 0.45 GM.) 3.) V. Kuzmiĉ: Solidareco. Novelo. (66 p. Prezo: 0.90 GM.)

La unua kajero pritraktas la krizon de la kapitalismo

kaj komparas ĝin al la situacio de USSR. La malamaj atakoj kontraŭ la socialdemokratoj estas plene karakterizaj je tio, kiel disigeblaj estas homoj, kiuj ekiris de la sama punkto kun la sama celo.

La rakontoj de Ĥrma havas ian kaosan forton, pri kiu oni ne povas ankoraŭ aŭguri, ĉu la talento de la verkisto disfluos, aŭ koncentriĝos. La noveloj estas verve verkitaj, sed la energio, kiu kelkfoje imponas, estas ofte akvumita de primitiva sentimentaleco, naiveco.

El la tri libretoj la plej valora estas la »Solidareco«, kiu prirakontas sangan revolucian epizodon. La rakontmaniero de la aŭtoro plastike figuras la eksplodoplenan revolucian epokon kaj la romanticismaj trajtoj, kiujn la verkisto tute ne malhavas, ne malutilas al la novelo. La naiveco kaj la rafinitaj ekstremoj drame miksiĝas. La tuta sangoplena rakonto ne estus estinta verŝajna antaŭ dudek jaroj, sed nun ni jam prilernis ĉion kredi. La figuroj estas sovaĝaj, konkretigitaj el abstraktaĵoj, tamen vivplenaj — kelkloke eĉ tro.

F. Szilágyi.

LA PASOJ DE LA JARKVINO. (Kunmetis N. Potapěik. Eld. Centreldon, Ĥarkovo-Kievo, 112. p. Prezo: 0.60 dol.)

Pri la rusa sociordo oni povas diversmaniere opinii kaj disputi, sed neniu povas kontesti, ke tiu fortostreĉo, kiun la rusa laboristaro dum la lastaj jaroj produktis, estas impona kaj estiminda. Mem la kvinjara plano, la reguligo de la disemaj homaj agadoj, estas vasta ideo, kiun la ĝisnuna historio ne povis ekkapti kaj regi pro ĝia giganteco. La unua kvinjaro estis etapo de tiu ĉi kolosa provo kaj ne neante la ĝisnunajn rezultojn, ni devas tamen pendigi nian finkonkludon, ĝis pasas iom da tempo, kiu ebligos la perspektivan vidon de la afero. Sed la okazaĵoj havas tre interesajn detalojn kaj tiuj ne estas nur teknikaj fenomenoj, sed ankaŭ tre atentindaj psikologiaj aperaĵoj; ekz: kiel sorbiĝis la nova sistemo, la planado en la animon de la laboristo kaj laboristaro, kiel anstataŭas la kapitalisman konkuron la vetlaboro de la laboristaj grupoj, kio estas nun la instigilaro de la homaj energioj en Ruslando.

Jam kelkfoje mi havis okazon paroli pri rusaj libroj, sed ĝis nun mi povis konstati nur tion, ke la esperantistoj, aperintaj sub rusaj flugiloj, ĝenerale ne pruvus la estantecon de la vera literaturo. La verkoj ĝenerale diboĉas en ia furioza maltrankvilo, ili havas ian senharmonian trajton, kiu estas eble natura konsekvenco de la cirkonstancoj, akompanantaj ĉiun naskiĝon, sed ili ne efikas laŭ la sugesto de la aŭtoroj. La rusaj esperantlingvaj literaturajoj ĝenerale ne estas bonaj propagandverkoj, ĉar ili ne povas konvinki pro sia trostreĉita, senharmonia furiozeco. Ĉar ne forgesu: energio kaj furiozo ne estas la samaj. Sed la libro, kiun mi nun tralegis, la kolektitaj artikoloj pri la efektivigo de la kvinjara plano, estas escepto. En tiu ĉi libro preskaŭ ĉiu artikolo estas speciala literatura perlo. Speciala, tute ne ŝablona. Forta energio, sincera entuziasmo radiadas el la libro, senpera arto kaj harmonia ritmo eksonas en ĝi, himno al la Maŝino, al la nova idolo, kreita de la homo. La Maŝino, kvazaŭ ĉesas esti simbolo, konkretiĝas kaj aŭdigas celkonsciajn ordonojn. Sub la literoj sin kaŝas nova metafiziko.

En la febraj, mallongaj frazoj de la diversaj aŭtoroj flamas la sama vervo, sene, ke oni pensus la artikolojn nenaturaj, perfortaj. La motora forto antaŭenflugigas la leganton kaj la viva priskribo de la kreado sur la sovaĝaj teritorioj, kie nun industriaj fortikaĵoj defendas la interesojn, estas multe pli valora kaj konvinka produkto de la rusa-esperanta literaturo, ol la duone pasiaj, duone limonadaĵ, kutimaj literaturajoj.

La ekstera formo de la libro estas tute aĉa. Ĝi estas malpropagando de la rusa paperfabrikado.

F. Szilágyi.

'OOMOTO'

La plej granda utileco de Esperanto estas ke per ĝi ni povas ekkoni la vivon de malproksimaj popoloj, kies lingvoj estas tute malsamaj de la eŭropaj.

Ekonu pli profunde la kulturon de Japanujo, la lando de la Leviganta Suno! kaj la novan spiritan movadon OOMOTO!

Petu specimenon de la Esperanta, ĉiumonata revuo „OOMOTO“, kiu enhavas regule Japanan Kolonon kun interesege enhavo kaj belaj bildoj.

**OOMOTO — PROPAGANDA
OFICEJO KAMEOKA**

Kioto-hu Japanujo

ĈU VERE?

EN OKCIDENTO NENIO NOVA?

- SE** — vi volas esti plej bone informata pri la progreso de la Esperanto-movado en Ameriko,
- SE** — vi volas fariĝi sperta pri la plej modernaj reklam- kaj propagand-metodoj aplikataj en Ameriko, por prosperigi vian lokan movadon,
- SE** — vi volas pensflugi trans la obstinajn barojn por koni la verajn morojn kaj vivon de la homecaj Amerikanoj per Amerika Esperanto-Literaturo,
- SE** — vi volas ekzerci vian scion de la angla lingvo per paralelaj Esperanto-anglaj legaĵoj.

ABONU la plej viglan nacian Esperanto-gazeton

AMERIKA ESPERANTISTO

Jarabono 1. — dolaro
de

ESPERANTO-ASOCIO DE NORD-AMERIKO
Fort Lee, N. J., U. S. A.

Petu specimenan ekzempleron

ESPERANTO BEZONAS FAJREJON!

La fundamenta ideo de *Esperanto* devas havi sian propran domon, de kiu elsprucos ĉiudirekten la radioj de la nova Esperanto-kulturo.

La monata organo de la

UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO OOMOTO INTERNACIA

estas komisiita de S-ro Onisabro Degučĉi, Honora Prezidanto de U. H. A. por la konstruo en la centro de Eŭropo de la

DOMO DE HOMAMO

Ĝi kostus proksimume 25.000.000 da frankoj.

Kiel esprimo de Universala Homamo, la konstruaĵo estos aranĝita kaj administrata per Esperanto, kiu estos kompreneble la sola oficiala lingvo en la *Domo*.

La *Domo de Homamo* havos komunan preĝejon, internacian kunvenejon, bibliotekon, muzeon, teatron, loĝejojn por malpli riĉaj vizitantoj, ktp.

En la teritorio de la »Domo« estas farata nenia diferenco inter rasoj, koloroj, lingvoj kaj religioj. Ĉiuj sin sentos samrajtaj en agrabla atmosfero de internacia fratiĝo kaj plena neutraleco.

Petu informojn de la U. H. A. Mendu la 1/4-paĝan broŝuron pri la Domo de Homamo (prezo 0.30 sv. fr. aŭ unu internacia respond-kupono)

de S-ro Koogecu Niŝimura
1, rue Félix-Faure, Paris 15e.

Atentu, ĝeinstruistoj!

Multe oni diskutas en niaj pedagogiaj rondoj pri la rekta (senpera) metodo. Ĉiuj jam aprobis ĝin kiel la plej taŭgan instrumanieron. Por faciligi al la instruistaro la instruadon laŭ tiu ĉi metodo, ni eldonis novan libron prilaboritan laŭ originala sistemo kun metoda enkonduko.

Esperanto per Esperanto de Leono Vienano

La sistemon de tiu ĉi libro formas kvar jenaj postuloj pedagogiaj:

- 1.) eblo de instruado laŭ senpera metodo (t. e. ne uzante tradukan lingvon) konformigita al plenkreskuloj sen iuj ajn iloj aŭ specialaj ilustraĵoj helpe de *ordinaraj objektoj*, kiuj troviĝas en ĉiu preskaŭ ĉambro, *tono*, *simplaj movoj* kaj *gestoj*.
- 2.) por eviti la enuigan sistemon de apartaj frazoj ne interligitaj per iu komuna senco, troviĝas eĉ en la komencaj lecionoj facilegaj rakontoj, kies *primitiva* stilo respondas precize la gramatikajn kaj vortajn sciojn de la lernanto en koncerna leciono.

3.) en ĉiu rakonto troviĝas nur tiaj formoj gramatikaj, kiajn la lernanto jam ekkonis en la antaŭaj lecionoj.

4.) la gramatiko estas klarigata laŭ indukta metodo, t. e. el specialaj ĉapitroj gramatikaj la lernanto mem konkludas koncernajn regulojn.

Prezo 1.75 zl. aŭ 0.20 dolaro.
Por sendkostoj aldonu 10%.

Eldonejo N. Szapiro WARSZAWA, Nowolipki 8.
Prospektoj senpage.

La Literaturo en Jugoslavujo

— D-ro Ljuba Maraković* —

La skribkono en slavaj lingvoj sur teritorio de la hodiaŭa Jugoslavujo komenciĝis en la IX jarcento post kiam oni forpelis el Moravujo la disĉiplojn de la sanktaj Ĉirilo kaj Metodo. La disĉiploj — post la morto de Metodo — enmigris la sudajn slavajn landojn portante kun si la slavlingvajn librojn por la Diservo kaj ankaŭ la abocan konstruitan tiucele de la sankta Ĉirilo, kiam li kun la frato iris en Moravujon por organizi la slavan hierarĥion. Sed la literatura laboro, ĝerminta el tio, havis tute praktikan karakteron: estis tio ekleziaj libroj por la Diservo kaj la religiaj instigoj, hagiografioj kaj homiletikoj; krome diplomaciaj aktoj kaj leĝaroj, surskriboj kaj testamentaj dokumentoj; fine — etnombre — iom da »romanoj« kaj fabeloj kun plene mezepoka karaktero, same kiel ĉe la aliaj eŭropaj popoloj. La tiel nomata »bogumila« (novmoniheja) movado naskis iom pli fortan literaturon, sed ankaŭ tiu ĉi ne estis originala, nek aŭtoĥtona. Apenaŭ ĉe la fino de la XVI. jarcento aperis la trubadura renesanca nacilingva poezio en la apudmaraj dalmaciaj urboj, kiuj sub protekto de Venecio eltenis la turkan invadon konservinte tiel almenaŭ relativan liberecon. Samtempe ekfloris en tiuj ĉi urboj humanisma literaturo en la latina lingvo.

Marko Marulić el Split (1450—1524) la aŭtoro de la fama asketa verko: De institutione bene beateque vivendi, kiu — tradukita en ĉiujn tiamajn kulturlingvojn — havis multajn eldonojn, estas ankaŭ la poeto de la unua nacilingva eposa poemo en versoj: »Judita«. Estas superflue mencii, ke la instigoj por tiu ĉi renesancstila literaturo venis el la najbara Italujo, kien veturis la filoj de ĉiuj pli famaj dalmaciaj, precipe dubrovnikaj, familioj por studado aŭ por komercaj kaj diplomaciaj aferoj. La formo kaj enhavo de tiu ĉi lirika, eposa kaj drama poezioj plejparte estas neoriginala kaj pruntita, sed tamen estas videblaj postsignoj de la tiamna nacia poezio kaj kelkaj interesaj bildoj el la nacia vivo. Same en la bon-egaj komedioj de Marin Drjić (Dubrovnik 1520—1567) estas brile pentrita per fremdaj motivoj la impresa bildo de la tiamna vivmaniero en Dubrovnik (Ragusa). Al la plej granda genio de tiu ĉi epoko Ivan Fr. Gundulić (Dubrovnik 1588—1638) venis kuraĝa ideo verki romantikan eposon en kiu la romantikaj karakterizaĵoj kaj la literatura formo rememorigas al Torq. Tasso. Sed la motivo — la malvenko de la turka sultano Osman fare de la pola reĝido Vladislav ĉe Chotim kiel ankaŭ la revolucio en Konstantinoplo, tiu unua signo de pereco de la turka imperio — estas laŭtempa kaj originala. Aliflanke la ideo pri la »slaveco« kiel ankaŭ pri la antaŭbatalanto de la kristanismo kaj eŭropa civilizo estas unuafoje forte kaj klare akcentita. Gundulić riĉigis ankaŭ la dolĉe sentimentalan specon de la itala dramo »dramma pastorale« per sia verko »Dubravka«. En ĝi li glorigas la liberecon de la respubliko Dubrovnik kaj de sia gento entute tiamaniere, ke ĝi povis esti prezentita en la plej lasta tempo kiel festludo sub la »serena ĉielo« aŭ ĉe la plej solenaj okazoj en la teatro.

Sed la literaturo en moderna senco komenciĝas ĉe la kroatoj, serboj kaj slovenoj en la unuaj jardekoj de la XIX. jarcento sub influo de la romantikaj ideoj, fluktuantaj tra la kultura kaj politika vivo. Ljudevit Gaj (1809—1872) ĉe la kroatoj kaj Vuk Stefanović Karadžić (1787—1864) ĉe la serboj preskaŭ samtempe reformis la ortografion (ĉe la unuaj per la latinaj, ĉe la duaj per la cirilaj literoj) kaj starigis la modernan literaturan lingvon. Ĉar tiuj ĉi lingvoj estas efektive identaj kaj ĉar la granda trezoro de la belega popola eposa poezio estas komuna al la kroatoj kaj serboj, Gaj kaj liaj kamaradoj nomis sian movadon »ilira« por kunigi tiel ĉiujn sudajn slavojn en unu tuton. Al tiu movado komence alvenis ankaŭ multaj slovenoj, kies literatura lingvo estas aparta kaj diferenca de la kroato-serba. Tiel ili baldaŭ disiĝis, gviditaj de sia tiamna plej granda poeto Francet Prešern; la samon faris ankaŭ la serboj kreinte sian propran literaturan vivon. La nomo »ilira« malaperis.

En la romantikisma epoko la plej grandaj kroataj poetoj estas Ivan Majuranić (1814—1890) kiu en sia eposo »La morto de Smailaga Čungijić« kunigis naivecon de la popola poezio kun la profundeco de la klasika kulturo kaj ankaŭ kun la raveco de la romantikaj ideoj. Tion ĉi li sintezigis por priskribi epizodon el bataloj inter la montenegroj kaj turka tiraneco. Lin apudstaras ankaŭ Petar Preradović »refleksiva« poeto kun profundaj religie filozofiaj ideoj. Samtempe ĉe la serboj la montenegro princo Petar Petrović Njegoš (1813—1851) glorigis la karakterizajn ecojn de la montenegrana vivo en la verko plena de neordinara beleco kaj skribita en la dram-eposa formo, subtitole »La monta girlando«.

»Smail-aga« de Majuranić kaj »La monta girlando« de Njegoš estas tradukitaj en plurajn eŭropajn lingvojn.

La romantikismo kreis ĉe la serboj tre fortajn lirikaĵojn poetojn: Gjuro Jaksić, Jovan Jovanović Zmaj, kaj Laza Kostić; ĉe la slovenoj la plej eminentan lirikiston Francet Prešern kaj proziston: Fran Levstik; ĉe la kroatoj la unuan romanverkiston, tre fruktodonan kaj impresan Aŭgust Senoa, kies historia romano »La trezoro de la orajisto« estas tradukita en multajn lingvojn, ankaŭ en Esperanton.

Post tiu tempo pli kaj pli evoluas la romano, en kiu oni pritraktas ĉiuflanke la problemojn de la tuta nacia vivo. Ksaver Šandor Gjalski kaj Vjenceslav Novak estas la plej fruktodonaj verkistoj sur tiu ĉi kumpo. La unua pentras la karakterizajn sociajn kaj politikajn ŝanĝojn en la nacia vivo de la XIX. jarcento, la dua enprofundiĝas krome ankaŭ en la psikologiaj problemoj. Aparte distingiĝas Fran Majuranić, la verkisto de la belegaj poemoj en prozo, titolitaj: »Foliaro«.

Ĉe la serboj Laza K. Lazarević en malgrandaj noveloj kaj rakontoj majstre prezentis la vivon de la »eturbanoj« kaj Janko Veselinović tiun de la vilaĝanoj (en Serbujo).

La komenco de la XX. jarcento alportis novajn pli fortajn artajn postulojn, kaŭzantajn levigon de la liter-

* Speciale por la »Literatura Mondo.«

La Poŝveturilo

— VOJISLAV IČIĆ pli juna —

Granda kaj fortega poŝta veturilo
Ruliĝas tra polvo dum plena sunbrulo.
Troveĝas interne sur la lignaj benkoj
Nur tri vilaĝanoj kaj mi — la migrulo.

La rondo rubena de l' sun' subiĝanta
Lumigas arbaron ĉe la voj' mistere.
Dum *Rtanj* majesta, kun pinto abrupta
Jetante ombregon vidiĝas surtere.

Ni tiel atendas alvenon vesperan,
Dum kamparon regas paŝtista alvoko.
Subite poŝtisto la vorton misteran
Ekkriis: »Atentu, jen *Krivi Vir* loko!«

»Ekrigardu supren, domo sur la monto
Loko de ilia kaŝa amkunveno...
Estintecon sian tie ŝi sen honto
Forgesigis tute en la plenmalbeno...»

La homoj sidintaj ĝis nun tute mute
Ekbabilis tiam pri fremda vivsorto
Per malvarma tono, strange kaj senĝene
Tuj kiam finiĝis poŝtista rakonto.

Plue, vidu, supre — klara ŝtonfonte'eto
El ĝi *Timok* kuras kvazaŭ forĵetita,
Jen vilaĝtombejo — supre sur monte'eto
En kiu ŝi kuŝas nune mortigita...»

Dum diskutis tiel pri mia doloro
Propra kaj grandega sensentaj fremduloj,
Dolore rigardis kun sanganta koro
Mi vilaĝon tiun per ploraj okuloj...

»Ĉu vi ploras?« diris ili surprizeme.
»Ĉu pri via eble temas familio?«
Kaj mi tuj respondis animkonsternite:
»Jes, ĝi estis mia.« kun dolora krio...

Kaj tuj ĉesis tuta stranga parolado.
Dolora nun iĝis rigardo ilia.
Nur aŭdiĝis klare veturilbruado
Tra la densa polvo — kaj plorado mia.

El la serba: *Mato Dugaŝjić*.

atura nivelo. Ĝiaj dimensio kaj interna kvalito grave pligrandiĝis. *Ivo Vojnovič* kreas la modernan impresionisman dramon, kiu tre influis la evoluon de la teatra arto seninterrompe ĝis la plej eminenta nuntempa dramverkisto *Miroslav Krleža*. La lasta en senco de la ekstremaj sociaj ideoj donas per siaj nekutime fortaj dramoj la socian analizon de la proksima pasinteco. *Borislav Stanekovič* ĉe la serboj («Malpura sango») kaj *M. Nehajev* ĉe la kroatoj («La forkuro») donas la plej bonajn romanojn. Ĉe la slovenoj *Ivan Cankar*, rakontisto kun lirika moleco kaj intima profundeeco, estas tradukita en plurajn lingvojn.

Sur la lirika kampo konkuras la kroatoj *D. Domjanič* kaj *V. Nazor*, la serboj *M. Rakič* kaj *Jovan Dučić*, la slovenoj *Antono Askere*, *S. Gregorčič*, *D. Kette*. Murn *Aleksandrov* kaj *Oton Jupančič*. *V. Nazor* estas krome la verkisto de la belega besta eposo »La urso Brundo«, de la mitologia »La anaso orflugila« kaj de multaj poetaj rakontoj, simbolo konceptitaj. Lastakampe konkuras kun li *Ivana Brlić-Majuranič*, la delikata poetino de la »Rakontoj el antikvo«, kiuj ĝis nun estas tradukitaj en anglan,

rusan, danan, svedan, germanan (manuskripte ankaŭ en la esperantan) lingvojn.

Dum la romantikismo elmontradiis en la romanoj plejparte la folkloran kaj dekoran elementojn kaj la realismo realajn sociajn kaj ekonomiajn problemojn, la nuna literaturo, disvolvante la lingvon kaj stilon ĝis plena matureco, prezentas karakterizan koloron de la pejzaĝoj kaj ilian psikologian atmosferon, pli substrekante la plastikajn kaj pitoreskajn elementojn (*Veljko Petrovič*, *Ivo Andrič*, *Dinko Simunovič* kaj multaj aliaj).

La lirika poezio, plej parte socia, entenas multajn eminentajn nomojn, sed ĝi ne trovis ankoraŭ sian definitivan novan esprimformon.

Per la granda evoluo de la teatra mimika kaj dekora artoj, kiujn antaŭgvidas la nacia teatro en Zagreb, krome de la skulpta kaj pentra artoj (en la skulpta arto la kroato *Ivan Mestrovich* en la arkitekturo la sloveno *Plečnik* — mondfamaj geniuloj) atingantaj la plej altajn celojn, ankaŭ la literaturo sendube elstarigos ĉiam pli kaj pli fortajn talentojn kaj trovos siajn proprajn vojojn.

Tradukis: *Ivo Lapenna*.

El la „Foliaro“

— Fran Majuraniĉ —

LA PAGO.

Spirite mi vidas la dezertan, mizeran straton de la laborista antaŭurbo.

Rigardu malgrasajn vizaĝojn de ĝiaj loĝantoj, vidu tiujn suferajn laboristojn kun enkavigitaj, lacaj okuloj, vidu tiujn etajn infanojn kiel ili surstrate — en la frotŝiritaj vestaĵoj — ludas — kaj vi ne imagos esti en Parizo.

Kompreneble, ne estas tio luksema kaj orgia Parizo sed la malsata laborista antaŭurbo.

Rigardu pormomente la infanojn kiel ili gaje ludas ĉirpante kaj saltante kvazaŭ paseretoj. — Nu, la pasereto estas ja »gamin« inter la birdoj!

Tiuj infanetoj ankoraŭ ne sentas, ankaŭ ne konjektas, mizeron ilin atendantan. Ho kiom feliĉaj!

La patrino rigardas ilin el la fenestro lulante la infaneton surbrake — ankaŭ ŝi feliĉas, almenaŭ dum momento!

Jen, kiel aminda estas tiu malgranda petola bubaco, kiu starante meze de la strato manĵetas kisojn al la etulino!

— Subite bruo de kaleŝo — ĉevaloj flugas — ili timsovaĝiĝis!

La veturigisto insultegas, la patrino jam terurkriis — jen la infano staras meze de l' strato kvazaŭ ŝtono. Jam perdita!

Tiumomente alsaltas viro al la infano kaj ĵetas ĝin flanken. Ĉevalo puŝas la viron, li falas, la rado transveturas la brakon. Ĝi estas rompita.

La najbaroj alkure amasiĝis. La patrino ĉirkaŭrigardas la infanon — ĝi senvunda!

Sed la savinto?

Nur mizera laboristo; li iras en la malsanejon.

Laboristoj lin kompatas. »Sed por kio la manoj?« — ridetas li amare — »jam tutan semajnon mi estas senlabora — de hieraŭ ankaŭ senmanĝa«.

... En la romanoj tio finiĝas ĉiam pli feliĉe. La savita infano estas aŭ tiu de grafo aŭ almenaŭ perdita filo de la riĉulo, kies ĉevaloj timsovaĝiĝis. La savinton oni prizorgas por la tuta vivo.

Sed en la vivo? Per kio pagu la malriĉulino, malsatanta mem por satigi la infanojn? — Si dankas nur per la ploro.

Ankaŭ la larmoj estas pago...

EN LA TAGO DE L' DUBO

Mi estis en Vieno, kiam Hackler murdis sian patrinon — por ŝin prirabi. Nur tri guldenojn li trovis.

La kadavron li kaŝis sub sian liton, per la forrabita mono li sin regalas kaj dormis sur tiu lito — sub kiu kuŝis la murdita patrino.

»Dio, ho Dio! Rabobesto ne farus tion — kaj vi, ho sankta Dio...«

»Sed ĉu ekzistas Dio?« Flustris al mi io. Mi ekdubis...

Dio estas — onidire — ĉioscia kaj ĉiopova.

Do Dio sciis, kiam la patrino koncipis kaj naskis

tiun, pendigindan, friponon, kiel li ŝin rekompencos. Kaj kial lin la Ĉioscia kreis? Kial ja la Ĉiopova enblovis al la hieno tian animon?

Dio do sciis, kiam li enblovis tiun animon, ke tiu homo estos pendigita — do, li devis fini la vivon sur la pendigilo!

»Devis?« Kontraŭstaras io en mi — »Dio ja donis al la homo liberan volon!«

Liberan volon? — Sed kiel akordiĝas tiu ĉi »libera volo« kun la dia »ĉioscio«?

La Ĉioscia antaŭsciis ĉiun lian penson, ĉiun lian faron — kaj ĉu li povis liberiĝi de tio, kion Dio antaŭsciis kiel okazontan?

Kaj kia estas tiu ĉi »libera volo«? — Tiukaze ankaŭ la streĉita horloĝo pro la »libera volo« batas la horojn!

Kaj ĉu iu, en tiu ĉi aŭ la alia mondo, estas respondeca pri tio — ke la Ĉiopova ne enblovis al li pli bonan animon?

Ĉu estas eble, ke iu venu en la eternajn turmentojn, ĉar li estis devigita naskiĝi por fariĝi krimulo kaj esti pendigita?

Ne, tio ne estas ebla! Tial mi ne kredas, ke ĉi mondo estas la komenco de nia spirita vivo. Mi ne kredas ankaŭ, ke ĉi tie nia spirita vivo finiĝas.

Eble tiu ĉi nia vivo estas ia pli malpli granda rekompenco aŭ puno — kaj la kaŭzo en tiu ĉi transira stato estas nekonata.

Kiu scias de kie ni estas kaj — kien ni iras?

Ho eterna kaj dieca mistero, kie kaj kiam vi klariĝos?

Lunbrilo

— Dragutin Domjaniĉ —

Songtrankvilo.	Ondoj spitas,
La lunbrilo —	Barko glitas
Sorĉa ŝpinfaden':	Kun argenta tren',
Tra tremoloj —	L' alnoj muĝas,
Ortavoloj	Ĝi rifuĝas...
Por la revpromen'.	Kial vi, ĉagren'?
Ĉe l' kratagaj	Iam varma
Dornoj sagaj	Rozo ĉarma
Laktas flora ŝut',	Si nun — ve, memor',
Bril' argentas	Bild' etera,
Kaj vin tentas	Efemera,
Al vilaĝa mut'.	Kuras vi jam for?
Kaj ĉe l' monto	Junko spiras,
Pina fronto —	Al ŝi tiras
Nigra la angul'.	La sopira sven'...
Jen barketo	Songtrankvilo.
En impeto	La lunbrilo —
Pro ondeta lul'.	Sorĉa mortfaden'...

El la kroata: I. Rotkviĉ.

HEJME.

Ho mia antikva urbo, kiom mi amas vin! Per via temposto, per via maro kaj per viaj ŝtonoj vi alkreskis al mia koro! — Sub ĉiu ŝtono kuŝas kara rememoro — plej karaj miaj rememoroj kuŝas ja sub la ŝtonoj!

Vi estas mia unua amo.

Mi amas vin — jen kial vi estas al mi tiom kara! Mi amas vin — jen kial mi dolĉtrankvilas en via sino.

Kiam mi elremas sur la maron, kiam mi promenas tra la kampoj, kiam mi sidigas antaŭ la domo — trudigas al mi petolaj bildoj el mia infanaĝo.

La bildoj min ĉirkaŭsaltas, krias, turnodancas kaj ridetas — ĝis kiam ankaŭ mi aliĝas al la danĉrondo — malrapide, malrapide! Dekutimiĝis mi de la rondo, petolo kaj felio...

Dimanĉo. La popolo iras en la preĝejon. Antaŭe areto de petolaj, pure vestitaj infanetoj.

Kiel konataj ili ŝajnas al mi!

Kvazaŭ ni estus kune ludintaj hieraŭ!

El ĉiuj mi estis la plej obstina...

Tiu malgranda friponeto estas certe de Petro. Tiu malgranda, fiera pavino estas verŝajne de Milka.

La infanoj scivole rigardas min kaj sin demandas: Kiu mi estas? Gepatroj min rekonas, demandas pri mia farto kaj miras, ke mi estas tiom alta kaj — kvieta. Jes ja, oni malsovaĝigis min!

Mi sidigas. Al mi rampas infaneto, ĝuste kvarpiede. Ĝi povus jam paŝi, sed rampado ŝajnas al ĝi pli oportuna. Ĝi alridetas min!

Mia Dio, ĝi — kies rido? Ankaŭ la nigrajn, ĝojajn okulojn mi jam ie vidis. Kies do la infano? Nu, mi demandas!

»— Etulo, kiel oni vin nomas?«

»— Panjo min jojas.«

»— Do, kiel panjo nomas vin?«

»— Venu ĉi tien.«

Ho, kiel mi volus ĝin kisi!

Kial tiu ĉi idilio ne povas eterne daŭri?

JUNAJ KAVALIROJ.

El la laŭbo aŭdiĝas rido kaj bojado de hundoj. Junaj kavaliroj matenmanĝis kaj nun ŝercas, ridas, batalstimulas du junajn dogojn unu kontraŭ la alian: en la mezon ili ĵetas oston kaj la hundoj batalas por ĝi... Mallertaj estas la hundoj. La junaj kavaliroj krevas pro rido...

La knabeto, proksimume kvarjara, alpremis sin al la enirejo de la laŭbo kaj per maltrankvilaj okuloj ilin rigardas... Nudpieda, pala, ŝirvestita li estas kaj per malsataj okuloj li glutas la restaĵojn de mangajo sur la tablo.

... Kelnero alportas pelvon da nutraĵo kaj metas ĝin antaŭ la hundojn. Ili amike manĝas. La infano avida rigardas ilin. Li enias la hundojn.

Marry rimarkis la knabeton. — »Nu, nu etulo, ĉu vi ne kunhelpus manĝi?«

La etulo kapklinis, ke jes.

La infaneto tremas kaj alpaŝas pli proksimen. Li klinas sin kaj etendas la malgrandan travideblan maneton en la pelvon. La hundoj murmuris.

»Ili mordos lin«, diris Freddy.

»Kvindek guldenojn, ke ne!« aldiris Aleksandro.

»Akceptite!« konsentis la unua kaj Carry batgeste konfirmis.

Blank-Krajna Balado

— OTON JUPANCIC —

Grakas sur la blanka neĝ'
nigra korvo voje;
vojaĝanto sur montet'
iras plormalĝoje.

»Korvo nigra, tra l' kampar'
nur ne krii brue!
Morton, morton vokas vi,
venus ĝi tro frue!

Kiu irus al preĝej'
ja en vestparado;
kiu harmonikon ja
ludus dum paŝtado?«

Sed nur kriis nigra korv',
viro rapidiris.
»Jen por fil' la sola sav'!
kuracisto diris.

Krias, krias nigra korv' —
hejmo proksimiĝas.
Dank' al Dio! Sed, ho ve,
kio jen moviĝas?

Kaj ekkrias plore nun
viro, esper-manka.
Vidu, tie el la hejm'
iras morto blanka.

El la slovena: *Franjo Modrijan.*

La etulo denove mankaptas en la pelvon...

Aleksandro esperas gajni la veton. Ankaŭ Freddy esperas... kaj kun kia naiva streĉiteco observas tiun ĉi ŝercon la noblaj, junaj kavaliroj!

Nu, ne riproĉu ilin! Freddy certe donacos al la knabeto kion li vetgajnos... Ha, kiel bonkoraj estas tiuj noblaj, junaj kavaliroj!

LA TRANKVILA LUDANTO.

Plej ofte la homoj gajnante en la ludo ridas kaj primokas la aliajn — sed malgajnante ili koleras.

Absolute trankvilan ludanton mi ankoraŭ ne vidis, sed pri iu rakontis al mi la onklo jenon:

»Mi rigardis kiel oni ludis ĉe ruledo. Precipe min interesis unu ludanto. Kun la plej granda flegmo li gajnadis aŭ malgajnadis grandegajn sumojn.

Fine komencis lin persekuti la malfelicio. Ĉiu ludkarto, sur kiun li metis monon, malgajnis. Dekkvar fojojn laŭvice li metis sur la »rouge« kaj dekkvar fojojn aperis la »noir«.

Kun la plej granda trankvilo li pagas siajn malgajnojn per la maldekstra mano. La dekstran li tenas sub la jako.

Kiam li malgajnis eĉ la lastan moneron, li leviĝis senzorge kaj paŝinte al mi, li rigardis kiel la aliaj ludas — sed la dekstra mano estis ankoraŭ ĉiam subjake.

Sinjoro, mi diris al li — mi tre miras pri via trankvilo. Kiel vi povas ĉe tia malgajno esti tiel flegma?

— Flegma?! diris la ludanto malbutonumante la jakon — jen rigardu ĉi tien kaj vi vidos kiel!

— El la brusto fluis sango. Ungojn de la dekstra mano li enpikis en la bruston kvazaŭ ungegojn de akcipitro!

El la kroata: *Dada Novačić.*

El la „Ex Ponto“

— Ivo Andrić —

Ofte mi sidas dum horoj kaj rigardas la malvarmajn kolorojn de l' aŭtuno. La trankvilo de la sorto, ne plu ŝangebla, glaciigas en mia animo kaj vizaĝo.

En mi ĉio mortinta; bone tiel.

Ne atingas min sono, mortis vidpovo de la okuloj. Ĉio restis post la pordego, kiu obtuze jetfermiĝis post mi. Mi perdis ĉion kaj mi ne plu estas la homo, sed la maltrankvila, sendorma penso, kiu dronis kaj kaŝtrankvilas sur la malproksima fundo... Kaj super mi kvazaŭ netravedblaj verdaj amasoj de akvoj: paco, malproksimo kaj forgeso.

Jam du tagojn oni ne elkondukas min eĉ al tiu unu nura horo da promenado, ĉar senĉese pluvetas.

Ŝajnas al mi, ke senhalte enfluas la ĉelon humido faladante sur la vizaĝon kaj manojn kiel gluema fundŝlimo. Mia kovrilo estas kruda kaj senvarma, la mangajo havas guston de la lada vazo kaj la ĉelo tiun nepriskribeblan haladzon de la mallarĝa spaco, en kiu unu homo spiras kaj vivas, senŝanĝe kaj sen aerumado.

Sed ĉi tie post miaj palpebroj — se mi fermetas la okulojn — vivas la tuta grandiozeco de l' vivo kaj la tuta beleco de l' mondo. Ĉio, kio nur iam tuŝis okulojn, lipojn kaj manojn miajn, ĉio estas en la konscio vivanta kaj brila sur la malluma fono de tiu ĉi sufero. Riĉeco kaj beleco de l' vivo vivas nedetruible en mi.

Kaj nun, kiam ĉio perdita, mian animon plenigas senluma dankemo pro ĉiuj multspecaj kaj admirindaj donacoj, kiujn la vivo donas al la pli feliĉaj ol mi.

De kie nur tiu ĉi stranga sento?

Tra ĝi mi pasas kvazaŭ tra la malhele verda paco kaj odora muteco de la pinarbaro en la somera tago. Kaj mi forgesas ĉion ĉirkaŭ mi.

Kiun nun amas tiu juna virino? Tiu juna virino, kiun mi trovis iun someron bela kaj matura en aĝo de dekseks jaroj, pasas — Dio scias kial — ĉimatene tra miaj sentoj.

Kiun nun amas tiu juna virino?

Iam mi trovis sur la rusa ebena ruĝan kaj ampleksan floron: ĝia suka kaliko — etflora — proponadis en la larĝe dismetitaj petaloj siajn superkreskintajn florpistilojn al ĉiuj ventoj.

Kiun nun amas tiu juna virino?

Neniam inter ni spiniĝis vortoj (mi ja malfacile komprenadis sian lingvon) kaj nia interrilato neniam havis difinitan nomon. Sub la steloj mi amis ŝin ĝis laciĝo kaj ĝis la noktomezo mi kuŝadis en herbo, la kapon en ŝia sino.

Estis ŝi virino kreita por la amo kaj ŝi sindonadis mute pro pasio kaj larmokule, flustrante rompitaĵajn vortojn pri fideleco.

Kiun nun amas tiu juna virino?

Ho estontaj! Infanoj liberaj, matenruĝo de nia nokto! Kiam liberaj kaj altaj domoj viaj siluetos eĉ la sama ĉielo, kiu rigardis nian suferon, honton kaj morton, neniu pensos ke tiuj potencaj fundamentoj ripozas sur

niaj ostoj. La feliĉo estas ja senzorga kaj pensas nur pri la estonteco.

Kio rememorigos al vi la patrojn, pli grandajn en suferado ol en la vivbataloj?

Via vivo estos nia forgeso.

Nur en senkonscia larmo de viaj virinoj, en entuziasmo de la junuloj, revoj de l' knabinoj, nokta muziko aŭ vortoj de viaj poetoj, ekbrilos eble nur pormomente rememoro pri viaj patroj, kies vivo estis mallonga, sed la doloro grandega. Nur la plej bonaj el vi eksentos, eble, ke el la ĉiutagaj okazaĵoj vipas, kvazaŭ vento, la senfina ĉagreno de l' mortintaj kaj mutaj vivoj, vivintaj kaj mortintaj por vi, ho estontaj!

Malbonaj pensoj kaj nigraj antaŭsentoj de la melankoliulo havas sian teruran precizecon, kiel ajn ili ŝajnu al la sana homo absurdaj kaj neprecizaj.

La melankoliuloj estas kvazaŭ tremolo, tremanta eĉ tiam, kiam aliaj arboj ne sentas bloveton. Kiel la aktoro, starante ankoraŭ post kuliso, jetas sian ombbron sur la scenejon tiel aperas okazantaĵoj en la sonĝoj kaj antaŭsentoj de la melankoliulo.

Ĉe la sana homo la centro de l' pensado estas la vivo kaj ĝiaj demandoj, sed eĉ melankoliuloj: la morto kaj ĝiaj misteroj. Ili suferas pro hipertrofio de la animo. Ili estas kvazaŭ nuda limako jetita de la petolaj infanoj en dornaron. Kuntiriĝas la limako kaj konvulsias, sed kien ajn ĝi sin movas, pikiĝas ĝi sur la dornon. La melankoliuloj estas viva disonanco de tiu ĉi batalema kaj kruda planedo.

En nenio tiel evidentiĝas la absurdeco de la hodiaŭa socio, kiel kiam temas pri pano kaj virino.

Kaj ĝuste tio, ke en la demandoj aranĝantaj tiujn du fundamentajn kondiĉojn la homa vivteno regas tia malordo kaj maljusteco, estas pruvo ke la socio ne kuraceble malsanas.

Ho Dio, scianta ĉion kio okazas, ne helpas al mi kaŝi, ke venas momentoj, kiam mi parolas kun Vi per la malpura lingvo de tiu ĉi tero. Mi parolas jene:

Ho Dio, kial vi donis al mi la koron tirantan senĉese al la malproksimo kaj beleco de la neviditaj regionoj? Kial Vi faris, ke mia feliĉo estas ĉiam tie, kie mi forestas?

Por kio al mi tiu ĉi terura donaco: amo al luksemo, ĝuo kaj ŝanĝo? Por kio la eterna flamo de l' sangigema koro? Por kio entuziasmoj pentoplenaj kaj sin vengontaj?

Ho Dio, kial la tuta penado de eterne soifa kaj eterne konscia: mi?

Diru al mi, kie ekzistas la amo?! Diru al mi, kien mi kuru for de la malbono, diru kien mi rifugu for de la malamo?!

Kvazaŭ girdando el flamo jen ĉirkaŭ mi la malamo; ĉu ekzistas loko por la animo super la steloj? Ĉu ekzistas luma momento de ripozo? Ĉu ekzistas alta pura loko, kien ne atingas la teruro de l' tero?

Mi kompatas la homon.

El la kroata: *Jean d' Agrève.*

* Ex ponto = el malliberejo.

D u m a

Fragmento el la poemo

— OTON JUPANČIČ —

Kanton mi aŭdis, ĝi estis vira voĉ',
kiu sonis kiel respond' al voĉo virina;
tremoj mi sentis de l' kor en kanta reson'.

Kanto de viro, respond' al kanto ina:

Meze de kampoj la kanton sonigas vi pri verdaj,
vento, branĉoj kaj herbo, kanton pri l' sun' sur herbejo,
kanton pri ondo kuranta kaj ondo sen mov',
pri arĝentita kaj orumita ondej' —
pri rivereto kaj pri grenkamp'.

«Kiel rubando kunligas vilaĝojn la kampa strat';
inter tegmentoj leviĝas la preĝej',
vivo de hom' sub si observe vidas ĝi,
tempo, laboron al li dividas ĝi.
Domoj, fenestroj nur estas malgrandaj, d'iant' de l' fenestroj
verde dependas sur muroj, ruĝe ŝaŭmanta
akvofal' en la sun' —
signo al preterpasantaj junuloj dum tag',
signo sekreta por nokt' —
kantas vi: tukojn kolorajn nur ŝatas via okul',
sanajn, brunajn vangojn, ridon el buŝo brilanta,
gestojn mallertajn kaj embarasitajn de l' hom' sur kampar';
plaĉas al viaj oreloj abruptaj malbenoj,
forta komparo — estus dukato por vi.

Meze de kampoj la kanton sonigas vi pri verdaj,
ĝojninvitante:

«Kverkoj gigantaj jen staras post kampoj, kun ventoj
luktante,
sonĝoj centjaraj balancas la suprojn en bru' malproksima,
ĉiuprintempa kreskaj' aŭskultas sekretojn pasintajn;
sed en fremdlando vi vivas kun peza anim'
rozo kun rozoj mi estas; sed intermiksita —
preterirante, el ili ne reekonus vi min!»

Meze de kampoj la kanton sonigas vi pri verdaj,
vokas, invitas
min al kamparo.

Jen fiero mia levas sin' kante nun,
kaj respondas al via kant', vin ne timante nun.
Kontraŭkantas mi mian kanton de la urb',
kanton pri domo ĉe domo kaj paŝoj del' hom' rapidanta,
brakoj, ritme levantaj ŝtonojn kaj trunkojn sur strat',
pri la trajn', trairanta la mondon laŭ takt',
pri riverego, portanta kun ĝojo ŝarĝaĵojn,
pri fadenoj, irantaj de nordo al sudo,
de okcidento al oriento zumante.
(Ĉe la stang' telegrafa ofte mi haltas:
kantas senĉese, sen mov', kuriero, servon farante,

ĝi murmurante mallaŭte kondukas sciigojn antaŭen —
same la kor' de poeto prikantas liajn ideojn —
forrapidantajn per tempo elektra el kap'.)


Ĉu ie estas sufoka fremdland'?

Kiel ĉe mi vidis patrinon maldormi ĉe la lulil',
palpe serĉadis infanoj la lakton de la mam';
viroj batalis akre por sia viv',
fortaj, rigidaj,
kaj por la amo; sola nur estis mi;
pelis la sang' al batal'
kaj pasi';
teron mi vidis, teranon sur propra bieno,
kara al li, kiel nia bien' al ni;
mi rigardadis teron — kaj bela ĝi estis
kaj same aminda kiel nia ter';
domon mi vidis ĉe strato, eniris mi ĝin vojaĝanto —
vino kaj pano jen estis kaj vorto amika,
eĉ pli plaĉa ol vino kaj pano,
En la ondeg' de urbo mi estis ond',
forte sonis pulsado de mia kor',
milobligite, potence en la takt';
vivo eniris, la novan, anim' kamparana,
kor' laciĝinta eksentis la flamon je nova kred'.
Fruitojn mi vidis: jen kvazaŭ testudoj rampus sub haŭte
sed pro pensad' tiel disŝoviĝis ĝi nur;
vangojn mi vidis: kun sulkoj por sem' de la estontec';
servis la manoj al la maŝin',
sed dum vespero ekbrilis la frunto fulgonigra
kaj okulo rigardis pejzaĝojn en brila rond',
revis maltime, revis pri estontec',
sekvis la gestojn vivajn de orator',
al la estonta ĝi kredis generaci'...

El Manĉurio venis batala kri',
ĝis al Parizo ehis centoble ĝi.
Vidis skulptilon mi de la skulptist': kun am'
kise ĝi tuŝis blankaĵojn de la marmor',
formon modelis facile el kruda rok',
vivo timeme ekspiris en la skulptaĵ'.
Kaj la pensulo: nur leĝojn skribadis li,
ne al teranoj — nur astrojn observis li,
malharmonion li trovis en univers',
jen novan mondon postulis la kalkulad',
«Estu!» li diris — malkovris la mondon la nokt'...

Vejnoj de l' vivo kunvenas tie ĉi,
vojoj el mond' kruciĝas jen tie ĉi,
mi ilin amas, la urbojn kun brua vigleco,
vojojn al la libereco kaj al la estonteco.

En la sloveni: Fran Modrijan.



Ni vivas kiel la kolomboj

— Julio Baghy —

Rolantoj:

ZAZA KORK, la edzino....

HUGO KORK, ŝia edzo....

MAKS NIKS, la »ma'nova«....

La INFANO rolas ne ĉiam mute, tamen statiste.

Tempo: hieraŭ aŭ morgaŭ, nur ne hodiaŭ.

Loko: kie ajn, nur ne en la urbo, kie oni prezentas la komedion.

Scenejo: ĉambro kun sofo kaj infanveturilo, kun du pordoj kaj kun ceteraj bagatelaĵoj, nepre necesaj por la kolomba kunvivado.

Unua sceno

ZAZA kaj KORK.

HUGO *serpentumadas sur la planko, purigas la pargeton per broso kaj viŝtuko, ŝvitas, sed silentas. Ĉe lia orelo malbonodoras estingita cigaredo. Sur liaj piedoj koketas riĉe broditaj pantofloj*): Terrurre! Tiu ĉi aĉa terebintodoro tiel tikle tordas... tiel tikle tordas mian na-na-na- (Terno.) -zon!... De kie vi prenis la ideon, ke ni frotadu la pargeton per terebinto?

ZAZA *kuŝas sur la sofo, en la dekstra mano tenas libron kaj legas. Ŝia maldekstra mano ripozas sur la infanveturilo. Ŝiajn kisindajn orelojn kovras radio-aŭdiloj*): Ho, belega, mirinde belega!

HUGO: Kio? Ĉu la libro, ĉu la radio-programo aŭ la pargeto?

ZAZA: Pri kio vi parolas, Hugo kara?

HUGO (*iom pli laŭte*): Mi demandis, kio estas belega?

ZAZA: Ĉio kune! La dolĉa melodio de la orienta muziko akcelas la plenan iluzion pri »Panĉa-tantra«... Ho, la kulturo, la kulturo, Hugo!

HUGO (*post ioma pripensado*): Ĉu panĉatantra? En mia infanaĝo oni nomis tian muzikon ĉindarassabumbumbum... Hja, la tempoj alternas.

ZAZA (*iom altigante la tonon*): Pri kio vi ĉindarassas?

HUGO: Nu, pri tiu ĵazbando, kiun vi aŭskultas.

ZAZA (*martirmiene*): »Pan-ĉa-tantra«, Hugo kara, »Panĉa-tantra«! Vere, vi havas tre malvastan horizonton.

HUGO: Kiel tiu panĉadrata aŭ panĉadrassa koncernas mian horizonton?

ZAZA: Hugo kara, vi devus multe legi. Finfine miaj amikoj kompatos min pro vi.

HUGO (*tute milde*): Ĉu vi bonvolus diri al mi, kiu purigas la pargeton per tiu ĉi putorodora terebinto, se ankaŭ mi legos kaj aŭskultos la panĉadrasson de la radio-programo?

ZAZA (*ironie*): Mi devas informi vin, ke la »Panĉatantra« havas nenian interrilaton al la Radio. La »Panĉatantra« ne estas muziko, Hugo kara, sed ĝi estas libro, mondfama libro, perlo de la hinda literaturo. Tiu libro, kiun nun mi legas. Jen!

HUGO (*infane ekridas*): Mi pensis ĝin fokstroto. Kial vi ne diris tuj, kio ĝi estas?

ZAZA: Feliĉe, ke neniu el miaj amikinoj ĉeestis. Prezentu al vi la honton! Kion ŝi estus pensinta pri vi kaj recipe pri mi, kiu ligis sin al tia viro, kiu ne konas eĉ la titolojn de la mondliteraturaj klasikajoj!

HUGO: Vere, granda malfeliĉo.

ZAZA (*temperamente*): Ĉu? Jen la danko! Ĉu tion mi meritis?

HUGO: -Miskompreno!!! Mi diris, vere, granda malfeliĉo, ke mi ne konas la titolojn de la klasikajoj.

ZAZA (*dorloteme*): Sed vi povus koni ilin, Hugo kara. Nu, ne malesperu! Mi instruos vin. Mi faros iun el vi. Aŭskultu! »Panĉa-tantra« signifas libro-kvino kaj ĝi estas tiel konata verko en oriento, kiel la Biblio...

HUGO (*tute naïve*): Kvino... Kvino... Kion signifas »Kvino«?

ZAZA: Kvin libroj. Hugo kara, kvin libroj. Ĉu vi komprenas?

HUGO: Interese! Kvin libroj kaj nur unu mi vidas en via mano.

ZAZA: Sed en tiu ĉi unu estas kvin libroj. La kvin libroj kune formas la verkon »Panĉa-tantra«.

HUGO (*kun sincera ĝojo*): Jen, jen, vidu! Mi estas prava. Kvin libroj kune povas esti nur »literatura ĵazbando«.

ZAZA (*incitite rigardas lin, poste ŝi turnas sin for de li*): Verdire, vi jam estus povinta fini tiun brosadon. Ĉu dum la tuta posttagmezo vi volas fari nur tion? Iomete vi povus dividi kun mi la hejmaĵajn zorgojn. Vi scias ja, ke mi estas elĉerpita. Antaŭ monatoj la akuŝo, poste la zorgoj pri la infano. Vi scias ja, ke mi vivas nur por nia bebo kaj por vi kaj tiu malbenita kontoro... Ĉiutage kvar horojn en la kontoro kaj poste duonhoron skuigi en la elektra vagono. Ĉu vi pensas, ke miaj nervoj estas el ferŝnuro? Mirinde, ke mi ankoraŭ vivas...

HUGO (*senvarte brosadis, momente haltas en la laboro, prenas la cigaredon aŭde rigardas ĝin, prenas alumeton, time palpebrumas al la edzino, profunde ekĝemas kaj remetas la cigaredon al la orelo, la alumeton en la poŝon*): Nu, poste en la kuirejo.

ZAZA (*subite ekkubutas*): Hugo, ĉu vi iam aŭdis pri la Fratoj Karamazov?

HUGO: Ne! Neniam!

ZAZA (*insiste*): Ĉu vi konas Onklinon Betty?

HUGO: Ĉu vi pensas pri la edzino de la vickortisto? Mi konas ŝin. Kial?

ZAZA (*post longa rigardo ekploras*): Dio, Dio, kiel malfeliĉa mi estas!

HUGO (*embarasite rigardas ŝin, poste levigas*): Kial vi ploras? Mi ne komprenas... Vere, mi ne imagis pri vi, ke vi supozas tian aferon pri mia... tian... tian... kaj kun nia vickortistino... Ah!

ZAZA (*incitite*): Hugo, Hugo kara! Ni parolas pri libroj, pri mondfamaj libroj.

HUGO: Nu, bone, sed kian rilaton havas nia vickortistino al la mondfamaj libroj?

ZAZA (*aplombe*): Ĉar »Onklinino Betty« estas mondfama verko.

HUGO: Ĉu? (*ridante*) Hehehe! La edzino de nia vickortisto estas mondfama verko. Pardonu, kara, sed mi ne sciis tion.

ZAZA: Ne pri la vickortistino temas, sed pri la mondfama verko de Balzac. Ĝia titolo estas Onklinino Betty. Nu! Kaj mi oferis mian junan vivon por tia viro... por tia viro (*ŝi ekploras*). Ho, mi malfeliĉa! Ho, kiom da intelektuloj estis ravitaj kaj inspiritaj de mi kaj nun vi... nun...

HUGO (*pardonpete*): Sed, Zaza kara, ne ekcitiĝu! Mi ja faris nenion por... (*Li klinas sin por leŝi ŝin*).

ZAZA: Pfiŭ! Kia tabakodoro! Denove vi fumis. Vi volas veneni la aeron kaj poste vi miro, ke nia bebo ne grasiĝas laŭ la normo de la samaĝaj infanoj.

HUGO (*senkulpigante sin*): Nur duoncigaredon... ne en la ĉambro, sed en la kuirejo... jam antaŭ ol vi venis...

ZAZA: Ho, tiu fumado via forprenas la duonon de mia vivo. Mi ŝparas, mi metas moneron al monero, mi ne elspezas, kvankam nun mi havas rajton, ĉar mi estas ja edzino, eĉ panakiranta edzino, mi

- laborgajnas la trioblon de via salajro kaj tamen...
Jes, vi forfumas la tutan monon de la familio.
- HUGO: Ĉiusemajne nur paketo da plej ordinara tabako...
- ZAZA: Ne protestu! Vi scias, ke la kuracisto malpermesis al mi multe paroli kaj ekscitiĝi. Vi scias ja, ke mia koro...
- (*LA INFANO energie kaj plenpulme esploras en la veturilo.*)
- HUGO: La bebo ploras.
- ZAZA: Mi aŭdas. Nu, jen, en tia animstato mi nutru mian feliĉon! Vi scias ja, se la infano ricevas ekscititan lakton, la rezulto estas ventrodoloro kaj...
- HUGO: Kaj pli da vindtukoj. Mi scias. Sed, Zaza kara, ne ekscitiĝu, mi faris nenion malbonan. Hodiaŭ vi havas kaprican humoron.
- ZAZA (*iom movas la veturilon, la INFANO eksilentas*): Vere, en tia stato mi ne povas riski la sanon de la bebo. Venu, kaj dormigu la infanon!
- HUGO (*obceme*): Jes... sed la pargeto...
- ZAZA: Nu, lasu tiun pargeton! Cetere la terebinto malbone efikas je miaj nervoj.
- HUGO: Vi diris, kara, ke per terebinto mi...
- ZAZA: Jes, mi diris, sed mi ne diris, ke vi faru tiam, kiam mi estas hejme. Vi ne havas takton! Vi malŝparas la tempon per fumado en la kuirejo. Hugo, Hugo, vi ne meritas mian delikatan virinan sinoferon!
- HUGO (*embarasite gratas sian verdon, poste elkaŭras por daŭrigi la brosadon.*)
(*Paŭzo. Hugo serpentumadas sur la pargeto. Zaza flankenpuŝas la libron, demetas la radio-aŭdilojn kaj kaŭre eksidas sur la sofo. Si rigardas antaŭ si, poste al Hugo. Sia mieno serenigas.*)
- ZAZA: Ho, Hugo, vi ne povas taksi min laŭvalore!
- HUGO: Ĉu mi?... Vi eraras. Mi bone komprenas vin.
- ZAZA: Ni povus vivi kiel la kolomboj, ĉiam kverante, ĉiam kisante, sed vi...
- HUGO: Mi ja volis kisi vin, sed vidante, ke vi havas malbonan humoron mia kuraĝo forvaporigis. Mi volis kisi vin, sed...
- ZAZA: Sed ne ĝustatempe. Jen, vi ne havas takton por senti la ĝustan momenton. Ekzemple nun... nun, kiam mi vidas vin serpentumadi sur la planko kaj mi vidas, ke vi tiel sindoneme zorgas pri mia nesto, nun mi estas kortuŝita kaj... kaj...
- HUGO (*luktas kontraŭ la terno*): Malbenita terebinto! Te-te-te- (*li ternas*) terure ĝi tiklas la nazon.
- ZAZA (*kun rezigna patoso*): Mi parolas pri turtovivo kaj li ternas.
- HUGO (*pardonpete*): Sed, kara, vi ja devus kompreni, ke tiu ĉi terebintodoro... Nu, ne estu kaprica! Cetere oni ankoraŭ ne enkondukis la terebinton en la idiliajn aferojn. (*Li leviĝas kaj ame proksimiĝas al Zaza*) Verdire mi ne scias, de kie vi prenis la ideon pri la terebinto. Ĉu ĝi...
- ZAZA: Lasu la terebinton! (*Si rigardas lin kaj ridetas*) Vere estas amuze! Ĉu sen viŝtuko kaj broso vi ne povas kisadi? Vidu, ne mi, sed vi volas enkonduki la terebinton en la... en la... (*Sia rigardo trafas la pantoflojn de Hugo. Sia voĉo tuj esprimas konsterniĝon*) Hugo! Hugo, la novaj pantofloj!! Nur tiel vi taksas mian kristnaskan donacon, ke vi uzas ĝin dum plankopurigado. Ĉu? Broditajn pantoflojn, kies prezo superas tiun de mia nova ĉapelo, vi taksas nur tiel. Ĉu?
- HUGO (*humile*): La malnovaj jam taŭgas por nenio. Ili estas plenaj de truoj. Cetere mi ne deziras akiri nazkataron, precipe en la nuna epidemia sezono. Diru al mi, por kio oni bezonas pantoflojn, se ne por la hejma uzado?
- ZAZA: Hugo, Hugo, mankas el vi eĉ tiu minimuma romantikeco, kiu nepre estas necesa por fari la vivon tolerabla. Nek takton, nek fantazion vi havas. Kion, kion, do kion havas vi?!
- (*Paŭzeto. Hugo pente rigardas antaŭ sin, ŝtete okulumas al Zaza, poste demetinte la pantoflojn ekiras por daŭrigi la brosadon*)
- ZAZA (*en tiu ĉi momento laŭte esploras.*)
- HUGO (*iom surprizite*): Kio denove?
- ZAZA: Nenio kaj ĉiam la sama. Vane mi komencas paroli al vi, neniam vi respondas. Vi neglektas min. Jen ankaŭ nun, kiam mi estas kortuŝita de via boneco kaj mi dezirus montri al vi mian zorgemon pri vi, vi turnas vin for de mi kaj vi ofendas min.
- HUGO: Ĉuuuu? Per kio?
- ZAZA: Jen, vi demetis la pantoflojn por altrudi la respondecon al mi pri via nazkataro.
- HUGO: Tute ne, kara! Sed finfine kion fari?
- ZAZA: Ĉu ĉiam mi devas instrui vin kion fari? Anstataŭ grumbli...
- HUGO: Mi ja ne grumblas.
- ZAZA: Anstataŭ grumbli vi devus veni al mi kaj enprofundiĝi en mian animon, diveni miajn sentojn, iom karesadi la harojn, doni pozicion al la ĉiutaga prozo. Jes! Anstataŭ silenti dum la pargetbrosado vi devus diri tiajn frazojn, kiuj plibeligas tiun ordinaran laboron kaj vekus en mi tiun koran varmon, en kiu la komuna vivo fariĝas ridoplena, iluzia kaj kolomba.
- HUGO: Mi ne estas poeto kaj mi kuraĝus veti, ke ne ekzistas tia poeto, kiun inspirus la terebintodoro kaj la pargetbrosado. Kion diri? La pargeto brilas kiel viaj okuloj, aŭ viaj okuloj brilas kiel la pargeto. Ĉu? Kaj pri la terebinto... Kion pri la terebinto?
- ZAZA: Ne moku! Jes, ekzistas frazoj en la amanta koro, inspirita de la terebinto kaj brosadu. Ekzemple, jen, rigardu »edzinet«, mia hejmo estos dometo de gekolomboj; ĉu vi sentas, ke mi faras ĉion por vi, nur por vi! Kaj tiel plu... Ne parolu! Mi konas viajn respondojn! Certe vi dirus, ke la gekolomboj ne havas pargetitan plankon kaj la virkolombo faras tute alian aferon por plaĉi al sia parulino. Sed kial vi ne faras? Kial? Ĉar vi estas dormema urso, Hugo kara, kiu ne konas kaj ne volas koni la misterojn de la virina animo.
- HUGO (*milde ridetante rigardas al Zaza*): Ĉu vi deziras, ke mi kisu vin?
- ZAZA: Kial vi demandas? Vi devus profiti mian kortuŝitecon.
- HUGO (*senbrue metas la broson sur la plankon kaj kun sincera bonkora amo proksimiĝas al Zaza*): Mi pensis, ke vi havas malbonan humoron. Vi scias ja, ke mi tre... tre...
- (*Ekstera sonorigado*) Iu sonorigis... Kaj ĝuste nun! Diable!
- ZAZA: Nu, rigardu, kiu?
- HUGO (*ekiras al la kuireja pordo*): Kaj ĝuste nun!... Certe iu el viaj amikoj.
- ZAZA: Atendu momenton! Prenu viajn pantoflojn, kaŝu la viŝilon kaj la broson en la kuirejo. Nu rapidu! Ne! Atendu momenton! Donu la kolonjan akvon! Ĝi estas en la dormoĉambro sur la noktoŝranko.
- HUGO (*kuras en la dormoĉambro, tuj revenas kun la ŝpruceboteleto, metas ĝin sur la tablon, prenas la broson kaj viŝilon*): Kaj ĝuste nun! (*Ekstera sonorigo plilonga*) Tuj! Tuj! (*Ekiras al la kuireja pordo*)
- ZAZA (*salte leviĝas, ordigas siajn harojn kaj veston*): Rapidu, sed retenu la vizitanton por momento. Tiu ĉi terura terebinto...
- HUGO (*forirante*): Mi diris ja al vi, sed vi ne volis kredi. (*Li foriras*)
- ZAZA (*rapide agas. Si ŝprucas kolonjan akvon en la aeron, malvolvas la tapiŝon kaj rulmetas ĝin sur la plankon, sidigas al la veturilo kaj kun patrina pozo klinas sin super la Infano.*)
(*Paralele okazas: sonorigado kaj la suba ekstera dialogo*)
- HUGO: Tuj, tuj!... Bonvolu!

La edzino de agao Hassan

Popolbalado

Kio blankas sur la monto verda?
Ĉu ĝi estas neĝo do, aŭ cignoj?
Se ĝi estus neĝ' jam ĝi degelus,
Ekflugintaj estus jam la cignoj.
Ĝi ne estas neĝo kaj ne cignoj,
Sed la tendo de agao Hassan.

Li malsanas de pezegaj vundoj,
Lin patrino kaj fratin' vizitas.
La edzino pro la hont' ne povis.

Kiam liaj vundoj jam mildiĝis,
Li sciigas al edzin' fidela:
»Ne atendu min en la kastelo,
Nek kastele plu, nek ĉe la miaj!«

Kompreninte vortojn sinjorino
Dronas, dronas en ĉi pens' mizera,
Ĉevalheno sonis ĉe l' kastelo.
Kaj ekkuris againo Hassan
Por sin ĵeti tra l' kastelfenestro.
Post ŝi kuras ŝiaj du filinoj.
»Panjo, panjo, ho revenu, kara,
Ja ne patro, la agao Hassan,
Onklo venis, bejo Pintoroviĉ!
Kaj revenis againo Hassan
Kaj ĉe l' ko'lo onklon ĉirkaŭprenas:
»Jes, ho frato, granda estas honto,
De kvin idoj ke li min forpelas.«

Bej' silentas, li nenion diras,
Sole prenas el la poŝo silka
Kaj prezentas skribon de disiĝo,
Ke ŝi prenu sian doton tutan
Kaj reiru kun li al patrino.

Kompreninte tion sinjorino,
Al du filoj ŝi la frunton kisis,
Rozajn vangojn de la du filinoj,
Kaj de l' filo ĉarma en lulilo
Sin disigi ŝi neniel povis.
Sed la onklo prenis ŝin ĉe l' mano,
De l' fileto pene ŝin disigis
Kaj ŝin metas al si sur ĉevalon
Kun ŝi migras al la blanka hejmo.

Ĉe la siaj ŝi mallonge restis,
Mallongtempe, eĉ ne dum semajno,
Sinjorino bona kaj bongenta,
Sinjorinon bonan multaj svatas,
La kadio de Imocki pleje.

Sinjorino petas sian fraton:
»Mi petegas vin, ho kara frato,

Al neniuj ja min edzinigu,
Ke ne krevu mia kor' mizera,
Rigardante georfetojn miajn.

Sed neniom ŝin la bej' aŭskultis,
Donas ŝin al Imocki-kadio.
Plue petis sinjorin' la fraton,
Ke li skribu la leteron blankan,
Senda ĝin al Imocki-kadio:
»Vin salutas bele sinjorino,
Kaj vin bele en letero petas,
Kolektinte nuptovirojn, portu
Longan ŝalon al la sinjorino,
Ke ŝi preter domo de l' agao
Ne ekvidu georfetojn siajn.

Al kadio venis la letero,
Li kolektis tuj la nuptovirojn,
Ili iras al la sinjorino.

Bone venis la edziĝfestantoj,
Bone kun la sinjorin' revenis.

Preterire ĉe l' aga-kastelo
Du filinoj tra fenestr' rigardis,
Kaj du filoj antaŭ ŝin elvenis
Kaj parolis al patrino sia:
»Ho revenu al ni, panjo kara,
Por ke al vi ni tagmanĝon donu!«

Gin aŭdante againo Hassan,
Al la estro edziĝfesta diris:
Frat' laŭ Dio, estro edziĝfesta,
La ĉevalojn ĉe l' kastel' haltigu,
L' orfojn etajn ke mi pridonacu.

Kun ĉevaloj ili apudhaltis,
Ŝi la idojn pridonacis bele;
Siajn filinojn per tranĉil' orita,
La filinojn per tolaĵo longa,
Al fileto ĉarma en lulilo
Ŝi en tuko sendis vestajetojn.
Gin rigardas la agao Hassan
Kaj du filinojn siajn li alvokas:
»Idoj miaj, tien ĉi alvenu,
Se vin etajn kompatindajn orfojn
Ne kompatas la patrin' ŝtonkora!«

Gin aŭdante againo Hassan
Sin al tero ĵetis blankvizage,
Tuj disigis de animo sia
Pro l' aflikto, rigardante orfojn.

En la serba: *Fran Janjić.*

MAKS: Pardonon pro la ĝeno!... Ĉu sinjorino Kork estas hejme?

HUGO: Jes, jes... bonvolu enpaŝi!... Demetu la palton! Jes, tien!

MAKS: Nenecese. Por kelkaj momentoj mi venis.

HUGO: Nu, tamen... tamen... Jes, tien. Tiu pendilo estas por la gastoj.

(Li malfermas la pordon kaj ŝovas sian kapon) Ĉu permesate?... Zaza, iu sinjoro... Bonvolu, sinjoro! (Li malfermas la pordon kaj ĝentile montras la eniron)

ZAZA (rekonas la voĉon de la vizitanto dum la dialogo. Ŝi paliĝas kaj apenaŭ povas kaŝi sian ekscitiĝon. En la momento, kiam Maks paŝas en la ĉambron ŝi profundo klinas sin al la infano): Mia bebo, mia vivo, mia trezoro... Nu, ridetu!... Panjo lulos vin, panjo kantos al vi.

Dua sceno

ZAZA, HUGO kaj MAKS

MAKS (enpaŝas. Li estas tipo de la elegante vestitaj artistoj. Liaj movoj kaj gestoj montras lin temperamenta kaj lia parolmaniero estas senĝena kun nuanco de konstanta ironio. Li havas edzan ringon): Respektplenan saluton, sinjorina moŝto! (Li ne proponas manon, nek mankasas.)

ZAZA (por kaŝi sian embarason tro ĝoje akceptas lin): Ah, vi, la perdita ŝafido! Kia agrabla surprizo!!

MAKS: Ĉuuu?... Nu, egale! Preterpasante la domon mi mi ne povis kontraŭstari al la deziro viziti vin, sinjorina moŝto. Espereble vi fartas bone? Ĉu ne?

ZAZA (kun pliiganta embaraso): Jes... jes... Oni diris, ke longdaŭre vi forestis el la lando. Ĉu?... Ek-sidu!... Hugo, seĝon!

MAKS: Dankon, ne longe mi restos... Oni atendas min en la Ekspozicia Komitato.

(kun ironia flato): Sinjorino, vi aspektas belega.

Je mia honora vorto, vi plibeligiĝis. Nu, jes, kompreneble! (Li rigardas la veturilon) Jes, jes...

Kiu estus pensinta, ke tiel baldaŭ vi fariĝos patrineto? (Longe li rigardas al la okuloj de Zaza) Nu, tamen ne tre surprize! (Ironie) Kiu havas edzon, tiu povas havi eĉ infanon. Estas tute laŭregule.

ZAZA (kun altrudita rideto): Jes, jes... kaj mia bebo estas tre bela.

MAKS: Mi ne dubas pri tio. (Li paŝas al la veturilo por rigardi la infanon) Vere, via bebo estas ĉarina, tre ĉarma. Ĉu knabo aŭ knabino?

HUGO: Knabino, eta kokcinelo, nia anĝeleta.

MAKS (kvazaŭ neglektante la ĉeeston de la edzo, ironie ridetas al la infano): Strange, vere tre strange! Kia okulfrapa simileco! La bebo mirinde simiĝas al sia patro.

HUGO (modeste): Mi estas la patro.

MAKS (turnas sin al li. Rideto. Pardonpeto, sed pika tono kies akreco celas trafi la virinon): Pardonon! Mi eraris. La bebo ne similas al la patro. (Paŭzeto. Okulludo inter Maks kaj Zaza) Do, sinjoro, vi estas la edzo. Ĉu?... Mi pardononjn, sed via kostumo...

ZAZA (senkulpige): Hugo estas tiel modesta. Ofte mi riproĉas lin pro lia vestmaniero. La vizitantoj kelkfoje povas erari.

MAKS (prezentas sian manon al Hugo): Maks Niks, pentroartisto.

HUGO (ĝojmiene): Ah, do ankaŭ vi laboras kun terebinto... Mi tre ĝojas. Mi estas Hugo Kork, oficisto ĉe la Stata Saladadministracio.

MAKS: Populara oficejo en nia lando, eĉ tro populara por esti serioze konsiderebla.

HUGO (gaje): Jes, jes! Kiam oni volas ĝentile esprimi la »iru al la diablo«-n, oni sendas la plendanton al la saloficejo. La plej supra instanco de la

nenifarebleco estas la saloficejo. Sed kion fari? La homoj ŝatas ŝercadi.

MAKS: Espereble via edzina moŝto ekzilis tiun frazon el sia hejmo. Ĉu?

ZAZA (flute proksimiĝas al Hugo kaj ĉirkaŭprenas lin): Ni vivas kiel la kolomboj. Ĉu ne, Hugo? De mateno ĝis vespero ni kveras kaj...

HUGO (ridante): kaj kverelas.

ZAZA (kun troa vigleco): Hugo estas tre ŝercema. Li estas la plej bona homo en la mondo. Li estas tiel mola, kiel la butero.

MAKS: Mi ne dubas pri tio. Unuavide oni povas konstati tion. (Post ĉirkaŭrigardo) Ĉarman hejmon vi havas, sinjorino. Guste tion, pri kia vi ĉiam revadis. (Li ekzamenas per fingro la kovrilon de la sofo)

Belega speco, de likata materialo.

HUGO: Donaco de ŝia ĉefo okaze de nia geedziĝo.

MAKS (kun malica rideto rigardas ŝin): Ĉuuu?... Ĉie regas delikata gusto. Ekzemple, tiu moderna lustro, tiu moderna lustro...

HUGO: Donaco de la edzino de ŝia ĉefo okaze de nia geedziĝo.

MAKS: Admirinda donaco. Ĝi absolute konvenas al via kolombejo. Nu, kaj tiu granda staranta horloĝo... Ĝi certe havas sonorilludon. Ĉu?

HUGO: Ne, sed tamen ĝi batas la horkvaronojn kaj la horojn. Cetero ĝi estas donaco de fratino de la ĉefo okaze de nia geedziĝo.

MAKS (kun troa entuziasmo): La koroj en tiu familio estas el oro, el pura oro.

ZAZA (nerve): Hugo kara, mi petas vin, bonvolu porti la infanon en la alian ĉambron. Vi scias ja... Eble la bebo...

HUGO (servoprete): Jes, jes!... Pardonu, sinjoro, sed la patra devo vokas min. (Li paŝas al la veturilo. Dume unu el liaj pantofloj falas) Nu, etulino, ni ekiru! Paĉjo rigardos vin, paĉjo donos al vi puran... Jes, Zaza, ĉu la infanpudro...?

ZAZA (tute nerve): Sur la noktoŝranko. Sed iru! Eble la bebo jam suferas.

HUGO (al la infano): Sed paĉjo ne lasos sin longe suferi... Paĉjo rigardos sian trezoron... Zaza, Zaza! Rigardu, kiel ĉarme ŝi ridetas al mi!

MAKS (rimarkas la falintan pantoflon kaj l-vas ĝin): Sinjoro, via pantoflo... Ĉu ankaŭ ĝi estas donaco de la bonkora famlio de la ĉefo?

HUGO (ridetante): Ho, kiel vi povas pensi tion! Ĝi estas donaco de mia edzino.

MAKS: Okaze de via geedziĝo. Simbolo de la kolomba vivo.

HUGO (surmetas la pantoflon): Bela paro, ĉu ne? Bedaŭrinde ĝi estas iom vasta kaj malhelpas min en la irado.

MAKS: Mi ne dubas pri tio.

ZAZA (tute perdinte la paciencon): Hugo, la bebo certe suferas.

HUGO: Tuj, tuj! (Dum foriro) Mia bebo ne suferos longe. Paĉjo donos al ŝi puran vindon, freŝan vindon kaj puff! per la pudrumo kaj... Nu, Zaza, rigardu kiel ŝi ridetas al la paĉjo! (Li kun la veturilo foriras en la dormoĉambron.)

Tria sceno

ZAZA, MAKS kaj kelkfoje ĝenas ilin HUGO

ZAZA (atentas la fermon de la pordo. Post malapero de Hugo ŝi proksimiĝas al Maks. Ŝia miĉeno respegulas sindefendon): Kial vi venis? Kiel vi kuragiĝis veni al mi?

MAKS (trankvile): Ah, kia akra tono! Verdire mi ne scias, ĉu ĝi estas oficiala konsterniĝo de jun-edzino aŭ spontanea helpkrio de freŝe bakita virto.

ZAZA (pli akre, pli nerve): Ni ne ludu kun vortoj! Diru tuj, kial vi venis?

MAKS (*ridetante*): Mi ja diris, ke preterpasante la domon mi ne povis kontraŭstari al la deziro...

ZAZA (*senpacience*): Kial vi venis? Mi volas scii. Ĉiu via vorto pikas min.

MAKS: Mi ne dubas pri tio.

ZAZA: Ĉu vi venis nur por ofendi min?

MAKS: Ĉi ja scias, ke...

ZAZA: Ne ciadu!

MAKS (*ironie*): Pardonu, sinjorina moŝto! Mi forgesis, ke ni ne estas plu unu por la alia la samaj kiel antaŭe... Do vi scivolas pri la celo de mia surpriza vizito. Ĉu? Nu, la celo estas simpla societa konvenaĵo. Mi venis por respektplene inviti vin kaj vian edzon al la morgaŭna malfermo de la Printempa Ekspozicio en la Moderna Galerio.

ZAZA: Ne mensogu! Mi sentas kaj mi legas alian celon el viaj okuloj.

MAKS (*kun ironia trankvilo*): Tute ne estas ĝentile esti tiel nekredema. (*Li prenas sian poŝpaperujon kaj scrĉas en ĝi*) Permesu, ke mi transdonu honoran bileton por vi ambaŭ!... Nu, kie?... Ah, jen! Bonvolu! (*Li proponas prezentas la invitilon*)

ZAZA (*ne etendas la manon al ĝi*): Por mi vi vane penadis. Min ne interesas la Moderna Galerio.

MAKS (*emfaze*): Eble vin ne interesas nun, sed poste... Ankaŭ mi ekspozicio mian novan pentraĵon.

ZAZA: Ĉerte vi havos sukceson kiel ĉiam.

MAKS (*malice r.d.tante*): Mi esperas... Ne sole sukceson mi esperas, sed ion pli, ion sensacie konsternan, ion eksterordinaran.

ZAZA: Ne vidinte la bildon, permesu tamen, ke mi gratulu!

MAKS: Sinjorino, ne dece gratuli al si mem.

ZAZA (*mire*): Mi ne komprenas vin.

MAKS (*trankvile*): Nu, la eksterordinara kaj konsterna sukceso apartenos ne nur al mi, sed ĉefe al vi, sinjorina moŝto.

ZAZA (*maltrankvile*): Pri kio vi aludas? Kian rilaton mi povas havi al via sukceso?

MAKS: Kian rilaton? Kiel mi esprimu por ne esti miskomprenata? Nu, sinjorina moŝto, vi bonvo'is esti mia inspiranta muzo... jes, muzo, sinjorina moŝto... Ne, ne! Mi eraris en la esprimo. Ne muzo, nur modelo, nur simpla modelo, sed...

ZAZA (*kun larĝe malfermitaj okuloj rigard' s lin*): Parolu klare! Mi ne komprenas vin, sed mi sentas, ke vi teksis reton por mi.

MAKS: Ĉu reton? Ne! Verdire mi konspiris iomete kun mia muzo, sed... vi ja diris, ke ne interesas vin la tuta afero. Eble nun ne, sed morgaŭ tiom pli!

ZAZA (*postule*): Parolu klare! Mi volas scii ĉion! Mi ne scias, kion vi preparis por mi, sed mi sentas, ke malamiko transpaŝis mian sojlon. Vengemo kondukis vin al mi.

MAKS: Ne uzu bombastajn vortojn! Simple, mi venis por kvitigi mian konton.

ZAZA: Ni ne ŝuldas unu al alia. Ni likvidis nian aferon per la forbruligado de niaj leteroj. Vi ne havas plu rajton enmiksiĝi en mian vivon. Mi havas edzon.

MAKS (*impertinente*): Ĉu ankaŭ tia estas edzo? Pardonon! Mi deziris diri: ankaŭ tia estas edzo.

ZAZA: Ne insultu lin! Li faris nenion malbonan al vi.

MAKS: Vi estas prava. Maljusta mi estis. Li estas tiel fidema, tiel honesta, tiel humila, kiel... kiel povas esti nur senpina oficisto de la Ŝtata Sal-administrejo.

ZAZA: Ne ĉiu povas esti — pentroartisto.

MAKS: Tute trafe! Eĉ nun ni estas tro multaj. (*Momenta paŭzo. Maks kun malica rido observas la baraktadon de Zaza. De ekstere sonas obtuze la voĉo de Hugo, parolanta al la infano: »Tuj, tuj, mia bebo!... Paĉjo ordigos ĉion.«*)

ZAZA: Nu?!... Por kio vi atendas?... Mi pensas, ke estus plej prudente, se nun vi forirus. Mi senkulpigos vin ĉe mia edzo.

SUKO

— JOVAN DUČIĆ —

En la larĝa ombro de l' palmventumilo
Kušas bela Naksis. Super Nil, tagmezas.
Hirundaroj ĉirpas. En la arda brilo
Tra l' aero silko flugas kaj karesas.

Nil'antikva, verda, laca, sufokspira,
Pasas for malvigle. Fajran polvon lulas
Super urb' malnova la tagmez' trankvila.
Pro l' pasi' volupta, juna, ĉio brulas.

Dum tagmez' pasia de l' somero mita
Naksis duonnuda nun pri Izos revas.
Foje tuŝas branĉojn ŝi, volupt-ekscita:
Jen, tra l' tuta bosko ruĝaj floroj krevas.

El la serba: K. Kalocsay.

MAKS (*cinike ekridas*): Bonege! Ĉu vi opinias, ke estis facile por mi veni ĉi tien? Mi povas aserti, ke ne estis facile... Permesu, ke mi eksidu en via, en via *kolombejo!* (*Li eksidas*)

ZAZA: Kion vi volas de mi?

MAKS: De vi — nenion. Absolute nenion. Mi venis por retranskiviligi, mi venis por trovi mian animan ekvilibron (*Li perdas sian ironian tonon.*) En la vivo estas okazaĵoj, kiujn oni ne povas forgesi. Ili konstante incitas nian fantazion, maltrankviligas nin kaj ili kreas en ni internan devigon por fari ion, jes, por fari ion, eble ion bagatelan, eble ion skandalan. Se ni ne obeas al tiu ĉi interna tiranismo, ĝi detruas nian tutan vivon... Nu, tia aŭ simila sento devigis min viziti vin. Mi venis por pagi.

ZAZA (*time rigardas lin*): Ĉu por pagi? Sed por kio?

MAKS (*anare*): Por kio? Por la multjaraj suferoj, por la iluzioj, ĵetitaj en la koton, por mia detruita kredo pri la Bono, por la larmoj de mia edzino, kiu martire turmentigis dum jaroj pro vi, pro tia... tia...

HUGO (*rapide envenas, kaŝas post sia dorso la malpurajn vindaĵojn*): Tuj, etulino! Tuj revenos la paĉjo!... Pardonu, la bebo...

MAKS: Ne ĝenu vin! Ankaŭ mi estas patro.

HUGO (*kun videbla ĝojo*): Ĉu? Nu, mi vere ĝojas... Mi jam pensis, ke vi estas... Sed pardonu, ia bebo... (*Li forrapidas en la kuirejon*)

ZAZA (*timotreme*): Freneze!... Kion vi volas fari?

MAKS (*malice*): Nenion pli ol ekspozicio mian novan pentraĵon.

ZAZA: Do tiu bildo... tiu nova bildo...

MAKS: Kiel mi vidas, ĝi interesas vin. Almenaŭ ĝi komencas vekti vian interesigon. Nu bone! Sciu do, ke ne ekzistos tia homo, kiu ne rekonos nin ambaŭ sur tiu bildo. Al la pilorio, jes, al la pilorio mi metis vin kun mi mem.

ZAZA (*kun time malfermitaj okuloj*): Frenezulo!

HUGO (*revenas kun freŝaj v'ndoj en la mano*): Pardonu, mi volas demandi ion... Ĉar vi estas ja patro, certe vi scias. Kion oni faras, kiam la infano havas ventrodoloron?

MAKS (*iom embarasite*): Kion? Ah, jes! Oni masaĝas la ventreteton de maldekstre dekstren.

HUGO: Dankon! De maldekstre dekstren. Komprenoble nur delikate, tre delikate kaj per vaselino. Ĉu?

MAKS: Oni povas ankaŭ per vaselino.

- HUGO:** Dankon, dankon! Ofte la spertoj de gepatroj valoras pli ol la konsiloj de freŝe bakitaj kuracistoj. Ĉu? Pardonu, sed la bebo... (*Li forkuras en la dormoĉambron.*)
- ZAZA** (*paŝas al Maks, longe rigardas al liaj okuloj*): Maks, ĉi ne faros tion, ĉi ne povas esti tiel maljusta.
- MAKS** (*seke*): Ne ĉiadu!
- ZAZA:** Frenzulo!
- MAKS** (*amare*): Egale kiel vi nomas min. Mi decidis kaj la bildo, »La etburga demono« elokvente parolos anstataŭ mi. Ho, tiu figuro abomeninde similas al vi kaj oni rekonas vin. Viaj gekonatoj fingre montros al vi kaj via edzo... nu, li havos la saman turmenton, kiun havis mia edzino pro vi.
- ZAZA** (*time retiriĝas*): Maks, mi ne rekonas vin. Ĉu vi volas kompromiti min? Ĉu vi volas skandalon? Mi ne scias, kion prezentas tiu bildo, sed ĝi estas mensoga, jes, mensoga! Vi scias plejbone, ke neniam mi donis min al vi, neniam mi estis via amatino, neniam...
- MAKS:** Ne, sed dum jaroj vi mensogis vin la mia. Mi volas pagi!
- HUGO** (*aperas en la kadro de la pordo*): Pardonon pro la interrompo! Mi forgesis, ĉu de dekstre maldekstren aŭ de maldekstre dekstren?
- MAKS** (*embarasite*): Mi ne komprenas, kion vi deziras.
- HUGO:** Nu, temas pri la masaĝo de la ventreto.
- MAKS:** Ah, jes! De maldekstre dekstren... Sed ankaŭ la kamomil-infuzajo bone utilas. Kompreneble, ne varmege!
- HUGO:** Dankon! Do de maldekstre dekstren kaj delikate. (*Li foriras. Longminuta paŭzo. Maks kaj Zaza rigardas unu la alian. Maks iom nerve prenas cigaredujon, malfermas kaj fermas ĝin, turnas sian rigardon al la lustron. Zaza senmove observas lin*)
- ZAZA** (*milde, iom mire*): Maks, mi ne sciis, ke vi ĉe nun tiel amas min.
- MAKS** (*amare ridante*): Mi? Ĉu mi? Vi eraras, Zaza.
- ZAZA** (*persiste*): Do, ni diru, vi malamas min. Egale! La amo kaj malamo estas ĝemeloj. Ili ambaŭ havas samajn trajtojn kaj arogas samajn rajtojn. Ili volas direkti aŭ detru la vivon de alia homo.
- MAKS** (*flame*): Mi abomenas vin. Kontentigon mi volas por mi pro viaj mensogoj, pro la primokita sento de mia koro.
- ZAZA** (*milde*): Kiel maljusta vi estas, Maks, maljusta, kiel ĉiam, kiam vi ne volis juĝi objektivite. (*Ŝi proksimiĝas al Maks*) Jen, mi konfesas, ke nun, en tiu ĉi momento mi ĝojas pro via vizito. Nun ŝajnas ankaŭ al mi, ke io restis nekvitigita inter ni... Sed kio? Jen la demando.
- MAKS:** Ĉu vi ne volas kompreni min? Vi mensogis, kvankam neniam mi devigis vin fari tion. Mi deziris nur amikecon kaj sincerecon. Mi donis al vi plenan liberecon, mi ne katenis vin al mi.
- ZAZA** (*amare, sed milde*): Amikecon kaj sincerecon! Sed vi ne vidis tiun kormuelan sopiron, kiu velkigis mian ĵunecon. Ĉu ne tiel estis? Ho, vi tre bone sciis tion, sed vi estis malkuraĝa, jes, malkuraĝa kaj senkulpigis vin per via devo.
- MAKS:** Do nun vi atakas kaj akuzas. Ĉu?
- ZAZA** (*eksidis kontraŭ Maks*): Ne! Mi nur konstatas... Dum jaroj mi staris ĉe via flanko, mi disipis miajn plej belajn jarojn, knabinajn revojn por vi, mi partoprenis en viaj laboroj kaj zorgoj. Kion mi ricevis rekompence? Almozminutojn. Efemeran ĝojon, ŝtelitan de alia virino. Neniam vi povis esti tute la mia. Vi deklamis grandajn vortojn, parafradojn pri via amo, sed neniam vi forgesis ripetadi pri via devo. Ĉu vi pensas, ke mi ne baraktis sub la ŝarĝo de tiu suferplena amo? Ĉu vi pensas, ke ne ĉiutage mi devis marĉandi kun la Vivo por povi persisti kaj sinofere toleri la mokan rideton de miaj gekonatoj...
- Sed kial? Vi scias la respondon, kvankam en tiu ĉi momento vi hontas konfesi ĝin.
- MAKS** (*iom kortuŝite*): Mi ne hontas. Mi kredis, ke ne sole flata arlekenado de katino estis en via sento.
- ZAZA** (*amare ridas*): Flata arlekenado de katino, jen via preferata frazo. Vane vi neas, nun vi mem sentas, ke sole mia amo kaj mia fido al vi subtenis min en la interna batalo. Mi kredis, ke ankaŭ vi amas min kaj iam vekigis en vi la forta decidkapabla viro, kiu solvos la inferan dilemon... Mi suferis, terure suferis, sed ĉion mi kaŝis sub rideton por ne torturi ankaŭ vin... (*Ŝi eklarmas*) Vi nomis min ja »printempa rideto« kaj mi sentis mia devo rideti kaj ĉiam rideti, peli for la nubojn, doni al vi inspiron por la laboro, teni forte vian manon, kiam la pesimismo nebuligis vian klaran vidon. Mi estis la via, tute la via, sed vi estis tro malkuraĝa rimarki tion.
- MAKS** (*hezite*): Kial vi ne estis sincera al mi? Kial vi ne diris, ke ni disigu amike? Kial vi aranĝis tiun hontindan komedion, tiun abomenindan ludon tie dum la balo? Pro kio?
- ZAZA** (*post ioma paŭzo*): Pro kio?... Pro vi. Jes, pro vi, ĉar mi sentis, ke via amo fariĝis nura devo kaj sole pro egoismo vi kroĉiĝas al mi.
- MAKS** (*tro energie por kaŝi, ke nun ŝi trafis la veron*): Mensogo! Ne tiel estis.
- ZAZA** (*kun triumfa tono*): Sed jes, tiel okazis, tiel estis, vane vi neas nun pro malfrua pentito. Kial vi ne revenis al mi la postan tagon aŭ post semajno aŭ tiam, kiam mi mem provis proksimiĝi al vi. Ho, ne la ofendita vanteco estis la sola kaŭzo.
- MAKS** (*energie*): Mensogo, mensogo! Ĉion vi faris pro tio, ĉar vi opiniis, ke tiu ekzotika fremdulo, en kies sinon preskaŭ vi enkubutis dum la balo, estos kaptebla per via rideto, per via babilema ĉarmo. Fi! Ne amo gvidis viajn paŝojn. Kio? Nura vanteco. Ne ĉiutage viron vi aspiris. Pro troa ambicio vi volis fariĝi Sinjorino lu kaj ne Sinjorino Neniu. Via eksperimento fiaskis. Jes, kaj post tio vi klopodis reveni al mi, al la naiva revemulo, melita en rezervon. Jen tiel estis!
- (*De ekstere aŭdiĝas lulkanto de Hugo. Ĝi ne estas tro laŭta kaj ĝiaj vortoj ne estas distingeblaj por ne malhelpi la dialogon.*)
- ZAZA:** Nu, se eĉ tio estus la vero, ĉu tio ne estas pardoninda? Vi estus povinta kompreni, ke mi ne volas velki sen amo.
- MAKS** (*subite ekflamiĝas*): Sen amo! Ĉu sen amo? Kaj tion vi kuraĝas diri al miaj okuloj. Ĉu vi pensas, ke mi estis blinda kaj mi ne vidis vian aman manovradon? Ho, mi tre bone vidis ĉion, sed mi estis scivola, ĝis kiam vi riskas ludi vian aĉan komedion.
- ZAZA** (*kun larmoj kaj milda riproĉo*): Ne estu maljusta, Maks! Rigardu al miaj larmoj kaj...
- MAKS:** Ehh, viaj larmoj! Per videblaj larmoj trompas la virino.
- ZAZA** (*sentimente*): Kaj pro la nevideblaj ŝi mem velkigis.
- MAKS:** Lasu la aforizmojn al la literaturistoj. Nun mi estas du homoj, kiujn la sorto kunligis, la reala vivo.
- ZAZA:** Sed vi estis tiu, kiu disiris la kuntenantan fadenon. Vane mi skribis, vane mi klopodis proksimiĝi al vi. Mia momenta ŝanceliĝo donis bonan pretekston al vi por akre tranĉi la nodon de la amikeco. Vane mi atendis vin kaj la malespero faris min malforta. Mi sentis min orfigita kaj tiam... tiam venis tiu ĉi bona homo, mia edzo. Li ekvidis apud mi, parolis nenion, nur prenis mian manon kaj rigardis min... li nur rigardis kaj rigardis...

MAKS (*ironie*): Tre romantike! Se mi ne konus vin tiel bone, mi kredus al viaj vortoj, sed... sed... Cetere mi gratulas al vi pro la sukcesa eksperimento, per kiu ĝustatempe vi fiskaptis vian edzon.

ZAZA (*indigne*): Ho, kiel mi abomenas vin, viroj! Vi ĉiuj estas egoistaj kaj nur egoistaj. Unu pro malkuraĝo, la alia pro negocemo, la tria...

MAKS (*kun mokema riverenco*): Mi dankas je la nomo de mia sekso. La unua estas mi, la dua... Nu, ankaŭ lin mi konas. Sed nun vi devus esti tre feliĉa. Via edzo estas bona, modesta, humila, kolomba, turta... kiel... kiel ia patrinbesto. (*Ekstere ĉesas la kantado de Hugo. Zaza ekstaras kaj iras al la sofo.*)

ZAZA (*dolore, rezigne*): Jes, li estas bona, tre bona. Vane vi mokas lin (*Ŝi eksidas sur la sofon*). Li estas bona pro egoismo. Boneco, kiu ĉiam plenumas niajn dezirojn, pardonas ĉion, iom post iom fariĝas kateno kaj faras nin malkuraĝaj.

MAKS (*triumfe kaj verve*): Ĉio en ordo! Jen la kontentigo, de la Vivo mem. Do ankaŭ vi sentas la liberminacan potencon de la Boneco, ankaŭ vi fariĝis malkuraĝa, ankaŭ vi sentas la katenojn de la devo. Hahaha! La kolomba vivo kiel devo!! La vivo ripetas la situaciojn. Nun, jes, nun aklamas mia turmentita animo, ĉar la sorto jetis vin tien, kie la samaj flamoj brulvundas vian koron, pri kies ekzistoj vi ne kredis, kiam ili torturis mian animon... Feliĉe, ke por vi restis la orkora ĉefo.

ZAZA (*energie protestas*): Vi eraras. Rilato kutima inter laborondonanto kaj dungito.

MAKS (*jaluze*): Mi bone konas tiun kutiman interrilaton.

ZAZA (*kiel supre*): Freneza, vi... vi, freneza! Vi pensas, ke...

MAKS: Mi ne pensas, sed mi scias. La orkora ĉefo ekzistas nur en la fabeloj de la palaj tipistinoj.

ZAZA: Mi juras je mia...

MAKS: Ne juru, false vi ĵurus! Nur blindulo kaj via edzo ne vidas, ke la infano...

ZAZA (*raŭke pro ekscitiĝo*): For! For el mia domo! Mi ne toleras viajn suspektojn.

MAKS (*furioze, sed kun sordinita tono*): Ne, ne, ne! Mi venis pagi! Ci, ci «etburĝa demozo». Oni rekonos vin sur la bildo. Mi mem montras ĝin al via edzo. Mi malfermos liajn okulojn. Mi eŝiros vin el lia koro, el la simpatio de tiu ĉi hipokrita socio, mi jetos vin tien, kien vi jetis mian koron, mian talenton, mian inspirecon. Mi... mi...

(*Ek tera infanplorado*)

ZAZA (*preskaŭ transformiĝis dum la paro'o de Maks. Ŝia rigardo ardas de interna ĝojo. La vortoj apenaŭ povas kaŝi la esperon, kiu promesas rompi la unutonecon de ŝia vivo*): Faru do, kion vi volas! Frakasu mian nunan vivon, vundu je morto la koron de homo, kiu kulpis nenion kontraŭ vi, metu nin ambaŭ al la pilorio, sed sciu, ke oni kondannos ne min, sed vin, sole vin... Mi ne defendos min. Ne! Sed poste... Kio venos poste?

MAKS (*sinforgese*): Egale!

ZAZA (*triumfe*): Num vi perfidis vin, Maks! Ĉu egale? Do bone, ankaŭ por mi estas ega'e...

MAKS (*furoro*): Ho, kiel mi abomenas vin, kiel... (*Li ekstaras minace*)

(*Fino sekvos*)

Pledo por literatura organizo

— Ludoviko Totsche —

Ni vivas la epokon de organizitaj movadoj, de organizita (eĉ, ni konfesu, jam kelkfoje troregulita) socia vivo. Iom post iom la individueco preskaŭ tute perdas sian kvalitan pezon kaj la apartaj energioj de l' izolitaj unuoj povas valorigi nur per la helpo de la kvanto: per la unucela klopodo de la unuigitaj fortoj. Ke tiu ĉi fenomeno estas ĝenerale valida specialaĵo de l' epoko, el sub kies efiko neniu povas sin tute liberigi, tion pruvas la surpriza fakto, ke tiu ĉi tendenco montras sin ankaŭ ĉe la verkistoj, kiuj — se ili estas artistoj en la vera senco de l' vorto, kaj ne industriistoj de la nuporamuza »literaturo« — estas denature ekstremaj kontraŭuloj al ĉiu unuformiga kaj mekanikiga direkto. La verkisto, eĉ se li konfesus la plej kolektivistajn ideojn, ne povas rezigni pri sia individua koncepto rilate al tiuj ĉi ideoj, pri sia individua esprimmaniero, per kiu li prezentas sian koncepton. Tia rezigno kondukus al certa morto de ĉiu pure artista klopodo. Kaj tamen ni vidas, ke la verkistoj sin organizas. Temas ne nur pri landaj societoj, destinitaj por defendi la materiajn interesojn de la anoj, sed ankaŭ pri internaciaj organizaĵoj, kiuj celas, per la forto de l' spirito, akceli la materian kaj precipe la animan progreson de l' homa kulturo. (Ekz. PEN klubo). Ĉu estas ĉi tie ia kontraŭdiro? Tute ne! Kvankam estas vere, ke apenaŭ oni povas trovi du verkistojn, kies priliteraturaj opinioj identus en ĉio, kvankam estas vere, ke por vera verkisto la spirita sendependeco estas nepre kondiĉo de la literatura agado, tamen oni povas trovi bazon, sur kiu la plej diverĝantaj verkistoj povas harmonie kunlabori: prosperigo de l' komunaj ekonomiaj interesoj kaj klopodo al la tamen sama celo: al la antaŭenigo de la homa kulturo.

La esp-istaj verkistoj ankoraŭ ne havas organizaĵon. La ELA ĉesis ekzisti post agado, kiu konsistis ĉefe el laŭda menciado de ĉiu meze bonstila libro; la Lingva Komitato kun la Akademio estas kaj restas nia ĉefa

konserva organo prilingva, sed ĝi ne povas plenumi la taskojn de pure literatura organizaĵo. Ankaŭ ĝia kunkmeto ne destinas ĝin al tiaj taskoj: pri literaturaj aferoj tamen la plej kompetentaj estas mem la verkistoj, la enmiksiĝo de eksteraj faktoroj kaŭzus nur konfuzon; krome signifa parto de la aktivaj verkistoj ne anas al la Lingva Komitato. Do restas la solvo: fondo de aparta, sendependa literaturo societo. Sed oni certe demandas, kiuj estas la gravaj taskoj, necesigantaj apartan literaturan organizaĵon? Permesu, ke mi prezentu al vi ilin tute mallonge; mi ne intencas doni ellaboritan planon, sole skizati bazon, laŭ kiu la pli precizaj konturoj de la organizo povos formiĝi dum la postaj pritraktadoj, se la verkistoj kaj la publiko emas favore akcepti la aferon... Do jen mia demando, al la esp-istaj verkistoj kaj literatur-amikoj: ĉu vi volas, ke en la Esp-a movado ekzistu sendependa, vivkapabla literatura societo, kies taskoj estus:

kunigo de la izolate laborantaj junaj kaj modernaj esp-istaj verkistoj, gardado pri la spirita kaj ekonomiaj intereso de la verkistoj, ilia reciproka pliproksimiĝo kaj interkonatigo,

organizo de la literatura vivo per reciproka konsilioj, eldono de libroj, reklamado, elekto de gravaj tradukindaj verkoj, aranĝo de literaturaj festoj,

helpo al junaj kaj talentaj verkistoj per morala kaj materiala subteno,

helpo al la evoluo de la Esp-a lingvo ĝis la plej alta grado de literatura perfekteco,

helpo al la plialtigo de la artista kaj intelekta nivelo de la Esp-a literaturo ĝis ĝia egalrangigo kun la naciaj literaturoj,

konscia laboro por pliprofundigo de la rilato inter publiko kaj verkistoj, helpo al la popularigo de la Esp-a libro.

Ĉu ne sufiĉe por efektiva laboro? Mi pensas, ĉiu plua klarigo estus superflua, pri la detaloj ni povos intertraktadi, se ni jam decidis pri la ĉefajo; pri la fondo de tia societo.

La literaturo rilatas al la lingvo, kiel la karno al la skeleto. Sed en Esperanto la literaturo signifas ilin ambaŭ. El la cent kaj cent lingvoprojektoj Esperanton ellevis kaj savis por la eterne nur ĝia literaturo... Ĉu estas neŝanĝebla, ke la Esp-a literaturo vivu plu kaj ĉiam la nunan amorfan, neorganizitan vivon?



OBSERVO

OTON JUPANČIĆ.

En la kultura vivo de Jugoslavujo okupas la slovenoj (sur la teritorio de Drava »banusejo«) apartan lokon, antaŭ ĉio pro la propra literatura lingvo kaj kiel mallarĝa ĉenoro en la mezeŭropa kultura sfero. Ilia literaturo ekprosperis en la 19-a jarcento; la unua presita libro aperis jam en la 16-a jarcento dum la protestantismo, kiu metis la fundamenton al la lingva kaj literatura evoluoj. En la tempo de Napoleono parto de l' slovena teritorio apartenis al Francujo, kio favore influis la plifortigon de l' nacia konscio. En la unua duono de la 19-a jarcento superas ĉiujn slovenajn aŭtorojn Francisko Prešern, la poeto de l' samtempa eŭropa formato. Ĉe la fino de la 19-a jarcento penetris en la slovenan literaturon la influo de l' okcidenta naturalismo preskaŭ samtempe kun la influoj de l' franca simbolismo kaj de la dekadencita literaturo. En la kuniĝo de tiuj influoj kun la enlanda hejmeca spirito, enradikiĝinta en la tradicio, evoluis la moderna slovena literaturo, kiu donis du kreintojn de speciale slovena tipo: la noveliston Johanon Cankar kaj la lirikiston Otonon Jupaniĉ. Ili ambaŭ dum la lasta tempo eniris la mondliteraturon.

La poeto de »Duma«, de la plej bela lirika slovena poemo, kies versoj, indaj de W. Whitman kaj E. Verhaeren, pentras la doloron kaj sopiron de slovena animo. — Oton Jupaniĉ, naskiĝis la 23-an de januaro 1878. en Vinica, en la regiono nomata »Bela Krajina« (Blanka Krajno). Ĉi tie alproksimiĝas kaj kunfandiĝas la slovena kaj kroata popola kaj kultura tipoj. Oton Jupaniĉ studis en la universitato de Vieno, li vivis kelkan tempon en fremdlando, precipe en Parizo; nuntempe li estas intendanto de l' slovena teatro en Ljubljana. En la jaroj 1899—1924 li eldonis 8 kolektojn de lirikaĵoj kaj tragedion en versoj. Li tradukis en la slovenan lingvon multajn unuarangajn verkojn el la mondliteraturo; precipe sukcesis liaj tradukoj de Shakespeare, la plej bonaj en la slava sudo. Oton Jupaniĉ estas ĝenerale rekonata kiel unu el la plej grandaj jugoslavaj poetoj.

Pri lia laboro ekzistas multaj studaj traktadoj en fremdaj lingvoj. Arturo Cronio eldonis en la jaro 1928 en »Istituto per l'Europa Orientale« longan monografion »En la ampleksa libro »Oton Joupantschitsch, poët slovène« (Paris 1931) traktas lian vivon kaj verkojn la universitata profesoro en Strasbourgh Lucien Tesnière. En tiu ĉi libro aperis en la traduko ankaŭ granda parto de poeziaĵoj, inter aliaj ankaŭ »Duma«. La itala traduko de »Duma« (Italo Maffei kaj Fanny Sinkovec—Mayer) aperis en Modena en la jaro 1924. La germana kritikistodro. Otto Forst Bataglia (Jahrbücher für Kultur und Geschichte der Slaven, 1931) juĝas pri Jupaniĉ kiel pri unu el la plej grandaj eŭropaj poetoj, samvalora al Claudel, Stefano George, Valéry kaj al d' Annunzio.

B. Borko.

DRAGUTIN DOMJANIĆ. La poeto estas unu el la plej grandaj kroataj lirikistoj ankoraŭ vivantaj. Temperamente melankolia, revema, amanto de la soleco, li sentas la mondon nur kiel la »vanan sopiron«. Nura rezignemo ŝajnas al li la sorto. Domjaniĉ kun rompita koro pri-

Ventego

— Hendrik Adamson —

Pluvetas, pluvas, pluvegas,
de ŝ'onoj faladas torent',
kuretas, kuras, kuregas,
spiretas, spiras, spiregas,
per den'oj klakadas la vent'.

Arbetoj, arboj, arbegoj
kliniĝis ĝis la herb'
treme'oj, tremoj, tremegoj,
ĝemetoj, ĝemoj, ĝemegoj
penetras ĝis ost' kaj cerb'.

ploras la forpasemon de ĉio, ankaŭ de la homoj, kiuj forbrulas senrevene... La virinon li rigardas romantike, metas ŝin en la barokan ĉirkaŭaĵon, kun gobelenoj, paĝioj, balkonoj inter rezedoj, aleoj kaj fontanoj. Tiel lia liriko akiras trubaduran melankolion kaj ĉarmon. La vortoj estas portantoj de la »agordoĵ«, tremantaj movoj de l' pentrista peniko, muzikaj arpeĝoj. De tiu artismo apartiĝas bukedo da poemoj, en kiun la poeto elspiris sian »blankan animon« konfesante la senŝancan amsopiron. Ne ekzistas en la tuta kroata liriko pli diskreta, nek pli profunda, analizo de la amo. Liaj »simpatiaĵoj« estas Heine, Ver'aïne, Mae'terlinck, Gogolj, Dostojevski, Nadson, Puŝkin, Ljermontov.

VOJISLAV ILIĆ PLI JUNA. Samnomano de la majstro de verso Vojislav Iliĉ. Li estas konsiderata unu el la plej bonaj vivantaj lirikaĵoj serbaj poetoj. La »Poŝtveturilo« priskribas lian revenon en la lokon kie li mortigis sian malfidelan edzinon. Tiu akcidento stimulis lin skribi sincerajn kaj dol'orplenajn lirikaĵojn.

S. B.

FRAN MAJURANIĆ. Naskiĝis en la familio, kiu donis plej eminentajn poetojn kaj scienculojn. Jam en la frua aĝo li komencis verkadon per spritaj skizetoj, kolektitaj poste sub la titolo: »Foliaro«. La formo de tiuj »poemoj en prozo« estas pruntita de Turgenjev. Jen doloro, jen profundaj meditoj, elvokitaj de sufero, mordanta pro la alia kristaliĝis en literaturaj perloj. La tutan kolekton uverturas antaŭparole la vortoj de Turgenjev: »Nur ne legu la leganto ĉion je unu fojo, ĉar — versaĵne — pro enuo la libro falus el la mano. Oni legu ĉiun skizeton aparte: hodiaŭ unu, morgaŭ la alian... Eble de iu folio gutos io en la animon...«

IVO ANDRIĆ. La verkisto aperis sur la literatura kampo jam antaŭ la mondmilito, kvankam li estis ankoraŭ junuleto. Dum la milito li estis — en la aĝo de 22 jaroj — jetita en la malliberejon kiel suspektita ŝtatperfidulo. Tie en mallumo kaj frostoj de la vintraj vesperoj ŝpiniĝis »EX PONTO«, la verko, plena de ĉaste pura poezio, nur tie kaj tie vualita de la malhela melankolio. Sentigas influo de Kierkegaard, Nietzsche, Pascal. Nur pli pasia, pli bolema kaj ribela li ŝajnas ol ili, ĉar li — preskaŭ infano — jam spertis tragedion de la vivo. Poste, kiam li forlasis la malliberejon kaj komencis la normalan vivbatalon, li verkis belegajn »bosniajn rakontojn«, kie per riĉaj koloroj li bildigas spiron de la oriento, inundata perforte de la okcidenta civilizemo.

RECENZO



Ĉiujn librojn, ricevatajn en du ekzempleroj, ni recenzas. Unuope ricevatajn librojn ni nur mencias. — La recenzoj esprimas nur la opinion de la recenzinto kaj ne tiun de la redakcio. Pro tio la redakcio tre volonte publikigas interesajn kontraŭopiniojn, koncernantajn ijn aperintajn recenzojn. — La libroj, ĉi tie menciataj kaj recenzataj, estas haveblaj ĉe la librofako de nia eldonejo.

TRANS LA FABELOCEANO. Originalaj noveloj de Francisko Szilágyi. Volumo 136 paĝa kun 15 ilustraĵoj sur peza senligna papero. Formato 20×13.5 cm. Kun dukolora ŝirmkovrilo. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt IX. Mester-utca 53. V. 7. Prezo broŝurita 0.60 dolaroj, bindita 1.— dolaroj. Aldonu 10% por sendkostoj.

Ĉu estis, ĉu ne estis, eble trans la Fabelmaro de hodiaŭa Eŭropo, estis Esperantista recenzisto, loĝanta en Londono. Necesas mencii, ke li ankaŭ faris aliajn laborojn, de tute honesta speco, sed fakto restas, ke li estis Esperantista recenzisto. Ankoraŭ pli fabelece estas, ke li kutimis legi preskaŭ ĉiun verkon, antaŭ ol recenzigi, nur kelkfoje li trovis iun verkon nelegebla, kaj memoris, ke ne necesas manĝi ovon ĝisfine, por konstati ĉu ĝi estas freŝa, freŝeta, aŭ jam antikva.

Kaj en iu mateno la Esperantista recenzisto vekigis pro la forta frapo de la leterportisto je lia dompordo. Kaj li pensis al si: »Do, jen pakajo por kiu la letertruo ne sufiĉas — tio certe estos io agrabla«. Kaj li ree endormiĝis por duonhoro, kontenta pro scio ke plezuriga pakajo atendos lin je matenmanĝo.

Sed kiam li venis en la manĝambonon li ne trovis agrablajn pakajon, li trovis libron en internacia lingvo, kaj subite li rememoris, ke li estas Esperantista recenzisto, kaj ne tia normala homo, al kiu oni sendas agrablajn pakajojn. Li do provis la efikon de du tasoj da teo, kaj legis en la matena ĵurnalo pri pluraj murdoj, naciaj revolucioj, kaj virinaj modoj.

Finfine, tamen, li ekrigardis la libron, kaj trovis la bindon tre plaĉa. Post tio, lian atenton kaptis la multaj desegnaĵoj, de trafa kvalito, hodiaŭa speco, kontrastantaj kun la mornaj malaktualaj kiuj malornamas multe da libroj en la moderna lingvo. Kaj ĉar li ne havis urĝan laboron antaŭ si, li komencis legi la klarajn litertipojn.

La rezulto estis, ke li trovis sin leganta paĝon post paĝo, kun konstanta intereso kaj sufiĉe da ridoj pro la pikaj ŝercaĵoj kaj la ŝercaĵ pikoj. Kaj fine li trovis, ke li legis la verkon ĝisfine, sen konscia penado tion fari.

Sed venis la penso, ke li ne estas ordinara homo, kiu rajtas legi libron kun plezuro, kaj poste forgesi pri ĝi. Li estas Esperantista recenzisto, kiu devas kiali, kaj kieli, kaj prii, kaj opini, en tiom da vortoj. Li do komencis cerbumi, kion li skribu pri la verko, kaj li komencis per frazoj pri »lertaj fabeloj«. »modernigitaj infanrakontoj« kaj »flua stilo«. Poste li provis meti la verkon en skolon, sed ne povis pensi al skolo kiu inkluzivus ĝin. Sekvis peno fari komparon kun iu alia aŭtoro de Esperanto, sed li ne povis pensi pri alia aŭtoro de Esperanto kiu faris same distrajn kaj samtempe ne senprofundajn skizojn. Estis terure. Kion oni opinios pri li, se li ne metos la verkon en iun skolon, ne faros ian trafan komparon? Oni taksis lin nekompetenta. Li sopiris pri la frua epoko de nia literaturo, kiam sufiĉis konstati ke iu verko estas gramatike bona, kaj laŭdi ĝin nur tial ke ĝi estas verkita en Esperanto. »Nia talenta samideano vere riĉigis nian literaturon« — tiutempe tia kliŝaĵo por ĉiuj verkoj sufiĉis.

La Esperantista recenzisto do faris tre simplan aferon: li skribis nur sian ordinaran opinion — ke la verko estas interesa, distra, flustila, ne profunda, ne senprofunda. Poste li denove legis en ĝi, ĉi tiun fojon ne kiel recenzisto, sed kiel ordinara homo.

Sed tio, ke recenzisto legas libron pro propra plezuro, tio estas jam tro fabeleca.

K. R. C. Sturmer.

LA PENTROARTO EN LA MALNOVA HUNGARUJO. Verkis dr. István Genthon, tradukis dro Francisko Szilágyi. Eldonis Literatura Mondo Budapeŝt. Formato 25×17 cm. Okdek paĝoj da teksto kaj 96 paĝoj da bildoj. Duonlede bindita. Prezo 3.— dolaroj + 10% por sendkostoj.

La historioscienco havas periodojn, kiam ĝi favoras iun tendencon kaj tiel estas kompreneble, ke ĝi havas ankaŭ kulpajn forgesojn. Ankaŭ la grandega monografio de dr. István Genthon forigas tian kulpon de la hungara historioscienco kaj per tio pagas ŝuldon ĝis nun nekvititan ne nur al la hungara nacio sed al ĉiuj kulturacioj.

Lia verko, kiu ekde la komenco de la hungara pentroarto, do ekde la lastaj jardekoj de la 14-a jarcento akompanas la grandiozan evoluon de la hungara pentroarto ĝis la fino de la gotika pentro, prezentas planan bildon pri unu el la plej unueca, plej bonkvalita epoko de la hungara arto. Li pravas, ke jam ĉirkaŭ la jaro 1380 ekfloris vigla pentrokulturo en Hungarujo, ĉar la bildoj, postrestintaj el tiu ĉi tempo, montras tiom rapidan evoluon, ke lian ekeston kaj neatenditan evoluon oni ne povas simple klarigi al si per la invito kaj penetro de fremdaj majstroj. Li tuŝas ankaŭ la memstaran nacian karakteron de la hungara pentro kiu fariĝis tia, kvankam la evoluo ekiris sub la protektado de du spiritaĵ granpotencoj: la germana kaj itala pentro. Tial estas, ke multaj eminentaj bildoj atingas la nivelon de la aŭstrogermana pentro. Sed la multscia verkisto ne traktas per hipotezoj, sed per la metoda esploro de la materialo, per la funda kono de pli ol dumil bildoj li desegnas la konturojn de la evolulinio de la malnova hungara pentroarto. Tiu ĉi linio kuras sagorekte supren de la Madono de Ludoviko la Granda kaj de la triobla altaro de Bât tra Tomaso de Kolozsvár kaj tra la eminentkvalitaj bildoj de la majstro de Jánosrét ĝis lat. n. M. S. majstro, ĉe kiu kulminas la malnova hungara pentroarto. Kaj en tiu spaco ekzistas la multego de la religitemaj bildoj, le memstaraj produktoj de granda kolektiva kulturo, valoraj dokumentoj de la spirito de jam pasinta mondo.

Sed dr. István Genthon, kiu apartenas al la unuaj pioniroj de la juna hungara artkritikista generacio kaj poluris sian apartan talenton per la detala trastudo de la plej modernaj metodoj kaj tendencoj, estas ne nur fakulo, sed verkanta por la plej vasta laika publiko. Kaj liaj meritoj estas eble plej grandaj sur tiu ĉi kampo. Ĉar se la leganto trastudas ĉi tiun verkon li klerigis ne nur pri la evoluo de la hungara pentro, sed li ricevas apude tian enkondukon por la ĝuo de ĉiuj epokoj de la arto, kiu honorus eĉ libron, speciale verkitan kiel manlibro de arto. La verkisto ne nur bone atentis la tiutempajn eksterlandajn interrilatojn, sed per la detalaj analizo kaj priskribo de la presitaj bildoj li montras al la leganto tiun vojon, kiun oni devas sekvi, se oni volas enprofundiĝi en la ĝuon de iu artverkaĵo kaj oni volas kompreni ĝin. Tio estas la neforpasebla merito de la verkisto kaj tial estos la verko ĉiam aktuala.

La tradukisto mem bone sciis kaj konis la celojn de la aŭtoro kaj tradukis la verkon ne nur en neriproĉebla lingvo kaj per plej facila kaj komprenebla stilo, sed ankaŭ per la uzo de kiel eble plej malmultaj neologismoj, kvankam la speciala temo necesigis por tio grandan fortostreĉon. La merito de la tradukisto estas ankaŭ tio, ke li faris ĝuebla la libron ankaŭ por tiuj, kiuj ne konas la historion de Hungarujo mem kaj krom la teksto, aldonis ankaŭ apartan klarigaron pri la elparolo kaj nuna nomo de la malnovaj hungaraj lokoj.

Kaj parolante pri la eldono, mi ne rajtas preterlasi la meritojn de la eldonejo mem, kiu ne ŝparante monon kaj energion, faris la verkon eble la plej bela libro en Esperanto.

Multfoje oni plendas, ke nia literaturo ne atentis bone la postulojn kaj bezonojn de la lingvo-propagando, kio ĉe ni estas tre grava postulo. Tiu ĉi libro plene kontentigas ĉiujn dezirojn:

La literaturisto ricevas interesan legajon

la lingvisto senriproĉan teknikan lingvon

la artamanto belegan libron kun vere abundaj ilustraĵoj

la propagandisto unu el tiuj propagandiloj, kiuj devas esti plej efikaj en artistaj, intelektaj kaj katolikaj rondoĵoj.

kaj la komencanto facilan legajon.

Jen pro kio mi deziras al la verkisto kaj eldonejo sukceson, kian ili meritas kaj al la esperantistaro ankoraŭ multe da tiaj eldonaĵoj.

D—ĝ.

TAKEO ARISIMA: SENBEDAURE AMO RABAS. El la japana tradukis: Tojosato Tooguu, la tradukon reviziis: S. Furusawa. 103 paĝoj. Eldonejo: Japana Esperanto Instituto, 1931.

Tiu ĉi profundanaliza libro atestas pri renkontiĝo de l' orienta kaj okcidenta Penso. La aŭtoro estas klar-mensa intelektulo, iom inklina al eklektikismo, al kiu tamen sukcesis konstruo de interesa, originala verko. Li multe legis, kaj, kvankam lia kontrola kritiko ne ĉiam funkcias senriproĉe, oni devas rekonii, ke li ne estas humila adepto de siaj eŭropaj filozofidealoj, sed la eŭropa efiko fekundigis lian originalan orientan spiriton, kaj la du faktoroj naskis amalgamon, kiu vere povas interesi ĉiun mense aktivan eŭropanon.

La esprimiloj de l' verkisto estas tiuj de logika filozofio, bedaŭrinde la libro senas ĉiun poezian facilecon kaj graciecon, kiuj en la verkoj de kelkaj eŭropaj filozofoj faras eĉ la plej komplikajn tezojn tiom facile alir-eblaj. Eble ankaŭ la tradukisto estas parte kulpa pri tiu ĉi iom peza stilo, sed tamen oni devas admiri lian brave plenumitan laboron. Mi povas rekomendi la libron al lingve spertaj, por pripensado pretaj samidenoj.

Ludoviko Totsche.

EISABURO ISIHARA: VERDA KARTO. Socio post 50 jaroj. El la japana tradukis: H. Jamanaka. 181 paĝoj. Eldonejo: Japana Esperanto Instituto.

Teknika fantazio pariginta kun socia utopio. Imitaĵo de samtendencaj eŭropaj romanoj, sed kun esprimoj multe pli modestaj. La gusto de l' eŭropa publiko estas ege dorlotita per tiaj libroj, en la okuloj de eŭropano la romano de Ishara estas nesaveble naiva: troviĝas scenoj, kie la aŭtoro intencis ĝis eksplodo streĉi la nervan ekscitiĝon de la leganto kaj la sceno rikoltas nur rideton. (La aŭtoro ridinde naive imagas la vivon en la estonto, ĝin simbolas la elektra revolvero, kiu estas nedisigebla de liaj herooj, ili eĉ dormas kun ĝi!) Pri la sociaj ideoj de l' aŭtoro ni eĉ ne parolu, ili estas tiom infancaj. Ankaŭ el psikologia vidpunkto la libro estas fuŝita: la rilato inter patrino kaj filo estas monstre absurda. Almenaŭ por eŭropaj okuloj.

La traduko ne estas malbona. Kompreneble la tradukinto devas ankoraŭ multe studi la modernan Esp-an literaturon. Kelkaj rimarkoj: en la frazo: »estas neeviteble, ke vi miskomprenus min« anstataŭ la kondicionalo ĝustas la u-modo. La uzo de »unu« kiel nedifinita artikolo infektas ankaŭ tiun ĉi libron.

Kaj tamen mi ne povas diri, ke la romano enuigis min. Mian interesigon streĉis la japana vidmaniero de l' aŭtoro, kiu senteblos sur ĉiu paĝo de la libro. Nu, kiu emas legi ĝin el tia vidpunkto, al tiu mi povas rekomendi ĝin.

Ankoraŭ demando al la Japana Esperanto Instituto: la eŭropa publiko avidas pri la veraj valoroj de la japana

literaturo, ĉu ne estus pli ĝuste tradukigi tiajn verkojn? Kaj, ĉu antaŭ eldono de iu libro ne estus utile konsulti eŭropan fakulon?

Ludoviko Totsche.

ITALO TOSCANI: RAKONTOJ POR GEKNABOJ. El la itala: R. Castagnino. 88 paĝoj. Eldonejo: A. Paolet. St. Vito al Tagliamento Italujo Prezo: 4.— liroj + 20% por sendkostoj.

Sunt lacrimae rerum: la aĵoj havas larmon, animon, tio estas la impresoj de la leganto dum la lego de tiuj ĉi rakontoj. Varmokula, mildkora poeto estas Toscani, kun helpema kompato al la suferanta vivo de la mizeruloj kaj malfortuloj. Kaj lia kompato inundas en la naturon, eĉ en la ŝajne plej senvivajn objektojn. Jen forlasita domo, jen sola cipreso, jen brila stelo helpas al la mizeruloj kontraŭ la kruela indifereco de la sorto, aŭ de la malbonuloj. Amo estas la ĉefmotivo, kiu regas en tiuj ĉi fabeloj, kaj kiu gajnas nian simpatian por la verkisto, kvankam multfoje la tendenco estas trovidebla, multfoje la apostolo venkas la poeton.

La traduko estas bonstila, kiel decas al libro destinita por knaboj. Tamen anstataŭ la plurfoje uzita »el-spiro« estus sufiĉinta »spiro«; la verbo »formalaperi« estas terura. En la esprimo »unu vesperon« la aŭtoro uzas »unu« kiel nedifinitan artikolon. Ĉu la 16 reguloj de la gramatiko estas tiom multe, ke oni tiel facile povas forgesi pri ili?

Oni bone agas, se oni legigas tiun ĉi libron per niaj esp-istaj knaboj.

Ludoviko Totsche.

LA ENIGMOJ. 16 paĝa kajero. 1000 premioj por la solvintoj! Eldonas: la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto.

La Internacia Cseh-Instituto aranĝas grandan enigmo-konkurson, kies partopreno estas tre utila, ĉar krom la multaj premioj, oni ludante, cerbumante, nerimarkante lernas multajn novajn vortojn esperantaj kaj pasigas kelkajn agrablajn horojn dum la solvo de la ruzaj enigmoj.

RAFAEL DE SAN MILLAN ALONSO: MIA POEZIO. 64 paĝoj. Eldonis: Hispana Esperanto Asocio. 1932. 1.— fr. sv.

De mortuis nil, nisi bene: pri la mortintoj diru nur bonon! Oni eldonis tiun ĉi poemkajeron je la memoro de l' fervora hispana samideano: do ĉi foje la kritiko silentu. La libro certe interesos la personajn amikojn de l' mortinto, sed mi ne pensas, ke ĝi povus allogi pli larĝan publikon. Tamen mi notu la titolon de la plej bona poemo en la volumo, la soneton »Moralisto«, kiun mi nepre envicigus en kiun ajn antologion de nia originala poezio.

Ludoviko Totsche.

UNUA LEGOLIBRO. Eldono de SAT. 23. Rue Boyer, Paris XX. 102 p. Prezo: 1 mkg. Kompilis: N. Bartelmes.

Tiu ĉi legolibro estas tre varia. Ĝi donas multajn interesajn kaj enpensegajn rakontojn, fabe'ojn, priskribojn, poemojn, sciencajn traktadojn, karikaturnajn ilustraĵojn ktp. por laboristesperantistoj.

La ĉefa merito de la verko estas, ke ĝi donas lingvajn rimarkojn post ĉiu legaĵo el kiuj oni multon povas lerni, analizante diligente la enhavon de la ĵus legita teksto. Tre rekomendinda lego- kaj lernolibro por kursoj kaj studrondoj proletaĵoj.

P. P.

DI INTERNACJONALE HILFS-SPRAACH de Dro A. Goldburt. (La internacia lingvo). Eldono de Vilna Esperantista Societo »Universo«. 24 paĝoj. Prezo: 30 groŝoj polaj.

Tre bona propaganda broŝuro por judoj. Klare kaj konvinke la aŭtoro prezentas ĉiujn popularajn argumentojn kaj avantaĝojn de Esperanto. Utila propagandilo en la mano de ĉiu esperantisto, aganta inter judlingvanoj.

I. Lejzerowicz.

IDO KAJ ESPERANTO

Principa kontraŭeco

— Prof. E. Grosjean-Maupin —



Ĉiu reklamisto scias, kiel grava estas trafa elekto de la nomo por la reklamota afero: multaj komercistoj kaj industriistoj dankis sian sukceson nur al ia lerte elpensita titolo aŭ reklama frazeto.

La kreintoj de Ido, elektante tiun nomon por la nova lingvo, montris, ke ili estas almenaŭ tre lertaj reklamistoj, ĉar la plej efika batalilo de Ido kontraŭ Esperanto estas ĝuste tiu ĉi nomo »IDO«, kiu erarigas ne nur la neesperantistan publikon, sed eĉ ankaŭ kelkajn Esperantistojn, kredigante, ke la lingvo IDO estas ja ido kaj filo de Esperanto, bazita sur tiaj samaj principoj, kiel la patro, kaj diferenciĝanta nur per flankaj, malĉefaj, facile ŝangeblaj detaletoj. Memkompreneble estas, ke Ido, estante nur posta formo de Esperanto, estas pli perfekta ol ĝi, ĉar la filo, naskiĝinte pli malfrue, povis profiti la antaŭan sperton de la patro kaj evoluinte pliboniĝis.

TIO ESTAS MALVERAĴO. Ido ne estas nek povas esti filo de Esperanto; ĝi eĉ ne estas nek povas esti bastardo de Esperanto, pro tio, ke, estante bazita sur principoj ne nur tute diferencaj je tiuj de Esperanto, sed eĉ tute kontraŭaj al ili, ĝi ne apartenas al la sama lingva familio. Tiun malsanfamaliecon kaj absolutan kontraŭecon estas facile konstati, konsiderante la principojn de Esperanto kaj komparante ilin al la principoj de Ido:

1. Primetoda principo: PRAKTIKECO.

Zamenhof ĉiam juĝas la lingvajn demandojn el vidpunkto praktika, ne teoria; li ĉiuokaze rezonas kiel multsperta lingvuzanto. »Neniam gvidu vin, li diras, per konsideradoj teoriaj, kiel ajn belaj ili ŝajnas... Senfrukta kaj danĝera estas la sekvado de teoriaj principoj, se ni ne demandas nin, kian praktikan signifon ili havas. Tio, kio en la teorio ŝajnas tre bona kaj trovas aprobantojn, en la praktiko ofte havas nenian signifon.« La sperto sciigas al li, ke ĉiu idealo de perfekteco estas nur individua, pli malpli arbitra, kaj aliĝas kun la personoj tiamaniere, ke nenia akordiĝo estas iam efektivebla inter la diversaj teoriistoj; nur la neeviteblaj bezonoj de la praktika uzobeco kapablas trudi vole nevole al ĉiuj komunajn kondiĉojn kaj nediskuteblajn regulojn.

MALE, Ido ĉiam juĝas la lingvajn demandojn el vidpunkto abstrakta kaj teoria; ĝi konstante rezonas kiel matematikisto aplikanta al la lingvaj, nature malsimplaj, multflankaj kaj interplektitaj aferoj la rigidan, sencedan kaj senkompromisan, tie ĉi netaŭgan, matematikan met-

odon. Ĝi celas lingvon konforman al nure teoriaj principoj, lingvon idealan kaj teorie perfektan.

2. Ĉefa principo: FACILECO.

Zamenhof persiste opinias, ke la unua kaj plej grava kondiĉo por lingvo internacia estas la plej eble granda facileco. Estas nepre necese, li ripetas multfoje, »ke la lingvo estu eksterordinare *facila*«. Li rigardas la internaciecon de la vortaro nur kiel unu el la diversaj uzeblaj rimedoj por atingi la plej grandan facilecon.

MALE, Ido rigardas la internaciecon de la vortaro kiel la plej superan kaj esencan regulon de la internacia lingvo kaj kiel absolutan senkondiĉan principon. »Parolante nur pli la necesega facileco de la internacia lingvo, oni malprave silentas pri la *esenca principo: la internacieco de la formantaj elementoj*... Ĉiuj radikoj devas esti kiel eble plej internaciaj... La lingvo internacia devas submeti sin *plej severe* al la regulo de internacieco, eĉ de la *maksimumo de internacieco*... La maksimumo de internacieco estas la idealo de la lingvo«.

3. Dua principo: FACILECO POR ĈIUJ.

Difinante la facilecon, pri kiu li parolas, Zamenhof precizigas sian penson: la lingvo devas esti kiel eble plej *facila* »por ĉiuj«, eĉ »por nekleruloj«. Li klare konscias pri la malsameco inter la facileco, kiun li celas, kaj la facileco, kiun celas Ido: »Tute ne estas bezone, li diras, ke, kiel opinias multaj pli novaj projektistoj, la instruistaj lingvistoj povu tuj kompreni tekston skribitan en lingvo internacia. En tia afero la instruitaj lingvistoj ludas la *lastan rolon*, ĉar por ili ja tia lingvo estas *malplej bezona*«.

MALE, Ido, en siaj propagandiloj, precipe fieras pro tio, ke, »estante tre analoga al Esperanto, ĝi tamen superas Esperanton *pro sia tuja komprenebleco*«. Sed la idistoj forgesas aldoni, ke tiu ĉi mirinda tuja komprenebleco, aŭ, pli ĝuste, divenebleco, koncernas *nur la »poliglotojn*«.

4. Tria principo: DERIVADO NE EKZISTAS EN ESPERANTO.

Ĉar »en nia lingvo ĉiu parto gramatika prezentas apartan vorton«, la malsimplaj vortoj estas nepre formataj nur per KUNMETADO, neniam per derivado. Sekve neniu ajn regulo pri derivado, kiel ekzemple la regulo pri renversebleco, povas koncerni Esperanton. Sro Couturat plene eraras kaj erarigas la legantojn, kiam li asertas, ke »la sistemo de la derivado en Esperanto estas sendispute la plej karakteriza trajto de tiu lingvo.« Kontraŭe, la plej karakteriza trajto de nia lingvo estas ĝuste la NEEKZISTADO de iu ajn derivado. Neniam pri ia derivado parolis Zamenhof, kaj, en la jaro 1913, la Akademio oficiale deklaris, »ke la vortfarado de Esperanto estas fondita sur la konstruo de ĉiu aparta vorto kaj ne sur tiel nomitaj reguloj de derivado.«

MALE, en Ido la *derivado* estas la plej grava kaj plej ofta procedo de vortfarado kaj Sro Couturat verkis specialan »traktaton pri derivado en Esperanto« konscie aŭ nekonscie konfuzante siajn proprajn teoriojn kun la ideoj de Zamenhof kaj malprave altrudante al Esperanto procedon, kiun efektive ĝi ne konas, kaj regulojn pri derivado, kiuj tute ne povas konveni al lingvo ne uzanta la derivadon.

Kvara principo: SENABSOLUTEKO KAJ SENRIGIDECO DE LA PRINCIPOJ KAJ REGULOJ. Zamenhof, ĉiam celante kontentigi ne la postulojn de abstraktaj

terioj, sed la malsimplajn diversflankajn bezonojn de la praktiko, konstante ripetis la konsilon: »Ĉio devas esti en ĝusta mezuro«, kaj li aplikas tiun ĉi rezervon al ĉiuj principoj kaj gvidreguloj. Oni devas »kunigi kaj konsentigi inter si diversajn principojn... Esperanto konsentigas ĉiun principon laŭ mezuro de ebleco, penante plej zorge, ke ĝi ne kontraŭagadu al aliaj pli gravaj principoj.« Li opinias, ke lingvo internacia devas konsentigi ne nur la postulon pri logikeco, aŭ ian ajn alian postulon, sed ankaŭ »ĉiujn aliajn postulojn, kiuj povas esti farataj al lingvo internacia« kaj kiujn tute ne zorgas la Idistoj, ekzemple la »naturecon, vivipovecon, flekseblecon, sonorecon, k. t. p.«

MALE, Ido rigardas siajn principojn kiel nepre absolutajn kaj senkondiĉajn kaj, laŭ la rimarko de Zamenhof mem, ĝi »penas plibonigi unu ian flankon de la lingvo, oferante por tio ĉi ĉiujn aliajn flankojn.«

Tiun ĉi superan ĝeneralan regulon de »ĝusta mezuro« Zamenhof precize aplikas mem al kelkaj apartaj demandoj, logikeco, komuna uzado, unusignifeco, idiotismoj, k. t. p.

Li malkonsilas la »tro grandan logikecon«, li ne akceptas la logikaĵojn, »kontraŭ kiuj protestas lia lingva sento«; li rekomendas, ke »nia lingvo ne estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem katenus... Ĉar la tuta esenco, de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi pli gravan rolon ol seka teoria logikeco... Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto de bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon absolutan, tiam la libera uzado de lingvo fariĝos tute ne ebla.«

Sammaniere, kvankam Zamenhof rigardas la unusignifecon de la vortoj kiel ĝenerale taŭgan kaj preferindan, kvankam li plej ofte unusignifigis la radikojn, tamen tiun ĉi regulon li aplikas ankaŭ »en la ĝusta mezuro« kaj sen ia absoluteco. Tial troviĝas en la Fundamenta Universala Vortaro kelkaj radikoj, kiuj estas nur ŝajne unusignifaj, ĉar ili estas tradukitaj per nacia vorto, kiu estas plursignifa. La Vortaro de *Bein* kaj la PLENA VORTARO de SAT eĉ apartigas per ciferoj la diversajn signifojn de la plursencaj radikoj.

La samo fariĝas pri la idiotismoj: kvankam Zamenhof konsilas traduki la naciajn apartaĵojn per esprimoj klaraj por ĉiuj kaj internacie kompreneblaj, tamen li ne ekstermas senkondiĉe la idiotismojn, t. s. la ne plene logikajn esprimojn. Li tute precize deklaras, ke »ankaŭ en Esperanto troviĝas diversaj idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj Esperantistoj ilin kontraŭbatalas, ĉar lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen vivo kaj tro peza.«

MALE, Ido tute ne zorgas pri interkonsento nek pri komuna uzado; ĝi konstante atentis nur la teoriantan rigidan logikecon, kiun ĝi ofte malprave konfuzas kun la klareco kaj facila internacia komprenebleco; postulante severan unusignifecon, ĝi malpermesas la plursignifecon, ĝi malpermesas la plursignifecon de la radikoj kaj vortoj: »Tio, kio distingas Idon, estas la absoluta internacieco... Ido ne estas bazita sur la komuna uzado, kiel la naturaj lingvoj, sed nur sur la logiko, kaj la tutan logikecon de la lingvo konsistigas la principo de unusignifeco.« Ido pretendas absolute forigi la idiotismojn kaj, deklarante, ke »la idiotismo estas la plej danĝera malamiko de la lingvo internacia«, ĝi fieras, ke la »propra karakterizilo de tiu ĉi lingvo estas, ke ĝi havas nenian idiotismon, nek en la gramatiko, nek en la formado de la vortoj, nek en la frazeologio.«

Knabina printempo

— Nikolao Hovorka —

*Printempe ekfloras la dolĉaj knabinoj
Simile al herboj, matenen klinitaj,
Al birdoj flugemaj, al nuboj forglitaj,
Al mi! surĉielaj vesperaj karminoj.*

*Kaj ili forgesas ĉugrenon kaj peron,
Ilian animon brileto jam movas,
Elsongan ŝabelon la koro retrovas
Kaj kantas esperan printempkantilennon.*

*Rigardas kun ĝoj' el okuloj anĝelaj
Fil'noj de Dio, filinoj de homoj,
Knabinoj, naskitaj, kreskintaj en domoj
Kelkiam plenumaj, plej ofte malhelaj.*

*Sed kiam printempas, jen ili memoras
Nur sunon, feliĉon, herbejon, a'aŭdon,
Kaj tloras la mondon, kaj scias nur laŭdon,
Kaj floras kaj floras kaj floras kaj floras.*

Murdita patrino

— Nikolao Hovorka —

*Jam tra la nazo e' rampis vermo,
Jam la virino en tombo putris.
Murdita la vivo. Sed viva la ĝermo!
Jen ekmoviĝis! — Kion vi nutris,
Ho morta virino en tombo mizera?
Kaj venis printempo, kaj kreskis la ido
El morta virino, el forto utera.
Ĉielo aperis jen ruĝa, jen blua,
La nuboj fuĝflugis dum naŭ monatoj
Dum ploro kaj rido, dum sun' kaj pluŭbatoj.
Printempis kaj venis violo unua.
Kaj estis komenco kaj ne estis fino!
Kaj naskis infanon murdita virino,
Ke venĝu la filo per sango kaj sabro,
Ke lia patrino nur estis kadavro.*

Ni sekve rajtas diri, ke Ido tute malprave kaj malvere distrumpetas, ke ĝi »ne estas nova lingvo«, ke ĝi estas »nur plisimpligita kaj plibonigita formo de Esperanto, kiu konservis la esencajn principojn, al kiuj Esperanto dankas sian sukceson«. Tio ESTAS MENSOGO. En la realeco Ido estas lingvo kerne kaj esence diferenca de Esperanto, malgraŭ ŝajna supraĵa kaj ekstera simileco; ĝi ne havas pli da rajto por pretendi sin plibonigita formo de Esperanto ol ekzemple la latina senfleksia lingvo de Sro Peano aŭ la lingvo Apolema, aŭ Dilkok, aŭ Novilatin, aŭ iu ajn el la ceteraj proponitaj internaciaj lingvoj, kiuj neniam reklamis sin idoj kaj formoj de Esperanto. Ido similas la kukolon, kiu, ne estante kapabla konstrui mem neston, metas siajn ovojn en la nesto de alispeca birdo. Nepre devo estas por la Esperantistoj forjeti la fremdajn kukolajn ovojn kaj denunci senhezite la artifikan kaj hipokritan taktikon de la Idistoj, konsciente, ke tiu, kiu akceptas kaj trovas taŭgaj la principojn de Esperanto, ne povas akcepti samtempe la pretendatajn plibonigojn de Ido, bazitajn sur principoj tute kontraŭaj.

Arto poezia

C. E. R. Bumy

Sesa ĉapitro

Mi jam parolis pri la nigra listo
De tiu kaj ĉi tiu kritikisto,
Pri harfendadoj subtilgramatikaj,
Superekzaktaj kaj superlogikaj.
Jes, al sinjoro iu vort' aŭ formo
L' okulojn foje pikas kvazaŭ dorno,
Kaj li, kriante en ekstaz': Heureka,
Ĝin ruĝkrajonas kaj deklaras peka,
Kaj pri ĉi temo plu neniam cedas,
Ĝin terenbatas, per genuoj knedas
Sovage, kiel iam en turniro
La malamikon kruda kavaliro.
Ĉu lin konvinki? Malfacila tasko.
La vortoj ne penetras tra la kasko.
Vi vane krios: »Ĝin ja ĉiu uzas!«
Eĉ se li aŭdus, lin vi ne konfuzas,
Li plue rajdas al batalo sprone,
Rekrias al vi: »Tiom pli malbone!«

Sed ĉiun malkomprenon mi korektas:
Tiujn sinjorojn ege mi respektas.
Jes, la sinjorojn mem. Sed la »principojn«?
Ne, eĉ se oni rompos miajn ripojn.
Mi asertegas, malgraŭ ĉiu klingo,
Ke la logiko servu al la lingvo,
Kaj ne la lingvo estu ĝia sklavo.
Do, malgraŭ ĉiu logikparagrafo,
Se io estas jam familiara,
Natura, kaj facile, simple klara,
Kaj donas bonan helpon por koncizo,
Tion sentime uzu, kun devizo:
De nia lingvo for la trudkitelon!
Vi tute rajte faros ĉi ribelon,
Ĉar ĉio prave vivas kaj funkcias,
Kion la vivo kaj kutim' sankcias,
Spite al subtilkapaj ambicioj
Vivu la vivaj lingvaj tradicioj!
Ja, akceptinte ĉi harfendojn tute,
Paroli oni povus nur balbute,
Ni ĉiam sentus kvazaŭ pulo-pikon:
Ve, ĉu mi ne ofendis la logikon?
Kaj nia Esperanto estus vere
Plej malfacila lingvo tutatere,
Rilate al pezemo kaj rigido
Envie hontus antaŭ ĝi la Ido.
Ĉefpostulat': viveco kaj elasto.
Kaj vane volas kelkaj, por balasto,
Matematikon en la lingvon miksi,
La lingvo vivas, vivi volas. *Dixi!*

La lingvo vivas, kreskas kaj burĝonas,
Kaj frukte — ankaŭ novajn vortojn donas.
Tre delikata tem': *neologismo*,
Kiun tra ege malamika prismo
Rigardas kelkaj kaj se pri ĝi temas,
Plej indigneme ili anatemas.
Kontente pri plej eta lingvo-kerno,
Aŭ pro la abomeno al vortlerno,
Aŭ time pro la lingva malfacilo,
Predikas ili tuj pri malutilo,
Kaj permesante ĝuste nur sufiĉon,
Ili deklaras virto la malriĉon,

Nu, certe, por agento tra la mondo,
Kaj por kolekto kaj por korespondo,
Eĉ por bezonoj de la ama flirto,
Tiu malriĉ' facila estas virto.
Sed la poeto, dum la strebo arta,
La vortprovizon sentas iom Sparta,
Kaj trovas, ke per ĝi nur balbutante
Interpretigus la vortriĉ' de Dante.
La konstruanto de l' litera turo,
Kredante, ke li penas por Futuro,
Ne povas pensi dum la alta kanto
Pri la stumbladoj de la komencanto.
Li volas forĝi lingvon, riĉe brilan,
Al grandaj lingvoj indan kaj similan,
Ne lingvon palan, platan kaj senkultan,
Lernindan, ĉar ĝi ŝparas penon multan,
Sed lingvon grandan, pompan, altnivelan,
Lernindan, ĉar de riĉaj beloj ŝvelan.
Ĉetere, por raketi per la rimoj,
Li ege ĝojas pri la sinonimoj,
Kaj, por eviti dum traduk' aborton,
Li pene serĉas pli mallongan vorton.
Do, li plezurigas pri la vorto nova,
Pli nuancrica kaj pli esprimpova,
Eĉ, tiajn kvazaŭ ĉasas li per hoko,
Por gardi ilin zorge en la stoko,
Ĉar vorto estas lia materialo,
Kaj ĝi necesos eble por falbalo.
Kaj, krom ke tiajn vortojn li karesas,
Eĉ mem li kreas novajn, se necesas,
Preninte ilin lerte el fontlingvoj
De Esperanto, per zorgemaj fingroj.
Kaj se lin oni batus tro malmilde,
Li povas preni mem la Majstron ŝilde,
Ĉar, ke li cedis al vortfaraj tento,
Atestas novaj vortoj, multaj centoj;
Ne sole vortoj, kiuj nepre mankis,
Sed ankaŭ, kiuj la naskiĝon dankis
Al koncizem' kaj »esprimpov-manio«.
Jen: *kalva, ŝrumpi, strikta, greg', ferio*.

Ekzistas krome kelkaj vortoj *malaj*,
Kiujn poeto sentas grize palaj,
Ĉar per la mala marko de l' direkto
Sangiĝas nur la senc', ne la efekto.
Eĉ, estas mia sento malgraŭvola,
Ke la *ma'mola* molas pli ol *mola*.
Poste, minacas min erar' eterna:
Fini kunsidon per parol' *malferma*.
Ĉu povus iu pri la vort' malcerti,
Se kun Grabowski dirus ni: *aperti?*

Kaj jam videblas certe la tendenco
De novaj vortoj por la mala senco.
Ke ni preferas: *fora, misa, eta*,
Tio jam pruvas pri konspir' sekreta.
Grabowski (li ne verkis pri negreto)
Ekuzis jam: *disipi, rara, noco*,
Neglekti kaj *obstaklo* kaj *humida*.
Kaj, ho, *horora* sento antaŭvida,
Jen, *trista, dura* staras jam sur sojlo,
Kaj *morna, plumpa, pigra* kaj *orgojlo*,

Eĉ, povra, kaj proĥibi, kaj obskura.
Ho, kia listo drasta kaj terura!
Fermu la libron, ĵetu ĝin alplanke,
Ŝangu poŝtkartojn (marko nur bildflankel!).

Sed eble tamen havos vi komprenon:
Ke alta ĝuo indas altan penon,

Ne povas esti arta fundamento
La triumfigo de l' maldiligento.
Kaj ke ne portas tiom da danĝero
La vortabund', kiel la vortmizero.
Aŭ, se al riĉ' rifuzas ni la rajtojn,
Ni ne flugigu poeziajn kajtojn,
Ni iru do, rezigne pri l' beletro,
Al la Eternaj Kalendaroj retro.

Ni vivas kiel la kolomboj

Moderna tragikomedio en duonhoro

— Julio Baghy —

Kvara sceno

MAKS, ZAZA, HUGO.

HUGO (*aperas ĉe la pordo*): Zaza, la bebo ploras.
(*Turmenta silento. Maks kaj Zaza explore rigardas la mienon de Hugo. Ĝi esprimas nescion.*)

ZAZA (*kun altrudita rideto*): Ĉu la bebo maltrankviliĝas?
HUGO: La bebo malsatas. La bebo deziras vidi sian panjon.

ZAZA (*ankoraŭ luktanta kun siaj sentoj*): Jes! Tuj!
Atendu momenton!

MAKS (*kun malica rideto*): Sinjorina moŝto, la patrino devo atendas vin.

ZAZA (*iom tirante la vortojn por diveni la senton de Maks*): Ho, jes, sed... sed ĵus mi memoras, ke vi menciis pri via okupateco, rendezuo ĉe la Ekspozicia Komitato kaj... kaj mi volas adiaŭni vin. Versajne vi tre rapidas kaj eble eĉ vi jam iomete malfruis... Ĉu ne?

HUGO: Sed kial vi memorigas lin pri la foriro. Ankaŭ mi ĝojus, se mi povus iom babiladi kun vivanta artisto. (*Al Maks*) Sinjoro, bonvolu resti. Estos agrable por mi.

MAKS (*fikse rigardante Zaza-n*): Verdire, mia vizito koncernis vin ambaŭ.

Ekstera infanplorado

HUGO: La bebo malsatas. La bebo vokas sian panjon.

ZAZA (*aplombe*): Ĉu vi restos?

MAKS (*torture*): Via edzo tiel afable petis min resti, ke mi ne povas rifuzi tian ĝentilecon.

ZAZA: Do bone! (*Ŝi iras al la pordo de la dormĉambro. De tie ŝi turnas sian rigardon al Maks. Signifplene*): Por mi egale!

MAKS: Sinjorina moŝto, la patrino devo...

ZAZA: Same kiel ĉe vi la patra... Ĉu ne? (*Ŝi foriras*)

Kvina sceno

MAKS, HUGO

HUGO (*post ioma paŭzo*): Ĉarma patrineto. Ĉu ne?

MAKS: Jes, vi pravas. Ŝi estas pli ĉarma ol en sia knabineco. (*Li prenas sian cigaredujon*) Bonvolu! ... Egipta importajo.

HUGO: Ĉu vere? Pardonu, mi ne dubas. (*Li prenas unu*) Verdire, mi ne scias, ĉu... ĉu... Ĉerte vi scias, ke mia edzino ne toleras la fumon.

MAKS: Ĉu vere? Io nova antaŭ mi. Kiel knabino ŝi neniam protestis kontraŭ la fumado.

HUGO: Efektive, kiel knabino, ŝi ne protestis, eĉ ŝi donacis al mi skatolon da ortubaj cigaredoj (*Vidante, ke Maks serĉas alumeton li elpoŝigas sian fajrilon*) Jen, mia »memĉagrenilo«!

MAKS (*ridante*): Trafe! Guste ĝi ne funkcias tiam, kiam oni pleje bezonas.

HUGO: Kiel la homa volo. Ankaŭ ĝi ĝuste mankas tiam, kiam ni pleje bezonas. (*Li ekfunkciigas la fajrilon kaj prezentas fajron al Maks*) Bonvolu!

MAKS (*ekfumante*) Dankon! ... Nu, kaj vi?

HUGO (*iom hezite*): Nu, bone. Ankaŭ mi... pro la gasto. (*Li ekfumante*) Ĝi estas bongusta, sed iom malforta. Kompreneble, mia tabako... Bonvolu eksidi!

MAKS: Dankon! (*li eksidas*)

HUGO (*momenton rigardas al la pordo de la aormoĉambro, poste ankaŭ li eksidas*) Jen, la bebo silentas... Jes ja, la panjo estas ĉe ŝi.

MAKS: Jes!

HUGO (*rigardante antaŭ si post ioma paŭzo*): Jes... (*Lia konduto klare montras, ke li dezirus komenci la konversacion, sed li ne scias kiamaniere*) Nu, la homa volo estas kiel la »memĉagrenilo«. Ĝi ne ĉiam funkcias.

MAKS (*sektone kaj iom meditante*): Ne.

HUGO (*sammaniere*): Ne.

MAKS (*post paŭzeto*): Vi vivas tre bone kaj komforte.

HUGO: Jes, komforte... Ni havas du ĉambrojn kaj la bopatrino.

MAKS: Ĉu ankaŭ ŝi apartenas al la domo?

HUGO (*kun rideto*): Ne tute, sed preskaŭ... Krome ni havas kuirejon. Sincere, ĝi estas nur kuirejeto, ĉar la antaŭĉambro mi faris forpreninte iom el la kuirejo, sed tamen... tamen... Krome ni havas gasan, akvokondukilon kaj... kaj — vi scias ja kion!?

MAKS: Jes. La bopatrino.

HUGO (*bonhumore*): Ne, ne! Cetere ŝi nun ne estas ĉe ni. Mia edzino havas ankoraŭ kvar fratinojn kaj ŝia patrino laŭbezone pasigas pli malpli longan tempon ĉe ĉiu sia filino. Antaŭ semajno ni ricevis telegramon de Milla pri baldaŭa familia okazontaĵo kaj post Milla sekvas — laŭ la aŭspicioj — Margareta. Do antaŭvideble mia bopatrino revenos al ni nur post jaro.

MAKS (*iom mire*): Ĉuuu? Jam post jaro?

HUGO (*kun embarasa rideto*): Nu, ne certe, sed versajne. Vi scias — sed kiel vi sciis? — mi tre amas la etajn homplantaĵojn. Mi estas ja — patrinbesto. (*Li rigardas al Maks kaj ekridas*) Patrinbesto. Ĉu ne, sinjoro?

MAKS (*embarasite*): Mi ne komprenas.

HUGO (*kun la sama trankvilo*): Bone, bone, sed vi ne dubas pri tio. Ĉu?

MAKS (*kun pliiganta embaraso*): Ne, ne, mi ne komprenas... Pri kio vi aludas per tiu vorto?

HUGO (*iom akcentante la vortojn*): Sinjoro, vi forgesis, ke la pordo ne estas tre dika kaj ĉiu vorto plilaŭta penetras tra ĝi... Nu, mi estos pli singarda. Mi parolos tute mallalte. Eĉ tiel ni komprenos unu la alian. Ĉu ne?

MAKS (*salte leviĝas kaj kavalire pozas*): Mi estas preta doni kontentigon al vi.

HUGO (*trankvile kaj simple*): Bonvolu residiĝi... Certe miaj kolegoj tre fierus pri mi, se... Sed mi ne ŝatas la hazardojn. La hazardoj ofte estas maljustaj. Mi ne deziras plimalbeligi mian vizagon, nek truigi min kiel la trambiletan. Estus malsaĝe, tute malsaĝe! ... Bonvolu residiĝi kaj aŭskulti min.

Ni interparoladu, kiel du homoj. Ne kiel du mezepokaj kavaliroj, sed kiel du homoj, kiujn la hazardo renkontigis.

MAKS (*residiĝas, kun ironia rideto rigardas at Hugo*): Mi ripetis, mi estas je via dispono kaj preta doni kontentigon.

HUGO (*iom ĝenite de la konduto de Maks*): Sinjoro... Nu kiel diri? ... Jes! Mi volas paroli ne al viro, sed al homo. Lasu tiajn esprimojn. Mi ne legis sufiĉe da romanoj por konvene respondi, sed dum mia mallonga vivo mi jam travivis tiom, ke mi ne dezirus oferi la nunon por malcerta kaj suferplena estonteco.

MAKS (*ironie*): Mi ne dubas pri tio.

HUGO: Ne! Vi ne bone komprenis min... Mi tre amas mian edzinon kaj ankaŭ ŝi — nu, laŭ siaj kapricaj inklinoj — amas min. Eĉ ŝi mem ne konscias sufiĉe pri sia amo al mi, sed ŝi estus treege malfeliĉa, se ŝi perdis min. Ne miru pri tio. Mi konas la vivon ne el romanoj.

MAKS (*pro la trankvilo de Hugo perdas ĉiam pli sian arogantecon*): Bone, mi komencas kompreni vin, sed ne tute klare... Finfine, kion vi deziras de mi?

HUGO: Nur tion, ke ne doloru al vi pli, ke la infano ne similas al vi, ol doloras al mi, ke ŝi ne similas al mi... Ne rigardu tiel konsternite!

MAKS (*tute embarasite*): Sed sinjoro... Ba, kiel vi povas imagi, ke tio doloras al mi. Finfine la infano... la infano...

HUGO (*fariĝas ĉiam pli kaj pli certa en sia konduto kaj sinteno. Li sentas, ke li venkos ĉe la fino*): Mi konas vin tre bone. Mi scias, kiu vi estas kaj kian rolon vi havis en la vivo de mia edzino en ŝia knabineco. De kiu mi scias? Ne de mia edzino. Ŝiaj plej bonaj amikinoj rapidis bonvole informi min tuj post nia geŝianĝo. Pri ĉio kaj ĉiu. Ĉu vi komprenas? Pri ĉiu.

MAKS: Sed mi certigas vin, ke...

HUGO: Nenion certigu! Vi finludis vian rolon kaj vi havos neniam plu similan rolon en ŝia vivo. Tion mi certigas al vi.

MAKS (*momente sentas sin ofendita*): Nenion certigu! Tio dependas ne de vi,...

HUGO (*trankvile*): Kaj ne de vi... Cetere vi venis por vengi. Ĉu?... Sed kion kaj pro kio? Momente inter ni ne estas granda diferenco. Vi preterlasis la okazon kaj mi... nu, mi iomete malfruis. Sed la pasintaj okazaĵoj apartenis al la Vivo. La nuno apartenas sole al la Amo.

MAKS (*delikate moke*): Vi parolas tiel, kvazaŭ la Amo ne apartenus al la Vivo.

HUGO (*tre simple, sed kore*): Mi pensis jam ofte pri tio. Ne ridu pri mi, sed mi trovis, ke la Amo, la vera kora amo ne apartenas al la Vivo. La Vivo estas ĉiam malbela, turmenta, embuska. La Amo estas ĉiam bela, karesa kaj senpretenda. En la Vivo ĉio povas montriĝi monstra, sed en la Amo eĉ la monstroj povas plibeligi. Mi memoras, en mia vilaĝo vivis stranga paro. La edzino estis ĝibulino, la edzo havis apenaŭ homan vizaĝon pro infanaĝa akcidento. Kaj, vidu, tiuj du homoj fidele kaj ĝistombe amis unu la alian. La amo en ilia rigardo malaperigis la difektojn. La amo estas afero de du geamantoj. La Vivo ne komprenas tion, ĉar la Amo ne apartenas al la Vivo.

MAKS (*iom surprizite rigardas la sensignifan figuron de Hugo*): Individua filozofio... Verdire, mi ne supozis, ke...

HUGO (*senkulpigante sin*): Individua... jes... Verdire mi ne scias, kion oni diras pri la Amo en la Panĉarandata, en tiuj kvin libroj, kiuj kune faras unu libron kaj mi ne konas la opinion de la Fratoj Karamazov, nek tiun de Onklino Betty, sed mi sentas, ke mi ne povus vivi sen mia edzino. Ĉu vi komprenas min?

MAKS: Jes. Mi komprenas vin. Vi faras kompromisojn al la Vivo por... por...

HUGO: Ne serĉu la ĝustan esprimon. Malfacile ĝin trovas tiu, kiu neniam amis, sed ĉiam estis amata... Vi kaj mia edzino estas egale egoistaj kaj pro tio vi kune neniam povis renkonti harmonion. Mia edzino kaj mi... Nu, kion diri?... Kial vi rigardas min tiel konsternite?

MAKS: Ne konsternite, nur mire. Mi konfesas, ke via parolo al mi ŝajnas iomete trafa.

HUGO (*sincere*): Mi ĝojas, ke fine mi sukcesis trovi la vojon al la homo. Mi estos danka. Mi pruvos al



Beciĉ

En la pentrejo

Amnokio **Anton Wildgans †**

vi, ke la rozo, perdita de vi, estis destinata al miaj zorgoj kaj ne al zorgoj de iu alia. Ĝiaj dornoj ne vundas min, ĉar mi donas ĉion, kion la vivo de la rozo postulas.

MAKS: Mi ne komprenas vin. Tro metafore vi esprimis vian penson.

HUGO: Metafore?... Hm, pardonu, kion signifas la vorto?

MAKS: Bilde, bildece...

HUGO: Ah, jes! Pardonu, sed mi memoris pri mia patrino kaj... Nu, tion mi rakontos al vi. Estas necese, ke mi parolu pri ŝi, ĉar tiamaniere vi komprenos pli facile min kaj mian karakteron.

MAKS (*interesigante*): Bonvolu do!

HUGO: Mia patrino estis simpla vilaĝanino, gaja kaj bonkora. Iun tagon ŝi trovis infanon, bone vinditan ĉe sia sojlo. Ŝi rigardis jen al sia edzo, jen al la fremda infano. Kion fari? Senvorte ŝi akceptis la devon de la prizorgoj kaj neniam ŝi demandis, al kiu la infano similas.

MAKS: Mi komprenas. La infano estis vi. Ĉu?

HUGO: Ne! Mia frato aŭ duonfrato, se tiel pli plaĉas al vi. Tiutempe mia patrino estis apenaŭ kelksemajna edzino. Ŝi tre amis mian patron kaj amis nin, knabojn, egale. Se unu el ni meritis vangofrapon, ni ambaŭ ricevis ĝin. Se unu lernis malpli diligente ol la alia, ni ambaŭ egale sentis ŝian patrinan severecon: unu pro troa ambicio, la alia pro mallaboremo. Nu, tia ŝi estis. La komunaj riproĉoj kaj karesoj faris nin veraj fratoj.

MAKS (*mallaŭte*): Mi komprenas.

HUGO: Sed ne ĉion... Mia patrino pasie ŝatis siajn florojn. De frua printempo ĝis prujna aŭtuno ŝi zorgis pri sia ĝardeneto. Ŝi havis la plej belajn laŭsezonajn florojn en la vilaĝo... Foje inter la aĉetitaj florsemoj troviĝis semo de nekonata floro. Tiu floro — laŭ ŝia rakonto — estis eksterordinare bela. Mia patrino tre fieris pri ĝi. Sed ŝi ne nur fieradis. De najbaro al najbaro ŝi kuris kaj ĉiun fremdulon ŝi alparolis por demandi kio estas la nomo de la floro kaj kian flegadon ĝi bezonas. Ŝi malzorgis siajn bedojn, nur pri tiu sola, fremda, eble eĉ ekzotika floro ŝi havis konstantajn zorgojn. Tamen la ordinaraj floroj ne aspektis orfaj. Pri ili zorgis la naturo mem. Sed tiu fremda floro donis multe da klopodoj. Jen ĝi bezonis apartan ujon, jen specialan teron, jen pli da varmo, jen pli da akvo kaj mia patrino faris ĉion por konservi ĝin en plena pompo.

MAKS: Tre interese! Kaj ĉu ŝi sukcesis?

HUGO: Jes. La floro abunde burĝonis... Nu, mi estas la filo de tiu simpla vilaĝanino. En la urbo same simpla, nemultsignifa mi estas kiel ŝi estis en sia vilaĝo. Ŝi estis unu el la virinoj kaj mi unu el la plej grizaj oficistoj.

MAKS: Jes. Mi scias.

HUGO: Oficisto ĉe la Stata Saladministrejo... Sajnas al mi, ke la sorto volis favori mian modestecon. Ĝi plantis ekzotikan floron en mian vivĝardenon. La eksterordinara beleco de la floro surprizis min kaj mi sentas, ke ĝi ne tre konvenas al la simplaj floroj de mia vilaĝa bedo. Sed mi ŝatas ĝin, mi fieras pri ĝi kaj klopodas fari ĉion por ne malhelpi ĝian pompan evoluon. La hazardodonita floro estas kaprica. Ĝi bezonas varmon, liberan aeron, multe da vartado kaj mi fieras, ke ĝi pompas en mia ĝardeno.

MAKS (*post paŭzo*): Mi komprenas... La hazardodonita ekzotika floro... Sincere dirante, mi ne pensis vin tiel poetoanima.

HUGO: Ĉu poetoanima? (*Li ekridas*) Bone, ke mia edzino ne aŭdis vin. Ŝi mokus min pro tio. Nu, poetoanima mi ne estas, sed — mi diris ja al vi — la Amo ne apartenas al la Vivo. En la Amo ĉio estas bela, bona kaj facila.

MAKS (*penŝeme*): Kaj diru, ĉu vi kredas pri la sukceso?

*Jen estis nokt' unika, sen ripet' —
Ĉu vi ĉambreton nian jam forgesis?
Ekstere milde helis la stratel',
Lunbrilo majmona'a ĝin karesis,
Ondcedis la kurtenoj en kviet',
Per lum' surŝuti ilin lun' ne ĉesis,
Kaj de l' ĝardenoj freŝa bonodoro
Fluis nun supren en ĉi nokta horo.*

*Unuafoje tiam trov's nin
Ni solaj dum printempa nokto tia,
En la pokaloj altaj ŝaŭmis vin',
Kaj sangis la oranĝ' pro vundo sia,
Kandela lumo plenis je intim',
Malofte nur de l' buŝoj vorto ia
Ekglitis kaj ekfalas ĝis korfundo,
Sorĉante tie florojn en abundo.*

*Kaj tiam — nun mi ne memoras plu,
Vi vin hezite defendadi penis,
Kolektis hontorozojn mi kun ĝu',
Kaj vin per la plej arda pet' ekĝenis.
Mi scias nur: vin donis vi sen bru',
Kaj tiam ni, por dormo benoriĉa
Elkuŝis brust' ĉe brust' kun sent' feliĉa.*

*Ho, ne por longe! — Ree la sopir'
Per nova forl' en nia kor' ekflamis,
Kaj time demandadis ni, sen spir':
»Ĉu vi do efektive min ekamis?«
Vipate la ĉevalo de l' dezir'
Fajran senbridon de l' pasi' aklamis,
Kaj dum ĝi furioze reekkuris,
Ardis la lipoj, la palpebroj brulis.*

*Kaj tiam venis ĝene la maten',
De griza man' fantoma altrenite,
Kaj forviŝiĝis ĉia nun solen'
Kaj aliĝis la ĉambret' subite.
Sur niaj vortoj pezis ia prem',
La kor' silentis kvazaŭ konsternite
La sentoj lacaj, la vunditaj nervoj
Tro atentemaj iĝis por observo.*

*Malordigita estis tablotuk',
En la pokaloj al'aj vino restis,
El fruktoj velkaj jam elfluis suk',
Surplanke floroj disĵetitaj estis —
Odoris putre je dolĉeca muk'
Kaj ĉio pri malbel' grimac-atestis —
Mi ne memoras, kiel post ĉi horoj
Retrovis sian amon niaj koroj.*

El la germana: *Hilda Dresen.*

HUGO (*longe rigardas al Maks kaj iom hezite*): Jam antaŭe mi petas vian pardonon. Per mia malierta komparo mi ne dezirus ofendi vin aŭ iun, kiu staras proksime al vi... Sed nun parolas du homoj kaj ne du viroj. Ĉu?

MAKS (*kapjesas*): Parolu senĝene!

HUGO: Mi konas similan ekzotikan floron en fremda ĝardeno. Mi ne havas la honoron koni la ĝardenistinon, sed mi konas la floron, kies vivo bezonas varian atmosferon, multe da sunvarmo kaj tre multe da pacienco por konservi ĝian vivon kaj pompon.

MAKS (*tre mallaŭte*): Mi komprenas la aludon.

HUGO (*pli kurage*): Sen tiu ĝardenistino vi, sinjoro, formortus dum kelkaj semajnoj... Ankaŭ mia floro ne povus vivi sen tiu varmo, kiun mi donas al ĝi... Certe via ĝardenistino same sentas kiel mi, kvankam ŝi ne diras, ke la Amo ne apartenas al la malbela Vivo. Ankaŭ ŝi, eble dolore, fieras pri sia prizorgata floro.

MAKS (*kortuŝite, sed abrupte*): Sinjoro, mi venis ĉi tien por... por...

HUGO (*tre simple*): Ni ne parolu pri tio. Vi venis kaj vi foriros. Nenio okazis. Du homoj konatiĝis unu kun la alia. Nenio pli.

MAKS (*subite leviĝas*): Vi estas prava. Mi tre estimas vin... Senkulpigu min pro mia subita foriro ĉe via edzino, sed mi devas tre tre rapidi al la kuneveno de la Ekspozicia Komitato... (*Li ekiras al la pordo*) Ah, jes! Preskaŭ mi forgesis. (*Li elpoŝiĝas la honoran bileton.*) Bonvolu transdoni tiun bileton al via edzino por la morgaŭa malfermo de la Moderna Galerio menciante, ke la titolo de mia pentraĵo estas: »Bovinoj en aŭtuna nebulo«. Ne forgesu!

HUGO (*tre dankeme*): Ne, ne! Mi ne forgesos. »Bovinoj en aŭtuna nebulo« Koran dankon. Certe ŝi tre ĝojos. Ĉiam ŝi havas grandan simpation al la dombestoj.

MAKS (*kun ekflamanta ironio*): Mi ne dubas pri tio... Sinjoro, mi havis la honoron. (*Li ĝentile klinas sin kaj forrapidas.*)

HUGO (*postkurante lin*): Permesu, ke mi akompanu vin ĝis la pordo. La seruro de nia kolombejo estas iom komplika. (*Li foriras*)
(*La scenejo restas malplena dum momentoj. La staranta horloĝo batas la kvinan horon.*)

Sesa sceno

ZAZA, poste HUGO

ZAZA (*aperas ĉe la pordo de la dormoĉambro. Li silento kaj la malpleneco de la ĉambro surprizas ŝin. Piedpinte ŝi iras al la pordo de la kuirejo, subaŭskultas. En tiu momento Hugo ekstere ekfajfas la melodion de Toreadoro el la opero »Carmen«*): Strange, li fajfas. (*Ŝi ekiras al la tablo, sur kiu ŝi rimarkas la postlasitan bileton. Ŝia mieno ekvigligas. Longe ŝi rigardas antaŭ sin.*) Freneze kaj tamen... (*Ekĝemo*) Ho, Maks! (*Subite ŝi rekon-*

sciigas, la bileton ŝi metas sur la tablon kaj ŝanceliĝe ekiras al la kuirejo. Ĉe la pordo ŝi haltas kaj iom hezite, mallaŭte vokas sian edzon.) Hugo... (*Iom pli laŭte*) Hugo kara!... Tiel forte li fajfas, ke li ne aŭdas. (*Pli laŭte*) HUUUUGO!

HUGO (*ekstere*): Jes?... Ĉu la bebo...?

ZAZA: Si dormas... Hugo!

HUGO (*ekstere*): Tuj, mia kara! Jus mi metis la lakton sur la Primus-aparator. Jam estas la kvina.

ZAZA (*langvore*): Komprenekle, la lakton... Estas ja la kvina. Preskaŭ mi forgesis. (*Irante al la sofo ŝi denove prenas la bileton. Pala rideto flirtas ĉe ŝiaj lipoj*) La venĝo prokrastiĝis do ĝis morgaŭ... Egale! Por mi egale!

HUGO (*ekstere*): Tuj, kara mia! Tuj!

ZAZA (*remetas la bileton sur la tablon kaj iras al la sofo, eksidas*)

HUGO (*venas kun blanka antaŭtuko ĉirkaŭ sia talio*): Ĉu vi estas laca?

ZAZA (*distrite*): Ĉu laca? Jes. Mi estas laca... Ĉu li... ĉu li foriris?

HUGO: Jes, li foriris. (*Kun vigla tono*) Do, la bebo dormas. La etulino satiĝis kaj ekdormis. Nu, ankaŭ la panjo ricevos sian kafon kaj poste ŝi povos ripozi laŭ sia plaĉo.

ZAZA: Jes, ripozi laŭ mia plaĉo... Ĉu morgaŭ, morgaŭ li revenos?

HUGO: Mi ne pensas tion. Simple li foriris.

ZAZA: Li foriris... Pri kio li parolis?

HUGO: Ni babiladis iomete.

ZAZA (*torturate de la mallongaj frazoj de Hugo*): Pro Dio, Hugo, parolu! Kial vi ŝparas la vortojn? Kion li diris?

HUGO: Li petis min senkulpigi lin pro la subita foriro.

ZAZA (*iom hezite kaj tirante la vortojn*): Kaj ion alian... Ĉu?

HUGO: Vere, nenion interesan.

ZAZA (*montrante al la tablo*): Kaj tiu... tiu bileto sur la tablo?!

HUGO (*iom troiĝe*): Nu, vidu, preskaŭ mi forgesis. Honorbileto por ni ambaŭ por la morgaŭa malfermo de la Moderna Galerio. Li invitis nin por montri al ni sian novan pentraĵon.

ZAZA (*reveme*): Do tamen...

HUGO (*ŝerceme*): Ĉu vi eĉ ne ĝojas? Vi ŝatas ja tiajn kulturkomediojn.

ZAZA: Hugo, mi ne iros tien... Mi ne volas, mi ne



Babiĉ

Marbordo

povas... Mi estas tiel timema... Mi ne scias pro kio?

HUGO (*ridetante krie*): De kiam vi timas la dombestojn?

ZAZA (*ekalentas*): Dombestojn?! Mi ne komprenas vin.

HUGO (*iom ruze*): Ho, jes, mi tute forgesis mencii al vi la titolon de lia ekspoziciota bildo. »Bovinoj en aŭtuna nebulo«.

ZAZA (*preskaŭ krie*): Kio? ... Kion vi diras?

HUGO: »BO-VI-NOJ EN AU-TU-NA NE-BU-LO«.

ZAZA (*senluziigite klinas sian kapon*)

HUGO: Sincere dirante, mi ne komprenas, kiamaniere oni povas vidi la bovinojn en nebulo. Entute, diru al mi, kial estas la bovinoj pli interesaj en nebulo ol en sunbrilo? ... Sed egale! Ni rigardos tiujn bovinojn.

ZAZA (*senluziigite*): Bonivoj en aŭtuna nebulo... (*Amare ŝi ekridas*) Bovinoj! ... Nur bovinoj!! Hahaha!

HUGO (*volas foriri*): Pardonu, kara, sed la lakto estas sur la »Primus«-o kaj...

ZAZA (*senbride ridas*): Bovinoj en aŭtuna nebulo! Hugo, ni nepre devas rigardi tiujn bovinojn. Hahaha!!

HUGO: Mi antaŭsciis, ke vi ĝojos. Eĉ mi mencis al li, ke vi ŝatas la dombestojn.

ZAZA: Kaj kion li respondis?

HUGO (*imitante lin*): Mi ne dubas pri tio... Ŝajnas al mi, ke li ŝatas tiun esprimon... Sed nun la lakto...

ZAZA: Nu, bone. Iru!

HUGO (*dum foriro*): La kafon laŭkutime, ĉu ne, kara?! Multe da lakto, malmulte da kafo kaj kvar sukeroj... (*Li foriras*).

ZAZA (*iras al la tablo, prenas la bileton, ridetante turnas ĝin inter la fingroj, poste kun subita ekflamiĝo dispecigas ĝin*): Ho, la malkuraĝulo!

HUGO (*revenas kun taso da kafo, kiun li metas sur la tablon*): Jen la via! Kun kvar sukeroj... Atentu! Ĝi estas varmega. (*Li forleuras*).

ZAZA (*eksidas al la tablo kaj kirlas la kafon*): La ĝistomba amo naskis bovinojn en aŭtuna nebulo... Ho, kiel mi malamas lin! ... Kiel... kiel... (*En ŝiaj okuloj aperas larmoj*).

HUGO (*revenas kun sia taso, kiun li metas sur la tablon kaj poste li eksidas kontraŭ Zaza*): La bebo dormas kaj paĉjo, panjo kaftrinkas... Vere ni vivas kiel la kolomboj... Ĉu, Zaza?!

ZAZA (*ripete*): Jes, kiel la kolomboj.

HUGO (*tre fervore*): Ĉu vi scias, ke mi decidis aĉeti Literaturan Enciklopedion? Mi lernos la titolojn de la klasikaj verkoj... Espereble vi estos kontenta pri mi. Ĉu? (*Li rimarkas ŝiajn larmojn*) Nu, kio okazis al vi? Ĉu pro la varmega kafo? Mi ja avertis vin, kara.

ZAZA (*erupcie*): Ho, kiel abomeninde! Kiel naŭzas nun...

HUGO: Ĉu la kafo...?

ZAZA (*amare*): Jes, Hugo, la kafo... La kafo kun kvar sukeroj.

HUGO (*embarasite*): Sed, kara, mi ja demandis vin.

ZAZA (*nerve, plorvoĉe*): Jes, vi demandis min, Hugo. Vi estas tre bona, Hugo. Vi ĉiam demandas aŭ silentas, Hugo. Foje provu ne demandi, sed nur paroli, paroli kaj paroli. Egale pri kio, sed parolu!

HUGO (*post paŭzeto iom malgaje, sed tre simple*): Mi ne scipovas. Kelkfoje mi provis, sed... sed ĉiam mankas la vortoj. Mi estas nek poeto, nek artisto. Mi estas nur simpla oficisteto ĉe la Ŝtata Administristoj kaj... kaj... sed ne ridu pri mi! ... mi pensas, ke la vera amo povas nur silenti aŭ demandi. Jes, demandi ofte eĉ senvorte.

ZAZA (*longe rigardas lin, kortuŝiĝas kaj puŝate de interna devigo ŝi ekkairas al liaj piedoj, flate ekkaresas lian manon, ripozantan sur lia genuo*): Hugo! ... Hugo kara! ... Pardonu mian kaprican humoron... Mi estas laca. Ho, kiel laca! La oficejo, la hejmuraj zorgoj, la bebo kaj tiu ĉi vizito...

HUGO (*tre kompreneme*): Jes, tiu ĉi vizito... Nu, sed ĝi pasis.

Senmia mi

— F. Szilágyi —

Mi tenas min en mia mano,
Ekiras palpe, subserve,
La sanktan ŝarĝon mi ĉe l' prano
Nebula donas al vi mute.

Returne! Nokt' min kovras tute,
De fore krias fat-imamo,
Mi paŝas sen mi, blinde, mute
— Returne — kun palpanta mano.

Epitafio

— F. Szilágyi —

Mi ridegis plormiene
Kaj mi ploris ŝerce.
Maskon montris mi nur; tamen
Mi konfesis verse.

ZAZA (*flute, preskaŭ pente*): Jes, ĝi pasis, ĉio pasis kaj Hugo, ĉu vi scias, ke tio, kion vi diris pri la amo, estis bele dirata... Neniam vi esprimis vin tiel bele... Kредu al mi, Hugo, ni vivos feliĉe kiel la kolomboj.

HUGO (*karesante ŝiajn harojn*): Ne kiel la kolomboj, Zaza, sed kiel la ĝardenisto kaj lia ekzotika floro.

ZAZA (*iom mire levas la kapon kaj kun ĝojtremo en la voĉo*): Hugo, Hugo kara, ĉu vi parolas pri la Ĝardenisto de Rabidranath Tagore?

HUGO (*tre simple kaj varme*): Mi ne konas tiujn sinjorojn, Zaza... Mi parolas nur pri tiu simpla ĝardenisto, kiu ĉiutage je la kvina horo alportas tason da kafo al sia ĝardeneto, al sia amata floro kaj forpelas el sia ĝardeno la bovinojn, erarvaganajn en la aŭtuna nebulo.

ZAZA (*kun sincera miro kaj ĉiam pliiĝanta entuziasmo*): Hugo, do vi... vi forpelas lin. Ĉu?... Hugo! ... Hugo kara, vi batalis pro mi kaj vi devigis lin retiriĝi. Ĉu?... Hugo, vi ne povas prezenti al vi kion mi sentas nun... Hugo, kion, kion mi faru?

(*Ekstera infanploro*)

HUGO (*volas levigi por iri al la dormoĉambro*): La bebo ploras.

ZAZA (*salte levigas, retenas lin kaj ŝi mem kuras vigle al la pordo*): Ne, ne! Restu, kara! Vi povas esti tre laca. Dum la tuta posttagmezo vi serpentumadis sur la pargeto... Nun ripozu, kara! Fumu unu cigaredon! Tuj mi revenos. (*Ĉe la pordo*) Hugo, rigardu! (*Ŝi jetas kison per mangesto*) Tuj mi revenos. (*Ŝi foriras*)

HUGO (*restas sola. Amc rigardas al la dormoĉambro. Post momento trinkas sian kafon kaj kun bonkora rideto rulfaras e.g.-redon, ekfumias*): Nun, se mi estus riĉa, mi certe aĉetus tiujn bovinojn en la aŭtuna nebulo. (*Ekstere infanploro*) Versajne ŝia ventreto. (*Krie al la ĉambro*) ZAZA! ... Zaza kara!!!

ZAZA (*ekstere*): Kion, kara?

HUGO (*iras al la pordo, malfermas ĝin kaj parolas al la alia ĉambro*): Utile estas iom masaĝi. Kompreneble, delikate kaj per vaselino... De maldekstre dekstren... de maldekstre dekstren... konstante... jes, tiel, tiel... ĝis la doloro malaperos... Nur delikate kaj per vaselino...

(*Kurteno*)

Fligelman

— H. D. Nomberg —

Kiu kaj kio estas Fligelman kaj pri liaj konatuloj. Fligelman estas juna homo havanta la aĝon de 30 jaroj, malgranda, iom ĝibeta, posedas grandan kaj kurban frunton kaj malgrandan blondan barbeton. La okuloj kvazaŭ plenaj je vaporo, ŝajnas ke oni devas ilin superviŝi per tuketo, por ke ili hele brilu.

Ofte irante malrapide tra la brua strato por doni lecionon, kliniĝinta, lokinta la manojn en la poŝojn, li pensas, ke en la mondo vivis multaj grandaj homoj: Budho, Spinoza, Kant kaj multaj aliaj kaj li, filo de la kuniva ŝameso konas iliajn filozofiajn sistemojn bonege kaj povas ripeti ĉion, kion li ĉe ili legis vorton post vorto.

Kiam la vetero estas bela, la fiakroj ne ekkrakas je liaj oreloj kaj oni ne devas rapidi al la lecionoj, tiam li pensas kun ĝojo, ke efektive ĉiuj filozofoj ne estis tro saĝaj, ĉiu fermiĝis en sia anguleto, divenadis, tamen iom nur divenis kaj li, Fligelman scias pri ĉio, kion ili kreis, li scias ankaŭ, ke la kvintesenco estas la vivo, jes, la vivo mem.

Kaj pri sia vivo Fligelman estis tre kontenta. La unuajn kvin jarojn en Varsovio li pasigis malbone, sed tiam li estis homo sen firmaj konvinkoj, sen intuicio kaj pri tiu vivo Fligelman ne volonte pensas. De post ok jaroj li sin aranĝis pli bone, akiris bonajn lecion-okupojn, komencante vivi trankvile, laŭ decidaj principoj apartigite de la mondo, sola en sia ĉambreto de kvina etaĝo.

La lito en la ĉambro estas ĉiam ordigita laŭ propra maniero. La servistino li ne trouzas, estante konvinka kontraŭulo de ĉia sklaveco. Se oni devas lavi la plankon, kion li cetere mem ne povas plenumi, li riproĉas al ŝi, ke li faras kompromisojn, konvinkiginte,

ke al honesta homo estas maleble nun vivi en la mondo.

Konatulojn li havas multajn, sed da proksimuloj tre malmulte. En la mondo de liaj konatuloj-junuloj oni lin rigardas tre klera homo, filozofo kaj estetikisto, sed paroli pri li, tion malmulte oni faras. Eĉ dum monkollekto oni pri li forgesas, nur escepte, kiam oni bezonas monon por ia grava celo, oni rememoras pri li. Tiam iu sin turnas:

— Pri Fligelman ni tute forgesis!


— Jes! — la alia diras kaj ĉiuj miras, ke Fligelman ĝis nun ne venis al ili en la kapon.

Kiam oni venas al li, Fligelman regalas ĉiujn per teo, demandas pri ĉiuj konatoj, donas monon, sed disputi li ne ŝatas, li evitas pli intiman dialogon, por ne tuŝi — kiel li esprimas — sian mondkoncepton. La konato foriras de li kontente, poste li rakontas al ĉiuj kamaradoj, kaj ĉiuj tre laŭdas Fligelmanon kaj ree forgesas pri li kelkan tempon.

Pli proksime al li estas Levantkovski, instruisto-familiestro, havanta ses geinfanojn estante samtempe malriĉulo, sed ĉiam gaja. Ili konatiĝis en librovendejo. Levantkovski havas pasion por libroj. Kiam nur aperas nova libro, kaj li ne havas la eblon ĝin tuj aceti, li tre ĉagreniĝas, denerviĝas kaj sidante ĉe Fligelman, li — pro aflikto — ne volas trinki la teon. Fligelman pruntas al li tre ofte monon, poste havante pri tio ĉagrenon, ĉar la edzino de Levantkovski riproĉas lin pro la pruntedono.

Kun Levantkovski Fligelman estas malkaŝema, parolas kun li ofte pri si mem.

— La poetoj pensas, ke sole ili sentas la belecon de la naturo. Mensogo. La diferenco konsistas nur en tio, ke ili kapablas la senton eligi poeforme, kaj mi



Beciĉ

*Pejzaĝo
en
Bosnio.*

tion ne povas: mi per tio ne okupiĝas. Ekzemple: mi pagas unu rublon pli multe por mia ĉambro, nur pro tio, ĉar nokte la luno enlumas ĝin. Mi estas malkaŝema homo, mi rezervis al mi ĉe la mastrino, ke mi pagas je unu rublo pli kare nur pro tio, ke en la ĉambro estas la luno. Vi scias, Levantkovski, la popolamaso estas tre malklera. Imagu al vi, mia mastrino mokis, kiam mi ŝin demandis, ĉu nokte la luno enlumas la ĉambrojn kaj ŝi — komprenu — estas konvinkita, ke mi estas malsaga... koncize mi diras al vi, Levantkovski, ke al honesta kaj saĝa homo estas tre malfacile vivi en la mondo. Jes!

Fligelman parolas ruse, Levantkovski ne komprenas la malfacilajn vortojn, sed li konfesas tion kaj voĉlegas por li versaĵon pri la naturo.

— Taŭga poeziaĵo — asertas Fligelman, vi nur devus posedi pli profundan filozofian rigardon. Ekzemple vi diras: »kiel bela estas la naturo sur ĉiu monto kaj monteto«. Efektive poeto sentas, ke la monto, la ĉielo, la tero kaj la tuta naturo estas la samo, kio mi mem...

— Kion signifas? — demandas Levantkovski kaj lia vizaĝo fariĝas plor-serioza, en la malferma buŝo oni vidas du longajn vicojn de dentoj kaj lia mano tremas en la aero.

— Estas tiel. Mi ekzemple tion tre bone sentas. Okazas tre ofte, mi sentas, ke mi, la ĉielo, la luno estas unu, unu absoluto — komprenu — nur en diversaj formoj...

— Nu, en diversaj formoj! tion mi ja dekomence diris, do, en ordo, kion vi volas? — Levantkovski movegas tiel la manon, ke Fligelman malkuraĝiĝas: li malŝatas, se oni ekbolas dum la parolado.

— Jes, la poeziaĵo estas bona, — li diras — mi parolos ankoraŭ pri tio, bonan nokton.

Iafoje, kiam li eliras, lin sekvas la edzino de Levantkovski, virino flaveta, kun enfalintaj mamoj kaj ŝi haltigas lin:

— Sinjoro Fligelman, eble vi povas pruntedoni 50 kopekojn?

Fligelman pruntedonas, haltas poste por kelkaj momentoj en la koridoro, ĉar baldaŭ aŭdiĝas krioj de la edzo kaj edzino. Levantkovski volas 15 kopekojn por aĉeti tabakon, la edzino ne volas doni, Levantkovski insistas motivante, ke se ne estus li, Fligelman ne pruntus al ŝi. La edzino respondas:

— Vi ne indas kun li eĉ paroli!

Levantkovski eksilentas, oni aŭdas nur la paŝojn, kiujn li faras tra la ĉambro, Fligelman tiam ridetas kontente ĝis li hejmenvenas kaj komencas legi.

Li legas tre malrapide ĉiam sidante en la sama pozo kaj kun la sama serioza kaj trankvila aspekto de la vizaĝo. Kiam li trafas lokon atentindan, li iom haltas kaj relegas la tekston malfacilan, ĝis li scias ĝin parkere, ektiras la vangharojn kaj daŭrigas legi plu kaj ŝajnas, kvazaŭ lia cerbo neniam laciĝus engluti la paĝetojn, simile, kiel la pulmoj la aeron. Pasas iom da tempo, li elpoŝigas la horloĝeton kaj se jam estas la 11-a nokte, li fermas la libron, ektiras ankoraŭfoje la lipharojn kaj sur lia vizaĝo evidentiĝas ia dolĉeco.

Se la luno vidiĝas sur la ĉielo tra la fenestro, li estingas la lampon, proksimiĝas la seĝon al la fenestro rigardante al la luno. Li ekfumas cigaredon, eligas la fumon tre malrapide. La fumo etendiĝas en la blua aero kaj en la nebulo naĝas la luno malrapide, pie kaj serioze... li kantas dumtempe malnovan hasidan kanzonon kiun li iam estis aŭdinta kaj kiu estas la unika melodio, kiun li sukcesis memori. Nebulo etendiĝas, la malhela ĉielo altiĝas kun la luno, Fligelman ĉe tio tenas la kapon alten, longe rigardas kaj sentas, ke li, la ĉielo, la luno, la tuta mondo estas unu tuto, unu absoluto diversforma, kaj ke la universo estas ĉio.

Kuŝante poste sur la liteto, li ekdormas kun la penso, ke la plej honesta kaj saĝa vivo estas samtempe ankaŭ la plej bona kaj bela, ke lia vivo estas riĉa ankaŭ je poezio.

Tia homo estas Fligelman.

(Daŭrigota)

Esperanto en la PEN-klubo

Dum la Budapeŝta kongreso de la Pen-klubo nia eminenta samideano Fr. KARINTHY faris paroladon por Esperanto. Laŭ nia scio ĉi tio nun okazis unuafoje dum oficiala kunsido de la Pen-klubo. Danke por la pledo, kuraĝa en tiu rondo, kie la opinioj pri Esperanto estas ofte malfavoraj, eĉ malŝataj, ni publikas tie ĉi lian paroladon.

»Sinjorinoj kaj sinjoroj,

mallonge mi parolos, kaj mi ja povas. Mi ne devas multe klarigi. Pri tia afero mi parolas, kies signifon ni ĉiuj konas. Per bildo mi parolas al la imago, per argumento al la intelekto.

La bildo ĉi tie bruas antaŭ vi — en la tagoj de la tonfilmo eble ne plu estas bildkonfuzo, se mi parolas pri brua bildo. Jen ni estas, verkistoj, en la konstitucia kunsido de la Imperio de l' Homa Voĉo, — animaj subuloj de tia lando, kies civitanojn kunligas fadenoj pli striktaj ol ĉiu komunumo: la religia kredo en la potenco de l' homa voĉo.

Ni preĝas lla saman Dion: la Dion de l' Vorto, tiun, kiu komprenas la homon pli ol la homo. Jen kio nin kunligas — la bildo kaj intelekto sin kaŝantaj post la vorto. Samas por ni viro kaj virino, pli konataj ni estas reciproke ol gefratoj, en la kredo de la flugila vorto kaj tamen, kvazaŭ envia kaj ludema spirito incitas nin petole: nia lango lamiĝas kaj ofte ektiminte ni gestadas

per la manoj, kiel la sovaĝuloj, ni, verkistoj kaj poetoj, la gardantoj kaj pastroj de la dekmil-jara homa kulturo.

La turo de Babilono ankoraŭ ne konstruiĝis, sed la ruiniĝintaj muroj falis inter nin. Hieraŭ mi parolis kun delikata pola poeto: ne komprenante la lingvon unu de la alia ni balbutis per la patra lingvo de tria nacio kaj je la fino per unufojo ni trovis la saman metaforon: ni ambaŭ sentas, kvazaŭ starus muro inter ni, tra kiu nur la plej kruda krio atingas niajn orelojn — kaj la delikata, la vera, la individua, la arta, la plej grava: perdiĝas.

Vi respondas: ni lernu lingvojn. Jes ja — sed kiom? La reprezentantoj de kvardek lingvoj kunvenis ĉi tie. Ĉiu parolas vere nur unu lingvon — tiun, kies artisto li estas: en la ceteraj li povas esti nur fuŝisto. La vivo estas mallonga — se ĉiun el ili ni volas ellerni, plej bonokaze ni fariĝos Mezzofanti kaj jen ni staras ĉe la vespero de nia vivo antaŭ la granda demando, en kiu lingvo ni do diru nun la unuan frazon, per kiu ni volis komenci la verkon de nia vivo.

Vi jam scias, pri kio mi volas paroli.

Du lingvojn bezonas la homa parolo: unu por la nacio, familio, arto, do por la *esprimo*, kaj alian por la servo de la komuno, homaro, mondo, do por la *komunikigo*!

Ĉi lasta ne povas esti la lingvo de vivanta nacio, kiom ajn klopodas ĉiu nacio disvastigi la sian. La nacio



ANTAŬ LA XXIV-A

En tiu ĉi loko de nia revuo ni jam plurfoje parolis pri la temo Esperanto kaj Filmo kaj esploris la diversajn eb'ecojn kaj ŝancojn, kiujn Esperanto povus havi ĉe la filmistoj. Estas nun plej urĝa tempo ke la oficialaj organizaĵoj

de la Esperanto-movado okupu sin pri la filmafero — afero tiel grava kaj aktuala, ke ni devas ĝin meti ĉiam denove sur la tagordon de niaj kongresoj.

Se oni trafolumas la fakan filmgazetaron, oni konstata, ke la problemoj de la diverslingveco en la parolanta kaj sonanta filmo ankoraŭ ne estas solvita — kontraŭe ke regas kaoso en tiu ĉi demando. La filmistoj serĉas febre eliron el tiu ĉi premanta situacio. Nenie oni citas Esperanton nun — kion oni faris tre ofte en la komenco. La Esperantistoj dormas — kaj la filmistoj ne aŭdantaj pri nia movado metis Esperanton jam delonge »ad acta«.

Mi havis lastfoje en Berlino denove okazon paroli kun potencaj filmproduktantoj pri la Esperanto-afero. Ili simple asertis: »Se Esperanto vere estas tiom disvastigita — kiel vi rakontas — ni jam delonge estus aŭdintaj ion pri tio. Kial la Esperantistoj mem ne produktas la unuan pli longan Esperanto-filmon kaj montras al ni la vojon el tiu ĉi lingvo-kaoso?« Alia diris: »Bone, ni faru unu Esperanto-lingvan varianton — de kie ni ricevos la Esperanto-parolantajn geaktorojn, reĝisoron, aŭtoron? Tia varianto kostas multe da mono kaj ni ne povas riski kun novuloj...«

La problemoj estas vere malfacila. Kiel ekzemplo servu la lasta Jannings-filmo de la Ufa. Ĝi estis montrata kun granda sukceso tra Svedujo en la originala germana varianto. En Polujo nun Jannings subite malaperis de la ekrano. Kial? Ĉar Jannings ne parolas france aŭ angle. Kaj la originalan germanan varianton la polaj kinoposedantoj ne kuragis montri. Bojkoto, eĉ atako de tropatriotoj estus la sekvo. Rezulto: oni montras en Polujo la francan varianton de la filmo kun francaj geaktoroj, malmulte konataj. La publiko ŝatanta Jannings ne priatentas la filmon, la aktoro Jannings (same kiel multaj aliaj geaktoroj) simple malaperis. Li fariĝis viktimo de la malfacila lingvo-problemo.

Kiel okulfrapa, kiel evidentega la solvo: Esperanto! La neŭtrala lingvo, nia amata dorlotita Esperanto! Kaj tamen ni, kiuj vidas tiun ĉi solvon tiel klare, tiel precize, ni staras kiel timemaj senkonsilaj buboj, kiel senhelpaj marionetoj kun rigidaj manoj kaj absolute ne scias, kion kaj kie komenci. Kaj ĉar ni nenion faras, ankaŭ nia dorlotita Esperanto restas inter ni en niaj kluboj, kongresoj, kunvenoj. Ho, priplorinda stato! Priplorinda larmtorente tial, ĉar la plimulto inter ni eĉ ne ekkonis ĝis

nun la gravecon de la situacio koncerne tiun ĉi filmdemandon, ne scias kompreni kaj taksu la grandiozajn ŝancojn kaj sekvojn, kiajn Esperanto povas havi en kaj per la filmo! »Esperanto: sur la ekranon, en la sonfilmaparatojn, instalitajn en ĉiuj kinoteatroj de la mondo! Esperanton, Esperanton, Esperanton!« ni krii.

Sed ho ve — niaj krioj ne atingas la iom surdemajn orelojn de la filmpotenculoj, de kiuj ni hundhumile atendas subtenon kaj komprenon por nia dorlotita Esperanto. Ni devas pli laŭte kaj tute energie krii, kriegi. Ni devas fari bruon, skandalon, por ke ni estu aŭdataj en la hodiaŭa bruoj de la moderna mondo! Ne sufiĉas nur kelkaj artikoloj en nia Esperanta gazeto, okaza diskuto en niaj kluboj aŭ kunvenoj.

Kion fari? Ni ne havas monon, ni ne havas fakulojn, ni ne havas Esperantajn filmaktorojn, ni ne havas Esperantan filmreĝisoron, ni entute ne havas spertojn, ni ne havas kuragon, unuvorte: ni havas nenion, ni estas absolutaj malkapabluloj. Finita la afero.

Sed ĉinjare ni havas Universalan Kongreson de Esperanto. Kaj tiu ĉi Kongreso devas diskuti pri la afero. Tiu ĉi Kongreso devas en Parizo finfine ion fari. *Ĝi devas ataki ĉiujn filmproduktantojn de la tuta mondo per rezolucio!* Per manifesto, direktata al ĉiuj filmistoj, fak-jurnaloj en ĉiuj landoj, dissendata per la telegrafagentoj al ĉiuj gazetoj. En tiu ĉi manifesto, en tiu ĉi rezolucio (aŭ kiel ajn ni nomu ĝin), en tiu publika letero la »Kongreso, la kunvenintoj el 40 nacioj de la mondo, atentigas la filmproduktantojn pri Esperanto, kiu havas plej taŭgajn ecojn por servi kiel internacia lingvo de la filmo! La Kongreso rekomendas al la filmproduktantoj turni sian atenton plej intense al Esperanto kaj konsideri ĝin en la produktado de fremdlingvaj variantoj de siaj filmoj. La Kongreso rekomendas al ĉiuj filmaktoroj okupi sin pri la lernado de tiu facilaj lingvo, la Kongreso rekomendas...« ktp.

Tiun ĉi manifeston aŭ rezolucion ni devas redakti kiel eble plej sprite kaj impresive en ĉiuj ĉefaj lingvoj kaj dissendi ĝin al ĉiuj gravaj filmfakgazetoj, filmproduktantoj, fakorganizaĵoj. Certe, ne estas multo, kion ni nun povas fari en Parizo. Certe, kelkaj el vi profetos, ke la rezulto estos nula. Certe, ni ne esperu ke tuj la filmproduktantoj komencos turni Esperantajn filmojn. Sed unuaktoro en la historio de nia movado okazos, ke la filmdirektoroj aŭdos pri nia Kongreso, ke la fakgazetoj komencos diskuti pri tiu ĉi solvo (la plimulto el ili estas al ni tre favora!), ke multaj filmaktoroj ekatentos.

Cu la Kongreso en Parizo komprenos, ke la filmo nun estas la plej aktuala kampo por Esperanto? Cu ni komencos fari la unuan paŝon por atentigi la filmmondon pri nia afero? Ni komencu per tia manifesto, rezolucio, kiu ne kostas multon, sed ni komencu, komencu, komencu finfine! Estas nun la plej urĝa momento!

Jean Forge

estas ne nur spirita komunumo: sed konkera kaj batalanta unuiĝo de gento kaj ŝtato kaj lando. Parolante fremdan lingvon, memkonscia homo ĉiam sentos, en la profundo de l' animo kaj sencie, ke li estas humiligita — kial ne la alia lernis mian lingvon, kial mi la lian, certe pro tio, ĉar lia nacio estas pli potenca. Ne postulas lingvoscion de siaj intelektuloj la angla kulturo — sed ĉe ni, hungaroj, oni opinias nekulturita tiun, kiu ne scias almenaŭ tri fremdajn lingvojn.

Nur artefarita lingvo povas esti la alia, la peranta, la komunikanta, la monda lingvo.

Tiu ĉi artefarita lingvo jam naskiĝis, multaj ĝin

jam parolas kaj komprenas. Ĝia nomo estas: Esperanto.

Kiel prezidanto de la Hungara Esperanto Societo mi havas proponon en du petoj:

1. Por ekzameni, ke la lingvo Esperanto estas vere la plej taŭga por interkomunikado, ne nur en ordinara, sed en arta senco de la vorto, la Pen-klubo faru esplorojn.

2. Esprimu la Pen-klubo sian protektan simpatian al tiu fiksitaj celo de la Esperanta movado, ke la komerca, diplomacia kaj scienca faklingvo de la mondo estu la lingvo Esperanto. (K. B.)

REVUO DE REVUOJ

Antaŭ ol komenci la nunan revuon, mi plezuras dankante pro simpatiantaj gratuloj salutintaj la novan rubrikon. Ni klopodos laŭpove, ke nia legantaro ĝin trovu interesa.

*

Komence ni vidu kelkajn gazetojn, ne preparolitajn lastfoje:

ESPERO KATOLIKA: De januaro ĝi aperas en Hispanio en la vigla redaktado de pastro J. Font Giralt. El literatura vidpunkto nenio interesa. Bona stilo, tamen kelkaj idiotismoj: la uzo de *sent*i en la senco de *aŭdi* estas iom stranga. Cetere papero, preso tre bonaj.

L' ESPERANTO: dusemajna, preskaŭ tute itale redaktita, lerta propagandgazeto. Precipe interesa la polemiko de du anglaj verkistoj pri la problemo de la universala helplingvo.

AUSTRIA ESPERANTISTO: Landa propagandgazeto. Estas menciinde, ke ĝi donas sufiĉe vastan lokon por recenzoj. Imitinda ekzemplo por similaj gazetoj, ĉe kiuj la recenzado estas duoninfane prizorgita! (Nu, kon-

cerne la enhavon mi ne povas ĉiam konsenti kun tiuj ĉi kritikoj.)

LINGVO INTERNACIA: (Ateno) Ba'a'ema gazeto, eĉ tro batalema... Sed ĝi estas nepre lerta propagandilo.

ESPERANTO LANDO (USONO): Ĝi nomas sin sendependa diskutejo. Enhavo kvalite malalta.

PARIS ESPERANTO: propagandilo.

LA OKCIDENTULO: La sama por portugala laboristaro.

HISPANA ESPERANTO GAZETO: Ne mankas literaturajoj, sed ili ne multe ĝojigas.

INFORMOJ DE ESPERANTO ASOCIO DE ESTONIO: La inteligentaj kritikoj de Hilda Dresen estas ĉiam interesaj.

LA ESPERANTISTO (TOKIO): Altnivela, preskaŭ tute esperantlingva japana gazeto. Precipe plaĉas al mi la bona Esp-a stilo de J. Simomura.

Jen poemo de Halina Weinstein el la **POLA ESPERANTISTO**:

Chopin ekparolis.

Ĉe piano blindulo hungara eksidis

Kaj komencis ludi. Ekestis silento.

Ĉiujn en salono kaptis ia sento

Kaj profunda kortuŝo. Li tion ne vidis.

Melodioj ekfluis el sub fingroj liaj.

Aŭdigis ĉirkaŭe dolora ĝemspiro,

Malĝojo kaj larmoj, plendo kaj sopiro.

Ies anim' ekploris kaj melankoliaj

Tonoj plenigis ĉambron. Ludis la blindulo...

Aŭdigis mazurko, polonez', preludo,

Lulkanto, sonato, jen ree etudo...

Ni ĉiuj lin aŭskultis kun larm' en okulo.

Ni ĉiuj estis kune, sed li sin izolis

Kaj solece vagis en la land' mistera,

Akompanis lin ia spirit' supertera.

...Pere de Imre Ungar Chopin ekparolis.

En la sama gazeto mi legis en recenzo pri la libro »Jane Eyre« de Charlotte Bronte la jenan frazon: »Romano verkita de virino antaŭ cent jaroj — kaj nun tradukita en la plej moderna lingvo! — Tio parolas per si mem pri valoro de l' libro.« Jen trafa modelo, se la recenzisto nenion havas por diri kaj tamen volas diri ion grandan!

Kara s-ano Robo, en via recenzo aperinta en la SUDA KRUCO, la heroon de Baghy-novelo anstataŭ hungaro vi menciis kiel ĉehon. Kial?

HEROLDO DE ESPERANTO: Ĝi aperas en tiu ĉi jaro en multe pli riĉigita formo. Speciale salutindaj estas la aldonaĵoj: Lingva Kritiko, Nia revueto, kaj precipe La Strigo, kiu enhavas literaturajojn. Daŭrigita romano: Coronel Ignotus: La amo en la jaro dekmil, tradukita de J. Fernando Berenguer.

LA PRAKTIKO: Eldonaĵo de la Cseh-instituto. Tre vigle redaktita bona ekzercilo por progresantoj, riĉe ilustrita. Sed kial oni trudas en ĝi unu, kiel nedifinan artikolon. Mi lernis en la Fundamento, ke artikolo nedifina ne ekzistas en Esperanto. Kaj LA PRAKTIKO praktike instruas la malon, ĉar ĝi skribas: »li alparolis unu pastron«, »oni prezentis al li unu junan poeton«, »foje li riproĉis al unu kortegano«. Ne nur laŭ la Fundamento, sed ankaŭ laŭ la ekzemplo de ĉiuj ĝisnunaj bonaj verkistoj, oni devas skribi: »li alparolis pastron«, oni prezentis al li junan poeton«, »foje li riproĉis korteg-



Hegedušić

Almozuloj

anon«. Ĉu tiu ĉi sen-unu-eco konfuzas iun, ĉu la frazoj ne estas klaraj, ĉu ili ne estas pli simplaj, pli mallongaj, pli klasikaj, pli Esperantaj? Kial do LA PRAKTIKO ŝanĝas la Fundamenton, ŝanĝas la ĝisnunan bonan stilon? Unu, kiel nedifina artikolo, estas plumpa superfluaĵo. Eĉ la multaj *iu* kaj *ia*, troveblaj en Esperantaj tekstoj, estas superfluaĵoj unu-surogatoj kaj preskaŭ ĉiam forstrekeblaj sen malutilo, eĉ kun nepra gajno. Ilia mankon ĉiu leganto, kiu sentas la guston de la lingvo, trovas eleganta, plaĉa. Ĉar la manko de la nedifina artikolo estas specialaĵo en Esperanto; altrudi *unu* signifus malriĉigi la lingvon, ĝin senigi de interesa idiotismo.

ESPERANTO (UEA): Inter la interesaj literaturaj kaj alispecaj artikoloj de la ĉijaraj numeroj min haltigas artikolo de Liem Tjong Hie (Semarang): batalema, eĉ tre batalema skribaĵo kontraŭ la neologismoj. Vere, ĝin legante oni ektimas, kvazaŭ imagas al si interkontinentan militon: Eŭropo kaj Azio ekmilitas inter si per tankoj, gasoj, flugmaŝinoj, kaj per terura amasbuĉado ili solvas la problemon de la neologaj vortoj. Sinjoro Liem Tjong Hie, por diveni la ŝancojn de la milito, faras eĉ popol-nombradon kaj montras ke la Azia armeo alte superas la mizeran DEFGHIR-armeon. Sed — kie marŝos mi? Mi, kiel hungaro, ja ne apartenas al la DEFGHIR-grupo, eĉ, kiel finno-ugron, oni devus min kalkuli al la Azia tendaro. Nu, kiel renegato, mi certe pendos pro mia *lici*-prefero. Kaj Sturmer, pro sia *etoso*, pendos apud mi.

Sed, ni parolu serioze, kaj ankaŭ sen kolerero (do sen »grandega azeno«, »tute freneza« kaj aliaj »sobrulaj« epitetoj uzataj de sinjoro Liem Tjong Hie.)

Estas tute strange, por ne diri komike, miksi politikon en internan aferon de lingvo. Tio, ke verkistoj sentas iom malvasta la vortaron, tute ne estas esp-a specialaĵo, ĉiu granda nacia verkisto ja estis ankaŭ lingvo-kreanto, ni pensu nur pri Dante kaj Shakespeare. Kaj la esp-a literatura lingvo tute ne estas eĉ tiom evoluinta, kiel estis la itala kaj angla lingvoj en la tempo de tiuj geniuloj. La vortriĉeco estas unu el la apartenaĵoj de verkista genio; lingvo, kiu postulas de siaj verkistoj lingvan malriĉon — neniam havos grandajn verkistojn.

Pro tio ĉiuj verkistoj estas neologismemaj, eĉ se ili ne konfesas tion. Antaŭnelonge en recenzo, mi montris en valora libro tre multajn neologajn vortojn, kvankam la aŭtoro en la antaŭparolo fiere deklaras, ke li evitis vortojn neoficialajn.

Poste, ni rigardu la internaciecon. Tiu DEFGHIR signifas ne nur ke la anoj de tiel multaj nacioj *jam* *konas* tiun novan vorton, sed ankaŭ, ke en tiel multaj lingvoj *ekzistas* aparta vorto por tiu koncepto, ke anoj de tiel multaj lingvoj *sentas la neceson* de tiu vorto, kaj sekve verŝajne ankaŭ en la anoj de ceteraj lingvoj ekzistas pri ĝi tiu sento de neceso. Komprenibile, propagandisto preferu subpremas tiun senton. Sed verkisto estas kaj ankaŭ devas esti pli pretendema ĉi rilate.

Jes, li devas esti. Ĉar ĝi preparas la literaturan lingvon de la estonteco. Kaj se Esperanto estos la dua lingvo de ĉiu homo, ĝi ja devos esti same riĉa je nuancoj, kiel la naciaj literaturaj lingvoj, alie ĝi ne povos plenumi la taskon de perfekta literatura interpretilo. Tion bone sentis Zamenhof, kiu neniam atakis neologismojn, li nur deziris ilian *iom-post-iom* enkondukon.

Propagandante inter verkistoj, mi ofte spertis, ke la troa akcentado de la lingva facileco, luda lernebleco ktp. havis preskaŭ ĉiam malbonan efikon sur ilin. Kaj ilia opinio fariĝis pli favora nur, kiam mi pruvis al ili la eblojn de pliriĉiĝo sur la natura vojo de lingva evoluo.

Ni lasu do la simplan lingvon al la propagandistoj, sed ili, pli paceme ol sinjoro Liem Tjong Hie, lasu al ni la eblojn de riĉiĝo. Kaj se li trovas ekzemple en la Dante-traduko vortojn, kiuj ne estas lerneblaj dum Cerkurso, li ne koleru, ja ankaŭ la originalo enhavas vortojn, kiuj estas nekompreneblaj por itala migranta glaci-ajisto.

Sed se li nepre emas ekmiliti, mi bonvole atentigas

lin, ke li dolore spertos renegatecon de neatendita flanko. En libroj lastatempe aperintaj en Japanujo li povas ja trovi ne malmultajn vortojn (ekz. *pojno* kaj similaj), kiuj starigos al li la harojn.

Ludoviko Totsche

D I S K U T O

Korekto de grava ofendo

(Pri la traduko de Eŭgeno Onegin)

Sinjoro *Leo Belmont*, konata kaj ŝatata pola kaj esp-a poeto kaj tradukanto, kies pola traduko de la »Onegin« de Puŝkin estas nomata kongenia kun la aŭtoro, skribis al ni sub la supra titolo leteron protestan kontraŭ la recenzo aperinta en L. M. pri la traduko de Nekrasov (1931. No. 10.) Krome tradukon de sia poemo, verkita antaŭ multaj jaroj responde al la poemo de la pola poeto Jankovski, kiu tiutempe, kiam la pola kritikisto, pro politikaj kaŭzoj, malfavore akceptis lian, Puŝkin-tradukon, honoris lian laboron per entuziasma saluto. Kaj li bonvolis sendi al ni ankaŭ poemon de Nekrasov, adresitan al li responde je lia saluta kaj laŭda letero.

Bedaŭrinde, pro nia malpliiginta amplekso, ni povas publikigi nur eltiraĵojn el lia letero kaj la poemon de Nekrasov; pri la ceteraj ni devas rezigni.

Post enkonduko, kiun ni resumis supre, sinjoro Belmont diras:

»Jen pensas mi, ke ankaŭ la traduko de sro Nekrasov prezita estos nur post jaroj, kiel granda ago, riĉiginta la literaturon esperantan. Laŭ mia opinio la temo — granda kaj ŝarĝa tasko de esperantigo de la Puŝkina ĉefverko — estas solvita definitive. Neniu post Nekrasov prenos sur siajn ŝultrojn tiun ĉi malfacilan laboron, ĉar ĝi estos nebezona. Eble la fama, kaj alte de mi prezita Kalocsay tradukis la leteron de Tatjana (bedaŭrinde mi ne legis ĝin), sed alia afero estas traduki peceton kaj alia, doni la tutan poemon en versoj — en ritmo kaj strofo Puŝkina.«

Eksplikante la malfacilecon de la Puŝkina strofo, la multajn tradukklodojn, ofte faritajn kun la ŝanĝo de formo, ĉar la konservo de formo pruvigis preskaŭ neebla, li daŭrigas:

»Kaj nun ekzistas nur du plenaj tradukoj de Onegin, kiuj transdonas la tutan gracion, tutan ĉarmon, tutan lertecon de la strofo Onegina, konservante la melodion de la originalo: mia traduko pola, kaj la traduko esp-a de Nekrasov. Prezi sufiĉe laŭ merito la laboron de Nekrasov povas nur simila tradukanto. Kritikistoj, ne konantaj la lingvon de la originalo, ne pensantaj fake pri la karaktero de tiu laboro, ne povas taksu ĉi tiun laboron laŭmerite.«

... »Neeble pravi ĉi tie la fidelecon de la traduko (mi devus doni studon kun multego da citatoj), sed la legantoj bonvolu kredi, ke mi konscience komparis ĝin kun la originalo kaj estis mirigita pri la sameco de aŭbaŭ, sameco malfacile atingata en tradukoj versaj. Sameco de melodio, fideleco de enhavo, kion vi volas pli? Kritikistoj, verŝajne nekonante la originalon, estis mirigitaj pri la realeco de la poemo, supozante, ke ĝi ne estas poezio, sed Puŝkin en multaj priskriboj estis intence reala: lia poezio estas vereco natura; sed realeco kun muziko versa, kun elektitaj ĉarmaj epitetoj estas speciala Puŝkina poezio. La tradukinto ne donis pli ol Puŝkin kaj ne estis devigita doni pli ol li...«

»... mi volus korektigi okazan maljustaĵon faritan al sro Nekrasov, esperante, ke mi samtempe montrus vojon al estonteco, kiu prezos la neforgeseblan meriton de la esp-a tradukinto de Onegin.

Leo Belmont.«

Vi tion skribis antaŭ jaroj, —
 Jes, tridek jaroj pasis jam, —
 Sed mi nun povas senerare
 Ripeti ĉion laŭ la sam'...
 Mirinde! Tute samfatala
 Kun via vere ideala
 Traduko pola de »Eŭgen«
 Fariĝis ankaŭ mia pen'
 Traduki ĝin al Esperanto.
 Kun nedirebla emoci'
 Leteron vian legis mi,
 En kiu vi sen ruz', sen vanto,
 En tute simpla manier'
 Al mi salutis kun sincer'.

Jes, oni min riproĉis ankaŭ,
 Ke por »Onegin« vane nur
 Mi perdas lastan tempomankon
 Je malutila memplezur'.
 Anstataŭ tiu ĉi relikva
 Malnova klasikaĵ' antikva
 Pli bone zorgu mi laŭ pov'
 Pri freŝa aktuala nov'.
 La nova tempo ja postulas
 Aliajn temojn en batal'.
 Ne oro sonu nun, sed ŝtal'!
 Ja ĉie, ĉie fajroj brulas!
 Favori al klasika rim'
 Nun estas vere granda krim'!

Mi scias: ili certe pravis,
 Sed la eterna harmoni'
 De Puŝkin min tiome ravis,
 Ke en ŝtelitaj horoj mi
 Sidadis antaŭ la romano
 Laŭ ebrulo kun rikano
 Ĉe vinbotelo en drinkeĵ'...
 Kaj min envolvis plej kaj plej
 Infekte ĉarmo poezia...
 Dum tradukado po silab'
 Revplene ŝvebis, mia kap'
 En mirepoko iluzia —
 Kaj mi en tiu reva rond'
 Forgesis ĉion en la mond'.

Sed fine estis jam tutpreta
 Streĉita mia verv-labor'.
 Eliĝis mi el kapto reta
 Kaj ebriceo pasis for.
 Aperis la volum' el preso
 Kaj kia estis la impresio?
 Ve, absoluta plenfiask'!
 Nudiĝis mond' el falsa mask'.
 Sur ĉies mi vizaĝoj vidis
 Indiferenton nur en sek'
 Kun indulgem' al mia pek'
 Kaj iuj eĉ al mi insidis:
 Ridet' acida sen diskut'
 Kaj malaprobo en konklud'.

Precipe spitis min domaĝe
 Kritik' venena sen motiv'
 De iuj Stroele kaj Szilághy,
 Ĝi du Zoiloj kun naiv'.
 Ne pensis mi, ke estus skurĝa
 Kritik' el ĉi tendar' etburĝa.
 Ne venis ja el mia plum'
 Ĉifoje trafa kugl' »dum-dum«
 De »propagand' revolucia«.
 Mi bakis panon ja kun krust'
 Tutplene laŭ ilia gust',
 Sed tamen krevis gal'ilia
 Kaj per venena sia bor'
 Penetris eĉ ĝis mia kor'.

Ĉu vere fuŝis mi la verkon,
 La majstroverkon de geni'?
 Ĉu vere nur malbonan sterkon
 El la poem' faris mi?
 Ĉu vere la originalon
 Transformis mi en fibanalon?
 Ĉu replantiĝis tiu flor'
 Sen poezia bonodor'?
 Ĉu estas mi fuŝulo nura
 Sen iu poezia sent'?
 Ĝi tiuj duboj en torent'
 Inundis min per ond' terura.
 En plej turmenta hezitem'
 Mi ekdubegis pri mi mem.

Kaj jen atingis min subite
 Amika via epistol' —
 Kaj revigliĝis mi spirite
 Kaj kuragiĝis mia vol'.
 Vi, kiu estas rekonita
 Aŭtoro vere laŭmerita
 De la pollingva verstraduk'
 De l' sama verk' en plena suk', —
 Nur vi kapablis en amaso
 Kompreni min kun trafa sprit'.
 Al mi vi skribis sen hezit':
 »For ĉiujn viajn dubojn lasu!
 Tradukon brile faris vi.
 Al vi transdonas laŭrojn mi.«

Kaj nun mi pensas pri la kaŭzoj
 De la kondamnoj de kritik'.
 Okazis kial tiuj klaŭzoj
 Kaj restis ĉio sen efik'?
 Kaj jam ekdubas mi nevole
 Pri mem Szilághy kaj pri Stroele.
 Idealisma mondkoncept'
 Verŝajne al la malakcept'
 Instigis ilin ironie
 Ĉar ne atingis ilin tem'
 De l' poezi' de Puŝkin mem.
 »Vulgara« realismo lia
 Al ili ŝajnas mia pek' —
 Kaj do rezultis la forstrek'!

Pli konvinkigas mi hodiaŭ,
 Ke eĉ en poezia gus'
 Diversa ideologio
 Kondukas al kanonafust',
 Sed malgraŭ ke asertas oni,
 Ke eĉ ne eblas rekomponi
 La majstroverkojn en traduk',
 Grenadon pafas mi je flug':
 Ne! Esperanto povas ĉion!
 Respiras ja la nova viv'
 En Esperanto kun aktiv'.
 »Onegin« mia provas tion!
 Ĝi bonas — (vetus mi kun gajj) —
 Ne malpli ol... ĉe Kalocsay!...



OBSERVO

H. D. NOMBURG. Li naskiĝis en la jaro 1876 en la urbo Mšèonu (Polujo) ĉe hasida (pia) familio. Estante ankoraŭ tre juna, lia patro mortis, pro kio li edukigis ĉe sia avo, la patro de la patrino.

Ĝis sia 18-a jaro li lernis en religia seminario, distingigante per sia profunda kono de talmudo kaj hebrea teologio. Post la edziĝo li komencis kleriĝi ankaŭ en aliaj branĉoj. Hazarde venis en lian manon la poezio de I. L. Perc, kiu faris sur lin grandan impreson kaj decidis veturi Varsovion por ekkoni la grandan poeton judan. Devigita disigi de sia edzino pro la subita »malpico«, li en 1897. venis Varsovion, vizitis I. L. Perc-on,

montrante al li siajn poeziajn skribitajn en la hebrea (malnova) lingvo.

De tiam Nomberg restis jam en Varsovio, kie li — influite de la ĵus vizitata granda poeto — komencis verki judlingve, t. e. en la lingvo de la granda amaso, forjetante la verkadon en la malnova hebrea lingvo.

Inter liaj plej unuaj poeziaĵoj estas la poste tre populara popolkanto: (en la medioj de la laboristaj amasoj ĉefe konata) »kuras kaj pelas malhelaj nuboj«.

Lia populareco kreskis pli post la aperigo de sia novelo Fligelman, kiu estas verdire la akso, ĉirkaŭ kiu turniĝas preskaŭ ĉiuj ceteraj rakontoj de Nomberg.

Tiu ĉi verko estas la kvintesenco de la tuta nomberga tiparo homa. Li sukcesis doni al ni la generon de la koncerna inteligenta juda individualisto.

En lia novelo »Inter Montoj« ni havas denove en la persono de la heroo Ŝvarcvald ian specon de Fligelman, la individualisto. En liaj literaturaj noveloj nur kelkaj pritraktas kaj respregulas la malnovan kutiman

judan vivmanieron. (Verktradicio de la judaj verkistoj ĝis lia veno) La plej granda parto en liaj rakontoj kaj noveloj pritraktas la transiron de la komunaj motivoj al la interna mondo de la individuo kun liaj personecaj intimaj travivaĵoj, skeptikismoj kaj sopiroj. Ĉefe li priskribas tipon de juda inteligentulo aŭ inteligenta proleto. La herooj de tiuj noveloj: oficistoj, instruistoj k. s. — estas preskaŭ ĉiuj variado de la sama kaj unika psikologia tipo: lacaj, senhelpaj mallertaj homoj sen forto kaj volo, homoj, kiuj konstante esploras kaj filozofas, malgraŭ ilia indiferenteco al la vivo, herooj de pasiva sufero kun enuo kaj sopiro anstataŭ amo — kaj amaramiĝo anstataŭ malamo, ili agas solece, mizere en la mondo kvazaŭ delonge jam mortintaj, aspirante al senbrua rigida trankvileco. Nomborg estas inter tiuj, kiuj la unuaj enportis en la judan beletristikon la motivojn de soleco, morto, aflikto, maltrankvilo kaj timo antaŭ la vanteco kaj tragiko de la vivo. Psika analizo, enpenetra kapablo, kvieta kaj objektiva tono, klara kaj harmonia stilo, jen estas la karakterizaj ecoj de Nomborg. En la priskribado de liaj mizeraj sed noblaj kaj fieretaj herooj oni sentas la malvarmetan kaj saĝan ironion de skeptikulo kaj super ĝi ŝvebas lirismo persekutanta la aŭtoron en ĉia lia verkado.

Oni diras, ke la fono de lia verkaro estas li mem, la materialon li ĉerpis el propraj travivaĵoj kaj ke en kelkaj herooj enkorpiĝas lia persono.

Dum sia vivo li multe vojaĝis.

Li mortis en aŭtuno de la jaro 1927.

S. Guterman.

RECENZO



E. DREZEN: Skizoj pri teorio de Esperanto. Libro dulingva (esp-a kaj rusa). 84 paĝoj grandformataj. Eldonis Ekrelo, Leipzig. Prezo Mkg. 1.10.

La libro prezentas al ni skize ĉiujn lingvajn demandojn de Esperanto, ĝi traktas el ĝenerala vidpunkto gramatikon, fonetikon, morfologion, sintakson, semantikon, etimologion, parolas pri la evoluo kaj ŝanĝo de lingvoformoj, konsideras la diversajn vojojn de la lingvo-progreso. Ĝi enhavas multajn interesajn kaj aprobindajn opiniojn pri ĉi tiuj punktoj.

Ekzemple, evidente li estas prava, ke oni devas krei sciencan gramatikon, kiu ne imitas la gramatikojn de la lingvoj naturaj, sed konformiĝas al la speciala gramatika karaktero de Esp-o. Nekontesteble li pravus ke inter radikoj kaj sufiksoj ne ekzistas esenca diferenco en Esp-o. Eĉ mi ne apartigus, kiel li, *verajn* sufiksojn, ne *uzablajn* memstare, ĉar, efektive, ili estas nur ne *uzataj*, sed tute ne maleble, ke iam *uzotaj* memstare. Ĉu ekzemple oni ne povus diri: *gea paro, boa rilato*, ĉu oni ne povus uzi memstare *isto*, kiel oni jam uzas *ismo*? Tiujn formojn kontraŭas nur la kutimo, sed kutimo povas ŝanĝiĝi.

Sed mankas loko, por pritrakti kaj konigi ĉiujn punktojn de la libro, kiujn mi aprobas, oni prefere legu ĝin mem. Mi volas paroli nur pri sola punkto,

La aŭtoro diras, ke ne necesas fiksi la gramatikan karakteron de la radikoj, ĉar la esperantistoj ja uzis ĝis nun perfekte la lingvon sen tia speciala fikso.

Nu, ĉi tiu aserto estas erara. La eraron de la aŭtoro kaj aliaj samopiniantoj (Ĉefeĉ, Panel) komprenebligas, ke vere en Esperanto unuavide ne estas evidenta la neceso

de la fiksado, ĉar 1. la gramatika karaktero ofte sendube montriĝas per si mem (bel, grand, hom, dom, ag, kur, bat), 2. ofte estas tute egale el kia karaktero oni eliras: oni venas al la sama rezulto. (Ekzemple, se, laŭ la Fundamento, oni rigardas la radikojn *interparol* substantiva, oni same povas el ĝi devenigi la formon *interparoli*, kiel el la verba *interparol* la formon *interparolo*.) Tamen ekzistas radikoj, kies fiksado estas nepra. Ni vidu la radikojn *bros* kaj *komb*. *Bros* estas substantiva, do broso estas *ilo*, *komb* estas verba, do kombo estas *ago*. Kaj ke la lingvouzo mem sentas la neceson de la fiksado, tion pruvas, ke ĝi mem ŝanĝis evidente la fund. karakteron de kelkaj radikoj. Ekzemple el la verbaj radikoj *flor*, *plant* ĝi fariĝis radikojn substantivajn. Se mi diras: »mi rigardas floron de ĉerizarbo,« ĉiu komprenos, ke mi rigardas unu ĉerizfloron, kaj neniu, ke mi rigardas la *floradon* de la ĉerizarbo.

Krome, mia teorio de vortkunmeta, kiu sensanĝe kaj senmanke interpretas la nunan lingvouzon, eblas nur per la akcepto de la karakterfikso. Ĉi tiu teorio, baziĝanta sur la vortreefiko, estas ĝis nun la sola vortkunmeta sistemo, kaj mi devas ĝin rigardi ĝusta, ĝis oni faros alian sur la bazo de la radikneŭtraleco. Mi firme kredas, ke fari tian ne estas eble, se nur oni ne ĉarpentos perfortan sistemon, nekomforman al la lingvouzo kaj al la direkto de la lingvoevoluo.

Kaj ĝuste ĉi tiu direkto, la validiĝo de la »neceso kaj sufiĉo«, postulas la fiksitajn radikokarakterojn. Se oni ĉiam algluas *ado*, aŭ *eco*, oni ja povas pli eviti la demandon pri la karaktero de la radikoj. Sed se oni, kiel en la moderna Esp-o, ŝparas sufiksojn, multe pli ofte prezentiĝas la demando, ĉu la ideo de ago aŭ kvalito jam enestas en la radikoj mem, aŭ oni devas ĝin marki aparte.

Kompreneble, ĉio ĉi ne malebligas, ke oni uzu »impresionismajn« formojn: »konstru(a)jo, mang(a)jo ktp., se la kunteksto tion ebligas, aŭ ke oni uzu formojn: *eksango, dismartelo, dum broso*, ktp., en kiuj la verbecon signas la nur-verba prefikso aŭ la nur-antaŭ-verba prepozicio.

Sed mi ne volas pli droni en la temo, mi rapide finas. La libro indas nepran rekomendon al ĉiu lingvistikemulo.

Kopar.

JUJZO JAMAMOTO: EN LA NEBULO. (Radio-dramo.) El la japana: Kijohiko Cujuki. Eld. Japana Esp. Instituto. 26. p.

La drameto de la japana aŭtoro estas pura kaj trafa radio-dramo, la verkisto ne prunteprenas la elementojn de aliaj artospecoj; li subite eksentis la esencan de la senfigura voĉo, kiu radias el la mistera skatolo. — La rezulto de tiu ĉi bonŝanca eksento estas la perfekta travivaĵo de la timvekaj, mallumaj voĉoj, kirliĝantaj en la misterplena mara kaj anima nokto; kiam la potencoj de la mallumo flugadas per senbruaĵaj vespertoflugiloj kaj susurvoĉe devigas, suferigas, humiligas la ploremantan homon, kiu nun pripentas la dumtagan trofieron.

La laboro de la tradukinto estas laŭdinda; tamen ankaŭ ĉi li mi trovis multe pli multajn »je«, ol bezonate. Laŭ mia opinio ni devas eviti laŭeble la uzadon de la nedifinitaĵoj, kiuj plejparte estas bone anstataŭigeblaj. La tradukinto uzis la vorton »kiel«, anstataŭ »kvazaŭ« en la frazo: »... mi mem ne mortigis lin, sed same estas, kiel mi mem faris...« (anstataŭ: kvazaŭ mi mem estus farinta tion.) Sed samtempe mi ĝoje salutis la bonegan vorton de la tradukinto — survango — anstataŭ la barbara »vangofrapo«.

Szilágyi

KIJO CUJUKI: STALA BIBLIO DE SAMURAIMO. (Eld. Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 22 p.)

Historio kaj prikonigo de la glavo, kio estas manifestiĝo, simbolo de la Samuraismo: — kavalira honoro, alta karaktero kaj morala kuraĝo.

Szilágyi

WALTHER KLOEPFER: VAGABONDO KAJ SINJORINO. Romano. El la germana: L. Goppel. Eld. Heroldo de Esp. Köln, 204 p. Prezo: GM 2.—

La skeleto de la romano estas sufiĉe simpla kaj ne tro eksterordinara: sinjoro amas fraŭlinon, kiu jam havas fianĉon. Aliaj fraŭlinoj amas la unue menciitan sinjoron, tamen li ne estas feliĉa pro tio, ĉar li amas obstine la fianĉinon de la alia, malpli simpatia sinjoro. La aŭtoro laŭdevone prizorgas, ke la malpli honestaj konkurantoj kaj la virinmalhelpaĵoj foriĝu kaj tio okazas tiamaniere, ke la aŭtoro murdas la metaŭgulojn, aŭ je la plej malbona okazo ili suferas geedziĝan akcidenton; post la variecaj katastrofoj nia juna paro trovas sian feliĉon ĝuste sur la 204-a paĝo. La aventura romano rememorigas al ni certan specon de la amerikaj filmoj; ni ne povas nei, ke ĝi estas subliteratura verko, tamen legota de nia pli naiva tavolo, kiu ne mankas el la verda popolo. Do, mi ne batalas kontraŭ tiu ĉi aventurromano, kiu *siaspece* estas akceptebla produktaĵo de la »kajerromanoj«.

La traduko ĝenerale plaĉas al mi; sed la troa, nemotivita uzado de la prepozicio »je« estas mallaudinda. (Ekz. »Li frothblankigis siajn ungojn je la trouzita jako.« Kial »je«?) *Szilágyi.*

K. SMOGORZEWSKI: POL-POMERANIO. (El la franca: S. Grenkamp. Eld. Esperantista Voĉo, Jaslo; 125 p. Prezo: Sv. fr. 2.50 + 20%.)

Tiu ĉi libro estas okulfrapa ekzemplo pri la praktika uzebleco de Esperanto por la plej diversaj politikaj klopodoj. Temas pri la aktuala problemo de Pol-Pomeranio, kies solvon la aŭtoro rigardas el pola vidpunkto, tamen akcentante siajn pacifismajn dezirojn kaj tendencojn. La detala historia studado de la problemo, la amaso de la diversaj datoj, klarigoj, planoj, la lerta grupigo de la temkomplekso, la ekzakta, spertoplena traduko igas la libron modela propagandverko. *Szilágyi.*

NAUM JERUSALMI: EKSIGO. (El la hebrea: Leono Vienano. Eld. N. Szapiro, Warszawa. 40 p. Prezo: 0.40 sv. fr. + 20%.)

La unua numero de la modestaspekta »Esperantlingva Novellibroteko« donacis al mi agrablan surprizon, allogan novelon de Jerusalmi, kies rakontmaniero eminente demonstracias la valoron de la simplaj, preskaŭ naive artaj rimedoj, kiuj kreskigis tiun ĉi ĉarman kamparan floron de la literaturo. Mi tute ne volas mortpremi la novelon per tro-saĝa analizado de la prirakontita juneca epizodo, kaj ankaŭ pri la traduko nur tiom, ke malgraŭ la respektinda talento de la tradukanto, mi denove retrovis ĉe li la malbenitan, trouzitan prepozicion: »je«. Mia pinĉilo elprenis la jenan frazon: »... li mortis je ftizo«. Por ĉiu naciato estas komprenebla la frazo: li mortis de ftizo. Same mi ne ŝatas la esprimmanieron: plena je... *Szilágyi.*

FUNDAMENTO DE ANIMO de Onisabro Degučĉi. Esperantigis kaj eldonis Oomoto-Propaganda Oficejo, Kameoka, Kioto-Hu, Japanujo. 1931. 48. p. Prezo: sv. fr. —.70.

La esperantistaro jam scias, ke la Oomoto (= origino de mondo) movado estas japana filozofia, religia kaj okulta celado, kiu deziras klarigi — precipe per la instruoj kaj rakontoj de sia majstro: Onisabro Degučĉi — la animan, spiritan vivon tiel en la tera, kiel en la postmorta vivo. La supra libreto estas tradukita el japana verko de Degučĉi kaj laŭvice prezentas liajn klarigojn pri la supertera kaj ĉiela vivo kaj pri la vojo de la homa spirito al eterna progresado. En kelkaj punktoj ĝi similas al la instruoj de la malnovaj religioj, en la plej multaj ĝi donas pli vastajn klarigojn, ofte tute novajn por la leganto. Sed ĉiuj klarigoj multe similas al la instruoj de la eŭropaj okultaj movadoj. La libreto enhavas ankaŭ foton de majstro Degučĉi. La nomo de la tradunkinto(j?) ne estas signita. Eĉ sen ia kredo oni povas kun intereso tralegi la bonstilan kaj korektan verketon kaj — pripensi.

P. B.

LA SOCIETO DE AMIKOJ (KVAKEROJ) KAJ ĜIAJ ESENCAJ TRAJTOJ. Esperanta traduko de preĝego de Edward Grubb, M. A. — Eldonita de Friends Service Council, Euston Road, London, N. W. I. Prezo: 3½ pencej. 20 paĝoj.

Mallonga priskribo de historio kaj esenco de la kvakera (amika) movado, kiu forjetante ĉiujn eksterajn dogmojn kaj ceremoniojn, celas per interna anima vivo realigi la instruojn de Kristo, »ĉar Dio mem, kun sia lumo kaj vero, ĉeestas en la profundo de ĉiu homa koro, kaj sin malkaŝas al ĉiu, kiu lin aŭskultas kaj obeos.« Por la kvakeroj la kristana unueco estas vivmetodo bazita je sperto. Jen nur du ekzemploj el ilia firma volo vivi kristane: La kvakeroj estis la unuaj en Usono, kiuj decidis, ke sklavposedanto ne povas esti ilia membro. Duni la milito ili ebligis por siaj membroj, kiuj ne volis servi sur la batakkampo, servadojn en armeo kuracista, ambulanca, savista kaj militviktima oficejoj kaj helplokoj. Post la milito ili helpis al suferantoj, precipe al infanoj en la venkitaj ŝtatoj. Fine estas menciinde, ke simile al Bahaa kaj Oomoto-movadoj, ankaŭ ili kredas, ke ili »havas propran kontribuon al la Reunuiĝo de la Kristanaro.«

Kelkaj gramatikaj aŭ eble nur preseraroj kaj ne ĉie bona stilo ne malhelpas, ke la kajereto estu leginda por interesigantoj.

P. B.

L. VIENANO: ESPERANTO PER ESPERANTO. Lernolibro laŭ senpera metodo. Kun metoda enkonduko. Warszawa 1932. Librejo: N. Szapiro, Novolipki 8. Prezo: 0.20 dolaro. + 20% 68 p.

Ni ĝoje salutas la disvastigon de la t. n. senperaj, rektmetodaj lernolibroj, tre bone uzeblaj en ĉiuj landoj kaj donantaj grandajn sukcesojn. Tiu ĉi lernolibro estas unu el ili. Per helpo de nemultaj vortoj, rakontoj, proverboj, ĝi facile enkondukas la komencantojn en la misterojn de nia lingvo.

ARVIDS KURMIS: LA KAŪZO KAJ LA DEVO. Traktaĵoj kaj rakontoj. Prezo: 4 usonaj centoj. Eldonejo: Scienco kaj vivo, Riga. 16 p.

Rakontetoj, malgrandaj meditadoj pri la progreso de l' tekniko, pri la kaŭzo de la troa produktado, senlaboro, malgrandaj salajroj kaj milito. Bedaŭrinde la lingvo ne estas senriproĉa.

HILLAR SAKARIA: ENKONDUKO EN LA PEDAGOGION. (Historia skizo.) Tallinn. 20 p. Prezo: 2 respondkuponoj.

Tre utila libreto por multaj, interesataj pri la problemoj de l' edukado. Tre klare kaj koncize ĝi resumas ĉion, kion indas ekscii pri pedagogio kaj pedagogoj.

F. LINDÉN: KURS I. ESPERANTO. 8¼ p. Stockholm, Förlagsföreningen Esperanto. Prezo: 90 öre.

Svedlingva lernolibro en dudek lecionoj, sur bona papero kaj kun bonaj litertipoj. Konversacioj kaj rakontetoj. Ankaŭ por privata lernado ĝi taŭgas.

DR. LEOPOLD DREHER: SUPERA KURSO DE ESPERANTO. Dua eldono. 66 paĝoj. Eldono de la aŭtoro. 1932. Prezo: 1.— svfr. + 10%.

La celo de tiu ĉi libreto estas eduki perfektajn espistojn el la novaj adeptoj kaj la fakto, ke ĝi jam aperas en dua eldono, pruvas, ke ĝi kapablas je tio. Estas bedaŭrinde, ke la ĉapitro, kiu traktas pri la originala literaturo en Esperanto, jam ne respegulas fidele la nunan staton de nia literaturo. Iom pli da aktualeco ne estus malutilinta. Cetere ni deziras al la libro baldaŭ trian eldonon.

Piscis Parvus.

INTER NI-A ESPERANTO KANTARETO. Eld. de La Suda Suno, Reusel; 16 p.

Elegante presita kantareto, enhavanta ĝenerale religiajn kantotekstojn kaj kelke da popolkantoj por la uzado de Esperantistoj en bona stilo.

Szilágyi.

K L A Ĉ . . . K L A Ĉ . . . A N T A Ŭ L A K O N G R E S O

— RAYMOND SCHWARTZ —



Se ni fidas al la neoficiala etimologio, ni povas aserti, ke Dio prezidis la inaŭguron de Parizo jam en la pratempoj, tuj post la malfermo, de l' mondo. Tiuepoke nia bona urbo estis ja la paradizo.

Sed Adamo estis sperta filologo. Oni rajtas mire sin demandi, kial li ne fariĝis la granda patrono de nia Lingva Komitato. Ĉu ne estas li, kiu kreis la unuan lingvon kaj publikigis la unuan zoologian terminaron? Efektive, la Genezo konfirmas: »Kaj kiel la homo nomis ĉian vivan estaĵon, tiel restis ĝia nomo.« (Genezo 2,19) Kaj la Ak-Adam-io estis fondita.

Do, kiam niaj prapatroj konstatis, post la fatala pomomanĝo, ke la paradiza periodo tro rapide forpasis, Adamo dekretis: »Tio, kio ne daŭras, ne povas enhavi la sufikson ad.« De tiu tempo Parizo fariĝis sinonimo de paradizo.

Kiel oni scias, la lingvoj poste evoluis kaj la modernaj popoloj elparolas la nomon de Parizo plej diversmaniere. Francoj, ekzemple, silabas »Pari' —«, — germanoj taktas »Pariss« dum angloj gargaras »Peri«. Sed plej trafe pravas ĝustan komprenon la italoj, kiuj melodias »Parigi«. — Parigi, jen tuta programo de Parizo. Kaj se, laŭ la proverbo, oni ne portu strigojn al Ateno, nek bieron al Munheno, estas ankaŭ nenecese veni Parizon kun sia edzino. Ho ve! Estus aliflanke tro damaĝe, se la edzinoj hejme, ĉar en neniu alia kongresurbo ili trovos tiom da interesaj magazenoj. Eĉ unu el la plej famaj parizaj gigantvendejoj invitos la kongresanojn al lunĉo, kaj tiun ĉi sukceson ni dankas al la L. K. K. (Loka Kongresa Komitato), pri kies utileco oni nun ne plu dubos. Sed ne nur utila ĝi estas, — ĝi estas ankaŭ necesa. Supozu, ke la kongreso malbone sukcesos, en tiu ĉi okazo oni nepre bezonos iun, al kiu oni povos direkti ĉiajn riproĉojn kaj insultojn. Tial, ĉar oni devas ĉiam antaŭvidi la eblecon de fiasko, tial prudenta L. K. K. devus ĉiam havi inter siaj membroj almenaŭ unu.. fiktivan personon, sur kies ŝultrojn ĝi povus poste siaflanke ŝovi la tutan respondecon pri akcidento. Ĉar tiu respondeca


ĉefkulpulo fakte ja ne ekzistas, estas verŝajne, ke li akceptus senproteste ĉiujn malbenojn kaj daŭriĝos kortuŝa harmonio de l' granda rondo familia.

Nu, en Parizo oni preskaŭ atingis tiun idealan staton. Preskaŭ, ne jam tute, ĉar la fiktiva membro de l' L. K. K. laŭdire tamen ekzistas. Kelkaj personoj certigas, ke ili jam vidis lin. Jen la danĝero, ĉar se poste oni provos kulpigi lin, povos okazi, ke li brue eliros el sia mallumo por manifesti sian vivkapablon. Sed feliĉe ne temas pri tia eventualeco. La pariza kongreso sendube estos triumfo, malgraŭ la stereotipe fama krizo, kiu lamigis multajn vojaĝemulojn.

Sukceson garantias la L. K. K. mem, kiu estas majstre, ĝuste, juste kaj science dozita, kiel evidentigas la sekvanta statistiko. — Inter ĝiaj dek membroj kvin estas laŭprincipaj nefumantoj. Kvin portas okulvitrojn, dum kvin estas normalaj vidantoj. Sed por definitive difini homojn, plej saĝe estas observi kion ili trinkas. Do sciu, ke kvin trinkas alkoholon sub ĉiuj formoj (ni ne nomos ilin, por ne embarasi la aliajn!), dum kvin preferas ĉokoladon, lakton, kafon, teon kaj.. akvon.

Entute: perfekte komponita L. K. K.

El la multegaj allogaĵoj de la pariza kongreso ni citu nur kelkajn: Jen — Scherer, la fama mondvojaĝinto, kies cirkulon tra nia planedo manaĝeris I. C. K., promesis neĉeesti. Kompense oni havos la teatraĵon »Knock«, kiun ludos eminentaj aktoroj kaj, tuj post la kurtenleviĝo, ankaŭ aŭtomobilo. Estu certaj, ke malgraŭ ĉi tiu komenca Knock-aŭto la teatraĵo daŭros ĝis fino de l' tria akto. Oni havos ankaŭ vesperon de Literatura Mondo, dum kiu bone konataj aŭtoroj intencas, laŭ sia kapablo, paroli en Esperanto. Kaj eble, eble, eble, oni ĝuos nian oratoron, d-ron Privat. Malgraŭ diversaj onidiroj kaj senbazaj suspektoj li ĉiam fervore okupiĝas pri nia movado, ankaŭ post sia vojaĝo tra Hindujo. Lia fiera devizo restas senŝanĝe la sama: »Unu celo — propa-Ghandi Esperanton!« Nur unu vorto iomete modifis sian ortografion. Ĉu tio gravas?



LA ERMITO

— GUY DE MAUPASSANT —

Ni iris viziti kun kelkaj amikoj la maljunan ermiton loĝantan sur malnova tombmonteto, kovrita de grandaj arboj, meze de la vasta ebenaĵo inter Cannes kaj la Napoule.

Revenante ni parolis pri tiuj strangaj laikaj soluloj, multnombraj iam, kies speco hodiaŭ malaperas. Ni serĉis moralajn kaŭzojn, ni penis difini la specojn de ĉagrenoj, kiuj iam instigis la homojn loĝi en dezertoj.

Unu el niaj kunuloj diris subite:

Mi konis du solulojn: viro kaj virino. La virino ŝajne ankoraŭ vivas. Si loĝis antaŭ kvin jaroj en ruinaĵoj, supre de absolute dezerta monteto sur la Korsika marbordo, dekkvin aŭ dudekkilometrojn for de ĉiu ajn domo. Si vivis tie kun servistino; mi iris viziti ŝin. Si certe estis iam distingita, monduma virino. Si akceptis min kun ĝentileco, eĉ kun afabla ĉarmeco, sed mi scias nenion pri ŝi; mi divenis nenion.

Koncerne la viron, mi tuj rakontos lian teruran aventuron.

Turnu vin malantaŭen. Vi ekvidas tie tiun pintan kaj arbaran monteton, kiu videbliĝas malantaŭ la Napoule, tutsola antaŭ la pintoj de l' Esterel; en la regiono oni nomas ĝin Monto de Serpentoj. Tie vivis la solulo, inter la muroj de antikva templeto, antaŭ proksimume dekdu jaroj.

Aŭdinte pri li, mi decidis, konatigi kun li kaj mi forrajdis el Cannes iun matenon de marto. Lasinte mian ĉevalon en la gastejo de Napoule, mi ekgrimpis tiun strangan konuson, cent kvindek aŭ ducent metrojn altan. Kovritan de aromaj kreskaĵoj, precipe cistoj, kies odoro estas tiel akra kaj penetrema, ke ĝi konfuzas kaj kaŭzas kvazaŭ sveneton. La grundo estas ŝtona kaj oni vidas ofte longajn kolubrojn, kiuj glitas sur la ŝtonetoj. Kaj malaperas en la herboj. Pro tio la monto havas la pravan Kromnomon de la Serpentoj. La rampuloj ŝajnas naskiĝi sub la piedoj, kiam oni surgrimpas la deklivon, elmetitan al sunbrilo. Ili estas tiel multnombraj, ke oni ne kuraĝas marŝi, kaj ke oni sentas strangan ĝenon, ne timon, sed specon da mistika teruro. Mi havis plurfoje la strangan impreson, suprengrimpante la antikvan sanktan monton, strangan parfumitan kaj misteran monteton, kovritan de cistoj kaj loĝatan de serpentoj kaj kronitan per templo.

Tiu templo ankoraŭ ekzistas. Oni ja certigis al mi ke tio estis templo. Sed mi ne klopodis, ekscii plion, por ne difekti miajn revojn.

Do mi grimpis tien, iun matenon de marto, sub la preteksto admirati la pejzaĝon. Atinginte la supron mi fakte ekvidis murojn kaj viron sidantan sur ŝtono.

Li ne estis multe pli ol kvardekkvinjara, kvankam liaj haroj estis tute blankaj, sed lia barbo restis preskaŭ nigra. Li karesis katon, ronde kuŝantan sur liaj genuoj, kaj ŝajne ne atentis pri mi. Mi rondiris tra la ruinoj, kies unu parto, tegmentita kaj fermita per branĉoj, pajlo, herbo kaj ŝtonoj, estis loĝata de li, kaj mi revenis al lia flanko.

De tie la vidaĵo estas admirinda. Dekstre estas l' Esterel kun pintaj supraĵoj, strange eltranĉitaj, poste la senmezura maro, etendiĝante al la malproksimaj, italaj bordoj kun ĝiaj multaj terpintoj kaj kontraŭ Cannes, la insuloj de Lerins, verdaj kaj plataj, kiuj ŝajnas flosi, kaj kies lasta prezentas al la plenmaro altan kaj malnovan kastelon kun dentitaj turoj, konstruita en la ondoj mem.

Poste stariĝas la Alpoj, kies pintoj estas ankoraŭ kapuĉitaj de neĝo. Ili superstaras la verdan bordon, sur kiu, de tiet malproksime, oni vidas, simile al senmombraj ovoĵoj, demetitaj laŭlonge de la bordo, la longan rozarion el vilaoj kaj blankaj urboj, konstruitaj meze de arboj.

Mi murmuris: »Kristi« estas bele.

La viro levis la kapon kaj diris »Jes, sed se oni vidas tion la tutan tagon, estas unutone«.

Do li parolis, li babilis, kaj li enuis, mia solulo! Mi do povis ion ekscii.

Mi ne restis longtempe tiun tagon, kaj mi nur klopodis trovi la specon de lia homeviteno. Li precipe ŝajnis al mi estajo laca je la aliaj kaj je ĉio, senhelpe seniluziigita, kaj tedita de si mem kiel de la cetero.

Mi forlasis lin post duonhoron da interparolado. Sed mi revenis ok tagojn poste, kaj ankoraŭ unufoje la sekvintan semajnon, poste ĉiusemajne; la rezulto estis, ke ni fariĝis amikoj antaŭ du monatoj.

Nu, iun vesperon fine de majo, mi opiniis ke la taŭga momento venis, kaj mi kunprenis manĝaĵojn por vespermanĝi kun li sur la Monto de Serpentoj.

Estis unu el tiuj sudaj vesperoj, tiel odoraj en tiu lando, kie oni kulturas florojn same kiel oni kulturas tritikon en la Nordo, en tiu lando, kie oni fabrikas preskaŭ ĉiujn esencojn, kiuj parfumas la virinajn karnojn kaj robojn, — unu el tiuj vesperoj, dum kiu la spiroj de la sennombraj orangarboj, plantitaj en la ĝardenoj kaj ĉiuj valetaj sulkoj, malserenigas kaj sopirigas je amorevoj eĉ maljunulojn.

Mia solulo akceptis min kun videbla ĝojo; li volante konsentis partopreni mian vespermanĝon.

Mi trinkigis al li iom da vino, kion li ne plu kutimis; li pli vigliĝis kaj ekparolis pri sia antaŭa vivo. Li ĉiam loĝis en Parizo kaj vivis kiel gaja fraŭlo, ŝajnis al mi.

Mi demandis lin neatendite: »Kian strangan ideon vi havis venante loĝi sur ĉi tiu pinto?«

Li respondis tuj: »Ha! ĉar mi havis la plej akran emocieton, kiun homo kapablas percepti. Sed kial mi kaŝus al vi tiun malfeliĉon? Ĝi igos vin pri plendi min, eble! Kaj... mi neniam tian diris al iu... neniam... kaj mi volus scii... unu fojon... kion alia pensas pri tio... kaj kiel li tion prijuĝas.

Mi naskiĝis en Pariso, mi estis edukata en Parizo, mi grandigis kaj vivis en tiu urbo. Miaj gepatroj postlasis al mi renton de kelkaj miloj da frankoj, kaj mi ricevis per protekto modestan kaj trankvilan oficon, kiu, ĉar mi estis fraŭlo, igis min riĉa.

Mi pasigis, ekde mia viriĝo, fraŭlon vivon. Vi scias, kio ĝi estas. Libera kaj senfamilia, decidinte ne havi leĝan edzinon, mi pasigis de tempo al tempo tri monatojn kun unu, ses monatojn kun alia, poste unu jaron sen kunulino, elektante el la amaso da preneblaj aŭ acetebraj knabinoj.

Tiu malboneta kaj banala vivo preskaŭ plaĉis al mi kaj kontentigis miajn denaskajn inklinojn al ŝanĝo kaj sencelaj promenadoj. Mi vivis sur la bulvaroj, en teatroj kaj kafejoj, ĉiam ekstere, preskaŭ senloĝeje, kvankam mi havis decan hejmon. Mi estis unu el tiuj miloj da estajoj kiuj kvazaŭ korkoj lasas sin florigi, en la vivo; por kiuj la Parizaj muroj estas la muroj de la tuta mondo, kaj kiuj havas zorgojn pri nenio, ĉar ili havas pasion por nenio. Mi estis, kion oni nomas bona tipo, senbonkvalitoj kaj sen miskvalitoj. Jen! Kaj mi juĝis min senerara.

Do, de dudek ĝis kvardek jaroj, mia vivo fluís malrapide kaj rapide sen grava okazaĵo. Kiel ili rapidas, la unutonaj Parizaj jaroj, dum kiuj neniu epokfara rememoro eniras la spiriton, tiuj longaj kaj rapidaj jaroj, banalaj kaj gajaj, dum kiuj oni trinkas, mangas kaj ridas, nesciante pro kio, kun lipoj etenditaj al ĉio gustumebla kaj al ĉio kisebla, sen deziro al io ajn! Mi estis juna, mi fariĝis maljuna, ne farinte, kion la aliaj faras, sen ia ajn amligeco, sen enradikiĝo, sen rilatoj, preskaŭ sen amikoj, sen parencoj, sen edzino, sen infanoj.

Do mi trankvile kaj rapide fariĝis kvardekjara, kaj por festi tiun datrevenon mi regalis min mem per bona vespermanĝo en granda kafejo. Mi estis solulo en la mondo; mi opiniis amuza, festi tutsole tiun daton.

Post la manĝo mi hezitis pri la sekvo. Mi ekdeziris iri en teatron; poste mi havis la ideon, pilgrimi al la »Latina Kvartalo«, kie mi iam studis la jurscienccon. Mi do trairis Parizon kaj eniris sen antaŭdecido en unu el tiuj biervendejoj, kie knabinoj alportas la trinkaĵojn.

Tiu, kiu atentis pri mia tablo, estis tute juna, beleta kaj ridema. Mi proponis al ŝi trinkaĵon; ŝi tuj ĝin akceptis. Ŝi sidis antaŭ mi kaj rigardis min per siaj ekzercitaj okuloj, por scii pri kia speco de viro temas. Ŝi estis blondulino aŭ, pli bone, blondetolino, freŝa, tute freŝa estaĵo, kiun oni divenis rozkolora kaj diketa sub la ŝvelita korsaja ŝtofo. Mi diris al ŝi la amindumajn kaj malspritajn aferojn, kiujn oni ĉiam diras al tiuj estaĵoj; kaj, ĉar ŝi estis vere ĉarma, mi subite havis la ideon, ŝin forpreni... tio ankaŭ, por festi mian kvardekjarecon. Ne daŭris longe nek estis malfacile. Guste ŝi estis libera... de dekkvin tagoj, ŝi diris al mi... kaj ŝi unue akceptis veni noktmanĝi kun mi en la Haloj, kiam ŝia servado estos finita.

Ĉar mi timis, ke ŝi malplenumos la rendevuon, — oni ne scias, kio povas okazi, nek, kiu povas eniri en tiujn bierejojn, nek, kiu vento povas blovi en virina kapo — mi restis tie la tutan vesperon por ŝin atendi.

Ankaŭ mi estis libera de unu aŭ du monatoj kaj mi demandis al mi, rigardante iri de tablo al tablo tiun infanĉarman novulon de l' amo, ĉu ne bone estus, fari aranĝon kun ŝi por kelka tempo. Mi rakontas al vi unu el la banalaj ĉiutagaj aventuroj de la vira vivo en Parazo.

Pardonu al mi tiujn maldelikatajn detalojn; tiuj, kiuj ne amis poete, prenas kaj elektas la virinojn, kiel oni elektas kotleton en la buĉejo, okupigante nur pri la kvalito de ilia karno.

Do mi kondukis ŝin en ŝian ĉambron. Estis laboristina loĝeĵeto pura kaj malriĉa, sur la kvina etaĝo; mi pasigis tie du ĉarmajn horojn. Tiu junulino havis maloftajn allogon kaj ĉarmon.

Forironte mi iris al la kameno, por tien meti la kutiman donacon, post kiam mi fiksas duan renkonton kun la knabineto, kiu restis en la lito: tiam mi malprecize vidis horloĝon sub kloŝo, du florvazojn, kaj du fotografajojn, kies unu, tre malnova, estis survitra kopio, nomita »dagerotipo«. Mi hazarde kliniĝis al tiu portreto kaj mi restis konfuzita, tro surprizita por kompreni... Estis mia, la unua el miaj portretoj... Kiun mi fariĝis iam, kiam mi studente vivadis en la »Latina Kvartalo«.

Mi subite prenis ĝin por ĝin pli atente ekzameni. Mi ne eraris... kaj mi havis emon ridi, ĉar tiu trovo estis tiel neantaŭvidita kaj gajige stranga.

Mi demandis: »Kiu estas tiu sinjoro?«

Ŝi respondis: »Estas mia patro, kiun mi ne konis. Patrino lasis tiun portreton al mi kaj diris, ke mi ĝin konservu, ke eble ĝi iam utilis al mi...«

Ŝi hezitis, ekridis, kaj rediris: »mi cetere ne scias,

por kio ĝi povus utili al mi, mi pensas, ke mia patro ne venos min leĝe filinigi...«

Mia koro batis rapidege, kiel la galopo de timfuri-oziginta ĉevalo. Mi remetis la bildon, kuŝigante ĝin sur la kameno, metis sur ĝin, eĉ ne sciante kion mi faris, du bankotojn centfrankajn, kiujn mi havis en la poŝo, kaj mi forkuris kriante: »Ĝis baldaŭ, ĝis la revido, karulino mia, ĝis la revido!«

Mi aŭdis, ke ŝi respondis »Ĝis mardo!« Mi estis sur la malluma ŝtuparo, kiun mi malsupreniris esplorpalpante.

Kiam mi eliris, mi konstatis, ke pluis, kaj mi foriris grandpaŝe tra iu strato.

Mi iris antaŭen, frenezeta, konsternegita, serĉante rememorojn! Ĉu eble? — Jes — mi subite rememoris pri knabino, kiu skribis al mi ĉirkaŭe unu monaton post nia disiĝo, ke ŝi estas graveda de mi. Mi disŝiris aŭ bruligis la leteron kaj forgesis la aferon. Mi estus devinta rigardi la fotografajon de la virino sur la kameno de la



P. Ysern-Alié

Fraŭlino Lolita Mas.

Du poemoj

— Amalia Nunez Dubus —

Stelara voĉo

Stelaroj malproksimaj, belserenaj,
brulantaj kiel la anĝelokul',
el kiaj florherbejoj lumoplenaj
flugpendas hele via stranga tul'?

Ĉu en vi, senmezura fajrujaro,
ankoraŭ la platen' estas vapor',
aŭ tegas vian mason nigra maro
sen fiŝoj, sen koraloj, sen kolor'?

Ĉu viajn ebenaĵojn primitiva
Mistero superregas en silent',
aŭ vin trairas la bestar' ekviva:
praelefantoj, megatera gent'?

Ĉu estas ĉe vi homoj, miaj fratoj,
regantaj super Viv' kaj super Am',
aŭ, kiel ni, la teraj mortpunatoj,
ekkonis la doloron ili jam?

Per kiaj mitoj ili reprezentas
la idealajn revojn de la em'?

Ĉu pri idoloj ili fundamentas,
aŭ kredas esti dioj ili mem?

Miljarojn teraj homoj ja sopiris
je l' Ver', sed penoj vane servis ĝin.
Ĉu ili, pli maljunaj, ĝin akiris?
Pli junaj, ili ĉu konservis ĝin?

junulino. Sed ĉu mi estus ŝin rekoninta? Ĝi estis, ŝajnis al mi, fotografaĵo de maljunulino.

Mi atingis la kajon. Mi vidis benkon kaj mi sidigis. Pluvis. Homoj pasis de tempo al tempo sub pluvombreloj. La vivo ŝajnis al mi abomeninda kaj indigniga, plena de mizeroj, hontoj, volitaj aŭ senkonsciaj krimoj. Mia filino! Mi ĵus seksposedis eble mian filinon! Kaj Paris, tiu granda, malluma, malbrila, kota, malĝoja, nigra Paris kun ĉiuj tiuj ŝlositaj domoj, estis plena de tiaj aferoj, adultoj, sangadultoj, seksperfortitaj infanoj. Mi rememoris, kion oni diris pri la pontoj vizitataj de aĉaj malvirtuloj.

Mi agis, ne sciante kaj nevole, pli malbone ol tiuj malnoblegaj estaĵoj. Mi eniris la liton de mia filino!

Mi preskaŭ volis min ĵeti en la akvon. Mi estis freneza. Mi vagadis ĝis la sunleviĝo kaj poste revenis hejmen por pripensi.

Mi faris tiam, kio ŝajnis al mi plej saĝa. Dirinte, ke mi estas komisiita de amiko, mi petis notarion, voki tiun junulinon kaj demandi ŝin, en kiuj cirkonstancoj ŝia patrino donis al ŝi la portreton de tiu, kiun ŝi supozis sia patro.

La notario plenumis miajn ordonojn. Kiam ŝi mortis, tiu virino estis nominta la patron de ŝia filino antaŭ pastro, kies nomon oni diris al mi.

Poste, ankoraŭ en la nomo de tiu nekonata amiko, mi transdonigis al tiu infano la duonon de mia havaĵo:

Ho, kiu scias, steloj senmezuraj,
ĉu la Mister' ne estas jam ĉe vi,
kaj vi, tra l' spacoj de l' ĉiel' lazuraj
sciigas nin per via harmoni'!

Ho jes! ĉar tra ĉiela stelvizio
rakontas vi, per via vigla brul',
misterojn de la Ĉio kaj Nenio,
al mi, malgaja ĉiam revemul'.

Sed estas vane: homa karno mia
komprenon baras ja de via vort'.
Nun diru: ĉu mi do dum tago ia
komprenos vin, libera post la mort'?

Nokta bildo

(Aŭtuna nokto)

Sonas el la turo du hor' kaj duono.
Mi revas sendorma post mia balkono:
sed dormas la eta provinca ĉefurb'
Velkintajn branĉetojn la vento frakasas.
Per paŝoj laŭritmaj policano pasas.
La luno vojiras tra ĉiela kurb'.
Drinkulo lamanta zigzagas la straton.
Vesperto skuigas la elektran draton
Malproksime ridas nokta belulin'.
Heroldo de morto — la popolo diras —
Noktua ekkrio silenton traŝiras.
— Ĉu pro birda amo? Ĉu pro homa fin'?

cent-kvardek mil frankojn proksimume, kies renton nur ŝi povas ricevi, poste mi ekŝiĝis el mia ofico kaj jen mi estas.

Vagante laŭ tiu marbordo mi trovis ĉi tiun monteton kaj mi haltis... ĝis kiam... mi ne scias!

»Kion vi pensas pri mi... kaj pri tio, kion mi faris?«

Mi respondis, etendante mian manon al li:

»Vi faris kion vi devis fari. Multaj aliaj estus donintaj malpli da graveco al tiu abomeninda fatalaĵo.«

Li rediris: »Mi tion scias, sed mi, mi estis preskaŭ frenezigonta pro tio. Ŝajnas, ke mi havis senteman animon, kvankam mi neniam tion eksentis. Kaj mi nun timas Parizon, kiel la kredantoj devas timi la inferon. Mi ricevis baton sur la kapon, jen ĉio... baton similan al la falo de tegolo, kiam oni pasas sur strato. Mi estas pli bona de kelka tempo.«

Mi forlasis mian solulon. Mi estis tre emociita de lia rakonto.

Mi revidis lin ankoraŭ du fojojn, poste mi foriris, ĉar mi neniam restas en la Sudo post fino de majo.

Kiam mi revenis la sekvan jaron, la viro ne plu estis sur la monteto de la Serpentoj, kaj mi neniam aŭdis paroli pri li.

Jen la historio de mia ermito.

El la franca: R. Richet.

Vizito al Stellan Engholm

— Jean Forge —



St. Engholm, S-ino Engholm kaj Jean Forge

Dum mia trimonata vojaĝo tra Svedujo urboj, urbejoj, vilaĝoj aperis kaj malaperis kiel sur filma rubando, vizaĝoj, vizaĝoj rigardis min, en la okuloj ekbrilis samideana entuziasmo — en la haveno de Göteborg mi aŭdis la sirenojn de oceanoj ŝipegoj, en Stockholmo salutis min la blankaj mevoj, flugantaj super la bluj akvoj, en miajn orelojn penetris la krio de l' grandurbo, tramoj kaj aŭtoj, homoj svarmantaj — la bildoj rapide pasis kiel sur sonĝa ekrano...

Kaj jen — el tiu tumulta kaoso, sur tiu sonĝa ekrano aperas unu rava bildo, unu mallonga sed neforgesebla bildo: Nyberget! Jes, subite post kelkhora veturado fervoje kaj aŭtomobile mi estas en Nyberget. Ne, verdire ie profunde en la arbaro, en densa sveda arbaro. Tie loĝas Stellan Engholm. Malproksime de la homoj, for de la grandurba bruo staras lia domo. Post tiom da bruo, da nervojn vipanta ĵazritmo de la nuna tempo, mi duoble sentegas la subitan kvieton de la naturo. Tie vivas la verkinto de la novelo »Al Toronto«...

Malofte direktas homo siajn paŝojn en tiun solecan domon, ĉirkaŭitan de densa arbaro, kaj tamen — kiel interese! — venis al tiu kaŝita idilia loko konataj Esperantistoj: pastro Cseh, Tiberio Morariu, Henriko Seppik, la hinda Sinha kaj aliaj...

»Sinha estis ĉe ni kelkajn semajnojn,« rakontas la edzino de Engholm, perfekta esperantistino. »Li pilkludis kun svedaj knaboj, fiŝkaptis kaj banis sin en la proksima lago! Kiel domaĝe, ke li devis tiel frue reiri Hindujon. Li faris veran propagandon por Esperanto.«

Dum la vespermanĝo ni parolas pri la »verda politiko«, pri novaj pli modernaj propagandmetodoj. Sinha montris unu el tiuj vojoj: praktike uzi la lingvon. Ni devus havi 100 tiajn prelegistojn el plej diversaj rasoj kaj popoloj. Ili devus veturadi tra la landoj kaj prelegi en Esperanto pri interesaj temoj. Mi rakontas pri mia »nigra inafno« la negro Kola Ajayi, kiu volas fariĝi la nigra Sinha.

Stellan Engholm estas silentema, modesta homo, ŝajnas ke liaj pensoj forvagas en malproksimajn regionojn. Kiam mi sciigas, ke »Literatura Mondo« sendas min por fari intervjuon kun li, li diras: »Mi tute ne ŝatas la reklamon!« Ankaŭ la fotoaparaton li malŝatas, kiel mi poste konstatas.

Engholm estas instruisto. En la jaro 1920 li eklernas sola Esperanton, sed nur en la jaro 1927 li fariĝas pli aktiva, kiam li renkontas d-ron Privat kaj aŭdas unuafoje esperantlingvan lian paroladon. Li estas verkisto jam fraŝe, verkas poemojn kaj novelojn en sveda lingvo. Poste komencas verki en Esperanto.

»Kiel tio okazis? Por konfesi la veron, unue mi ekskribis malgrandan skizon por ekzerci la lingvon, sed

poste tiu ĉi skizo fariĝis pli kaj pli longa kaj fine el ĝi rezultis mia unua originala novelo »Al Toronto«.

Venas la tempo, kiam li tradukas la Andree-libron. Ĉiun liberan minuton li uzas, por fini tiun ofte malfacilan tradukon. Ĝis la unua, dua nokte li laboregas kun helpo de sia edzino. La lingvo, kiun li uzas, estas majstra, la stilo bonega, la formo unuaranga. La lingvaj lerteco kaj perfekteco estas la unua nepra eco de la originala Esperanto-verkisto. Engholm posedas ĝin en alta grado.

»Kion vi opinias pri la originala verkado en Esperanto?« mi demandas.

»Mi ne konsentas pri la aserto de kelkaj esperantistoj, ke Esperanto estas nura helplingvo taŭga por tradukoj. Laŭ mia opinio ĝi estas vivanta lingvo, en kiu ĉiu povas libere verki. La evoluo de la lingvo laŭ mia opinio estas akcelata ĝuste per la originalaj verkistoj. Tamen mi ne ŝatas neologismojn.«

»Do, laŭ vi Esperanto estas memstara literatura lingvo,« mi diras, »sed ĉu vi verkante ne sentas kelkfoje ĝian artefaritecon, ĝian konstruitecon? Ekzemple la multaj pre- kaj sufiksoj laŭ mia sento malaltigas la literaturan forton de la lingvo. Vortoj kiel malami, varmeta, malvarmega, malhela ktp. ofte havas specialan esprimon aŭ terminon en la naciaj lingvoj, ili por tiel diri estas pli »palaj« en Esperanto ol en la nacia lingvo. Al mi ofte ŝajnas — mi faris kelkajn tiurilatajn eksperimentojn — ke teksto bone tradukata el Esperanto en nacian lingvon en sia tradukita formo pli impresas ol en sia antaŭa origina formo.«

»Tion mi ne sentas,« kontraŭdiras Engholm, »sed ni konsideru, ke ni staras ankoraŭ en la komenco de la literatura lingvo Esperanto. Ĝi ankoraŭ estas uzata tro malmulte en la praktiko kaj tial la vortoj ankoraŭ ne penetris tro profunde en la sentojn de la esperantistoj — kiel tio okazis ĉe la ĉiutage uzata nacia lingvo, kaj eble ankaŭ la verkistoj.«

»Mi komprenas,« mi interrompas, »vi estas prava: oni uzas Esperanton tro malmulte en la praktiko! Ni devas lerni rektan pensadon kaj sentadon en la lingvo, precipe la originala verkisto devas liberiĝi tute de sia nacia lingvo. Kaj la simpleco de Esperanto, ĉu ĝi ne ĝenas dum la verkado?«

»La facileco kaj simpleco de Esperanto tute ne malfortigas la literaturan kvaliton, kapablon de nia lingvo. Mi mem ekzemple ne ŝatas la modernajn verkistojn de hodiaŭ.«

»Kial ne?«

»Ĉar ŝajnas al mi, ke la modernaj nacilingvaj verkistoj faras tro multajn vortojn. Ili ofte uzas strangan »vortlingvon«, ili konstruas modernajn barikadojn de frazoj kaj vortoj, malantaŭ kiuj oni vane serĉas valorajn pensojn.

Kaj la taskoj de la originala Esperanto-verkisto? mi demandas.

»Antaŭ ĉio ili verku serioze! La temoj povas esti diversaj. Eĉ romani pri la vivo de la esperantistoj mem, pri ilia laboro, feliĉo kaj malĝojo povus esti interesa valora literaturaĵo, se oni priskribus la esperantistojn kiel homojn kaj serioze klopodas trovi la veron...«

Jes, tiel agas ja la verkisto kaj poeto Engholm. Li observas ĉion, kio lin ĉirkaŭas, la homojn de la svedaj arbaroj, la svedajn gejunulojn de hodiaŭ, la problemojn, kiajn prezentas la nuno, kaj projekcias per plej delikata sentospegulo iom de tiu nuno en la animon de la leganto!

»Homoj sur la tero« estas la titolo de lia nova romano. El la angla originalo li ĵus tradukis verkon de hinda profesoro S. Radhakrishnan en Esperanton. Kaj jam atendas lin nova tasko: por granda Stockholma eldonejo »Tiden« traduki sveden mian romanon »Mr. Tot aĉetas mil okulojn«...

Kiu verkisto influas lian verkadon? Li ne povas diri.

Iom da Parizo

— Knut Hamsun —

Min ĉirkaŭas belo kaj forto, preter mi pasas la blindiga kaj rapidege kuranta vivo. Tio estas nacio, kiu paŝas kun brulantaj torĉoj, — pro plej sensignifaj cirkonstancoj venas en pli altan animstaton, lanĉas raketojn kaj jetas ĉirkaŭ si fajrerojn.

Cio tie ĉi miksiĝis, — malvirto, malĉasto kaj ree belo kaj forto. Inter la harmonio de arkitekturo kaj arto aŭdiĝas falsa kanto kaj naiva muziko. Kiaj gurdoj kaj kiaj strataj kantistoj estas en Parizo. La homoj ofte fajfetas marŝon, irante tra la strato, sed mem ne iras laŭ takto. Kiam tra la urbo marŝas la nacia gvardio, aŭ la versajla armeo, la militistoj tiel malbone atentis la takton, ke ili elvokas nur kompaton. Eĉ la Marsejlezoj oni povas aŭdi en pli bona plenumo eksterlande ol en Parizo.

Sed tiu popolo kantetas, muzikas kaj ludas plej diversajn instrumentojn kun plezuro. La ĝojo kaj vivo ĝin ebrigas kaj levas de la tero. En la stratoj la homoj intervokas sin, krias al la ĉevaloj, surdige klakas per la longaj vipoj. Kaj samtempe, kun la konscio pri sia supereco kaj malŝato al fremduloj, ni vidas en ili infanan sciivolemon. Sufiĉas ke ili renkontu en la strato ĉinon aŭ eĉ nur arabon por ke ili haltu, sin turnu kaj rigardu. En San Francisco neniu eĉ ekpensus halti antaŭ sovaĝulo kun ringo en la nazo.

*

Ili marŝas subsaltante dumire, kiel gajaj dancistoj, kiel plej juna kaj plej facilanima popolo en la mondo. Kaj malofte, tre malofte vi vidas, ke ili rompus la fiksitajn formojn. En ilia sango estas malnova kulturo, ili penas eviti maldelikatecon kaj konservas la ekvilibron. Kiel ĉiuj aristokratoj, ili estas konservativaj, ĝis nun ili gluas siajn leterojn per oblatoj kaj uzas alumetojn, kies terura odoro povas konkuri nur kun la odoro de la alumetoj amerikaj. Ilia pasinteco estas grandega kaj ili vivas per ĝi; generalo en uniformo fariĝas ilia dio kaj ili sopiras je l' grandeco de monarkio. La sendatoj en la ministrejoj portas ankoraŭ ĝis nun triangulajn ĉapojn.

Monsieur-monsieur.

Foje vespere antaŭ hotelo sidas kuireja knabo, lavante ion, kaj tien elvenis unu el la kuiristoj. Ili sidas kaj babilas inter si post tago labora. Sed jen la knabo leviĝas kaj diras:

— Bonne nuit, monsieur!

Kaj la kuiristo respondas:

— Bonne nuit, monsieur!

La formo ne estas forgesita...

Foje venas letero. Ĝi estis respondo je peto pri rendevuo. Juna sinjorino ĵus vidviniĝis, ŝi portis funebrajn kaj respondis sur funebra leterpapiro. Sed al rendevuo ŝi konsentis veni.

Mi scias, ke tio estas vero. Mi mem vidis tiun leteron, skribitan sur funebra papero.

Iu rakontas:

Estas la kvina matene. Mi jam estas leviĝinta, ĉar

*

Li ŝatas la hispanan poeton Cervantes kaj lian verkon »Don Quixote«, li ŝatas la rusan verkiston Dostojevski plej multe. Li eĉ studas la rusan lingvon. Kaj li ŝatas kaj admiras la genian mortintan Berlinan pentriston Heinrich Zille.

»Zille? Kia surprizo por mi!« mi elkrias, Ĉu vi scias, ke ankaŭ mi estas admiranto de tiu pentristo, kiu majstre desegnis la proletojn kaj malriĉulojn de Berlino kun unika ironia trajto? Ke laŭ mia manuskripto ni turnis en tiu »milljöh« (medio) unu el la plej sukcesaj artnivelaĵoj filmoj?»

Tio estas nova bazo por vigla diskuto. Estas malfrua nokto, kiam ni fine enlitiĝas.

Matene la suno brilegas en miajn fenestrojn. De la lerneja korto sonas la ĝojkrioj de svedaj geknaboj. Eng-

la tutan nokton mi ne povis fermi okulon. Mi estas forlasita kaj malfeliĉa; mi sentus min bonege se ne estus la letero, kiun mi ricevis, kaj el kiu mi eksciis ke mi estas forlasita.

Mi eliras el mia ĉambro en la straton kaj eniras en koĉer-drinkejon. Mi mendas kafon kaj konjakon. Tie jam sidas kelkaj koĉeroj kaj ĝuas sian unuan matenmanĝeton, — ili estas entute kvin, ili laŭte interparolas kaj mangas.

Mi portas malgrandan fotografajon en la mano, rigardas ĝin kaj por la centa fojo tralegadas la du-tri vortojn, skribitajn sur la inverso. Si min petis bruligi la fotografajon, sed mi ne bruligis ĝin tiun nokton. Mi ĝin prezentas al koĉero sidanta apud mi, li rigardas ĝin, ridetas kaj diras, ke mi havas bonan guston.

— Vi eraras — mi diras, — tio estas mia fianĉino.

Tiam li laŭdas min ankoraŭ pli pro mia bona gusto. Li transdonas la fotografajon al siaj kamaradoj kaj klarigas al ili, ke tio estas mia fianĉino. Ĉiuj estas ravitaj, ĝojas pro mi, laŭte parolas kaj ridetas.

— Verdire ŝi ne estas plu mia fianĉino, — mi klarigas. — Ĉar ĝuste hieraŭ vespere mi ricevis de ŝi la lastan leteron. Mi havas la leteron kun mi ĉi tie, kaj jen kion ŝi skribis.

Mi montras al ili ankaŭ la leteron kaj turnas ilian atenton al tiu loko, kie estas skribite, ke ŝi forlasis min. La koĉeroj ne scias legi en mia lingvo, sed kiam mi montras al ili, kie tio estas skribita, ili kapskuas kaj fariĝas seriozaj pro konsento je mia malfeliĉo.

Ni trinkas kune.

Estas jam la sesa horo.

En la drinkejton ridege enfalas kelkaj viroj kaj virinoj. Eble ili revenas de balo tiun matenan horon, ili estas en balaj kostumoj, palaj post nedormita nokto, sed infekte gajegaj. Ankaŭ ili havis la ekpenson eniri en tiun ĉi drinkejton; ili mendas kafon kaj konjakon. La koĉeroj montras ankaŭ al tiu fremda kompanio mian fotografajon kaj rakontas mian historion. Ĉiuj rigardas min kun-sente kaj alta juna fraŭlino enpensiĝas.

Mi trinkas ankoraŭ kafon, precipe pro la konjako, la koĉeroj trinkas ankaŭ. La fremda kompanio partoprenas en nia societo, kapskuas al ni kaj trinkas por nia sano.

Subite la alta juna knabino aliras al mi, prenas el sia zono du rozojn kaj prezentas ilin al mi. La ceteraj sidas kaj rigardas. Mi leviĝas kaj dankas kaj staras antaŭ ŝi konfuza kaj konsternita. Ŝi prenas mian kapon en siajn manojn, kias min sur la lipoj kaj iras al sia loko.

Aŭdiĝas ĝenerala aprobo.

La rozoj ĉifigadis la tutan nokton kaj komencis jam velki; sed ili estis grandaj kaj malhelruĝaj. Mi volas ilin alkroĉi al mia brusto kaj mi serĉas pinglon. Iu tuj prezentas al mi pinglon. Ĉiuj volas helpi min kaj vidigi ian servon. Ĉiuj ĉi homoj estas allogitaj de minuta agordo; unu fiakristo demandas min, kie mi loĝas kaj proponas

holm jam komencis la instruadon en la lernejo...

Bedaŭrinde la tempo ne permesas resti pli longe en la agrabla gastama hejmo de gesinjoroj Engholm, babilu kun la poeto pri niaj »verdliteraturaj« demandoj, promeni tra la sorĉa sveda arbaro, senti la kvieton de la naturo.

Stellan Enholm adiaŭas dum la paŭzo. Li esperas veni al Parizo. »Mi ne ŝatas la reklamon!« li ripetas. Certe — ankoraŭ li staras en la komenco de sia Esperanta verkado. Sed mi estas konvinkita, ke li donacos al ni ankoraŭ grandajn valorajn verkojn, pri kiuj povos fieri la Esperanta popolo, ke li estos unu el la pioniroj en la batalo por la ekzistado de nia originala literaturo — li, la delikatsenta psikologo, la kvietvorta poeto el la alta nordo: *Stellan Engholm!*

veturigi min hejmen senpage. Sed kiam mi pagas la plenan kalkulon, ĉiuj fiakristoj protestas, ŝvingas per la manoj kaj evidentigas simptomojn de forta ekscitigo; ili akompanas min ĝis la pordo kaj postkrias korajn vortojn, ĝis mi malaperas, Bonjour, monsieur! Merci, monsieur!

*

Ce la angulo de bulvardo Saint-Michel kaj strato Vaugirard staras homo. Lamulo. Li vendas kraĵonojn. Tiu ĉi homo tedas neniun, ne parolas eĉ unu vorton, kvankam li treege dezirus vendi kraĵonon. Foje, matene, mi aĉetas de li kraĵonon kaj li ne parolas eĉ unu vorton, krom la kutiman: Merci, monsieur! Kaj jen, mi komencis aĉetadi de li ĉiutage kraĵonon dum tri semajnoj. La homo tiel kutimiĝis al mi, ke tuj li prezentis al mi kraĵonon, kiam mi nur proksimiĝis al li; jes, kaj per ĉiuj fortoj li penis elekti por mi plej bonan kraĵonon, kiun li nur havis. Sed li parolis al mi nenion krom: Merci, monsieur!

Fine li foje al mi diris:

— Mi ĝojas, monsieur, ke vi trovis kraĵonon kiu taŭgas por vi.

Sed tion li diris al mi post kiam mi aĉetis de li dudek kraĵonojn.

*

Foje vespere mi sidas en granda restoracio kaj tra-rigardas ilustritajn ĵurnalojn. Subite la pordo malfermiĝas kaj en la saloon eniras sinjorino. Ŝi haltas momenton kaj rigardas ĉirkaŭen. Ŝi estas eksterordinare belega, sed harojn ŝi havas, kiel kutime havas la sinjorinoj de l' duonmondo — heligitajn je flaveta koloro, kaj ŝia tuta figuro esprimas arogecon.

Ŝi turnas sin al mi kaj diras:

— Estu afabla, eliru kaj pagu mian fiakriston.

Mi tute ne sidis pli proksime al ŝi ol aliaj, tamen ŝi turnis sin al mi. Mi ekmordis la lipojn, metis la manon en la poŝon, vokis kelneron kaj diris al li:

— Iru kaj pagu al la fiakristo de tiu sinjorino.

Mi jetis al li moneron dudekfrankan. La sinjorino komencis min observi kun scivolemo kaj kun miro.

Sen plua parolo mi ree komencis studadi la ilustritajn gazetojn kaj interne ĝojis, ke la sinjorino ricevis bonan instruon de mi. Ŝi eksidis eĉ alia tablo. La kelnero revenas, donas al ŝi la monon, kiun li reste ricevis, ricevas frankon trinkmone, riverencas kaj foriras de la sinjorino. La restaj moneroj kuŝas antaŭ ŝi.

Eniras sinjoro kiun ŝi konas kaj ŝi kapsigne vokas lin al si. Ili interparolas mallaŭte, ŝi komunikas al li mian maldelikecon, konsistantan en tio, ke mi sendis la kelneron, montras la monon sur la tablo, skuas la kapon kaj levas la ŝultrojn. La sinjoro sendas al mi kelneron kun mia armonero, kaj mi akceptas ĝin kun konvena al tiu kazo trankvileco, kaj lasas la moneron en la veŝtan poŝon.

Sed nun la sinjorino ree aliras al mi. Mia neŝancel-ebla trankvilo incitas ŝin, ŝi volas, ke la lasta vorto apartenu al ŝi.

— Ĉu vi ricevis mian monon? — ŝi demandas.

— Jes, mi dankas, — mi respondas kun miro.

— Ĉar mi prunteprenis de tiu ĉi sinjoro dudek frankojn, — ŝi diras al mia najbaro. Kaj ŝi denove klarigas kiel mi agis kaj kiel mi sendis la kelneron. Ŝi turnas sin ankoraŭ al unu el la ĉeestantoj, kaj poste ankoraŭ al unu, — estas klare, ke ŝi sentas sin forte ofendita kaj serĉas kunsenton eĉ unu tablo post la alia tra la tuta salono. Ŝi komencas ĉie paroli pri tio ĉi, mi aŭdas la vorton fremdulo, ĉiuj konsentas kun ŝi.

Meze de tio ĉi mi povis nur silenti. Se mi provus senkulpigi min kun la du dekoj da francaj vortoj, kiujn mi havas en provizo, mi fariĝus nur ridinda kaj eble oni min eĉ forpelus. Kaj tial silente mi aŭskultas, kio okazas ĉirkaŭ mi.

— For lin! — aŭdiĝis el ie en la salono.

— For lin! — oni respondis en alia loko.

Mi vokis la kelneron kaj pagis la kalkulon. Farinte tion, mi trankvile refoje sidigis. Ĉirkaŭ mi okazadis mal-kvietaj interparoloj.

En tiu momento malfermiĝis la pordo kaj eniris

AŬTUNA KANTO

— Cf. Baudelaire —

I.

Ni baldaŭ dronos funde de la mallumoj frostaj;
adiaŭ, viva klaro de ĉi somer' tro fuĝa!
Mi aŭdas jam, ke falas, kun skuoj morte tristaj,
sur kortpavim' la ligno, resonadante muĝa.

En min la tuta vintro eniros tuj: kolero,
malamo, trem', hororo, penego truda, dura,
kaj, kiel sun' en sia polusa frost-infero,
jam mia koro estos nur glaciblok' purpura.

Tremante mi aŭskultas la ŝtipojn, kiuj falas;
ne ehas ja pli surde eĉ eŝaford' farata falas;
Mia spirit' similas al tur', kiun ŝancelas
la frapoj de arjeto senlace, peze bata.

Kaj ŝajnas, dum min lulas ĉi tiu monotono,
ke oni najlas ĉerkon per martelado hasta.
Por kiu? ... Jus someris; jen estas la aŭtuno!
Ĉi bru' mistera sonas kiel foriro lasta.

II.

Mi amas verdan lumon de l' longa okulparo,
vi, milda Bel', sed ĉion mi trovas nun amar';
neni', nek via amo, fajruj', nek buduaro
valoras por mi sunon, radian sur la mar'.

Tamen, min amu, estu patrino, kor' tenera,
patrin' eĉ por maldanka, eĉ por malbona vir';
ame aŭ frate, estu la mildo efemera
de la aŭtuno glora, aŭ de la sunsubir'.

Mallonga task'! Atendas, avidas ja la tombol'
Ho, lasu min, gustumi, kun frunt' eĉ via zon',
bedaŭre pri la blanka kaj varma somerpompo,
la brilon flavan, mildan de la malfru-sezon'.

El la franca: G. Waringhien

sinjoro, kiun mi konis. Tio estis d-ro Goldman, la korespondanto de »Frankfurter Nachrichten«. Li sidigis eĉ mia tableto kaj volas ekscii, kio okazis. Kiam mi en kelkaj vortoj klarigas al li la situacion, li diras ke tiu sinjorino estas la fama mademoiselle G. Kaj li aliras al mademoiselle G. kaj diras al ŝi kelkajn vortojn, tenante la ĉapelon en la mano.

Post tio ĉi la uragano mallaŭtiĝas. Mi trinkas kun la doktoro vinon kaj la sidantoj ĉirkaŭ ni komencas rigardi min eĉ kun certa favoro. Sinjoro demandas la doktoron

— De kiu nacio estas via amiko?

Kaj la doktoro respondas:

— Ruso.

— Ruso — rusoj, — disportigis murmuro tra la tuta salono. Mi estas savita. Kiam mi forlasis la restoracion, mi ricevis bukedon da violetoj de m-elle G.

Du semajnoj poste mi famiĝis kiel rusoj en pafejo. Kaj malgraŭ tio, ke mi pafadis tre malbone, ĉirkaŭ mi aŭdigadis laŭtaj aklamoj ĉiufoje, kiam mi de tempo al tempo sukcesis trafi en la celon.

Tradukis: E. Wiesenfeld.

Prezentado de Parizo je la kvina vespere

— JULES ROMAINS —

Antaŭ la pordego del Sankta-koro provincanoj, fremduloj, alvenintaj nur hieraŭ, rigardis Parizon atingitan de la ondaĵoj movoj del ombro, kiel indikigis al si la monumentojn. Aliaj, malproksime, forlasis la lanternon del Pantono, la turojn de Notre-Dame, malfruadis en la ŝtuparo del Eiffelturo, tute frostigitaj, de vento kiel vakuo. Del balkono de sia laborejo, en Caulaincourt-strato, pentristo vidis ondegi la nordajn antaŭurbojn, kun siaj fabrikoj, siaj fumoĵoj, kun la blankaj neĝeroj del lokomotivoj, ĝis la montetoj de Pierrefitte... En la centro la vastaj vespermovadoj, la longaj supreniradoj al Nordo kiel Easto, similaj al senfina spirado, apenaŭ komenciĝis. La homfrekvento jam forlasis la internon de la Dorso kiel del bankoj, malpliigis ĉe la etaĝoj del komercejoj, sed pliigis kiel plidensiĝis en la stratoj. La butikoj eklumiĝis ekde la fundo... Uzintrumoj fajfadis; la stacidomaj horloĝoj montris la kvinan. Kvar, sep, dekunu ekspresaj trajnoj rulis al Parizo. La kvar, kiuj malproksime rampadis, eliris apenaŭ el provinco. Ili ĵus deiris de la lastaj urbejoj, kiujn Parizo lasas kreski je kelka distanco; ĉi tiuj signas, palisoj, cirkloj, kiu estas kvazaŭ la desegno de ĝia ombro. De kiam oni penetras kiel en ĝin, Parizo nesenteble jam komenciĝis.

Tri aliaj, multe pli proksimaj, trairas kamparojn ensorbitajn kiel konkeritajn, sed ankoraŭ belajn, en la oblikva fluo de orbruna sunsubiro. Ili alvenis al la dua cirklo, al tiu, kiun difinas, ĉirkaŭ dekdu legvoj for de Notre-Dame, la ĉeflokoj del maljunaj landoj de Ile-de-France.

La kvar ekspresoj kiuj alkuradis la unuajn, jam atingis la najbaran ĉirkaŭurbon, sin enŝovis en ĝin, malrapidiĝante. La unua venis de Lyon, alia de Lille, alia de Bordeaux, alia de Amsterdam.

Parto de centro komencis malstreĉiĝi: vigla fluo de veturiloj progresis en direkto al uesto, kiel kontinua svarmado de piedirantoj ŝtopadis ĉiujn vojojn, kiuj iras de Concorde al Bastille. Estis la horo, kiam en la stratoj la proporcio de riĉuloj estas plej granda; kiam la magazenegoj, akre iluminataj, pleniĝas de virinoj; kiam la virinoj ŝajnas esti ĉie pli multaj kiel pli feliĉaj ol la viroj; kiam laŭtiĝas en preĝejoj delikata bruoj de preĝado, sub la sola lumo del kandeloj; kiel kiam la infanoj del popolaj kvartiroj kriante sin pelas sur la trotuaroj.

En la stacioj del subtera fervojo, vojaĝantoj, ne ĉesante gvati la estontan tondron de trajno, ekzamenis la planon, serĉis straton. Aliaj, kiuj vidis ilin tiel agi, rimarkis la planon, ankaŭ rigardis eble por la unua fojo ili klarigis al si la formon de la urbo, pripensis ĝin, ekmiris pro la orientado de bulvaroj, pro la dimensio de arondismento. Koĉeroj, ŝoforoj akceptis klientojn, aŭskultis nekutiman stratnomon; tiam Parizo malvolviĝis en ilia kapo, en ilia korpola, netuŝebla Parizo farita el vivantaj linioj, el sensitaj distancoj, sorbigita de movadoj kiel spongo kiel misformita de la senĉesa fluo del proskimiĝantaj kiel foriĝantaj aferoj. Subite en tiu Parizo, kiam ili identigis al si mem, la strato pikis ilin ĉe preciza punkto, kiel ili iris al ĝi kvazaŭ al juko.

En la oficejoj del Prefektejo, ĉiel ekstremo de ĉiam malpuraj koridoroj, homoj kun lustrinaj manikoj adiciis naskigojn, difterikazojn, akcidentojn per ĉeval- kiel motorveturiloj, kvadratmetrojn da asfaltita ŝoseo, centkilogramojn da vivviando, biletojn de sub-

tervojoj laŭ stacioj kiel linioj, kostojn po vojaĝanto-kilometro. Kliniĝintaj kiel anatomoj super ia sensanga Parizo, ili detranĉis de ĝi longajn rimenojn da ciferoj.

La homoj en la dekunu ekspresoj pensis al Parizo. Kiuj jam konis ĝin, tiuj reprezentis al si precizajn stratangulojn, hejmojn, vizagojn; faris jam antaŭe siajn klopodojn, gestoĵojn, respondojn en ĝustaj lokoj; sternis sin jam antaŭe en liton, en kiu la dormo atingos ilin laŭ preciza maniero. La novevenintoj metis al si demandojn, metis ilin al la kamparo trans la vitroj, al siaj pakajoj, al la rapide preterpasantaj stacidomoj, al la konveksa lanterno del kupeo, al la vizago de silenta apudsidanto. Ili angore serĉadis kaj kolektis ĉiujn viziojn, kiujn ili imagis al si pri Parizo. Ili malvolvis fantaziajn dekoraciojn ĉirkaŭ konataj estaĵoj. Ili dotis per ia voĉo, rigardo, korpulenteco la nomojn, kiujn oni skribis al ili sur paperpecetoj. Ĉirkaŭ la periferio, teren-spekulaciistoj padelis en la koto de nefinitaj stratoj, levis la kapon por rekoni laŭ la lumoj del sunsubiro la direkton del nordo, del sudo; okulesploris pasantan maljunulinon, stratlanternon, la drinkejon ĉe la angulo, aŭskultis la rulbrulon de aŭtobuso, flaradis la venton, kvazaŭ la estonto parolus tuj al ili, mallaŭte. Vendisto de laĉoj kaj kraĵonoj, forlasante la regionon ĉirkaŭ la pordego Saint-Denis, malsupreniris tra la bulvaroj Sebastopol al la Châtelet kaj Urbdomo, kvazaŭ fiŝeca instinkto antaŭsentigus al li, ke iaj akvoĵoj laŭ la horoj estas pli aŭ malpli favoraj. La poŝtelistoj, ankoraŭ pli impresiblaĵoj de la nuancoj del homama so, fordonis sin al analogaj migradoj. Kaj la publikulinoj, kiuj ne havas kapricojn, iris fidele reokupi sian postenon sur la gvatvojo de l' korpa amo.

Tiam la liceanoj, en la studĉambroj, mordetante sian plumingon aŭ taŭzante al si la harojn, sekvis la lastajn tagrebrilojn pelitajn de la gashumo sur la

La Kokoso

— Toŝon Simazaki —

De insuleto fora, nekonata,
Tra l' maroj alboridiĝis jen kokoso.
La hejmon forlasinte, laŭ supozo
Ĝi venis post vagado multmonata.

Forpelis min la sorto senkompata,
Kaj sola kaj malseka de la roso
Mi litas ĉe l' marbordo por ripozo,
For de la hejmo, arde sopirata.

Mi prenas la kokoson ekkarese.
Ho, bolas nun denove la doloro
Kaj varmaj larmoj fluas for senĉese.

La sun' subiras jam en orkoloro.
Ho, kiam hejmenvenos mi sukcese,
Vagulo? Ve, respondas sole ploro!

El la japana: K. H. Sisido, Kioto.

Rim, de l' trad': La originalo, poemo de nuntempa poeto japana, ne estas soneto; la japana verso ne havas rimojn, do ankaŭ soneto ne povas en ĝi ekzisti. Mi tamen aranĝis ĝin kiel soneton, ĉar, laŭ mia sento, ĝia strukturo, ĝia interna formo estas tute konforma al soneto.

glacea kurbo del grandaj geografiaj kartoĵoj. Ili vidis la tutan Francujon; Parizon, metitan kiel dika glueca gutto sur la 48-a paralelo, kaj fleksante ĝin sub sia pezo; ili vidis Parizon strange kroĉitan al sia rivero, haltigitan per ties buklo, kojnumitan kiel perlo sur tordita fadeno. Oni eksentis deziron maltordi la fadenon, glitigi Parizon almonte ĝis la kunfluejo del Marne, aŭ alvane kiel eble plej malproksime, al maro.

Aliloke, en hotelĉambro, en iu kerno del homamaso, en kupeo de ekspreso, estis iu, dum minuto, kiu revis pri la formo aŭ la grandeco de Parizo. Iu serĉis ciferon en sia memoro, komparis, ekmiris. Kelkaj konsultis dokumentojn, librojn, gvidfoliojn. Vojaĝantoj, kiuj estis rigardintaj Parizon de la alto de turo, konjektis, malsuprenirante la helikŝtuparon, la radion de tiu tutplene humana horizonto. Aliaj, de malproksime venintaj, sin demandis: «Ĉu estas ĉi tie pli da homoj ol en la subway? Ĉu mi estas pli puŝpelita ol sur la ŝtonplatoĵ de Cheapside?»

Preĝo sur la Eiffelturo

— J. Giraudoux —

... Jen la Eiffelturo! Dio mia, kian fidon en la universa gravitado havis ĝia inĝeniero! Sankta Virgino, se por sekundkvarono la hipotezo pri la pezoleĝo estus miselpensita, kia grandioza rubo! Jen kion oni konstruas per hipotezoj! Jen realigita el fero la ŝnuro, kiun ĵetas al ĉielo la fakiro, k per kiu li invitas siajn amikojn grimpi ... Mi konis Eiffel'on, mi grimpas ... Dio mia, kiel ĝi estas bela, vidite de la deirkaĝo, kun sia larĝa surtrikaĵo, stebita ĝis la dua etaĝo, kiel al impona ŝtrumpeto! Sed ĝi ne estas konstruaĵo, ĝi estas veturilo, navigilo. Ĝi estas maljuna k flikita kiel ŝipo, samaĝa kiel ĝi, kiel ankaŭ mi, ĉar mi naskiĝis la monaton, dum kiu ĝi eliris al tero. Ĝi havas tiun aĝon, kiam oni plezure sentas sin surgrimpa de infanoj k amerikaninoj. Ĝi havas tiun aĝon, kiam la koro ŝatas provizi sin per SFT k koncertoj je sia supro. Ĉion, kion mi amas en la transatlantikaj ŝipoj, tie mi retrovas. Nekompreneblaj parfumoĵ, demetitaj en ŝtala lozaĝo de unu pasinto, k tiel fikis en sia alto, kiel ĉerko en maro, tenata de sia kugleĝo; sed precipe nomoj de sirianoj, de kolombianoj, de aŭstralianoj, gravuritaj ne sur la pavezoj, sed sur ĉiuj vitroj, ĉar la materio plej impresbla k modlebla de tiu turo estas la vitro. Ne unu fremda vizitinto, kiu tien supreniris sen diamanto ...

Oni translokas nin ĉiuminute de lifto al lifto, por erarigi mi ne scias kian persekuton, k kelkaj vojaĝantoj, senembarasigitaj de siaj nomoj k antaŭnomoj ekde la dua etaĝo, vagas sur la tria kun malprecizaj okuloj, serĉante pseŭdonimon aŭ idealan patronon.

Oni permesas kvaronhoran halton sur tiu ĉi plataĵo. Sed por tiuj dekkvin minutoj da izoleco, Eiffel kolektis ĉion, kio sufiĉas por dekunu monatoj al la pasaĝeroj del ŝipo, kiu rondiras la teron, dek barelludojn, dek aŭtomatajn orakolojn, mekanikajn birdojn laŭ dekduoj k la friziston. Ĉiu ekspozicio lasis tie alte sian aluvion, iom da universala aluvio. Tiu de 1889, stereoskopajn aparatojn, en kiu oni vidas la negrinojn, de ĉiu tribo en Kongolando disetendi la okulojn k la mamojn antaŭ miregiga spektaklo, kiu povas esti, tiel similaj estas iliaj surprizoj, nur la aspekto del fotografisto. Tiu de 1900 rusajn vortojn. Moskvo, Kronstadt ascendis ankaŭ por gravuri siajn nomojn ... Sed kiel la muzeo Galliĉera estas bela de tie ĉi! Kaj tiuj disputoj, per kiuj malpacas sube Notre-Dame k

Ŝed la liceanoj turnis la okulojn al la eŭropa karto. Kaj tie oni vidis ankoraŭ Francujon, oni ekvidis ĝin tuj, kiel ion arkiĝintan; preskaŭ prancintan jel antaŭo del kontinento, ion tamen kelke retirigintan, grandvaloran, ŝirmitan de pli riskemaj elstarajoj. Azio k Eŭropo turnas al si la dorson; Eŭropo fluegas al uesto; Eŭropo estas marŝado al okcidento. Parizo, reduktita ĝis punkto, pikita tro alte por la oportuno de Francujo, ŝajnis okupi la lokon deziritan de Eŭropo. Malpli taŭge lokita por la provincoj ol por la nacioj, kaj por la savo de unu el ili ol por la renkonto de ĉiuj, Parizo donis sian nomon al la probabla situo de metropolo del popoloj. Eĉ ĝia malproksimo for del maro ĝojigis nun la vidon. Metropolo sur la bordo ŝajnas ĉiam tro ekstera kaj tro vundebla, tro forlasita ankaŭ al la ir- k reiroj del maro, kaj tutapertita antaŭ la trafiko. Por ŝirmi la koron del Okcidento, estis ja necesa tiu dikajo da franca tero.

El »Julieta en la virlando«: G. Waringhien

la Sankta-Koro, la Panteono k la Lyon-stacidomo, kiel oni vidas de tie ĉi, ke ili estas tromparangitaj por iom amuzi homojn, k male, ke estas inter ĉiuj tiuj konstruaĵoj nur akordo k nur konsento! Elaksigitaj hodiaŭ per magneto, kiu estas sendube la amikeco, la Aleksandra ponto k la ponto del Konkordo preskaŭ sin proksimigas k kunigas ...

Do, mi havas sub miaj okuloj la kvin mil hektarojn en la mondo, kie estis plej multe pensate, plej multe parolate, plej multe skribate. La vojkrucio en nia planedo, kiu estis plej libera, plej eleganta, malplej hipokrita. Tiu delikata aero, tiu malpleno sub mi estas la tavoloj, kiom akumulitaj! del spirito, del rezonado, del ĝusto. Do, pri ĉiuj tiuj malpliigoj k stumpigoj, kiujn suferis homoj, estas pli probable ĉi tie ol ie ajn, inkluzive de Babilono k Ateno, ke ilin kaŭzis la lukto kontraŭ la malbela, tiraneco k materio. Ĉiuj laborakcidentoj estas tie ĉi pensakcidentoj. Pli probable estas ol aliloke, ke la kurbigitaj dorsoj, la faltoj de tiuj burĝoj k metiistoj estas ricevitaj por la legado, la presado, la bindado de *Descartes* k *Pascal*; ke tiuj nazumoj iĝis necesaj pro *Commines* k *Froissard*; ke tiu malforto ĉe la palpebroj estis ricevita dum kopiado del heraldika gvidlibro, aŭ, en metiejo, pro tio ke homoj ne volis kompromisi pri ia kromflavo aŭ skarlato; ke tiu stumpulo perdis, tranĉitajn, la fingron, poste la manon, poste la alian manon retenante apud la radiumo la barkon (se vi volas k ekkomprenis la aludon al tiu Salamina batalo) de niaj doloroj. Jen la hektaro, en kiu la kontemplado al Watteau kaŭzis plej multajn tempifaltetojn. Jen la hektaro, en kiu la komisioj por enpoŝtigi Corneille, Racine k Hugo estigis plej multajn varikojn. Jen la domo, en kiu loĝas la laboristo, kiu rompis al si la kruron riparante la memorplaton de Danton. Jen, ĉe la angulo del Volterkajo, la centiaro, en kiu oni akiris plej da reŝonetoj batalante kontraŭ la despotismo. Jen la kvadratcentimetro sur kiun, en la tago de lia morto, falis la sango de Molière. Okazas, ke en tiu strika tago, kiam la metioj ŝajnas nelabori en Parizo, kiam la laboristoj, kredante kontraŭstari al sia naturo, k obeante nur al la ava kutimo, reiris al kamparo, Parizo plenumas la puran metion de Parizo; k Notre-Dame, k la Louvre, k ĉiuj ĝiaj monumentoj estas hodiaŭ tiel kompaktaĵ k senmovaj, kiel la rado del helico turniganta po mil turnoĵ ...

El »La homoj de bona intenco«: G. Waringhien

Fligelman

— H. D. Nomberg —

Daŭriĝo

Fligelman kaj la amo

Pri amo Fligelman havis altan opinion. — Amo — li kutime diras, — estas la ĉefa principo de l vivo. La vivo sen amo havas nenian sencon. Homo, kiu de-nature ne emas ami, pli malmulte valoras, ol homo, kiu scias nek legi, nek skribi. Fligelman estis tre inklinata por amo, sed se oni kondutas en la vivo honeste kaj prudente, oni devas apartiĝi de l' mondo. »Mi povas nek mensogi, nek komplimenti«, li sin konsolis, pro sia malkapablo interrilati kun virinoj.

Li esperis ĉiam trovi tian animon, kiu kunsentos la lian, li kredis, ke neniu kruda animo povas lin ami.

Iam post translokiĝo en alian loĝejon, li rimarkis en la kontraŭa fenestro palan figuron kun nigraj haroj, vestitan en hela bluzo kun neĝblanka malelasta kolumo. Okuloj grandaj, nigraj rigardis rekte al lia fenestro. Estis malfrue. Ekstere estis lume, hela lumo kuŝis sur la duona kontraŭa muro. La fenestroj estis malfermitaj, la knabino tenis la manon super la okuloj kaj rigardis, ankaŭ Fligelman rigardis. La knabino mallevis honte la okulojn, ŝia brusto ekmoviĝis, ŝajnis, kvazaŭ ŝi ekĝemetus. Fligelman daŭre rigardis al ŝi kun ravo, sed la knabino jen ree levis la okulojn jen ree mallevis ilin, honteme, denove la brusto ekmovis sin... Fligelman frapetis per du fingroj sur la fenestro kaj diris al ŝi: *sufiĉe!*

Kaj li foriris de la fenestro, kontente, ke li sin mem venkis ne rigardante plu, kvankam li tion volis.

»La plej granda venko estas, kiam oni sukcesas sin superforti« li poste pensis irante tra la strato al iu el siaj lernantoj. Sed sidante ĉe la leciono, li sentis, ke li estas iom maltrankvila, io tuŝis la koron: la nigraj haroj kaj la hela bluzo kun la blanka kolumo tremis en lia cerbo. Krome li estis iel bonhumora, vigla, kiel iam en sia hejmo, nur dum la antaŭpaska tago, antaŭ multaj jaroj:

»Hm... jes« li pensis dum la tuta tago, frotis per la manoj la lipharojn, eligante preskaŭ nenian superfluan vorton, kaŝante pri si ian sekreton. Lia vizaĝo ridetis la tutan tagon.

Nokte kuŝante en la lito, kiam nur li fermis la okulojn, la lito iom forturniĝis, kaŭzante, ke liaj okuloj estis en flanko de la fenestro. Li senĉese pensis pri la figuro, kaj en la malluma fono kuris multaj punktetoj, kaj io blanka posttreniĝis, kvazaŭ malpeza nebulo. Ŝajnis, ke la punktetoj flugante faris rektan geometrian linion de tiu fenestro al lia. Subite li rememoris, ke li kuŝas turnita kun la kapo al la fenestro kaj komencis orientiĝi. Kiam li atingpalpis la muron, malfermante la okulojn, la liteto ree forturniĝis kaj lia rigardo nun fiksiĝis sur la blanka forno.

Li eksidis, returnis la kapon. Vid-al-vide estis mallume. Li rekuŝiĝis kaj post kelkaj minutoj la liteto denove situis alimaniere.

— Hm... li ridetis por si kaj ree ekdormis songante.

Morgaŭ matene la knabino denove sidis ĉe la fenestro. Ŝi legis libron kaj Fligelman povis rigardi kiom longe li nur vidis, la knabino subite levis la okulojn kaj rigardis rekte al li, en la rigardo sin kaŝis io. »La animo de la homo respuguliĝas en la rigardo kaj rido.« li ripetis por si ian frazon, kiun li de longe jam estis leginta. »Rimarkinde bona sentenco.«

Li paŝis al sia malgranda speguleto, rigardis en ĝin, konstatante, ke lia rigardo estas tute simila al tiu de ŝi, sendube tial ŝi plaĉas: »animon animon sentas.«

Tio ripetigis dum du semajnoj. La knabino sidis ĉe la fenestro kaj Fligelman rigardis. Unufoje, dum li rigardis ŝin, ŝi subite levis la okulojn, kiel kutime, kaj ŝi ne mallevis ilin kiel kutime, sed ŝi konstante rigardis fiere en la liajn, tiel obstine, ke fine Fligelman ne plu ĝin eltenante, honteme mallevis la okulojn. Poste, kiam li kaŝe ĵetis al ŝi rigardon, sur ŝia vizaĝo kuŝis rideto kaj ŝia brusto libere sin movis... Fligelman sin sentis venkita de fraŭlino.

— Forta popolo estas la virinoj — li diris la saman tagon sidante kun Levantkovski.

— Oho — Levantkovski respondis kaj komencis ion rakonti pri sia edzino.

— Atendu, Levantkovski. Vi min malĝuste komprenas. Mi ne eliras de tiu ĉi vidpunkto. Mi parolas pri tio, ke batalante ili havas pli da takto kaj certeco ol viroj, ĉar ili estas certaj pri siaj fortoj kaj beleco; verdire beleco entenas ja ĉion, la estetiko ja estas la plej alta mondkoncepto.

Levantkovski — kiel kutime, kiam lia amiko parolis pri gravaj aferoj — silentis, trinkante nun teon, pozante seriozan mienon simile al infano, kiam la avo ĝin benas. Foje li rigardis al Fligelman, ekĝemis kaj reprenis la antaŭan pozon. Fligelman parolis plue:

— Por diri la veron, mi jam nenion scias. La psikologiaj elementoj estas tiel komplikaj, ke estas tre facile fariĝi mistikulo. Ekzemple: vi renkontas iun surstrate, mi diru, ekz. fraŭlinon, vi ŝin rigardas, ŝi vin rigardas kaj la rigardoj kvazaŭ disputis, interhaltis. Unu venkis... Kiel tio okazis?... Jen komenciĝas spiritualismo. Sed komprenu: la pura logiko ordonas serĉi por ĉio klarig-respondo, ligi ĉion laŭ la leĝo de objektiveco kaj kion mi ne scias, pri tio starigi demandsignon, ne fidante al okultaĵoj. Mi scias certe de propra praktiko, ke se ne mia saĝo, mi delonge jam fariĝus mistikulo. Jes!

— Vi multe legis... — Levantkovski ekĝemis.

— La ĉefa afero ne estas legi — diris Fligelman fariĝinte tre serioza — komprenu; la filozofio volas krei el teorio la vivon, sed la vivo estas multe pli larĝa, multe... oni devas pri la vivo, pri la praktiko, serĉi la veron... komprenu kaj pripensu tion...

Nokte lumis ronda kaj pura luno. Ĝi eliris el sub la kameno de la kontraŭa tegmento. Sur la ĉielo portiĝis etaj nuboj kaj la luno inter ili kuris, kuris kaj staris tamen en la sama loko, en la korto ĉion surverŝis lazura aero, en la kontraŭa fenestro estis ankoraŭ lume, nur la rulkurteno estis malsuprentirita. Fligelman sidis ĉe la fenestro kaj lia rigardo fiksiĝis jen sur la ĉielo, jen sur la fenestro.

La rulkurteno leviĝis kaj montriĝis la konata kapo. Montriĝis du nudaj brakoj de juna fraŭlino kun distaŭzitaj haroj... la okuloj de Fligelman rapide leviĝis al la luno.

»Ruza popolo« li ekpensis kaj nerveze endormis.

Foje ĉirkaŭ vespero Fligelman sidis kaj legis libron. Ekstere estis pluvego, fulmis kaj la tondroj estis tiel fortaj, ke post ĉiu tia bruego Fligelman alkuris la fenestron por konvinkiĝi, ĉu ĉio estas en ordo.

Kaj jen li rimarkis, ke vidalvide ŝi elrigardas,

Ŝajnis, ke ŝi lin ne rimarkas, sidas apogante per

Galopé tra kelkaj francaj pensuloj

— L. Bastien, Paris —

En kelkaj linioj, kompreneble oni ne povas resumi la gravegan verkon de la francaj klasikaj pensuloj, kaj apenaŭ citi kelkajn karakterizajn vortojn el la plej famaj.

DESCARTES (1596—1650) estis matematika kisto, sed precipe filozofa. En la *Parolado pri la Metodo* li provis atingi sciencon certecon per severa metodo, forlasante la argumenton »Magister dixit« (La Majstro diris). Tiel li elservutigis la modernan penson.

(La kvar principoj de la metodo)

La unua estis akcepti vera nur tion, kion mi konas evidente vera.

La dua, dispecigi ĉiun ekzaminotan malfacilaĵon en tiom da partetoj, kiom mi povas, kaj kiom postulas ĝia plej facila solvo.

La tria, vicigi miajn pensojn en ĝusta ordo, komencante per la objektoj plej simplaj kaj plej facile koneblaj.

La lasta, ĉie plenumi nombradojn tiel senforĝesajn kaj kontrolojn tiel kompletajn, ke mi estu certa, ke nenion mi pretirigardis.

El tio mi eksciis, ke mi estas substanco, kies tuta esenco aŭ naturo konsistas nur en penso... ; sekve mi, tio estas la animo, dank' al kiu mi estas tio, kio mi estas, estas tute aparta de la korpo kaj eĉ pli facile ekonebla ol ĝi.

LA ROCHEFOUCAULD (1613—1630) estas fama pro siaj Maksimoj, amara kritiko de la homaj inklinoj, ofte troa, sed ĉiam energia.

Memestimo estas la plej granda flatulo.

Profitemo parolas ĉiuspecajn lingvojn kaj ĉiuspecajn rolojn, eĉ tiun de neprofitemulo.

Tio, kion ni opinias virtoj, estas ofte nur miksaĵo el diversaj agoj kaj el diversaj interesoj, kiujn favora sorto aŭ nia lerteco scias kunarangi.

Virtoj dronas en profitemo, kiel riveroj en maro.

Sincereco. — Ĝi estas malfermo de koro. Oni trovas ĝin ĉe tre malmultaj homoj, kaj tio, kion plej ofte ni vidas, estas nur subtila kaŝemo por allogi la konfidon de la aliaj.

Modesteco. — Kiu rifuzas laŭdon, deziras duoblan laŭdon.

la manoj la kapon, la okuloj estis teruritaĵ: ili rigardis al la nigra nuboj kaj en ili kuŝis funebro multe pli peza, ol la nuboj supre... Fligelman senpacience iradis en sia ĉambro.

La fulmotondro finiĝis, la ĉielo serenigis, montriĝis jam sunlumo, ĉio estis nun lavita kaj freŝa. Fligelman staris ĉe la fenestro kaj daŭrigis la rigardadon. Kelkfoje ankaŭ la knabino levis la okulojn kaj ŝia rigardo estis kuraĝa. Fligelman komence iom honteme, sed poste jam pli kaj pli kuraĝe rigardis al ŝi senĉese, lia vizaĝo alprenis mienon ridetan. La knabino ree levis la okulojn kaj subite foriris kelkfoje revenante kaj havis aspekton maltrankvilan.

»La ĝusta tempo« Fligelman ekpensis, penante kuraĝigi... ekbalancis la kapon kaj dolĉa rideto superverŝis lian vizaĝon...

La knabino rapide sin levis, montriĝis granda ruĝa lango kaj la rulkurteno rapide malsuprenfalas...

Kelkaj sekundoj pasis, ĝis kiam Fligelman rekonsciigis, kaj kiam li fine ĉirkaŭrigardis, li rimarkis, ke la rulkurteno estas malsuprentirita. De unu flanko vidiĝis la ĉielarko.

Kuŝante nokte en la lito li mordpremis la lipojn, ne povante trovi la ĝustan esprimon por la sento, kiun li nun portis en la koro por la knabino. Malŝato

Kuraĝo. — Amo de gloro, timo de honto, aspiro al riĉeco, emo al vivo oportuna kaj agrabla, kaj deziro malaltiĝi la aliajn, jen ofte la kaŭzoj de tiu braveco tiel fama ĉe la homoj.

Donacemo. — Tio, kion oni nomas malavareco, estas plej ofte nur donvanteo, kiun ni ŝatas pli ol kion ni donas.

PASCAL (1623—1662), genia matematikisto kaj pensulo, kunigis sentemon kaj sciencon ekzakte. Unu el liaj plej famaj verkoj estas la »Pensoj«.

La homo estas nur kano, la plej malforta en la naturo, sed li estas kano pensanta. Ne necesas, ke la tuta universo sin armu por lin frakasi. Haladzo, guto de akvo sufiĉas por lin mortigi. Sed, eĉ se la universo frakasu lin, la homo tamen estus pli nobla ol lia mortiganto, ĉar li scias, ke li mortas, kaj la universo ne scias pri sia supereco super la homo.

LA BRUYERE (1645—1696) pentras la homaron en siaj famaj »Karakteroj«, pli melankolie ol pesimisme.

Granda animo staras pli alte ol ofendo, maljusto, doloro, moko, kaj ĝi estus nevudebla, se ĝi ne suferus pro kompto.

Ni ne koleru kontraŭ la homoj, vidante ilian malmildecon, sendankemon, maljustecon, fierecon, la memamon kaj la forgeson pri la aliaj — tiel ili estas faritaj, tia estas ilia naturo; kvazaŭ ni ne tolerus, ke ŝtono falas aŭ fajro levigas.

Ni devas ridi antaŭ ol esti feliĉaj, por ke ni ne mortu ne ridinte.

Iuj noblaj sentoj, iuj noblaj kaj altaj agoj devenas malpli de la forto de nia spirito ol de la boneco de nia naturinklino.

MONTESQUIEU (1689—1755) skribis, krom diversaj pensoj, famajn verkojn, inter ili »l'Esprit des Lois«, en kiu li montras la kialon de la leĝaroj.

Se mi konus ion, utilan por mi kaj malprofitan por mia familio, mi forpelus ĝin el mia spirito. Se mi konus ion, utilan por mia familio kaj ne por mia patrujo, mi provus ĝin forgesi. Se mi konus ion, utilan por mia patrujo kaj malprofitan por Eŭropo kaj la homaro, mi opinius ĝin krimo.

aŭ kolerio? Denove fajreroj ŝvebis kiel en tiu punkto, sed nun ili kuris senorde, disportigis ĉiufanke, antaŭ la okuloj restis nigro, la liteto antaŭ la endormiĝo turniĝis kaj ruliĝis en libera kaj malplena spaco.

Li vekigis kun la penso, ke li devas streĉi la penson, por batali kontraŭ la malfeliĉo, ke saĝa kaj prudenta homo ne devas malkuraĝigi — parolante poste kun Levantkovski li diris:

— Homo devas esti singardema. Oni ĉiam devas rezervi al si fortojn por povi kontraŭstari ĉian neatenditan malfeliĉon, kiu nin atendas ĉie. Mi povas kuraĝe diri, ke sen mia konstanta sinpreparo kontraŭ ĉiu eventuala akcidento — komprenu Levantkovski — nun estus tre malbone, jes, tre malbone.

Pri lia intenco edziĝi kaj kiel li frenezigis

Pasis du jaroj, sed la vivo de Fligelman apenaŭ ŝanĝigis. Kreskis en lia koro sopiro je edzino, la sopiro lin ofte igis distrita, kaj poste eĉ ekscitis liajn nervojn, malhelpante lin en la legado. Okazis, ke li subite forgesis bone konatan vorton. Ofte svensignoj montriĝis antaŭ liaj okuloj, en la kapo ĉio kvazaŭ maldensigis kaj renversigis.

Tre ofte li rememoris pri sia infanaĝo. Li bone memoris la patron, etan kaj malgrasan homon, kiu

senĉese tuis. Li memoris pri malvarma nokto: la patro eliris el la lito tusante, kaj li, Fligelman, sentis tiam malvarmon, restante sola en la lito. Li bone memoris la morton de la patro: kuŝante sur la planko li aspektis tiel malgranda, kvazaŭ la kadavro estus kuntiriginta por dormi.

La sola, pli aĝa, fratino de Fligelman ploregis, viŝante per sia antaŭtuko la nazon. Reveninte el la tombejo, ili malpacis pro duono de orango, restinta sur la tablo... poste li *manĝis tagojn*.*

La fratino nun, plej verŝajne, instruas abocon al infanoj, malamante la edzon pro lia malpieco.

Verŝajne ŝi jam havas multajn infanojn proprajn, kiuj, simile al tiuj de Levatkovski, ne havas konvenan vestaĵon kaj sin kovras per ĉifonoj kaj malsatas. Kaj li, Fligelman, estas ilia onklo. Kiel stranga estas ĉio ĉi.

En la nova pasporto, ĵus ricevita el lia naskurbeto, estas notita, ke li aĝas 36 jarojn. Turnante la pasporton tien kaj reen, li iom enpensiĝis. Lin maltrankvigilis la penso, ke li eble malfruos edziĝi.

Li komencis serĉi gekonantojn diversajn, li faris tion kun granda peno.

Laste li konatiĝis kun fraŭlino, dentistino. Ŝi ne estis tre bela; diketa ŝi estis, havis plenan vizaĝon, laŭte ridegis, tiel, ke estis malfacile aŭdi siajn dirojn, kutimis ofte kunplekti kaj malplekti siajn harojn. Fligelman komencis ofte venadi al ŝi kaj en lia koro kreskis ia espero.

Li parolis kun ŝi ĉiam nur pri libroj, verkistoj kaj filozofoj. Ŝi sidis ĉiam silente, ĉion aŭskultante, sed tamen ofte interrompis: Ĉu vi volas teon?

Pasis monato. Foje ŝi estis enirinta en la apudan ĉambron por alporti teon, Fligelman restis sola dum momento, li ĉirkaŭrigardis ĉion, li ne konsciiĝis momente, kion li faras tie ĉi. Li prenis speguleton de la tablo kaj turnis ĝin kontraŭ sian vizaĝon. En la sama minuto ŝi revenis kun la teo.

— Vi ankaŭ spegulumas? Jen, vi, viroj, riproĉas nin, ke ni estas koketaĵ! Je mia honoro, estas ridinde!

— Jes! — Fligelman tiris la vortojn — ankaŭ mi volas plaĉi — precipe al vi!

La lastajn vortojn li eldiris mallaŭte, kun malcerteco en la voĉo, la knabino demandis ion, kvazaŭ mirante? ĉu? — kaj poste eksilentis. Ankaŭ Fligelman ne parolis plu, en la ĉambro estiĝis peza situacio. La knabino malfermis libron kaj li longe rigardis la fornon.

— Kiom, ekzemple, povas kosti tiu ĉi forno? Bela forno... — li diris mallaŭte kaj sentis, ke li diras ion ege stultan; li ekiris la ŝultrojn.

Ŝi sidis longtempe, nenion dirante, la libro kuŝis malfermite antaŭ ŝi, subite ŝi ekridegis:

— Ridinde, ridinde! — ŝi eldiris pene, montrante al la libro, kiun ŝi nun fermis. Fligelman ne sciis, ĉu ŝi ridis pri li, aŭ pri rimarkinda legaĵo en la libro. En la ĉambro daŭre estis peze kaj maloportune. Envenis konato, ŝi vigliĝis, sed Fligelman tuj eliris por ĉiam kaj ne plu revenis al ŝi.

La tempo rapide pasis, tago post tago forkuris kaj Fligelman sensaĝe vivis en soleco.

Liaj nervoj dum tiu tempo plimalkvietiĝis, lia pasporto jam montris la aĝon de 38 jaroj...

Ekstis malseka aŭtuno, sur la strato estis ĉiam

* Al malriĉaj junuloj fremdloke studentaj en religia lernejo, aŭ al malriĉaj orfoj, oni kutimas donaci tut-tagan manĝon, en ĉiu semajntago ĉe alia difinita familio. Tion oni nomas: *manĝi tagojn*.

Anton Wildgans

Profunda rigardo

Soleca povas esti vi sen fin',
Eĉ inter homoj ekkaptadas vin
Subita hontosento kaj teruro.
Kelkiam vi peĉate de sopir'
Je iu, kiu konus vin, — kun mir'
Nur propran bildon vidas en spegulo.

Amikojn, familion havas vi,
Sed via koro plenas je glaci',
Similas arbon, ĝi en frosta vento —
La ĝoja amikar' ĉirkaŭas vin,
Dumnokte dormas vi kun la edzin',
Al la infano ligas vin amsento.

Kaj tamen estas ĉiu via vort'
Por ili sen enhavo kaj sen fort',
Ĝin ja anim' ilia ne bezonas —
Por via ĝojo mankas la kompren',
Kunsenton vane serĉas la ĉagren',
Nur scivolemon ili al vi donas.

Kaj fremda iĝas vi eĉ al vi mem,
Ekludas komedion vi sen ĝen',
vizaĝon kovras vi per masko deca —
Kaj nur kelkfoje, timigite vi
Demandas vin: »Ĉu tio, estas mi?« —
Jen kiel povas esti hom' soleca.

El la germana: *Hilda Dresden*

kote pro konstanta pluvado, tio ĉi tre mise influis al Fligelman. Aĉetante galoŝojn, li aĉetis, forgesinte la ĝustan numeron, galoŝojn pli grandajn je unu numero, kaj irante poste en la strato, li eĉ dum minuto ne povis elpeli la misaĉeton el sia kapo. La galoŝoj ĉiam formoviĝis de la piedoj, kio lin ege suferigis.

Lastatempe li ofte vagis en la stratoj, sencele, kaj preskaŭ nenion li legis.

Sur la stratoj daŭre estis malseke kote, la fiakroj, veturante tien kaj reen, ŝprucigis kotajojn ĉiufanken; enterigprocesioj sin tiris ĉiaspacaj. Knabinoj, kun libroj subbrake, trapasadis rapidante, en la manoj ili tenis la jakojn kaj la blankaj jupoj estis plensprucigitaj de koto. Vespere iu strata portisto, zonita per ŝnurego, ĵuradis, ke eĉ unu groŝon li ne perlaboris dum la tuta tago.

Fligelman sentis sin tre laca, en la cerbo ĉio maldensiĝis, antaŭ la okuloj montriĝis svensignoĵ, la dorso kvazaŭ rompiĝis...

Li iris al kuracisto, la kuracisto, esplorante lin, demandis, ĉu li jam estas edziĝinta. Fligelman mensogis, respondante »jes«. Poste li ĉagreniĝis pro la mensogo.

— Mi sentas — li diris poste al Levatkovski — ke mi fariĝas pesimisto. Gustadire ja la pesimismo estas la lasta vorto de la filozofio.

Li menciis ion pri Šopenhauer, sed ĵetis rigardon al Levatkovski, kiu sidis trankvile kaj preparis al si cigaredojn, penante enpuŝi kiel eble plej multe da tabako.

Tion Fligelman ne povis toleri: kolere li pensis

pri la indiferenteco de Levantkovski, ke lin ŝajnis tute ne koncerni tio, ke Fligelman haltis en la parolo ne finante.

— Vi scias, Levantkovski, — vi estas stultulo. — Levantkovsky tion kvazaŭ ne rimarkis, trankvile tiris la fumon de la cigaredo, plenigante la ĉambro per fumo. Fligelman longe lin rigardis kaj fine eldiris: — Efektive, kial vi devas havi tiel multajn infanojn, Levantkovski? Vi estas facilanima.

Levantkovski diris ridetante:

— Mi havas ses, vi — neniom, imagu ke ĉiu havas tri, ĉu do ne estas bone? diru mem.

Levantkovsky estis kontenta pro la deca respondo, laŭte ekridis, sed tio eĉ pli denervis Fligelman'on.

— Aŭdu, Levantkovsky, vi estas stultulo, stultulo, mi diras al vi, stultulo, aŭdu bone, kion mi diras al vi, stultulo...

Fligelman sentis, ke li denerviĝas kaj ĉesis.

Levantkovski faris malkontentan mienon, ĉio ĉi lin strange mirigis, li adiaŭis malkontente kaj foriris.

Fligelman restis sola en la ĉambro, li komencis pensi pri pesimismo, sed la pensoj perdis la firmecon, li forgesis frazon sciitan parkere.

Li iradis en la ĉambro ripetante por si: »li estas stultulo, pura stultulo, stultulo... stultulo... stultulo« io igis lin multfoje ripeti ĉi tiun vorton.

Kelkajn tagojn li sentis sin tute distrita, nokte li faladis kun la liteto en abismojn, forte ĝemante dum la dormo.

La sekva tago estis malsarena, nuba. Fligelman decidis resti hejme. En la domo, kie li loĝis, iu mortis, tra la korto aŭdiĝis ploroj kaj lamentoj, ĝis venis la nigra veturilo, kiu forportis la mortinton. Poste silentiĝis la korto.

Li komencis legi, sed traleginte ion, li haltis, oscedis, antaŭ liaj okuloj ree montriĝis vertigiĝsignoj, li kuŝiĝis, apenaŭ ekdorminte li komencis sonĝi:

Li portis longan rigidan kadavron envolvitan en nigra littuko. La tukon li tenis ambaŭmane kaj iris kliniĝinte. Li venis el malantaŭ la urbo portante la kadavron por enterigo. Estis mallume. Kun li iris du ŝamesoj interparolantaj. El la interparolo li sciigis, ke li portas sian fratinton mortan. Li igis tre laca, ĉe butiksojlo li glitfalas, la kadavro eliĝis el liaj manoj kaj falis sur la sojlon. El la tuko aŭdiĝis ploro simila al pepo de infano. Unu ŝameso diris: »Portu, Fligelman, portu, ŝi estas malviva, tio ĉi estas nur reflekso.«

Li portis plu. La voĉo igis pri tremplora, li pli laca, eĉ lacega, la ŝamesoj lin puŝis, frapis, je la ŝultroj instigante, ke li iru pli rapide. Fligelman volis plori, sed timis, ke tio estos reflekso, ke li estas morta.

Li fartis tre malbone kaj vekigis kun ĝemego.

La kapo doloris, en la ĉambro estis mallume, nokte, ekstere nuboplena ĉielo. Surkorte kato miaŭis terurege, jen ĉesante, jen rekomencante. Tio ŝajnis tre kortuŝa, kaj ne estis eble kompreni, kian mankon ĝi sentas, pri kio ĝi plendas tiel malfrue en la malluma nokto. Fligelman sin envolvis per la kovrotuko, la kato plu lamentadis. Li ne dormis plu, pasigis sendorme preskaŭ la tutan nokton.

Je l' sekva tago, sidante ĉe leciono, iu lernanto forte lin ekscitis per malĝusta traduko: anstataŭ »la verdaj lampoj de viaj najbaroj« li tradukis »la lampoj de viaj verdaj najbaroj«. Fligelman korektis lin, sed la lernanto nun tradukis »la lampoj de niaj verdaj najbaroj«. Fligelman ekkoleris, kaptis la knabon ĉe la ŝultroj, skuis lin, kriante ne kun sia voĉo: »Verdaj najbaroj! Kiamaniere povas esti verdaj najbaroj! Kiel povas esti!«

Subite li ŝanĝis la voĉon, kaj komencis paroli pli delikate: »Nu, diru mem! Ĉu estas eble? kiamaniere?« Sed tamen lia voĉo kaŝe tremis, la koro batis kaj li spiris tre pene. La knabo ploris.

— Komprenu!...komprenu, tio ja ne estas ebla...



Karl Krahl

Kartono por la karteno de la Viena Operdomo

RIMITAJ ENIGMOJ

— ALESSANDRO MAZZOLINI —

Al la plenkreskaj infanoj de Andreo Csef

1. OSCEDO.

Jen, vokalo
en vokalo
naskas tedon
kaj oscedon.

2. NENIIGO.

Forprenu linion
el kapo de besto,
la resto
prezentas nenion.

3. EFIKO DE ABOMENO.

Se el la literaro
vi iun abomenas,
devenas
loĝanto de la maro.

4. UTILA ALIIGO.

Mi: nomo
de homo,
ofte nur tedbabila
kaj senutila.
Sed se vi el mi ŝiros
la koron, vi akiros
tuj utilon:
kuirilon.

5. BARBARA BARBIRO.

Kun barbo tufa,
duhufa
sinjor' razejon iris,
deziris
iĝi senbarba viro.
Sed la barbiro
anstataŭ garbo
de barbo,
ampute
fortranĉis lian kapon tute, tute,
do, li tre funde razis,
sed kio nun okazis?

La eksbarbulo ŝanĝis sian veston,
kaj en sovaĝan beston
transformis sin subite.
Kaj la barbir' kaptite
de la teruro,
sin savis per forkuro.

6. MISTERA SAVO.

En la kaptit' sekreta
baraktis besto eta,
korŝire ĝi lamentis,
neniu ĝin atentis,
sed fine, jen, alvenas

sorĉisto, kaj li tenas
super la beston krian
signon magian.
Miraklo kaj enigmo!
Per tiu eta signo
ŝanĝiĝis la aspekto,
estiĝis fluginsekto,
per zumaj flugilbatoj
rifuĝis inter dratoj.

7. ENSORCITA REGO.

En kapornamo festa
de reĝ' majesta
litteroj du elŝanĝas
la lokojn, kaj aranĝas
hazardo blinda,
ke l' reĝo kompatinda
pro ŝanĝo de litero,
ve, ŝajnas rinocero.

8. MULTKOLORA AJO.

Jen ajo, laŭ koloroj tre multflanka.
Ĝi en Eŭropo norde estas blanka,
sed se kondukas vin la vojo migra
al Oriento, vi ĝin trovos nigra.
Ĝi en la granda kontinent' praava
maldekstre estas ruĝa, dekstre flava.

solos. i. en-u-u-u. 2. mu-u-u-u. 3. fi-ŝo: 4. poeto-poto; 5. kapro-apro; 6. muŝo-muŝo; 7. krono-krono; 8. maro.

La knabo levigis, eniris al la patrino kun plorego.
La patrino venis. Fligelman sentis, ke li nun devas
al ŝi komprenigi, ke la »verdaĵ najbaroj« estas ne-
eblaĵo, sed li ne sciis kiamaniere tion fari. Ŝi demandis:
kio okazis inter ili. Fligelman silentis dum momento,
la patrino staris kaj atendis. Fligelman ekbalbutis:

— Nenio. Mi hodiaŭ estas iom distrita, mia fra-
tino mortis.

La patrino interesiĝis pri la fratino. Fligelman
multe mensogis, diris, kio nur venis al li en la kapon,
mem ne sciante de kie. Elirante li multfoje ripetis al
ŝi: »Mi estas malsana, mi estas malsana...« —
pro la ripeto estiĝis al li pli facile. Al la ceteraj lecio-
noj li jam ne iris. Antaŭ vespero li venis hejmen, lin
timigis la ĉambro, li kuŝiĝis sur la lito kaj endormiĝis.

Li vekigis ĝemante, ŝvite, en la ĉambro estis
mallume, la blanka viŝtuko ektimigis lin, li rapide ek-
kaptis la palton, eniris al Levantkovski. En la ĉambro
de Levantkovski oni vidis ĉirkaŭe nur litaĵojn, infan-
ajn vizaĝetojn.

En unu lito ĝemis lia edzino. Fligelman sidigis
sur seĝon kaj dormetis. Subite, dum la duondormo, li
eksentis sur si ies manon, ĝi estis la mano de Levant-
kovski. Li malfermis la okulojn kaj vidis, ke Levant-
kovski, duone malvestiĝinta, ridetas al li; li diris, ke
li estas ebria... Fligelman estis denervita de tiu ri-
deto, li volis diri ion akran, por ke Levantkovski ĉesu
ridi.

— Mi iras al la Vistulo... — li diris pene.

— Iru dormi, estas malvarme.

Fligelman efektive eksentis, ke al li estas mal-
varme, en la ĉambro estis vaporo, Levantkovski ridetis
kaj Fligelman foriris.

Li trairis multajn stratojn kaj rimarkis nur, ke
li preterpasis jam multajn stratlanternojn, ke lia ombro

jen plimallongiĝas, jen elkreskas... En iu strato por
momento haltigis lin fraŭlino, ŝi ridetis, turniĝis, ba-
lancis gaje la kapon; kiam ŝi foriris, aŭdigis putraĵ
tusego, kiu longtempe tremigis la aeron... kaj ĉion
ĉi ne estis eble kompreni.

Li haltis sur la ponto de la Vistulo kaj ĉirkaŭ-
rigardis. Policano lin sekvis per rigardoj. — Mi havas
ja pasporton — pensis Fligelman, tenante la manon en
la ĉebrusto.

Sur la ponto li longe staris. De malproksime vid-
iĝis du vicoj de lanternoj brulaj, iliaj radioj balanciĝis
en la akvo, sur la ĉielo moviĝis diversspecaj nuboj
kelkloke intermiksate kun la akvo; sur la ponto oni
veturis kaj ĉio ĉirkaŭe tremis.

La mallumo en malproksimo alproksimiĝis, la
nuboj malleviĝis kaj antaŭ liaj okuloj moviĝis kaj mo-
vigiĝis senĉese...

Fligelman eksentis, ke lia tuta korpo balanciĝas;
aŭdigis radbruo de veturiloj sur la malmola ponto.
Iu parolis al li ruse, sed li ne komprenis.

Li tradormis en la policojo la tutan nokton, sentis,
kvazaŭ li kuŝus en akvo, tra la okuloj tiriĝis blua fluo,
fariĝis al li pli facile, sed sub la kapo doloris kaj al
li ŝajnis, ke li falis sur ŝtonon.

La sekvan tagon matene, kiam la policano per-
forte volis lin starigi sur la piedojn, li neniel povis
rememori, kion li faras ĉi tie, li rigardis ĉirkaŭen per
rigidaj okuloj. Nur kiam li vidis antaŭ si paron da
epoletoj kun glavo kaj aŭdis severan voĉon, tiam ia
penso venis en lian kapon. Li metis la manon en la
ĉebruston kaj eligante ion el tie, li diris:

— Mi havas la honoron subiĝe kaj humile peti...
enterigu min, mi havas pasporton, jen!

El la juda: S. Guterman.

La diablo-bonfaranto

— S. G. Frug —

I.

La reganton de la infero atingis teruraj famoj: diablo perfidis.

Io neaŭdita, senekzempla en la kronikoj de la subtera regno.

Perfidadis kaj faladis anĝeloj. Tio estis antaŭ la diluvo. Faladis dioj antikvaj. Faladis kaj faladas idoloj, tiuj malfeliĉaj idoloj, kiuj estas kreataj de homoj de multaj miljaroj — kaj ĝis nun tre malbone. Sed, ke perfidu diablo — tio ĉi estas tute nebla.

Sed tio ĉi estas fakto: li perfidis — perfidis sian reganton, perfidis la inferon, perfidis tiun grandan elementon, de kiu li estis naskita por servi al ĝi senripoze kaj eterne.

— Terure! — ekkriis Belzebubo.

— Terure! — ripetis la sennombraj aroj de la subtera militistaro.

— Terure! Terure! — ehe ondis sub la arkajoj de la senlima abismo.

Kaj demonoj, diabloj, satanoj are kuris al la trono de sia reganto por ĝui la vidaĵon de severa juĝo kaj prava puno pri ilia kunfrato malhonoriginta ilin por jarcentoj.

II.

Severe kaj majeste sidis Belzebubo sur sia alta trono, kunmetita el la kranioj de plej grandaj pekuloj de la mondo kaj ornamita per surskriboj el la traktatoj de plej antikvaj herezuloj kaj apostatoj.

Kaj antaŭ la trono staris la diablo-perfidinto.

Milionoj da flamantaj rigardoj falis sur lin kun indigno kaj teruro kaj li, fieraj kaj belega, kiel li estas fandita kaj hardita en lermontova jambo, staris antaŭ la timiga potenculo kaj unutone kaj sonore aŭdiĝis lia voĉo sub la arkajoj de la regno de ombroj.

— Jes, — li diris — mi perfidis. Mi logis la homojn ne nur al peko kaj malbono, sed direktis kaj entuziasmigis ilin ankaŭ por heroagoj de bono kaj favorkoreco... Ho, mia timigesevera potenculo, kaj vi, fratoj, kolegoj miaj! Aŭdu kaj indignu!

III.

Estis vintra nokto.

Nek stelo sur la ĉielo, nek vojeto sur la neĝaj ebenoj. Kaj la glacio krakis kaj rompiĝis sur la rigidigitaj lagoj, kaj la neĝa turnovento ĝemis kaj blekis kiel la animoj de jurrompuloj en la nigra turnoblovo de la subtera elemento. Bona estis tiu nokto, bona pro tiu sovaĝa, pereiga beleco, kiu teruras la anĝelojn, mortigas la homojn, kaj ĝojigas vian animon, gloriplena potenculo mia.

En tiu nokto mi traflugis la ĉirkaŭaĵojn de granda urbo.

En unu el la plej senhomaj stratetoj mi ekvidis nigran figuron, malrapide moviĝantan laŭlonge de ligna barilo. Mi vidis, ke ĝi estas maljunulo-almozulo, apenaŭ kovrita per ĉifonaĵoj. La maljunulo pene movis siajn malsanajn piedojn kaj ĉiuminute pli kaj pli forte raŭkis en lia brusto la astmo, pli kaj pli minace bruis la enradikiĝinta tuso kaj pli malrapidaj fariĝis liaj movoj. Nun per la ŝultro li apogis sin al la glaciigitaj lignoj, eksanceliĝis kaj falis sur ĵusfariĝintan neĝamason. Lia kapo nudigis kaj la maldensaj haroj kunigis kun la blanko de l' neĝo. La maljunulo ko-

mencis morti de frostoj. Malproksime lumetis la fajroj de la riĉa urbo, kien li iris almozpeti. Nun estis lia lasta nokto. Rigidiginta korpo, iam juna kaj forta, videbliĝis tra la truoj de la forputrinta vestaĵo... La spirado fariĝis pli kaj pli intermita kaj obtuza...

— Kaj vi?

— Kaj mi savis lin.

— Malbenon! ...

— Jes, potenculo, mi savis tiun ĉi malriĉan kadukulon: mi alvokis molkorajn homojn helpi lin, — oni lin transportis en komfortan ĉambron, oni varmigis lin, nutris... Vi indignas, potenculo mia! Sed aŭdu plej:

IV.

Estis varmega, somera tago. En granda mal-luma salono sidis juĝistoj sur oportunaj molaj brakseĝoj, kaj sur la malhonora benko sidis akuzato. Li estis ankoraŭ junulo, preskaŭ infano, kun korpo malforta, velka kiel ĉe maljunulo, kaj kun senkoloraj okuloj, en kiuj esprimiĝis stulta, apatia laciĝo.

Antaŭe sidis la defendanto. Lia frako estis tro malkomforta en la varmega somera tago, kaj la blanka brusttalo, kiu kurbiĝis laŭlonge de la brusto, maltrankviligis lin, devigante lin ĉiuminute ŝanĝi la situacion de la manoj kaj de la kapo. Krom tio, li troviĝis ĉitie laŭ la destino de la juĝantaro kaj, ĝuste tiutempe sin preparante por brila defendo en fama proceso, li ne sukcesis eĉ iel orientiĝi pri la nuna procesafero, tiel enuiga kaj seninteresa... Laŭmemore — ion diris la akuzato, ke vagante de infaneco sen parencoj, sen hejmo kaj prizorgo, li trovadis azilon en malpuregaj nestoj, en la societo de homoj kripligitaj de malvirtoj kaj malriĉeco... Ie, de tempo al tempo, li laboradis... malsatadis, frostadis... Kelkfoje li ŝtelis, — malgrandajojn nur, kiujn li vendis por kelkaj kop-ekoj... Iuuprintempe, pasigante la nokton en arbaro, li malvarmumis, tri tagojn kuŝis, plejparte senkonscie... komencis resaniĝi kaj — ŝtelis... feltŭuojn, ŝajne en la kortistejo... Ne, tio estis antaŭe, pri la feltŭuoj, kaj nun — ĉapelon sentaŭgan, disŝiritan veturigistan ĉapelon... Kun la ŝtelaĵo oni lin kaptis...

V.

Sufoke, varmege kaj enue estas en la salono. En la oreloj de la defendanto sonas la voĉo de la kulpiganto, jam delonge konata — unutona kaj tre enuiga voĉo.

Enuas la juĝistoj, enuas la defendanto, enuas eĉ la akuzato... Bone estas nun en la arbaro, sed en la malliberejo, kien oni lin certe venigos de ĉi tie... estas nudaj fumnigrigitaj muroj, ŝtona planko polvo plena kaj kraĉita, odoro de ŝvito kaj putraĵo, korpo kaj ĉifonaĵoj...

Mi aliris al la defendanto, kliniĝis kaj komencis flustri al li en la oreloj...

Vi scias, Belzebubo, kian perfektecon de elokvento kaj forton de konvinkigo ni atingas, kiam estas necese.

Kaj inspiriĝis la pastro de Themis. Torento ekfluis, ekversigis lia parolo. La vangoj ekflamiĝis, ekardis la okuloj... Li parolis — kaj larmoj fluis sur lia vizaĝo, kaj larmoj videbliĝis sur la okuloj de gravaj, majeste trankvilaj juĝistoj. Sur la fatala, malhonora benko antaŭ ili estis ne mizera ŝtelisto-vagulo, sed malfeliĉa, malriĉa infano sen pano, sen rifuĝejo, sen

Karl
Krahl



La akcepto
de Manfredo.

defendo kaj konsolo... Kaj li estus punota? Ja, tio estus terura moko pri vero kaj favorkoreco.

— *Ne, li ne estas kulpa*, — diris la juĝistoj, kaj mi, kontenta kaj fiera, eliris el la salono de la juĝejo... Haltu, haltu, Belzebubo, kvietigu la jus'an koleron, vin atendas ankoraŭ unu bonfaro — atendas, kiel homoj ĝin nomas, sankta heroago por la triumfo de virgeco kaj virto.

VI.

Bona, simpatia antikveco, kun la piaj domoj, ĉe kies muroj estas tiel timige kaj agrable al ni vagi — kun turoj de maljunaj alĥemiistoj kun nestoj de strigoj kaj vespertoj, feraj maskoj en la profundoj de la kastelaj subteraj kaj dolĉegaj idilioj ĉe la kamenoj, apud kies fajreto sin varmigis kaj sin dorlotis la Margaretaj kaj Julietaj, la Doraj kaj Mignon-oj... Aminda, naiva antikveco!

— Ne, glora antaŭulo mia, bona gajulo Mefistofelo! Mia Grethen ne sidos antaŭ radŝpinilo, ne kantos pri la reĝo de Thule kaj lia multekosta pokalo... ne.

Infano de »nerva tempo« — ŝi tro frue iĝis virino, kaj mi ĝuplene observis la gradan sed neevit-eblan alproksimiĝon de ŝia malmoraligo. — Ŝia Faŭsto, ŝia »aminda Henriko« estis ankaŭ tute alia, li estis multe pli simpla, sed ankaŭ multe pli juna, almenaŭ lia juneco estis ne renovigita, sed efektiva propra. Mi konfesas, ke en pek-aferoj mi estas iom estetikulo, mi amas la pekon belan, kun varmega sango, kun forta blanka korpo... Kaj cetere ĝi fariĝas maloftaĵo en la nuna tempo. Sed mi daŭrigas: tiu belulineto, gracia kaj nerva, kiel serpenteto, havis patron, tre ŝatindan sinjoron, kaj patrinon, tre indan virinon. Nek tiu, nek la alia, ĝuante unufoje la posttagmangan ripozon, kompreneble, eĉ suspektis, kio tiutempe okazas en la malnova laŭbo de la maljuna, ne prizorgata ĝardeno... Ho, kun kia plezuro mi observis la alproksimiĝon de la dezirata minuto... Gi estis venonta... Tiam mi forte vipis per branĉo de l' plej proksima arbo la verdan flankon de la laŭbo kaj — malhelpis okazi la pekon...

Poste...

VII.

Sed daŭrigi la rakonton iĝis neeble. Milionoj da surdigaj voĉoj kuniĝis en komunan obtuzan bruon de

indigno kaj teruro... kia honto, kia malhonoro por la infero!...

Sed jen li levis la manon, ridete ĉirkaŭrigardis la sennombrajn arojn de l' indignantaj kunfratoj, ridete ekrigardis rekte en la flamantajn okulojn de la reganto kaj en la estiginta silento ekaŭdiĝis tiu obtuza, rompsona diabla rido, de kiu kun teruro retirigis la plej malbenita pekulo...

— Jes, li diris — mi savis la maljunulon de morto, la junulon de malliberejo kaj la junulinon de malmoraligo. Sed ĝuste per tio mi helpis al la afero de la peko pli, ol se mi ne malhelpus al la maljunulo mortfrostigi, al la junulo esti malliberigita kaj al la junulino malmoraligi.

La maljunulon oni rekonsciigis, varmigis, nutris, oni donis al li trinkaĵojn, permesis pasigi la nokton en oportuneco kaj varmo, kaj — la sekvintan tagon jam denove elpelis en la sama frostan malvarmon kaj malsaton. Anstataŭ unufoje, li frostiĝos dek, cent fojojn.

La junulon oni liberigis de la puno, kaj — elĵetis en la saman malsaton, sendefendan solecon. Ja dum tiuj monatoj, kiun li devus pasigi en la malliberejo, li almenaŭ estus sata kaj ne ŝtelus...

Kaj tiu ĉi junulino... Mi savis ŝin de malmoraligo, de morala falo en la ĉirkaŭprenoj de amata junulo, kiam la peko almenaŭ valoris ion kaj ĝi ne ventumis tiun trivialan kaj vulgaran prikalkulon, ofere al kiu oni poste donos ŝian puran korpon, ŝian junan sangon, ŝiajn varmegajn junulinajn revojn, — donos ŝiajn gepatrojn. Mi rifuzis al mi la plezuron rigardi la moralan falon de la junulino, kiam ŝia koro ardis kaj soifis la kison de amataj lipoj, la dolĉan odoron de l' unua dezirata ĉirkaŭpreno, kaj kun plezuro rigardis poste tiun ĉi junan koron, rompitan inter la premiloj de »profitdona« edzeco, sen amo, sen aspiro, sen deziro...

VIII.

Kaj de komenco ĝis la fino, de l' unua ĝis la naŭa rondo de la subtera regno ekbruis, ekflamis, eklaŭtigis komuna krio de admiro kaj gojego!

— »Gloron al vi! Gloron al la saĝa granda diablo, al la diablo-bonfaranto!!

Tradukis: J. Sapiro.

GASO

— Kálmán Sándor —

Tagiĝis. Frumatena krepusko. Kvina horo. La urbo dormis. Dormis la arboj, dormis la domoj, dormis la stratoj kaj en la fundo de ĉambroj, kies fenestroj estis kurtenitaj, sub molaj kovriloj, ronkante, ŝvitante, inkube sonĝis la dormantoj.

La verkistspeca homo staris en nigra vesto, striita pantalono sur la fervoja ponto en la supra parto de la urbo kaj rigardis la akvon. Tagiĝis. Venteto blovis, milde ondigis la akvon. La akvo estis flaveta kaj iom malklara, sed cetere pace ĝi fluis malsupren. Sur la vizaĝo de la viro vidiĝis duataga barbo.

— Nu, ĉi tio estos bona — pensis kontente la viro kaj profunde enspiris la fumon de sia cigaredo. — Guste konvena — li balancis poste amare sian kapon — la romanon mi jam certe ne verkos. Romanon skribi estas ege malsage, belan romanon. Sukceso... mono... ĉio... eh — li mansignis — kial denove komenci. Sur la ponto vagonaro trabruis, sur la koridoro de la dormvagono piedpinte iradis la konduktoro, en la vagonoj ankoraŭ brilis dormemaj elektrolampoj.

— Mi havas la honoron — diris moke la sinmortiganto al la vagonaro — ĉi tie nun mortos verkisto — kaj li senzorge eklevis sian ĉapelon. — Chemins de Fers de l'Est — li legis laŭte sur unu vagono — la verkisto ne verkis romanon, li nun mortas. Li suprenŝovis sian jakon, poste sur siajn okulojn tiris sian ĉapelon, kun decida movo forjetis sian cigaredon, kiun la aĉetis por siaj lastaj du fileroj kaj — li transpaŝis la parapeton.

— Ne bone, tute malbone — li pensis kun kurbigintaj lipoj, farante transkapiĝon en la aero — malbone, ke mi estas lerta naĝanto, longe daŭros.

Kaj tiam, ĝuste dum la transkapiĝo, en la aero, li ekaŭdis la fajfegadon de la sirenoj.

*

La suno leviĝis. La sinmortiganto kun laŭta plaŭdo atingis la akvon. La bato estis forta, preskaŭ li svenis de ĝi... Sub la akvo li malfermis siajn okulojn. Malklara flaveta balanciĝo. Super lia kapo heliĝas. En liaj pulmoj ĝiskreve streĉiĝas la eluzita aero, la vesto falde gluiĝas al lia korpo. Tre malvarma estas la akvo.

— Nu — diris teruriginte la sinmortiganto — kio estas — kaj lia buŝo pleniĝis de akvo. Malespere li frapadis ĉirkaŭ si. Li volis kriegi, malpura akvo eniĝis en lian buson.

— Ho... upp — li diris kaj forte piedsvingis. Kelkajn regulajn movojn li faris, kaj li estis supre, sur la supro de la akvo. — Diablon — li pensis amare — ĉu tiel malfacile estas morti?

Tre malvarma estas la akvo. La vesto malseke gluiĝas al lia korpo. Li mortos. Kial li ne razis sin antaŭe. Malbenita mono. Liaj brakoj estas lacaj pro la frapadoj, lia hararo falis en la okulojn. Weissmüller dum 58 sekundoj naĝas cent metrojn kaj li spiras sur la maldek-

stra flanko. La sinjoro verkisto mortos. En vesto estas pli malfacile. Portas lin la akvo, li mortos. Li ne skribos la romanon.

— He, homoj — li volis kriegi kaj li ektimis de sia ĝemanta akvoglutata voĉo. Malvarma estas la akvo. Ĉi tie sinmortiganto baraktas. Skandalo, kie restas la savboato de la polico? Verkisto dronas ĉi tie en la malvarma akvo kaj nun oni lasas lin morti. For la registaro! Generalan sekretan balotrajton ankaŭ por la mortintoj — li pensis amare kaj ekkuŝis sur sian dorson. Profunde li spiris. Tiel jam estas pli bone. Tiel, jes — li diris, ĉi tion li legis kiel infano en ia kamparanromano kaj nun subite li rememoris. Malrapide portas lin la akvo. Sed li restas supre. Ĉu ne egalas, kie li atingos la bordon?... ĉe la buĉejo... aŭ ĉe la panfabrikoj... aŭ ĝuste en la mezo de la urbo. Jarcento pasis, de kiam li saltis en la akvon. Malsagaĵo. Kiu naĝi povas, tiu kuŝigu sub vagonaron, ne saltu en la akvon. Droni estas pli malfacile ol skribi romanon. Ne estas bone. Se li elnaĝos, li kuŝiĝos antaŭ vagonaron.

Malrapide lin portis la akvo. — Chemins de Fers de l'Est, la sinjoro verkisto nun mortas — li pensis malvigle kaj rigardis la ĉielon. Triumfa vojo de sinmortigkandidato, malsupren, sur la rivero. Ambaŭflanke la urbo. Dormas la urbo. Neniu helpas lin. Li vojaĝos sub la pontoj, surdorse kuŝante. Sur la pontoj brilas ankoraŭ la lampoj, oni forgesis estingi ilin. Kulpa urbo.

Estas stranga la ĉielo. Sirenoj fajfegas. Groteskformajn, flavetajn nubojn pelas la vento supre en la aero. Strangaj nuboj. Ie motoroj de aeroplanoj muĝas.

— Malbonodoro estas, jam eĉ en la akvo estas malbonodoro — pensis lace la homo, ĉar li ankoraŭ ne sciis, pri kio propre temas. Li grimacigis sian nazon. Groteskaj, flavetaj nuboj. Estus bone jam atingi ie la bordon. Poste ja denove komencigos ĉio.

Kelkajn movojn li faris per la piedoj kaj li venis en la bordan fluon. Plaŭdante portis lin la akvo. Ankoraŭ kelkaj metroj. — Nun — li pensis kaj lace elrampis sur ŝtonŝtuparon. Li sidigis sur ŝtonŝtupo. Malseke, taŭzite. La aero estas prema kaj sufoka, strangaj odoroj kaŝiĝas ĉie. La urbo estas nekutime silenta.

— He, kio povas esti ĉi tio? — diris la sinmortiganto maltrankvile — ĉu haltis la tramoj kaj la aŭtoj? — Li rigardis la ĉielon. La suno iris alte jam. Ĝia telero estis tamen pala, ĝia lumo senforta. — Suneklipso — miris la homo. Li starigis, viŝis sian frunton, suprenrigardis en la aeron kaj tiam denove li rimarkis la flugantajn, flavetajn nubojn. Super la etaĝaj domoj supreniĝante flugadis jam la flavetaj nuboj. Satigitaj, laborfinitaj, kaŝmurdaĵaj, flavetaj gasnuboj.

Sed ĉi tion ne povis scii la sinmortiganto, ĉar la sinmortiganto ignoris la mondpolitikon, li estis verkisto,

kaj li estis la sola homo en la tuta urbo, kiu vive rifuĝis de la gasatado de l' Aliancaj Potencoj.

Malrapide, enpensiginte li ekiris sur la kajo supren. Lia vesto sekigis iomete. Nenie li vidas homon. Tie, sur la reloj, staras flava tramo. Tie ne estas haltejo, kial staras tiu tramo? Per hezitaj paŝoj li aliris la tramon. Ĉe la fenestroj kun balanciĝantaj kapoj, sidas la vojaĝantoj. La kondukisto staradas strange kliniĝante sur la aerbremson. — Nu, kial ni ne iras — demandis la sinmortiganto kaj scivole li ascendis la tramon. La kondukanto spasme premis la tenilon de la aerbremsa. — Ĉu estas ia akcidento, sinjoro kondukanto? — demandis ĝentile la sinmortiganto. La kondukanto, dorsmontre al li, staris senmove kaj ne respondis. — Nu, — diris senpacience la sinmortiganto kaj ekskuis la ŝultron de la kondukanto. La kondukanto ŝanceliĝis kaj flankenfalis sur la teron, lia dekstra mano, per morta gesto, ektiris la premilon de la kontakto kaj la tramo malrapide ekiris. — Ho...o — diris la sinmortiganto — kio estas, kio okazis? Ja mortis la gvidanto! — Li flankenŝovis rapide la fenestropordon kaj eniris la internon de la tramo. La kondukanto transverse kuŝis sur la planko, maljuna sinjoro sidis sur la benko, lia kapo antaŭenfalis, gazeto en lia mano. Kvazaŭ ĝin li estus leginta. — Mi petas vin — komencis la sinmortiganto — ne moku, mi petas vin, la tramo iras...nu, kio, estas...helpon...

La vizaĝo de la maljunulo estis nigra, la vizaĝo de la kondukanto estis nigra, la vizaĝo de la kondukanto estis nigra, la tramo malrapide iradis, poste alpuŝiĝis al la staranta antaŭ ĝi tramo kaj haltis. Kaj la sinmortiganto kun klakantaj dentoj malsuprensaltis de la ŝtupo de l' tramo kaj komencis sian migradon en la mortinta urbo. Mortintoj, ĉie mortintoj.

Ĉe la unua kadavro gapa teruro tranĉis en la koron de la homo. Ĉe la dua li kredis, ke li frenezigis. Ĉe la tria, ĉe la centa kadavro li jam apatiĝis. Li trairis la urbon. Li vizitis ankaŭ la vendejojn. La spicisto kun nigra vizaĝo kurbe apogis sin ĉe la pupitro, la ŝuisto antaŭenkliniĝante sidis apud la ŝutenilo, en la kafejoj mortintaj homoj legis la gvidartikolojn de la ĵurnaloj kontraŭ la panamoj. La tramoj haltis, ĉi tie rompita kuŝis aŭtomobilo. Tie, la trafikpolicisto ĵus suprenlevis sian brakon por signi liberan vojon al la aŭtisto. La aŭtisto mortinte sidis ĉe la direktrado, lia piedo estis sur la gaspedalo. La motoro bruis malplene, la mano de la mortinta aŭtisto estis ĝuste sur la unua rapideco. La maŝino muĝas, sed la aŭtomobilo jam neniam ekiros. En la tombejo, kadavro kuŝas en ĉerko, kvar aliaj kadavroj ĝin volas ĝuste levi, por enterigi. En banko monon kalkulas la kasisto, en dikaj faskoj ĝi kuŝas antaŭ li sur la pupitro. La sinmortiganto alpaŝis la pupitron kaj karesis la dikajn faskojn.

— Malbenita mono — li diris kaj poste kun malamo li kraĉis — mi nun foriros, mi nun kuŝiĝos sub la vagon-

aron. Kia terura epidemio estis en ĉi tiu urbo! Li ekiris al la stacidomo. En la giganta vitrohalo silente staris la vagonaroj. La nigraj literoj de la elpendigita horaro moke kaj mensoge rikanis al li. Ne ekiras vagonaro.

— Hu — diris la sinmortiganto malkontente — ĉi tie do eĉ morti ne eblas? — Diablon — li blasfemis — oni trompis min, oni tre trompis min.

Li sentis sin pritrompita kaj prirabita. Larmoguto aperis en liaj okuloj, poste, kun klinita kapo, malgaje, denove li reiris al la urbo. Sur unu el la stratoj, sur la asfalto, kuŝis amaso da flavaj afiŝpapiroj. La sinmortiganto malsuprenkliniĝis kaj levis unu. — Gaso — estis skribite sur la afiŝeto. — La unua gasatado de la aeroplana taĉmento de l' Aliancaj Potencoj. Okaze de neplenumo de l' kondicoj sekvos aliaj urboj.

— Ehe — diris la sinmortiganto. — Gaso! — Li jam komencis kompreni la aferon. — Gaso, nature, gaso. — Ja li eĉ aŭdis pri ĝi ion en la lastaj semajnoj. Li, kompreneble, ne komprenas la eksterlandan politikon, oni parolis pri ia konflikto, sed li estis ĝuste tiam okupita pri sia propra vivo kaj nur ĉi tiun unu vorton li notis: Gaso!

Sed nun, ja nun ĉio estas klara kaj komprenebla. Kial koncernas lin la konflikto? Tra la ondoj de la rivero ne penetris la gaso. Li estas verkisto, li volis morti. Ne lia kulpo, ke li ne sukcesis. La romano, jes, la romano. Li ja vere faris ĉion eblan. Li ekspiris profunde. Nun ĉio estas simpla. Skribi li devas la romanon. Mallaŭte li ekridis.

— Gaso, hahaha, gaso, hihi, gaso, jen, jen ĉi tiu gaso — li levis idiote sian montrofingron dum oftaj ekrido. Nun li montros ion!

Li eniris en papervendejon kaj elektis por si kelkajn foliojn da delikata papero, enpoŝigis dikan fontoplumon, sidigis en kafejon apud la fenestro kaj kun febra ambicio li komencis skribi senprokraste la romanon.

La savtaĉmentoj nur post du semajnoj kuraĝis eniri la ekstermitan de gaso urbon. Kornikoj cirklis super la mortintoj. Kadavrodo kaj mortintoj ĉie. La satigitaj kaj kaŝmurdaĝ gasnuboĝ jam delonge forflugis de super la urbo. Kaj la singarde proksimiĝantaj savtaĉmentoj trovis entute nur unu mirindmaniere rifuĝintan homon en la urbo. La homo sidis en la fenestro de kafejo, ĉirkaŭ li la tero estis plena de tasoĝ de nigra kafo, antaŭ li sur la tablo amase kuŝis plenskribitaj paperoj. Lia barbo pendis sur lian kolumon kaj ĝuste cerbumante pri ia epiteto li maĉis sian plumingon. Verkistspeca homo li estis, kaj ian romanon li verkis, pri malĝojo, birdoj kaj pri malfeliĉa amo. Oni devis lim perforte forporti de la tablo.

Sur la stratoj ŝvebis peza kadavrodo. La verkistspecan homon oni portis en la frenezulejon.

El la hungara: *Parvus Piscis*.

La vidvino de Efezo

— Titus Petronius Arbiter —

El la fragmenta kultura romano de la roma verkisto Petronius ni en antaŭa numero prezentis la rakonton pri la festeno ĉe Trimalhiono. Ĉisube ni prezentas alian eltiraĵon el la sama verko, la rakonteton pri la vidvino de Efezo, per kiu la rakontanto volas pruvi la ŝanĝemon kaj malfidelecon de la virinoj.

Vivis foje en Efezo edzino, kiu estis tiom famkonata pro sia ĉasteo kaj fideleco, ke eĉ la virinoj de la najbaraj popoloj venis por ŝin vidi.

Nun okazis, ke la edzo de tiu ĉi virino mortis, kaj en sia kordoloro ŝi ne nur laŭ la kutimo iris en la funebra procesio kun disliberigitaj haroj kaj batis sian bruston por montri al la homoj sian doloron, sed ne kontenta je tio ŝi sekvis la mortinton eĉ en la toboĉambrom subteran, kaj tie ŝi nun grekmore priĝardadis kaj priploradis sian mortintan edzon tagojn kaj noktojn senĉese. Vidante ŝian grandan kordoloron kaj ke ŝi, dezirante morti, nenion manĝas, ŝiaj gepatroj kaj parencoj provis ŝin forvenigi el la tombo, sed vane. Eĉ la reprezentantojn de la estraro ŝi forsendis malatentitaj. Kaj ĉiuj homoj kompatis la eksterordinare fidelan virinon, kiu nun dum kvin tagoj estis sen manĝaĵo. Ĉe si ŝi havis sian fidelan sklavon, kiu plorante partoprenis en la malĝojo de sia malfeliĉa estrino kaj de tempo al tempo metis novan kandelon sur la tomban monumenton, kiam la antaŭa forbrulis.

Tiel la fidelega vidvino iĝis la sola interparola temo en la tuta regiono, kaj ĉiuj homoj, nobluloj kiel simpluloj, interkonsentis, ke ili neniam vidis tian pruvon de fideleco kaj amo...

Nun okazis tamen, ke la estro de la provinco krucumigis nombron da rabistoj najbare apud la tombo, en kiu priploradis la virino sian mortintan edzon, kaj soldato ricevis la ordonon gardadi la krucojn, por ke neniu forŝtelu iun el la kadavroj por enterigi ĝin. Kiam tiu ĉi soldato en la unua punkto vidis inter la tombaj monumentoj kandelon pli klare lumantan ol la aliaj kaj aŭdis funebran ĝemegadon, li kompreneble (li estis ja nur homo) ekscivolis, kiu estas la ploreganto kaj kion li faras, kaj pro tio li malsupreniris en la toboĉambrom subteran.

Vidante la belegan virinon en la tombo li konsternite haltis, kvazaŭ li vidus fantomon el la regno de la mortintoj. Sed kiam li post tio vidis la kadavron kaj observis la larmojn kaj la unĝovunditan vizaĝon de la virino, li komprenis, ke ŝi estas vidvino, kiu ne povas sin forŝiri de sia kara mortinta edzo. Tuj li alportis sian manĝaĵon kaj komencis peti ŝin, ke ŝi finu tiun senutilan funebradon kaj ne turmentu sin per tiu vana ĝemegado: la sama sorto kaj la sama ejo atendas ja nun ĉiujn... Unuvorte: li diris al ŝi ĉion, kion oni ordinare diras al malesperantoj por ilin konsoli. Sed la konsolaj vortoj de la fremdulo nur turmentis ŝin, kaj ŝi komencis unĝovundi sian bruston eĉ pli ol antaŭe kaj forŝiri siajn harojn super la korpo de la mortinto.

La soldato tamen ne senkuraĝiĝis, sed provis persvadi la vitinon akcepti iom el la manĝaĵo. Fine

la sklavino, verŝajne venkita per laodoro de la vino, etendis sian manon kaj akceptis la manĝaĵon, kiun ofertis la bonkora soldato, kaj post kiam ŝi fortigis sin per manĝaĵo kaj trinkaĵo, ŝi komencis ataki la obstinecon de sia estrino.

— Kian utilon vi havos, ŝi diris, se vi forvelkos per malsato, se vi enterigas vin mem viva, se vi senkulpas mortos antaŭ la tempo, kiun fiksas la sorto.

»Ĉu vi opinias, ke la fantomo, la cindro ĝin sentas?«*

Ne, revivu. Forigu vian eraran opinion, kaj ĝuu la ĝojojn de la vivo, dum vi povas. Eĉ la morta korpo tie devas vin admoni, bone uzi la vivon...

Ĉiu homo aŭskultas ne malvolonte, kiam oni instigas lin manĝi aŭ konservi sian vivon. Kaj tial la virino, senforta post la longa nemangado, ne protestis, kiam oni neniigis ŝian obstinecon, kaj ŝi manĝis ne malpli avide ol la sklavino antaŭe.

Sed same kiel la soldato persvadis la vidvinon daŭrigi sian vivon, tiel li nun per flataj vortoj komencis ataki ankaŭ ŝian ĉastecon. Kaj la sklavino kunhelpis gajni ŝian favoron por la soldato dirante:

— »Ĉu vi eĉ la bonvenan amon rifuzos, kaj ĉu vi ne pripensas, en kies lando vi vivas?«*

Ŝajnis ankaŭ al la virino, ke li estas sufiĉe bela kaj elokventa junulo. Unuvorte: ankaŭ en tiu ĉi rilato la virino ne kontraŭstaris la bravan atakon de la soldato. Kaj ili kunkuŝis ne nur tiun ĉi unuan punkton, en kiu ili solenis sian unuigon, sed ankaŭ la sekvan kaj la trian — sed kompreneble nur post kiam ili fermis la pordon de la toboĉambro, por ke, se iu konato aŭ alia persono venos al la tombo, li kredu, ke la fidelega edzino mortis super la korpo de sia edzo.

La soldaton tre plaĉis kaj la beleco de la virino kaj la sekreto, kaj tiel ofte kiel li povis li aĉetis ĉiuj-specajn frandaĵojn kaj portis ilin nokte al la tombo.

Kiam nun la gepatroj de unu el la krucumitoj observis, ke la gardado ne estas tiom zorga kiom antaŭe, ili nokte dekrucigis la korpon de sia filo kaj enterigis ĝin. La sekvan tagon la soldato, vidinte unu el la krucojn senkadavra, tre ektimis, kaj antaŭvidante la punon li rakontis al la virino, kio okazis, kaj deklaris, ke li volas antaŭveni la juĝon kaj per sia glavono mem puni sian malatenton. Ŝi do aranĝu tombojn por sia mortonta amanto.

Sed la virino, kiu estis tiom kompatema kiom ĉasta, diris:

— Malpermesu la diojn, ke mi samtempe vidu mortintaj la du virojn, kiujn mi amas pli ol ĉion alian! Ne — mi pli volonte krucumas mortintojn ol mi mortigas vivantojn!

Tion dirinte ŝi eligis la korpon de sia mortinta edzo el la ĉerko kaj krucumigis ĝin ĉe la kruco, kiu ne havis kadavron.

El la latina: *Einar Knutsson*

* Vortoj el la Eneido de Vergilius, adresitaj al Dido, kiam ŝi hezitas edziniĝi kun Eneas post la morto de sia unua edzo.

Skizo de esperanta metriko^{*}

— G. Waringhien —

Antaŭparolo

Mi ne intencas, en la sekvanta verko, instrui la poetojn pri ilia metio, sed simple kompili k klasifiki la rimarkojn de mi faritajn dum vasta legado k kontrolitajn per longa diskutado. Mi ne opinias mian provon tro frua: se oni konsideras, ke nur en la lastaj jaroj tradukiĝis *Faŭst* de *Goethe*, age de *Barthelmess*, *La Tragedio de Homo* de *Madach*, age de *Kalocsay*, *Eŭgeno Onegin* de *Puŝkin*, age de *Nekrasov*, estas tradukata *La Dia Komedio* de *Dante*, age de *Kalocsay*, (mi ne volas paroli pri originalaj poemoj), oni konsentos, ke venis la tempo skizi sisteman studon pri la Esp-a metriko.

Sed antaŭ ol entrepreni ĝin, stariĝas la demando — ne ĉu Esp-o estas poezia lingvo (la cititaj ĉefverkoj estas sufiĉa respondo), sed laŭ kia mezuro ĝi pruvis sian poeziecon. K se ni esploras la temon laŭ tiu vojo, ni konstatos, krom grandaj kvalitoj, kiel la stilfleksebleco k la riĉo el kunmetitaj formoj, ankaŭ unu gravan mankon: nia lingvo ne estas sufiĉe *elvokanta*. Oni nomas elvokiveco de iu vorto ĝian kapablon veki en la spirito de la leganto vidimpreson, imagbilon; la vorto »neĝo«, ekz-e, estas elvokanta. ĉar aŭdante ĝin, ni mense vidas la blankan k malvarman teron glimbri de pala suno. Nu, tiun kapablon havas tro malmulte da esp-aj vortoj: ĉiu povos konstati, ke plejofte nacilingva traduko de poemo estas pli elvokanta ol la, eĉ pli perfekta, esp-a. Tiu manko havas tri kaŭzojn, el kiuj ne ĉiu estas same grava.

La unua estas la granda signifamplekso de pluraj esp-aj radikoj, t. e. ilia abstrakteco. Estas fakto konata de ĉiuj filologoj, ke vorto estas des pli elvokanta, ju malpli multajn objektojn ĝi signas, t. e. ju pli konkreta ĝi estas. Plej elvokantaj el ĉiuj vortoj estas la propraj nomoj (»Zamenhof«), aŭ loknomoj (»Parizo«); poste venas komunaj nomoj, kiuj signas tre malvastan k bone difinitan kategorion el aĵoj, kiel »suno, eburo, nigro«: laŭ la mezuro, kiel la signata aĵ-kategorio estas pli ampleksa, la elvokiveco malgrandiĝos ĝis plena malapero: »Bela Joe« estas pli elvokanta ol »vertrago«, »vertrago« pli ol »hundo«, »hundo« pli ol »kvarpiedulo«, »kvarpiedulo« pli ol »besto«, k »besto« pli ol »estaĵo«, kies elvokiveco estas ĝuste nula. Nu, al multaj radikoj Zamenhof donis tre larĝan k malprecizan signifon, celante kiel eble plej maldikigi la vortaron. Sufiĉas malfermi nacilingva-esp-an vortaron por konstati, kiel la naturaj lingvoj estas pli precizaj. La sola »pinto« signifas F. »pointe, bout, sommet, cime, faite« -G. »Spitze, Stachel, Gipfel, Wipfel« — A. »point, peak, summit, apex, pinnacle, top, tip, nib«. »Rando« estas F. »bord, lisière, arête, contour,

*Antaŭparolo kaj unu ĉapitro. El la »Parnasa Gvidlibro« de Kalocsay kaj Waringhien.

rebord, tranche« -G. »Rand, Saum, Grat, Krämpe, Umritz« — A. »Edge, brink, brim, rim, rand, verge, ledge, sharp corner, cant«. Komprenoble tiaj esp-aj vortoj estas multe pli konfuzaj ol ĉiu el la respondaj nacilingvaj.

Dua kaŭzo estas la maloftega uzado de Esp-o en la ordinara, familiara vivo; ĝi estas precipe skribita lingvo, kiun oni parolas nur post longaj intertempoj k nedaŭre. Nu, la ĉiutaga uzado havas tiun efikon, ke ĝi nedisigeble ligas la objekton aŭ ĝian imagbilon kun la vorto. Se mi neniam havis okazon indiki markrut-aĵojn per ilia nomo, mi ja scios per mia vortaro, ke »klifo« signifas F. »falaises«; sed la franca, ne la esp-a vorto estos elvokanta. Same okazas pri la kunmetitaj vortoj, kiuj respondas al simplaj nacilingvaj vortoj (ekz-e: patrolando): se oni ne daŭre kutimiĝis percepti rekte la simplan ideon tra la malsimpla formo, la spirito ĝin mallerte analizos en ĝiajn elementojn, k tial ne ricevos la drastan imagbilon. kiu tiel gravas en la poezio.

La tria kaŭzo, la plej grava, estas la tre ofta uzado de vortoj formitaj per *mal*, *ne* aŭ *sen* por signifi la kontraŭojn. Tio ĉi malutilas la poezion, ne ĉar ili estas ne sufiĉe elvokantaj, sed ĉar ili estas kontraŭsence elvokantaj. Efektive, se ni rememoras la klasifikon de la vortoj laŭ ilia elvokiveco, ni vidas, ke ĝi estas despli malforta, ju pli abstraktaj ili estas; nu, plej abstraktaj vortoj estas la gramatikaj iloj, la »morfemoj«; kiel morfemo, la negacio estas tute sena je poezia valoro. Ne rimarkinte tion, kelkaj poetoj faris verajn kontraŭsenceojn; por ke la leganto sentu la malon de koncerna impresio, ne sufiĉas kunmeti negacion kun la vortoj, kiuj ĝin esprimas; ĉar oni ne forigas tiel la evitendan impreson: oni elvokas la imagbilon, dum oni kredas ĝin forpeli. Dezirante priskribi grizan vintran tagon, Grabowsky skribis:

La tago malvarma, malgaja, sensuna...

verso taŭga por doni la impreson de sunplena somertago; tiun bildon la uzo de *mal* ne forigas de la spirito de la leganto (mi nun ne parolas pri la malĝusta uzo de la vokalkoloro: vd. §. 3g). Tiuj malvortoj estas vera plago por la poezio — k ne nur por la poezio: pensu pri la sekvoj, kiujn havus miskompreno de poraŭtomobila surskribo »Turnu maldekstren!«.

El tiuj tri kaŭzoj oni povas esperi, ke la du unuaj iom post iom malaperos, laŭ ke Esp-o estos pli diskonata. Efektive, ĝia uzado por pli teknikaj uzoj devigos ĝin precizigi la tro konfuzajn terminojn. Jam antaŭ niaj okuloj ni vidis apud la fundamenta »fosilo« stariĝi en la 4a Aldono »pioĉo« k »ŝpato«. Apud la fundamenta »murmuri« naskiĝis en la 3a Aldono »flustri«, k Zamenhof uzis krome oficialigindan »su-

AFORISMOJ

suri». Apud la fundamenta »bleki« la 1a Aldono metis »miaŭi«, la 2a »grumbli«, la 4a »kluki«: plie Zamenhof uzis »grunti« k »kveri«, k oni komencas renkonti »heni« k »ululi«. Certe, ke la evoluo ne ĉesos. Same, kiam Esp-o estos lernanta jam de unuagradaĵ lernejoj, la infanoj kutimiĝos nomi rekte la objektojn per ilia esp-a nomo, ne plu pasante tra sia patra lingvo, k Esp-o akiros tiam multe pli grandan elvokivecon.

Kontraŭe, ne estas ia ajn ŝanco, ke oni iam tute forlasos la tiel genie elpensitan, tiel oportunan sistemon de la mal-vortoj: la ekonomio en la lingvo estas tro grava por esperi modifon. Nur por kelkaj ĉefaj ideoj, oni iom post iom kreis apud la mal-formo alian simplan. Jam de la komenco de la lingvo oni diris »forgesi« k ne »malmemori« »gajni« k ne »malperdi«, »komenci« k ne »malfini«, »hieraŭ« k ne »malmorgaŭ«, kvankam tiuj kunmetitaĵoj estus tiel logikaj kiel »malfermi« aŭ »malsupre«. Je ĉiu evoluetapo oni povas noti tiajn konkerojn: en la Fundamento »falsa« anstataŭas la antaŭan »malvera«; en la 1a Aldono »fiksa« vanigas la ĝistiaman »senmova«, k »naiva« — »senartifika«; en la 2a »stulta« (= mal-sprita), en la 3a »aflikti« (= malĝojigi), »efemera« (= maldaŭra), en la 4a »kalva« (= senhara) estas atestoj pri la sama tendenco; kelkaj aliaj atendas ankoraŭ oficialigon («kompleksa» uzita de Zamenhof anst. »malsimpla«), k oni povas eĉ supozi, ke, ĉe granda vastiĝo de la esp-a turismo, oni pro la supre aluditaj kaŭzoj akceptos »sinistre« k »infre« apud »maldekstre« k »malsupre«. Sed tia kreado restos ĉiam fragmenta en nia lingvo, k ve. Ŝajne neniam ĝeneraligis. La poetoj, kiuj bezonas tuj drastan vortaron, devos helpi al si mem. K tio estas ebla: preskaŭ en ĉiu lingvo la poezio, se ĝi ne kreis por si apartan lingvon, kiel faris la helena, almenaŭ rezervis al si uzon aŭ kreon de specialaj vortoj: ni pensu nur pri la francaj »courroux, onde, penser« apud la prozaj vortoj »colère, eau, pensée«, la itala »lumi, vanni, natali, augelli« apud la prozaj »occhi, ali, nascita, ucelli«, la anglaj »steed, brine, gale, mead, main, bosom, wrath, brow« apud »horse, sea, wind, meadow, sea, heart, anger, forehead« ktp. Kial Esp-o, kiu imitas tiujn lingvojn sur aliaj kampoj, ne imitus ilin sur tiu ĉi? Kial, kontraŭ la prozaj vortoj »malgaja, malvarma, mallonga, malrapida, malfermi«, ne starus poeziaj terminoj, signitaj, kiel tiaj, en la vortaroj »trista, frida, kurta, lanta, aperti«? Mi deziras, ke pri ĉi tio estigu nenia miskompreno. Ni neniel intencas ŝanĝi aŭ forigi ian ajn radikon de la Fundamento, kiun ni severe gardas k observas; ni volas simple sekvi la vojon montritan al ni de Zamenhof mem, k de la kompetentaj kompilintoj de la 4 Oficialaj Aldonoj, proponante apud la ordinara formo, alian akcesoran k specialan por la poezio. Tio estos nur daŭrigo de la ĝisnuna evoluo, ne revolucio.

La konkludo de tiuj kelkaj rimarkoj estas do favora. Mi ne volas diri, ke de nun Esp-o povas rivali

— *Kiam mi konsideris, kiom da diferencaj opinioj pri unu afero povas ekzisti, el kiuj ĉiu trovas defendanton inter la scienculoj, kaj ke nur unu sola el ili povas esti vera, tiam mi konvinkigis: Cio, kio estas nur verŝajna, estas verŝajne malĝusta!*
Descartes

— *Kiam ni profesoroj estas necertaj kaj ŝanceliĝaj pri iu procedo, ni komencas nian tezon per »kiel oni scias«.*
(Fizikisto) W. Dove

— *Ni estas ĉiuj sufiĉe fortaj por elporti la mizeron de l' proksimulo.*
La Rochefoucauld

— *Kiel nia irado estas nur falado ĉiam retenata, la vivado de nia korpo estas nur mortado konstante retenata, morto ĉiam prokrastata. Tamen ni daŭrigas nian vivadon kun multe da intereso kaj zorgo kiel eble plej longe, same kiel oni bloŝvetigas sapvezikon kiel eble plej longe kaj grande, kvankam oni certe scias, ke ĝi estas krevoanta.*
Schopenhauer

— *Homo, kiu faras amdeklaron kun malvastaj pupiloj, hipokritas.*)*
C. I. Schleich

— *Kiam oni trovas stilon naturan, oni estas tute mirigita kaj ravita, ĉar oni supozis aŭtoron kaj trovas homon.*
Pascal

— *Ankaŭ la plej honesta homo, precize esplorinte laŭ la leĝoj ĉiujn siajn agojn kaj pensojn, trovos, ke li en sia vivo minimume dekfoje meritis esti pendigata.*
Montaigne

— *Ĉiu enestas en sia konscio kiel en sia haŭto kaj vivas senpere nur en tiu: tial ne estas eble tre helpi lin de ekstere. Sur scenejo unu ludas princon, alia konsiliston, tria serviston, aŭ soldaton, aŭ generalon. Sed tiuj ĉi diferencoj ekzistas nur en la eksteraĵo; en la interno, kiel kerno de tia aferaĵo estas ĉe ĉiuj la sama: bedaŭrinda komediisto, kun siaj sufero kaj mizero. Same estas en la vivo.*
Schopenhauer

(Walter Lippmann)

*) Ĉar fortaj emocioj vastigas la pupilojn.

kun ia nacilingvo: 50 jara praktikado, eĉ en la epoko de l' elektro, ne povas egalvalori miljaran prilaboradon. Sed kiam oni, kiel mi faris, tra legis preskaŭ la tutan esp-an literaturon de la »Nega Blovado« ĝis »En Okcidento nenio nova«, oni vidas tre klare, ke la post-militaj verkoj prezentas tre gravan antaŭenpaŝon k lingvoprogreson.*) La teknikajn problemojn de versfarado ni povas do sentime alpaŝi, konsciante, ke nia laboro ne estos vana batado de vento, sed ebligos novan ekfloradon de nia kara esp-a poezio.

Mi ne povas fini tiun antaŭparolon sen rememorigi la nomojn de miaj antaŭantoj, Sroj Cart, Parizot, Vaillant — k precipe sen danki Sron Kalocsay, al kies valoraj konsiloj mi multe ŝuldas. Restas nun al mi deziri, laŭ la antikva formulo, ke tiuj, kiuj legos tiun skizon, sentu tiom da plezuro, kiom mi ĝuis, skribante ĝin.

* Oni tamen ne miros, se mi citos kiel eble plej ofte versojn de Zamenhof: konscienca studo de liaj verkoj estas tiel necesa por firme fondi metrikon, kiel por kompili vortaron aŭ ellabori gramatikon.

Sonharmonio

La skando de la ritmo k la arango de la rimoj, kiujn mi ĝis nun studis, ne devas esti la sola zorgo de l' poeto: li devas atenti ankaŭ la harmonion, t. e. la agordon de la konsonantoj k vokaloj interne de la verso. Antaŭ ol entrepreni tiun studon, estas bona memori, ke pro la akcenta strukturo de Esp-o, ni okupiĝos nur pri la konsonantoj k vokaloj de la akcentaj silaboj: tiuj de la senakcentaj ne estas per si mem sufiĉe rimarkeblaj por fari efekton, ili povas nur plifortigi la harmonion de la akcentaj.

Ripeton de sama aŭ simila konsonanto oni nomas aliteracio. Kiel mi diris supre, ĝi estis esenca elemento de pragermanaj versoj. K. Kalocsay imitis tiun sistemon en sia »Kongres-Runo«:

Vokas voĉ' de Väinemöinen,
Vibras vok' en vaga vento
Kaj ĝin muĝas malproksimaj
Montoj, maroj murmurantaj ...

Tiu aliteracio, kiel oni vidas, anstataŭas la rimon. Sed en la rimaj versoj, la aliteracio, malpli ofta, ludas akcesoran rolon. Ĝi servas precipe por pentri la naturajn bruojn, la movojn k la sentojn. Cetere oni devas ĉiam memori, ke la sonoj estas esprimivaj nur okaze, k sugestas ion nur se la en ili entenita ideo akordas kun tia sugesto: la ripeto de U estas elvokiva en »susuro«, sed ne en »uzuro«; tiu de K estas sugesta en »klaki« k »kraki« sed ne en »kaki« aŭ »makako«. Aliflanke, la respondo inter sonoj k sentoj estas certa, sed ne logike difinebla: oni do ne devas serĉi en tiu kampo matematikan precizon.

La dentaloj (dt) k guturaloj (gk) esprimas ĝenerale la obstinon, persiston:

Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan ... (Z)

La verdan standardon tre alte ni tenos ... (Z)
k ankaŭ simple la emocion:

... Nun mi plene sentas

La tutan terurecon de l' danĝero. (If)

La guturaloj, miksitaĵ kun R, pentras la krudajn, sovaĝajn bruojn:

Raŭkaj korvoj ĉirkaŭgrakas ... (T. Jung)

Ŝtona mur' kun tondra krak'
Krevu sub la peza hak'! (B. Rifling)

La Ekvidoj (lr)k nazaloj (mn) donas impreson pri mildo, karesemo:

Al brusto la mia, ha, ĝi min doloras,
Almetu maneton, amata krabino ... (FK)

Nun, kun flu' pli mola ol river' trankvila ... (K)

Ha, legi longe el oku'a he'o
Kvietan raven ... (K)

La lipaj frikativoj (fv) esprimas fizike mi'dan k sonoran blovon aŭ fluon:

Sur flugiloj de facila vento ... (Z)

Kiel vento la blovanta,
Ili flugis for ... (FK)

Freŝa parfum' eliris el la asfodeltufoj,
La blovoj de la nokto ekflirtis sur Galgala ...

Sed ili povas esprimi ankaŭ multajn sentojn,
la ĝojeksciton:

Printempo volas vekti vin per vibre febra kiso ... (K)

Kaj vian familion vi ornamas
Per novaj, freŝaj floroj de la vivo ... (If)
la forton:

La viro kun la fera vol', la filo ... (If)
la funebbron:

Floro falis ankoraŭ! Sekiĝis herbero kaj mortis,
Velkis pro vintra la frostoj ĝia verdanta folio ... (FK)

La ripeton de sama aŭ simila voka'o oni nomas asonanco. Laŭ sia esprimiveco, la vokaloj grupiĝas en tri grupoj: la klaraj (I, E), la malklaraj (O, U) k la meza (A). Kvankam ilia esprimiveco estas malpli facile difinebla ol tiu de konsonantoj, oni povas diri, ke la klaraj, precipe I, servas por esprimi la malgajon, plendon, melankolion:

... Pleje nun min via ĉarm' altiras,
Ravita mi priskribas vin, ĉar mi je vi sopiras ... (Z)

Mia mizero, mia mizero,
Ĉu mi vin finos iam suferi? (FK)

Sed griza jam iĝis ĉe miaj tempioj
La nigra harar' ... (K)

La malklaraj esprimas surdajn sonojn (kiel en la vortoj: tondro, ronki, murmuro, zumi ktp) aŭ timigajn impresojn:

Noktuo jen ululis sur Forumo ... (M. Lukaŝ)

Morgaŭ uragano kun hurlanta muĝo ... (K)

Ĉiu tomb' malfermis buŝon kun murmuro ... (K)

A miksita de E k O servas kontraŭe por signi sonorajn, ĝojajn sentojn:

Ho, ardu la koro en flamo,
Ĝin hardu la fajro de amo
Por granda kaj sankta fervor',
kaj sonu la voko tra l' mondo,
Ja vane, sen kora respondo,
Jam certe ne sonos ĝi for! (K)

Antaŭ ol forlasi la studon pri la vokaloj, ni devas rimarkigi la harmonieffektojn, naskitaj de la simetria arango de la samklasaj vokaloj (EI-OU) en la akcentaj silaboj. Tiu ĉi versmuziko, kontraste kun la sonimito, ne estas esprimiva k ne dependas de la esprimita ideo. Cetere, por ke la harmonio de la vokalgrupoj estu perceptebla, ĝi devas respondi al la arango de la piedoj ĉiuflanke de la cezuro. Jen kelkaj mallongaj indikoj pri tiu tre riĉa materio.

Trioble tri minutoj

Intervjuo pri AELA

»Nun post UEA, ICK, KR, LKK — ankoraŭ unu mistera organizajo!« mi kriis kun indigno, kiam mi legis prospekton de AELA. »Fulmotondro! Kion ili volas? Monon? Kompreneble. Kion ili donas? Librojn. Ah — librojn! Jen alia afero. Ni rigardu. AELA volas doni al siaj membroj librojn, librojn kaj ankoraŭfoje librojn. Bone. La prezo? La kostoj? En tiu ĉi momento mi ekprenas mian kapon, miaj okuloj vastiĝas kiel aŭtoradoj, mi elkrias: »Bleier, vi bankrotos! Vi freneziĝis! Vi ruinigos vin mem, la eldonejon kaj nin kompatindajn verkistojn!!«

Rigardu! Programo de AELA por 1932: 6 libroj, preskaŭ sume 2000 paĝoj, inter ili originalaj kaj tradukitaj romanoj, riĉe ilustrita libro pri pentrarto, Hungara Antologio kaj — Enciklopedio de Esperanto, ĉiuj libroj kune en la valoro de sv. fr. 55.— riceveblaj por (nur!) 13 sv. fr. 50 centimoj.

Blufo? Aprila ŝerco? Simpla prezeraro? ... Mi kuregas al la telefona aparato. Mi devas averti, protesti en la nomo de la malsatantaj verkistoj...

»Hallo! Interurban centron!« Procedo enuiga. »Jes, 380—84!« Ekscitite mi atendas ĉe la aparato. Fine sonorigo.

»Hallo! Kiu tie? ...«

Malproksima voĉo respondas:

»Hallo! Bleier!«

»Bonan! Ĉi tie, ne miru, Forge! Aŭskultu, mi estas tute ekscitita. Mi ĵus legis pri via AELA. Prezoj neeblaj.«

Min interrompas voĉo tute natura, neniom surprizita, kvazaŭ okazus tute ĉiutaga afero:

»Trankviliĝu! Ĉio estas en ordo. La afero estas simpla. Ĝis nun la Esperantaj libroj estis multekostaj. Tial ili vendiĝis en pli kaj pli malmultaj ekzempleroj. Sekve, ili devis fariĝi ankoraŭ pli multekostaj. Sekve ili vendiĝis en ankoraŭ pli malmultaj ekzempleroj. Jen la

vera »peka cirklo«, en kiu komencis jam tute sufokiĝi la Esperanta literaturo. Nun, kion ni volas fari? Turni la direkton en la cirklo. Doni malmultekostajn librojn, sekve vendi pli multajn ekzemplerojn, sekve ankoraŭ pli malaltiĝi la prezojn, sekve vendi ankoraŭ pli multajn ekzemplerojn. El la »peka cirklo« ni volas fari »virtan cirklon«.

»Bonegaj ideoj!« mi konsentas, »Sed ĉu vi ne timas, ke la libristoj unuanime-unumane vin ŝtonumos?«

»Ne, ĉar ili nepre rekonos pli aŭ malpli frue, ke la malkara libro neniam malutilis al la libristoj. *Gi ja kutimigas la homojn legi.*«

»Vi pravas! Estas fakto ke ekzistas miloj da Esperantistoj kiuj avidas aĉeti librojn, sed pro la krizo ne povas elspezi tiom da mono. Sed ĝuste tiuj krizaj tempoj — ĉu vi ne timas ilin?«

»Krizaj tempoj? Ili ĝuste favoras nian AELA. Ĉar kion la Esperantistoj faros sen AELA? ...«

»Hallo! Tri minutoj pasis!« interrompas mistera voĉo.

»Ankoraŭ tri minutojn!« mi kriis. »Vi estas terura optimisto!«

»Mi dankas la komplimenton! La plano de nia AELA volas venki la krizon. Neniu havas monon, almenaŭ ne multan. Kontraŭ tiu malagrabra fakto oni povas batali nur per malaltaj prezoj. La ĝisnunaj prezoj, inter la nunaj cirkonstancoj, kondukus neeviteble al la ĉesigo de ĉia eldonagado, ĉar la libroj nehelpeble ŝimiĝus en la magazeno. Sed la kvaronigo, eĉ kvinonigo de ĉi tiuj prezoj povos savi la situacion. Precipe, ĉar oni ja povos pagi ankaŭ en partoj. Pripensu ke la membrojn de la AELA ŝarĝas monate malpli ol 1.5 sv. fr. do tage malpli ol 5 centimoj. Kaj por tiu sumo ili havos jare ses ampleksajn librojn, kaj krome ankaŭ recenzgazeton, kiu raportos vigle pri nia tuta literatura vivo.«

»Kion vi diras!« mi demandas surprizite. »Ankoraŭ recenzgazeton? Ne, tio estas tro, tio ne volas eniri mian kapon!«

La akcentvokaloj povas inter respondi duope:

Ni ĝin atingos per la potenco i i-e e

Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj i i-o o

Ni paŝo post paŝo, post longa laboro a a-o o

Aŭtuno nebula! Arbar' nudiganta! u u-a a

Ili povas alterni:

Tiam atendas nin rekompenco i e-i e

Al vi iris jam oferoj a i-a e

Nur rekte kuraĝe kaj ne flankigante e a-e a

La Forto mistera de l' mondo nin benos o e-o e

aŭ ringe sin respondi:

Se donas Di' al vi favoron o i-i o

Forte ni staru, brave laboru o a-a o

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia i e-e i

La verdan standardon tre alte ni tenos e a-a e

Floradas ankoraŭ la floroj en valo a o-o a

(ĉiuj Z, krom la 4a FK k lasta: K)

En la versoj de malpli simetria ritmo prezentigigas la sama harmonio, sed laŭ formoj pli malsimplaj; cetere oni devas atenti nur la efektive prononcatajn

akcentojn (vd § 10):

Kvinjamboj:

Por mI nenIam tIon mi dezIris

AnI'mo lIa bEla k libERa

Ne mAnkas Al mi bEno de l' ĉiElo

LibERe spIri nE signIfas vIvi

Si dOnu vEnkon, glORon kaj riĉEcon (If)

Jen mIlda Ombr' allOgas vIn ripOzi

Al brUst' klimIĝu kaj mi vIn ventUmos

CollOnga vIv' admOnas nIn rapIdi (K)

Aleksandroj:

La nOmo, mi memORas, sonORE, dOlĉe sOnas ...

LilIojn de l' anI'mo kaj rOzojn de la kORO

Kaj mIa fantazIlo kiel la vEloj ŝvElas

PupIloj viaj tAmen albrIlis, divenAtaj

La vIbraj violOnoj post mOntoj moldeklIvaj (K)

Sufiĉos tiuj kelkaj analizoj por montri la sekvotan vojon: ili pruvos ankaŭ, mi esperas, ke nia esp-a poezio penvaloras ne nur supraĵan k neglektan tralegadon, sed ja la studon k kritikan esploron.

»Ĉu ne inde aniĝi? Ĉu oni ne povas esperi, ke tiel oni tranagos la krizon? Nia ŝipo certe estas bone ekipita, havas elektitajn ŝipanojn, prenis bonan direkton...«

»Bone, bone —« mi diras nerveze, »Sed se oni ne havas eĉ kvin centimojn tage?«

»Hallo! la dua triminuto pasis!« malagrablas ree la mistera voĉo.

»Ankoraŭ tri!« mi insistas kiel ebrulo, kiu mendas la trian botelon.

»Jes, ankoraŭ tri!« ehas alia drinkemulo ĉe la transa fino de la drato. »Kion vi diris? Se oni ne havas«

»— se oni ne havas tiujn 5 centimojn!«

»Kiujn centimojn?«

»Nu tiujn diablajn 5 centimojn tage por esti membro de AELA?!...« mi krias ekscitite, ĉar mi volas elprofiti la lastajn tri minutojn.

»Nu, povas ja kuniĝi du personoj po 2.5 centimoj tage, aŭ tri personoj po 1.66 centimoj, ili povas kune legi kaj poste inter si dividi aŭ lotumi la librojn.«

»Mi komprenas.«

»Tial ankoraŭ la programo estas tiel varia! Ĉiu trovos konvenan verkon por si! Jam la 640 paĝa interesega Enciklopedio de Esperanto valoras pli, ol la tuta sumo, kiun oni pagas por ĉiuj libroj!«

»Bone, bone, bonege!«

»Kion bezonas Esperanto? Librojn! Pli ol iam ajn! Por la lingvo, por la movado, por la verkistoj! Librojn, por kiuj estas inde lerni la lingvon!« ekscitiĝas la voĉo ĉe la transa fino de la drato. »Ni povus diri sen fanfarono: entrepreno tiel grava kaj utila por nia lingvo kaj movado, ke ĉiu esperantisto devas ĝin subteni! Sed ni tute ne volas voki al ia »esperantista oferemo«, kiun ni tre alte taksas, sed je kiu ni jam delonge ĉesis kalkuli.

Prefere ni povus diri, ke ni ne volas ricevi donacon, ni volas doni donacon. Sed ankaŭ tion ni ne diras.«

»Momenton, haltu, ankoraŭ unu demandon!« mi krias.

»Ĉi tie ne temas pri donaco, sed pri ambaŭflanka reciproka gajno, sur la bazo de prudenta kaj reala kalkulado.«

»Unu gravan demandon: kiel vi imagas al vi la aferon kun la verkista...«

»Ni konstruas aerkastelon el ŝtono kaj ŝtalo kaj invitas logi la esperantistojn por la plej malalta luprezto!...«

»Haltu, poeto! Nur unu demando: la verkista honorario?!«

»Tri minutoj pasis!« krias la Fata Voĉo.

»Ĝis revido en Parizo!« la alia.

»He, he, hallo, ĉu la honorario same estos kvinonigata??...«

Responde la telefono sonoris en miajn orelojn kaj eĉe ripetiĝas la bela frazo »Ni konstruas aerkastelon el ŝtono kaj ŝtalo kaj invitas logi la Esperantistojn por la plej malalta luprezto...«

... Post unu horo alvenis telegramo. Mi ŝire malfermis ĝin. Miaj manoj tremis, kiam mi legis la tekston:

1000 membroj por AELA jam alighis stop malgrau prezredukto ni decidis duobligi verkistan honoraron

L. M.

Post tiu ĉi telegramo mi estis kortuŝita. En tiu ĉi momento mi konfesis, ke tiu ĉi AELA estas la plej mistera organizajo de Esperantujo, ke ĝi estas la plej grandioza entrepreno de la dudeka jarcento...!

Jean Forge.

MIA ANGULO

— JULIO BAGHY —

En Varsovio

Varsovio... Dense neĝas. La senfortiĝinta vintro faras ligon kun la marta vento por ĵeti sian koleron al niaj vangoj. La moderna pilgrimanto rifuĝas en la elektran veturilon kaj tiel proksimiĝas al la tombejo, en kiu ripozas postlasita korpo de koro, vivanta eĉ nun inter ni. La batetado de tiu ĉi nevidebla koro estas la sola, kio muzikas pri espero en la hodiaŭa renversita mondo. La profunde sincera kredo de tiu ĉi koro lulas mian animon en piecon... La unuan fojon antaŭ 22 jaroj mi ekaŭdis ĝian vokan voĉon. Tiom da konvinka fido estis en ĝia voĉo, ke mia revpelanta juneco memvole fariĝis ĝia sklavo. La sorĉan melodion de tiu ĉi koro mi aŭskultis kun la entuziasmo de la dudekjaruloj... ĝia voĉo resonis en mia animo dum la mortvoma tondrado de la kanonoj, ĝia kredo kuraĝigis min dum la animuelaj jaroj de longa militkaptiteco kaj la melodioj de tiu ĉi koro karesas nun mian homan vivon, ŝiritan kaj ĉifonitan, dum mi rigardas rigide senlarne en la haoson, en kiu baraktas mia tuta familio: la homaro.

Varsovio... La pordego de la juda tombejo oscedas al ni. En mia animo tremetas emocio. Mi preferus esti sola. Mi dezirus plori, ploregi. Mi volus envortigi la revojn kaj senluziigojn de dudekdu jaroj kaj malfermi mian tutan animon antaŭ la tombo, en kiu kuŝas polviĝanta, malvarma korpo... Majstro, mia amata Majstro, pardonu al mi la mutecon de miaj lipoj. Ĉio kaj ĉiu ĝenas min ĉirkaŭ via tombo... El inter la tomboŝtonoj la impostprenantoj de la pio kaj pietato, la pagataj kaj dungeblaj preĝantoj fiksas sian malsatan rigardon al mi. Ho, kiel dolore! Ĉu fremda buŝo povus diri tion, kion mi sentas ĉe via tombo? Ĉu ekzistas tia elokventa pre-

ĝanto, kiu povus doni flugilojn al miaj pensoj? Tia ne ekzistas, mia vivantkora Majstro.

Pardonu al mi, ke mi venis kun malplenaj manoj, ke miaj lipoj ne murmuras preĝon, ke miaj okuloj senlarne fiksiĝas al via tomboŝtono, ke starante en la densa neĝado mi pensas pri tio, ke tamen estus bone kaj dece dungi unu el la spionantaj preĝistoj... ho, ne pro la preĝo mem, sed pro tiu peceto da pano, kiun li povos aĉeti per la groŝoj. La mizerplugita vizaĝo de la Vivo subpremas la pian emocion kaj ekveas en mi la Homo, tiu homo, kiun antaŭ 22 jaroj vekis el dormo la espermuzika melodio de via koro.

Majstro, mi hontas pri mia muteco ĉe via tombo. Ho, kiel mi dezirus preĝi al la Mistera Forto. Jes, preĝi, sed ne kredperdinte, ne kun mortinta espero en mia animo. Mi dezirus preĝi tiel, kiel antaŭ longaj jaroj, kiam por mi la Homo estis promeso kaj ne ruiniginta prudento. Mi ne povas preĝi, Majstro. La infana kredo mortis en mi kaj la scio donis nenion.

Mi ne preĝas. La danko de mia animo senvorte, senlarne, sed kun neforŝirebla amo ĉirkaŭprenas vian tombon. En tiu ĉi ĉirkaŭprenado enestas, vivas varmo de tiu fajro, kiun la dolĉa melodio de via koro pri la homa Homo flagrigis en mi. El la iama flagranta fajro restis nur fajrero, sed ĝin mi povas danki sole al vi. Ĉe tiu ĉi palpebrumanta fajrero mi varmigas mian frostotremantan animon, la vivon de tiu ĉi fajrero mi nutras kaj el ties varmo mi donas al tiuj, kiuj malvarmas, tremas pro frosto dum la vintro de la Vivo. Kaj mi ne estas sola. Hodiaŭ jam centmiloj da flagrantaj kormeĝoj brulas kaj lumas kaj ĉiu ricevis sian lumon, sian varmon de via koro. Majstro mia, mi dankas al vi ĉi tiun lumon je la nomo de tiuj, kiuj venos post ni kaj kiuj vidos tion, kion sole vi vidis en via profeta inspiriteco... Ripozu pace post laboro. La semajo jam ekfloriĝis kaj promesas abundan rikolton.

Varsovio... La filinoj de la Majstro honoris min kaj ili malfermis la pordon de la memorajoj antaŭ mi. Mia rigardo reve migras sur iliaj trajtoj. Ĉe kies vizaĝo respeguligas lia milda miemo? Mi atentis pri la voĉo de la orfinoj. En la voĉo vibras la ritmo de animo. Al kiu el ili la sorto donacis pli el la patraj riĉaĵoj? Neeble sciŝi. Ili ambaŭ estas egale komplezemaj kaj egale modestaj. Nur en la temperamentoj estas diferenco. Sajnas at mi, ke la pli juna, f-ino Lidja Zamenhof, havas pli reveman naturon kaj en ŝi viglas pli la batalo por belaj ideoj, ol en ŝia fratino Sofia, kiu impresas kiel la ekvilibrita boneco kaj mastrina zorgemo. Senceremonie, senpoze ili montras al mi sian hejmon kaj ilia parolo ne havas eĉ nuancon de ia oficiala patoso, kiam ili klarigas, informas pri la postlasitaj objektoj de ilia patro. Kvazaŭ ili ne estus liaj filinoj. Jen, jen! Guste tiu ĉi spontaneeco provas, ke en ili ambaŭ vivas plu la patra animo. Karaj, varmkoraj samideaninoj, kiuj ĉiujminute rememorigas pri la modesteco de la Majstro: »Mi ne estas majstro, sed egalranga batalanto de la ideo.«

Sed mi... mi fariĝas sklavo de la impreso, kiun la vido de la memorajoj vekas en mi. Mia rigardo longe ripozas sur la skribotablo, sur kiu pretiĝis je vivo nia lingvo kaj mi karesas la klavaron de la malnova skribmaŝino, super kiu laborante klinis la foririnto. Por longa momento haltigas min la kolorperdinta kanapo, sur kiu lia laca koro fordormis. Medaloj, insignoj, memorobjektoj, diplomoj kaj riĉa biblioteko de la Majstro donas ian muzean atmosferon al la loĝejo.

Mi dezirus vidi lian manskribon kaj... kaj dank'al la komplezemo de la du fratinoj mi vidis tiajn manuskriptojn de Zamenhof, pri kies ekzisto tre malmultaj scias. Mi petas permeson por kopii kelkajn liniojn el ili. Volonte ili plenumas mian deziron kaj ion emociite mi foliumadas.

Jen kajero. Mi legas: Lingvo universala f. e. gramatiko e verbio laul trema ridakco del anno 1881, Varsovo (Kajpassa i Augusto del anno 1881.)

Jen plena gramatiko kun vertaro kaj ekzercoj, kun kelkaj tradukoj. Ne multaj scias pri tiu ĉi lingvoprojekto. Ni scias nur pri Lingvo Universale, kies naskiĝon festis la junaj gimnazianoj en 1878 kaj pri la nuna Lingvo Internacia. Dum la unua reforma periodo Zamenhof faris novan projekton, kiu feliĉe malaperis post la publikigo de la specimena teksto. Tre verŝajne, ĝi eĉ ne estis plene prilaborita. Sed nun antaŭ mi kuŝas kompleta gramatiko, pri kies ekzisto mi ne sciis.

Mi foliumadas. Kelkaj linioj de rakonto, bone konata en nia lingvo, proponas sin por kopio: La umbo (Esp. La ombro)

»Il kalaj guroj la ŝemmo rajiŝe alia prekalto el di no. La homoj faktidzé tute buraj, e il plej kalaj guroj po eĉ (jenaj vortoj trastrekita): de prek bruliga) ŝtel bruligado del ŝemmo faktidzé negroj...«

Mi foliumadas plu. Jen tre konata poemo de Heine. Mi kopias la tuton laŭ la originala ortografio.

BALLADDO

(He Heine)

redzidaŭ (Tiu ĉi vorto trastrekite)

Mo bella princino il onto vidá
Ko zuoj malseŝaj e palaj
Sul dillo, sul verda no koe sidá
Il armoj amizaj e kalaj.

»La kron' de ta padro fio pu mo esté,
La ora, la redza ra sello!
La skepro diantiza, — rol mo ne volé,
Tol mem koj volé mo, ma bella«

»Fo et ne estebla, ŝo pallu a mo
Kor et i la tomo kuŝe mo
E koj i la nokto vioné mo a to,
Kor tol fe prekale amé mo!«

He m z a

Jen titolo de alia dika kajero: 1881. Verbozo Russa — universala. Mia rigardo avide kuras sur la linioj de postlasita, sed neniam komunikita letero. Ĝia titolo: Pri la »novaj vortoj« Nefermita letero al unu amiko. La propramana malpermeso de Zamenhof enpoŝigas mian fontanplumon. Perkraĵone li skribis sur la unuan paŝon: Ne publikigota.

Pro la neforgeseble bela horo mi esprimas dankon al la du fratinoj kaj adiaŭinte mi ekiras al la hejmo de s-ro Feliks Zamenhof, al la frato de la Majstro. Lia gastamo donis afable al mi ripozejon por la du tagoj, kiujn mi intencis pesigi en la urbo.

Varsovio... Sola mi vagadas tra la stratoj de la malnova kvartalo. Parto de la historia pasinteco reviviĝas en mia fantazio... Vigle, gaje tintades la sonoriloj de la elektraj veturiloj... Jen bela vasta parko. La brua trafiko de la liberiginta pola ĉefurbo distras min. La pensoj silentas en mi... Iu esperantlingve salutas min kaj petas informojn. Estus travojaĝanta germano. Li interesiĝas pri la loko de la tombejo, kie Zamenhof ripozas. La saman tagon li vojaĝas pro komercoj af-roj al Rigas.

Li foriras kaj en mia kapo venas penso: kiom centoj da eksterlandaj gesamideanoj vizitis jam ĉi tiun urbon, kiom malmulte da ili havis la okazon vidi la relikvojn de la komenco, la relikvojn, kiujn nur la filina amo gardas hodiaŭ por la esperantista mondo. Tiaj ĉi relikvoj havas ja inspiran forton. Estus pli dece, se ili estus videblaj por ĉiu. Estus bone havi, sur iu placo de Varsovio, Zamenhof-Domon, modestan muzeon. Tio estus la plej bela Zamenhof-monumento. La vojaĝanto kun respekto, la pilgrimanto kun profunda emocio povus paŝadi en la laborĉambro, instalita laŭ historia fideleco. Li povus admiri la riĉan bibliotekon, la centojn da memorobjektoj, la elmodiĝintan skribmaŝinon, kiu donis flugilojn al tiom da idealaj pensoj, la malnovajn manuskriptojn, per kiu la plej idealista praktikulo semis pacamon, komprenon en la homajn korojn ĉie en la mondo.

Zamenhof-domo en Varsovio. La efektiviĝo de la ideo ne estus tiel malfacila kiel oni pensas. La urbo mem povas esti nur fiera pri la homo, kiu kun sankta entuziasmo kaj spitante al la tuta armo de skeptikuloj kaj mokenuloj komencis fari sian pioniran laboron kaj kiu sukcesis ne sole montri, sed finfari novan vojon por la kulturspiraj homoj. La urbo Varsovio povus ne sole protekti, sed eĉ iniciati la planon, kiu vekus ĝeneralan simpatian en ĉiu lando de la tero. Per la honorigo de Zamenhof la urbo Varsovio honorus ankaŭ sin mem. Ĝi starigus muzeovaloran monumenton por tiu filo de la pola lando, kies ideo kaj laboro donacis tiun frukton al la homaro, kiu vekis la admiron kaj respekton en ĉiu nacio. Esperanto estas tiu admirata produktis floro, kiun la humo, saturita de larmoj kaj sango, de la iama mal-libera Polujo. La urbo Varsovio mem povus efektiviĝi ĝin per donaca gesto kaj la monumentstariga amo de la la tutmonda esperantistaro zorgus pri la inda eksterajo, sed... Ho, kiom da »sed« krozas en la huoso de la hodiaŭo! En ĝi ĉio havas sian eblecon, nur ne la danku pietato, kiu deziras honori la Homon en la homo... Tamen iam alvenos la tempo, kiam pri la relikvoj kaj pri la homo — pri kiuj kun distingita respekto pensas centmiloj sur la tero — ankaŭ liaj propraj sampatrujanoj estos fieraj... Ni atendu la tagiĝon de la homa komprenemo.

D I S K U T O

Korekto de korekto

La lasta numero de Literatura Mondo ĝojigis min per agrabla plezuro kaj pligrandigis la modestan trezoraron de mia scio; mi eksciis, ke lerta aŭtoro povas trovi rimon eĉ por mia malfacile elparolebla nomo, kiu cetere

ne estas tro inda por la rimigo. Do, unue mi sendas amikan dankon al s-ano Nekrasov, kiu bonvolis dediĉi al mia modesta persono plurajn versojn en sia vere ne ordinare bela, majstra poemo, aperinta en la lasta numero de L. M. kun la titolo: Letero al Leo Belmont. Nun mi petas lin, bonvole akceptu mian amikan kaj afablan manpremon pro la bela poemo, kies kelkaj partoj nur el personaj vidpunktoj ne gajnis mian plaĉon.

Samtempe mi devas respondi al s-ano Leo Belmont, kiu protestas kontraŭ mia recenzo, aperinta en la Literatura Mondo. (1931. N-ro 10.)

Por ke mi pruvu, ke mia recenzo ne subtaksis tiun heroan laboron kaj la rezulton kiun la verko de s-ano Nekrasov signifas, mi citas nur mallongajn frazojn el la recenzo:

»Lia rimtrova preteco estas granda, lia teknika aparato estas preskaŭ perfekta. Kaj admirindaj estas liaj kuraĝo kaj persisto... Malgraŭ ĉiuj miaj riproĉoj mi rigardas la tradukinton eminenta lertulo de la Esperanta verso ktp. ktp.

Mi tute malfacile povas kompreni kiamaniere oni povas paroli pri »grava ofendo« koncerne recenzon, kiu enhavas tiajn frazojn. Aliflanke estas faktoj, nome: mi rimarkis, ke la traduko tamen ne kontentigas ĉiam mian poezian senton kaj se mi estus erarinta, nun mi konfesus volonte mian kulpon, ĉar nenio estas pli malproksima de mia naturo, ol senmotive kaŭzi doloron al tiaj personoj, kiuj multfoje pruvis sian eminentan talenton, eĉ se ili loĝas en ŝtato, kies bazo ne estas kapitalismo. (Pri tiu ĉi temo poste.) Mia kritiko neniam intencas bruligi, sekigi, dezertigi la humon, mia celo estas ĉiam fekundigi ĝin. S-ano Belmont konstatas, ke ekzistas nur du plenaj tradukoj de Onegin, »kiuj transdonas la tutan gracion, tutan ĉarmon, tutan lertecon de la strofo Onegina, konservanta la melodion de la originalo: »lia traduko pola kaj la esperanta de Nekrasov. Plezure mi sciigas al s-ro Belmont, ke ekzistas ankoraŭ traduko, kun la samaj eminentaj kvalitoj, en la hungara lingvo, kiun mi povas plenrajte aserti laŭ la opinioj de aŭtoritatoj komprenantaj ankaŭ la rusan, ankaŭ la hungaran lingvon kaj plenrajte mi povas aserti ĝin pro tio, ĉar ne temas pri mia propra traduko. (Bedaŭrinde!)

Sed nun mi devas paroli pri la diferenco, ekzistanta inter la hungara traduko kaj la esperanta interpreto. La hungara Anjegin estas ĉie same legebla kaj ĝuebla, eĉ finlegebla dum unu sido, — la Esperanto — ne. La facila, *reala*, tute natura lingvo de la hungara traduko estas ĝenerale pli memkomprenebla legaĵo, ol la Esperanta, kiun oni povas kelkloke kompreni nur malfacile kaj ne samnomente; la lingvo de la Esperanta traduko montras la serĉadon de grandtalenta homo, kies vojo gvidas supren kaj se mi atentigis lin pri la mankoj, kiuj laŭ mi ekzistas, ne pensu s-ano Nekrasov, ke min direktas ia nigra sento, eĉ... Nun estus facile al mi, citadi partojn de la traduko por konvinki la publikon, ke la traduko ne estas bona, sed tiam mi estus blinda, aŭ malhonesta, ĉar vere s-ano Nekrasov, la supreniranta, talenta verkisto, ne tion meritas kaj ne tion ricevis de mi. Mi devas konstati, ke mi mem spertis jam en mia vivo, ke kritiko puŝis, aŭ puŝetis mian sentemon, aŭ almenaŭ tion mi konstatis dolore, ke oni indiferece preterpasis miajn plej elinternajn bildojn. (inter miaj lastaj noveloj, estis kelkaj, pri kiuj mi pensis, ke oni prikomprenos ilin; tamen, malgraŭ la ĝenerale belaj recenzoj, neniu rimarkis ilin.) Tamen mi ne povas ribeli kontraŭ la kritiko, ĉar mi scias, ke mi devas atendi la maturiĝon de mia propra *kritiko*. Kial mi parolas pri mi mem?

Ankaŭ tio havas motivon. S-ano Nekrasov vidas en mi rigidokulan boacon, kiu volonte manĝus ĉiutage rusajn ŝtatanojn. La pensasociacio venigis al mi miajn novelojn kaj fabelojn, kiuj ĝenerale estas larmoj pro kaj por tiuj homoj, kies mizero estas la plej granda doloro de mia vivo. S-ano Nekrasov akuzas min en sia poemo pri etburĝeco (certe li ne intencis flati min), pri politika malobjektiveco kaj resume pri stulteco. Mi ne povas koleri, ĉar mi estas pli komprenema homo, ol li kaj mi sendas amikan manpremon kaj koran gratulon al li, ĉar li asertis per lia belega poemo, ke la esperoj, pri kiuj mi parolis en mia atakita recenzo, jam realiĝas kaj kun tiuj strofoj, kiuj koncentras la difektojn de mia modesta persono, — malgraŭ ĉiu homa vanteco, — mi ĉiam ŝatos tiun ĉi fenomenon de la sincera sento. Mi petas s-anon Nekrasov, kreu al mi, ke en mia mano, neniam dum mia vivo estis venenita ponardo. Kaj tial mi bonvole avertas lin, ke per tio, ke li nomis min Zoilo, li donis al mi ege tentan okazon, diri, ke li ne estas Homero. Tio tamen ne signifas, ke li ne estas talenta tradukisto.

Francisko Szilágyi.



OBSERVO

Opinio de JULES ROMAÏNS pri Esperanto:

Miaj multaj vojaĝoj en diversaj landoj min konvinkis pri la neceso de internacia artefarita lingvo, speciale kreita por tiu celo.

Mi kredas, ke Esperanto havas ĉiujn kvalitojn kiujn bezonas tia lingvo.

Mi kredas, ke la registaroj helpus al interkompreniĝo de popoloj kaj al la tutmonda paco, se ili enkondukas devige Esperanton en ĉiujn lernejojn, kondiĉe ke la necesaj horoj estu prenataj ne el la studo de vivantaj aŭ klasikaj lingvoj, sed EL TIU DE LA NACIA HISTORIO.

P. YSERN-ALIÉ

Klasifiki artiston, jen facila afero. Oni malfermas la keston de la etiketoj, eltiras unu el ili kaj fiksas ĝin apud lia nomo. Sed tio estas danĝera, se oni volas esti justa. Tiel danĝera kiel, en tiu ĉi okazo, diri »Ysern estas hispana«. Ĉar tia klasifiko en unu rason elvokas imagon pri la klasikaj pentristoj de lia lando kaj situigas lin sur la paŝvojo de ilia skolo-, vero relativa nur tra la italaj kaj francaj skoloj en kiuj Ysern perfektigis siajn studojn.

La vera klasifiko de artisto estas, kiu situigas lin en lian nomon, en lian propran personecon. Vere ĝi estas la sola, kiu povas interesi nin kaj meriti la penon ĝin atingi.

Ysern estas Ysern; liaj verkoj estas »ysernaj«. Ĉu li pentras francajn dancistinojn, ĉu pejzaĝojn de sia lando, li ne bezonas subskribi. Lia subskribo troviĝas en ĉiu tuŝo de la penikoj.

En liaj verkoj, la temo, kiun objektivite tamen li respektas, estas la malpli grava afero. La vera grava afero por li estas la lumo, la koloro. Ysern vivas por kaj pro la koloro. Li estas koloristo.

Multaj jaroj jam fluis, ve! Ni estis tre junaj. Okaze ni troviĝis en la for kaj alfluo de ondoj de popola brua demonstracio. Noktis, pluvus, la lumaj anoncioj briladis

sur la malseka tero kaj sur la profiloj de la malsekaj trakriantoj. La polico atakis. Mi memoras ke mi ege kuris kun aliaj amikoj, kiuj ne forlasis min en tiu glora, kvazaŭ Olimpa provo. Kiam ni atingis lokon, kiu ŝajnis al ni sufiĉe malproksima de la batoj, ni haltis. Sed Ysern ne estis kun ni. Kiam ree ni lin renkontis kaj intencis gratuli lin pro lia kuraĝo, li diris, ankoraŭ iom pala:

— »Ne, ne gratulu min; mi sufiĉe timis, sed la koloro de la spektaklo estis tiel bela ke mi tute ne povis forkuri.«

En la katalunaj pejzaĝoj, la majstro atingas nekompareblan perfektecon. En la katalunaj pejzaĝoj, kaj en tiuj de la insulo Majorko, kiu pro lingvo, gento kaj koloro estas peco de Katalunujo, riĉa ŝtono alŝirita el Pirineo kaj fiksita en la blua juvelo de Nia Maro.

En la hispana pentrista movado, Ysern estas figuro perfekte limigita kaj aparta.

Ysern, laŭ propra naturo tre malparolema, konas perfekte kvar lingvojn lernitajn dum siaj vojaĝoj de studo tra la mondo; li estas entuziasma partiano de lingvo internacia kaj akiris ekkonojn de Esperanto ĉe unu el miaj kursoj. Plurfoje li ĉeestis kunvenojn de la pariza Grupo.

Se muziko estas arto por blinduloj, pentrado estas arto de mutuloj. Rubens eĉ estis diplomato, ĉar diplomatio estas la arto nenion diri. Tio klarigas, kial diplomatoj iradas senĝene tra la diverseco de lingvoj kaj ne premas ilin la bezono de lingvo internacia. Nenio estas pli internacia ol diri nenion!

Car Ysern estas malmulte parolema kaj plie li estas pentristo, lia entuziasmo por Esperanto fariĝas eĉ pli laŭdinda.

Se li estus verkisto kaj manipulus la lingvon internacian kiel la kolorojn, kiajn belajn kaj originalajn verkojn li povus al ni doni! Fred Pujula.

EKSPOZICIO en la Salon dr Tuilleries estas fama en la tuta mondo. Estas revo de ĉiu eksterlanda pentristo eniri ĝin. Povi enpenetri kaj — pendigi tie sian bildon. Siatempe vere nur majstroverko povis sukcesi ricevi la necesan permeson post serioza studo. La lastajn jarojn enfiltris ankaŭ mezbonaj talentoj; Sed ĉu simile ne okazas en la plej aristokrataj proletaj salonoj? Ankaŭ tie oni ofte vidas vizaĝojn, kiuj ne devus tie troviĝi.

Ci-jare 600 nomoj kun 2000 bildoj prezentigis antaŭ la publiko. La skulptaro estas bone reprezentita. Jen Marmoro de *Paut Manaut*; el bildoj ni notu: bona nudulino de *Eisenschütz*, nudulino sur sablo de *Kvapil*; multe da nudaĵo ĉi-jare, certe sub influo de la krizo... Jen simpatiaj skizoj kaj provincaj pejzaĝoj de Darel. Roland Oudot reprenas la eternan temon de »afrodito«; li iluminis la scenon per preciza kaj fantazia lumajo, kvazaŭ revon de interplaneda balo. La dimanĉaj ciklistoj de *Labat* estas valora bildo kaj bone subrigardis la dimanĉan kutimon, kiu cetere ĉie estas simila, eĉ tie, kie oni ne »ciklas«, nur — piediras man' en mano... *Takanori O-gniss* montras al ni kun gusto kaj kun simpatio malmovajn domaĉojn, kiuj en lia prezento fariĝas interesaj dometoj. S. G. K.

JAMES JOYCE KAJ LIA »DUBLINERS.«

Eksterordinare grandaj verkistoj kunportas sian apartan lingvon. Vortoj, kiuj perdis ĉiun vigecon de vivo, vortoj paliĝintaj, verkintaj subite ricevas novan aromon, novan kolorigon en iliaj libroj, ilia malnova senco ricevas alian perspektivon profundigitan de l' nova nuanco. La historio de la lingvoj konsistas el senĉesaj rigidigoj, ŝtonigoj kaj senĉesaj renaskigoj: ĉiu literatura genio estas samtempe lingva genio.

La horizonto de la angla lingvo atingis mondanpleksan perspektivon: ĝi ludas gvidan rolon de la norda poluso ĝis Cap Horn, en ĉiuj mondpartoj. Tiun ĉi spiritan imperion tute ne influas eventualaj krizoj de la

politika imperio: kiel la latina lingvo restis interkroĉiga komprenilo ankaŭ post la disfalo de l' romano imperio, tiel post eventuala atomizigo de Granda Britlando ankaŭ la angla lingvo vivus sur tiu ĉi giganta teritorio ankoraŭ longtempe, ĝis fine la dialektigo mortigus ĝin. Kaj estas interesa fenomeno, ke dum plena florado de tia mondlingvo fremduloj transprenas la kulton de la lingvo. Tiel okazis ĉe la latina kaj ankaŭ ĉe la angla, kies modernaj plej grandaj majstroj estas la skota Walter Scott kaj Shaw, la hebrea Disraeli, la kelta Wells, la pola Joseph Conrad, la armena Michael Arlen, la malpursangaj amerikanoj kaj la irlandaj James Joyce. Tiuj ĉi fremddevenaj verkistoj donis al la angla lingvo sian nekredeblan flekseblecon, espriman forton, universecon. Kaj de Shakespeare la angla lingvo ne havis tian produktivan revolucion, kia la dublina James Joyce.

Joyce kreis tute novan anglan lingvon, nun ankoraŭ fremdecan, nun ankoraŭ mokatan. Nun oni eldonas vortadon, ĉiun intelektan profundon de tiuj ĉi lingvoj li parolas kaj skribas dekok lingvojn: ĉiun sentimentan vortadon, ĉiun intelektan profundon de tiuj ĉi lingvoj li akumulis en siaj libroj, por ke li direktu la internan okulon de la leganto en profundojn ĝis nun neimageblajn de pensoj, intuicioj kaj konjektoj.

Joyce estas revolucio ne nur en la lingvo, sed ankaŭ en sia originala verkista vidmaniero. Kion novan li portis ĉi rilate? Oni povus respondi proksimume jene: Joyce portis la atomizon, la dispolvigon de eventoj, frazoj, pensoj, sentoj, vortoj kaj per tio li kreis tute novan *humoran* literaturan valoron. Sed kompreneble tiu ĉi frazo diras same nenion pri li, kiel oni vane volas karakterizi lian stilon al iu, kiu ne legis liajn librojn. Prefere ni vidu la temojn de lia unua proza verko, de la »Dubliners«, kiu ankoraŭ nur ĝerme montras la pli postan reformatoron, la Joyce-komencanto nepre ĝin devas unue legi, por ke li povu aliri liajn Ulysses kaj Work in progress.

Tiu ĉi volumo estas kolekto de dekkvin noveloj. Miniaturportretoj: la freneza pastro inter siaj fratinoj; la nekonata *flagelanta* viro inter la studentoj; la senespera unua amo de la studento al rajdistino; en malluna cirko, post la fermhoru; la orfino ĉenita al sia trista hejmo, kiu en la lasta momento ne kuraĝas riski la fuĝon, la kartludo de kvar diversrasaj junuloj; la ĵurnalisto, kiu kovas poetajn sonĝojn, kaj kiun ĉiam rekaptas la prozo de l' vivo; la senkora oficestro, kiu en sia hejmo elsprucas sian furoron; la bonmorala homo, kiu pro nura moralo rifuzas la amon de edziniĝinta virino, post kio la virino kutimiĝas al drinkado; la historio de kristnaska vespero, dum kiu la okazaĵoj ere forfalas antaŭ niaj okuloj kiel la petaloj de l' rozo, ĝis fine aperas la nostalgia memoro de la unua, kaŝita amo de l' edzino, kiun ŝi ankoraŭ ne konfesis al sia edzo, nun ŝi konfesas, sed la konfeso finiĝas per simmortigo... k. t. p.

La unua eldono de la »Dubliners« kaŭzis grandan sensacion: nekonatulo aĉetis ĉiujn ekzemplerojn de la libro kaj bruligis ilin, nur unu li sendis al la aŭtoro! Nu, la indigno de la dublinanoj estis iom komprenebla: Dublin estas malgranda urbo, kie ĉiu povis nomi tiun aŭ alian figuron, kiun la verkisto pripentris en sia libro. Car Joyce faris jenon: li priskribis, kion li vidis, per la plej kruela homkarakterizado de la naturalista skolo, kvankam jam en tiu ĉi libro sin anoncas la transsubstanciga kapablo de la pli posta Joyce, per kiu li projekcias en la senfinon kaj distilas je eternaj homaj nekvalifikeblaj la etajn malpuraĵojn de la ĉiutaga vivo.

Post la apero de la libro Joyce ne povis plu resti en Dublin. Li devis elmigri, komence li loĝis en Pola, Trieste, poste en Parizo. Nun li estas 50 jara, preskaŭ blinda. Louis Brun.

GEORG KAISER: ES IST GENUG! (SUFICE!) La artisto de malvastaj vortoj, duvortaj frazoj kaj rapide ekbrilantaj dialogoj, kiu montris al ni, kiel estas eble sur duco da loko esprimi duoblon, tiu ĉi artisto nun verkis

regulan romanon. Romanon, kies amplekso estas tricent kvardek kvin paĝoj, dense plenpresitaj.

La tuta romano estas monologo. *Isa*, la amata edzino, subite mortas. Restas la edzo kaj la kvinjara filineto, *Doris*. La edzo furoras kaj sin konsumas. Sed subite li ekatentas: en la voĉo de sia filineto li opinias rekonii la voĉon de l' edzino. Li ekhavas fantazian penson: la edzino ne mortis, ŝi vivas plu en la filino. Li do amos *Isa'n* en la filino. Ĉi tio estas lia rajto, eĉ devo. Sed kiel? Post dek du jaroj *Doris* fariĝos fraŭlino. Tiam ili devos denove renkontiĝi. Sed jam ne kiel patro kaj filino. Sed kiel viro kaj virino.

Ĝis tiam li devos malaperi. Li ludos akcidenton: multaj pensas memmortigon. En alia parto de l' mondo, en la domo de malnova amiko li ekhejmas. Kaj malrapide pasas la dekdu jaroj. Alvenas la tago de l' hejmeniro. Ili renkontiĝas. *Doris* jam estas plenkreskinta knabino. Ŝi tute similas sian patrinon. Forta, ŝajne nekontraŭstar-ebla amo ekflagras inter ili. Post mallonga tempo ili jam fiksas la tagon de l' geedziĝo.

Sed... en *Doris* vivas subkonscia timo al la viro veninta el nekonata lando. Kaj tiu ĉi timo foje eksplodas el ŝi. Io flustras al ŝi, ke la viro jam havas edzinon. Kaj ŝi timas ke iun tagon aperos tiu ĉi alia virino, kaj tiu alia virino ne meritas, ke li estu malfidela...

Li rifuĝas, ree al la lando de glacioj. Kaj li sentas kaj scias, ke li transfalis grandan krizon de sia vivo dum tiuj ĉi tagoj. Sed li venkis. Li ne devas honti antaŭ la homoj, antaŭ la memoro de sia edzino — kaj antaŭ si mem.

Jen la enhavo de la unuaj kvindek kaj lastaj kvindek paĝoj. Inter ili la historio de la dek du jaroj, pasigitaj fremdlande, estas propre alia romano, multe pli seninteresa, ol la unua. Ĉar Kaiser ne scias — mi preskaŭ havas la senton ke li eĉ volas — porti la rolantojn de tiu ĉi dua historio pli proksimen al la leganto. Tiuj ĉi homoj ne interesas nin. Iu germana kritikisto skribis pri tiu ĉi romano, ke lias legi nur la komencon kaj finon. Nepre troigo kaj malpravo. Ĉar ankaŭ en la intera parto plurloke la stilo de Kaiser leviĝas en neverŝajnajn subtilaĵojn. Pri la mondo de l' glacioj mi ne vidis ĝis nun pli ĉarman fotografajon.

Ne estas grava la leĝo, kiam la vivo parolas, kiam la vivo postulas siajn rajtojn: la heroo komencas kun tiu ĉi penso sian dekdu jaran memvolan kapitecon. Kaj kiam fine li rekonas, ke tamen estis vana ĉio: kvazaŭ la vivo kapitulacis antaŭ la ordonoj, skulptitaj en ŝtonon, de la leĝo. Sed tiu ĉi kapitulaco estas nur ŝajna. Ĉar ĉe Kaiser ne estas venkinto kaj ne estas venkito. Kiam sub la efiko de la sinanoncantaj duboj de *Doris* la rekonsciiginta viro decidigas sin, ke li donas denove gravan turnon al sia vivo: propre oni ne povas paroli pri venko aŭ fiasko. La leĝo konsideras la ne deskribitajn regulojn de l' vivo, kaj la vivo rekonas, ke eĉ en la ŝajne kaprica senrilateco de ĝiaj epizodoj tenas ordon ia sistemeco sendependa de ĉio kaj de ĉiu.

Georg Kaiser jam atingis multe da laŭtaj laŭdoj kaj preskaŭ same tiom da bruaj kontraŭdiroj, dum sia dramverkista kariero. Ankaŭ tiu ĉi lia unua romano defiligos nun la duoblan armeon de liaj adeptoj kaj kontraŭuloj. Tamen tiom certas: la *Es ist genug!* estas kreaĵo de verkisto. Kaj eĉ de tia verkisto, kiu formas per certa mano ankaŭ la multe pli fleksiĝeman kaj flekseblan materion de l' romano.

K. B.

PRI LA TENDENCOJ DE MODERNA LITERATURO EN JAPANUJO. En la kadro de mallonga artikolo estas necble pritrakti la tutan kampon de literatura produktado en Japanujo. Sed ĉar la beletristiko bone esprimas la manifestiĝon de la nacia karaktero, ni flankenlasos filozofian kaj sciencan branĉojn ĉi tie. Ni ankaŭ devas flankenlasi la humoran literaturon pro la simpla kaŭzo, ke ĝi preskaŭ ne ekzistas en Japanujo — en la eŭropa senco. Ni ne devas kredi, ke Japanoj estas seriozegaj homoj, kiuj ne ŝatas ridadi. Kontraŭe, en nenia lando mi vidis tiom da gaja rideto kiel ĝuste en

Japanujo. Sed la fakto mem de ilia gajeco montras, ke ili bezonas malpli da arta gajigilo kaj turnas sin tute nature al la tragedio.

Post la limigo de nia esploro, ni konsideros unue la vulgaran literaturon. Ĝi aperas sur la paĝoj de ilustritaj gazetoj popularaj kaj sur ekranoj de provincaj kinemejoj. Detektivoj, aventuristoj, vojaĝistoj infektas la japanan popolan imagon tute same kiel en aliaj »civilizotaj« (jes, »O«) landoj per mikroboj de stulteco. Ni ne bezonas paroli pri tiu kategorio de skribaĵoj, oni jam bone konas ĝin eie. Sed apud tiu ĉi literaturo por kuiristinoj ekzistas en Japanujo la kategorio nomata »kengeki«. Ĝi konsistas el historiaj aventuraj rakontoj pri bataloj inter »samurai« (nobelaj soldatoj) kaj rabistoj. Sur milionoj da paĝoj da malmultekosta papero kaj sur miloj da ekranoj de kinemejoj aperas antaŭ la okuloj de entuziasmaj sekvantoj senfina serio de skermadoj. La heroo ĝenerale batalas sola, per nura ventumilo, kontraŭ amaso de banditoj armitaj de sabroj. Estas notinde, ke laŭ la tradicioj de japana kavaliroco, kontraŭ fiuloj nobelulo ne devas tiri la glavon. Li uzas en tia okazo feran ventumilon. Kvankam en la rakontoj la heroo eliras tiajn batalojn ĉiam senvundita kaj venkinta, oni ne devas kredi, ke ili estas pure imagita heroaĵo. Laŭ atesto de japana amiko eĉ hodiaŭ ekzistas personoj, kiuj tre lerte batalas per fera ventumilo kontraŭ glavoj. La popolo japana adoras glavojn kaj kiel oni scias la industrio de glavfarado estas la plej nobla en la lando. Tio klarigas la entuziasmon de »kengeki« legantoj... kaj rigardantoj.

En kinemejoj japanaj mi renkontis por la unua fojo »klariganton«, kiu sidanta apud la ekrano klarigas la okazaĵojn sur la filmo. Tio!-tekstoj ankaŭ estas projekciitaj, tute same kiel en Eŭropo, tamen klarigo estas samtempe donata. Tiu ĉi kutimo venas de la pasinteco, kiam al ĉiu persono sur la filmo korespondis parolanto apud la ekrano. Krom tio diversaj klarigistoj resumis la enhavon kaj instruon de la filmo antaŭ, meze kaj post la reprezentado. La nuna klarigisto estas restaĵo de tiuj personoj. Oni vidas do, ke en Japanujo la parolanta filmo ekzistas de la komenco.

Mi devas pardonpeti pro mia flankenreligo, sed mi kredas, ke kinematografo estas alia formo de literaturo kaj meritas specialan atenton. Nun ni venas al pli arta skolo de nacio-historiaj verkistoj, el kiu rimarkindaj estas Misou Naoki kaj Shin Hasegawa. La unua verkis tre valorenhan teatraĵon »Nankoku Taiheiki«, kiu temas pri la paca periodo de la Suda Provinco kaj priskribas tiun historian epokon kun rimarkinda fideleco.

La serioza literaturo respogas la psikologion de la nacio, kvankam la spegul-bildo estas malpli fidela ol la optika. Personeco de la aŭtoroj, limigiteco de la legantoj kaj temoj kaj multaj aliaj faktoroj deformas la bildon ricevitajn. Tamen, la sola rimedo por eksterulo ekkoni la nacion karakteron de iu lando estas studadi ĝian literaturon. Tio validas ankaŭ por Japanujo. La ĉefaj temoj de la modernaj romanoj estas la luktado inter moderna kaj tradicia mondkomprenoj kaj la mil problemoj de la seksa vivo. Pli ol en iu alia lando la unua temo estas grava en Japanujo. Oni bone scias, ke antaŭ estaro la lando estis hermetike fermita al la ekstera mondo. La enkonduko de okcidenta civilizo okazis laŭ dekreto de la fama Imperiestro Meiji kaj estis energie kaj rapide plenumata. Ĉar la Mezepoko estas nur cent jarojn malantaŭe, la konfliktoj estiĝantaj inter la junaj generacioj kaj la maljunaj estas multe pli akraj ol en Eŭropo. Rilate al la temoj de seksaj kompleksoj ni devas rimarki, ke la propra atmosfero de Japanujo estas multe pli kvietaj ol tiu de Eŭropo en tia rilato. Kvankam sub la influo de enportitaj ideoj la atmosfero fariĝas nuntempe pli kaj pli »freuda«, Keyserling, la fama germana filozofo deklaris (Vojaĝlibro de Filozofo) ke inter japanaj prostituinoj regas la sama trankvila kaj bona atmosfero kiel en burĝaj familioj de Eŭropo. Kaj li aldonas, ke la etoso de deca balo en Eŭropo estas neimageble malĉasta laŭ japanaj normoj... »La Kelnerino« de Kazuo Hirotsu estas ekzemplo de la enkonduko de seksaj temoj en Japanujon.

Ĝi temas pri la vivo de kelnerino, profesio kiu en Japanujo estas ofte ligata al prostituo. Ne nur pro la seksa intereso sed ankaŭ pro la fakto, ke por la unua fojo la vivo de ekstere laboranta virino estas traktata, la publiko avida legis tiun ĉi verkon.

Ne nur en Japanujo sed ĉie oni konstatas, ke la plejparto de literaturaj verkoj traktas la problemojn de mez- aĝaj personoj kaj gejunuloj. Oni ŝajne ignoras la aron de gemaljunuloj kaj ankaŭ la infanojn. Tio estas ĉar la verkistoj ĝenerale rememoras siajn proprajn problemojn de seksa sperto kaj ili ankaŭ bone scias, ke tiaj aferoj interesas la grandan nombron de la legantoj. Kia domaĝo tamen, ke la vivo de la pli aĝaj personoj restas nekonata kaj ankaŭ tiu de la infanoj restas neesplorata. Estas ja vere ke infana psikologio estas malfacila. Sed, ĉu malfacilaĵoj kaj komercaj konsideroj devas por ĉiam malhelpi la plivastigon de konoj? Bedaŭrinde ankaŭ en Japanujo oni konstatas la supre cititajn mankojn. La materialo jam ekzistas, sur la paĝoj de la ĉiutagaj ĵurnaloj ni legas mult tragediojn inter infanoj, sed la artisto, kiu ilin resumus en arta formo, ne ankoraŭ alvenis. Samkiel nia Julio Baghy traktis la problemojn de geadoleskuloj en »Printempo en Aŭtuno« la unua japana literaturisto, kiu utiligos la problemaron de geinfanoj, akiras certe grandan famon...

Nun ni venas al moderna poezio. Antaŭ ĉio ni devas mencii la produktadon de mallongaj poemoj, karakterizaj por Japanujo. Tiujn 31 silabajn poemojn oni nomas *waka* kaj pli moderne *tanka* kaj ili reprezentas la maksimumon de enhavo en minimuma amplekso. La plej lertaj modernaj kulturantoj de tiu ĉi skolo estas S-roj Onisabro Deguĉi kaj Jaso Saijo.

Kvankam ekzistas granda aro de bonaj libroj verkitaĵ de »proletaj« aŭtoroj, ni povas flankenlasi ilin en tiu ĉi artikolo, ĉar ili estas en la servo de specialaj, nome »klasbatalaj« ideoj. Ili ne zorgas pri analizo de karaktero, pri konfliktoj de sentimentoj kaj pri delikataj priskriboj. Forjetante la konvenciojn de literaturo por klasbatalaj motivoj, la plejparte intelektulaj gvidantoj de proleta literaturo metas sin ekster la teritorio de ĝenerala literatura kritiko.

Nur kelkajn vortojn nun pri la evoluo de la japana literatura lingvo. Oni bone scias, ke ekzistas grandega diferenco inter la parolata kaj inter la skribata lingvoj en Japanujo. Preskaŭ temas tie ĉi pri du apartaj lingvoj, en la senco de la itala kaj franca ekzemple. Ĝenerale oni konstatas simpligon de la stilo en popularaj ĵurnaloj kaj libroj. Ne nur ili uzas malpli da ĉinaj ideografoj ol antaŭe sed ankaŭ klarigas la signifon de multaj el ili per apudmetitaj notoj en »hiragana« (alfabeta sistemo). Tamen, en la altklasaj verkoj kaj ĵurnaloj, tiaj klarigaj signoj mankas. Bedaŭrinde la »Romaji« movado ne faras kontentigajn progresojn kaj apud la kelkaj miloj de ĉinaj ĝenerale uzataj oni ankaŭ utiligas du sistemojn de alfabeto skribado: »katakana« kaj »hiragana«.

Jozefo Major, Kameoka.

Neologismoj

en tiu ĉi numero, ne troveblaj en la Plena Vortaro de S. A. T.:

arondimento: Pariza kvartalo

ascendi: supreniri

easto: oriento kiel geografia direkto

gvati: kaŝobservi, ŝtelobservi

padeli: marŝi malfacile, ŝmacante en koto

pranci: stariĝi sur la postaj piedoj

sensio: sentorgano

uesto: okcidento kiel geografia direkto

trista: malĝoja

RECENZO



LUDOVIKO TOTSCHÉ: *De paĝo al paĝo*. Literaturaj profiloj. Eldonis Literatura Mondo.

Al korsaro,

Korsaron atakante, ne prosperas al faro, diris malnova franca poeto; same, sendube, al kritikisto kritikiston kritikante. K tamen estas nejuste prisileni tian verkon, kiel la libro de L. Totsche, »De paĝo al paĝo«, kiu prezentas al ni, por la unua fojo en nia lingvo, kleran k prudentan skizon de esp-a kritiko. Mi diras: en nia lingvo, ĉar aperis jam en la angla, havinda libro de Sturmer »Esp-o Litterature«, kiu entenas sagacajn konsiderojn pri multaj verkistoj del postmilita epoko; sed la koncizeco, kiun trudas al siaj recenzistoj la brita gazeto, en kiu aperis tiuj artikoloj, ne obligis al Sturmer profundigon de liaj juĝoj. Male L. Totsche tute libere malvolvis sian penson, k liveras al ni ellaboritan materion. Li studas en ĉi tiu volumo, kiun, mi esperas, sekvos aliaj, dekunu aŭtorojn, naŭ sinteze, Bodó, Dresen, Engholm, Forge, Hohlov, Robinson, Schwartz, Sturmer k Szilágyi, k du detale, Baghy k Kalocsay. Tiu nombrado sufiĉas por montri, ke temas reale pri panoramo de nia aktuala originala literaturo (solan escepton li faris favore al la Cikonikalifo de Bodó). Ĝi vere ne estas kompleta, ĉar neniam homa verko estas tia, — sed la esencon ĝi prezentas al ni k laŭ tre lerta maniero. Totsche efektive sentis la danĝeron proponi al la esp-a legantaro, kiu tute ne kutimiĝis al tiaj solidaj nutraĵoj, tro seriozan, teknikan sciencaron, k li ruze intermiksas siajn juĝojn per loge elektitaj citaĵoj: li donis al kelkaj el siaj studoj la formon de dialogo, al aliaj tiun de konversacio kun la leganto, — unuvorte la teksto estas nenie abstrakteca aŭ filozofaĉa, sed oni ĝuas senpene la fluantan, elegantan stilon, en kiu ne mankas delikataj aŭ subtilaj esprimoj (»mondo, teksita el sonĝoj k revadoj« — »akre konturitaj pensoj« — »kristale evoluinta lingvo« — »vivjesanta filozofio« ktp). (I) (NOTO. Ĉar mi volas tute pedante hudi mian rolon, mi notas tamen du eraretojn: pĝ 66 *Protea* devas esti *Protea*; pĝ 73, en la frazo »kio ajn nacia literaturo povus envii Esp-on«, la relativa pronomo estas malĝuste uzata anstataŭ la nedifina, malkorekto, kiu kvankam plurfoje trovebla ĉe Zamenhof, estas tamen nepre evitinda.) Sed plej bela stilo ne multe valoras, se ĝi vestas mistrafajn pensojn. Nu, la kritiko de Totsche estas ĉiam tre bongusta, kio estas despli miriga, ke li estas ankoraŭ juna. Kun tre lerta fingro li dissekcas la viktinojn, preskaŭ sendolore, indikante al ni la belajojn, sed ankaŭ tute sincere la mankojn. K niaj gazetrecenzoj estal tiel putraj de komplezemezo k blinda entuziasmo, ke tiu simpla, honesta juĝado ŝajnas al ni mirige saniga, kvazaŭ freŝa aerondo.

Neniam ekz-e mi vidis pli ĝustan, pli justan taksadon de la verkoj de Baghy: la kvalitoj — lingva harmonio, lirika impeto, humura satiremo — same kiel la malkvalitoj — malpreciza bombasto, romantikaĉa sentimentaleco, nebula filozofiado — estas akurate notitaj k difinitaj. Same pri la esenca rolo de »Streĉita Kordo« en la verkaro de Kalocsay, k, en tiu libro, pri la senpara valoro del grandaj versliberaj poemoj del *Ebria Ekvatoro*. Pri ĉiuj tiuj punktoj liaj sentencoj pruvas akrevidan, larĝidean spiriton, kies influo en nia literaturo estos certe grava.

Ne ĉie tamen mi konsentas kun li. Pri la »Por recenzo« de Sturmer, mi havas pli bonan opinion ol li, trovante en tiu skizo modelon de modernstila rakonto. Totsche riproĉas, ke »la romano abrupte finiĝas sen vera fino, kvazaŭ tranĉite per tondilo«. Sed oni ne povas postuli ankaŭ de Proust aŭ Joyce klasikan komponadon:

tiel abrupta k eĉ pli mallogika ŝajnus al li la grandvalora romano de A. Gide, »La monfalsistoj«. Cetero, mi trovas en »Por recenzo« sukplenaĵojn rimarkojn, detaliĉajn pentraĵojn de la moderna Londona vivo, kiuj faras el tiu verko unu el la plej rimarkindaj en nia literaturo, la sola kritiko, kiun mi havas por fari, estas la sufiĉe granda nombro de anglismoj en la stilo.

Same, mi ne trovas en »Anni k Montmartre« la profundan »filozofion de saĝa kompreno k trankviliginta rezigno«, kiun tie malkovras L. Totsche. Eble, ĉar li ne konas la samtemajn francajn romanojn de Francis Carco (Mia Ulo), La Fouchardière (La Hundino) ktp. La vera originaleco del verko ne kuŝas tie, sed, laŭ mia opinio, en la provo al kreado de familiara lingvo k en la bildokrea, drastimaga stilo. La unua punkto estas vere tre grava por nia literaturo: oni sentas tion precipe, se oni legas tradukojn, kiel »En okcidento nenio nova«, en kiuj la senfamiliareco de la lingvo estas sufero sentebla. La dua estas la vera forto de Schwartz. Paĝoj, kiel la priskribo de la nokta Montmartre (»Sur la Place Blanche la eterna vico de taksioj — obstinaj formikoj — pacienco boras sian vojon tra moviĝanta kaoso. Radon ĉe rado ili tremas, sekvas, puŝas, bruas k malbonodoras...«) aŭ tiu de la grandaj bulvaroj (»Anni rigardis la ĉiam renoviĝantan ĉenon de veturiloj — aŭtobusoj, kiuj sur siaj ses radoj aspektis kiel avidaj drakegoj, taksioj, privataj aŭtomobiloj pli aŭ malpli luksaj, ĉaroj ĉiuformaj, fiakroj antaŭmilitaj, kiuj preterpasis kun graveco de historiaj dokumentoj, unuvorte ĉiuspecaj veturiloj, kiuj glitis k glitis inter la knedantaj pugnoj del urbeĝo, kiel perloj de rozario inter tremetantaj fingroj de eterne preĝanta bigotulino...«) estas sufiĉaj pruvoj pri tiu rara talento elvoki tutan scenon per vivaj k solidaj vorteltrovoj. Tiu skribmaniero estis eble influita de modernaj verkistoj, kiel P. Morand aŭ J. Romain, sed tute ne, kiel supozas Totsche, de A. France: estas inter li k Schwartz neniu komuna punkto, nek laŭ la proza stilo, nek laŭ la poezia vervo, kiu rememorigas prefere la kanzonistojn M. Donnay aŭ R. Ponchon.

Alia erara komparo estas tiu, kiun faras Totsche inter Baghy k Hugo (pĝ 19): sendube, ĉe Hugo ofte renkontiĝas sonora k malplena retorikajo, sed ne pli ol en la aliaj romantikuloj; male, per la akreco de sia vidkapablo, per la precizegeco de sia vortaro, per la elvokiveco de sia ĉiam perfekta stilo, li neniel estas komparebla kun Baghy. Se oni volus finfine trovi al li analogion en la franca literaturo, nur ĉe Lamartine aŭ Laprade oni trovas ĝin. Sed, krom la okazo, en kiu oni klare vidas parencecon inter du verkistoj, ekz-e inter Poe k Baùde-laire, Hugo k Carducci, mi opinias evitenda la serĉon al tiaj komparoj, ĉiam lamaj k nejustaj.

Tamen mi ne volus doni la impreson, ke en la libro de Totsche multas tiaj eraroj: nur la malo estas vera, k la atento, kun kiu mi diskutis liajn juĝojn, pruvas la altan valoron, kiun mi rekonas en tiu kritiklibro: ĝi estos tre utila por vastigi tra la esp-a publiko ĝustajn ideojn pri nia moderna literatura movado, kiu estas tro ofte aŭ nekonata, aŭ ignorata. Ne apartenas al mi kritiki naciajn esp-ajn societojn, sed, en kelkaj el ili, oni havas tro ofte la impreson, ke tie, kie taŭgus kalkulisto, oni prefere elektas kiel diris Figaro danciston — aŭ flugiston. Ĉi tiu verko rememorigu al ili, ke ekzistas aliaj valoroj krom monaj, k aliaj paperoj krom obligaciaj. En la tempo del reformisma krizo, nur la tiama literaturo, kvankam malriĉa k humila, savis Esp-on de disfalo; mi firme kredas, ke nur la pli k pli vasta malvolviĝo de la nuna baldaŭ estigos triumfon de nia lingvo. G. WARINGHIEN.

BOLESLAV PRUS: La vizio. La veŝto. El la pola: *Lidja Zamenhof*. Esperanta Novelbiblioteko. Eldonejo: N. Szapiro, Warszawa. 38 paĝoj.

Du noveloj interese rakontitaj, precipe la dua impresas kortuŝe per la larve ĉarma ruzo, per kiu du kompatindaj estaĵoj volas ŝpari la doloron kiel eble plej longe unu al la alia. Eĉ se temo kaj templekto ŝajnas al mi iom malnovtempaj, la noveloj certe malkaŝas grandan

verkiston, kvankam lia talento, kompreneble, ne povas disvolviĝi en ĉi tiuj mallongaj pecoj tiom, kiom en la grandioza »La Faraono.«

La traduko estas bona: flua, facila, fleksiĝema Esperanto. *Ludoviko Totsche.*

PANTELEJMON ROMANOV: La mistero. Unu horo. El la rusa: *Isaj Dratwer*. Esperanta Novelbiblioteko. Eldonejo: N. Szapiro, Warszawa. 32 paĝoj.

Ambaŭ noveloj temas pri ama epizodo en la vivo de virino, ili montras akraŭvidan psikologon kaj majstran rakontiston.

Sur la kovrilo la eldonejo anoncas, ke la serio volas diskonigi »imitindan stilon esperantan«. Nu, la stilo de ĉi tiu traduko certe ne estas malbona. Sed se jam temas pri imitindeco, mi ne povas prisilenti, ke en la libro mi trovis tiajn frazojn: »la senton de tiu ĉi ial kortuŝinta ŝin frata renkontiĝo«, »kiel moviĝas rapide malantaŭen plej brilaj post mallumo de l' kampoj elektraĵoj lumoj de fabrikejoj« ktp. Mi rekonas, ke kelkfoje la slava vortordo povas interese variigi la Esperantan stilon, mi rekonas, ke pro la gramatika strukturo de la lingvo (la substantivo akordiĝas nombre kaj kaze kun sia adjektivo) tiu ĉi disĵetado de frazeroj ne naskas miskomprenon, tamen, mi devas konfesi, ke legi tutan libron verkitan en tiu ĉi dialekto estigas al mi kapdoloron. *L. Totsche*

GVIDLIBRETO TRA KORTRIJK—BELGLANDO.

(Eld. Esperanto-Grupo, Kortrijk; 20 p.)

Atentinda, plaĉa eldono.

Szilágyi

»SAT«-JARLIBRO, 1932. (138 p.)

Multaj datoj, zorgemaj klarigoj pri la gvidantaro, sekcioj, societoj, adresoj, statutoj ktp.

Szilágyi

MINNESKRIFT MED ANLEDNING AV ESPERANTORÖRELSSENS I GEFLE 25 ARS JUBILEUM. (Eld. Esp. Föreningen i Gefle; 20 p.)

Jubilea, bele eldonita kajero de la brava Gefle-a societo. *Szilágyi*

Diversaĵoj:

La Universitata Ligo Kontraŭ la Japana Invado fondita ĉe la Kuo Min Universitato en Canton dissendis akran, tre interesan proteston kontraŭ la japanoj. La folio estas ricevebla senpage ĉe la supre nomita Ligo.

La Centra Presejo Esperantista Paris V-e 33 rue Lacepède, eldonis tre belan kaj interesan flugfoliojn okaze de sia 25-jara jubileo. En la flugfolio ĝi vicigas grandan aron da verkistoj kaj verkoj, kiujn konatigis dum tiu longa tempo la konata presejo.

La 5-a Jugoslava Kongreso eldonis tre belan dukoloran afiŝon porkongresan.

La gazeto de la flandra turista societo, ampleksanta pli ol 110,000 membrojn, daŭre presas kurson. Ni gratulas al la Flandra Ligo Esperantista pro la bonega rezulto.

Prospektoj eldonis lastatempe:

Ministerio por Komerc kaj Trafiko de Aŭstrio. La tre belan prospekton kun du aliaj sendas por unu respondokupon la Int. Esperanto Muzeo, WIEN I. Neue Burg.

La Internacia Labora Organizaĵo, GENEVE, okaze de la dekjara datreveno de ĝia fondiĝo. La tre detala prospekto enhavas ĉiun sciindaĵon pri tiu grava institucio kaj estas havebla senpage de ĝi.

La Sveda Gimnastika Instituto pri siaj someraj gimnastikaj kursoj en Lund.

Ĉiuj tri prospektoj estas bonegaj propagandiloj por Esperanto ĝuste per tio, ke ili celas per esp-o konatigi gravajn instituciojn.

Nia numero, bedaŭrinde, estas tre malriĉa de bildoj. Eble niaj legantoj pardonos tion: pro malfaciloj, kaŭzitaĵoj de la mondmalsano, ni ne povis ĝustatempe elsavi niajn kliŝojn el la labirintoj de la doganoficejo. Ni donos ilin en la sekva numero, raportonta pri la kongreso.

REVUO DE REVUOJ

LA NOVA EPOKO. En la dua numero ni mencias unualoke la bonegan tradukon de Weinhengst: T Hood: La kanto pri la ĉemizo. Viktoro Ekström verkis novelon, kies energia tendencemo pariĝas kun impresa rakontpovo. El la tradukoj alte elstaras »La betono« represita el la »Paŝoj de la Jarkvino«, kiu kun nerezistebla impeto prezentas al ni la malhelpojn kaj heroajn laborluktojn de la »socialisma konstruado«. La numeron kompletigas »Sur la ekrano«, »Paĝo de Filozofio«, »Scienco«. En la rubriko »Lingvoscienco« Waringhien komencas artikolon pri neologismoj, traktante la temon tre klarvide kaj freŝe, parte el tute novaj kaj interesaj vidpunktoj. La Recenzoj estas detalaj kaj, precipe el lingva vidpunkto, konsciencaj. La reviviĝo de la revuo certe estas gajno por nia lingvo.

LA NOVA ETAPO. La unua numero havas sur la titolpaĝo la portreton de Ludwig Renn, kiu mondfamigis sin per sia romano: Der Krieg (La milito). Ke tia verkisto aliĝis al Esperanto kaj eĉ verkis mem Esperante en la revuo, tion certe ĝoje salutas ĉiu esperantisto. Menciinda estas la studo de Nekrasov pri Bulthuis, tre interesa kaj bone skribita artikolo, kiu, tamen, konsideras preskaŭ ekskluzive la socialan observmanieron de Bulthuis. Nu, kun la sama observmaniero oni ja povas esti tute senvalora verkistaĉo, sed ankaŭ la plej granda verkisto de la mondo. La poemo de Mihalski estas tre verva, ĉi tiu talentulo senĉese evoluas. Wüster klarigas la diferencojn inter sufiksoj kaj radikoj. Nu, laŭ mia opinio, ĉi tiuj diferencoj ja ekzistas, (same kiel tiuj malkovritaj de Minor), sed same ne tiel esencaj kaj gravaj, ke oni povus sur ili bazi fundamentan diferencigon. C. Ock.

AL LA NOVA ETAPO. Sub tiu ĉi titolo ĵus aperis verketo ĉe eldonejo Ekrelo tiom interesa kaj grava ke mi volus citi la tuton. Sed mi diru koncize ke ĝi prezentas la vidpunkton de la sovetiaj adeptoj de Esperanto al la lingvo internacia nuna kaj estonta, vidpunkton ege sagacan kaj atentindan.

En la rezolucio de la lingva komisiono de SEU de 28.6.31 oni legas: »la Lingva Komisiono estas kontraŭa al ĉiuj nekonsekvencaj, precipe grandskalaj kaj mase koncentritaj eksperimentoj kun Esperanto, kiuj, sen la necesa laŭtempa aproba verdikto de la amasoj, povus konduki al tre danĝera splitiĝo kaj disdialektiĝo de la lingvo«. En posta artikolo E. Drezen skribas: »Ni ne estas reformemaj rilate al la lingvo. Ni tute ne intencas preferi idon, occidental aŭ novial, pro iliaj laŭsajnaj, laŭformaj perfektaĵoj... de tiu vidpunkto pravas idistoj, nomante nin »lingvaj ortodoksuloj«.

»Ni ankaŭ ne estas konservativuloj, fundamentistoj rilate al la lingvo. Ni tute ne intencas limigi nian lingvouzadon nur per formoj troviĝantaj en la Oficiala fundamenta vortaro kaj en ĝiaj aldonoj. Konforme al niaj bezonoj kaj al la eventualaj ebloj ni tute libere iras ekster la limoj de la Fundamento. Ni tute konscie pretas esti pliperfektigistoj de la lingvo, ni pretas senhezite ĝin akomodati al ĉiuj sentataj bezonoj kaj necesoj. De tiu vidpunkto pravas la vere-ortodoksaj fundamentistoj, kies ordinara bezono estas kontentigeblaj per la enhavo de la Fundamento, nomante nin »lingvaj reformemuloj«... la ŝanĝojn trudas la vivo kaj la sociaj bezonoj. Elimini sin kaj la lingvon de tiuj bezonoj povas nur homoj, kiuj kulturata apartan sekton kaj menson, izolitan de la alia mondo.« Bonege!!!

Kaj el la jam aludita rezolucio: »la Lingva Komisiono firme opinias esperanton nur transira, evoluanta ŝtupo al la estonta monda helpa lingvo kaj ties pli posta evoluo al la sola, komuna lingvo de la senklasa, sennacia kaj senŝtata socio«.

Pri la Lingva Komitato: »estas sperto ne sole de la Lingva Komisiono de SEU, ke la komplika, malvigla plenumaparato de la centraj esperantaj lingvo-institucioj, dank' al sia strukturo, bezonanta internajn kaj eksterajn reformojn, ne kapablas iri sampaŝe kun la tempo, precipe

en konsidero kun la progresoj kaj evolue de la proleta klaso.«

Unu artikolo, de l' iama poeziemulo N. Hohlov, lerte tuŝas la fakton, ke en Esperanto malmultaj personoj kapablas nomi sian metion, sian maŝinon, la labormetodojn de l' ĉiutaga laboro. Mi mem ofte jam aludis al la fakto ke Esperanto estas lingvo trokulturita kaj ne sufiĉe praktika, kaj pri tio mi forte pensis kiam antaŭ kelka tempo mi elektis prelegi en Londona Esperanto-Klubo pri mia ĉiutaga metio, anstataŭ pri la literaturo aŭ la vojaĝado. Kun amara rideto mi konsciigis, ke mi, kiu multe laboris por la kulturo de nia lingvo, ne povas nomi en ĝi la plej simplajn aferojn de mia ĉiutaga metio okupinta min dum dek-kvin jaroj. Kaj simile povus konstati multaj okcidenteŭropaj esperantistoj prilaborinte la kulturan flankon de Esperanto. K. R. G. S.

Invito

al la

Literatura Vespere de Verkistoj

arangata de „Literatura Mondo“

okaze de la Pariza Kongreso

la 2-an de aŭgusto, vespere je la 8 horoj ¹/₂,
en la granda teatro de la Kongresejo



PROGRAMO

1. Esperanto-himno.
2. Salutparolado de Kolomano Kalocsay.
3. Teo Jung prelegas novelon.
4. Ludoviko Lazaro Zamenhof sur filmo.
5. Kolomano Kalocsay deklamas el *Eterna Bulcedo* kaj *Streĉita Kordo*.
6. Esperanto, la lingvo de literaturistoj: parolado de Jean Forge.

Paŭzo

7. Kolomano Kalocsay prelegas alvenintajn salutleterojn de verkistoj kaj prezentas ilin al la publiko.
8. Nikolao Hovorka deklamas sian poemon.
9. Mihaelo Sárossy kantas hungarajn kaj originalajn Esperantajn kantojn.
10. S. Grenkamp-Kornfeld prezentas novelon.
11. Julio Baghy interpretas I. Lejzerowicz kaj L. N. Newell.

Dum la tuta prezentado konferas Raymond Schwartz.



Rajtas eniri ĉiu interesiganto, kiu aĉetis la specialan francan numeron de *Literatura Mondo* por 9 frankoj, aŭ alian numeron de *Literatura Mondo* por 7 frankoj.

Abonantoj de *Literatura Mondo* ricevas la enirrajtigilon post aĉeto de iu ajn libro en la valoro de 5 frankoj el la eldonaĵoj de *Literatura Mondo*.

Novaj abonantoj ricevas la enirrajtigilon sen la kroma pago.

La necesaj enirrajtigiloj estas riceveblaj ĉe la speciala kongresa stando de *Literatura Mondo* aŭ antaŭ la prezentado.



Literatura Mondo informas ĉiujn interesigantojn, ke ĉe la kongresa stando deĵoros-ro V. Bleier, administrando de *Literatura Mondo*, rajtigita por ĉiuj aferoj.

GRAVA INFORMO! DONACO AL MALRIĈAJ ESPERANTISTOJ

En la Maja numero de LA PRAKTIKO ni publikigis la demandon: »Kiu havas bonan koron, por pagi la abonon anstataŭ kelkaj malriĉaj samideanoj?» (La abono por unu jaro kostas 1 dolaron.)

Je tiu demando ni ricevis surprizan respondon de unu grandanima samideano, kiu bedaŭrinde malpermesis publikigi sian nomon. Ŝi skribas:

»Ne por montri bonan koron, sed por pravi mian grandan ŝaton al via grandioza instrua kaj amuza gazeto La Praktiko, ni sendas al vi 200 dolarojn. Per tiu sumo mi pagas por 400 malriĉaj samideanoj la duonon de unu jarabono, tiel, ke la alian duonon pagu la abonantoj mem. La Praktiko devas esti en la manoj de ĉiu Esperantisto, kiu volas lerni kaj ridi.«

Esprimante koran dankon al la nobla donacinto, la eldonejo de LA PRAKTIKO de sia flanko decidas simile pagi la duonon de la jara abono por 100 malriĉaj samideanoj. Sekve de tio entute 500 personoj povos ĝui la favoran abonon.

Ni alvokas nun tiujn gesamideanojn, kiuj suferas pro la ekonomia krizo kaj pro la falo de la naciaj valutoj, ke ili rapidu partopreni en ĉi tiu malofta favoro.

En interkonsento kun la donacinto ni aranĝas la disdonon de la donaco en la jena plej facila kaj plej oportuna maniero:

Ĉiu persono, kiu deziras la favoran abonon, sendu al ni en simpla letero 10 (dek) tiajn poŝtmarkojn de sia propra lando, per kia li afrankas la eksterlandan leteron (ekzemple en Nederlando tia poŝtmarko kostas 12½ cendojn, en Britujo 2½ pencojn, en Francujo 1.50 fr. en Germanujo 25 pfenigojn, en Svedujo 25 oerojn, en Italujo 1.25 lir., en Polujo 60 groŝojn, en Aŭstrio 40 groŝojn, en Hungarujo 40 fil., en Ĉeĥoslovakujo 2.50 ĉ. kr., en Norvegujo 30 oerojn, en Rumanujo 10 leojn, en Jugosl. 3 din., en Bulgariujo 6 levojn, kaj tiel plu). La valoro de 10 tiaj poŝtmarkoj kune pli-malpli egalas al duona dolaro, do al duonjara abono. La alian duonon de la abonprezo ni pagos el la donacita sumo.

Kontraŭ la tiel pagita abono ni liveros LA PRAKTIKON dum la tuta jaro 1932 (do ni sendos ankaŭ la ĝis nun aperintajn numerojn de Januaro). Mendoj ne konformaj al la supra maniero ne estos plenumataj.

Pluraj personoj povas sendi la abonon kune en unu letero, por ŝpari afrankon. Oni skribu sian nomon kaj adreson tre klare, laŭeble per skribmaŝino, aŭ imitante presitajn literojn. En la letero oni ne forgesu aldoni, kion ni faru kun la poŝtmarkoj, se la mendo alvenas tro malfrue, t. e. post la disdono de la 500 favorabonoj. Ĉu ni resendu la markojn, aŭ uzu ilin por duonjara ordinara abono?

Al tiuj personoj, kiuj ankoraŭ ne konas LA PRAKTIKON, ni sendas specimenan numeron senpage, je peto.

La leterojn kun la mendoj kaj poŝtmarkoj oni devas adresi al:

La eldonejo de LA PRAKTIKO
Internacia Ĉeĥ-Instituto de Esperanto
Oostdijnslaan 32, DEN HAAG, Nederlando

La romano, gajninta unuaniman plaĉon ĉe la juĝistaro kaj la premion de la romankonkurso de Literatura Mondo aperis:

HOMOJ SUR LA TERO

Romano de
STELLAN ENGHOLM

indigis sin por tio per sia **granda karakterizkapablo, altira rakontpovo, facila stilo**, kiuj ecoj lokigas la svedan aŭtoron en la unuan vicon de niaj originalaj verkistoj.

Legu la raporton en la ĉi jara maja numero.

En formato de 20×13.5 cm. 200 paĝa. En kutime plaĉa aspekto. Prezo broŝ. USA dol 0.70. bind. 1.— + 10% por sendkostoj.

Eldonas **LITERATURA MONDO**, Budapest
Havebla ĉe ĉiuj seriozaj esperantistaj libristoj.

La plej sukcesa lasttempa teatraĵo sur la tutmondaj scenejoj, ludota dum la XXIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo, ĵus aperis:

JULES ROMAINS

KNOCK

AŬ

LA TRIUMFO DE MEDICINO

El la franca tradukis:
DRO PIERRE CORRET
membro de l'Esperantista Akademio

Eldonejo: **ESPERANTISTA VOĈO**,
Jaslo, (Polujo)

80 paĝoj. Prezo: fr. fr. 7.50

Se vi volas ridi sane, kaptu ĝin ambaŭmane — Havebla ĉe **LITERATURA MONDO**, Budapest

Babilado pri Parizo kaj pri la XXIV-a

— Julio Baghy —

Dum la lasta redakcia kunveno miaj kolegoj surprizis min per la deziro, ke mi verku raporton pri la Pariz-a kongreso. Vane ni protestis. Mi diis al ili, ke la raportmaniera verkado ne estas mia meto, ĉar se mia fantazio vole nevole liberigis, mi falsos la faktojn kaj se mi profundigos en la realon, mi ne povos reteni min de la rememoroj. Kiu ekmigras sur la vojo de rememoroj, tiu kontraŭvole tuŝas la kordojn de subjektiva sentimentaleco. Kiu ŝatas raporton, pakitan en lirikon? Neniu. La leganto estas scivola pri la okazintaĵoj kaj ne pri la sentoj kaj pensoj de s-ro N. N. redaktoro. La leganto estas tute prava. Mi amasigis ankoraŭ kelkajn motivojn por liberigi, sed la volo de la plimulto venkis per la argumentoj: »vi loĝis en Parizo, vi konas la parizanojn, vi vidis la preparan laboron kaj partoprenis ankaŭ en la kongreso mem«.

Mi ne neas, ke tiuj ĉi argumentoj estas konsiderindaj, tamen ĝuste en ili kaŝiĝas la kaŭzo, kiu malfaciligas mian taskon. Mi provis klarigi al miaj kolegoj tion, sed ili ŝajne ne komprenis la motivadon kaj tial mi estas devigata turni min al vi, kara leganto. Eble vi estos pli komprenema, almenaŭ pli indulgema kaj absolvos min.

»Vi loĝis en Parizo«... Eraro. Mi ne nur loĝis en Parizo, sed mi havis tie songovivon. Mi forgesis, ke kvardek kaj kelkaj jaroj peziĝas sur min. Kun studenta juneco mi vagadis tra la bulvaroj, reveme sidadis en kafejoj de la universitata junularo kaj per la neo de la pasinteco mi teksis tiajn fantaziajn planojn, kiajn mi faris iam en mia deka jaro. Mi reunigis mian animon per la observado de la ŝaumanta vivo kaj mia koro estis plena de amaj melodioj. Ilin mi duonvoĉe kantis sidante ĉe tableto en Café de la Sorbonne kaj mire mi revidis min juna en la fumringo de mia pipo. Nun Parizo estas for, la iluzidona atmosfero mankas, nur la pipo restis, la pipo, kiu konvene al mia aĝo iom pesimiste pendas el inter miaj lipoj... Ne deziru raporton de tiu, kiu en Parizo havis songovivon!

»Vi konas Parizon«... Mi ne konas ĝin. Mi estas ĝia amanto. Neniu amanto konas sian idealon. La amo faras nin blindaj. Tutanime mi ĉirkaŭprenas la urbon, per infanokuloj admiras ĉiun ŝtonon kaj ĉiun loĝanton de ĝi kaj la necesa objektiveco de la raportu dronas en la larvoj de la rememorigo. Kion mi povus rakonti al tiu, kiu neniam vidis Parizon, aŭ kiu pasigis oktagojn inter ĝiaj muroj? Tre multon, sed vane, ĉar la priskribo gvidlibromaniere ne donas la guston, kaj sen gusto eĉ la plej bela priskribo ŝajnas anemia vortotorento. Parizo estas kiel la rubena vino de Bordeaux. Estas necese gustumi por laŭvalore taksi ĝin. Sed post la trinko ne ekzistas tia elokventeco, kiu povus senteble priskribi la guston. Sidante en la aŭtobuso la vizitanto nur rigardas, sed ne vidas Parizon. Tiu ĉi admirinda urbo montras sin nur al tiu, kiu post la inspektado de la palacoj kaj historiaj konstruaĵoj haltas ĉe la bordo de la Seine aŭ sur iu bulvaroj kaj boras sian rigardon en la pulsanta vivo, konatiĝas kun la ŝajna indiferenteco, maskanta profundan komprenon por ĉiu homa malforto. Iom post iom oni rimarkas strangan metamorfozon. La observanto fariĝas amanto de la urbo, fariĝas pli tolerema al siaj homaj gefratoj, poste li konstatas sian nepriskribeblan amon al la urbo. Kial li amas ĝin, li ne scias, sed li sentas profundan

simpatian al ĉiu ŝtono ĝia, al ĝiaj lukso kaj mizero, al ĉiu loĝanto. Kial? Eble pro tio, ĉar ĉio ĉi apartenas al la urbo, kies atmosfero spiras songovivon al li: la songovivon de la libereco. Fine iun tagon li ekkonscias pri tio, ke la urbo estas lia urbo kaj li havas lokan patriotismon, fariĝas franco eĉ sen scio de la lingvo mem. Jen Parizo... Pri ĝi ne deziru raporton de ĝia amanto! Aĉe!u gvidlibron por havi almenaŭ tian bildon, kian vi povas havi pri la koloro de la Bordeaux-a vino rigardante ĝin tra la montra fenestro de vendejo.

»Vi konas la parizanojn«... Nu, ne tre, nur iomete. Mi konas precipe miajn geamikojn kaj gelnintojn, sed por skribi pri ili mi bezonus la plenan amplekson de la gazeto kaj tre verŝajne eĉ tiam mi ne estus kontentigita. Ili restis tro vivaj en mia memoro por paroli pri ili sen emocio, sen mencio de bagatelaj okazintaĵoj. Kun dankplena respekto kaj sincera simpatio mi amas ilin. Kiamaniere mi povus skribi pri tiuj, al kiuj ligas min subjektiva sento? Mi vidas ilin antaŭ mi sidantaj ĉe la longa tablaro. Raymond Schwartz, la ĉiama bonhumoro kaj kolega amiko, ridetas al mi kaj proponas glason da aperitivo. S-roj Bastien kaj Dubois diskutas kun mi pri projektoj reorganizaj. Sinjoro Marchand interesigas pri la bezonotaj objektoj dum la Ĉe-metodaj kursoj. Carmaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj babilas pri la modo aŭ pri dimanĉaj ekskursoj. En la kadro de la pordo subite mi vidas aperi la blondan kapon de s-ro Newell. Li estas laca, sed bonhumora, ĉiam bonhumora. Kaj jen, ankaŭ s-ro Warnier alvenas por paroli pri kongresaj laboroj. Rideto petolas en liaj okuloj. Tie, en la angulo, amike kaj ŝerce disputadas s-roj Grenkamp kaj Linder pri Pol-Pomeranio. Babili pri ili mi povus, sed raportu... raportu ne, tute ne!

»Vi partoprenis la kongreson mem«... Mi devas esti sincera. Mi ne partoprenis, nur ĉestis. Vagado el unu ĉambro en la alian, kurado de unu amiko al la alia ne signifas partoprenon. Mi klopodis renkonti miajn geamikojn, diverslandajn kaj jam de longe neviditajn, por longminuta konversacio kaj poste mi forkuris por adiaŭi de la urbo, de parizaj geamikoj. Estus senkonsciece raportu pri io, kion mi ne vidis... Cetere la kongresoj similas unu al la alia. Naŭdeknaŭ procentoj de la partoprenantoj deziras nur amuzi sin. Ili estas tute pravaj. Preterlasi la plej taŭgan okazon estus sensece.

Kio okazas dum kongresoj? La popolo ja ne scias kion ĝi volas. Pli precize: ĝi volas nenion kaj precipe ne tion, kion oni faras en ĝiaj nomoj kaj intereso. La reprezentantoj de la diversaj societoj nekonante la volon de la popolo volas tion, kion la centraj gvidantoj ne volas. La centro mem nekonante sian propran volon volas ĉion, nur ne tion, kion la reprezentantoj volas. Rezulto: ili kune faras tion, kion neniu volis: surpapere ili nuligas la ekziston de la kontrakto de Helsinko, de I. C. K. kaj de U. E. A., tamen tiamaniere, ke ĉio ĉi daŭre povas funkcii ĝis la Reorganiza Komitato surpaperigos tion, kion ĝi mem volas... Tamen oni povas konstati, ke dum la Pariza Kongreso oni faris unu paŝon. Ĉu antaŭen aŭ malantaŭen? La estonteco montrus tion. Mi fidus la unuecan volon de la elektitaj »Sep Saĝuloj«, kiuj verŝajne sukcesos trovi la ĝustan vojon, tiun vojon, kiun la popolo mem elektus, se ĝi kapablas doni formon al sia volo, erar-



S-ro Citrom (li ŝajnas Oranĝ) kaj srino Helmi Dresen



S-ro Nišimura amas la homaron



S-ro Kreuz post iom da manĝo

vaganta nun en cent direktoj. Sincere mi deziras plenan sukceson al tiuj, kiuj nun plenumas sian taskon respondecan je la intereso de la movado.

Tiom pri la kongreso. Kiu ne estas kontentigita, prenu la oficialajn raportojn, kiuj entenas la stenografitan vortbatalon.

Mi deziras paroli pri du programpunktoj de la kongreso; pri la teatra prezentado kaj pri la literatura vespero de L. M.

KNOCK aŭ *La Triumfo de Medicino*. Jen la titolo de la komedio de *Jules Romains*, la fama franca verkisto, kiu per sia persona ĉeesto honoris la prezentadon. La originalo havis tre grandan sukceson ne sole en Francujo, sed ankaŭ sur la scenejo de diversaj landoj. La esperantista publiko nur modere ĝuis la majstraĵojn. Kial? Pro diversaj kaŭzoj. La teatra salono de la kongresejo havis tian akustikon, kiu malfaciligis la komprenon de la teksto kaj la stilecan ludon de la geaktoroj, kiuj konstante luktis kontraŭ la akustikaj malfacilaĵoj... La traduko estas korekta, eĉ tro korekta. Tiu ĉi korekteco kelkloke malhelpas la tujan komprenon kaj ofte kaŭzas apartan malfacilaĵon por la geaktoroj. En tiu ĉi korekteco dronis la plej bonaj spritaĵoj de la franca originalo. La sursceneja lingvo de modernaj komedioj devas respeguli la ĉiutagan esprimmanieron. Ĝi devas esti mallonga, enhavanta la kutiman esprimmanieron de la parolata lingvo. D-ro Pierre Corret plej konsciencie plenumis sian taskon kaj oni ne povas riproĉi lin pro la sursceneja tekniko. La bagatelajn ŝanĝojn estus devinta fari la kraĵono de la reĝisoro je la intereso de l' prezentado. Mi estas tute konvinkita, ke s-ro Gustave Cauwenberg la reĝisoro, volonte estus farinta tion, se li konus nian lingvon tiel kiel sian propran... La plimulto de la publiko malofte aŭdas esperantlingvajn prezentadojn, precipe tiajn, en kiuj havas gravan rolon *nur la teksto*. Jen la kaŭzo, kial la trialogo kvardekminuta en la unua akto kaj la longaj dialogoj de la tria akto ne trovis la merititan atenton. La dua akto, en kiu diversaj tipoj aperas kaj malaperas, vigle parolas kaj montras iaspecan okazaĵon, plene trafis la plaĉon de la publiko. Do, ĉe la elektado de la kongresa teatraĵo oni devas konsideri ankaŭ la guston de la publiko. Certe iu komedio de Molière aŭ iu moderna franca burleskaĵo estus akirinta pli bruan sukceson malgraŭ la malbona akustiko, ĉar oni estus vidintaj okazaĵojn, situacion komikon sur la scenejo. Por percepti nurtekstajn spritaĵojn, la oreloj de nia publiko ne estas ankoraŭ sufiĉe kulturitaj.

Pri la arta laboro de la geaktoroj mi povas paroli nur laŭde. La plimulto de la rolintoj estas la membroj da la Flandra Reĝa Teatro en Antwerpen. Willy Gauwenberg (Knock) prezentis bonege la figuron de la ĉefrolo, kies karaktero ĉiam pli kaj pli reliefigis en

lia ludmaniero. Louis Belloy (D-ro Parpalaid) bone efikis per sia natura parolmaniero, kiu faris lian kreaĵon perfekta. Aleksandro Starke (La urba tamburisto) alportis la unuan ridekslopon per sia komikoriĉa ludo, S-ino De Vreker (La sinjorino nigre vestita) meritis plene la tondran aplaŭdon pri sia brila rolado. S-ino Loosveldt (La sinjorino viole vestita) per sia diskreta ludmaniero karakterize prezentis la avaran aristokratinon. Marcel Gauwenberg, Willem Condes. De Lieu; s-inoj Starke kaj Koch Darnault Godet en la epizodaj roloj partoprenis talente en la artplena prezentado de la teatraĵo, reĝisorita bonege kaj entuziasme de s-ro Gustave Cauwenberg.

La literatura vespero de la Literatura Mondo. Per la afabla helpo de la L. K. K. nia revuo aranĝis ĉi tiun vesperon en la teatra salono de la Kongresejo. Kun agrabla surprizo ni konstatis, ke la granda salono estis plenplena; ĉi tiu prezentado, kiel ankaŭ la antaŭjara en Krakovo, renkontis ĉe la kongresanoj ĝeneralan interesigon kaj simpatian. Mi rememoras, ke antaŭ jaroj, en Nürnberg, en la unua periodo de nia revuo, malplenaj seĝoj oscedis antaŭ la scenejo de nia prezentado — kia ĝojiga ŝanĝo de tiam! Jes, ĝojiga, ĉar en ĝi mi vidas la signon de tio, ke nia publiko rekonis la grandan signifon, kiun la literaturo havas en nia movado. Nia publiko volas alproprigi tiun pli kaj pli grandan, pli kaj pli belan konstruaĵon, kiun la senlaca laboro de niaj verkistoj kreas sur la malnova Fundamento. Kaj en ĉi tiu paca sieĝo ilin ne plu malhelpas la alto de la etaĝoj kaj la granda nombro de la ŝtupoj.

Literatura Mondo ja havas du celojn. Unue, malkovri, instigi, laborigi, grupigi talentulojn por literatura kreado, due, krei legataron kun tia lingva pretenco, ke ĝi povu kompreni, taksu kaj ĝui la kreaĵojn de ĉi tiuj talentuloj. Ĉar tiu nova lingvotrezoro, kiun iliaj klopodoj produktas por fari Esperanton ne sole vivanta, sed ankaŭ triumfanta pri ĉiuj literaturaj pretendoj, havas valoron nur, se ĝi fariĝas *komuna trezoro*. Senfanfarone ni povas aserti, ke ni pasas ĉirilate sur la vojo de la progreso.

Kompreneble, la plenumo de ĉi tiu tasko estas pli facila, se nia publiko povas konatiĝi kun siaj verkistoj ne nur litere, sed ankaŭ persone. Jen kial ni aranĝis ĉi tiun Vesperon de Verkistoj, kaj jen kial ni ĝojas, ke nia publiko aprobis ĉi tiun arangon per amasa vizito.

Parolante pri nia programo, mi antaŭe konstatas, ke ĝi plaĉis; ĉiuj, kun kiuj mi parolis pri ĝi, laŭdis ĝin, ofte tre entuziasme. Poste, mi konfesas, ke ni mem ne estis pri ĝi kontentaj. Nu, ĝi ja certe enhavis multon valoran, mi ne kontestas, kiel mi kuraĝus ja kontraŭdiri al tiel multaj aplaŭdantoj. Sed ĝi estus multe pli vigla kun kelkaj scenoj kaj kantoj, precipe kantoj scenigitaj, kiuj estus donintaj al la seriozaj partoj



S-ro Kalocsay antaŭ oi perdiĝi en la Louvre



S-ro Warnier (la mastro observas sian gregon)



S-ro Merchant ne pensas pri organizo



Jean Forge apud la mistera blanka fantomo

multkoloran kaj varian kadron. Nu, ĉi tiu konfeso estas samtempe promeso por Kolonjo.

Ĉe la komenco de la Vespero, K. Kalocsay salutis la ĉeestantojn per kelkminuta parolado kaj li tuj sukcesis krei tiun intiman, varman atmosferon, kiu estas nepre necesa por tiaspecaj aranĝoj. La intima humoro konstante altiĝis dank' al la tikla seriozo de Raymond Schwartz, kiu sprite kaj tre basvoĉe anoncis ĉiun verkiston, dum la verkisto mem mire kaj kapskue aŭskultis malantaŭ la kurteno, kiel oni lin »karakterizas«. Teo Jung, la ĉefredaktoro de la Heroldo parolis pri Kolonjo, kongresurbo de la XXV. a, kaj la ŝercoj, per kiuj li spicis sian parolon, rulis tra la aŭskultantaro vastajn ondojn de rido. Jean Forge parolis pri la »heroaj« tempoj de nia literaturo, varmitone li pentris antaŭ ni la penan kaj pezan laboron de la Majstro. Kaj je la fino de sia parolado li prezentis la grandan surprizon: mallumiĝis la ĉambro, eksonis la himno malantaŭ la scenejo kaj sur malvolviĝinta ekrano staris antaŭ ni la Majstro mem, deklamanta »La Esperon«. La karaj, konataj trajtoj tie vibris vive antaŭ ni, kaj la impresoj, kiun ĉi tiu apero de karmemora Mortinto faris, estis tiel granda, ke per unu fojo stariĝis la tuta aŭdantaro kaj kune kantis la himnon kortuŝite. Bone, ke sekvis paŭzo, neniu estus kuraĝinta prezenti ion post ĉi tiu grandimpresa sceno.

En la paŭzo ni intencis amuzi la publikon per gramofondiskoj de Mikaelo Sárossy, sed tiu punkto ne rikoltis atenton, eble neniu ĝin rimarkis.

Post la paŭzo leviĝis la antaŭkurteno, kaj en la scenejo, sur purpura fonkurteno, paradis per grandegaj arĝentaj literoj »Literatura Mondo« kaj la konata emblemo de nia revuo. Bele ĝi aspektis, ricevis longan aplaŭdon. Nun N. Hovorka deklamis sian originalan poemon, tre klare, tre varme, kun granda vervo. S. Grenkamp-Kornfeld, respondinte per sprita skermobato al la karakterizo de R. Schwartz, legis sian noveleto kaj fragmenton el la »Vortoj de Prof. Cart«. Sekvis

K. Kalocsay; en lia prezento unue la Vento de Verhaeren trasis, ĝemis, trumpetis kaj hurlis super la kapo de la publiko, poste lia propra Ezopa Fabelo vekis ridon per sia neatendita fino. L. Lejzeroviĉ kaj L. N. Newell estis interpretataj de J. Baghy. Fine Dro Olsvanger laŭtlegis parton el sia poemo, kies versoj revelaciis profundan filozofion.

La sinsekvaj aplaŭdoj, la dumpaŭza varma humoro de la publiko, la postvesperaj gratuloj (ne sen aŭto-grampeto), montras, ke ankaŭ tiu ĉi eta prezentado havis surprize grandan sukceson, ke nia publiko avidas la literaturon, en kiu ĝi sentas vere vivi nian lingvon. Kaj ĝi montris, ke por krei kaj pligrandigi ĉi tiun avidon, grandsignifa estas tia senpera interrilato de legantoj kaj verkistoj. Ni dankas pro la hanoro kaj deziras, ke en Kolonjo nia renkonto okazu same amike kaj intime kiel nun en Parizo. Bonan antaŭsignon ni jam havas. La Ferma Kunsido okazis en la sama salono, kie nia prezentado, la kongresa estraro sidis sur la scenejo, kaj super ĝi, grandlitere, kvazaŭ egido, arĝentis la grandlitera surskribo: Literatura Mondo. Kaj, se ni anstataŭas la literon M per R, mi kredas, ke tio estas ĝusta. La literaturo havas tiel grandan signifon por nia movado, ke la reva Familia Rondo devas esti ankaŭ Literatura Rondo.

Noto de l' Redakcio: La babilado de nia Baghy finigas jene: »Por esti fidela raportanto mi mencias, ke la verkinto de ĉi tiu artikolo rolis kvin minutojn sidante en la teatra prezentado »Knock« kaj dek minutojn starante en la Literatura Vespero.« Tiu ĉi la raporto estas tro vortavara. Baghy prezentis tre varme kaj intime la belan poemon de Newell pri Parizo, kaj rikoltis ĉambroskuan ridon per la Verda Biblio de Lejzerowicz. Poste, li kortuŝis per originala poemo kaj fine, kiel armeestro, li ekirigis en piedbrua marŝo ĉiujn ĉeestantojn por venki ĉiujn niajn malamikojn. Ĉi tiu estis la lasta punkto de la prezentado, kaj post ĝi la forirantoj certe sentis sub lia sugestia forto ankoraŭ longe ĉi tiun venkopretan marŝemon en la kruroj.

Doĵantaj pensoj

I. Ebriiĝo estas stato de superlucido: oni perceptas eĉ la teroturnon.

*

II. Per korupto, oni kutimigas nin de la infanjaroj, kiam la panjo donis al ni moneron, por ke ni trinku amaran medikamenton.

*

III. Ekzistas speco de parenco, kvankam nedi-

finita, tre ĝenanta kaj danĝera: la boamilko.


*

IV. Imperio malpli bezonas cezaron, ol cezaro imperion.

*

V. Ekonomian krizon karakterizas marĉand-avaro: Ju pli ricevi — des malpli doni.

M. Beraru



Kvapil

Nudulino sur la sablo

LA MIRAKLO

— KAN KIKUĈI —

Personoj:

Sukan, knabo kun razita kapo.

Oben, knabino.

Koo, *Ocu*, *Hei*, *Tei*, junaj bonzoj.

Tempo — Nefiksita.

Loko — Monteta antaŭurbo de granda metropolo.

(*Scenejo: La interno de la Halo de Emma en la korto de granda templo. Nokto. La pala lunlumo konturas la grandan figuron de Emma, Sinjoro de Infero. De malproksime venas la sono de fluto miksite kun konfuzaj bruoj de la granda urbo.*)

Sukan, bela junulo en formo de bonzo, aspektanta, kvazaŭ li estus altiginta ĝis lia nuna pozicio el tiu de paĝio, ŝtele envenas tra la dekstra pordo kaj ĉirkaŭrigardas.)

Sukan. Bedaŭre! *Oben* ne estas ĉi tie ankoraŭ, ĉu ne? Prefere mi do legu Sanktan Skribaĵon pli atente. Nenio helpas. Estos bone pasigi tempon kun sinjoro Emma, mi pensas. (*Eksidas sur la altan plankon apud Emma kaj mallaŭte tamburas per siaj kalkanoj sur la piedestala plataĵo. Post momento, li surprizigas de la sono de voĉoj proksimiĝantaj al la Halo kaj stariĝas sur la piedfingroj por vidi. Venas tri junaj bonzoj, Ocu, Hei kaj Tei, kaj Sukan rapide okulserĉas la lokon por sin kaŝi kaj fine kaŝiĝas malantaŭ la statuon de Emma, dum ili envenas tra la maldekstra pordo.*)

Ocu. Ĉu vi pensas, ke la afero iros bone?

Tei. Sendube, ĉar *Rjookan* faras tion.

Hei. Se li malsukcesos, ni devos enlitigi kviete hodiaŭ nokte.

Ocu. Estos bone, se malofte.

Hei. Sed mi promesis iri hodiaŭ nokte.

Tei. Tiel same ankaŭ mi.

Hei. Someja atendas min.

Tei. Ankaŭ min atendas iu.

Ocu. Ankaŭ min atendas iu.

Hei. Ni do ĉiuj devas iri.

Ocu. Mi timas, ke tiu *Rjookan* fuŝos la aferon.

Tei. Ne timu. Jam de longe li forĵetis la konsciencen. Li estas knabo, kiu rigardas la konsciencen kiel ĝenaĵon. Por li ŝtelo estas nenio. Li diras, ke la mondo, persekutanta la ŝteliston, estas malbona.

Hei. Jam baldaŭ li devas reveni.

Ocu. La ĉefbonzo, la junaj bonzoj kaj la paĝioj — ĉiuj ankoraŭ sidas, tial li nun eble devas havi malfacilan tempon.

Koo (la kvara juna bonzo, envenas tra la dekstra pordo kaŝante ion en la maniko de sia robo). Ja estis terure malfacila laboro. (*Elprenas orumiton budastatuon el sia robo kaj montras al la aliaj tri.*)

Ocu. Jen vi sukcesis, ĉu ne?

Hei. Ĉu sinjoro ĉefbonzo ne rimarkis?

Tei. Ĉu la paĝioj kaj subbonzoj ne rimarkis vin?

Koo. Eĉ se ni fandos ĝin, ni povos havi gajan tempon du tri fojojn dank' al ĝi.

Ocu. Neniel oni devas ĝin! Certe ĝi havigos al ni tridek rjoojn en tiu formo.

M o r t i n t o

— Frigyes Karintfy —

El la hungara: K. Kalocsay.

Vivanton per frukto regalias somero,
Per vino regalias la vintro
Sed scias mi, kiel mortinto sin nutras:
Per larmoj sin nutras mortinto.

Jes. Kuŝas mortinto sur fundo de tombo,
Kie estas nek frostoj, nek varmo,
Vizaĝ' lia flavas, okul' lia kavas,
Li kuŝas, atendas je larm'.

Kaj kuŝas, atendas: ĉu iu jam plendas,
Kaj kuŝas, atendas sub humo.
Nek dankon li konas, nek petas, nek donas,
Lin logas nek sun', nek lunlumo,

Nek memor' nek esper' nek fora pejzaĝo,
Nur la griza larmsuko, grandkvante.
Kiam krakas la branĉoj kaj zumas la arboj,
Kaj spasmas la gorĝo pulsante.

Kiam ŝmacas la tero, vekiga silento,
Sekiĝas la ostoj en kaŝo,
La ostoj, la kruda, atendas je l'nuda
Barakta, vivanta molaĵo.

Ĉar sciu: se kurbas la buŝo je ploro,
Li plezuras kun ĝoja ridaĉ',
Dum plor' ne forgesu sub molaĵ vizagaĵoj
Pri l' rid' malica de l' ostovizaĝ'.

Ho, kiom mi ploris! Jam tede! Per larmoj
Mordiĝis la koro en brust',
Kiel la supraĵo de olda kupraĵo
Per pigra verdaĵo de rust'.

Mi ploris, kie neniu min vidis,
En aĉaj, malpuraj anguloj,
Ĉar naŭzas ja min kaj abomenigas
Poltrona ploraĉ' de l' okuloj.

Sed se vi pli volas, nur signu, mortinto,
Ne ĉesis festeno, plu daŭras regal',
Se sekos okule la akvo, mi donos
Ja sangon kaj salon, aceton kun gal'.

Disfluos mi larme, sorbiĝos en teron,
Se tion vi volas, mortinto,
El ter' mi vin lavos, el ter' vin elfosoj,
Elvolvos mi vin el tol-viando,

Kaj kun vi ekiros la larmino-rivero,
Ekŝvelos malpure la flu',
Tra l' mur' kaj tombar' la rivero sovaĝa
Inundos, galopos ĝi plu.

Denove diluvo englutu la teron,
Ne restu insulo sen mergo,
Kaj supre de l' akvoj, sur ŝaŭmo de l' akvoj
Arke' de Noah': via ĉerko!

Mortint', ho mortint', vi, patrin' amatin',
Edzino, infano, homfrato!
Elpaŝu el barko kaj sendu mesaĝon,
Kiam bordos vi sur Ararato.

Koo. Denove al Ŝimaŝoo hodiaŭ nokte, ĉu ne?
Tie ni povas fari gaĵon tute laŭ nia maniero.

Hei. Sed ni revenu iom pli frue hodiaŭ nokte. Ni
ne devas lasi, ke la ĉefbonzo suspektu kiel la lastan
fojon. Li ankoraŭ scias, kiel peli sian konsciencon
rilate al alies konduto.

Tei. Sensencaĵo! Kion li povas fari al ni? Por
virino li fordonis Haramita-Kjoo'n propramane skrib-
itan de Sankta Kooŝoo Daiŝi. Se ni malkaŝus tion, li
mem ne povus resti en la templo.

Ocu. Mi ne scias, ke li faris eĉ tian aferon.

Tei. Tio estas nenio; la virinoj, kiuj venas kaj
diras, ke ili estas liaj nevinoj en mondeca rilato, se ni
pripenas, estas ja suspektindaj.

Hei. Ni do ĉiuj kaj eĉ la ĉefbonzo putras.

Tei. Ne nur ni homoj. La Budaoj. La ĉefbonzo
mem rompas la malpermeson kontraŭ virino. La bonzoj
kaj subbonzoj pensas pri nenio, krom propriigi al si
la ofermonon. Ni nia-parte vizitadas al Mijagaŝoo
kaj Hanajimaĉoo. La ekspaziĝo ŝukan rendezvas kun
Oben sekrete. Sed la majesta ĉefbudao povas fari
nenion. Li ne povas puni eĉ unu aferon. Ŝukan blov-
estingas la sanktajn lampojn por la ĵus kisinta buŝo.

Hei. Ni legas Sanktan Skribaĵon transsaltante de
fino al fino.

Tei. Homoj malboniĝas, ĉar Budaoj malboniĝas
unu.

Koo. Ne, ne estas tiel. Ĉar homoj malboniĝas,
Budaoj malboniĝas post ili. En la pasintaj tagoj, kiam
la homoj estis justaj, tiuj Budaoj estis ĉiuj vivaj.

Tei. Ĉiokaze rigardu tiun ĉi Sanktan Emma.
Kvankam ni ŝtelis statuon kaj nun forvendos ĝin, tamen
li povas fari nenion.

Hei. Sed li havas sufiĉe teruran vizaĝon, ĉu ne?

Tei. Estis tempo, kiam, nur pro la vizaĝo terura,
la homoj timis lin. Estis tempo, kiam la homoj kredis
lin nur pro la oraj radioj. Sed hodiaŭ la homoj estas
aliaj; ili iom post iom kutimiĝis al lia terura vizaĝo.
Ili tute ĉesis senti ion ajn pro la eksteraĵo sola.

Ocu. Estas vere. Kiuj timas lin, estas nur la
infanoj sur la dorso de maljunulinoj. De kiam oni
eksciis, ke tiu granda korpo estas simpla timigilo
por teruri homojn, ĝi fariĝis tute sentaŭga.

Hei. Jam devas esti ĉirkaŭ la sepa; ĉu ni nun
ekiru? Eble ili estus lacaj de atendado.

Ocu (*mokeme, kiam li iras proksimen antaŭ
Sankta Emma*). Ni estas homoj kulpaĵ pri ŝtelo,
diboĉo kaj mensogo. Sankta Emma, kiam ni iros en
Inferon, estu al ni indulgema pro nia intimeco, mi
petegas. (*Ridas. La aliaj ridas kun li, kaj tiam li
parolas iom dramece.*) Se mi faras peton tiamaniere,
ni povas fari ian ajn malbonaĵon laŭ nia volo. Nu, ni
ekiru. Ĉu ni drinku en iu drinkejo, he?

Koo. Bone.

Tei. Do ni nun ekiru.

Hei (*okaze rigardante returne al la vizaĝo de
Emma, kiam li ekiras post ili*). Ho, ĝuste nun la okuloj
de Sankta Emma ŝajnis ekbrili.

Koo, Ocu kaj Tei (*iom surprizite, sed rapide
redonante al si trankvilon*). Kiam sensencaĵon vi diras?
(*Hei fikse rigardas al Emma senorte.*)

Ocu. Prefere ol en drinkejo, ni drinku sekrete ĉe
Umegen ekster la malantaŭa pordo. Tie ni povas pagi
poste.

Koo. Estas bona ideo.

Hei. Do ni iru al Umegen.

Tei. Konsentite.

Ocu. Venu do.

GEFRATOJ KUNIGU LA MANOJN!

— Nikolao Hovorka —

Tamburoj tamburas, trumpetoj proklamas:
»Milito, milito, milito ekflamas.«

Pri tempoj heroaj tamburoj tamburas;
Ekaŭdas la knaboj, aŭskulti alkuras.

Aŭskultas volonte virinoj kaj viroj
Rakontojn pri venko kaj gloraj aspirioj.

Jam marŝas la knaboj, trumpetoj trumpetas,
Knabinoj al ili rozflorojn disjetas.

Tamburoj tamburas: »aperis espero«;
Trumpetoj trumpetas: »finiĝos mizero.«

Allogas promesoj, allogas la pompo
Muziko, marŝado, minacoj kaj trompo:

»Se mankas al vi de post longe laboro,
Batalu, militu, kompensas vin gloro!

Malsatas edzino, malsatas infano?
Militu kaj venku, abundos la pano!

Vi volas feliĉon, vivĝojon kaj ĝuon?
Bataŭ kuraĝe, ne timu detruon!

Vin venĝu kaj viajn sopirojn! Frakasu
Kun ĝojo kaj ĝu! Ma'amikojn mortĉasu!

Demandu neniam, ĉu homo ĉu kato,
Demandu nur ĉiam, ĉu trafis la bato!

Kaj se vi la estron fidele obeis,
Jen, kiam l' amas' malamika pereis,

Per vi realiĝos en sanga ebrio
De l' superhomaro la grandimperio.«

Tamburoj tamburas la mortaventuron,
Barbaroj minacas la mondan kulturon.

Amikoj vekigu el sonĝoj kaj dormo
Ho ĉesu vortludi pri normo kaj formo!

Ho ĉesu apogi vin sur iluzioj,
Disigi doktrine en pompaj partioj!

Ĉar dum vi pri ĝustaj komprenoj diskutas,
Satano jam vian proprajon englutas.

Aŭskultu kaj aŭdu: tamburoj tamburas,
Trumpetoj trumpetas, barbaroj alkuras.

Ĉu vi jam forgesis pri ĉia teruro
De l' lasta tulmonda militaventuro?!

Ĉu vi jam forgesis la tombojn militajn,
La sangon verŝitan, la larmojn ploritajn,

Vidvinojn kaj orfojn, blindulojn, kriplulojn,
Malsaton, malsanojn, detruon kaj brulojn,

Diboĉon, maljuston, senhoman perforton,
Mortigajn maŝinojn, blasfemojn kaj morton?

Jen: ĉio ĉi estis nur ludaventuro
Kompare kun nova milita teruro.

Popoloj pereos kaj ne plu nur homoj,
Kaj landoj pereos, ne urboj kaj domoj.

La tero estiĝos homar-kabario:
Nur estos kadavroj, jen unu partio.

Se restos vivanta somerpapilio,
Ĝi povos prip'ori la teron ĉe Dio.

Amikoj, vekigu el sonĝoj kaj dormo!
Ho ĉesu vortludi pri normo kaj formo,

Doktrine diskuti infani'uziojn,
Partigi, disigi la sav-energiojn!

Amikoj, gefratoj kunigu la manojn,
Forigu fantomojn, forpelu tiranojn!

»Eĉ guto malgranda traboras la monton.«
Kuniĝu, komune ni savos la mondon.

Konscia kaj k'lara kaj tre difinita,
Ĝi estas la bazo komuneteklita:

Ega'a jus'eco, spirita libero,
Laboro kaj pano por ĉiuj sur tero,

Liberdukita la homkonscienco,
Spirita batalo, spirita potenco.

La bazon vi savu por firma konstruo
De nova mondord' el milita detruo.

Aŭskultu kaj aŭdu, tamburoj tamburas,
Trumpetoj trumpetas, barbaroj alkuras.

Kunigu la manojn, for'enu fantomojn,
Ni savu la mondon, ni savu la homojn

L' espero, l' obstino kaj la pacienco
Jen estas la signoj, per kies potenco

Ni paŝo post paŝ', en laboro sen laco
Atingos la lumon en gloro kaj paco.

La poeto, membro de la Reorganiza Komitato, rikoltis per sia supra poemo deklamita eble la plej grandan sukceson de nia Literatura Vespere en Parizo.

Hei. Venu do.

Koo (subite rimarkante la statuon en la mano):
Se ni iras al Umegen, tio ĉi estos ĝena.

Ocu. Ni do povas poste reveni por ĝi. Kaŝu ĝin
ie proksime.

Koo. Ĉu oni ne trovos ĝin?

Tei. Mi kaŝos ĝin en bona loko. Ĉiuj rigardu!
(Prenas la statuon de Koo kaj enpuŝas ĝin en la buŝon
de Emma.) Tio ĉi estas fama skulptaĵo kun kavo, tial
estas nenio en la ventro. Se ni metas ĝin ĉi tie, eĉ
Sankta Gaŭtamo ne scios pri tio.

Hei. La aktoro Kogenĵi Joŝizaŭa iam legis tian
linion.

Koo. Ni do iru.

Tei. Ni ekiru.

Hei. Ni ekiru. (Kiam li iras du aŭ tri paŝojn.)
Kiam mi iom rigardas returne tiamaniere li havas
teruran vizaĝon malgraŭ ĉio, ĉu ne?

Tei. Kiom ajn terura estas lia vizaĝo, se ni ludas
per li tiamaniere, li estas senvalora. (Ridas.)

(Ili foriras kune. La juna Sukan elmetas sian
kapon el sub la brako de Emma.)

Sukan. Jen estas friponoj. Sed mi mem ne estas
bonulo miaflanke. Mi kaŝos min ĉi tie ĝis Oben venos.

(Por momento ĉio estas silenta. La knabino,
Oben, bela kaj ĉarma eĉ en la mallumo, envenas ŝtele
tra la maldekstra pordo. Ankaŭ tiu ĉi knabino rigardas
trankvile ĉirkaŭ si, kvazaŭ ŝi neniom timus Emma'n.
Fine ŝi malfermas la dekstran pordon iomete kaj
enrigardas al la ĉefhalo.)

Sukan. Obenjo! (La knabino surprizite provas
forluri.) Estas mi. Estas Sukan. (Sa'tas sur la plankon.)

Oben (iom volupteme). Ho, vi surprizis min.
Malica vi estas; mi pensis, ke min vokis Sankta Emma.
Sukan. Se vi prenas min por Sankta Emma, ĉio

estas finita. Sed eĉ mi mem konsideras min kiel pli bonan ol Sankta Emma.

Oben. Kvankam via vizaĝo estas bela, ĉu vi ne estas pli malbona ol Sankta Emma en la rolo, kaptante kaj formangante la homojn kvazaŭ mortintajn de amo?

Sukan. Ĉar mi hodiaŭ nokte vidis vin post longa tempo, ni ĉesu ĵeti malicajn vortojn inter nin kaj parolu pri nia amasiĝinta amo. Vi venis absurde malfrue, ĉu ne?

Oben. Patrino iris al la teatro en Kimiŭakamaĉi kaj revenis terure malfrue.

Sukan. Ĉiuokaze, mi ĝojas, ke vi estas ĉi tie.

Oben. Ĉu mi povus ne veni? Vi vidis la leteron, en kiu mi enfermis la ofermonon kaj lasis hireaŭ, ĉu ne?

Sukan. De nun vi devas ĉesigi tiajn riskajn ruzaĵojn.

Oben. Ne riskaj tamen. La ĉefbonzo ŝatas vin kaj vi traktas la tutan ofermonon. Eĉ se ĉio estus malkovrita kaj vi estus forpelita de la templo, mi nur povas preni vin al mia domo kaj karesi vin.

Sukan. Sed mi ne konsentos forlasi la templon. Vi iam vidos, ke ĉi tiu granda templo Ĉitokuin estos mia.

Oben. Naiva, vi estas naiva. Kiu povus aŭskulti serioze tion, kion la ĉefbonzo diris por amuzi vin, kiam vi estis malgranda paĝio?

Sukan. Atendu Oben. Ne taksu min tro facile. Estas vere, ke mi estas bonzo kun razita kapo, sed la ĉefbonzo estas ĝuste kiel pupo en mia mano. Observu

min, ĉar mi baldaŭ montros al vi, kiel mi regas la tutan Ĉitokuin eĉ malsupre ĝis la polvo sub la vestiblo.

Oben. Naivulo! Se tia homo kiel vi fariĝos la ĉefo, Ĉitokuin estos en bonega stato.

Sukan. Sensencaĵo! Ĝi ne povas fariĝi pli malbona ol ĝi nun estas. Vi vidis kolorpresaĵon, kiu mi donis al vi antaŭ nelonge, ĉu ne? La ĉefbonzo sin amuzas rigardante tiajn bildojn.

Oben. Dio!

Sukan. Ĝi plaĉis ankaŭ al vi, ĉu ne?

Oben. Komprenoble jes. Mi portas ĝin ĉebruste. (Elprenas la bildon el sia brusto.) Io sur tiu ĉi junulino rememorigas vin. Io sur la flanko de ŝia nazo kaj buŝo rememorigas vin.

Sukan. Tiu ĉi, knabino, estas Tamanosuke Mineŝima de l' Jamamura Teatro en Nara, la plej granda danto en la tri provincoj.

Oben. Sed mi ŝatas vin pli multe.

Sukan. Tio estas komprenebla. Min, kiam mi estis dekonujara, petis la templo kaj Hiŝigane-no-Kongoo. La templo proponis dek rjoojn pli multe por mi, tial fine mi fariĝis razkapulo tiamaniere. Se mi surmetus la ĉapelon de katamito, mi ne estus venkita de l' tridekunu favoratoj de tiu ĉi urbejo.

Oben. Vi parolas brave, ĉu ne?

Sukan. Dum mi ankoraŭ portis la harligon antaŭe, mi estis prikantata eĉ en kanteto kiel Hidenoo de Ĉitokuin. Eĉ nun estas tre domaĝe, ke mi estas lokita por bruligi incenson.

Oben. Vi do neniam pensis sincere pri la aferoj de Budaoj, ĉu ne?



Roland Oudot

Afrodite

Sukan. Komprenoble ne. Al tiuj, kiuj preĝas al Budaoj nur de tempo al tempo, ili povus ŝajni bonfarantaj, sed se iu prizorgas ilin matene kaj vespere kiel mi, tiu fine tediĝas kaj volas prefere rompi ilin en pecojn. Ĉar ili estas tuj apude ĉiutage, li sufiĉe sciigas, ke ili estas faritaj el ligno, kaj kiel ajn peneli provas pensi alie, li ne povas trovi ilin bonfarantaj. Bonzoj estas la plej malpiaj homoj en la mondo, mokante la Budaojn. La ĉefbonzo, eĉ ne lavante la buŝon post manĝado de kaviaro kun rizbrando, rekte sin turnas al la recitado de Sankta Skribaĵo. La junaj bonzoj iras al Hanaĵimamaĉi en ĉiu nokto. Versajne estas nur mi sola, kiu faras nenion.

Oben. Kaj vi ĉi tie faras amrendevuon kun mi tiamaniere, ĉu ne?

Sukan. Sensencaĵo! Mia peko estas kiel nenio. Krom la konkubulino, la ĉefbonzo havas kelkajn virinojn, kiujn li nomas siaj nevinoj. Kiam li purigas la ĉefstatuon, li traktas ĝin kiel pecon da ligno. Li ĉiam plendas, ke ne venas enterigpetoj. Li diras kutime, ke li deziras morton al la maljunulo de Naraja. Tio estas, ĉar la maljunulo promesis kontribuon de mil rĵooj por havi la mezon porsu eterne. Se ni turnas nin al la junaj bonzoj, ili estas duoble pli malbonaj. Hodiaŭ ili ŝtelis la sanktan trezorstatuon de Seiŝi Bosacu kaj intencas vendi ĝin por kovri la elspezon en Hanaĵimamaĉi. Kaj ĉu vi povas kredi, se mi diros, ke ili kaŝis ĝin en la ventron de Sankta Emma? Pro la aferoj irantaj tiamaniere, la mondo pereos en malbonaj tagoj, ĉar la rigardego de la Reĝo de Infero havas neniom da efekte. (*Irasi al Emma kaj karesas lian vangon.*) Vi vere devas doni al vi pli da streĉo, ĉu ne, sinjoro Emma?

Oben. Mi ne ŝatas, ke vi iras al li tiel proksimen. Oni diras, ke li amas junulojn.

Sukan. Mi memoras, ke mi iam legis tian rakonton en iu legolibro. Sed kiel li povus amindumi per tia vizaĝo? Ni du pare montru al li nian amon. Ĉu ne, sinjoro Emma? (*Denove karesas la vizaĝon de Emma moke.*)

Oben. Sed ĉu vi neniom sentas timon de Sankta Emma?

Sukan. Kial?

Oben. Mi ne timas lin kutime, sed kiam mi profundigas en amon kun vi kaj okaze ekrigardas lian vizaĝon, mi ofte sentas froston sur la dorso.

Sukan. Tio neniam okazas al mi. Ni estas tre intimaj, jam de kiam mi estis dekanu aŭ dekd. Ĉu ne sinjoro Emma? (*Denove donas kareson frapeton al la vizaĝo de Emma.*) Mi ŝtelis oferkukojn kaj ĉiam alportis ĉi tien kaj manĝis ilin.

Oben. Mi dubas, ĉu Sankta Emma kaj la Budaoj efektive ne havas potencan por fari ion. Ĉar ili devas fari ion al tiuj, kiuj ŝtelas statuon.

Sukan. Kaj samtempe ili devas fari la samon ankaŭ al la fripono, kiu pekas kun virino antaŭ iliaj okuloj. (*Denove frapetas la vizaĝon de Emma.*)

Oben (iom serioze). He, vi devas ne tiel moki Sanktan Emma. Ĉu vi ne agas tro senbride?

Sukan. Kiu agas senbride? Kiam mi estis malgranda, ankaŭ mi pensis la Budaojn kaj Sanktan Emma tre grandaj, sed observante ĉion ĉiam, mi sciigis, ke ili estas tute senpotencaj. Kian ajn malbonaĵon faras la ĉefbonzo kaj la junaj bonzoj, ili povas fari nenion. Ĉar mi pensis, ke li estas trompanto, mi iam kraĉis prove sur la vizaĝon de Sankta Emma, sed nenia puno falis sur min. De tiam mi pensas pri li, kiel pri peco da ligno. Tio estas vero, ĉu ne Emma?

Du sonetoj

— W. B. Johnson —

I.

*Mallume griza tago pluvinaca
Vesperon fruan falsis dum tagmezo,
Kaj eĉ la febran urbon ĝia pezo
Ŝajnis somnambulo morte laca.*

*Surstrate la trafiko pruvis brue
Normalan vivon de la urbiganto;
Sed kvazaŭ ĝojperdinta funebranto,
Rutinin sian sekvis ĝi enue.*

*Subite al la urbo venis lumo:
Penetris suno sian nubembuskon,
Venkante per heliga palpebrumo
La grizajn apation kaj krepuskon.*

*Ho, Suno mia, faru reaperon
Kaj petu for tro fruan viv-vesperon!*

II.

*Plezure mi a'endis vin hodiaŭ,
Vagante sur perono stacidoma;
Ĉar tie regis sento varme homa —
»Bonvenon!«, oni kriis, kaj: »Adiaŭ!«*

*Okulojn delika'e nebuligis
Disĝo de ama'a forironto,
Kaj amikaro, ĝoja pro renkonto,
Ke'kope siajn brakojn interligis.*

*Momente mi ekdub's pri l' sincero,
Trov'nte ĝin ĉe homoj nekutima.
Tro ofte sub la ĉarmo de l' ekstero
Maskiĝas nur perfid' malgrandanima.*

*Sed ĝuste tiam venis vi, amiko, —
Forflugis dub', kaj mortis la ciniko!*

Vi estas nenio alia ol peco da ligno, ĉu ne? Kion vi diros? Se tio ofendas vin, faru kion ajn pro tio. He, Emma! Emĉjo! Eĉjo! (*Donas resonantan survangon al Emma.*)

Oben. Ho, mia kara! Ne agu tiel malpie.

Sukan. Sensencaĵo! Al tia aĵo jen tiamaniere! (*Levas la piedon kaj piedfrapas lian ventron.*)

Oben (per iom penika voĉo). Guste nun la okuloj de Sankta Emma ŝajnis ekbrili.

Sukan. Malsaĝaĵo! Ĉu li estas kapabla je tia sprita artifiko? (*Donas al li alian piedfrapon.*)

Oben. Ho, kara. Jam vi devas ĉesi. Ial mi nun sentas min nervoza. Supozu, ke ekzistas Infero.

Sukan. Kiuj laboras kiel bonzoj, tiuj neniam havas kredon, ke ekzistas Infero. La Halo de Emma ĉe Ĉitokuin ŝuldas sian kontsruigon al la enviemo de la ĉefbonzo kiu vidis la rimarkindan prosperecon de la Emma ĉe la najbara templo Daiĵanĵi en servistaj libertagoj. En la fina analizo, li estas instrumento por elpremi la poŝmonon de komize'oj. Ĉu ne vere, Emĉjo! (*Donas al li alian fortan piedfrapon.*)

Oben. Jam ĉesu. Ial mi sentas froston kaj mi tremetas. Ha, rigardu! Ĉu vi ne vidas, ke la okuloj de Sankta Emma tiel brilas?

Sukan (fine amuzite de la timo de Oben). Sen-

sencaĵo! Tio estas de via nervozeco. Estas pli bone timi la vilan hundon en la strate'lo, ol timi tian aĵon. Ĝi povas okaze mordi vin.

Oben. Sed, kara, li aspektas pli terure ol kutime.

Sukan. Povas esti do, ke li havas kapdoloron pro mia piedfrapo tro ripetita. Ne, estas pli verŝajne, ke li havas ventrodo'oron, ĉar li devis manĝi la statuon de Seiŝi Bosacu. Ĉu mi elprenu ĝin? (Iras sur la altan plankon de Emma kaj enmetante la manon profunde en la buŝon de Emma, serĉas la statuon.) De nun estu pli atenta kaj ne lasu vin uzi kiel kaŝejon de ŝtelajoj. Kun tiel granda trunko, vi estas tute malkuraĝa, ĉu ne? Ne estas sufiĉe por vi simple elpreni la poŝmonon de komizetoj. Hola! Ĝi estas en lia gorgo kaj ne elvenas facile. Hola, Emĉjo! Malfermu la buŝon pli larĝe.

Oben. Kara, la okuloj de Sankta Emma ŝajnis ekbrili kaj moviĝi. Jam es'u sufiĉe. Jen, ĉu vi ne vidas, kiel liaj okuloj brilas?

Sukan (al Emma pers'iste). Ŝajne vi ankoraŭ povas timigi nur virinojn, ĉu ne?

Oben (kun la plej panika emocio). Ho, liaj okuloj moviĝas refoje.

Sukan (ankoraŭ persiste). Malsaĝaĵo! Ho! Ĝi tute ne elvenas. Emĉjo! Malfermu la buŝon pli larĝe, mi diras. (*Fine elprenas la statuon de Seiŝi Bosacu.*) Ili faris teruran aferon, ĉu ne? Aŭskultu, karulino, tio ĉi estas la sankta statuo de Seiŝi Bosacu el pura oro, trezoro necesega al Ĉitokuin.

Oben. Vi tiel mokis Sanktan Emma, ke mi timas, ke li malbenos vin iamaniere.

Sukan. Ĉu vi supozas, ke li estas tiel sentema? Sed atendu! Kiel ajn ni pensas, estas damuinde, ke tiu ĉi Seiŝi Bosacu ŝanĝiĝu en la kapitalon de junul-aĉoj por iri al Hanaĵimamaĉi. Estus multe, multe pli bone por Sukan kaŝi ĝin ie sekrete, ol lasi al tiuj friponoj forvendi ĝin malkare. (*Parolante enmetas la statuon en sian bruston. Ĝuste tiam aŭdiĝas la junaj bonzoj revenantaj en ebrieto kantante baladon. Sukan konfuzite.*) Ho, ili revenis. Venu, Oben! Ni devas nin kaŝi.

(*Ili rapide sin kaŝas malantaŭ Emma. La junaj bonzoj. Koo, Ocu, Hei kaj Tei envenas.*)

Koo. Ha, mi sentas min agrable.

Ocu. Se ni iros nun, ni estos tie ĝustatempe.

Hei. Estos tre interese iri Naŭate-straton dum kantado.

Koo. Krome, ni havas monon abunde. (*Al Tei.*) Nu, elprenu la statuon.

Tei. Jes, bone. (*Iras al Emma kaj enmetas la manon en lian buŝon.*) He!

Koo. Kio estas?

Tei. Estas strange. Mi ne povas trovi ĝin facile.

Koo. Retiru vin. Kiel tia absurdaĵo povas esti? (*Prenas la lokon de Tei kaj serĉas profunde.*) Estas strange. Ĝi vere ne estas ĉi tie.

Ocu. Ŝajnas neeble, ke iu estis ĉi tie, ĉu ne?

Hei (ŝajne iom frapite de paniko). Strange. Ĝi ne povas malaperi en malpli ol unu horo, ĉu ne?

Koo (ankoraŭ serĉante en la ventro de Emma). Ĝi ne povas malaperi en tiu ĉi malgranda stomako, sed — (*Al Tei.*) Ĉu vi certe enmetis ĝin?

Tei. Certe! Ĉu vi ĉiuj ne vidis min?

Hei (nun ŝajne en pli granda paniko). Ĝi estas Cukehimo Emma de Ĉitokuin, formanginta infanojn en la pasinta tempo.

Koo. Kiel sensence vi parolas? (*Parolante retiriĝas de Emma timeme.*)

Hei. Jen, ĉu mi ne diris al vi? Mi diris al vi jam ĉe la komenco. Mi diris, ke ni neniel devas esti tiel malpiaj, ke ni tuŝu al Seiŝi Bosacu. Kiel la protektanta dio de la ĉefepiskopo Rjooen, ĝi estas mirinde sankta statuo, tial mi pensis de la komenco, ke kiel ajn degenerinta la mondo estas nun, ni devas dece nin deteni de ĝi.

Tei. Rigardu! Rigardu la vizaĝon de Sankta Emma! Li aspektas terure. Mi ial sentas nekomforte.

Koo. Kiel sensence vi parolas!

Hei. Mi ial sentas frostotremon. Ho, eĉ sekundon mi ne volas resti en tia loko. (*Retiriĝinte ĝis la pordo, subite ekkuras en granda rapideco.*)

Tei. Ankaŭ mi sentas froston en la korpo. Permesu min antaŭiri.

Ocu. Malkuraĝuloj, vere! Sed ankaŭ mi rememoris aferon, kiu ne permesas min resti tie ĉi tiamaniere. (*Hezitas, sed subite forkuras.*)

Koo. Ili ĉiuj estas malkuraĝuloj, vere! Sed neniom mi utilas restante tie ĉi sola. (*Sekvas la aliajn forkurante.*)

(*Oben elrampas el malantaŭ Emma kaj estas forkuronta. Sukan kuratingante ŝin.*)

Sukan. Pro kio vi timas? Ili estas facile kaj tute superruzitaj de mi.

Oben. Lasu min iri! Mi tremas kaj ne povas elporti. Kaj ial mi sentas teruron restante apud vi. (*Parolante forŝiras sin de la manoj de Sukan kaj forkuras.*)

Sukan (restas sole). Kia kolekto da malsaĝuloj! (*Ridegas. Tiam kvazaŭ subite sentante panikon, veninta al li kun la malplena eĥo de lia ridego.*) Ankaŭ mi ial sentas froston. (*Okaze rigardante la vizaĝon de*



Eisenschitz

Nudo

Grava eltrovo

— L. L. Caragiale —

Venis iun dimanĉon Diabĉjo al Dio kaj diris:

— Dio! Kial vi streĉas vian cerbon pro la homoj? .. Ĉu ne vidas via sankta moŝto, kiaj sentaŭguloj ili estas? .. Donu ilin fine al mi kaj liberigu de ili! Domaĝe pri la zorgo de via sankta moŝto: ili estas malbonanimaj kaj stultaj!

Sed Dio — li ne tro havis parolemon, tiun tagon — diris malafable:

— Malaperu de ĉi tie, nigrulo kaj ribelulo, ĉar mi ne volas aŭdi hodiaŭ, dimanĉe, tiajn akuzajn vortojn...

— Dio...

— Kiel ili povas esti stultaj, se mi faris ilin ĝuste laŭ mia figuro kaj aspekto?! Ha?

— Vi faris ilin laŭ la figuro, sed vi eraris pri ili ĉe la kapo, ne koleru via sankta moŝto.

— Silentu kaj malaperu, pesimisto! — diris Dio tre malmilde, — ke mi ne koleru!... Kial vi uzas mensogojn kaj kalumniojn kaj imagaĵojn viaspecajn?... Kiel ili estas stultaj?... mi ne vidas ilin stultaj!

— He! sankta moŝto, — diris Diabĉjo, — vi ne vidas ilin, ĉar vi ne tro iras de kelka tempo al ili, de kiam okazis al vi — sed min pardonu via sankta moŝto ke mi kuraĝas — tiu afero, hm... kiam ili malrespektis vin, estu respektata via sankta moŝto...

— Kiu afero — demandis Dio sulkigante la frunton kaj ŝajnigante ke li ne memoras, — aŭ, ĉu mi scias? eble li vere jam forgesis, ĉar, al Dio, kio ne estas ebla?

— He, kiu afero?... kun la du rabistoj... en la mezo... sur Golgoto, nu...

— Bone, bone, — diris Dio provante ŝanĝi la temon... — Vi... ĉu vi estis lastatempe tie, ĉe ili?

— Sed kie mi pasigadas mian tempon, mastro? Ĉe ili kaj kun ili; tage kaj nokte, senmanke: eĉ dum la dormo mi ne lasas ilin... Kiu edukas ilin? Kiu zorgas pri ili? Kiu instigas ilin al bonfaro? Sed se ili estas stultaj!... De kiam mi jam instruas ilin!? vane: ili estas stultaj.

— Bone, bone, — diris Sankta Petro, vidante ke Dio ĉagreniĝis, — ni scias kiel kleraĉa vi estas; sed Dio volas pruvojn, ne vortojn... Nu, ne plu konfuzu nin! foriru aŭ mi plilongigos viajn orelojn ankoraŭ iomete!

Kion faru la kompatinda Diabĉjo? Li foriris, ĉar li sciis, ke Sankta Petro ne ŝercas. Sed kion li diris al ŝi mem enpense, la demono?

— Pruvojn vi deziras? Mi donos al vi ankaŭ pruvojn... tiel ke vi satiĝos.

Kaj li ekiris... kaj iris, ĝis li atingis germanan urbon, inter du grandaj kaj belaj riveroj, ĝuste okcidente. Kiam li volis eniri tra la pordego, jen li ekaŭdis la vesperan sonoradon.

Ektremegis Diabĉjo kaj haltis. Li tiel staris kun

rondumita vosto kaj kun la ungegoj profundigitaj en la poŝo, ĝis tute, tute estingiĝis la lasta postsono de la sonoriloj.

Tiam li eniris mallaŭte-mallaŭtete en la urbon kaj tuj renkontis germanon kun barbo longa ĝis la talio.

— *Guten Abend!* — *Guten Abend!* — *Wie geht's?* *Wie steht's, Herr von Gutenberg?* (Jen, Diabĉjo konis la lingvon kaj la nomon de la homo).

Kaj... ili interamikigiĝis kaj, tion-alion, alion-tion, ili iris en bierejon.

Kion ili interparolis tie, kion ili interkonsiliĝis, kion li flustris al la germano — Diabĉjo scias; sufiĉas diri ke la germano ne povis dormi la tutan nokton pro pensoj... Poste alian nokton kaj aliajn multajn same; ne povis la homo fermi la okulojn. Li cerbumis kun la ideoj kaj kun la planoj, li tordiĝis, li baraktis, li turmentigiĝis ĝis li ekkomprenis kaj... kaj li finfine eltrovis la presarton.

— Poste... atentu, papero, ke vi ne ŝirigu! Preso kaj presado...

Komence ĝi funkciis, kiom bone ĝi funkciis, malrapide. Poste, kio pasas tra la cerbo de Diabĉjo? Li metas radon al la maŝino kaj kiam li vidas ke la rado rondiras malrapidete, jen li aljetiĝas, li alkroĉas la voston al radradio kaj ĝi komencas rondiregon, ke ĝi knaras kaj ne plu estas videblaj la radradioj, kaj li sukcesas presi hodiaŭ 500.000 foliojn laŭ numero 12 pohore; li presas ilin, li numerumas ilin, li kunfaldas ilin, li algluas la adresojn kaj la poŝmarkojn kaj, — rekte al la poŝtejo kaj poste al la fervojo, kaj tie ĉi Diabĉjo denove kun la vosto sur radradio, kaj veturas pohore sesdek kilometrojn kaj eĉ pli, pro rapidemo disdoni siajn bonaĵojn.

Kaj kion ekaŭdis foje Sankta Petro? Bruegon kaj skandalon de ĉe la pordego de la paradizo, ke oni povis pensi ke venas la barbaroj, ne alie: — fajfoj, raŭkoj, sonoroj, kaj kia fumo... Kio estas? Kio estas?

Estas Diabĉjo kun varvagonaro, ŝarĝita per ĉiuspecaj *Biblioj, Leĝaroj, Gazetoj, Revuoj malnovaj, Revuoj novaj*, kaj aliaj — ĉiujn li malŝarĝis kaj rekte al Dio kun ili. Diras Dio:

— Vi ree venis, malbonulo?

— Ree, Dio.

— Kio nova?

— Jen, Dio, mi venis kun tiuj ĉi paperoj; pruvojn vi postulis, pruvojn mi alportis. Rigardu nur! mi petas, Sankta Petro, prenu viajn okulvitrojn kaj rigardu...

Kaj komencis Diabĉjo montri al Dio kaj al Sankta Petro la aĵojn. Dio rigardas, la sankta apostolo rigardas, kaj komencis ambaŭ grati sin ĉe la barboj kaj interrigardi sin profunde per iliaj saĝecaj okuloj.

— Ĉu estas vere, Dio? — demandis Diabĉjo.

Emma.) Gi estas terura vizaĝo malgraŭ ĉio. Kiam mi restas sola ĉi tie, mi komencas tremeti. Mi ial sentas malkomforte. Do, ankaŭ mi forkuru. (*Estas forrapidonta, sed subite rememorante la statuon de Seiŝi Bosacu en sia brusto.*) Ha, kun tia afero mi sentas min pli malbone. (*Elprenas la statuon, metas ĝin zorgeme sur la genuojn de Emma kaj sin forpafas. Tiam Koo, Ocu, Hei kaj Tei revenas.*)

Koo. Jen, ĉu mi ne diris al vi? Ĉar Oben elkuris post ni, certe ŝi estis kun tiu Ŝukan en la Halo de Emma denove. Se ni kaptos lin, ni povos ekscii, kie nun estas Seiŝi Bosacu.

Ocu. Vi estas prava. Ni tute ne bezonas timi Sanktan Emma.

(*Ili iras proksimen al Emma kaj vidas la majestatan kaj radiantan oran statuon de Seiŝi Bosacu sidanta trankvile sur siaj genuoj.*)

Koo (surprizite). Ha! Jen ĝi estas ĉi tie.

Ocu. Ho!

Hei. Jen ĝi estas.

Tei. Gi estas.

Hei (kvazaŭ frapite de ia inspiro). Estas mirinde. Gi sidas tie ĉi preta por kulto. Kia sankta figuro!

(*Koo, Ocu kaj Tei staras konsternite kaj silentas.*)

Hei. Gi faris tiun ĉi mirindaĵon por nin admoni pro nia renegateco. Mi definitive min reformos. (*Surgenuiĝas kaj adorkliniĝas.*)

Tei. Estas mirinde! Estas mirinde! Ankaŭ mi intencas for asi misagojn. (*Surgenuiĝas.*)

(*Koo kaj Ocu, duone kredante kaj duone dubante, sekvas ilian ekzemplon kaj surgenuiĝas.*)

(Kurteno)

El la japana: *Joŝisi Simomura.*

Sed Dio ne respondis.

— Ĉu estas vere, Sankta Petro?

Sankta Petro... muta.

— Nu? Kion vi nun volas? demandis Dio.

— Ke vi donu ilin al mi, kiel estis la konsento.

— Do, prenu ilin fine kaj lasu min en paco! —
diras Dio enue...

Diabĉjo volas foriri.

— Haltu! kien vi iras, malpurulo!

— Mi iras preni ilin.

MIA ANGULO

— JULIO BAGHY —

Karikaturoj

La propagandisto

Li estas konstante ebria pro siaj ideoj. Li rifuzas manĝi viandon, naŭze turnas sin for de la fumantoj, kondamnas eĉ la biertrinkantojn je frua morto aŭ je mensa bankrotiĝo. Pro naturamikeco li havas nur sandalojn kaj obstine lasas hejme sian ĉapelon. Pro sia proleta mondpercepto li rifuzas la lukson de kolum- kaj kravatportado, sed por demonstraciŭ pri sia neŭtralisma interna ideo li ne toleras la verdan stelon kun ruĝa kadro en la butonruo de sia jako. La ruĝa kadro estas politiko. Li estas membro de U. E. A. kaj de S. A. T. Li havas membrokartojn de I. K. U. E. kaj de U. H. A. Li estas santempa aprobanto de pastro Andreo Ĉe kaj s-ro Robert Kreuz. Li havas provizon da elastaj argumentoj en la krepo kaj faskegon da diversaj presajoj en sia akutujo.

Al ŝovinistoj li parolas pri l' uzo de Esperanto dum la mondmilito en la germana propagando kaj avertas, ke la burĝa ideologio, baldaŭ falos se la amikoj de l' nuna mondordo cedas Esperanton kiel monopolon al la proletaro. Al pacifistoj li asertas, ke la germanoj estas venkitaj pro l' misuzo de Esperanto kaj Pan-Eŭroĝo aŭ U. S. E. ne estas atingebla sen tiu ĉi lingvo. Al klaskonsciaj laboristoj li proponas la lingvon el vidpunkto de internacismo kaj promesas per ĝi baldaŭan faligon de l' kapitalismo. Al kapitalistoj li aŭguras nepran kaj centprocentan profiton per la enkonduko de la lingvo. Al katolikoj li predikas pri »Unu ŝafisto kaj unu ŝafejo«, en kiu la ŝafaro nur Esperanton blekante povos kompreni unu la alian, kaj li ne forgesas menciŭ, ke malgraŭ tio, ke »tiu« Zamenhof estis judo, tamen li havis krucifikson en sia laborĉambro laŭ aserto de E. Privat. Al protestantoj li montras la Bibliion, kaj eĉ judoj li prisilentas la krucifikson kaj per memfarita geneologio li klopodas pruvŭ, ke la Majstro devenis rekte de reĝo Davido kaj pro tio ĉiu judo plenumas gentan devon lernante la lingvon.

La unuan fojon mi renkontis lin en kafejo. Por pli komforte observi lin, mi kaŝis mian verdan stelon. Li staris kaj parolis al siaj »disciploj«.

— Jes, karaj ĝeamikaroj, mi estas la homo de la praktikko. Neniam mi lernis Esperanto el libron. Min ne interesigas la gramatikon, ĉar ĝi malfaciligas la uzado de la lingvon.

— Tuj oni povas konstati tion — rimarkis iu el la rondo de l' »ĝeamikaroj«.

— Kial? Ĉu pri tiun malbenitan akuzativon? — li temperamente sin defendis. — La akuzativo ne gravas. La plej efa estas la praktikko kaj la interna ideo sen aŭ kun akuzativon... Mi volas raportigi pri miaj sukcessoj. — Li prenis notlibreton el sia poŝo kaj laŭlegis. — Sabate: algluo de du mil sigelmarmoj en ĉiu vagono de la subteraj fervojoj. Ok horojn mi laboris sub la tero.

— Kiel? ... Kaj tiujn ĉi paperaĉojn al kiu vi lasas? Forprenu ilin kaj ne plu aperu kun tiaj stultajoj, ĉar mi ordonos al Petro detranĉi al vi la voston! Ĉu vi bone aŭdis?

Kiam aŭdis Diabĉjo tion, — li prenis rapideme la ajaron kaj kuŝt! per la sama vojo, revenis kun la vosto inter la piedoj.


Kaj tiel, li instruis al la homoj fari bibliotekojn kaj Naciajn Akademiojn, por ke la tempo ne povu detrui iliajn saĝecojn!

El la rumana: Peire Firu.

Elspezo nur 70 centimojn, kiuj vi redonos al mi el la propaganda kasso. Dimanĉe: mi partoprenis en ekskurson. Vestita en mia propaganda kostumino kun la broditaj verdaj steloj kaj kun la surskribo »Lernu Esperanto!«, »Vivu Esperanton!« mi trabiciklis la urbo kaj la arbaro. Nepriskribebla sukcesso. Ĝis raŭkiĝo mi parolis kaj disdonis tri mil diversajn folioj kaj vendis eĉ du gramatikkkkoj. Oni promessis rigardi nin. Elspezo ne estis. Lunde: mi faris planon por mardo. Elspezo unu folio da skribpapiro dek centimojn. Marde mi kontrolis la lunde farita plano kaj vespere mi vizitis la kunvenejon de la Verda koko, kie mi vendis dek kvin insignoj. La vendiĝo donas profito 20 frankoj al la propaganda kasso. Merkrede mi legis la leteroj, kiuj alvenis dum la lastajn tagojn. Terurra laborro. Multaj samideanoj uzas tiaj vortoj, kiuj mi ne renkontigas en mian praktikkkkon. Zamenhof diris, ke la stilo estu simpla kaj komprenebla. Elspezo 5 frankoj por vortaron. Jaŭde: mi renkontis kun unu viro sur unu strato. Li demandis pri la verda stelo en mia jako. Poste mi eksciis, ke tio viro antaŭ tagoj liberigis el la malliberejo. Li estis viktimo de sia amikkko, kiu devigis lin ĉirkaŭbiri kaj prirabi l' monŝrankon de banko. Tuj venis al mi ideo: mi faros li esperantiston.

— Tio estas troigo! Finfine kio okazus, se ĉiu fripono, ĉarlatano kaj ŝtelisto lernus Esperanton? — li indignite demandis.

— Mi faris ankaŭ la sama demando al mi kaj mi trovis, ke ĉiu malutilo portas utiloj. Se la friponoj organizigos sin kaj lernos Esperanto, fine la polico devos akcepti nian karan lingvon kun la interna ideo. Jes, la interna ideo! Guste la friponoj bezonnnas ĝin. Kion diras la interna ideo? Amu unu la alia! Nu, nu, la friponoj amos unu la alia kaj amos ĉiun verdstelulo kaj Esper-



Takanori Ogniss

Malnovaj domoj

anto fariĝos plej bona assekuro kontraŭ ili kaj ni savos la mondo per Esperanto. Vivu Esperanton!

— Vivu! Vivu! Vivu! — tondris la »geamikaroj«.

— Sen akuzativo — rimarkis obstinulo.

— Efektive estus pli oportune sen akuzativon, sed mi estas ĝisosta fundamentisto kaj min interesiĝas ne la lingvo, nur la praktikokko... Sed nun, karaj geamikaroj, ni kantu nian grupan himnon! Laŭte! Forte, kuraĝe! Elegante, por ke (ne porke!) la homoj sciu sur la strato, ke ni praktikokkas nia kara lingvon. Dum, unu... du... tri... Uf!

Ve-erda Ste-elo, ni-aa ce-clo,
Esta-as vi niŭia sort',
Esta-as vi niŭia sport'.
Trala lalala! Trala lalala!
So-o-onu la ka-a-anto!
Vivu do, vivu do, vivu do
E-e-e-espera-a-anto
kaj la »intern' ide'«!

Mi devas konfesi ke la efiko ne forestis. Ĉe la pordo baldaŭ granda amaso ĝuis ridetante la himnoblekadon de la »geamikaroj«. La duan strofon mi jam ne aŭskultis. Mi rifugiĝis el la kafejo. Neniam plu mi miros pri fiasko de zorge preparitaj planoj. La »praktikokko« mortkantas ilin. La »praktikokko« ne interesas la gramatikaj reguloj, nek la riĉiĝo de la vortaro, nek la literatura evoluo. La »praktikokko« bezonas nur la »intern' ide'«-on kaj la broditajn verdajn stelojn, laŭeble eĉ sur la kalsono. Se Esperanto iam venkos, tio okazos spite al siaj »fervoraj propagandistoj«, kiuj nur praktikokkas kaj praktikokkas.

Ho, bonvolaj naivuloj, kreu al malnova proverbo: »Per tamburono oni ne kaptas paseron«.

D I S K U T O

PRI NEUTRA GRAMATIKA SEKSO.

»Grandegan malfacilecon prezentas por la lernanto la memorado de la sekso de ĉiu substantivo en la naturaj lingvoj« —
Zamenhof.

Ci suprajn vortojn mi trovas en la »Plena Vortaro de Esp.«, kiu ankaŭ samloke donas al ni ian eltiraĵon, nome:

»Ekzistas tri gramatikaj seksoj, la vira, la ina, kaj la neŭtra, kiu apartenas al la senseksaj aferoj«.

La tria sekso, neŭtra, en la angla lingvo dividigas en »komuna« kaj »neŭtra«, sed efektive la »komuna« sekso estas absurdaĵo, kaj nur ekzistas ĉe hermafroditoj. Eĉ en pure gramatika signifo la »komuna« sekso estas neblajo, krom ĉe pluralaj vortoj kiel »gepatroj«, »gebovoj« k. t. p. ne uzeblaj en singularo.

Sed, krom la »ge«-aj vortoj ekzistas en la esp-a literaturo tendenco uzi kun insekse signifo vortojn, al kiuj oni ordinare atribuas gramatikan vort-sekson laŭ la kunteksto. Efektive, ĉi tiu tendenco kontraŭas la pure sciencajn kaj logikajn konstruon de nia lingvo.

Interesa ebla sekvo de la supre menciita tendenco estos, ke la situacio de la virinsekso gramatike fariĝas pli supera en Esp-o, ol en iu alia lingvo. Ni trovas, ke la malforta sekso rajtos uzi por si tiel la formon nun kutime uzitan por virsekso kiel ankaŭ sian propran inan. Antaŭ ne longe sinjoro E. ricevis leteron de amik(in)o, en kiu ŝi skribis:

»Mi estas anglo«.

»Jen«, diris Sinjoro E. al mi, »Jen la sekvo de tio, ke Asquith, Lloyd George kaj Bonar Law donis la voĉrajton al la virino«.

»Tute ne«, mi respondis, »Oni devas kulpigi Paul Bennemann«.

»Kiel??«

Mi montris al Sro. E. libron »Tra la Mondo« I, tiun klasike kompilitan legolibron de Paul Bennemann, kaj sur paĝo 69 mi indikis la sekvon:

»Ĉiu el la kaproj havis sian apartan malgrandan mangujon, el kiu ĝi tiris fojnon aŭ trifolion, dum ni melkis ĝin«.

Sro. E. strabe rigardis min.

»Klarigu!«, li demandis.

»Eble la anglino, kiu estas ankaŭ anglo«, mi respondis, »aŭ la anglo, kiu estas ankaŭ anglo — ĉar verŝajne —«

»Daŭrigu«, mallonge ordonis E. malvarme.

»Nu, eble la anglino legis pri ĉi tiuj kaproj kiuj estas ankaŭ kaprinoj, kaj diris al si — »Se Bennemann povas melki kapron, mi estas anglo«.

»Vi estas kapro«, malĝentile diris sro E. kaj nia interparolo finiĝis.

*

En unu el la malsukcesintaj kaj mortintaj artefaritaj lingvoj la inventisto uzis finajn ,o' por vira, ,a' por ina, kaj ,e' por neŭtra substantivoj. Tia metodo estus ĝenaĵo. En tia lingvo (Novial de Jespersen) oni devus ĉiam elekti inter tri substantivaj formoj, — (1) amiko, (2) amika, kaj (3) amike, el kiuj (1) difinas viramikon, (2) amikino, kaj (3) aŭ bestamikon (kiel hundo), aŭ birdamikon (kiel kanario) aŭ arbamikon (kiel kverko) aŭ viramikon aŭ amikino aŭ hermafroditon. Efektive Novial fariĝus hermafrodita lingvo, kaj tre certe la deviga elekto inter tri formoj ne estus gajno. Zamenhof, tamen, donis al ni multe preferindan sistemon, kiu je la unua ekrigardeto ŝajnas ne tute logika, sed kiu, post ekzameno, satigas ĉiun postulon de la rezono.

Kiam oni dubas pri iu punkto en Esp-a gramatiko, oni ĉiam sin turnu al la ununura regulo de vortkonstruado, t. e. »Necesoj kaj Sufiĉoj«. Ni uzu la minimumon, kiu estas sufiĉa difini nian signifon. Sed, por uzi ĉi tiun regulon, oni devas funde scii la radikon uzotan, kaj same estas pri la farado de sekshavaj vortoj. Nu, por funde scii radikon, estas devige elstudi esp-esp-an vortaron, de kiu ĝis nun ni havas »Kabe« kaj lastatempe, »Plena Vortaro de Esp-o« de S. A. T. Nek unu nek alia de ĉi tiuj vortaroj donas, ekzemple, difinon de l' radiko — ,angl-', kaj tial mi devas min turni al esp-angla vortaro de Millidge kaj mi trovas, ke li unue difinas »angla« kaj sekve mi konkludas, ke la radiko estas mem adjektiva, kiel ekzemple, ,bela', ,bona' etc., kaj tial »angla« en si ne havas sekson, sed nur difinas la econ de iu raso. Litero ,o' nur estas ,fleksio de la substantivo k. t. p.' (Kabe) kaj ne havas sekson. Tial ,anglo' (kunmetaĵo de »angl« kaj ,o'), ne havas gramatikan sekson. La logiko do tute pravigis la anglinon, ke ŝi skribu sin anglo.

Tamen, Millidge difinas ,anglo' kiel ,Englishman' t. e. viranglo. Sajne Millidge estas prava, sed ne komplete, ĉar verŝajne la vorto ,anglo' difinas — »homo el raso angla«. Nu, homo*) estas difinita de Zamenhof en Genezo — »Dio kreis la homon, en formo de viro kaj virino kreis ilin«. Tial la vorto homo estas neŭtra, kaj, laŭ kunteksto, aŭ vira aŭ ina. Sekve ankaŭ logike la vorto ,anglo, laŭ kunteksto, difinas aŭ viranglon aŭ anglinon. Ankaŭ la vorto ,angloj difinas pli ol nur ,geangloj. Geangloj difinas anglojn de ambaŭ seksoj. Angloj mem ne difinas la sekson kaj povas esti — ,virangloj, ,anglinoj, aŭ ,geangloj, laŭ kunteksto.

Kutime la kunteksto montras sufiĉe klare la sekson kaj, laŭ la leĝo de neceso kaj sufiĉo, la listo de pure virseksaj radikoj prave povas esti tre mallonga.

Viro, patro, knabo, onklo, frato, filo, avo, edzo, vidvo.

Eĉ ,fianĉo' kaj ,amiko' laŭ la difino de Esp. Vort-

*) »Plena Vortaro« pri »virino« difinas jene: »Homino, kontraste kun virhomo«. Ankaŭ »Kabe« difinas »virino« kiel »homo« ktp.

Jen antaŭ mi nun la Danubo,
Kaj blondas la matena ond',
Ne migras eĉ plej eta nubo
Sur varme blua horizont'.
Mi ekmeditas sur ferdeko
Pri l' propra sorto, monda peko,
Vortfluon naĝas plumo-ŝip',
Sed — gaja birdo pepas: ĉip.
La ŝip' min portas al Vieno,
Medit' min portus al pasint',
Sed — tie ridas verda pint'
Kaj flugas for la trista temo.
Ĉu tamen, malgraŭ multa plor',
Ankoraŭ ridas suna or'?

Intencis kanti mi alie,
Sed kaptis min la vivplezur'.
Riproĉe kaj melankolie
Ne eblas kanti sub lazur'.
Pejzaĝoj mildaj preterflankas,
Anser-makuloj borde blankas.
Min portas ŝip' kun mola lul',
Trankvile. For la vundo-brul'...
Sed halt'! Kun spita virdecido
Mi min devigas al promes':
Konfesi pri la viv'. Nu, jes:
Ne kiel grandbienulido,
Sed nur en tre modesta dom'
Naskiĝis mi, sen festa nom'.

Junage mi ja panon havis,
Eĉ truejn ŝuojn sur pied',
Ludiloj fremdaj min tre ravis,
Mi sonĝis pri velociped',
Sed mia am' — platona restis,
Kaj ankaŭ poste, dum mi estis
Lernanto de la gimnazi',
Mi ĝuis nur en fantazi'.
Nun sekvis zorgoj: kie prenu
Gepatroj monon por la fil'.
Sopiris ĉiuj ni kun mil
Esperoj, ke la Tago venu.
Ĝi venis: mi al patra dom'
Fiere iris kun diplom'.

Nun skize: Mondmilit' kaj fine,
La Paco. Mi: bankoficiist'.
La bankoj »ŝparas«. Mi: viktime
Paradas sur la »ŝpara list'«,
Por vagi en la mondo kriza.
Kaj — ruĝa strek' en vivo griza —
Nun sekvis sango el la pulm'.
Edzino. Par' sub sorta fulm',
Ne certe eĉ pri seka pano,
Laboron ne serĉante plu,
Ĉar ja domaĝe pri la ŝu',
Sen mono, sen esper', sen sano,
Sen ia ŝanc de bona nov':
Elturĝo — diras Nekrasov'.

aroj de Kabe kaj S. A. T. estas gramatike neŭtraseksaj.

Pri inaj radikoj, krom »in« mi trovis nur kelkajn: ,Bajadero' (hinda dancistimo), hetajro, matrono, nimfo, kaj eble pluaj specialaĵoj.

Sufiksoj — ,ul', ,an', ,ist', ,id', ankaŭ ,anto' ,ato' k. t. p. ĉiuj estas radike el neŭtra sekso. »Telefonisto« gramatike estas aŭ ina aŭ vira, sed kutime ,ĝia' voĉo estas telefonistina.

Sed krom la logiko ekzistas la rezono, kiu estas influita de uzado kaj konveneco. En la nuna epoko kreiĝas esp.-a literaturo. Post unu centjaro la Voronofuloj inter ni juĝos, ĉu nia lingvo fariĝis radike senseksa, en kiu okazo niaj virpostuloj eble devos skribi ,virpatro', ,virklo' k. t. p. por aserti sian sekson, ĝuste kiel nun la virinoj devas uzi la formon ,in' por sin aserti. Dumtempe mi pli preferus ,anglino' kaj ,kaprino' ol ,anglo' kaj ,kapro', eĉ se la aldonita ,in' peketas kontraŭ la leĝo de sufiĉeco, kaj eĉ se la kunteksto montras, ke la ina sekso estas jam difinita.

Pan Loti.

P. S. Post longa pensado mia Sinjoro E. reskribis al sia amik(in)o:

»Se vi volas esti enskribita inter la nevirinaj virinoj, kaj nur rilatiĝi je neviraj viroj, vi plu skribos, ,Mi estas anglo'. Sed se inter ni, kiuj estas viraj viroj, vi volas resti kiel virina virino, skribu: ,Mi estas anglino'«.

Viramike via: E. E.

PPS. Mi sekrete aldonis subskribon al la letero, jene: — »Sro. E... estas junulo kiu similas al Bernard Shaw nur en tio, ke li tute ne komprenas la virinojn.«



OBSERVO

KAN KIKUĈI.

Kan Kikuĉi, la aŭtoro de la samnumere publikita »La Miraklo«, naskiĝis en Takamacu, malgranda kastelurbo sur la insulo de Sikoku, en la dudek-dua jaro de Meiji (1889). Li estis studento de la Kiota Imperia Universitato, studante anglan literaturon. Post la akiro de la diplomo li laboris dum kelka tempo kiel ĵurnalraportisto kaj fine konstruis sian vivon kiel literaturisto. Liaj publikitaj verkoj ampleksas kelkajn longajn novelojn, multajn kolektojn de mallongaj rakontoj kaj skizoj kaj tri volumojn de kolektitaj teatraĵoj. Li nun loĝas en Tokio.

Studento de angla literaturo, Kikuĉi estas influita, oni diras, plejparte de Shaw kaj Galsworthy. Li akiris reputacion per siaj historiaj noveloj, en kiuj sin trovas lia propra humaneco. Elprovante sian plumon en ĉio ajn krom poezio, kiel materialon li uzas rakontojn same el la pasintaj tagoj kiel el sia propra sperto. Nek idealisto nek moralisto li estas ekzakte, li estas homo kun edukita konscienco kaj sana vivpercepto.

Li rigardas sian profesion tre alta kaj pretendas dignan respekton en lando, kie la verkisto suferas pro historiaj antaŭjuĝoj. Salutate en iu kunveno de virinoj antaŭ kelkaj jaroj, Kikuĉi pledis por la valoro kaj kultura kaj eduka merito de la literaturo kaj uzis iom fortajn vortojn pri la lando, kiu ne rekonas siajn verk-

istojn. Li demandis, kie en la tuta Japanujo eĉ unu strato portas la nomon de Cikamacu, granda dramverkisto de la Tokugaŝa epoko. Tio estas interesa demando, kvankam ĝi ne nepre pruvas la mankon de taksapablo pri tiu literatura genulo flanke de liaj samlandanoj. Sed rakonteto, kiun li aldonis, montras en ia senco, kiel la oficialuloj pensas pri la nuntempaj japanaj novelistoj. Kiam antaŭ kelkaj jaroj eksterlanda kortega vizitanto estis en Tokio, la magistrato aranĝis grandan akcepton por lia honoro kaj invitis al ĝi efektive ĉiujn famulojn de ia urbo, inter kiuj, tamen, sin ne trovis eĉ unu novelisto. Tiam, demandis Kikuĉi mokeme, se la honora gasto turnus sin al komitatano kaj petus montri la plej grandan japanan noveliston, kion oni farus? Ĉu oni klarigus, ke en Tokio neniu novelisto meritas la honoron esti invitata? En neniu granda urbo de la mondo, Kikuĉi konkludis, tio povus okazi.

«La Miraklo» estas farso, faranta tamen tre efikan scenon. La templo kun la kruelaspekta Dio de Infero, *Jamo*, kiun la japanoj nomas *Emma*, malame rigardanta la ludeman junulon *Sukan* kaj la aliajn kaprazitajn junulojn (la aŭtoro nomas ilin A, B, C kaj D, malallogaj literoj, kiujn mi konservis en ilia japana formo, kvazaŭ ili estus realaj nomoj) kaj la pompe vestitan virinon *Oben*, prezentas frapantajn kontrastojn. La komento de Kikuĉi mem pri ĉi tiu teatraĵo estas, ke ĝi estis foje malfavore kritikata de *Sooseki Nacume*, moderna novelisto, kiu, mortinta en 1916, ankoraŭ estas rigardata de la plimulto de la japanoj kiel plej granda verkisto post la Restariĝo, sed, ke li trovas en ĝi ion neforjeteblan kaj tial li publikigis ĝin en volumo kun la tri teatraĵoj: «Amo de Toŝjuuroo», «La surtegmenta frenezulo» kaj «Pli bone ol venĝi».

J. Simomura.

I. I. CARAGIALE (1852—1912) estas unu el la verkistoj, kiun rajte oni devas kalkuli inter la artistoj universalvaloraj. Gloro de la rumana literaturo, li transpasis la limojn de sia verklingvo per tradukoj kaj eĉ filmado.

La variecon de lia verkaro kaj artaj priokupoj egalas nur la variecon de lia vivo. Iame okaza teatristo, li atingis direktorecon de la Nacia Teatro. Debutinte per bonhumora kaj satiraja gazeto, nur poste, en maturaĝo, kiam aŭtodidakto akiras plenan kulturon, lia genio evidentiĝis ĉiurilate.

Strange ŝajnis al liaj samtempuloj — la emfazaj katedruoj — ke, dum li estris restoracion, li estis kompetenta artkritikisto kaj gvidis revuon. Malkonvenis al politikuloj, ke bieristo verkis komediojn kaj skizojn ilin pentrantajn kun ĉiuj ridindaj flankoj, pri kiuj ĝise eĉ ili mem ne konsciadis.

Dotita per sama humoro, li amis la vivon kaj naturon, sed ne priskribis tion. Inter liaj gajhumoraj kaj mokcelaj skizoj kaj teatraĵoj, oazas kelkaj dramverkoj kiuj montras plian flankon de lia talento kaj penso. Ankaŭ la homojn li ne priskribis, sed per lia tute aparta perceptpovo, li fundobservis la urbanojn ĉiumediejn — de la jaluzrabia kartludisto ĝis la dignoplena partiestro — kaj prezentis ilin al ni kun iliaj moroj, parolstilo, gestoj ktp.

Precipe li emis ridi kaj ridigi pri la homa stulteco.

Kritikistoj foje komparis lin al Molière, sed ne prave, ĉar lia satiro ne laŭas la klasikmanieran, la aŭtoro, kun sarkasmo aŭ saĝula moralo, sed neniel indulgante la heroon, konkludas, kiel la publiko, en rido, tiel verigante la varieblan sentencon de *Boileau*: Se vi volas min amuzi, unue sukcesu tion pri vi mem.

Speciala trajto de liaj komedioj estas la barakto inter la tradiciaj moroj orientaj kaj la francerevoluciaj ideoj. Tial lia teatra ĉefverko — «Letero perdita» — restas, pro lokaj kaj kronikeco, propraĵo de la lando de l'aŭtoro.

Koncerne liajn provstudojn pri la arto — kiujn li titolas modeste «Kelkaj opinioj» — ili montras klarvidan kaj objektivan juĝon pri belo, havante propran

kriterion pri proporcio en ĉiuj rilatoj, kion mi nomus «ĝustenco». Fuĝaj rigardoj en la dramojn de Shakespeare, Schiller, Hugo k. a., montras, kiom funde li konis la teatreteknikon kaj la sekreton: kio sencas aŭ troas.

Siajn kontraŭulojn Caragiale malofte refutis kaj bonvole instruis aŭ ignoris. Ĉe sia vivfino li estis rigardata kiel «majstro de la rumana literaturo», ĝuis la estimon de la juna verkistaro kaj de la publiko, kompense pro la antaŭa nekonsidero flanke de la titolumitaj intelektuloj.

M. Beraru.

LA KONFLIKTOJ EN MANCURIO KAJ SANHAJO.

(Pri la agado de Universala Homama Asocio en Ĉinujo. Eld. Univ. Homama Asocio 1932. Komeoka Kioto-Ilu, Japanujo. — 50 p. Prezo: 0.50 sv. fr.)

Politika disputverko, kies stilo, formo estas ĝenerale laŭdindaj kaj la dua parto, kiu parolas pri la bonfara agado de UHA en Ĉinujo, estas tre simpatia. La tono de la libro estas objektiva, nur foje trarompas ĝin kruda frazo: «Ĉinoj estas majstroj en la aranĝo de grandskala trompo, ne nur hejme, sed ankaŭ en Genevo.»

Tie ĉi la aŭtoro ŝajne forĝesis pri la meza litero de UHA.

F. Szilágyi.

TOO TRUE TO BE GOOD (TRO VERA POR ESTI BONA)

de George Bernard Shaw.

La granda sensacio en la dramarta horizonto nunmomente en Anglujo estas la unua publika prezento de la supre tiolitita teatraĵo eĉ la ĉiujara dramfesto en Malvern. Preskaŭ ĉiuj kritikistoj malfavore skribas pri la nova plumido de Shaw, sed la aŭtoro tute ne estas ĝenata pro tio kaj diras: «mi supozas, ke, kiel kutime, la plimulto de la kritikantoj ne povis atingi la supron de la okazo. Mi ja ne povas helpi, se mi estas ĉirkaŭ kvindek jarojn pli antaŭe ol ili.»

Oni diras, ke B. S. kritikis detruie kaj konstrue. Li ne nur kondamnas la ekzistan staton de aferoj, sed sugestas rimedojn; li tamen ne faras tion ĉiam en la sama elspiro. La nova teatraĵo rilatas al postmilitaj senluziigoj. En ĝi li sole kondamnas, kaj liajn konstruajn proponojn oni devas serĉi aliloke inter liaj verkoj. Rezultas de tio, ke la verko suferas de dramarta vidpunkto, kvankam ĝi estas bona propagando. B. S. diras al ni nun, ke ni senigis nin de sennombraj superstiĉoj kaj intelektaj falsajtoj, ke ni akiris la arton, reciproke eksponi niajn animojn, sed ni ankoraŭ ne inventis filozofion por riveli la mensan sunbanadon, kaj tial nia malfeliĉo.

Objektive — li diras — ni estas en plibona stato ol antaŭe, sed subjektive ni estas senespere malkontentaj. Tion li ilustras pere de riĉa juna virino, kiu forkuras de superflua prizorgado flanke de sia patrino kaj kuracisto; pere de pastro, kiu, perceptinte post siaj militspertoj la vakecon de siaj antaŭaj kredoj, fariĝas rabisto; ankaŭ pere de ties ateista patro, kiu vidas sian determinismon «falanta kiel la muroj de Jeriĥo antaŭ Einstein». Neniu el ili tamen trovis ion, kiu anstataŭos tion, kion li aŭ ŝi forigis.

La teatraĵo komenciĝas en la ĉambro de la malsana dorlotita junulino. Sia ekscitigema patrino, la riĉaj nutraĵoj, kaj la kuracisto, kiu nepre devas fari ion por justigi siajn honorariojn, kondukas sin al konstanta malsano. Ni havas Bacilon, kiu priplendas la naŭzan egoismon de la homaro, kiu konstante infektas sin per siaj memkaŭzitaj malsanoj. Ni havas friponan flegistinon en ligo kun domrabisto, iama pastro. Tiuj du planas rabataton por ŝteli la perlojn de la malsanulino, kiu tamen tute neatendite montriĝas sufiĉe forta por rezisti la atakon. La rabisto, trovante sin en malagrabla situacio, proponas al la junulino, ke ŝi mem ŝtelu siajn proprajn perlojn, ili dividi la rabajon inter si kaj ŝi mem fariĝu unu el ili por vivi en saneco kaj libereco. Oni planas ankaŭ ŝajnan kaptan de la junulino per banditoj, por havigi ankaŭ la riĉan elacetan monsumon. Tiamaniere la ludo translokiĝas al iu orienta mondparto, kaj tie, en la Brita Armeo, la pastro-rabisto renkontas sian patron. En la dezerto

estas sufiĉe da tempō por predikoj, kion la pastro plene eluzas per la elokventaj frazoj donacitaj de la aŭtoro.

La komika flegistino, sendia pagano kaj la avara junulino, kiu akiris liberecon kaj tamen trovas la vivon enua, estas la simbolo de la postmilita degenero.

»Mi estas predikanto per Dia donaco« — proklamas la pastro, aviadisto, bandito, rabisto kaj filozofo en la teatraĵo — »mi povas klarigi ion ajn al iu ajn« — kaj tiu rimarko resumias en malmultaj vortoj *la raison d'être* de la nova verko.

J. D. Applebaum.

RECENZO



ANDERSEN: FABELOJ. Plena kolekto. Tria parto. Tradukis: D-ro L. L. Zamenhof. 153 paĝoj. Eldonis: Esperantista Centra Liberejo. Paris. Prezo 9.— frfr + 30% por sendkostoj.

La Andersen-fabeloj estas ŝatataj legaĵoj kaj de la infanoj, kaj de la plenkreskuloj. La infano trovas en ili neelĉerpeblan sorĉfonton por kontentigi sian fantazion: Andersen gvidas ilin jen al ekzotikaj pejzaĝoj de l' Oriento, jen al ruinaĵ domoj de la konata marbordo de sia propra patrujo, jen al la mistika lando de l' sonĝo, de l' elfoj, jen al la silenta regno de l' morto. Tiuj ĉi fabeloj havas apartan mondon, ĝi estas spĝgulbildo de la realo, sed la spegulo de Andersen montras pli ol simplan reflekon de l' eksteraj: per nepriskribebla ĉarmo li jetas la akcenton sur la Bonon, per magia lanterno li projekcias animon en la krudon de l' realo. Per sia sorĉbastono li vivigas la ŝajne senvivajn objektojn, meblojn, ludilojn, li portas el la ĉielo la brilajn anĝelojn, kiuj vizitas la bonajn infanojn...

Sed ankaŭ al la grandaj infanoj, al la plenkreskuloj la libro de Andersen donas tre multon. Lia preciza homkono, lia akra, sed ne malica satiro prezentas al la leganto eksterordinarajn valorojn: Andersen apartenas al la plej klarvidaj kaj plej klarmensaj verkistoj de l' homaro. Sed la satiro, la preciza analizado de l' homaj mankoj, kiuj sin kaŝas sub la sorĉa mantelo de l' fabelo, montras nur unu flankon, la negativan, de la verkisto, je la alia flanko mutiĝas la ironio kaj ni trovas sinceran poezion, pian adoron al la Bono, ni aŭskultas la voĉon de unu el la plej mildkoraj poetoj de l' mondliteraturo.

La traduko de Zamenhof, kiel ĉiam el la sama fonto, estas mirinde klara. Krom la ĝuo de ĉi tiu diafana stilo, kiu tiel senpere interpretas al ni la belajojn de la originalo, ni povas en ĝi ankaŭ ĝoji pri formoj, kiuj estas kvazaŭ decidoj pri diskutataj aferoj. Ekzemple ni trovas praktike aprobatan la formon, kiun de certaj flankoj oni tiom atakas: la uzon de artikolita adjektivo anstataŭ substantivo, ekzemple: *la plej ĉarma, kion oni povas vidi*. Poste ni povas ĝoji pri *mano en mano, brako en brako*, anstataŭ la pli peza *manon en mano*. Oni trovas laŭeble eviton de *je* kaj ĝian anstataŭigon per pli precizaj prepozicioj (plena *de*, trinki *por*, distranĉi *en*). Male: *morti de malsato, tremi de frostoj* montras, ke la malprecizan, sed malpezan de la Majstro preferis al la preciza, sed peza, tro klariga *pro*. Oni trovas *limi* anstataŭ *limigi*. Poste ĝojigas min la manko de kunmetitaj verboformoj, kiujn Zamenhof tiel malŝatas, ke eĉ anstataŭ: *mi neniam estus pensinta* li skribas: *mi neniam pensus*.

Tamen, se licas rimarki en la stilo de la Majstro makuletojn, mi notas, ke la tro ofta uzo de la sufikso *ad* (apartaĵo propra al multaj polaj esp-istoj) min ĝenetas. Kaj ne plaĉe min mirigis la uzo de *unu* tie, kien mi estus metinta — simple nenion.

Nun oni diros, ke, kiel certere multaj aliaj, mi agas kun tre travidebla ruzo, kiam mi akceptas la lingvo-uzon

de la Majstro kiel nepran argumenton en aferoj, kiuj al mi plaĉas, sed mi simple ignoras ĝin en aferoj kontraŭaj al mia opinio. Tamen — »faru la kontrolon!« Dum la supre ĝoje menciitaj formoj estas evidente pli facilaj, pli elegantaj aŭ donas solvon apenaŭ anstataŭigeblan, — la forstreko de la multaj *ad* kaj *unu* neniam forprenus el la klareco kaj farus la stilon pli konciza aŭ evitigus oftan ripeteton de sama elemento, kiu ja evidente devas efiki monotone.

En la libro ne mankas preseraroj. Plej ĝena estas »Notka ĉapo«, ĉar ne nur ĝi troviĝas en titolo, sed eĉ obstine ripetiga sur pluraj kapoj de paĝoj.

L. Totsche.

PROF. Dr. GÖHL: Ausführliche Sprachlehre des Esperanto. Eldonita de Dr. med. C. Renken kaj Friedrich Ellersiek. Berlin, 1932. Friedrich Ellersiek G. m. b. H. Esperanto-Verlag. 296 paĝoj.

Estas vere tragike, ke la aŭtoro de ĉi tiu ampleksa kaj mirinde riĉa, preskaŭ plene elĉerpa gramatiko, preta jam antaŭ dek jaroj, ne povis ĝisvivi ĝian aperon en libroformo. Tion certe konsentos ĉiuj esp-istoj, kies manuskripto tiel tromaturiga en la tablokesto, ke fine ĝi iĝas ŝima.

Sed ĉi tio ne rilatas al ĉi tiu bonega verko, kiun cetere la aŭtoro konstante, ĝis sia bedaŭrata morto, tra kaj tralaboris. Ĝi estas tute freŝa kaj tre supera al la gramatiko de Velten. Alilandanoj certe povas envii la germanlingvajn esp-istojn pro ĉi tiu lerta gvidilo tra ĉiuj vojoj kaj vojkruciĝoj de nia lingvo. Impone abundan materialon ĝi enhavas; riĉaj ekzemploj pliklarigas klare esprimitajn regulojn; plurmaniere tradukendaj germanaj verboj (mögen, dürfen ktp.) estas esplorataj laŭ ĉiuj ebloj; prepozicioj kaj konjunkcioj estas traktataj vaste kaj detale — sed mi ja ne volas listigi la tutan riĉan enhavon de la libro, la germane scianta leganto plezure legos ĝin ĝisfine, kaj utile profitos el ĝi ĉiam, konsultante ĝin en okazo de dubo.

Mi volas noti nur kelkajn detaletojn, pri kiuj mi ne konsentas. Rilate al la vortfarado mi insistas, ke *bonaĵo* same ne estas *bona aĵo*, kiel *boneco* ne estas *bona eco*. Krome, mi opinias, ke en la okazoj, kiam la lingvo-uzo jam akceptis facilan, koncizan, elegantan formon, ĉi tiu certe venkos ĉiun pli pezan, eĉ se pli logikan formon, nove proponitan. *Tre* kaj *tro* antaŭ verboj neniam estos forpuŝataj de *tree* kaj *troe*. Pli certe triumfe tenos sian pozicion kontraŭ pli multe. Anstataŭ la simpla konjunkcia *dum* neniam ĝeneraligos la pli pezaj *dum kiam* kaj *dum ke*. Kaj se *ĝuste* uzeblas en malpropra senco, kial ne uzeblus tiel ankaŭ *propre*, kies tian uzon, cetere tute internacian, tiel malfacile estas anstataŭigi. La samon mi diras ankaŭ pri *sufiĉe* en la senco: *ĝis certa grado*; el ĝiaj surgatoj bona ŝajnas al mi la propono de Karl Minor: *ne kun mal-* (*ne malbona anstataŭ sufiĉe bona*), sed ĝi ne ĉiam estas uzebla; kontraŭe, *treete* estas tiel artefarita, ke la plumo haltus en mia mano, se mi volus ĝin skribi. Poste, la tendenco de la lingvoevoluo estas kontraŭa al la *mal-vortoj*, kaj tial *maljam* estus mortenaskita, eĉ se ĝi ne estus tiel kaprompe konstruita. Mankas en la libro la zamenhova uzo prefiksa de *pri*, tiel bonevena por turni la direkton de la ago (*verŝi akvon, pri-verŝi floron*; rabi monon, prirabi homon; pentri bildon, pripentri pejzaĝon).

Mi estis frapita legante, ke en la sin-kunmetoj *sin* rilatas ankaŭ al la 1. kaj 2. personoj (mi estas sindona al vi), jen vero, kiun mi neniam rimarkis konscie. Ĝian kaŭzon mi trovas en tio, ke la sin-kunmetoj kontraŭas la regulojn de la esp-a vortkunmetado, laŭ kiuj akuzativon oni ne povas fandi kun verbosubstantivo (vd. la zamenhofan ĉiopovo, ĉiopova: povo de ĉio: povo de ĉio/a); nu, ĉar oni instinkte sentis la malbonecon de ĉi tiuj formoj, en ili *sin* perdis sian originan akuzativan sencan kaj alprenis la signifon *pasiva mem.*, kiu ja povas resti sensanga ankaŭ en la 1. kaj 2. personoj.

La libro estas tre zorge, vere ame eldonita kaj vestita per tre belaspekta kaj forta verda tolbildo.

Kopar.

STELLAN ENGHOLM: HOMOJ SUR LA TERO.
Gajninto de la Literatura Konkurso de Literatura Mondo en 1931. Eldonis: Literatura Mondo, Budapest. 202 paĝoj. 20x13.5 cm. Prezo broŝ. 0.70, bind 1.—dolaro + 10%.

La romano gajnis la konkurson kaj la esp-a literaturo tre valoran verkon. Sendube tiu ĉi libro estas la plej signifa evento de nia originala romanliteraturo ekde la apero de «Anni kaj Montmatre» de R. Schwartz. Jam la unua libro de Engholm, «Al Torento», havis grandajn kvalitojn, kvankam en tiu libro la eminentaj verkistaj ecoj de Engholm aperis ankoraŭ en ĝermostato.

La nova volumo atestas pri granda progreso: la ideologiaj pritraktadoj kaj meditoj, kiuj tiom oftis en «Al Torento», ĉi tie jam forestas. Ĉi tie jam estas klara la klopodo de l' verkisto: li volis prezenti vivajn figurojn, homajn karnon kaj koron per la plej simplaj iloj, sen oratorado kaj falsa patoso.

Kaj unu el la ĉefaj virtoj de Engholm estas lia sobra realismo, per kiu li pentras siajn heroojn kaj iliajn mediojn. Tre bonajn okulojn havas Engholm: oni sentas, ke liaj figuroj ne estas naskitoj de lia fantazio, sed ke li vestis ilin per ecoj kaj gestoj, kiujn liaj precizaj okuloj mirinde trafis observis kaj ĉemagazenigis. Sed ĝuste apud lia granda forto troviĝas lia granda malforto: lia realismo estas iom tro sobra, iom hipertrofia, ĝi ne donas lokon por la fantazio. Tio rezultigas, ke liaj figuroj iĝas iom monotonaj: ili havas eksterajn ŝtelobservitan vere el la vivo, en siaj vejnoj ili havas la plej puran, la plej noblan sangon, kiun romanherooj nur povas havi, sed la kvanto de tiu ĉi sango estas malmulta. Engholm estas la poeto de la blankaj-nigraj lumefektoj, por la riĉaj nuancoj de koloroj li ne estas tro sentema.

Tiu ĉi bariteco de l' fantazio kaŭzas la ĉefan mankon de l' libro: la malriĉon je eventoj, kaj tiun prezentmanieron, ke la aŭtoro rakontas pri la agoj de siaj herooj, sed li ne iĝas ilin agi antaŭ ni. La verkisto sentas sian mankon kaj li volas kontraŭbalanci ĝin per la plej konscienca kaj preciza priskribo de siaj figuroj kaj iliaj propraj, el tio sekvas kelkfoje malavantaĝo tute kontraŭa al la pli supre riproĉita anemio: kelkfoje li estas tropreciza, trologika. Ekzemple kiam Kristoforo miksiĝas inter urbanojn kaj sekve aĉetas urbajn vestaĵojn, li skribas: «Ankaŭ tiu ŝanĝo kostis iom da mono. Bedaŭrinde li havis la senton, ke tia ŝanĝo nemulte utilas. Gaja vespero valoras la monon, sed la efiko de la drinkaĵo estas tute sama, se oni estas vestita per ĉifono aŭ ŝtofo de reĝoj. Sed kutimo postulis ja, cetere li ne malsatis la belajn vestojn.» La troprecizeco de l' lasta frazo jam lacigas. Kelkfoje en la imagon de l' leganto venas akre konturita foto, ĉe kiu ĝuste la akreco malhelpas la plenan validiĝon de l' efekto. Iom da arta malprecizeco ne malutilas!

Sed oni ne devas pensi, ke la figuroj de Engholm pale efikas al la leganto. Tute ne! La du kamparaj virinoj, Kajsa kaj Selma, ŝajnas radikigitaj profunde en la teron. Kaj per kia delikata psikologio estas pentrita la maljuna Kristoforo!

Psikologio! jen la dua reganta vorto en la regno de Engholm, la magia ilo, kiu anstataŭ la epika fantazio helpas la realistajn okulojn de l' verkisto. Ni povus citi sennombrajn ekzemplojn, ni vidu kiel li karakterizas per kelkaj simplaj frazoj la diversan labormanieron de la du Kristoforoj kaj per tio kiel li ekpalpas ilian plej kernan temperament-diferencon: «La maljuna Kristoforo ĉirkaŭflugis kiel juna birdo, ĉiam vigla kaj kun vivema brilo en la okuloj. La filo, kontraŭe, paŝis sian vojon malvigle, kiel maljuna bovo, kun kurba dorso kaj kun ŝultroj larĝaj kiel kabano. Komencante laboron, li neniam havis urĝon, sed komencinte li obstine daŭrigis.» Kiel delikate estas analizataj la rilato inter la maljuna Kristoforo kaj liaj familianoj, kaj tiu inter li kaj liaj konatoj. Kiel preme li scias sensigi la etoson de l' malpleno en tiu ĉi stranga familio. Kaj la duoblan malplenan kaj sencelcon post la morto de l' maljunulo! La iompostiomani-

procezon de l' ŝanĝigo en la animo de l' filo, kaŭzitan de ĉi tiu morto. Kiel delikattakte li desegnas la rilaton inter la malnova kaj nova mastrinoj: la malfortan spiton kaj envion, per kiu Kajsa volas defendi sian pozicion kontraŭ la novveninta Selma, la objektivan rezignon, per kiu ŝi rekonas siajn senriproĉajn kvalitojn kaj trankviligas pri la ŝanĝoj de l' nova reĝimo. Kaj kiel vere homa estas la natura sinturno de l' maljunulino al la nepo, ŝi, kies tuta ĝisnuna viveco estis la korto, la tero, nun trovis novan vivsencon: «... ŝi vidis nur la senfortan etulon en la lulilo.» «Revekiĝis malnovaj lulkantoj, kiuj dum pli ol tridek jaroj dorinis en la anguloj de ŝia memoro, kaj ŝia sensorora, maljunulina voĉo kortuŝe ĉirpadis ilin, dum la lulilo moviĝis kaj la triokuloj sencese zigzagis inter ŝiaj ostaj kaj ŝrumpintaj fingroj.» La virinfiguroj estas plej sukcesaj ĉe Engholm.

En la pentrado pri la knabaĝo de l' nepo li ne sukcesis tiom. Mi sentas ĝin iom griza kaj hasta, eventoj apenaŭ. Sed estas vere genia ektrovo, kiam la verkisto sensigas al ni la revekiĝon de l' maljuna Kristoforo en la animo de l' nepo. (Mi aludas pri la scenoj sur la kampo, kiam la plugantan nepon nevideble akompanas la avo, aŭ la nepo ekludas sur la violono de l' avo.)

La romano pritraktas la historion de kamparana familio tra tri generacioj; se ni rigardas ĝin el tiu ĉi vidpunkto, ni trovas ĝin iom mallonga, skizeca. Sed la ĉefa heroo de l' romano estas la bieno, la tero, kies pulsado sentiĝas sur ĉiu paĝo de l' libro, la tero, kiu indiferece rigardas la homojn penadantajn sur ĝi, la sinsekvantajn generaciojn, kiuj perdas kaj regajnas ĝin, sed al kies vivo ĝi donacas la celon kaj sencon... La volon al monumentaj simboloj oni klare sentas ĉe Engholm: por ŝia konstruaĵo li uzas eble nur grizajn ŝtonojn, sed la dureco de tiuj ĉi ŝtonoj estas granita.

La stilon de l' libro mi trovas pura, natura. Precipe menciindas la bongusta freŝeco de liaj komparoj, la fortika simpleco de liaj esprimoj. Liaj komparoj estas trasorbitaj de la bildoj de l' kampara vivo. Ĉe li la vento «iĝis la grizan kaprobarbon ondi kiel grenkampon en blovego. Imagigaj esprimoj, kiel «tio estis verŝi akvon sur anason», «vorto donis vorton», «la pasinto subite trabreĉis la multjaran tavolon de labortage grizaj pensoj kaj sentoj», «li estis montfirme konvinkita», donas sanan viglon al liaj frazoj kaj firme ekkaptas la fantazion de l' leganto. Ne mankas ankaŭ ŝercaj petolaĵoj, ekzemple kiam Kristoforo nomas la edzinon «akra ilo». Lia frazkonstruo estas klara, lia vortordo logika, sed ĉiam natura. Monstrajn vortkunmetojn li evitas. Precipe laŭdindaj estas kelkaj delikathumoraj naturpriskriboj, kiuj ĝuste akordigas kun la humoro de liaj herooj, tamen estas riproĉinde, ke tiuj ĉi priskriboj estas malmulte elvokivaj: Engholm sentas en kaj kun la naturo, tamen li ne sukcesas rekonstrui pejzaĝon.

El lingva vidpunkto kompreneble mi trovis preskaŭ nenion riproĉindan. Bedaŭrinde mi trovis kelkajn «unu» uzatajn kiel artikolojn nedifinajn. Tia stilisto, kia Engholm, devus pli severe atenti kaj liberigi sin de modaj epidemioj.

RESUMO: «Al Torento» alportis valorojn kaj multajn mankojn, vekis esperojn, «Homoj sur la tero» montras pli evoluintajn kvalitojn, ŝrumpantajn mankojn kaj plifortigas la esperojn. Nia publiko agos en la intereso de l' esp-a literaturo, se ĝi sekvos kun atento la vojon de tiu ĉi neĉiutaga talento. *Ludoviko Totsche*

Neologismoj

en tiu ĉi numero, ne troveblaj en la Plena Vortaro de S. A. T.:

etoso: atmosfero de loko, pejzaĝo k. t. p.
dura: malmola
lucida: klarvida
hasti: senpacience rapidi
poltrona: malkuraĝa
sledo: glitveturilo
olda: maljuna

Esperanto, lingvo de literaturo*

— Jean Forge —



Sinjorinoj kaj sinjoroj!

Duan fojon la Esperantaj poetoj kaj verkistoj venas al la Esperanta popolo por prezenti al ĝi la belan muzikon de la Esperanta vorto! En tiu ĉi momento ripetigas la ĉiujara miraklo de nia kara lingvo Esperanto, kiam centoj da koroj ekbatas en unu ritmo, kiam centoj da lipoj diverslingvaj ekmovas sin por eldiri sentojn kaj pensojn en unu komuna lingvo!...

Hodiaŭ kiam la voĉoj pli kaj pli multiĝas, kiuj plendas pri la malrapida progresado de nia afero, pri la krizo kaj stagnacio en nia movado, ni konstatas kun ĝojo kaj fiero, ke la nova freŝa vento de nia *literaturo* konstante blovas, ke ĝi pelas la Esperanto-sipon senhalte antaŭen, — kaj ni konstatas kun admiro, ke tiu freŝa agrabla vento blovas el Budapeŝt kun speciala forto! La mirinda ekfloro de nia verda literaturo post la milito atestas brile pri la *vivanta* lingvo Esperanto!

Ni venas al vi hodiaŭ ne por reklami niajn nomojn, sed ni venas al vi por enspiri en viajn korojn la admiron kaj amon al la lingvo, por popularigi la Esperantan libron! Ni bone konscias, la historio ja elmontras tion klare; kion signifas kaj signifas la literaturo en nia movado. La libro ja ludas ĉe ni pli gravan rolon ol en iu ajn nacio! Ĉar la Esperanta libro havas la unuan kaj plej gravan taskon: eduki, krei perfektajn Esperantistojn! Mi estas profunde konvinkita, ke ni baldaŭ forigos, malaperigos tiujn samideanojn, eternajn komencantojn de nia lingvo, kiuj preskaŭ pendolas nur inter »bonan tagon« kaj »ĝis revido«, se ni pli energie akcentos kaj popularigos en niaj grupoj la legadon de la Esperanta libro!

Kaj tamen — ankoraŭ hodiaŭ ekzistas homoj, kiuj subtaksas la gravecon de nia literaturo, kiuj ridetas pri la skribistaĉoj Esperantaj, kiuj neas la necescon de la originalaj prozo kaj poezio. Ili ne scias, ke la *literaturo* estis tiu mirinda motoro, kiu ekmovis kaj funkciigis la lingvon, ke la *literaturo* estas ankaŭ hodiaŭ tiu mirinda akumulato, kiu sendas kvazaŭ elektran fluon, ian misteran vibradon tra niaj koroj! Por pruvi tion ĉi, ne decas citi la *nunajn* poetojn kaj verkistojn, sed por kompreni tion, ni devas returni niajn okulojn en la pasintajn tempojn, kiam estis la komenco de la lingvo, la unua naskiĝo de la Esperanta vorto!...

Kaj en tiu ĉi momento de nia Literatura Vespero, en tiu ĉi momento antaŭ miaj okuloj kvazaŭ sur sorĉa ekrano de la animo ekaperas la vivo de tiu granda homo, kies lingvon ni hodiaŭ parolas... kvazaŭ sur interese

filmrubando ekaperas la scenaro de lia vivo, kiu similas al plej fantazia romano plena de ĝojo kaj doloro! Sur la filmekrano de la animo aperas multaj, multaj multkoloraj bildoj... kelkajn el tiuj bildoj mi vidas tute klare, kelkajn scenojn... ili apartenas jam delonge al la historio, sed nun ili revivigas subite...!

Mi vidas modestan ĉambro de studento. Profunda silento regas inter la kvar muroj. Ĉe la tablo sidas juna pala homo kaj skribas. Sur la manuskriptaj folioj aperas literoj, vortoj, frazoj... de lingvo nova, nekonata. Li forstrekas vortojn, aldonas novajn, serĉas en libroj, komparas. La lampo sendas sian lumon super la manuskriptojn. Pasas horo post horo. Sed la bildo de tiu skribanta junulo restas la sama. Pasas semajnoj, monatoj, jaroj — la bildo de la studento laboranta super siaj manuskriptoj en silenta ĉambro restas la sama.

Sed jen rigardu! Sur la tablo kuŝas libroj, libroj. Kaj jen sur la libroj ni povas legi la nomojn de la aŭtoroj: SHAKESPEARE... MOLIÈRE... GOETHE... SCHILLER... GOGOL. Kion faras la juna studento? Li tradukas la verkojn de plej famaj poetoj en la novan lingvon. Tra la ĉambro blovas io mistera, potenca. Jen ŝajnas ŝvebi tra la ejo la spiritoj de plej famaj poetoj de la mondo, ili partoprenas kaj ĉeestas la veran naskiĝon de la nova lingvo! La juna studento scias; lia lingvo estos perfekta kaj bona nur tiam, kiam ĝi kapablos esprimi kaj respuguli la pensojn kaj sentojn de tiuj grandaj poetoj, kiam ĝi povos komenci sian propran vivon, la vivon de memstara literatura lingvo kun propra stilo kaj spirito!

Longe restas tiu bildo de la laboranta junulo sur la ekrano. Sed jen! Mi vidas, kiel liaj malgajaj revemaj okuloj levigas, kiel liaj rigardoj ŝajnas vagi tra tiuj silentaj muroj eksteren, en tiun bruan mondon, pri kiu li rezignas. Jes, ekstere bruas la mondo, logas knabina rido, studentaj kolegoj en gaja rondo...! Ĉu en liaj okuloj ne ekbrilas larmoj? Lia mano ekprenas la plumon, glitas super la manuskriptajn foliojn... kion li skribas?.. MIA PENSO...

»Kion havis mi plej karan —
La junecon — mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta.«

MIA PENSO — la unua poemo en la nova lingvo, la komenco de la originala poezio Esperanta!

Kaj jen nova bildo aperas, nova sceno el la multkolora scenaro de la historio. En malgranda pola urbo mi vidas fenestron de librejo. Kaj en tiu fenestro mi vidas multajn librojn kun belaj titoloj kaj koloraj kovriloj. La homoj preterpasas tiun librejon, neniu haltas antaŭ tiu fenestro. Tiam — laŭlonge de la strato venas juna ĉirkaŭ tridekjara sinjoro. Li haltas antaŭ la fenestro kaj li rigardas, rigardas... Ion-interesan li ekrimarkis. Li surmetas sian nazumon por vidi pli bone. Jen inter la multkoloraj libroj kun la kiantaj titoloj kuŝas modesta griza broŝuro »Internacia Lingvo« de D-ro Esperanto! Kaj tiu juna sinjoro eniras la librejon kaj aĉetas la broŝuron.

Mi vidas, kiel tiu sama sinjoro post kelkaj tagoj surpaŝas la ŝtuparon al la loĝejo de d-ro Zamenhof en Warszawa, kiel li levas la manon kaj sonorigas, kiel la pordo malfermiĝas kaj kiel en la kadro staras la modesta malalta figuro de d-ro Esperanto. La fremda sinjoro rigardas lin dum momento kaj poste diras en la nova

* Parolado okazis de la Literatura Vespero, Parizo,

I.

Thomas estis trideksepjara, kaj portis lipharojn kaj pintan barbeton. De nememoreblaj tempoj Thomas estis tiel frizita; kaj tio bone lin plaĉis.

Tiam okazis, ke Thomas en fatala posttagmezo akompanis sian edzinon al la vagonaro, kaj per la sama vagonaro foriris societo de aktoroj. Kaj la edzino de Thomas plaĉe rigardis tiujn glatrazitojn. Ĉi tio iom incitis Thomason, kaj li demandis:

»Kion do vi tiel rigardas?«

La edzino de Thomas respondis tre kviete kaj plezure:

»Tiujn pure-razitajn vizagojn. Tio ja estas mirinde ĉarma.«

Post ĉi tio Thomas ne tiel kore adiaŭis sian edzinon kiel kutime: kvankam ŝi forvojaĝis por kvar tagoj; al sia patrino. Kaj dumvoje hejmen Thomas meditadis. Meditadis pri la aŭdaca ideo: »Se ankaŭ mi foje igus mian vizagon razi kalva?«

II.

Ion tian oni faras nur post zorga konsiderado de la rezultatoj; kiel decas al prudenta trideksepjara homo, Thomas unue esploris la demandojn: kiel okazis, ke iam mi decidis lasi tiujn barbon kaj lipharojn kreskantaj? Kaj ĝis kia grado ankoraŭ validas la argumentoj, kiuj siatempe kondukis min al tio?

Antaŭ ol eliri al la Stacidomstrato, Thomas jam

konkludis, ke siatempe — tio estis proksimume antaŭ dudek jaroj — li lasis kreski siajn lipharojn, ĉar tio faris pli viran impreson, tio estas, malpli junan. Tiu kialo sendube multe perdis dum la pasintaj jaroj el sia forto. Thomas ekĝemis, kiam li ĉi tion pripensis. Kaj poste li transiris al la ĉapitro: »barbeto«. Kial — Thomas nun sin demandis — mi lasis kreski mian barbeton antaŭ multaj multaj jaroj? La respondo al ĉi tiu demando estis trovebla en la sama direkto kiel al la antaŭa: estis ĝia senpera daŭrigo. Mi lasis kreski mian barbon, meditatis Thomas, ĉar tiam, en miaj studentaj jaroj, mia forta barbarkresko tion ebligis, dum tio ne estis ebla al miaj samjaruloj. Per tio mi kaptis la ŝancon por montri min, inter samaĝaj homoj, escepte *vira*. Ankaŭ el ĉi tiu kialo malmulte postlasis la dento de l' tempo. Thomas ankoraŭfoje ekĝemis, kiam ankaŭ ĉi tion li pripensis. Tute kontraŭe nun prefere urĝus — post ĉiuj ĉi meditoj Thomas ankoraŭ ĉiam estis trideksepjara — fariĝi iom pli juna.

Sed tamen li ne ankoraŭ tuj efektivigis tiel radikalan senbarbigon. La sekvoj... Li fariĝus, eble, pli juna; sed li fariĝus eble ankaŭ pli malbela. Kiel aspektus lia vizago sen barbo? Dum ĉiuj ĉi meditadoj Thomas estis veninta hejmen. Li ekstaris antaŭ la spegulo, kun poŝtuko premita kontraŭ sia mentono. La facile supozebla konkludo estis, ke li aspektus kiel haremvirino. Sed Thomas, kiu ne estis tute malsaga, malfidis konkludon, en kies estigo lia poŝtuko evidente ludis tro grandan rolon. Sed ĉu tamen estos ebla alia, pli bona provo? »The proof of the pudding is the

lingvo: »Mi estas ingeniero Antoni Grabowski. En la broŝuro de D-ro Esperanto mi ellegis vian adreson...« La koro de la juna kuracisto ekbatas pli forte. Jen venis la unua homo, kiu parolis en lia lingvo, en lia nova lingvo!... Kaj kion diris tiu unua pioniro en tiu historia momento de unua esperantlingva interparolo? »SEN LITERATURO VIA PROJEKTO NENIAM FARIGOS LINGVO!«

Kaj tiu ĉi klasika frazo de Grabowski estas kvazaŭ la signalo por la unuaj pioniroj kaj poetoj. Grabowski, la poeto, Kabe, la stilisto kaj multaj aliaj komencas konstrui sur la lingva fundamento de Zamenhof la Esperantan literaturon, formas kaj pliriĉigas la lingvon. Al la unuaj poetoj kaj verkistoj ni dankas, ke Esperanto fariĝis vivanta lingvo! Verkoj kiel »Sinjoro Tadeo« de Mickiewicz-Grabowski aŭ »La Faraono« de Prus-Kabe restas eternaj modeloj por venontaj generacioj de Esperantaj poetoj kaj verkistoj!

En tiuj ĉi krizaj tempoj, kiam ankaŭ en nia movado regas disputoj, malkontento, rezignemo, en tiaj momentoj aperas sur la filmekrano de la historio la plej brila bildo el la vivo de nia Majstro Zamenhof: la jaro 1905! La unua Esperanta kongreso en Boulogne sur Mer! Mi vidas la vastan feste ornamitan salonon de la teatro. Mi vidas kiel feste vestitaj homoj sidas en la salonego, kiel ili staras en la koridoroj, sur la balkonoj, sur la placo antaŭ la teatro. La muziko de la nova lingvo flugas de buŝo al buŝo. Kaj mi vidas la malaltan modestan, figuron de la Majstro. Pri kio li songis kiel knabo, por kio li oferis la plej bonajn jarojn de sia juneco, tio komencis efektiviĝi en Bulonjo...

»Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa

familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn, pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas...«

Jes, enviindaj estas vi, malnovaj pioniroj, kiuj povis travivi tiujn momentojn, kiuj vi povis vidi kaj aŭdi la Majstron kaj amike premi lian manon!...

Sed rigardu: el tiuj multkoloraj bildoj de la historio la tekniko konservis malgrandan fragmenton. La stranga sorto favoris nin. Unu mallonga sceno, mallonga filmo restis por la venontaj generacioj. Sur tiu ĉi ekrano ekaperos nun la kara figuro de la mortinta Majstro. La poeto de Bulonjo el la jaro 1905 staras antaŭ vi kaj deklamas el la »Fundamenta Krestomatio« la neaŭdeblajn vortojn de la himno. Ankaŭ li, la unua poeto en Esperanto rolos inter la vivantaj verkistoj kaj poetoj.

Multaj, multaj venas al ni, multaj iras de ni... Sed ni verkistoj ankoraŭ havas unu esperon, unu malgrandan esperon: ke tiu kiu penetris foje pli profunden en la spiriton de la lingvo, kiu ekflugis kun ni en la paradizon, en la fabelan landon de la Esperanta poezio, kiu paŝis sur la multkoloraj flortapiŝoj teksitaj de l' poetoj, kies koro ektemis kaj ekbatis pli forte ĉe la sonanta bronzo de la sorĉa Esperanta vorto, kies tempiojn tuŝis la juna freŝa vento de nia literaturo — ke tiu ne forlasos nin tiel rapide...! Ke tiu restos fidela! Ke li kantos kun ni la kanton, kiun kantis la poeto de Bulonjo:

»Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero!«

«eating of it»*) meditis Thomas. Kia mondo de dezirplena atendo kaj timo povas sin kaŝi en tia simpla proverbo!

»Se mi igos razi mian barbon«, rezonadis Thomas en la soleco de la edzin-forlasita domo, kie la pensoj dolĉe ŝvebis en la silento, kiel fumnubetoj en seaventa atmosfero, — mia mentono montriĝos. Kia estas mia mentono? Mi kredas, jes — mi kredas, ke mia mentono estas tro mallonga. Mi havas tro dikajn kapacojn; kiu bezonas plilongigilon... Almenaŭ...

Sed — liaj pensoj plue drivis — se mi razigos mian barbon kaj lipharojn, videbliĝos ankaŭ mia buŝo. Kaj mia buŝo estas bona, tre bona... Kaj subite Thomas, kiu — kiel eble tio jam iom montriĝis — estis iom vanta, almenaŭ ne tute indiferenta pri sia aspekto — subite ekmemoris diraĵon de amiko el sia unua, kaj nura, senbarba studentjaro. Tiu amiĉjo diris: »Mia onklino Clémentien diras, ke vi ĝuste havas buŝon por fariĝi amata de ĉiuj knabinoj.« Diable, diable, pensis Thomas, tion diris onklino Clémentien; mi ankoraŭ scias tion precize. (Tiajn aferojn li ĉiam sciis »ankoraŭ precize«.) Nu, envere, Kees rakontis tion kun ia moka malestimo, sed jen kio estas ja ĝuste la plej rava en tia okazo. Diable, diable, se tiu onklino Clémentien tion tiel rimarkis, ja tiu buŝo mia verŝajne estas okulfrape bona. Hm — do la afero statas jene: Buŝo kontraŭ mentono. Buŝo por razi, mentono kontraŭ razi. Jes, tiel estas. Ĉar mi ne povas pro la buŝo forrazi miajn lipharojn, kaj lasi la barbon pro kontraŭmentona vidpunkto. Ekstremokaze tio estus ebla, se mi povus havi plenan barbon, kvankam tio estus sufiĉe Krügersimila; sed kun mia pinta barbeto — kiu ne rapide kreskas,

*) La provo de pudingo estas manĝi ĝin.

kaj neniam fariĝos plena barbo — ne!

Mi kredas, ke mi nur devas decidi. Ĉar ankaŭ tiu barbeto mem ne estas perfekta. Nepe estas io komika en ĝi alie — vere, ne tre malofte — la stratbuboj ne krius kelkfoje al mi: »Bé, bé«, nek tuo impertinentulo la antaŭan semajnon: »Mi gardos la terpomŝelojn por vi... »Nu, jes, tio neniel tuŝas min, sed tamen pravas, ke estas io nebona en la barbeto.

»Do« — Thomas, kiu estante tute mastro en la domo, kuŝis sur tri seĝoj, sin levis kun la sento de historia momento, kaj kun energia kapjeso li diris al si mem: »For la barbon!«

Tiam Thomas ekpaŝis al la frizisto ĉe la stratangulo, kie li estis kliento.

III.

Antaŭ ol eksidi en la frizista seĝo, Thomas sin turnis al la helpanto, kaj diris:

»Mi volas liberigi de la tuta afero; de mia barbo kaj miaj lipharoj; de ĉio.

Tio estis tiel klara, ke la klareco povus ŝajni troigita. Sed Thomas volis troigitan klarecon, ĉar li ne deziris longan konversacion kun la helpanto, kiu, se tio ne estus tiel klara, emus plu demandi, aŭdeble al ĉiuj prilaborataj razklientoj; plu demandi kun nekredema, eble moka vizaĝo. Ĉar Thomas, kiu ne estis tute indiferenta pri sia aspekto, same ne estis tute indiferenta pri la impresado de sia konduto.

La helpanto sentis pro la iom incitita koncizeco — frizisthelpantoj estas, post la pastroj, kaj kun la kelneroj, la plej grandaj homkonantoj — ke li devas ne multe kaj precipe ne kritike reagi. Li do nur diris, interese: »Ho, sinjoro«, kaj sin turnis al la ŝranketo kun la proprajoj de Thomas. Thomas eksidis decideme



Labat

Dimanĉaj ciklistoj

kaj kun ia provoka digno. Tiam la afero komenciĝis. La helpanto — li nomiĝis, aŭ pli ĝuste: li nomiĝas Piet — sapumis Thomason. Tute normale, tiel ke Thomas jam iom timeme ekdubis, ĉu Piet bone lin komprenis. Sed li ne volis senbezone rekomenci ĉon. Piet razis. La animo de Thomas atendis. Dume liajn okulojn trafis lia bildo kun la barbo. Ankoraŭ kun la barbo. Li kvazaŭ trinkis tiun vilajon kun tia apetito, kun kia trinkas homo kondamnita al dieto sian lastan glason da biero.

Nun la helpanto prenis la tondilon. Kaj permesis al si, por ununura atesto pri la neordinareco de la afero, tondi kelkfoje en la aero; signifoplena antaŭludo. Tiam li ektondis maldekstre en la barbeton; tiam li tondis dekstre en la barbeton. La ornamaĵo de kvarona homekzistado estis falinta.

Li plue tondis. Kio estis barbeto, fariĝis stoplaro, kio estis lipharoj fariĝis stoplaro. El la spegulo Thomason kontraŭrigardis fremda viro.

La mastro, kiu mem ne razis, nur havis la administron super la butikoj kaj la »salono«, hazarde envenis. Li rigardis la fremdan viron en la spegulo; li rigardis la nomplaton de la ŝranketo de Thomas. Li diris: »Kion vi nun komencas, sinjoro Thomas?«

Thomas trovis plej bone, nun al la mastro, trakti la aferon komforte. Li respondis bonhumore sed brave, kaj ne sen akcenteto de digno; — kio signifis, ke li, kvankam li faras ion strangan, tamen, per la diablo, ne estas idioto, pri kiu oni povas ridi; sed sinjoro, kiu faras petolaĵojn, rigardendan de ĉiu afable kaj estimplene. Li diris: »Mi foje eksperimentos kun kalva vizago. Tio ŝajnas al mi pli agrabla kaj facila, kaj se al mi ne plaĉos, nu, mi simple ree lasos kreski la aĵon.«

»Tje«, langklakis la frizisto, kiu pli atentis la vizagon de Thomas ol liajn vortojn — »Vi strange aspektas. Kion ja diros via edzino, kiam ŝi vidos vin tial!«

Laŭ la sento de Thomas — kiun ni ja ekkonis kiel ne tute indiferentan pri la impreso de sia konduto ĉi tiu rimarko iomete transpasis la limojn, kiuj laŭ lia opinio apartigas friziston kaj frizaton. Li nur aristokrate ridis, kiel iu, kiu la aŭditan rimarkon rigardas amuza folkloro simptomo kaj diris post kelkaj momentoj, kun digna neglektemo:

»Jes ja — por mia edzino ĝi estos granda ŝanĝo.«

Kiam li sin aŭdis tion diri, li rimarkis, ke ankaŭ ĉi tio ne estas la ĝuste bona respondo.

IV.

Tia estis la ago. Aparte zorga prilaborado de la senbarbigitaj regionoj per aluno; vigla spruĝigado per forta vinagro ankoraŭ apartenis al ĝia perfektigo. Tiam Thomas venis al la stadio de la sekvoj. Tiuj estis multaj, kaj el tiuj multaj estis kelkaj, kiuj estis gravaj.

Kompreneble ne estis grave, ke la frizistedzino, paradanta post la magazentablo kun kapo bele frizita kvazaŭ por kortega balo, ne rekons lin, kaj respondis lian klientsaluton kun rezervo kaj miro. Iom pli grava ŝajnis fariĝi la afero, kiam en la loka poŝtoŝeĵo li volis akcepti monon por poŝtekkonto je la nomo de sinjoro Thomas; kaj la oficisto, kiu diable bone konsis sinjoron Thomas, suspekto fiksis la rigardon sur la senbarban knabon, kiu sin prezentis kiel sinjoro Thomas.

V.

Kun tiuj ĉi akiritaj spertoj sinjoro Thomas iris la sekvan matenon al sia oficejo. Trifoje li renkontis

Ĉarideto

Printempbalado

— Anton Wildgans —

Jen kia estas homkatimo:
Zorgadi pri morgaŭa tag' kun timo —
Dum blinda restas la malriĉa kor'.
Gardenojn belajn oni preteriras
Kaj arbojn ekflorantajn ne admiras,
Eterne la animoj plenas je dolor'.

Ke pro miraklo ĉio renoviĝis,
Pordegoj malnovvegaj disŝoviĝis,
De kie sonas nun infana rid' —
Ke en aero cigareda fumo,
Orangodoro ŝvebas kaj parfumo
Dum preterpasas iu belulino kun rapid'.

Ja ĉion tion oni ne eksentas,
La lacajn laboristojn ne atentis,
Laŭ stratoj hejmirantajn dum vesper'.
Ne vidas junulinojn, kiuj tremas,
Ĉar nun iliajn vangojn palajn premas
Printemp-sopiro, plena je danger'.

En mia viv' mi malsanulon sciis,
Plu lia korpo, pensoj ne funkciis,
Sed tamen sana estis la anim' —
Rideti tiel kore li scipovis
Pro sunradi' printempa, kiu trovis
Al li la vojon el la malproksim'.

Rideti povis li pro flor' plej eta,
Kaj ĉi ridet mirinda kaj kvieta
Vivigis la okulojn por moment':
Scipovis plori li pro kantosoj,
Gu-spiri, kiam de siringburgonoj
Salute bonodoron portis vent'.

Abundis liaj larmoj kaj rideto
Je ĉi mirinda, dolĉa kor-kvieto,
Mankanta al la sensentema kor'.
Mi lian manon en la mia tenis,
Herede la rideton prenis
De lia pala buŝo dum la mortohor'.

Mirigas tial min ĉi homkatimo:
Zorgadi pri morgaŭa tag' kun timo,
Dum blinda restas la malriĉa kor'.
Gardenojn belajn oni preteriras,
Kaj arbojn ekflorantajn ne admiras,
Eterne la animoj plenas je dolor'.

El la germana: *Hilda Dresen*

nerekonanta konaton. La sento ne esti rekonata ne estis tre interesa per si mem; sed tamen en tiuj renkontoj estis io, kio frapis Thomason. Nome, kiel strange estas, kiam vizagoj, al kiuj vi vin turnas kun afableco, kaj kiuj, kiel vi atendas laŭ la kutimo de jaroj, devas renkonti vin kun la sama inklino, subite estas eligintaj el la interrilata kuneco. Estis tia sento, kiam oni havas, kiam oni, jam suprenveninte, erare pensas, ke restas ankoraŭ unu ŝtupo por suprenpaŝi; estis kvazaŭ psika spegullabirinto; estis, kiel se oni, ridinte kaj petolinte al iu en la apuda ĉambro, rimarkas, ke tiu evidente jam de longe ne plu estas tie... Sed krome ĝi estis: frostiga. Thomas vidis la vizagojn, sed ili ne vidis lin. Eble mortinte oni glitos tiel, nerimarkate, preter siaj

vivantaj amikoj... Amikoj kiujn oni subite rigardas alie, rigardas kiel fremdulo; pro tio ke ili kiel fremduloj preterpasas.

Tiam Thomas venis al la oficejo, al la kasist-oficejo, kie li iam ricevis lokon kiel juna juristo, post la senluziigo de advokatidealismo, kaj kie li nun estis prokuristo, kune kun la maljuna Wensma.

Enirante, Thomas ekhavis la ideon nun foje esti sprita. Li evitis la ĉambron, kie ĉiuj malpli altaj akto-dioj laboris ĉe la longa tablo, kaj frapis la pordon de la oficejo de la »altuloj«, inter kiuj altuloj ankaŭ Thomas rajtis sidi.

»Envenu«, vokis la premita sensona voĉo de la maljuna Wensma.

Thomas malfermis la pordon. Iom timeme — kun la senbarbeco ŝajne li akiris ankaŭ aliajn aktorajn ecojn — li enpaŝis, fermis post si la pordon kun la iom kompleksa sinteno de oficaspiranto, faris malgrandan riverencon al la grizbarbetulo kontraŭ li, kaj diris: »Pardonu, vi verŝajne estas sinjoro Wensma?«

»Jes«, tiu diris, iom konfuzita pro la kombino de bone konata voĉo kaj nekonata vizaĝo...

»Mi nur venas momenton por diri al vi en la nomo de mia frato — tiu estas sinjoro Thomas — ke li nepre ne povas veni al la oficejo hodiaŭ.«

»Ah,« demandis la maljuna Wensma konsternite, »ĉu via frato estas malsana?«

»Jes«, diris la frato de Thomas, »li fakte estas operaciita.«

La vortkombino estis iom stranga, sed la enhavo estis tiom agitiga, ke la strangeco per tio ne rimarkiĝis.

»Opera...??« Sinjoro Wensma terurite rigardis la junan sinjoron Thomas.

»Jes, vidu, sinjoro Wensma, mian fraton tre ĝenis... har-doloro, kaj sciu do... por iom malpliigi tion, li igis forpreni parton de sia hararo!« Kaj ĉar ŝajnis, ke Wensma ankoraŭ ne komprenas, Thomas iris al li, etendis al li la dekstran manon, tenis la maldekstran antaŭ la loko, kie iam estis liaj lipharoj kaj barbo, kaj ridis: »Kaj vidu, tial mi ja faros lian laboron hodiaŭ! Li precize sciigis min pri ĉio!«

VI.

Sed ĉio ĉi estis nur antaŭludo. Fakte la nura grava venis, kiam venis la edzino de Thomas, kiun li atendis kun certa timo. Li ne avertis ŝin. Kia ŝi trovos lin? Kiel antaŭ ol decidi pri la razoperacio li tiom zorge pripensis la eblajn sekvojn, same kompreneble ankaŭ post tiu prilaborado, li penis fiksi la valorkurzon de sia aspekto. Li trovis sian buŝon bona, kvankam li ne povis konsenti kun la tro favora prijugo de onklino Clémentien; kaj sian mentonon tro mallonga, koniganta al la mondo lian mankon de energio, kio estis perfekte pravigita de liaj tro dikaj vangoj. Certe, li estis malbeliĝinta; kaj li lernis taksi la valoron de lipharoj kaj barbo kiel mizerkaŝon. Malice li pensis: tion virinoj ne havas! Finfine li povus lasi ĝin kreski, kiam ajn li volus. Sed ĉu li faros tion? Car li ja estis pli malbela, sed ankaŭ pli juna. Estante ne tute indiferenta pri la impresado de sia konduto, li tion bone rimarkis per la mieno de la knabinoj, kiujn li renkontis sur la strato. Nu jes, la impresado, kiun li faris, ne estis imponega, sed almenaŭ ia impresado estis konstatebla. Viro kun agimpona barbo kaj lipharoj estas ekster konkurso; senbarba knabo, tiu estas almenaŭ momenton ekzamenata de la virgulinokuloj. Do, se lia edzino ne ŝatus lin, nu ha!, pensis Thomas — ĉar la konscio pri juna



Darell

Pejzaĝo

Bona reĝo kaj sentima soldato

— A. Vachek —

Reĝo Ondro XVII. eldonis la jenan severan ordonon:

»Laŭ paragrafoj 798 kaj 965 de la ŝtataj leĝoj, estas malpermesite kaj punote, uzi dum veturado tra la ĉefa reĝa strato de nia reĝurbo sirenojn, fajfilojn aŭ trumpetojn aŭtomobilajn.«

Tiu ĉi reĝa reskripto estis eldonita laŭ la deziro de reĝino Kunigunda, kiu ne povis plu jam toleri la bruon.

Post la eldono de ĉi tiu ordono, la kripligoj kaj vundadoj, kaŭzitaĵ de aŭtomobiloj, dekobliĝis. Tiu katastrofa plimultiĝo de akcidentoj okazis plejparte en la ĉefa reĝa strato.

Sekve de tio, reĝo Ondro XVII. eldonis pluan ordonon:

»Laŭ paragrafoj 798 kaj 965, kune kun la nro 1648 b., d., Ni pliakrigas la malpermeson, uzi en la Reĝa strato sirenojn, fajfilojn aŭ trumpetojn aŭtomobilajn, aldonante, ke en la nomita strato estas malpermesite ankaŭ veturi kun rapideco pli granda ol 8 km. hore.«

Sed la reĝa aŭtoritato estis, bedaŭrinde, en dekadenco. Reĝino Kunigunda iĝis pli kaj pli nervoza kaj el la policaĵ raportoj evidentiĝis, ke la progresantan malsanon de ŝia Reĝina Moŝto kaŭzas plejparte alt-rangaj ŝtataj oficistoj, kiuj tute ne atentis ŝtatajn ordonojn, veturante tage kaj nokte tra la reĝa strato

aspekto tuj reflektas junecajn frivolajn ideojn al la interno — tiam ankoraŭ estus aliaj!

Sed tiuj senbarbaj pensoj estis for, kiam en la krepuska posttagmeza horo li atendis ĉe la stacidomo ŝian vagonaron. Tiam nur estis la espero, la necerta, tima espero, ke ŝi... Ĉar tamen estis tiel ege agrable, ke ŝi revenas, kaj, ho ĉielo, se eble ŝi estus konsternita pri li; trovus lin teda kaj bulsimila; se la nudiginta eksterajo eble klarigus al ŝi la erarojn de lia interno — ĉar li *estis* senenergia! — kaj se ŝi...

La vagonartondrado veturis rompe tra ĉi tiuj supozoj. Thomas ekstaris ĉe la barilo. Rigardis, rigardis — nun sinforgese... Jen ŝi estas! Kun koraj okuloj li ŝin rigardis; kapsalutis, svingis la manon...

Kaj ŝi...

Momenton ankaŭ ŝi rigardis lin; tiam maltrankvile ŝiaj okuloj vagis for de li. Kaj Thomas vidis, ke ŝi ruĝiĝas pro ektimo. Optimisto povus ĝin nomi ankaŭ »surprizo«.

Ŝi restis nekuraĝe forrigardanta, kiam ŝi estis ĉe la barilo. Thomas sentis kunpremiĝi sian koron. Silente — kaj forrigardante — ŝi venis al li. Li prenis ŝian valizon. Kiel kondamnito, tiel malfeliĉa li kondukis ŝin al la atendanta veturilo. Kiam li diris al la veturigisto sian adreson, lia propra voĉo sonis al li fremda.

Unu apud la alia ili sidis en la kupeco; la valizo sur la malgranda benko kontraŭ ili. Kaj ili silentis.

Tiam Thomas diris:

»Infanjo, nu, donu kison al mi. Ĉu vi trovas, ke mi tiom idiote aspektas?«

Ŝi klinis la kapon, obei sin lasis kisi. Thomas rimarkis, ke ŝiaj okuloj estis fermitaj. Kiam li fortiris sian kapon de ŝia vango — stratbubo enrigardis spione — ŝi momente suprenrigardis, sed tuj, timeme mallevi la okulojn, kaj ruĝiĝis.

kvazaŭ tra tute ordinara ŝoseo, uzante superflue sirenojn kaj trumpetojn.

Reĝo Ondro XVII. furiozis.

Kaj vere, estis grava kaŭzo por koleri. Ĉar reĝino Kunigunda minacis forkuri al siaj gepatroj, se la malbonaĵon oni ne forigos. Kaj tiu ĉi eventuala forkuro ne estis bagatelo, ĉar la reĝo per la geedziĝo ricevis de sia edzino kiel doton du duklandojn kaj keston da amerikaj akcioj.

»Io devas okazi«, diris la reĝo, irante »inkognito« trarigardi la reĝan straton.

»Io devas okazi!« — ekkriis la reĝo minace, vidante la aŭtomobilon de la polica prezidanto veturi per pli ol 70 km. hore, kaj estante superŝprucita de koto kaj duonsurdigita per korsiĝa bleko de itala fajfilo, ĉar la polica prezidanto veturis en aŭto de FIAT.

»Mi devas ion fari kontraŭ tio«, ekgemis la reĝo, vidante sian kortegan ceremoniestron, kiu per sia aŭto faligis militinvalidon kune kun lia gardo.

»Soldataro! Jes, soldataro! Jen la sola elemento, kiu min ankoraŭ respektas, kaj sentas devon obedi. Soldataro devigos la homojn respekti kaj obedi miajn ordonojn.«

»Nu, tio estas tre bela kaj tre edifa«, diris reĝo Ondro XVII., »sed ŝajnas al mi, ke la plenumigo de miaj ordonoj kaŭzas pli da bruoj, ol ilia malatento.«

»Infanjo«, ree diris Thomas, »Ĉu vi trovas ĝin tiom malbela? Mi nur volis ĝin provi. Lieske! Se vi trovas ĝin malbela, mi ja povas ĝin lasi ree kreski. Post kelkaj semajnoj mi ree estos kia antaŭe.« Li prenis ŝiajn manojn, kaj, fortunante la kapon, ŝi diris: »Kiam mi aŭdas vian voĉon, ĉio estas la sama, sed kiam mi... — momenton ŝi levis la okulojn...

»Dio«, ŝi plende diris, kaj kun ektimo — »mi tiom hontas... tia fremda viro... Mi neniam alktimigos al ĝi...«

»Sed infanjo«, li denove parolis al ŝia oreleto, oblikve direktata al li, »tio ja ne necesas, mi povas ĝin lasi kreski. Sed tamen estas *mi!* Mi ne komprenas, ke vi tiel...«

»Ne estas mia kulpo,« — la sono de ŝia voĉo ŝajnis kvazaŭ ŝi devus venki larmojn. — Sed mi tiom sopiris al vi; kaj nun...«

»Nun vi foje vidas min en mia vera formo«, li provis ŝerce. »Nu pupo! Vi tamen amas min, kaj ne tiujn tufetojn da haroj!...

»Jes« ŝi diris ankoraŭ ĉiam kun fortunita kapo — »sed vi estas tiel fremda...«

»Nu bone,« li trovis, »atendu momenton!« Li aperigis sian postukon, tenis ĝin, haremvirine etenditan sub la nazo.

Ŝi rigardis, duone, unue ne kuragaŭte; tiam subite kun ravata surprizo: »Jes! Nun estas vi!« ŝi kriis kaj kisis lin sur la vangojn, ankoraŭ kaj ankoraŭ.

VII.

Sed Thomas ne respondis ĉi tiun kareson. Li estis silenta. Li meditis. Meditis pri »amo kaj ekstera aspekto«. Kio estas tro komplikita afero por esti plu esplorata ĉi tie.

El la nederlanda: *May Bijveld.*

AFORISMOJ

Zorgplene li rapidis en la ĉambrojn de sia edzino.

»Ĉu al vi ne ŝajnas« li demandis zorgplene la reĝinon, »ke ekstere estas eĉ pli da bruoj?«

La reĝino, rigardante lin ironie, ĉesis ludi la edzigmarŝon de Mendelssohn kaj respondis: »Ho, tute ne!«

»Ĉu vi ne aŭdas, ke oni pafas?, demandis la reĝo.

Si rigardis lin desupre, dirante: »Al vera reĝa sango, pafado neniam ŝajnas bruoj. Ĝi estas kiel spirado.«

Dum posta, mallonga, tempo, la reĝa aŭtoritato estis de ĉiuj rekonata.

Post kelkaj tagoj reĝo Ondro XVII. veturis mem per aŭto signita per reĝa krono, kaj en la reĝa strato, veturante kun rapideco de 60 km. hore, li uzis la reĝan trumpeton.

Pafado de gardanta soldato en la pneŭ-radon de l' reĝa aŭto devigis la reĝon halti.

La soldato rektigis kiel kordo kaj salutis.

»Ĉu vi scias, kiu mi estas?«

»Jes.«

»Do?«

»Vi estas Reĝa Moŝto Ondro XVII., grandduko de...«

»Bone, sed kial vi min haltigis?«

»Ĉar mi havas la ordonon haltigi ĉiujn, kiuj veturas en la reĝa strato pli rapide ol ŝarĝveturilo, aŭ uzas aŭtotrumpeton, fajfilon aŭ sirenon.«

»Bone, sed por mi, la reĝo, tio ne validas!«

»Mi havas la ordonon, ĉiujn...« ekkuragis la soldato.

»Bruto! Kaptu lin!«, kriegis reĝo Ondro.

»Kaj mi opiniis...«, ĝemis la soldato, dum la ĝendarmoj lin trenis.

»Kion vi opiniis?«, demandis kolere la reĝo.

»Ke mi estos premiita pro la perfekta plenumo de l' ordonoj, kaj ke pri mi oni skribos en la infanaj legolibroj.«

»Tri jarojn da severa karcero pro grava ofendo de reĝa majesto«, ordonis la reĝo.

La soldato nomiĝis Jaromiro.

Kiam oni liberigis lin post tri jaroj, oni komunikis al li, ke ankoraŭ tri jarojn li estos sub polica observo. Post tiu ĉi sciigo li rapidis al sia familio. Lia filo dum jam iradis lernejon.

»Paĉjo«, diris foje la knabo, »ni havas en la nova legolibro belan rakonteton.«

»Do, legu.«

»Foje«, legis la knabo, »elveturis la reganta reĝo Ondro XVII. aŭtomobile en la reĝan straton de sia reĝa urbo. Sed tie estis malpermesite veturi rapide kaj uzi avertajn ilojn bruajn. Tio estis ordonita de la reĝo mem, por ke li ŝirnu la regatojn kontraŭ troa bruoj.«

Lia Reĝa Moŝto pensis jene: tie ĉi deĵoras soldato, zorgante, ke la bonfara lego estu plenumata: mi provu, ĉu la soldato kuragos gardi la leĝon eĉ kontraŭ la reĝo. Kaj li ordonis, ke sur la aŭtomobilo troviĝu malproksime videbla reĝa flageto kaj ke oni veturu pli rapide ol estis permesite kaj oni uzu la grandsonan trumpeton.

Kaj post mallonga momento ekĝojis la koro de la reĝo.

La soldato tuj haltigis la reĝan aŭtomobilon kaj

— La fraŭlo enuas ĉie, la edzo nur hejme

Alexandre Dumas p. j.

— Kontraŭ la nejusta juĝo de la kunvivantaro oni rajtas apelacii eĉ la postvivantaro kiel eĉ pli alta instanco, sed kontraŭ ĉiu jurkutimo nur tiam, kiam oni estas pasiginta la vivdaŭran punon.

Ludwig Fulda

— La homo devanta morti egalas al aktoro, kiu neniam sciigos, kia estas plue la teatraĵo, en kiu li mem kunludis unu akton.

Ludwig Fulda.

— En la scienco ni ĉiuj similas al infanoj, kiuj tie kaj tie suprenprenas silikon, dum la vasta oceano de l' nekonata etendiĝas antaŭ niaj okuloj.

Isac Newton.

— La historio ĉefe instruas, ke la homoj ne volas lerni laŭ ĝi.

Hegel.

— La penso estas la ŝtelanto de l' vivo.

Hebbel.

— Filozofadi estas lernadi morti.

Montaigne.

— Bona societo devas esti pli granda ol la nombro de la Gracioj, plimalgranda ol la nombro de la Muzoj. (3, 9)

Varro.

— Du aĵoj ĉiam denove plentigas min je respekto: la stelara ĉielo super mi kaj la morala lego en mi.

Kant.

— La cerbo estas la utero de l' spirito.

De la Mettrie.

— Bestoj satigas, la homo manĝas, nur la homo de spirito scias manĝi.

Brillat-Savarin.

— La homojn priridu neniu krom kiu vere amas ilin.

Goethe.

— Ekzistas nek arto patriota nek scienco patriota.

Goethe.

— Kiu ne apartenas al la popolo, kaj kiuj estas ĝiaj malamikoj? — Ĉiuj, kiuj ne sentas mizeron!

Richard Wagner.

— Mi tute ne volas malaserti la efektivecon de la amo. Kontraŭe mi opinias ĝin malutilo de la societo kaj de la individua feliĉo de la homoj. Laŭ mia konvinko ĝi kaŭzas multe pli da malbono ol da feliĉo, ... eĉ estus bonfaro inda je bona diino liberigi la mondon de tiu malbonaĵo.

Napoleon Bonaparte.

— Ĉiu homo, kiu ne estimas sian propran vivon, estas sinjoro super la vivo de aliulo.

Montaigne.

(Walter Lippmann)

respektplene salutis lian reĝan moŝton, kiu, vidinte ke li estas rekonita, elpaŝis el la veturilo.

Irinte al la soldato, li diris: »Mi estas via reĝo.«

»Mi scias«, respondis la soldato, tremante de feliĉo.

»Kaj kial vi min haltigis?«

»Laŭ la ordono, via reĝa moŝto.«

Aŭdinte tion, la reĝo pagis la ordonitan punpagon, donacis al la soldato ringon kun la reĝaj inicialoj kaj, frapetante lian ŝultron, diris: »Pro tio, vi, bravulo, meritas, ke pri via modela plenumo de ordonoj sciuj legu la junularo, lernante de vi.«

Jaromiro ekridetis kaj pensis:

»Do, vidu, tamen mi penetris en la legolibrojn.« Kaj li demandis la fileton: »Kio estas la titolo de la rakonteto?«

»Bona reĝo kaj sentima soldato.«

El la ĉeĥa: Fr. Kudrna.

Poeto Firduzi

— H. Heine —

I.

Oraj homoj, argenthomoj!
Se tomanon trampo diras,
temas sole pri argento,
pensas ni argent-tomanon.

Sed en buŝo de regnestro,
de la ŝah', tomano estas
ĉiam ora; ŝah' ricevas,
donas sole or-tomanojn.

Tiel pensas bonaj homoj,
tiel pensis mem Firduzi,
la verkinto de la glora,
adorata Ŝah Nameh.

Li ĉi grandan herokanton
skribis laŭ la vol' de l' ŝaho,
kiu ja promesis pagi
ĉiun verson per toman'.

Deksepofoje floris rozo,
deksepofoje velkis ĝi,
kaj la najtingal' ĝin kantis
kaj mutiĝis deksepofoje,

Dume sidis la poeto
ĉe l' teksilo de la penso
tage nokte, kaj li teksis
pri l' giganta kant-tapiŝo,

pri l' tapiŝ' giganta, kie
li mirinde intertekis
de l' patruj' fabelkronikon,
la prareĝojn de Farsistan,

korheroojn de l' popolo,
kavalirojn, aventurojn,
kaj demonojn kaj magion,
multe da fabelaj floroj:

ĉion freŝa kaj vivanta,
brileganta, flora, fajra,
kaj ĉiele radianta
de la sankta lum' Irana,

de l' pralumo dia, pura,
kies lasta fajrottemplo
malgraŭ la Koran' kaj Mufto
en la kor' poeta flamis.

Kiam finis li la kanton,
sendis al patrono sia
la poet' la manuskripton,
sume versojn ducent mil.

Tio estis en banĉambro,
en la banĉamb' en Gazna,
ke la migraj kurieroj
de la ŝah' Firduzin trafis;
ĉiu monosakon tremis,
kaj, genuc, ĉe l' piedoj
de l' poeto metis, kiel
honorpagon de l' poem'.

La poet' la sakojn ŝiris
haste: ĝui la delonge
malhavatan oraspekton!
sed rimarkis konsternite,

ke enhavas tiuj sakoj
blankargentajn, nur argentajn,
ĉirkaŭ ducent mil tomanojn.
Kaj amare li ekridis.

Kaj kun rid' amara nun
tiun sumon li dividis
en tri samajn partojn kaj
li al ambaŭ kurieroj

donis kiel kurierpagon
po triono kaj la trian
donis al la banservisto
lin zorginta, por trinkmono.

Tiam prenis vojbastonon
kaj forlasis li la urbon;
antaŭ la pordeg' li skuis
polvon for de siaj ŝuoj.

II.

Se li home ordinare
sin ne tenus al promeso,
rompus vorton per forgeso,
ne kolerus mi amare.

Sed ne povas mi pardoni
ke li volis trompi min
per dusenco de l' termin',
kaj min per silent' friponi.

Digna estis la figuro
laŭ vizaĝo kaj laŭ gesto,
rara estis la majesto
vere reĝa la staturo.

Li min alrigardis flame
kiel sun' en ĉielsfero,
kaj fiera vir' de Vero,
li mensogis al li tamen.

III.

Ŝah' Mohamed, post mang' festena,
nun estas en humor' serena.

En krepuska ĝarden', sur purpura divan'
Li sidas ĉe l' ŝpruce freŝiga fontan'.

Servistoj mienojn respektajn faras,
la favorato, Ansari, ĉestaras.

El marmorvazoj ŝprucas koloroj
de fajraj, volupte riĉaj floroj.

Kaj kiel odaliskoj ĉarmaj
ventumas sin sveltaj arboj palmaj.

Cipresoj, senmovaj ĉe l' ventĉeso,
ĉielon revas en mondforĝeso.

Sed laŭtas subite liuta son
Kun milda misterplena kanzon'.

Sub sorĉ levigas la regant':

»Kies la teksto de tiu kant'?»

Ansari al kiu demandis li, donis
Respondon: »La versojn Firduzi komponis.«

»Firduzi?« konfuze la princo ekkrias,
»Do kion pri la granda poeto vi scias?«

Ansari respondas: De temp' longdaŭra
li vivas en mizer' bedaŭra,

en Thut, patrubo de l' poet',
en sia eta ĝardenet'.

La ŝaho silentis longe, rigide,
kaj poste: »Ansari, mi urĝas, rapide

en stalojn! Elektu! Metu la selojn
sur cent azenojn, kvindek kamelojn,

kaj ŝarĝu ilin per ĉiu trezoro,
per kiu plezuron trovas homkoro,

per maloftaĵoj, multekostaĵoj,
per karaj kaj luksaj paradvestaĵoj,

per mebloj el santal' kaj ebur'
kun ora, argenta miniatur',

kaj per kalikoj kun anso arta,
per grandmakula fel' leoparda,

per ŝaloj, tapiŝoj kaj riĉaj brokatoj,
artfabrikitaj en miaj ŝtatoj,

kaj ne forgesu meti en pakojn
brilajn armilojn kaj ĉabrakojn,

ne manku trinkaĵoj delikataj,
ĉiaj mangaĵoj en pot' konservataj,

kaj mandeltortoj, artaĵo konfita,
kaj mielkuko agrable piprita,

aldonu el la araba gento
dekdu ĉevalojn, vetkurajn kun vento,

kaj same dekduon el sklavoj nigraj,
korpoj el bronz', penspite viglaj,

kun tiuj belaj aĵoj, Ansari,
tuj devas vi mem la vojaĝon fari,

kaj porti ilin, kun mia salut'
al granda poet' Firduzi en Thut.

Ansari laŭ vortoj de l' Estro tuj agis,
kamelojn, mulojn li plenpakis

per honordonacoj, ja, laŭ la kosto
superaj al tuta provinc-impосто.

Kaj post tri tagoj jam, laŭ ordono
ekiris kaj en la propra persono

sub ruĝa flago de hetmano
li rajdis antaŭ l' karavano.

La okan tagon atingis la trupo
al Thut, kuŝanta ĉe montsubo.

Tra l' pord' okcidenta marŝis tie
la karavano bruege kaj krie,


kun tambursono, kornsonor'
kaj kun triumfjubilaj hor'.

La Allah Il Allah — plengorga kanto
jubilis el ĉiu kamelkondukanto.

Sed tra l' alia pord', oriente,
El Thut eliris ja sammomente

Funebra grupo ĉerkoporta
Por enterig' de Firduzi, la morta.

El la germana: G. Waringhien.



Darell

Pejzaĝo

Nia bonfaranto

Historio el la praarbaro

— Walter Brecht —

Estis sabate vespere, kaj mi sidis en la brand-butiko en Charlesbury kiu situas norde de Quibec, inter la praarbaroj de Kanado. La kolonio aĝas du jarojn kaj konsistas el kvar blokdomoj kaj unu brand-butiko, kies muroj estas el krudaj, nerabotitaj lariktabuloj, ekstere ili estas kovrataj per gudraj tegmentlamenoj.

En Charlesbury loĝas 28 animoj, enkalkulante la Dobermann-hundon kaj la kuniklon. La kanari-birdo mortis antaŭ tri semajnoj.

Post la dorsoj de la domoj la arbaro kunfermiĝas, kiel kruda, senfina, grandega pelto, disvolvita sur la tero.

Tie fluas flankbranĉeto de la Lorenz-rivero el la senfino de l' arbaroj kaj portadas la arbojn, kiujn la burĝoj de Charlesbury faligas, kaj la rivero sur sia supro portadas ilin, tra grandega terpeco, trans arbaroj, montoj kaj valoj, en la direkto de Sudo.

Peceto de veturebla vojo, kiu debranĉiĝas sudoriente de Charlesbury ĉirkaŭ dutagvetura distanco de la landstrato Vancouver-Montreal, estiĝas gracila vejneto kaj tie formortas, antaŭ la brand-butiko de Charlesbury.

La brandbutiko situas nemalproksime de la domo de Jack Pakham, kiu estis iam ĝentilhomo, sed nuntempe li faligas arbojn, same kiel ni ĉiuj. Li surmetas ĉiudimanĉe gladitan duran kolumon, havas kinoaparaton, radioricevilon, kuniklon kaj Ford aŭtomobilon kaj estas abonanto de New-Jork-Times, kiun li kutimas ricevi ĉiun jaron kvarfoje en kvaronjaraj paketoj, liveratan el Marytown. Por ke lin ne trafu iaspeca maljusto, ĉi-loke estu menciata, ke malgraŭ la tiel grandega superfluo de papero, li mendas ĉiam la plej delikatan higienan paperon, en grandaj cilindroj. Do estas nature, ke sekve de tio ĉi li okupas la urbestran oficeon en nia urbo. En lia domo loĝas krom li ses aliaj arbofaligistoj.

Tiun vesperon pri kiu nun mi parolas, falis la unua neĝo kaj ĉirkaŭ meznokto Martin Baller vidis dulupojn. Sed tiam estis nur la oka horo vespere kaj en la butiko ĉeestis dudek kvin animoj, inkluzive la Dobermann-hundon. La franco, Napoleono Daguerret, kuŝis malsane hejme kaj oni ne povis esperi, ke Jack Pakham venos, ĉar posttagmeze alvenis la kvaronjara aŭtomobilo el Marytown, surhavante centkvindek kilogramojn da New-Jork-Times, dekkvar cilindroj da «salon»-papero kaj unu grandan, enpakitan objekton, pri kio ni sciis nenion kaj pri kio ĉirkaŭ la sepa horo jam validis deksep vetoj. La ŝoforo de la aŭtomobilo estas ebria jam de posttagmezo kaj dormis en la kabano de Jack Pakham, kun la kuniklo sur sia kapo.

Ni, kiuj sidis en la butiko, trinkis kaj fumis, kaj kies vizagojn kovris hirtaj barboj, — ni ĉiuj havis ion sur la konto.

Daguerret ŝtelis antaŭ du semajnoj la kudrilarskatolon de Irene Sullivan kaj nun kuŝis hejme, ĉar hazarde defalinta lignobranĉo rompis lian ŝlosiloston.

Ancoraŭ Martin Baller, la idioto: eĉ li sciis, ke Charlesbury finfine ne estas alio, ol malliberejo enŝovita en la plejinterton de l' arbaroj por malfeliĉaj homoj, kiujn la vivo piedpremadis.

Ĉi-loke estu ancoraŭ rimarkate, ke la Dobermann-hundo ne havis laŭrajtan posedanton kaj neniu sciis, kiu kunportis ĝin. La multaj piedfrapoj kiujn ĝi ricevis, certe ne grasigis ĝin, sed ne estus dece ĝin lasi senmencia, kiam ni nombras la animojn.

La grandan cerbumadon ĉi vespere kaŭzis la mistera objekto, kiun Pakham portis en sian domon kun la

helpo de Joe kaj lasis ĝin enpakita ĝis kiam la aliaj foriris. Fine, ĉirkaŭ la naŭa horo aperis Jack Pakham en dura kolomo kaj kravato, sed kun malpuraj, trolaboritaj manoj kaj kunportis botelon da viskio kiun li transdonis al la butikmastro, kiu estis same arbofaligisto, kiel ni ĉiuj, sed en la trinkado li tre postrestis malantaŭ ni.

La atendado kaj streĉeco kiuj tenis katene ĉiujn animojn, atingis nekredablajn dimensiojn ĉe la alveno de Jack kaj esprimiĝis en ĝenerala silento, kiun interrompis nur kelkaj kraĉoj de tabakmaĉantoj.

Jack devolis de sia kolo la ŝalon, demetis sian ŝafpeltjakon kaj rompis la silenton per jenaj vortoj: »Porka malvarmeĝo estas, knabetoj.« Li eksidis kaj ŝtopis sian pipon.

Tom Raifelhuber, nia gvidanto, sidigis apud Jack. Ni kredis, ke nun sekvos enuiga interparolado, variigita per viski-glutglutadoj kaj multaj paŭzoj, dum kiu nur tute flanke kaj per hazardaj aludoj defalos la vualo de la mistera, sekreta objekto. Sed Martin Baller la idioto, simple ne povis atendi plu kaj sen ia enkonduko li balbutis: »Nu, Jack diru: kio estas tiu grandega umo?«

Nenio povas esti pli ĝena, ol sensanktigi la majestatan silenton de serioza horo. Do lian demandon sekvis granda silento tra kiu klare aŭdebligis la yebuardo de l' tempeto inter la arboj kaj la zumzumado de la neĝeroj, kiuj jetiĝis kontraŭ la vitrotabuloj de l' fenestroj.

Sed Jack estis ĝentilhomo antaŭ ol li venis pro lia edzino en la arbaron kaj li transsavis nin diskrete tra la ĝena situacio.

Jene li respondis, kvankam tio ĉi estis neniam aŭdita sensacio: »al ni ĉiuj mankas bankuvo. Hodiaŭ posttagmeze ĝi alvenis. Mi mem muntis ĝin komplete kaj de nun vi povas vin bani.«

La neĝo komencis pli forte frotfrapi la fenestron kaj ni sciis pri la mondo nur tiomete, ke ĝi komenciĝas ie, ie — trans la nemezurebla maro de l' arbaroj. Se Jack estus por ni konstruinta templon, aŭ estus donacinta aeroplanon, tio estus nenio, tio valorus nenion kaj ni ne povus per ĝi ion komenci. Sed tiel estis tute alie. Jack estis nia bonfaranto.

Tiam Raifelhuber, nia gvidlaboristo, ŝovis malantaŭen sian seĝon kaj ekparolis:

Neniu estas inter ni, kiu ne estus metinta fiordan lignon sur la fajron kaj neniu estas inter ni, kiu tial ĉion ne malhavis, kio faras vivinda la homan vivon. Mi mem foje elreligis tramvagonon, en kiu sidis la homo, kun kiu mi ne povis aliforme ordigi mian konton kaj mi laboras de post dek jaroj en la arbaro, kvankam ne dorlotata de la Felicho. Cetere Jack estis *gentleman*, ĝis kiam li pro lia edzino ne migris al la Sing-Sing kaj el ĝi en la vastan mondon. Jack estas malbona laboristo, terure malbona arbofaligisto, sed li estas pura kaj bona animo kaj li estis mem, kiu unue donis al ni la kuniklon, poste donacis la kinoaparaton, poste la radioricevilon, per kiu ni povas aŭskulti hodiaŭ la orkestron de la Ritz-Carlton Hotelo en Montreal, morgaŭ la helpokriojn de la vaporsipoj naĝantaj sur la Oceano. Mi supozas, ni ne povas doni pli grandan kaj belan riverencon al Jack, ol la jenan: antaŭ la banej-barako, kiun ni komencos konstrui morgaŭ matene, ni starigu monumenton, sur kiu estu nur la sekvontaj vortoj:

»Je la memoro kaj honoro de Jack Pakham, arbofaligisto kaj gentleman, starigis liaj

La fontoj de Granado

— Francisko Villaespera —

Alhamar. Mia poet' kion portas?
Abul Beka Sinjor', floron kaj Kasidon.
La flor' — el viaj ĝardenoj
kie ĝi tremis feliĉa,
kun la granda fierec'
povi ravi vian vidon.
Kaj se vi donas permeson,
kiun ŝi petas humila,
Sobeya, ja la plej bela
el Granadaj sinjorinoj
antaŭ via bril-kortego
recitos mian Kasidon...
Kasidon al la fontanoj
de via urb' favorata.

Alhamar. Mi danke la floron prenas,
sed ni aŭdu la Kasidon.
Sobeya. La fontoj de Granado...
Ho admiro!
En la nokto, kun stelo-parfumado,
ĉu io pli doloras ol ilia ĝem-spiro?
Ĉio ripozas kun plej rava sento
en l' argento fluida de la luno.
Ce l' odoro je nardoj sentebla tra la vento,
akvo-freŝeco estas kiel unu
mano refreŝiganta tempion por momento.
La akvo estas kvazaŭ urbo-anim'. Ĝi viglas
dum ĝia dorm', kaj flustre
rakontas de l' silento
la legendojn vivantajn malgraŭ forges-

doloro,
kaj sub la brilaj steloj de la nokto
trankvila
ĝi havas ja pulsadojn de dissirita koro.
La akvo-voĉo sanktas!
Kiu trafas l' akcenton, fundau muzikon
ĝian,
iam povos kompreni ankaŭ parolon dian...
Di' per la akvo-guzlo siajn misterojn
kantat'!

La fontoj de Granado...
Ho admiro!
En la nokto, kun stelo-parfumado,
ĉu io pli doloras ol ilia ĝem-spiro?
Unu font', gutadanta, sopiras kun
trembriloj
ĉe ĝarden' ke la mano de misteraj
sorĉantoj
briligu sub la luno ĝiajn klarajn
ŝprucilojn
por doni al la nokto pli helajn diamantojn,
kaj dume sur marmoron disfaligas sen
fino
la perlojn de l' kolringo de riĉa Sultanino.

* El la dramo: La Fonto de Perloj.

bravaj kunburĝoj, kiujn feliĉigis la Fortuno
tiel malmulte, kiel lin.

Tiun ĉi decidon ni akceptis unuanime kaj per granda
emocio. Poste ni kantadis kelkajn kantojn, la kantetou
plej ŝatatan de Jack »Ho panjo, ho panjo, ni revenis al
vi,« ni kantis trifoje, tiel bela ĝi estis kaj ni trinkis
multe da viskio. Poste ni ekmoviĝis ĉirkaŭ la deknua
horo antaŭ meznokto, helpe de du homoj ni transport-
igis Napoleonon Dagnerret kaj ĉiuj transiris en la domon
de Jack. La kuniklo ankoraŭ tie sidis, sur la kapo de

Aliaj fontoj falas kvazaŭ kun torentbruo
kaj inter poplaleoj defluas sen ripozo,
trenante en la viva helec de sia fluo
interne de ŝaŭmĉerkoj la kadavrojn de
rozaj.

Alia tra la muroj malrapide glitadas
kaj inter la hederoj senĉese ĝi larmadas,
kvazaŭ iom post iom, tra vundo sensignifa,
sian sangon elversus ĝi ĝis resti senviva.
De l' fontoj en la heloj
ploras la moviĝanta argento de la steloj.
Pro tioma malseko la aero malvarmas.
La nokto disfluigas aromon de kaskado.
La akvo ĝemas, kantas, sopiras, ridas,

larmas,
kaj super la konfuza eterna murmurado
aŭdigas rauka plendo de l' river-serenado.
La sango de Granado fluas tra tiuj fontoj,
kaj en la mildsilento de la noktoj serenaj,
aŭdante akv-muzikojn sur la malnovaj
pontoj,
ni sentas ke ĝi fluas ankaŭ tra niaj vejnoj.
Dormigas la spiriton ĝia muzika ĉarmo,
ni ensorbas la sorĉon de ĝiaj elspiradoj,
penetras ĝis la karno ĝi en daŭraj
filtradoj
kaj tra l' okuloj njaj fugas en ŝtela
larmo...

La fontoj de Granado...
Ho admiro!
En la nokto, kun stelo-parfumado,
ĉu io pli doloras ol ilia ĝem-spiro?
Alhamar. Vian belan Kasidon mi aŭdis kun admiro
kaj ĝi restos skulptita per kufikaj literoj
en la plej bela fonto de l' palaco-ĝardenoj,
por ke de l' vizitantaj okuloj estu miro.
La versoj estas, meze de nia malkvieto,
palmoj je kies ombro ni revas pri
amglor'...

Kiu ne aŭskultadas la kantojn de l' poeto,
simile ne atentat' la voĉojn de l' Sinjor'!
Plej nobla reĝokrono iĝas la poezio...
Se pri via poemo povus esti taksado
kaj mi estus mondreĝo, mi donus ja,
pro Dio,
por ĉiu poemstrofo urbon kiel Granado!
Por pagi viajn versojn ne ekzistas

trezoro.
Sed, se ne por la versoj, mi pagos por
la flor'...
Prenu mian reĝringon kaj sigelojn el
oro...

Al vi estu farata la plej granda honor'!
El la hispana: *Jaume Grau Casas.*

la dormanta soforo el Marytown kaj restis ankaŭ trank-
vile kiam la lumo de niaj lampoj grimpis laŭ la muro
por ke ĝi brilante haltu sur la emajlo de la belega
bankuvo. Akvon ni varmigis, trinkajon ni kredencis sed
la fortuno de la lotado favoris al Martin Baller, al la
idioto, kiu unua rajtis bani en la kuvo kaj kiu poste,
hejmenirinte, unua ekvidis la ardajn, fosforeskantajn ok-
ulojn de l' unuaj ĉjaraj lupoj en la neĝa, malvarmega,
fresta nokto.

El la germana: *A. Kemény.*

MIA ANGULO

— JULIO BAGHY —

Karikaturoj

Ca organizanto

Post dekduhora baraktado en triaklasa kupeo de la plej malrapida »rapidvagonaro« de la mondo fine mi sukcesis enlitiĝi. La silento de la hotelĉambro min ek-lulis, mi jam fermis la palpebrojn, kiam, ve... energia frapo sur la pordo... La palpebroj malfermiĝis kaj terurite mi vidis, ke en la kadro de la pordo aperas du metrojn alta larĝsultra atleto. Frostotremo kuris tien reen sur mia dorso... Feliĉe, ke la atleto havis mildan rideton ĉe la lipoj, mieldolĉan mienon kaj ĉielbluajn revemajn okulojn, ĉar tio forpelis miajn unuajn pensojn: malgranda hotelo, mi estas eksterlandano, tutmonda krizo, oni supozas, ke eksterlandano portas kun si almenaŭ unu milionon ktp. Poste venis la penso, ke verŝajne la hotel-servisto deziras preni miajn ŝuojn por purigi. Nu bone, li prenu! Mi estis turnonta min al la muro, kiam la atleto ekparolis.

— Kara majstro, bonan matenon!

— Unue, mi ne estas majstro, due, por mi nun komenciĝas la nokto, kara samideano — mi respondis iom akre kaj bedaŭris, ke la vizitanto ne estas bandito, kiu kontentigis per la alproprigo de mia plata monujo kaj poste lasus min dormi. Dormi... dormi... ho, dormi!!!

— Ĉu mi ĝenas vin?

— Ho, tute ne! — kaj mi malbenis la etiketon — Sed, kara samideano, vi certe komprenos, ke la dumnokta vojaĝo, la preparigo por la vojaĝo kaj... Kion mi diru al vi? Mi estas iomete tre laca.

— Kredeble, kara majstro. Mi ne miras — li diris kaj preninte seĝon li trankvile eksidis.

— Mi ne estas majstro.

— Bone, bone, mi scias, kion oni decas scii. Mi scias, ke vi estas...

Li ekparolis flate drolote, sed la incensfumo de la belaj frazoj ne atingis mian komprenon. Ho, dormi... dormi kaj nur dormi!... Miaj tempioj nerve pulsas. La okuloj brulis pro maldormo.

— Vere vi aspektas tre laca, kara majstro.

— Ĉu ne? — kaj vekigis espero en mi, ke mia vizitanto baldaŭ forlasos min. — Jes, efektive mi estas iomete laca kaj la kapo...

— Ĉu ĝi doloras?

— Nur iomete, sed tio ne gravas... Verdire, la vojaĝo ne estis agrabla kaj mi sentas rigidigon en mia tuta korpo.

La okuloj de la vizitanto ĝoje ekbrilis kaj per subita gesto li deprenis de si la jakon, suprenfaldis la manikojn de la ĉemizoj kaj mi vidis tiajn muskolojn, kiujn eĉ lukto-ĉampiono devus respekti ĉe sia kontraŭulo. Pro miro la demando haltis en mia gorgo. Teruraj scenoj el bulvardromanoj zigzagis en mia kapo. Li ridetis afable kaj proksimiĝis al mia lito.

— Gustatempe mi venis.

— Ĉu vi pensas — respondis mia ĝemo.

— Vi devas scii, kara majstro, ke mi estas diplomita masagisto — kaj li faris manmovon, kiu rememorigis min pri la cirkaĵaj atletoj. — Sed antaŭe mi estis buĉisto.

— Ne diru! Ĉu vere? — kaj la frostotremo komencis kankandancon en mia dorso.

— Sed mi abomenas la sangon. Mi heredis la karakteron de mia patrino. Si estas laktvendistino. Jes, kara majstro, se vi ŝatas la kremon... Nu, iun tagon mi devis

forlasi la buĉejon por komenci mian militservon. En la armeo mi estis en la Roto de la Milita Ruĝa Kruco kaj baldaŭ oni rimarkis mian talenton en la arto de la flegado. Do, tie mi lernis la masagiŝtan metion, kiu absolute kontentigas min. Ĉar, kara majstro...

— Mi ne estas majstro, jam mi...

— Mi scias, kion oni decas scii. En la roto ni lernis la flegadon sub gvidado de kuracistoj kaj ni lernis anatomion por ne erari dum la laboro. Vi povas fidi min. Via korpo estas travidebla por mi. Mi refreŝigos vin tute fakscie, ĉar vin bezonas nia movado kaj... Ĉu vi havas pudron? Nuntempe oni masaĝas uzante pudron. Antaŭe oni uzis oleon. Ĝi malpurigas la tolaĵojn kaj krome ne incitas sanige la epidermon. Ĉu vi ne havas pleŭriton? Estas grave scii dum masaĝo de la skapolaj muskoloj. Ĉu vi ne havas incititan renon? Estas utila scii dum la masaĝo ĉe la vertebra muskolaro. Nu bone, kaj nun...

Kaj nun komenciĝis mia torturado. Efektive mi refreŝigis, ĉar la dormodeziro estis forpelata. Mia bonkorā samideano parolis kaj parolis, dolorige ilustris sur mi la erarojn de la malnova masaĝarto, poste milde demonstraciis pri la novaj progresoj. Knedante min, li klarigis al mi la nomon kaj destinton de ĉiu muskolo kaj intertempe, akompanate de miaj veoj, dolorsibloj, li malkaŝis la celon de sia vizito.

— ... kaj malgraŭ tio, ke mi estas nur komencanto, tamen mi konstatas, ke en la movado ne ĉio estas en ordo. Mankas la nepre necesaj organizaĵoj. Precipe mankas fakorganizaĵoj. Por ekzemplo, al kiu organizaĵo povus aparteni mi laŭ mia profesio? Mi turnis min al la gvidantoj, sed ili ne respondis. Fine mi eksciis, ke la fakorganizaĵo de la masaĝistoj ankoraŭ mankas en nia movado. Longe mi pripensis tiun ĉi mankon kaj subite venis la ideo, ke ĝuste tiu fako estus la plej utila por nia movado. Ĝi estus la refreŝiga taĉmento por niaj lacaj pacaj batalantoj.

— Hahaha! Hihihhi! Bruhahahahaha!

— Kio okazis?

— Mi estas iom tiklema... Certe, tio estas bonega ideo!

— Ĉu ne! Ankaŭ vi trovas la ideon brila! Prezentu al vi, kiom da utilo alportus I. O. M.

— Iom?!... Ho, jes, certe, iom, ... jes, iom ĝi alportus.

— Vi bonvolis miskompreni min. Ne iom, sed I. O. M. Internacia Organizaĵo de Masaĝistoj. Cetere mi ankoraŭ ne decidis pri la definitiva titolo. Oni povus nomi la novan organizaĵon I. O. M. E. por havi simbolon pri la maniero kaj precizigi la esperantistan karakteron.

Duonsvene, mortknedito mi ĝemas mian respondon.

— Jes, iome... sed vi masaĝas trro-e, ka-rrra sami-dddea-nno... Se tiamaniere vi daŭrigos vian knedadon, mi povus proponi por via organizaĵo nomon, kiu entenas ankaŭ la efikon.

— Ĉu vere?

— Jes! M. O. R. T. Masaĝista Organizaĵo Refreŝiga kaj Tutmonda. En la titolo oni retrovas promeson kaj efikon.

— Hahaha! Kara majstro, vi bonvolas ŝerci. Jen la efiko de la masaĝo. Vi refreŝigis, vi havas bonhumoron... Espereble vi subtenos mian ideon ĉe la instancoj de nia movado.

— Tre volonte! Bedaŭrinde I. C. K. kaj U. E. A. ĉesis ekzisti, sed mi rekomendos vian servon al la membroj de la nova reorganiza komitato. Ili estas vere lacaj pacaj batalantoj, kiuj bezonas knedanton por kunglui la nekunglueblan.



OBSERVO

PROUST-STRATO EN PARIZO.

Ce la sojlo de la deka datreveno de la morto de Marcel Proust — laŭ mallonga sciigo — li ricevas straton en Parizo. Pri li oni baptas tiun straton, sur kiun rigardis dum tiom da jaroj la fenestroj de lia loĝejo. Pli ĝuste: *ne rigardis*. Ĉar dumtage Proust kurtenis la fenestrojn. Li ne volis, ne sciis vivi tage... Li vekigis nur kiam jam mallumigis ĉirkaŭ li Parizo. Kaj li rerifuĝis en sian kurtenitan loĝejon, kiam komencis lumigi la aŭroro.

Nur en la mallumo de l' nokto li sciis vivi. Li malamis la akran brilon, laŭtan bruon de la tago. La homojn li ne evitis tiel kaj tiom, kiel oni vaste diris pri li. Ĉirkaŭ noktmezo aŭ post noktmezo li volonte renkontis liujn, kiuj pro io interesis lin. Sed dumtage li ne volis konatigi kaj amikiĝi. *Mia estas la nokto*: jen lia devizo. Kontraŭ la tago li krude, senindulge batalis. Aŭ eble la senindulgecon de la taga vivo, de la taga lumigo ne eltenis liaj nervoj.

Li estis en tia materiala situacio, ke lia vivo ne dependis de la verkistaj honorarioj. Li ja ne estis vera milionulo, sed li ne devis zorgi: kiom da honorario li ricevos laŭ linioj. Eĉ, li povis pagi por la apero de liaj skriboj, se ili ne povis alimaniere aperi.

La ombrojn de la ombroj de l' ombroj li priskribis. La nuancojn de l' nuancoj. Bedaŭrinde: ne tiel, ne tiom klare, ne tiom koncize, kiel tion postulas la spirito kaj lego de la franca lingvo. Nekredeble malmultan okazajon priskribis sur nekredeble multaj paĝoj Marcel Proust. Preskaŭ nenion, per preskaŭ nebla parolabundo.

Belegajn titolojn trovis Marcel Proust. La unu estis: *Mi serĉas la postsignon de l' perdidintaj tempoj*. La alia: *En la ombro de la ekflorintaj junaj virinoj*. Skribi mal-longe, simple kaj klare: jen la tradicio kaj lego de la franca literaturo. Proust ne sciis, eĉ ne volis skribi mal-longe, simple, klare. Li distiris timige longa ĉiun sian romanon. Malgrandajn novelojn li vastigis je grandaj romanoj. Li preferis halti kaj longe halti tie, kie estus estinte pli bone rapide pluiri.

Mi devas konfesi: min lacigas kaj ofte tedas Proust. Ĉi tiun mian senton ne ŝanĝis tiu modo, kiu, kelkajn jarojn post lia morto, levis subite je granda, eĉ plej granda modo ĉi tiun tre neverŝajne komplikan verkiston. Kvankam jam antaŭ la alveno de la granda modo mi rekonis, ke Proust estas vera verkisto. Li nur ne volis trovi la simplan, sinceran, homan voĉon.

Mi konfesas, kvankam hodiaŭ ne decas konfesi: mi opiniis nemotivita tiun grandan Proust-modon, kiu, kelkajn jarojn post la morto de Proust, trakuris Francujon kaj Eŭropon. Sed estis same tiom aŭ eĉ pli maljuste, ke Proust mortis kvazaŭ nekonate. La pariza nokto interesigis pri Proust, la bizara strangulo kaj frenezulo de l' nokto. Sed liaj libroj, verkitaj per turmenta zorgo, asketa avido, nenion aŭ preskaŭ nenion interesis, dum li vivis: kaj dum, estante nokta migrantanto, li serĉis tamen la rekonon de l' tago. La unu ekstremon ŝanĝis la alia ekstremo. La dumvive tre malŝatata, tre malhonorata Proust fariĝis postmorte troe tro honorata literatura grandulo. Por mal-longaj jaroj.

Li vere ne estis tia literatura diletanto, kia oni lin opiniis dum lia vivo. Kaj ne tia literatura papo, kia oni lin promociis post lia morto.

Sed tion li vere meritas, ke li havu straton en Parizo, ĉe la deka datreveno de lia morto. Ĉar nuraj doloraj trompigiloj estis lia vivo. Ĉar la skribo estis por li sankta kaj granda afero. Ĉar sincere, tute — sin mem, sian propran vivovidon li volis doni kaj donis en ĉiu sia skrib-

ajo. Ĉar por neniu kaj por nenio li faris kompromisojn. Estis domaĝe fari tiel grandan modon, el li post lia morto. Kaj estis domaĝe tiom ne zorgi pri li dum la tempo de lia vivo.

K. B.

GORKIJ.

La tuta Ruslando festis la 40-jaran jubileon de la verkista kariero de Maksim Gorkij. Laŭ la rusaj laboristoj kaj kamparanoj li apartenas al ili; kvankam li neniam flatis al ili en siaj verkoj. Generale tiu ĉi verkisto neniam flatis, neniam mensogis kaj unuavice pro ĉi tio festas lian jubileon ne nur lia patrolando, sed la tuta kulturmondo. Li mem skribis foje pri Tolstoj, ke *antaŭ Tolstoj ne eblis mensogi*. Eble ĉiam estis Tolstoj antaŭ liaj okuloj, aŭ eble ankaŭ la rusa popolo estas tia, kia Tolstoj: ne eblas antaŭ ĝi mensogi. Gorkij estas verkisto de kvardek jaroj, kreis abunde kaj skribis ĉiam nur la veron. Li skribis la vivon. Se li skribas du liniojn, se li konstruas unu frazon, tiuj jam enhavas parton da vivo, kun ĝia viva spirado kaj kun ĝia kruda kaj fresaodoro. Li verkis ĉiam pri la rusa vivo, pri laboristoj, kamparanoj, kelkfoje pri etburĝoj kaj ofte pri ekstercitaj vagabondoj kaj revemaj migrantoj. Ankaŭ li mem vivis longe la vivon de laboristoj, li estis ŝarĝportisto kaj ŝiptrenisto sur la Volga. Kiam lia unua novelo aperis antaŭ kvardek jaroj, li estis fervoja laboristo en Tiflis. Lia nomo estis *Aleksej Maksimoviĉ Peŝkov* kaj li elektis la pseŭdonimon Gorkij. Gorkij signifas: *amara*. Eble ne tute trafas tiu ĉi nomo ĉe li, ĉar en liaj skriboj estas ne multe da amaro. Li priskribas la vivon de malriĉuloj, mizeruloj kaj prostituitoj, kaj ne ploreme kaj malespere, sed kun brutala simpleco kaj memkompreneble. Eĉ speco de profunda kaj vera vivoĝojo estas en la skriboj de Gorkij, la amo de l' vivo por la vivo mem, la kompreno de l' naturo kaj senekzemple forta fido en la estonto. En okcidenteŭropaj »intelektaj« rondoj nuntempe Gorkij ne estas tre laŭmoda verkisto, interalie pro tio, ĉar ili vidas en li nur regulan reprezentanton de la realismo kaj ne trovas ĉe li altajn kaj komplikajn animajn problemojn. Gorkij tamen estas granda verkisto. Granda, ĉar li kreis neforgeseblajn figurojn kaj ĉar lia realismo ne estas tute »regula« kaj »dezerta« realismo. Gorkij estas la unua moderna verkisto, kiu priskribis la kamparanon



P. Manaut

Marmoro

kaj la laboriston ne desupre kaj ekstere. Li apartenas al ili, vivas inter ili, kaj prezentas ilin tiel memkompreneble, kiel *Balzac* aŭ *Flaubert* la burĝojn. Kaj estas psikologio en liaj romanoj: eĉ, post *Tolstoj* kaj *Zola* li estas la unua verkisto, kiu vere rekonas, ke ankaŭ pri la simplaj homoj oni povas verki sinceran kaj profundan animan portreton. Ĉi tion ni vidas en ĉiu lia verko, en »La perdigintaj homoj«, en la diversaj vagabondaj noveloj kaj romanoj, en lia fama dramo: »Nokta rifugejo«, en la unua rusa kolektiva romano: »Patrinoj«, en la aŭtobiografiaj libroj kaj en iu lia lasta kaj eble plej plena, plej bela verko, en la »Artamonovoj«, kiu estas nomebla la rusa kampara-Buddenbrook. Oni ne povas ne lian grandegan efikon al la tuta juna rusa literaturo; kaj lia verkado nun jam apartenas al la trezoroj de la homa kulturo. Tiu ĉi kaduk-korpa, sulkita, kamparavizaĝa granda verkisto kaj bona homo vere meritas, ke oni festu lin.

K. B.

(X) *LADY CHATTERLEY'S LOVER*, la fama romano de *Lawrence*, ne povis aperi ĝis nun en Anglujo kaj Ameriko, ĉar la prudaj britaj cenzuristoj faris pretekstojn kontraŭ kelkaj pli erotikaj partoj de la libro. Sekve la anglalingva eldono de la fama verko aperis en Parizo kaj la francaj librovendistoj vendis ĝin por pipra prezo al la anglaj turistoj, kiel »pikantan legajon.« La romano nun fine tamen aperis ankaŭ »oficiale«. Amerika entreprenisto eldonis la libron de la eminenta angla verkisto, mortinta antaŭ kelkaj jaroj — *kun la forlaso de la genaj partoj*.

(X) *KLEINER MANN WAS NUN?* estas la titolo de grandsukcesa libro nuntempe aperinta en Germanujo. La aŭtoro estas tute nova homo: *Hans Fallada*. En la romano la heroo estas tipa germana ethomo: la familia, juna etoficisto, kiu la krizo faris senlabora kaj fine tute muelas, kune kun lia familio. Eksterordinare pesimisma estas ĉiu ĉi libro, ĝia fino estas la plej aflikta »unhappy and« kaj tamen ĝi havas senekzemplan sukceson.

RECENZO



GOETHE: ROMAJ ELEGIOJ. LA TAGLIBRO. tr. de *K. Kalocsay*. (Literatura Mondo, 1932.) Dukolore presita, kun 6 ilustraĵoj, 14x10.5 cm. 80 pg. Prezo: broŝ. 0.40; bind. 0.60; silke bindita, numerita kaj subskribita de la tradukinto 1.—dolaro afrankite.

Cent jarojn antaŭe, kiel vi certe scias, en Weimar mortis la granda eŭropano, Wolfgang von Goethe. Kaj por celebri tiun memoron, en ĉiu lando aperis studoj pri la geniulo aŭ tradukoj el liaj libroj. Ankaŭ en nia lingvo ni povas fieri pri la publikigo de la titolo citita verko. Ĝi ne estas el la ĉefaj inter ĉiuj Goethe-produktoj, sed tre bone karakterizas lian pensadon kaj humoron, kaj estas des pli valora, ju pli malofte ĝi estis tradukata. Oni ja konis en Esp-o la flankon majestata — iom tedan, ni sincere konfesu — de la giganto, dank' al la traduko de tiu apotekista epopeo, kia estas *Herman kaj Dorotea*; oni konis lian patosan aspekton per la traduko de tiu marmorstila ĉefverko, kiu prezentas *Ifigenio en Taŭrido*; oni konis lian romantikan figuron per la traduko de la sentimentalaĵoj, foje sentimentacaj *Suferoj de juna Werther* — sed la viron mem, en lia intima, kerna vivo, kiel li sentas, kiel li amas, ni ankoraŭ ne konis. Tiu libro obligas

al ni pli rekte kaj sincere ankigi al la granda poeto, ĉar, laŭ la parolo de Pascal, post la vortoj del' verkisto ni eltrovas la homon.

La du partoj traktas proksimume la saman temon — la amon de Goethe al *Christiane Vulpius*, sed laŭ du tre diversaj tonoj: la unua estas pentrita per antikve klasikaj procedoj: la fono, la scenoj, la stilo, eĉ la poemformo kaj ritmo, ĉio estas aludo aŭ imito al Katulo, Tibulo kaj Propercio, kiujn li nomas la triumviroj de l' amo. De la unuaj versoj:

Stonoj, parolu al mi! ho parolu, vi altaj palacoj!
Stratoj, vorton nur! Ĉu vi silentas, Gem?
Ĉie ja logas anim' en la sanktaj kolonioj kaj muroj,
Romio eterna...

Ĝis la lasta poemo, bedaŭrinde ne tradukita de Kalocsay, kiu estas monologo de Priapo, ĉie restarigas la roma historio, ĉie klarigas la admiro de l' germana klerulo al la latina civilizo. La amo mem preskaŭ estas sentata kiel plej bona modelo por la ekkono kaj ekkompreno de l' antikvaj ĉefverkoj:

Kaj ĉu ne lernas mi do, se la dolĉajn formojn de l' brusto
Esploradante, la man' glitas malsupren al koks?
Nun mi komprenas nur la marmoron; mi pensas, komparas,
Vidas palpante l' okul', palpas vidante la man'...

En la dua parto, ĉio estas moderna; per viglaj kvin-jamboj, arangitaj laŭ stancoj, ĝi rakontas al ni komence pri rompigo de kaleŝo, kaj fine pri flikado de virto. Kio okazas inter tiuj du eventoj, estas malfacile klarigi per prozo. Tial mi uzos metaforon. Dum riparigas lia kaleŝo, Goethe ekvidas la logan montrofenestron de rostisto, kaj haste eniras, forgesante la bonegan manĝon, kiu atendas lin hejme. Sed kiam la servisto prezentas al li la ĉarmajn formojn de rostita kokineto, subite lia tuta apetito malaperas, kaj li devas rezigni la festenon. Dume li pripensas sian antaŭan mirapetiton, kiam hejme li glutis plurajn kokinetojn per unu sama manĝo. Je tiu memoro, lia apetito denove vekigas, sed pro danko al sia hejma kuiristino, li jam ne tuŝas la gastejajn pladojn, rezervante sin por la familia nutraĵo. Ĉu mia parabolo estis sufiĉe klara?

Tiu aventuron Kalocsay en sia antaŭparolo prezentas, kiel apoteozon de la monogameco; eble, jes, sed apoteozo simila al tiu de la antikvaj romanoj, kiu konsistis en la forbruligo de la apoteozato. Cetere mi ne emas enkonduki moralon en tiajn... kuirajajn incidentojn. Goethe, kiel ĉiuj solidaj ĝenoj, konsentis al la seksferoj ĝuste la rolon, kiun ili indas: tiun de gravega artmaterialo. Por li la moralo estis nur ĉapitro de la estetiko. Kaj tio estas pli sana spiritstato, ol la obseda kaj indignema zorgo pri obscenajoj.

La traduko, kiel konvenas sub la parafo de Kalocsay, estas bonega. En la Romaj Elegioj li uzas kun rimarkinda lerteeco antikvan metrikon. Mi jam diris aliloke, sed estas bone ripeti, ke Kalocsay estas la unua esp-a poeto, kiu scipovis komponi harmoniajn heksametrojn; tion li ŝuldas al sia severa observo pri la vira cezuro post la forta tempo de la tria piedo. Sen tiu fortika spino, plej bonintencaj heksametroj fandiĝas en nauzan kaĉon da amfibrakoj. Ni devas krome noti la pli kaj pli grandan rolon, kiun li donis al la longaj senakcentaj silaboj, prefere al la mallongaj akcentaj, ekz-e:

Si partoprenas en flam', kiun en lia brusto ŝi metis...
Tiel do fine la tromp' min trafis. Vi al mi koleras...
Ofte trompata de ŝi por mia kaj ŝia bon'...

Bedaŭrinde la lingvostofa kaj la vortumizero trudas iafoje al li tro pezajn daktilojn, kiel:

Ravas en plena matur' homojn kaj diojn la ber',
Temas pri ia prelat? Nu, ĉi prelat' estas vi.

Pri la lingvo mi rimarkis la' esceptan elizon de kelk horojn kaj ancor' (jam uzita de Grabowski), la adverbigon de al kaj re (klini sin al kaj re) la arkaikan uzon de

konvenajoj (= decaĵoj, pg 5) kaj kelkajn tre bonvenajn neologismojn, precipe *damo* (= sinjorino) kaj *sinki* (= milde fali, kvazaŭ retenate).

Resume, tiu malgranda libro, sub sia tola bindaĵo, kun siaj graciaj desegnaĵoj estas vera juvelo de nia poezia libraro. G. Waringhien.

TRA SOVAGA KAMCATKO de Sten Bergman. El la sveda tradukis: Birger Gerdman. Eldona Societo Esperanto. Stockholm. 1932. 276 p. Kun du mapoj kaj multaj fotoj. Prezo: 4.50 svedaj kronoj. + 10%.

Nuntempe la ekspediciaj libroj estas en modo, kaj legataj aŭde tie en la mondo. Ankaŭ en Esperanto aperas de nelonge jam la tria ekspedicia libro, tre elegante eldonita kaj tre riĉe ilustrita.

La libro priskribas malgrandan svedan ekspedicion, kiu en la jaroj 1920—1922 vizitis tiun preskaŭ nekonatan nordan landon kaj faris tie diversajn sciencajn esplorojn, kolektis etnografiajn kaj natursciencajn dokumentojn por la sveda ŝtata muzeo.

Jam ilia alveno al Kamcatko estis nekutima, ĉar okazis al ili ŝiprompiĝo kaj apenaŭ ili sukcesis savi sin kaj parton de sia havaĵo. La libro ne priskribas la tutan historion de la ekspedicio, nur du grandajn ekskursojn, kiujn la aŭtoro faris kun sia edzino parte per hundsledo, parte per skioj. Tiuj ĉi ekskursoj vere ne estis bagatelaj, se ni konsideras, ke ili travojaĝis 800 kaj 2000 kilometrojn.

Kamcatko estas tre interesa lando: gigantaj vulkanĉenoj, senfinaj tundroj, severega vintro. Ankaŭ la loĝantoj estas interesaj: politikaj rifugiintoj, eĉ ordinaraj krimuloj, kiuj ne tre ŝatas paroli pri sia pasinto, plejparte rusoj, sed troviĝas tie homoj el ĉiuj partoj de la mondo, precipe ĉinoj, kiuj komercadas, japanoj, kiuj fiskaŭtas grand-skale kaj konstruas grandajn fiŝkonservfabrikojn sur la marbordo. Krome indiĝenoj degeneriĝintaj, venenitaj de alkoholo kaj sifiliso, tre mallaboremaj, por kiuj la

tempo havas nenian signifon, kiuj eĉ sin mem ne povus vivteni plu, se ilin ne helpus la pli sanaj kaj pli riĉaj bestbredantaj nomadpopoloj, vivantaj en la altaj montoj. Tiuj ĉi primitivaj, migrantaj popoloj vivas en jurtoj, estas tre gastamaj, vivas vere liberan, sendependan vivon, vivon krudan, sed belan, estas baptitaj, sed tamen konservis siajn samanajn tradiciojn kaj en ĉiu jurto troviĝas magia tamburo per kiu ili petas la helpon de la favoraj spiritoj. Ili ĉesas diversajn bestojn, precipe zibelon, kiu estas la ĉefa monunuco tie. La alkoholon, kiel ĉiu primitiva popolo, ili freneze ŝatas. La plej interesa parto de la libro estas tiu pri la moroj kaj kutimoj de ĉi tiuj primitivaj gentoj. Okazis kelkfoje, ke matene ili vizitis alian jurton, kaj reirinte jam ne trovis la antaŭan jurton sur ĝia loko, ĉar ĝi dume transloĝiĝis. La bravaj geedzoj devis suferi multajn malfacilaĵojn, neĝostormojn, kiuj ofte dum tagoj ne ĉesas, froston, malsaton. Ni admiras dum la legado ne nur ilian heroan kuraĝon kaj persistemon, sed ankaŭ la konduton de la hundoj: iliaj plej fidelaj kunuloj kaj helpantoj dum la longa kaj penega vojaĝo.

Plezure oni legas ĉi tiun interesan vojaĝlibron, en kiu varias aventuraj kaj amuzaj partoj. La traduko estas flua, konciza, bona. Parvus Piscis.

JAKOB ROSENBERG: Esperanta Legajaro. Eldonis la aŭtoro, Tallinn. 15 $\frac{1}{4}$ paĝoj.

Ne tre plaĉa titolo, sed vere bona legolibro por estonoj, enhavanta koncizan gramatikon, kontentige vastan Esp-estonan vortaron, facilajn legaĵojn. Ĝia poezia parto enhavas poemojn de Zamenhof, artajn tradukojn de Hilda Dresen, la Kongresan Runon de Kalocsay, poemojn de Baghy, ktp. Tre utila, bonstila verketo. Sed en la frazo: „Tiu ĉi libro estas skribita por la homoj, kiuj kapablas ellerni...“ la artikolo estas superflua. Ludoviko Totsche.


24-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. Oficiala Raportaro. (Eld. Loka Kongresa Komitato, Paris, 96 p.)

Goje ni tralegis la Raportaron, kiu precize nin informas pri la konscienca laboro de niaj faktoroj kaj goje ni konstatas el la raporto de s-ro Kreuz, ke li mem estas unu el tiuj, kiuj pensas necesa la reorganizon de la movado. Tio estas taksinda precipe el psikologia vidpunkto, ĉar la laboro de ICK sendube ne estis bagatela kaj se iu povas resti post la opoziciaĵoj klarvinda kaj objektiva, kiel la sekretario de ICK, tiu meritas la plej altan laŭdon kaj saluton. La movadon oni devas reorganizi, sed ni ne forgesu konstati, ke la ICK-anoj estas fidelaj bravaj soldatoj de nia paca milito. La rezultoj de la lasta jaro estas relative kontentigaj. — El la datoj ni rimarkis, ke la Sveda Esperantista Federacio estas registrita kun 498 anoj kaj samtempe la gazeto de tiu societo aperas en 3000 ekzempleroj. Kio estas la kaŭzo de tiu ĉi mistero? F. Szilágyi.

HUNGARA ESPERANTO-JARLIBRO, por 1932, red. L. Kökény, 56 p. Prezo P 1.50. Jen aperis la triajara eldono de tiu ĉi modela propagandilo, sed samtempe ankaŭ utila manlibreto kaj instruilo por ĉiuj hungaraj samideanoj. S-ino John prezentas interesan bildon pri la agado de HES, Kökény pritraktas sciencan temon: E en la hungaraj enciklopedioj, Traeger verkis pri stenografio kaj E, Joó pri la jubileo de la HES-grupo en Debrecen, Zöldy pri la katolika E-movado, P. Tolnai pri la rolo de E en la rusaj militkaptitejoj. Agrabla allogaĵo de la libro estas „La Simpla Esperanto“, tiu ĉi sprita, ilustrita gramatiko de Szilágyi. Preso kaj ekstero laŭdas la presejon de Literatura Mondo. (S.)

»BES-A ADRESARO de Esperantistoj el ĉiuj landoj« 1932. Eldonas: BES, Potštejn, Č. S. R. 100 p. Prezo sv. fr. 1.—

Tiu ĉi malgranda, praktika adresaro de korespondemuloj aperigis sian jubilean, dekan eldonon, kiu enhavas



Darell

Pejzaĝo

1107 adresojn el ĉiuj terpartoj. Bone estas, ke oni povas trovi tiamaniere laŭ profesio kaj laŭ koresponda temo taŭgajn amikojn — kondiĉe, ke ili vere respondos. Multajn oni povas elekti laŭ la fotografajo. P. B.

XV. Internaciaj Floraj Ludoj en la urbo Vendrell, dum la Pentekosto de 1933

Goje ni sciigas niajn legantojn, ke la famaj Floraj Ludoj, kies mankon oni bedaŭre sentis dum la lastaj jaroj, nun reviviĝos. Ĉi tiuj belaj Ludoj, ĉiujare ripetigintaj estis interesaj eventoj de nia movado, multaj famuloj de nia literaturo partoprenis ĝin per siaj verkoj kaj ĉiujare ni povis al ĝi danki la naskiĝon de poeziaj perloj. Ni esperas, ke la saman favoran efikon ĝi havos ankaŭ de nun, kaj eble ni havos la okazon ĝojigi niajn legantojn per la publikigo de kelkaj el la premiitaj verkoj.

Inter la ordinaraĵoj troviĝas la tradicia: Originala Versaĵo Kantanta Amon premiota per la solena donaco de l' Natura Floro. Krome: Originala Ama Verko en Prozo kaj du fiksitaj tradukoj el la kataluna lingvo.

Inter la eksterordinaraĵoj ni trovas tri laŭvolajn, unu pri »Studo pri popolkantoj kaj popolkutimoj« kaj unu pri »Kiel oni faras bonstilan tradukon«. Ĉi lasta estos premiita per la dumviva abono al Kataluna Esperantisto: la premio de la aliaj estas po 50 pesetoj.

Pliaj premioj kaj temoj sekvos en la venontaj numeroj de la Kataluna Esperantisto.

Detalaj informoj estas riceveblaj ĉe la sekretario de la Juganta Komitato: sro *Jaume Grau Casas*, Ramon i Cajal 53, Sant Quinti de Mediona, Katalunujo.

Ni finas per la tradicia alvoko de la Floraj Ludoj: *Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo.*

Premio por frupago

Por komplezi al niaj malnovaj abonantoj, ni donas al ĉiuj, kiuj pagas sian tutjaran abonon por 1933, ĝis 1. decembro 1932, por 0.15 usonaj dolaroj de sendkosto

BINDAJON POR LA JARKOLEKTO 1932.



Por aliaj, nepagintaj ĝis tiu dato, ni fiksis prezon por la bindaĵo en dolaroj 0.50 afrankite. La bindaĵo estas bela duonleđa, fortika, kun ora surpriso laŭ la

suba bildo. La bindaĵon ni ekspedos kune kun la enhavtabelo samtempe kun la januara numero.

Al ĉiuj novaj abonantoj, kiuj sendas sian tutjaran kotizon por la dua jaro ĝis 1.12. 1932, kaj aldonas 0.10 dolarojn, ni sendas senpage tri diversajn numerojn de Literatura Mondo el 1932.

En la lasta momento, antaŭ apero nin trafas la dolora sciigo, ke i. akademiano, lingvakomitatano

Paŭlo de Lengyel

mortis en sia 64-a jaro en Budapeŝto je la 4-a de oktobro.

La karmemora mortinto estis unu el la atestantoj de la heroaj tempoj de Esperanto. Kiel presejposedanto de Szekszárd li redaktis kaj eldonis la gazeton »La Esperantisto« en tiu tempo, kiam ĝi estis la sola gazeto de Esperanto. Poste li iris al Parizo, estis kunfondinto de la »Presa Esperantista Societo«. Post la milito li revenis Hungarujon, kun kadukiĝinta korpore, malsane kaj mizere. Tamen li ne ĉesigis sian esperantistan agadon, li estis ĉefkunlaboranto de la L. M., en ĝia unua periodo, kaj verkis por ĝi siajn interesajn Rememorojn.

Nun post la meritplena, multpena vivo li ekripozis. Li foriris al sia amata Profesoro Cart, kies adepto li sin sentis kun la plej sindona fidele.

Dolore ni adiaŭas nian karan kunlaboranton, lia memoro kaj la rezultoj de lia fervora agado restas al ni eterne.

Al lia familio jene esprimas sinceran kondolencon

Literatura Mondo

Alvoko

L. M. intencas kolekti por listigo kaj eventuala eldono vortojn, esprimojn, parolturnojn, kiuj estiĝis en diversaj lokoj por signi specialaĵojn de la esperantista vivo aŭ por anstataŭigi intimajn, ŝercajn, duonslangajn, vulgaraĵojn, popularomajn, grimacaĵojn formojn de la respektiva nacia lingvo.

Tial ni alvokas precipe la samideanojn, ĉe kiuj ekzistas intensa grupvivo, ke ili bonvolu kolekti kaj kompleze al ni sendi la ĉirilatan materialon. Speciale ni petas la »esperantajn geedzojn«, por kiuj Esperanto estas aŭ longe estis familia lingvo, ke ili kolektu el la memoro, kaj sendu al ni tiajn spontane estiĝintajn formojn. Tre bonvenaj estus ankaŭ la kreaĵoj de Esperante parolantaj infanoj.

Neologismoj

en tiu ĉi numero, ne troveblaj en la Plena Vortaro de S. A. T.:

hasti: nerveze rapidi

sledo: glitveturilo

tomano: persa monero

trampo: ĉifona, malzorgita ulo.

La kliŝojn por tiu ĉi kaj la antaŭa numeroj afable pruntedonis la franca revuo »Le Crapouillot«.

MAJSTROADMIRO AŬ IDOLKULTO?

— G. WARINGHIEN —



Mi ne estas la unua, kiu rimarkis, ke al multaj el niaj samideanoj mankas la kritikemo, kaj ke laŭdinda entuziasmo tro ofte kuniĝas kun miriga trokredemo. Unu el la plej favoraj terenoj, sur kiu efikas tiu fanazio, estas kompreneble la persono mem de L. L. Zamenhof. Le genio de la kreinto de nia lingvo, lia escepta kapablo kunposedi samtempe la forton de teoria simpligo kaj la senton pri realaj ebloj, lia dignoplena sindeteno de ĉiu honoro aŭ profito, la perfekta nobleco de lia vivo — ĉio prezentis plej justajn pravigojn por admiro, eĉ admirego al tiel humane bela figuro. Sed tia admirato ofte riskas fariĝi objekto de vera kulto, fariĝi pura idolo: laŭ maniero, bone konata de ĉiuj religiihistoriistoj, la popolo forgesas liajn mankojn, aŭ la trajtojn, kiujn ĝi ne komprenas en lia karaktero, ĝi aldonas al liaj veraj kvalitoj ĉiujn aliajn, kiujn ĝi konsideras havindaj, kaj anstataŭ la viva, ŝanĝema, profunde kortuŝa homo ĝi kreas al si rigidan, malvarman statuon — el pura marmoro, eble, sed nur statuon. Tiun misformadon al la plejrespektato ni komencas observi nun pri la persono de Zamenhof; el diversaj flankoj de la esp-istaro oni provas atribui al li la ideojn, la principojn, kiujn oni mem aprobas; oni tiras lin al si laŭ falsa, eĉ malrespekta maniero. En sovetaĝ gazetoj, ekzemple, oni ofte legas pri la marksismaj tendencoj de lia penso, pri la mirinda akordo inter liaj lingvoprincipoj kaj la leninaj teorioj. Nu, la bazo de la marksismo estas la klasbatalo, kaj nenio estis pli fremda kaj pli abomenata por la fondinto de la Homaranismo; la leninismo baziĝas sur la diktatoreco de la minoritoj, kaj male, en ĉiuj siaj agoj kaj skriboj Zamenhof konsideris plej grava la demokratian organizon por la esperantistaro. Oni facile vidas, ke la aludita akordo estis tiom pli mirinda, ke ĝi ekzistis nur en la spirito de la ĵurnalisto.

Sed sur la ideo kampo oni povas pli facile reforĝi la realon kaj maltimi la kontraŭbatajn faktojn. Tamen eĉ pri la pli precizaj, pli konkretaj detaloj de la agado oni povas konstati la efikon de la supre denunciata tendenco. Ni esploru ekzemple la demandon pri neologismoj. Kritike ekzamenite, la sinteno de Zamenhof rilate al tiu punkto, estas tre klara: li tute ne estis kontraŭa al la enkonduko de novaj vortoj en nian lingvon. Kvankam li zorge avertis kontraŭ perforta evoluigo de Esperanto kaj maloportuna trorapidigo de ĝia vortriĉeco («ne tro multe, ne tro krude per unu fojo») — li neniam rifuzis al si novan vorton, kiam

la tradukota ideo ĝin postulis, aŭ eĉ simple invitis. Ĉiu el liaj verkoj, de *Hamleto* ĝis la *Fabeloj de Andersen* alportis novan stokon da neologismoj; tiel, ke en 1908 P. Boulet povis publikigi libron kun la titolo «*Du mil novaj vortoj ĉerpitaj el la verkaro de Dro Zamenhof*». Du mil, vi bone legis, du mil neologismoj preter la Universala Vortaro! Kaj ĉe la dua eldono, kiu okazis ses monatojn poste, Boulet kalkulis jam 2126 novajn vortojn. Kaj la afero daŭris. De tiu dato ĝis nun, oni povas proksimume taksu je du mil aliaj la neologismojn uzitajn de nia majstro. Ili plejparte eniris en la 4 Oficialajn Aldonojn de la Akademio, sed ne ĉiuj. Sufiĉas, ke oni malfermu la Biblion por trovi vortojn, kiel «kultivi, fuli, kolumbo, perversa, sedimento, sistro» ktp. kiuj mankas al la *Zamenhof-Radikaro* de Wüster. Foliante, dum tiuj ĉi ferioj, la ĵus aperintan trian volumon de la *Andersen-Fabeloj*, mi notis ĉirkaŭ 21 neologismojn, el kiuj kelkaj forestas eĉ de la *Plena Vortaro*: «marsejlezo (12), angoro (25) kvitit (28), ŝrumpi (35), aŭreolo (48), farbo (46), patriarko (48), genero (49), tino (51), drato (54, 85), aŭtenta (55), strebi (60, 117), kompakta (68), konfirmacio (90), be! (97), paraŝuto (112), klaŭno (119), transponi (120), ŝminko (125), driado (133), maskerado (148)» — mi ne kalkulis «toasto» (126), kiu ŝajnas esti stranga preseraro anstataŭ la Fundamenta «tosto». Oni devas krome atenti, ke mi ne notis ĉiujn vortojn, kiuj eniris en la trian kaj kvaran Oficialajn Aldonojn, kaj kiuj estis tamen veraj neologismoj je la dato, kiam tiu verko tradukiĝadis, en 1916—17. Oni povas do prave aserti, ke Zamenhof mem estis la plej granda neologisto en nia lingvo kaj ke li enkondukis novajn vortojn ne nur pro kruda neceso, sed ankaŭ pro oportuna mallongigo (kp.: *kalva* = senhara) aŭ pro aparta efekto (*susuri* apud *flustri*, *kultivi* apud *kulturi*).

Nu, tiu tre klara sintenado, tiu sistema taktiko de Zamenhof estas simple ignorata — aŭ eble nesciata — de estintaj kaj nunaj kelkaj konservativuloj. En *Lingva Kritiko* mi antaŭnelonge legis, de konata verkisto, tiun strangan frazon: «En tiuj (t. e. de Zamenhof kaj Kabe) verkoj, la lingvo estas vere vivanta. Kial? Car la verkistoj aŭ tradukantoj uzas vortojn, kiuj estas plene vivaj *pro ĉiama uzado*». Laŭ la supraj citoj oni povas juĝi, kiel malmulte tiu opinio taŭgas pri Zamenhof. Aliflanke, en flugfolio, malavare dissendita de L. K. ano al ĉiuj siaj kolegoj, okaze de la projekto por la 5a Oficiala Aldono, la subskribinto, pli malpli volonte akceptinte 75 kaj rifuzinte, pro fakeco, 25 el la proponitaj radikoj, aldonas: «Restas el tiel longa listo 118 vortoj facile anstataŭeblaj aŭ per alia radiko el nia nuna trezoro, aŭ per kunmetita vorto trovita aŭ trovota. Ili estas la rezulto de *nura malpacienco*, de *troa ekzakteco*, de *infana vortfabrikemo*, kaj mi intence ilin ne tradukas por al neniu altrudi mian opinion. (Sekvas la listo). Ne aŭskultu tiujn, kiuj krias, ke ili nepre bezonas «nuancojn». La serĉemo de nuancoj plejofte estas *nura malebleco precizigi ideon*... Ĉu ne ŝajnas al vi la supra listo kvazaŭ *fremdlingva* teksto pli aŭ malpli facile tradukebla en nian lingvon? Pripensu ĉu nia Majstro, ĉu Kabe ne estus povinta verki majstrajlon malgraŭ malpermeso uzi tiujn «nuancojn»? Ĉu oni ne kredas, ke temas pri tabelo da fenomenaj vortmonstroj, neniam uzitaj de iom inteligenta homo? Nu, el tiu timiga listo de 118 vortoj, 59 estas uzitaj

La francilo

— Valentin Katajev —

Iom da dimanĉa promeno en la urba parko — jen la plej brila okazo por rigardi ĝisfunde en la animon de iu.

Paŝka Kokuŝkin komencis sian dimanĉan promenon vespere je la sesa ĉe la »Puraj Lagoj.« Antaŭ ĉio li vizitis la malfermitan pavilonon de l' »Moselprom« kaj trinkis botelon da biero. Ĉi tio jam sufiĉe karakterizas lian veran vivpercepton kaj moderecon.

Poste li aĉetis ĉe vendistino litron da bakitaj sunflorsemoj kaj sen troa rapidemo li trapaŝadis la ĉefpromenejon. Dumvoje lin alparolis ciganino.

— Belega sinjorido, permesu, ke mi diru vian estonton el via manplato, la puran veron vi ekscios, mi diros, je kiu vi sopiras, mi diros, kio premas vian koron, mi diros ĉion, mi nenion kaŝos sub vualo kaj por tiu ĉi ĝojo vi donos nur dek kopekojn al la maljuna ciganino. Se mi diros al vi la estonton, ĉio estos bona, sed se mi ne diros, vi pripentos.

Paŝka pripensis la aferon kaj diris:

— La aŭgurado estas sensencaĵo kaj superstiĉo, tamen, prenu, jen la mono, profetu, sed ne mensogu!

La ciganino metis la moneron en sian multkoloran kitelon kaj montris siajn nigrajn dentojn.

— Agrabla renkonto vin atendas, belega sinjorido, per la renkonto vian koron atingos ĉagreno, maljunulo baros vian vojon, sed ne timu, belega sinjorido, timu nur la tranĉilon, per la tranĉilo vin minacas granda malagrablaĵo. Ne timu la amikojn — la malamikojn timu, la verda papago portos feliĉon en vian vivon. Ekiru tute gaje vian vojon!

La ciganino rektigis sian maldiketan korpon kaj majeste forpiedumis, gratante la teron per la brunaj plandoj.

— Amuze mensogas la inaĉo, — diris Paŝka kaj palpebrumis, poste laŭte ekridis kaj daŭrigis sian vojon.

Dumvoje li traĝuis laŭvice ĉiujn ĝojojn, kiujn la vivo por li rezervis: unue li mezuris sian pezon per danca-balanca pesilo — ĝi montris kvar pundojn kaj dekkvin funtojn; post iom da tempo li elprovis sian fortan kaj, kun tremantaj de fortostreĉo genuoj, li tiris la vibrantan monstrilon ĝis la signo »forta«; poste li iom ankoraŭ promenadis tien-reen, kaj priesploris siajn nervojn per elektro: en la manojn li prenis po unu kuprostangeto kaj en liaj kubutoj tiel pikpikis kaj torporis, kvazaŭ formikoj rampadus en ĝi, liaj artikoj pleniĝis per sodakvo, liaj manplatoj glu-

iĝis al la kuprostangetoj — sed ankaŭ la nervoj pruviĝis fortaj.

Fine, antaŭ kuliso, kiu estis pendigita sur arbo kaj figuris la Kremlo el Moskvo, rigardatan de sur la ŝtonponto, li sidigis sur seĝo, krucmetis la piedojn, faris mornan vizagon kaj tiel fotografigis sin. Post dek minutoj Paŝka ricevis la bildon ankoraŭ malsekan kaj esploradis ĝin longe, kun granda plezuro; la kvadratumita ĉapo, la konata nazo, la apaĉa ĉemizo kun malfermita kolo, la jako, ĉio ĉi estis tute bona, ĉio plaĉis al li: li kvazaŭ malfacile povis kredi, ke ĝi estas vere li mem kaj krome eĉ tiel mirinde bela.

— Ne malbona, — li diris, bele, ordeme kunrulis la gluigeman bildeton en malgrandan volvaĵon kaj iris al la boatponto.

Por elĉerpi ĉiun eblon de la dimanĉaj plezuroj, li nur devis ankoraŭ kunpreni kaj boatumigi la promenadantajn knabinojn. Sed iel li tamen iris plu kaj haltis ĉe konata budo. Ĉe la malfermegitaj pordoj premiĝis granda homamaso. Metalan tinton oni povis aŭdi kaj laŭtan ridon.

— Kio okazas ĉi tie — demandis Paŝka pigmekreskan ruĝgardianon, kiu gapadis ĉe la enirejo.

— Oni jetas ringojn: finta afero. Kiu trafas, gajnas samovaron.

Paŝka scivole ekrigardis super la kapoj de l' homoj en la budon hele iluminitan per lampoj. La tuta dorsa muro estis tegita per ruĝa ŝtofo. En tri vicoj, unu super la alia, staris tranĉiloj, enbatitaj en stablojn. Inter la tranĉiloj kuŝis allogaj gajnaĵoj. Sur la plej suba breto: skatoloj, dolĉaĵoj, sukerpanoj, sur la meza: vekhorloĝoj, kuiraj vazoj, ĉapoj, kaj sur la plej supra, jam preskaŭ sub la tegmento en la duonlumo, speciale tentaj objektoj: du balaĵkoj, samovaro el falsa arĝento, flavaj ŝuoj, itala harmoniko, kukola murhorloĝo kaj gramofono. La ringon oni devis ĵeti sur iun tranĉilon — kaj la gajninto ricevis la apudan objekton. Sed trafi la tranĉilon per la ringo estis preskaŭ neeble: la tranĉiloj estis fleksigemaj kaj la ringoj elastaj. Tre interesa ludo.

Paŝka laboris per la kubutoj kaj sukcesis penetri en la budon. Maljuna oĉjo, kun arĝentkadrax okulvitroj sur la nazo, vendadis la ringojn malantaŭ stando, kvardek por dudekkvin kopekoj.

Ekscitita bubo, kun hirtaj haroj, ĵetadis kun sovaĝa rikano la lastajn kvin ringojn. Lia jako flagris,

provojn pri la envicigado de Zamenhof en tiun aŭ alian partion, tute ne konsiderante, kia efektive li estis. Hontigu nin la bela, tro malmulte konata iniciato de niaj japanaj samideanoj, kreintaj la »Studejon de Zamenhofa gramatiko«, el kiuj venis al ni jam tiel valoraj studoj. Estas tempo por sciencé esplori la karakteron, la ideojn kaj la verkojn de nia Majstro, ne provante altrudi al li niajn hodiaŭajn antaŭjuĝojn. La rezultato eble ne ĉiam plaĉos al ĉiu. Sed Zamenhof estas sufiĉe granda, por ne timi la kritikan, objektivan ekzamenon pri liaj pensado kaj verkaro: li meritas pli, ol blindan adoron de idolanoj aŭ fanatikuloj, li meritas, kaj certe ricevos la kleran admiron kaj amon de ĉiuj prudentaj homoj.

Librovendo ĵabela:
Ne legendo! AELA!

de Zamenhof mem (absolvi, aĝioto, amatoro, anatemo, angoro, aplombo, arkeo, aŭreolo, aŭroro, bankiero, blago, blanketo, blufi, bufro, devii, distribui, drasta, drato, dreni, ekrano, flakono, generi, graki, grego, grunti, imputi, kabineto, kaprioli, kartelo, kaskado, kirurgo, klaŭmo, koĉero, kokri, kulmini, magistrato, minus, negacio, orta, perversa, plus, promocii, psiko, renomo, sino, slango, slipo, staplo, strebi, strikta, susuri, suvereno, ŝrumpi, tajdo, taŭzi, torturo, trajno, treti, tribo) kaj »de Kabe (persvadi, surfaco)! Tiel, ke por pli ol la duono, la troa elzakteco, la infana vortfabrikeco, la malebleco precizigi ideon estas rektaj batoj sur la vangoj de Zamenhof kaj Kabe. Jen okazo por ripeti kun nia konservativulo, ke »la plibono estas la malamiko de l' bono«, kaj eĉ aldiri, ke, kiu volas tro pruvi, nenion pruvas.

Nu, estas tempo por rifuzi tiujn neobjektivajn

Amkanto

— K. Kalocsay —

Andante

Miklós Tŕegze-Gerber

re - sus - cil' - mon - do mi for - ge - sus, an - mar - mi - e - la
dro - nus an - ĝe - ta vo - ĉo so - nus kun vor - toj dol - ce
kan - taj je - li - ĉon a - non - con - taj al kor - me lan ko - li - a ho
ka - ra mi a! - Kaj ka - ra mi a!

2. Kaj kisoj! Trink' Edena!...
Min nokte sonĝo bona
Per dolĉa tromp' enlulas,
Ke lip' sur lipo brulas.
Nokt' benas, tag' min mokas,
Mi tage vane vokas
Vin kun dolor' pasia,
Ho kara mia!

la ferringoj saltis el inter liaj krudaj fingroj, frapigis al la tranĉiloj kaj falis tintante sur la tolon sternitan sub la stabloj. La gapantoj ridis. La vizaĝo de l' fraŭlito ruĝigis. La tranĉiloj, tuŝitaj per la ringoj, tremante zumis kaj kliniĝadis en ĉiam pli grandaj rondo.

— Fi, al la diablo ĉi tiujn tranĉilojn kaj ringojn, — ekkriis fine la bubo. — Preskaŭ du rublojn mi forĵetadis vane, se mi estus gajninta almenaŭ sukerpanon!

Kaj ĝenite li malaperis en la tumulto.

— La pasintan dimanĉon iu gajnis ĉi tie paron da botoj — diris fraŭlo en flikita pantalono, — kaj tiu forringadis por ili dek rublojn.

— Ĉu vi permesas, ĉu vi permesas, — diris Paŝka kaj laboris sin al la stando, — min interesas, kiel iras la afero.

La maljunulo donis al li ringojn.

— Do, — interesiĝis Paŝka detaleme — se oni trafas la suban tranĉilon, ĉu oni gajnas sukerpanon?

— Povas gajni, — respondis la maljunulo kun indiferenta voĉo.

— Kaj iom pli alte vekhorloĝon?

La maljunulo kapjesis.

— Intere. Hu! Kaj por la samovaro verŝajne oni devas celi tute sub la tegmenton?

— Antaŭe gajnu nur sukerpanon, poste vi povas grimpi pli supren, — ekparolis iu senpacience el la amaso, — ĵetu!

Paŝka metis la fotografajon sur la standon, disŝovis per siaj kubutoj la kunpremiĝintan ĉirkaŭ li publikon, apogis sin, celis, sed subite ekstremis lia mano, la ringo saltis el inter liaj fingroj, falis flanken kaj forruliĝis.

Paŝka rigidigis. Flanke, apud la stabloj, sur seĝo sidis juna, fiereta knabinjo, kun manoj bele kunkroĉitaj en la sino, tiel tre bela, ke Paŝka preskaŭ blindiĝis sin rigardegante. La knabino rapide levigis, prenis la ringon kaj etendis ĝin al Paŝka, ne alrigardante lin kaj subite facile, ŝtele ŝi ekridetis, nur buŝangule, — kaj Paŝka perdiĝis!

— Nu, kio al vi, ek, forĝajnu el la alto la samovaron, — ekkriis la scivoluloj post lia dorso.

Paŝka rekonsciigis kaj komencis ĵetadi unu post la alia la ringojn, nenion vidante ĉirkaŭ si, nur la mallevitajn palpebrojn kaj la buŝeton de la knabino, la buŝeton kiu havis meze fendeton, kiel la ĉerizo.

Kiam li jam ĵetis ĉiujn kvardek ringojn, la knabino silente kolektis kaj metis ilin senvorte sur la standon. Sed nun ŝi ne ridetis, nur levis siajn grizajn okulojn al Paŝka, reordigis iun el siaj blondaj bukloj, kiu antaŭensaltis el post ŝia orelo. Paŝka denove pagis la dudek kvin kopekojn. La ringoj mallerte flugadis, unu post la alia. La publiko ridaĉis kaj premiĝis post lian dorson. La tranĉiloj zumis kvazaŭ abeloj. La maljunulo indiferente turnadis sian kurbigitan fingron en sia nazotruo.

Paŝka, post kiam li forĵetadis tutan rublon, ne trafinte eĉ per unu ringo, reiris rezigne el la amaso en la parkon kaj promenis plu sub la tilioj, sur la bordo de la lago, kium la sunsubiro pentris rozkolora. Facila nebulo ekkovris la lagon. Freŝa venteto ĉirkaŭŝvebadis lian kapon. En la molkolora akvo kvazaŭ flamkolonoj respeguliĝis la lampoj de kinejo. Kelkaj junaj knabinoj, kun mallongaj haroj kaj verdaj kaj bluj kombiloj, kuris preter Paŝka, puŝis unu la alian kaj ridaĉe turniĝis post lin, — jen vere bela knabo! Sed Paŝka nur iris plu, tute ne zorgante pri ili kaj reveme zumkantis:

— Ciganino profetis, ciganino profetis, ciganino profetis, — el mia manplato.

Cinokte definitive kaj neŝangeble li enamiĝis.

Dum tuta monato ĉiudimanĉe li aperis en la budo, por ĵetadi ringojn. La duonon de lia salajro li elĵetadis tiel kvazaŭ tra la fenestro. Li eĉ ne prenis sian ferion — malfruis sian vicon. Li tute frenezigiĝis. La knabino ankaŭ nun, kiel antaŭe, donadis la ringojn kun mallevitaj okuloj. Nur malofte ŝi ridetis kvazaŭ antaŭ sin. Kaj kelkfoje, kiam subite ŝi ekvidis Paŝkan en la amaso, ŝin trakuris profunda ruĝo, tiel ke eĉ siaj ŝultroj, tra la diafana batisto, brilegis kvazaŭ abrikoto. Sed kiel ajn penadis Paŝka, neniel li sukcesis eĉ por momento paroli kun la knabino inter kvar okuloj; jen la homoj malhelpis ilin, jen la maljunulo atentis ilin per siaj malicaj okuloj super la okulvitroj kaj turnadis la kurbigitan fingron en siaj nazotruoj, kvazaŭ minace al Paŝka: »for la manon de tiu knabino, ŝi ne estas por vi, estos bone, se vi forportos vin!« Sed foje

Al moderna knabo

— Ludoviko Totsche —

Silentu nun la rim' en mia verso, ĉar
heroo ĝia estas vi, moderna knab',
kaj ĉi juvelon pompan ja rigardus vi
senvalorajo, kiu elmodiĝis jam.
Ja, pli konvenas al praktika via mens'
ĉi nude simplaj versoj; la magia bril'
de l' tintaj gemoj ja malvarma lasus vin,
vin plaĉas klara, fakta kaj rapida vort'.
Por mini rarajn belojn kun tenaca vol'
ne estas tempo plu. Ĉi tion lasas vi
al kelk stranguloj lastaj, kiuj kun sindon'
oferas pie sur altaro de la Bel'...

Sed mi rakontu jam pri nia renkontiĝ'.

En kino sidis mi. Dimanĉa posttagmez'.
La nervojn, lacajn de l' semajna sklav-penad,
humiligitajn en avido al liber',
mi volis ripozigi nun per la muzik'
kaj kura bildo-vic'. La filmo temis pri
banala historio, sed la ĉefhero'
mem estis la Maŝina Moŝt', en formoj mil
ĝi rolis: kiel flugmaŝino, zepelin',
milita ŝipo, aŭto, bombo kaj la hom',
pelita ĝia sklav', maŝiniĝinta mem.

Mi en brakseĝa sin' enuis lace nun,
pli orfe sola en ĉi granda homamas'
ĝuanta kune, ol en la ermita sol'
de mia ĉambro. Jen ekspiron de admir'
mi aŭdas. Mi rigardas al apuda seĝ'
kaj vidas vin kun brusto kliniĝinta al
la lumobildo; tremis lipoj pro l' ekscit'
kaj fajris viaj vangoj de l' plezurekstaz'.
L' impulsigemo febra de la juna aĝ'
vin igis sekvi, sekvi kun atento-streĉ'
la heroagojn kaj miraklojn de l' Teknik'.
Mi vin observis ŝtele. Tra la duonlum'
albrilis min de viaj haroj juna hel';
muskoloj viaj fortaj, via kreska korp'

Paŝka tamen sukcesis momenton paroli kun ŝi. Estis
malmultaj gastoj, kaj la maljunulo ĝuste kuris mal-
antaŭ la budon, por forpeli per sia kanbastono la strat-
bubojn.

— Humilan saluton, — ekparolis Paŝka kaj haltis
lia korobato. — Kio estas via nomo?

— Ludmilla. — flustris la knabino rapide kaj
arde. — Mi bone konas vin, vi foje forgesis ĉi tie vian
portreton sur la breto kaj mi ĝin konservis. Mi rute
enamigiĝis al ĝi, — tiel bela ĝi estas.

La knabino metis sian fingron en la kolumon kaj
montris sur sia ŝlosilosto la angulon de la ĉifita bildeto.
Poste ŝi levis la okulojn kaj ruĝiĝis, kvazaŭ rozo. —
Kaj ĉu via nomo?

— Paŝka. Ĉu vi ne volas veni kun mi en la
»Colosseum«-teatron? Estas tre interesa programo:
»La miliarda sinjoro, dua parto.«

— Ne eble. Patro gardas.

— Tamen.

— Dio gardu! Se mi iros, li eĉ ne enlasos min
plu en sian domon. Kaj panjo estas eĉ pli malbona.
Ŝi havas vendobudon sur la foirplaco Suharov, sub sia
propra nomo. Terure, kiel severaj estas la gepatroj,
simple terure. Ni loĝas en la Sretenka, strato Prosvirin,

ŝveligis viajn knabajn vestojn ĝis kreviĝ'.
Mi meditadis. Mi vin vidis en imag'
dum futbal-ludo, dum vetkuro, en naĝej',
triumfe ĉiam, venke ĉiam per la fort'
de via jun'. Kaj kaptis min rezignaci'
envia, ĉar mi ne plu estas homoplant'
floranta, juna, freŝ-elasta, kia vi...
Pardonu! Sed sur sojlo de la viro-aĝ'
tiom doloras la renkonto al la jun'!
Jen antaŭ mi enuaj taskoj de la viv'
seniluzia, klaras jam la vido, sed
la celo mankas... Ho, ja kiom volus mi
kun vi vetkuri, naĝi, sporti, kion dum
knabaĝo mi neglektis, ĉar delogis min
bibliotekoj. Sed mi scias ja, ke nur
ĉi kelk minutojn daŭras nia vojkruĉiĝ':
la griza ritmo de la taga viv-muel'
denove kaptos min, kaj kun rezigna firm'
sur mia voj' soleca mi min trenos plu.

Vi, same, iros sur aparta via voj':
kiel la subjuginto de Aleksandri'
bruligis librojn por akiri lokon al
kulturo nova, tiel vi, sur la ruin'
de l' civilizo nuna, per muskola brak',
praktika mens konstruos mondon novan kaj
realan. Ho, barbara mondo estos ĝi!
tiu ĉi mondo de l' racio kaj maŝin',
de la malvarma kaj kalkula intelek',
el kiu ekzilita estos senta riĉ'
kaj poezio. Kompatinda ŝtala mond'
malvarme brila, via, ho moderna knab'!

Kaj se vi sentos la malplenon en anim',
eble vi fosos foje el sub ruinaĵ'
trezorojn forgesitajn, kaj memoros vi
pri kelk stranguloj lastaj, kiuj kun sindon'
oferis pie sur altaro de la Bel'
kaj ŝtele kaŝis la trezorojn de l' kultur'
por renaskiĝo el utero de l' Futur'!

ne malproksime de ĉi tie, numero du, en la korto,
maldekstre de la pordego.

— Kiel do estu, Ludmilnjo?

— Ja povas esti nur tiel. Rapide, ĵetu la ringon,
patro venas.

Apenaŭ rekomencis Paŝka la ĵetadon de la ringoj,
kiam la patro aperis kun la kanbastono. Li alrigardis
la knabinon kun malicaĵ okuloj. Paŝka do, nenion
aranĝinte, denove foriris.

Kaj kiam la sekvan dimanĉon li denove tie aperis,
li vidis — ke la budo estas ennaĵlita. Sur la firmotab-
ulo estis legebla: »Praktika amerika ringoĵeto: 40
pecoj 25 kop.« Sur la pordotabulo paradiso en blua
kampo verda papago kun rozkolora vosto, kun ringo
en la beko. Kaj antaŭ la papago vento frostotremigas
la flavajn tilifoliojn, ĝi frapadas ĉiufanke la budon,
la florbedoj estas senordaj, nenie iu en la parko; estas
aŭtuno.

Tiam Paŝka rememoris la vortojn de la ciganino:
maljunulo baras vian vojon... per tranĉilo minacas
vin granda malagrablo... la verda papago portos
feliĉon en vian vivon, — kaj tia kolero kaj indigno
lin kaptis kontraŭ la stulta ciganino, ke tion oni eĉ ne
povas priskribi. Paŝka pugne minacis la papagon kaj

POEMOJ

— Grindel Falkonbrilj —

Somernokto

Cie — langvora mut',
Cie — streĉita silent',
Gibas levil' ĉe put',
Blovas parfuma vent'.

Nokto ĉirkaŭas nin,
Nokto similas al vin',
Ĝi ebrigas vin,
Mia nuna reĝin'.

La ĉirkaŭpreno kun fort'
Tia, ke krakas ostar',
Ŝajnas ke drona mort'
Estas en febra mar'.

Baldaŭ leviĝos sun',
Tiam disiĝos ni,
Sed rememoro pri l' kun'
Restos ĉiama vizi'.

La rememoro pri l' kun'
En blanka nokt' de somer':
Vi longe ĝin kredos ver'...
Baldaŭ leviĝos sun'.

Printempigis

(kanteto)

Printempigis, plivarmigis.
Gaje bilas sun'.
Neg' degele eklarmigis,
Ĝi ma'sanas nun.

Jes, alvenis por vi, vintro,
La plej certa mort',
Al mi tedis vidi vin tro
Ofte en la kort'.

Iru for, veter' malbona,
Kune kun malgaj',
Nin de l' vivo monotona
Savu luma Maj'!

iris plu en la vento frapanta lin el ĉiu direkto, sur la dezertaj, kalvaj vojoj. Li atingis al Sretenka, kaj venis en la straton Prosvirin. Estis malsevena, vitroluma aŭtuna tago. Kontraŭflanke de malgranda, malriĉa preĝejo staris vere, kun la cifero 2. la domo pentrita verde kaj blanke. Paŝka paŝis en la korton kaj sin turnis maldekstren. Sed plu li ne sciis, kien la vojo.

Tiam en la korto eknaris gurdo, sur la gurdo sidis verda papago kun rozkolora vosto kaj rigardis al Paŝka per la rondaj, impertinentaj okuloj el sub dikaj palpebroj. Subite malfermiĝis eta fenestro en la dua etaĝo. El la fenestro etendiĝis delikata mano kaj moneron volvititan en paperon faligis sur la trotuaron de l' korto. Tra la duobla fenestro, super vatkuseno kun torditaj sur ĝi lanbuletoj, inter kurtenoj kaj fikuso, Paŝka ekrimarkis Ludmillan. La knabino amike rigardis suben al li, premis sian freŝan vizaĝon al la fenestro, donis signojn per siaj fingretoj, disetendis siajn brakojn, balancis la kapon, mangestadis, — entute oni ne povis kompreni, kion ŝi volas. Ankaŭ Paŝka komencis klarigadi per la mano: »Venu malsupren, fajfu pri la gemaljunuloj, mi ne povas vivi sen vi«, sed tiam aperis en la fenestro grasa, liphara, turktuka virino, ŝi frapfermis la fenestron kaj minacis fingre al Paŝka.

Paŝka sin trenis hejmen, sin turmentadis du tutajn semajnojn, vagadis ĉiumokte en la strato Prosvirin, kie li timigadis la irantojn kvazaŭ ŝtelisto, tute malgrasiĝis, kaj la trian dimanĉon li purigis per malnova teo siajn jakon kaj pantalonon, maŝis rozkoloran kravaton, ciris la ŝuojn kaj penetris rekte en la faŭkon de l' drako — proponi siajn koron kaj manon. Ludmilnjo mem malfermis por li la pordon, — ŝi ekmiris, kaptis mane al sia koro, sed Paŝka iris preter ŝi en la ĉambron, kie la gepatroj trinkis laktan teon post preĝado, kaj ekparolis:

— Bonan apetiton. Pardonu min, paĉjo kaj pardonu min, panjo, sed sen Ludmilnjo mi ne povas vivi. Kiam mi ŝin ekvidis, mi tuj freneziĝis. Faru, kion vi volas, jen mi staras antaŭ vi: diplomita serruristo, sesa salajroklaso, plus aparta aldono, de 1917. sindikatano, mi ne trinkas brandon, mi nenien pagas alimentojn, tiel ke ankaŭ ĉiflanke ĉio estas en ordo.

— Por vi mi ne estas paĉjo, — ekkriis la maljunulo kun voĉo senindulga, — kaj mia edzino por vi ne estas panjo! Ĉu vi komprenis?

— Kaj kia nova modo estas aŭskulti gurdon sub la fenestro, en la korto kaj enpuŝigi en loĝejon de nekonataj homoj, — daŭrigis kolere la virino, — rezervu tion nur por vi mem! Nu jen! Ni bezonas tute alispecajn svatantojn. Nu jen, sesa salajroklaso! Pasintjare domservisto svatis pri Ludmilla el la strato Mjastnickaja kaj ni ne donis ŝin eĉ al li. Mi petas vin, civitano, forlasu nian loĝejon! Kaj la knabino — sub seruro — ankaŭ bone! Ni ne bezonas serruriston, precipe ne el la sindikato.

— Sole per praktika amerika ringojeto mi gajnas mil rublojn en kontanta mono dum unu sezono, — aldonis la patro grumbleme, — kaj mi havas gajnobjektojn por kvarcent rubloj. Ludmilnjo bezonas tian edzon, kiu havas kapitalon, por pligrandigi la negocon. Per unu vorto: ĝis la revido!

— Do vi ne donas al mi la knabinon? — demandis Paŝka malesperiginte.

— Ne, — kvikis la maljunulo.

— Nu bone, — diris Paŝka minace, — se temas pri kapitalo por negocgrandigo, ni fermu la kunsidon. Vi ankoraŭ memoros pri mi, mi ankoraŭ bele vin ar-

angos. Adiaŭ, Ludmilnjo, ne malesperu, atendu je mi! Sed Ludmilnjo sidis ekstere en la koridoro sur kesteto kaj tordadis la manojn.

Paŝka kunmordis la dentojn, iris al la placo Suharov kaj aĉetis akran kuirejtranĉilon. Hejmenveninte li ŝlosfermis la pordon. Alvenis la vintro kaj ĝi ankaŭ pasis. De sur la dorso de la »Puraj Lagoj« oni forportis la glacion per sledoj. Paŝka laŭorde iris labori, eĉ unu horon line pasigis vane, sed ĉiumokte li estis hejme, enfermiĝinte, kaj la najbaroj aŭdis el lia ĉambro mallaŭtan tintadon. Eble li lernis ludi gitaron. Neniu sciis.

La rivero degelis. La suno komencis varmigi, la arboj ekburgonis kaj verdiĝis, al la »Puraj Lagoj« oni ekspedis la boatojn per ŝarĝveturiloj. La fotografistoj en la aleo elpendigis Kremlon kaj la lunluman nokton. Kaj vespere la parko vigliĝis per promenantoj.

Ĉiudimanĉe Paŝka sisteme eliris al la »Puraj Lagoj« por rigardi, ĉu oni jam malfermis la budon. Ĝi ankoraŭ estis fermita. La verda papago kun roz-

kolora vosto sidis en la tempestobatita, paliĝinta blua kampo kaj tenis ringon en la beko, inter la freŝajj tilibranĉoj. Paŝka estis malgrasa kaj malgaja. Kaj iun belan dimanĉon li denove elvenis — kaj la budo estis malfermi'a. Ĉe la enirejo tumultis gapantoj. Interne brulis la lampoj kun blindiga brilo. Aŭdiĝis sono de metala tinto kaj rido.

Paŝka disprenis ŝultre la homamason kaj ĝentile paŝis al la stando. Liaj okuloj ŝtaldure fulmis super la fortaj vangostoj. Ludmilla ĝuste prenadis la ringojn. Kiam Paŝka enpaŝis, ĉiu sango kuris el la vizaĝo de l' knabino, ŝi fariĝis preskaŭ diafane pala, ŝiaj okuloj mallumiĝis kaj ŝia buŝo ankoraŭ pli similis ĉerizon. La patro ordigis la okulvitrojn kaj iom paŝis malantaŭen.

— Permesu, kamaradoj, — diris Paŝka moroze, ŝultre li flankenŝovis ĵetantan knabon kaj eĉ ne alrigardante la maljunulon, li signis al la knabino. Ŝi preskaŭ senlive transdonis al li la ringojn. Paŝka tuŝis ŝiajn malvarmajn fingrojn kaj ĵetis trirublan moneron sur la tablon.

— Vi devos preni ŝovveturilon, kamarado, por ekspedi la samovaron, — oni mokridis post lia dorso.

Paŝka ne rigardis dorsen, prenis la unuan ringon kaj neglekte ĝin ĵetis. La tranĉilo eĉ ne ekprenis. Aŭdiĝis mallonga eksonoro. La ringo sentuŝe flugis sur la tranĉilon. La maljunulo impete boris per la fingro sian nazotrupon kaj suspekteme lokis antaŭ lin skatolon da sukerpano. Paŝka flankenŝovis la skatolon kaj nur neglekte ĵetis la duan ringon. Ĝuste tiel facile kaj certe falis la ringo sur la duan tranĉilon. Kaj eĉ tempon ne havis la maljunulo por piedo al la stablo, malantaŭ lia dorso Paŝka jam ĵetis tri aliajn ringojn horizontale, unu post la alia, kiuj facile, preskaŭ sensone falis sur tri aliajn tranĉilojn. La amaso mutiĝis.

La maljunulo turnis sian ŝrumpintan vizaĝon al Paŝka kaj rapide palpebrumis. Malluma ŝvitoguto kvazaŭ cimo rampis suben sur lia frunto. Liaj pantalon-tuboj iom ŝoviĝis malsupren kaj ĉifiĝis kvazaŭ malplenaj sakoj. Paŝka staris elegante, kun krucmetitaj piedoj, sin apogante al la pupitro kaj tintadis per manplato da ringoj.

— Do kiel ni estos pri Ludmilnjo, paĉjeto, — li demandis mallaŭte kaj indiferekte flankenrigardis.

— Mi ŝin ne donas, — respondis la patro kun maldika voĉo.

— Vi ne donas, — diris Paŝka dormeme, — nu bone. He, bubo, kuru al la Prokovskipordego por ĉaro, vi ricevos la samovaron. Stariĝu iom flanken, paĉjeto.

La vizaĝo de Paŝka fariĝis fere dura. Sur lia frunto la vejnoj ŝvelis branĉe. Facile li levis la streĉitan brakon. Fulmoj zigzagis el inter liaj fingroj. La tranĉiloj muĝis, surprizite de la ringoj falantaj sur ilin. La amaso kriegis, hurlis, inundis. La homoj el ĉiuj direktoj kuregis al la budo. Paŝka preskaŭ eĉ ne rigardis al la celo. Liaj okuloj kvazaŭ senpense turniĝadis. Estis terure. Eĉ unu ringo ne falis sur la tolon. Li finis dum kvin minutoj. Per la maniko li traviŝis la frunton. La amaso disiĝis en du partojn. Antaŭ la budo staris ĉaro.

— Surmetu ilin, — diris Paŝka.

— Kion vi volas fari? — ekparolis la maljunulo kun granda sufero kaj piedadis tien-reen inter la stabloj.

— Nenion, ĉion mi ĵetos en la lagon kaj fino.

— Jes, sed kiel, civitano — veadis la maljunulo kvazaŭ maljuna virino. — nur en varo ja perdiĝis kvardek ĉervoncoj, ne kalkulinte la entreprenon mem.

— Mi fajfas pri tio! Kaj eĉ se cent. La varoj estas miaj. Mi ne ŝtelis ilin, mi gajnis honeste. Jen staras la atestantoj. Dum la tuta vintro mi ekzercis, mi eĉ ne dormis. Mi faros, kion mi volas. Se mi volas, — mi portos hejmen ĉion, — se mi ne volas, — mi ĵetos ĉion en la akvon.

— Prave, — ekkriis la amaso entuziasme. — Kaj eĉ sub ĵuro! Sed, aŭskultu, la gramofonon ne forĵetu! Kelkaj volontuloj rapide ŝarĝis la ĉaron, plena.

— Ni iru, — diris Paŝka.

— Kien... kien... — klukadis la maljunulo. — Mi eĉ ne kuraĝas hejmeniri post tiu ĉi bela negoco. Ĉu vi volas vere dronigi ĉion?

— Jes, — respondis Paŝka, — ni iru al la boatodomo.

— Ĉu vi ne timas la ĉielon?

— Ĉielo — restaĵo de obskuraj tempoj, paĉjo, ĝuste kiel la verda papago. La esenco — jen!

Kaj li streĉis sian muskolan brakon.

Ĉirkaŭata de vivanta ringo de svarmantaj homoj la ĉaro forskuiĝadis kaj haltis nur ĉe la boatodomo. Paŝka prenis de plej supre la ŝuojn kaj ĵetis ilin en la akvon. La homamaso ŝtoniĝis.

— Haltu, — ekkriis la maljunulo kun fremda voĉo kaj kuregis al la ĉaro, — nenion ĵeti en la akvon!

Tiam Paŝka metis la manon sur la supron de la fatraso kaj diris mallaŭte kaj kun mallevitaj okuloj:

— Lastokaze mi parolas malkaŝe kun vi, paĉjo. Ĉi tiuj homoj estu miaj atestantoj. Donu al mi vian filinon kaj reprenu viajn aĵojn. Tiam mi evitos de nun centpaŝe vian budon — sed alimaniere mi blovos en la aeron laŭvorte la tutan entreprenon, paĉjo. Sen Ludmilnjo mi ne povas vivi.

— Do prenu ŝin! — ekkriis la maljunulo kaj signis per la mano. — Fi! — Iru kun ŝi!

— Ludmilnjo, — ekparolis Paŝka: li paŝis de la ĉaro kaj paliĝis.

La knabino staris apud li kaj embarasite kaŝis sian vizaĝon inter la brakojn. Pro la honto eĉ ŝiaj manoj fariĝis rozkoloraj.

— La kunsido finiĝis, kamaradoj, vi povas disiri, — diris Paŝka kaj tiel singarde li ĉirkaŭprenis la junan knabinon, kvazaŭ ŝi estus el porcelano.

En tiu ĉi horo la parko estis plena de siringodoro. Ĉie estis siringodoro, — en la haroj de l' promenantoj kaj en la akvo de l' lago. Super la tilioj, alte staris la luno sur la malhelviola firmamento, akre, kvazaŭ tranĉilo. Kaj ŝutiĝis ĝia juneca lumo, respeguliĝis en la akvo, disfluis en grandaj kaj malgrandaj ringoj, kiuj estis kvazaŭ vivantaj, oraj, fianĉaj ringoj.

El la rusa: *Sarmato*.

AFORISMOJ

— Bone pendigite estas pli bone ol malbone edziĝinte. Shakespeare.

— La agoj de la homoj pruvas al ni, ke la leĝo de l' virto ne estas ilia interna principo... La virto estas ĝenerale aprobata, ne ĉar ĝi estas ennaskita, sed ĉar ĝi estas utila. John Locke.

— Mangajoj estas bonaj nur por malsatulo, vino por sanulo, medikamento por malsanulo, pelto por la vintro, virinoj por la junularo. Ili do estas nur relative bonaj. Nur mono estas la bona absoluta: ĉar ĝi kontentigas ne nur unu bezonon konkretan, sed la bezonon ĝenerale, abstrakte. Schopenhauer.

(Walter Lippmann)

P O E M O J

— Hendrik Adamson —

Diogeno

Moderna mi Diogeno, —
mi propran loĝas barelon,
vi, homoj, flanken! sen ĝeno
ĉe l' sun' mi varmigu oreton.

Forpaŝu, Makedoniano,
ne baru sunbrilojn orajn,
superas en ili la bano
triumfojn viajn glorajn.

Eĉ sole mian lanternon
mi kredas ja pli valora,
ĉar montras ĝi vian internon,
kun via mizero plora.

Por kio viaj purpuroj
kaj multekostaj ŝ'onoj,
vi estis kaj estos stultuloj,
vi estis kaj estos friponoj.

Amasoj da homaj kranioj —
rikolto de falĉo batala,
jen spuroj de glormanio,
por landoj kaj homoj fatala.

Sed mi ne bezonas gloron,
nek flatojn de vanta kortego,
en koro mi sentas doloron
de kruda hommortigo.

Kaj mi ne bezonas oron,
nek ĉiuajn trezorojn de l' mondo,
sed sangan mi ploras ploron
pri homaj maljust' kaj senhonto.

Gril'

Gril', gril', vi gajamuza gril',
kun dolĉa tril'
dum nokt-trankvil',
kaj hel' kaj bel': de sur ĉiel'
bril' de s'elmil'.

Tili', lili' kaj papili'
raviĝas de la idili'
de bril', de tril'
de gril'.

Gril', gril', vi gajamuza gril',
kun farsa tril',
jen fajro-bril'
kaj ŝveba fumspiral' en val',
kiel korktiril'.

Tili', lili' kaj papili'
raviĝas de la idili'
de bril', de tril'
de gril'.

Gril', gril', vi gajamuza gril',
kun ĉarma tril';
jen varma bril'
de gaj' trankvila en okul'
de noktvagul'.

Tili', lili' kaj papili'
raviĝas de la idili'
de bril', de tril'
de gril'.

Aŭtuntamburoj

Plu ne jodlas najtingal'
en ĉi val',
flavas luno kvazaŭ gal';
folifal'.

Kirle, kirle, kirle, kirle ilin vento tordas,
hurle, hurle, hurle, hurle, kiel hund' rabia mordas.

Nur kriaĉas noktvagul' —
strig-ulul'
kaj iraaĉas kvazaŭ mul'
ebriul'.

Stumble, stumble, stumble, stumble, kun la naz' en kot',
grumble, grumble, grumble, grumble li disŝmiras ĝin
per frot'.

Flugas vento kvazaŭ vel'
en ventpel',
jen raketo de ĉiel' —
falas stel'.

Grince, grince, grince, grince prujnon ŝutas frost',
pinĉe, pinĉe, pinĉe, pinĉe premas ĝis ekkrakas ost'.

Jam koaglas la medol',
col' post' col',
sed finiĝas la petol'
de l' fivol':

fuge, fuge, fuge, fuge nokto kuras for,
ruĝe, ruĝe, ruĝe, ruĝe disfloriĝas la aŭror'.

Desperkanto

Forpasis kure la juneco,
temp' tro revema sen prudent' —
kaj es'ingiĝis purpurmeĉo
en malproksima orient'.

Min tro lacigis voj' ŝtonoza,
sur dorso sidas zorgo-ĝib',
mi iras, iras, senripoza
vagulo, sub sortbata vip'.

Min jam, post lastaj lacaj paŝoj,
atendas tombo: frosta lit',
kaj ĉirkaŭ kruco el kreskaĵoj
de l' ter' volviĝos sole vit'.

LA NOKTO

— Š. BERLINSKI —

Sur granda, senhoma kaj libera spaco rivelis sin antaŭ mi la Nokto. Si estis kontenta, plena rideto brilis sur ŝia vizaĝo, senĉese ornamente ŝian helbluan vualon per arĝentaj tulaj rubandoj, kiujn ŝi sternis tie kaj ĉi tie. Kiam mi ekrigardis ŝiajn multajn okulojn, kiuj gajknabine palpebrumis, okulumis, ŝi komprenis mian rideton kaj turnis sin al mi:

— Karulo mia, ĉu vi fakte min rigardas petolulino, celanta sole al ludo? Mi ne neas, ke mi foje ŝatas ekkaresi junan koron, vekti tie kordon. Kial ne? Se mi, ekzemple, renkontas paron ie sub arbo, en angulo, mi donacas al ili rideton, kunplektas ilin per mia blanka ŝalo. Nu, jes, la okuloj — vi tion ja mem bone komprenas — ŝatas sin respuguli. Flameto en ili montriĝas. Ne domaĝas, infanetoj, varma sango, ĝuu ĝin elkore. La Tago verdire ŝatas admoni kontraŭ tio, konsideras ĝin kiel mian teruran pekon, sed pri la Tago kaj liaj belaj aferoj valorus paroli aparte. Aŭdu. Ofte mi renkontas homojn sur solecaj vojoj, kiel vin ĉi tie. Ili venas kun tremetantaj koroj, kun soifaj rigardoj kaj ekzaltigas per mia beleco, admiras mian rideton, okulumon, ĉarmon, la diversajn rubandojn, per kiuj mi ornamas min. Tiam mi ludas iom kun ili, per mia molvelura spiro flustras al ili rakonton pri ensorĉita lando, kie reĝidino kun parfumita korpo premas sin sopire al sia blanka silka litajo. Ŝiaj okuloj estas lacaj de sopirado, ŝiaj lipoj sekigis de soifo al kisoj. Do ŝi prenas harpon kaj elsorĉas el ĝi la tonojn de ŝia koro, kaj tiuj tonoj plenaj de amo kaj sopiro vokas, vokas ĉiujn, kiuj kapablas admiri. Tiam mi superĵetas per miaj lumradioj la vojon kondukantan al ŝi. Kaj fariĝas sankta ĝojo, ili kreas laŭdkantojn, gloras ŝiajn okulojn, la orajn buklojn, kaj sian eternan sopiradon al ŝi. Kaj ĉu vi pensas, ke per ĉi tio finiĝas mia laboro? Mi estas patrino, patrino por ĉiuj malfeliĉuloj! La homo ja bedaŭrinde tiom multe suferas, havas tiel malican malamikon, kiu batas la homon en loko plej dolora, kaj mi devas liajn vundojn kuraci.

Si subite kovris ŝian vizaĝon per facila nubeto. Ŝi ŝajnis malĝojigi, ŝia spiro ekstremis kaj malgaje ŝi daŭrigis:

— Certe vi scias, kiu estas la malamiko? La Tago. Vidu, ankaŭ mi ŝatas foje ekbrili, ja ne ĉiam mi estas tiel nigre-melankolia, kiel oni ŝatas min pentri. Sed kie vi trovos ĉe mi tiun aŭdacan arogantecon, kiun havas la Tago? Brili? Bone. Sed ĉu oni vere devas malkaŝi ies vundon, montri al li lian tutan malriĉecon kaj malfeliĉon en plej fascina lumo? Ĉu vi pensas, ke mi renkontas malmulte da homoj kun ŝiritaj vestoj, flikitaj ŝuoj, kaj ankaŭ la koro estas ŝirita kaj nigra kiel mia vizaĝo en la fino de l' monato? Do ĉu mi nepre devas sterni min en la nefermitajn lokojn, ke laŭeble plej videbla fariĝu la korpo? Mi ne volas fanfaroni antaŭ vi. Mia kutimo estas tute alia. Mi prefere sendas rideton en malluman koron. Kvankam per mia iomo de lumo mi devas ofte lumigi ĉambreton, kie lumo foje ekmankas. Vere, la homoj ĝenas sin iom. La malriĉecon mi tamen ne nudigos antaŭ iliaj okuloj. Tion mi ne kapablas. Do mi vualas la rompitaĵajn litetojn, la ĉifonojn kuŝantajn sur ili kaj endormigas la vivantojn: Sss, silento. — Ne unu fojon mi devas montri la vojon al migranto. Ofte mi tuj alkuras al li kaj haltigas lin por ripozi. Mi ne

forĝegas, se mi renkontas malliberejon, ensendi al la malliberulo lumstrion sur la muron: malfeliĉa li kuŝas tutan vesperon kaj rigardas la densan mallumon, li ludu do iom per la lumstrio. — Kaj kiom da koroj trompitaĵ mi renkontas, prefere ne demandu, karulo. — Jen en lito kuŝas knabino, ne povas ekdormi: neniĝita amo, malfeliĉigita. Ĉirkaŭe estas mallumo kaj al ŝi ŝajnas, ke eterne tiel estos. Ja la homoj ĉion ŝatas kompari kun mi. Do ŝi pensas: la vivo estas malluma kiel la nokto. Subite mi ne plu povas elporti tiujn silentajn suferojn, la dentgrincadon, kaj mi proksimiĝas al la fenestro kaj enrigardas. Mia rigardo jam falas tie ien sur muron aŭ sur la liton, enŝteliĝas en ŝian koron, dispelas iom la nubajn pensojn, kuracas, promesas ion kaj mi plenumas la promeson. Mi tuj kuras al la junulo de la malfeliĉulino kaj ne lasas lin dormi, rabas lian trankvilecon. »Ne estas kiel vi pensas! — mi krias — vi rompis junan koron! ĝi doloras, degelas, mi ne lasos vin ekdormi en mia sino, mi faros ĉion, kion mi nur povos. Nigrajn langojn mi disblovos antaŭ vi, plej terurajn figurojn, kiujn mi nur posedas, mi prezentos en via imago. En ĉiama teruro vi vivos. Iru, iru tien, kie koro sangas pro vi!« Kaj li iras. Sed okazas, ke mi renkontas homon malnoblan sen animo, kaj tiam mi restas senhelpa. Kaj ĉu vi pensas, ke mi ne konas la diversajn malbonfamojn, kiujn oni malgraŭ tio klaĉas pri mi? Nome, ke mi estas sorĉistino, ke mi ŝatas kaŝi sub mian nigran vualon la plej malbelajn aferojn. Unuavide ĝi eble tiel aspektas, sed tio estas miopeco. Vere — en unu nokto oni pekas, kaj en la alia — oni ŝiras la harojn de la kapo, grincigas la dentojn. Oni eĉ hontus antaŭ la Tago, sin ĵeti, kiel antaŭ mi, kun peko en animo sur la litajon kaj elplori la maldoleon el la koro. Por homoj kun nepura konscienco mi estas terura, timiga: mi staras en ĉiuj anguloj kun insidaj mallumaj okuloj kaj volas tiujn homojn kaperi en mian abismon. — Sed oni devas senti mian delikatan tremon, mian malhelan silkspinitan estajon, por aŭdi ĉiujn mallaŭtajn voĉojn de l' koro, kiujn mi kapablas akcepti. Jen ploras animo: ĝi ne volas disiĝi de la ĉielo, ĝi sopiras ĝian lumon kaj senĉese suprenrigardas. Sed la tero volas ĝin posedi, entute posedi, kaj ĝi batas ĝin, por ke ĝi malsuprenlasu la okulojn kaj vidu, kiel li sur ĝi tretas kaj vivas. Tiam la animo ekpendas inter tero kaj ĉielo, kun erarvaganta rigardo, kaj li ploras, ploradas ne dum unu nokto, nek dum du — ĉiam. Alia animo sopiras. Nekonataj mondoj, belaj, sorĉitaj rivelas sin al ĝi, kaj ĝi serĉas vojon al ili, kaj ne trovas. Do ĝi degelas de sopiro en silenta nokto, Tria animo dum tuta tago estas batata, mokata, ofendata. Do ĝi atendas min, malbenas la tagon kaj kuras hejmen, kiel batita hundo, por kapti iom da ripozo en mi. Kaj la Tago? Kion li faras kun tiu tuta malfeliĉa mondo, kiu plorvundas mian kapon? Li ridas, cinike-impertinente li mokas pri ili, kaj filudas kun kelkaj elektitaj, sataj, kontentaj, liaj »homaj« homoj. Mi vidas, ke vi mireme rigardas min: kiel mi scias pri tio, kio dumtage okazas? Por mi sufiĉas nur ekrigardi fulmrapide antaŭ ol mi foriras: tuj kiam li malfermas sian arogantan okuleton en Oriento, li la mondon ŝangas en inferon. Ĉiuj pordoj haste malfermiĝas kaj homoj ekŝutiĝas en la stratojn. Ĉevalojn oni elpelas el la staloj. Ĉiujn oni jungas en la pezan

jugon kaj super ĉiuj pendas la vipo de l' tago, kiu skurgas, pelas en senĉesa galopado. Kaj ili kuregas, ĉevaloj kaj pelantoj samtempe, kaj la bruoj de l' maŝinoj, marteloj, hakiloj, tranĉiloj kune kun la homa kriado fariĝas tiel grandaj, ke mi dankas Dion, ke mi jam forkuras. Sed tute alie aspektas ili, tiuj homoj, je mia alveno. Do mi jam povas imagi, kio dum la tago okazis. Plej bonan okazon por tio mi havas somere: la Tago estas granda, ĝi longiĝas kaj kunpremas min en etaĵon. Sed tio eĉ ne tuŝas min. Mi scias: la tempo venos kaj mi igos lin feti. Koleretiga nur estas tio, ke li — la Tago — pensas, ke lia regado daŭros sen fino. Jen mi jam malsuprenrigardas per unu okulo, per ambaŭ jen mi jam estas veninta kun mia pala vizaĝo, kaj lin tio eĉ ne ektuŝas: li brilas. Li ĵus komencas subiri en okcidento, ŝvite-lace kiel bandito post murdo. Dume mi ĵetas rigardon kaj vidas, kiel eĉ dum adiaŭdiro li alridetas siajn kelkajn satajn ornamitajn hometojn: sinjorinon kun brilantaj orel-

ringoj kaj kun ringetoj sur la fingroj, sinjoron kun dika ora ĉeno sur la nefermita veŝto. Kun kia flatemo li ridetas al ili, disbriligas kolorojn kiel en ĉielarko, ludas kun iliaj silkaj vestoj kaj lakŝuoj, kovras ilin per brilo kaj pompo. Kaj la aliajn, kiujn mi la unuaj vidas en la ĉambroj, li bone forpelis. Lacegaj ili revenas hejmen, ne povas movi la ŝultrojn. Iliaj okuloj estas estingitaj, la manoj pendas kiel pezaj traboj. Kaj se li ankaŭ al ili donacas rideton, ĝi estas nur mokrido: li malkaŝas ilian honton, la ŝiritajn vestojn, el kiuj la korpo elrampas, la ŝrumpintajn vangojn, sur kiuj lia ruĝa flamo aspektas kiel ĉe ftizulo, kies lastaj sangeroj ludas kun li.

— Nu, fartu bone. Mankas jam tempo. La koko signalis, ke mi jam devas prepari min por mia vojo. Juna vi estas ankoraŭ, mi multon ankoraŭ rakontos al vi...

La Nokto komencis malaperi.

Tradukis: I. Lejzerowicz.

MIA ANGULO

— JULIO BAGHY —

Karikaturoj

Solvintoj de la reorganizo

Li fariĝis esperantisto pro — eraro. Por ĝui la milfoje prikantitan ĉielon de Italujo, li decidis lerni la lingvon de Dante. En la Popoluniversitato diversaj lingvoj estis instruataj kaj li senpacience atendis la komencan de la kursoj. Pro malhelpo li iom malfrue venis al la unua horo. La instruado de la diversaj lingvoj jam komenciĝis en la multnombraj ĉambroj kaj, por aŭskulte trovi la ĝustan klason, li ŝtelis sin de pordo al pordo sur la longa koridoro. Fine, ĉe iu pordo trafiltriĝis la vortoj ofte ripetataj: sinjoro... sinjoro. Jen la itala ĉambro, li pensis, kaj, honte pro malfruiĝo, li senbrue, rapide paŝis en la ĉambron, eksidis ie sur lastavican benkon kaj modeste, sed entuziasme malfermis orelojn, koron al la »muzika« lingvo. Ĉe la fino de la unua horo li pagis la kotizon kaj dum la dua horo konsternite li konstatis sian eraron. Kion fari? La kotizo estas pagita, li ne povas ridindiĝi sin per rakonto kaj repostulo de la mono. Li faris ja tiel, kiel la iama dratisto de potoj; kiu aĉetis sapon anstataŭ fromaĝo. Tiu mangis la sapon; li do lernis la lingvon.

Mi ne scias, ĉu la sapmanĝado havis drastan efikon, sed mi scias, ke la lernado pro eraro renversis la tutan ekvilibron de lia vivo. Post semajnoj kun kursfina elokvento li faris paroladon al la instruisto kaj ĵuris je la memoro de la Majstro kaj je lia homaranismo, post unu monato li boksduelis kun sia plej intima amiko pro la »ideo«, en la oficejo ĝis raŭkiĝo li diskutis kun siaj kolegoj, forlasis sian fianĉinon, kiu kuraĝis nomi la lingvon »kirlomiksa idioma« kaj li fariĝis cellabulo de moko, ŝercoj. Post jaro la aspekto de lia loĝejo eĉ en liaj samcelanoj maturiaj penson: li ne estas normala. Duonmetra verda stelo ornamis la eksteran pordon de la loĝejo, en kies antaŭĉambro akceptis la vizitanton la — Bulonja Deklaracio, pentrita sur la muron. En la laborĉambro staris busto de Zamenhof, millibra biblioteko, Esperanta Vekhorloĝo, kaj sur la muroj pendis portretoj de pioniroj, literaturistoj. En la manĝoĉambro la gasto havis okazon enkuleriĝi la kafon per Zamenhof-a kulero, kaj se li tranoktis en la dormoĉambro, li povis mediti pri la »DEK DEVOJ DE BONA ESPERANTISTO«, kadrumita kaj pendigita kontraŭ la lito sur la muron.

Antaŭ ok jaroj li konstatis, ke la afero ne marŝas kontentige. La indiferento de la publiko, la hezitemo de la gesamideanoj, la konfuza organiza problemoj detruas

la fruktojn de la pioniroj. Pri solvo li longe cerbumadis, ĝis fine la vekiganta naturo dum iu sopirplena printempa nokto alportis la ideon, per kiu estas savebla kaj fortikiĝebla la movado de »nia kara lingvo«. Bonaj ekzemploj mankas kaj mankas la harmonia kunlaboro. Li decidis — edziĝi por realigi la teorion planon.

Ŝi lernis la lingvon — pro kompato. Konante ŝian mildan karakteron mi ne dubas pri tio. Iam ŝia fratino eklernis la lingvon, sed kiel multaj ankaŭ ŝi baldaŭ ĵetis la librojn en la angulon de la subtegmentejo kaj forlasis la sanktan aferon pro tiklaj lipharoj de junulo. Nia mildkora heroino sentis kompato al la kruele traktitaj libroj, al la perfide forlasita ideo kaj por reboniĝi la kulpon de sia fratino ŝi decidis lerni la lingvon. Esktazan entuziasmon ŝi ne havis; simple pro kompato al la lingvo kaj pro la familia honoro ŝi oferis sin.

Iun tagon en la esperantista rondo ŝi aŭdis de fraŭlino, ke pro fianĉiniĝo ŝi devas ĉesigi la korespondadon kun eksterlandanoj. La fianĉa prestiĝo postulas tion. Kion fari? Ŝi ja ne povas oferi ĉion por tiu ĉi movado, tamen ŝi bedaŭras nur unu el siaj korespondantoj, kiu... Nu, la mildkora heroino pro kompato petis de ŝi lian adreson. Pro kompato al la idealista korespondanto kaj por ne havi falsan ideon pri la nacia karaktero de sia popolo en la animo de eksterlandano. Tiamaniere la sorto renkontiĝis ŝin al li kaj poste pro kompato ŝi edziniĝis kun la bonvola viro kaj fine pro kompato al la malforta movado ŝi naskis tri fortajn infanojn en rapida sinselevo por realigi la planon de la edzo.

Mi povas aserti, ke Ludoviko, Lazaro kaj la blondhara Klara jam ĉarme kartonas nian lingvon kaj se ne erarigis min la simptomoj, baldaŭ Felikso aŭ Lidia ekzercos la finaĵojn de la substantivo kaj adjektivo »o-a! o-a!« en la verda kaj abunde stelumita vindaĵo kun la brodita surskribo: »La estonto estas nia«. La cellkonscia edzo kaj lia mildkora edzino faris al mi solenan promeson, ke post elĉerpiĝo de la bantonomoj de la Zamenhofa familio sekvos la nomoj de la literaturistoj. Pro cellkonscio kaj pro kompato al la graveco de la literaturo originala. De tiam mi konstante kalkulas pri la ŝanco, kioma povas esti mia nomo en la kronologia ordo?

Oni multe parolas pri la reorganizo, oni cerbumadas pri la plej ĝusta solvo. Mi memoris pri miaj 100%-e esperantistaj geamikoj kaj mi rekomendas sekvi ilian ekzemplon, sed — tuj!

Al kriza drako
Surpriza hako:
AELA!



FILMSTELOJ KAJ ESPERANTO

La demando, ĉu ekzistas filmsteloj parolantaj Esperanton, interesas nin Esperantistojn speciale. Tial ni volas pli ofte aperigi intervjuojn kun konataj filmsteloj, kiujn ni demandos, kion ili pensas pri Esperanto. Ĉu la famo, ke Anny

Ondra estas Esperantistino, estas vera, pri tio ni raportos en venonta numero.

Antaŭ kelka tempo mi renkontis filmstelon Betty Amann. Tiu ĉi aktorino havis tre interesan travivaĵon: ŝi mortis trifoje! En Aprilo de tiu ĉi jaro raportas Berlinaj gazetoj pri la morto de la filmaktorino Betty Amann, la tuta eksterlanda gazetaro transprenas tiun informon. Aperas grandaj nekrologoj kun portretoj de la ŝatata aktorino. Oni memoras bonege ŝiajn grandajn Ufa-film-ojn »Asfalt« kaj »La blankan diablon« (kun Mosjoukin), en kiuj ŝi ludis ĉefajn rolojn.

Mi renkontas ŝin nokte, apud la cirko Busch, en la brilego de la grandaj reflektoroj. Multaj ĵurnalistoj ĉirkaŭvarmas ŝin. Ŝi havas nun iom da tempo, ĉar nun estas kelkaj scenoj, en kiuj s-ro George (konata el la filmo »Berlin-Alexanderplatz«) ludas sola.

Interparolante ni devas atenti, ĉar jen staras la mikrofono, malantaŭe la granda veturilo kun la sonaparatoj. Kiam venas signalo dufoja, oni devas eksilenti. Sole la voĉoj de la aktoroj estas aŭdeblaj en la nokto. Nur post refoja signalo de aŭtomobila sireno oni scias, ke oni rajtas denove paroli.

»Kion vi pensas, kiajn sentojn oni havas, kiam oni sidas vivserene en Londono kaj trinkas sian matenan kafon kaj subite ekvidas en la matenaj ĵurnaloj sian portreton kun nekrologo? Oni mortis subite kaj tamen povas konstati kun ĝojo, kiel fama kaj ŝatata aktorino oni estis!« rakontas Betty Amann ridante.

»Sed kiel estas eble, ke oni enpresis nekrologojn?« mi demandas.

»Mi mem ne scias precize, kiel la famo pri mia morto naskiĝis,« ŝi respondas, »vojaĝante kun angla film-ekspedicio mi efektive malsaniĝis grave je malario en Tripolis. Iu ĵurnalista franca aŭ germana, kiu ne scipovis bone la anglan lingvon, miskomprenis mian malsanon kaj raportis, ke mi mortis —«

»Do lingva miskompreno, kiel interese!« mi diras.

»Kaj dume mi filmis tre multe en Anglujo ĉe la British International. La anglan lingvon mi parolas perfekte, kaj estas terure, vi eble rimarkis tion, mi nun havas ioman anglan akcenton en mia germana lingvo.«

»Do vi tute ne estis en Berlino?«

»Mi alvenis de Londono antaŭ kelkaj tagoj, por ludi en ĉi tiea filmo »Schleppzug M 17« (Trenŝipo M 17). Kaj tre interese, la Berlinaj gazetoj dubas pri la identeco de mia persono. Unu ĵurnalo asertas, ke mi estas falsa Betty Amann, knabino de Hamburgo, tre simila al la mortinta aktorino, kaj ludas rolon de duulino —«

»Do vi mortis la duan fojon,« mi konstatas.

Betty Amann metas la fingron sur la buŝon. Jus la sireno eksonis, la lampoj brilegas, hundego bojas — en la lumkonuso baraktas du viroj — nokta gardisto kun krimulo — ili krias raŭke.

»Mi mortigos vin, hundaĉo... mi mortigos vin, hundaĉo!« krias la unu, dum la alia nur stertoras.

En la paŭzo mi aludas Esperanton.



Betty Amann kun L. M.

»Kio ĝi estas? Mi neniam aŭdis pri ĝi —« sonas la respondo de la ridetantaj belaj lipoj.

Mi estas iom konsternita. Ĉu kulpigi la Esperantistojn pro tio, ke ekzistas ankoraŭ hodiaŭ multegaj, eĉ kleraj homoj, starantaj meze en la vivo, kiuj neniam aŭdis pri ni, neniam, neniam...? Mi klarigas pri Esperanto rapide, kion mi opinias sciinda. La bela aktorino ne povas kaŝi sian grandegan miron.

»Kaj ĉu ĝi estas facila lingvo?« ŝi demandas.

»Tre. Mi diros al vi frazon en Esperanto, kiun vi tuj komprenos: Blonda knabo trinkas varman kafon!« mi respondas kun amuzo.

Ŝi ekridas: »Nun vi volas moki min! Montru al mi tuj Esperantan gazeton!«

Mi montras al ŝi numeron de »Literatura Mondo«, la afero komencas interesi ŝin pli kaj pli. Ankaŭ aliaj ĵurnalistoj ekinteresiĝas. Mi denove sentas min en la rolo de propagandisto. Al kiom da miloj mi jam parolis pri Esperanto! Sed eĉ inter la ĵurnalistoj estas kelkaj, kies eraran kaj fuŝan opinionon mi devas ĝustigi. En tiu ĉi laboro helpas min mia kolego-amiko D-ro Lohmeyer, kiu fariĝis eminenta pioniro de nia afero en la filmmedio.

La ĉarma Betty nun devas eklabori. Kaj kia stranga hazardo: hodiaŭ ŝi mortos efektive! Heinrich George, la ŝipisto, kiu posedas grandan trenŝipon, feliĉe vivis kun sia familio. Sed al la granda urbo, en kiun li veturis, venis la hela logantino, ĵetis siajn erotikajn retojn kaj detruis lian familian harmonion. Kaj pro tio ŝi devas morti. La ŝipisto ĵetas ŝin en la nigran akvaron de la Spree-rivero. Tiel deziras la fantazi-plena aŭtoro de la filmo.

Do, hodiaŭ ŝi mortos la trian fojon, sed Betty Amann ridetas: »Proverbo diras, ke tiu kiun oni mortskribas, vivas duoble longe.«

»Tion ankaŭ mi esperas,« mi respondas, »ĉar vi ja devas ankoraŭ lerni Esperanton, kiam ni faros la unuan grandan filmon kun Esperantlingvaj dialogoj!...«

En tiu momento eksirenis. Betty Amann paŝis en la lumkonuson. Iu staris antaŭ la aparato kun nigra tabulo, sur kiu estis skribita per kredo la numero de la sceno. Li diris laŭte kaj klare: »Sceno cent kvardek ok kaj naŭ...«

Mia intervjuo kun Betty Amann estis finita.

F.

En la kriza epoko
Jen deviza Alvoko
Ribela:

Librojn legi necesas,
Eldonegi ne ĉesas
AELA!

KION NI FARIS EN PARIZO?

Cu ni fondos Esperantan Filmkompanion?

Dum la Internacia Esperanto-Kongreso okazis en Parizo la unua Fakkunsido de Filmistoj. Venis ĉirkaŭ 80 personoj, inter ili diversaj de la filmo. La kunveno malfermis la iniciatinto s-ro Jean Forge, kiu jam de jaroj laboras en la Berlina filmbrando kiel dramaturgo. Li proponis elekti gvidanton de la kunveno kaj sekretario. Gvidanto restis s-ro Forge, sekretario estis la franca filmaktoro Marc Darnault. La gvidanto en pli longa parolado skizis la situacion en jena maniero:

Depost kiam venis la sonanta kaj parolanta filmo, la demando pri la internacia helplingvo fariĝis tre aktuala, pli aktuala ol en la Radio-brando. La fakaj gazetoj tre multe citis Esperanton en la komenco, kiam la ekparolo de la filmo evidentigis la grandajn malfacilojn, kiujn la multlingveco de la mondo signifas al tia internacia entrepreno, kia estas la filmproduktado. Estas bedaŭrinde ke ne trovis sin en tiu momento energiaj homoj, kiuj tiam komencus la produktadon de Esperantaj sonfilmoj. Kaj estas bedaŭrinde ke la Esperantistoj ankoraŭ nun ne prientenas tiun urĝan kaj plej aktualan demandon, kiu okupas ĉiutage la cerbojn de la filmfabrikantoj de la tuta mondo.

La filmo estas la plej grava kaj moderna rimedo por esprimi homan penson kaj senton de nacio al nacio. Esperanto estas la lingvo de la filmo. La ĝisnunaj klopodoj sur tiu ĉi kampo estas tute senrezultaj. Kial? Ĉar la filmistoj, la potencaj filmfirmoj nenion scias pri nia ekzisto. Tial ni proponu al la Kongreso, ke ĝi per manifesta publika skribaĵo atentigu ĉiujn filmfabrikantojn, fakajn organizaĵojn kaj gazetojn en la tuta mondo pri la filmplingvo Esperanto.



Lilian Harvey.

Post tio la parolanto laŭlegas rezolucion transdonatan por aprobo en la ferma kunsido al la Kongreso. La parolado, kiu enhavis ĉion, kio rilatis la ĝisnunajn klopodojn sur la kampo de la filmo, vekis grandan eĥon inter la aŭskultantoj.

S-ro Darnault en pli longa parolado alvokis ĉiujn Esperantistojn al aktiva kunlaboro kaj proponis la fondon de la unua internacia filmkompanio, kiu per la kapitalo de la Esperantistoj komencus produkti Esperantlingvajn filmojn.

En la vigla diskuto partoprenas tre multaj personoj, i. a. D-ro Fulda el Berlino. Li diras, ke laŭ lia opinio la projekto de Esperanta filmkompanio estas absolute realigebla. Fakuloj kompreneble devas esti. Li tre subtenas la ideon produkti mallongan filmon, kiu montrus la Cseh-metodon.

*Kalkuloj miras: Donaco!
Kalkuloj diras: Sagaco!
AELA!*


S-ro Forge diras, ke li havas en Berlino seriozan firmon, kiu tre interesiĝas pri Esperanto kaj kun financa helpo de la Esperantistoj estus preta fari apud la germana originalo ankaŭ Esperantlingvan varianton. Laŭ li estus rekomendinde kolekti kapitalon por akcia societo, kiu certe prosperus. Mankas nur la praktikaj fakuloj-Esperantistoj.

D-ro Fulda promesas kiel unua enmeti en tiun fondotan societon kapitalon de 10.000.— fr. frankoj. Brua aplaŭdo. Aliaj parolantoj promesas pli malpli altajn sumojn.

La kunveno devas esti fermata pro malfrua horo. Ĉiuj ĉeestantoj interkonsentas pri tio, ke s-ro Forge plu ellaboru la projekton de Esperanta filmkompanio. Eble en Kolonjo jam estos konkretaj proponoj.

M. D.

*Por etkvanta monsumeto
Pleniĝanta librobreto!
AELA!*





OBSERVO

JELUSIC: CEZARO.

Iu civilizo, popolo, jarcento estas fakte nenio alia ol difinoj, evoluantaj — spirale — supren. Kaj la homo, laŭ la filozofia kriterio, estas nur teoremo, glitanta la saman vojon.

La ĉefdifinoj, kiuj barakte luktas tra la lastaj du jarmiloj, povus enpreniĝi en du akraĵojn terminoj: individuo — kolektivo.

Plej kruela duelo inter individuo kaj kolektivo daŭras senĉese tra la homa historio, arangas impete konfliktojn en la politika, ekonomia kaj kultura arenoj. Ankaŭ la hodiaŭna sennombro de la ĉiaspecaj krizoj kaŭzas furiozajn interatakojn de tiuj du principoj. Dume la »homoj-unuopuloj« estas kondamnitaj: atendi kalkanside kun tremangoro la solvon, farotan de la historia ritmo...

Cu la spiritaĵoj de la apartaj generacioj respektigigas ankaŭ en iliaj aktualaj literaturoj? Ni tuj respondu — ignorante la profesoriajn difinojn — ke la literaturo estas ja nenio alia ol enketo pri la homo baraktanta certamomente en la propra medio.

Neniu do el ni miras, ke ankaŭ la konvulsioj de la hodiaŭna homamaso flambrele reflektigas — kvankam multvarie — en la nuntempa literaturo. Verserĉemaj genioj de l' artistoj abunde disprucigas galsaturitajn analizojn de l' nuna epoko, klopodante en la spirita ventokirilo trovi firman bazon por la luma baldaŭtempo.

Sed la arto denaskiĝe ŝatis tendencojn, kiuj, pristrabataj eflanke, ŝajnas plej paradoksaj. Ankaŭ hodiaŭ, kiam la kolektivismo, dank' al la moderna socia mondrigardo, triumfe jubilas sian venkon, en la literaturo ĵus disfloris branĉeto de la biografiaj romanoj. Plej sukaj floroj de la individualisma mondkoncepto en multkolora riĉo: de la facilrakonta biografio ĝis la plej pedanta historia kroniko.

Estas sendube multe da romantikeco en ĉi tiu revivigo de la kulto, adoranta la »individuojn-heroojn«. Kvankam sonorata banale, tamen ni diru, ke tio probable estas spiroraba rifuĝo el la griza, korĉifa ĉiutago en la mirlandon de la fantazio, nur intuicie percepteblan. Oni kvazaŭ sentas konsolon kaj inspiron ĉe la grandioze skulptitaj monumentoj de herooj, impone elstarantaj el mezo de la ordinaruloj...

La biografioj en la lasta jardeko impresas plimultiĝis, liverante ofte al siaj aŭtoroj belan honorarion. Jen, inter la germanoj Emil Ludwig pri siaj biografioj de Napoleono, Kristo, Bismarck, Vilhelmo II gajnis milionojn. Eĉ en Rusujo, kiu admire incensas al la kolektivismo, eliris tuta serio de la biografiaj romanoj. Iom paradokse...

En tiu inundo de la biografioj pri krurosveltaj amvendistinoj kaj pli-malpli miopaj ŝtatestoj, troviĝas multaj, kiujn tuj post eliro ekkovras rustopolvo de l' forgeso. Sed estas ankaŭ kelkaj, kiuj sin prezentas kiel perfektaj, profundsencaj artaĵoj, inspirantaj multajn legantojn.

Du verkoj, elfluantaj antaŭ nelonge el geniaj plumoj de André Maurois kaj Mirko Jelusiĉ, donis sensaciojn. De la unua: Disraeli, de la dua: Cezaro. Kvankam laŭ verkmaniero la verkoj akre diferencas, tamen iliaj ideobazoj estas tre parencaj.

La iama roma imperio estas pratipo de la individualismo. Poste kreigis, kvazaŭ herede, la brita imperio, tiu admirinda unikaĵo de la historio. Kaj interese ankaŭ ĝi fariĝis plej elstara bastiono de la individualismo. La du supre menciitaj verkoj konturante eble la plej grandajn ŝtatestojn de la du politike plenumitaj rasoj, estas atentabsorbaj dokumentoj pri la homa evoluo. Ili provas montri, kiom la homo kiel politikisto kaj ŝtatesto, pli vere: kiel politika kaj ŝtateca teoremoj, sukcesis progresi sin levi supren.

Kiam eliris »Cezaro«, la tutmonda kritiko, eĉ tiu — ofte iom petola — de Ameriko, tuj akklamis ĝin kiel unu el la plej sensaciaj »romano-biografioj«, iam ajn verkitaj. En sole du jaroj eliris dudek germanaj eldonoj kaj krome ĝi estis tradukata en multajn gravajn lingvojn de la mondo.

Jelusiĉ sukcesis verki grandiozan libron el malfacila kaj tempofora materialo. La libro estas mirige plastika, okazoturna kvazaŭ plej aventura filmo kaj krome tre ofte profunda kiel la abismaj paĝoj de Dostojevski. Plena de plej subtilaj »agordoj« la libro genie kreas la psikan memon de Cezaro, ŝajne unu el la plej rimarkindaj pilotoj de la homara sorto.

La titana figuro de Cezaro estis jam antaŭ jarcentoj vivblovita de l' »avona cigno«, de Shakespeare. Sed estas tre granda diferenco inter tiuj du figuroj. Shakespeare sonigante lastajn vivakordojn de Cezaro pentras lin per tre palaj, polvaj koloroj, reliefigante apud li la prometean personecon de Marko Bruto. Al tiu lasta, lia paletro donas plej vivajn tonojn, tutan riĉon de siaj plej belaj nuancoj, kiuj plene ombrovras Cezaron.

Strange, sub la peniko de Shakespeare Cezaro montriĝas korpa, ankaŭ morala kriplulo, taŭganta pli por komedio ol por tremiga tragedio. Tiu Cezaro suferas ne nur pro epilepsio (kion cetere kelkaj asertas kiel faktan), sed estas ankaŭ duonsurda, negre superŝtita, fanfaronema timemulo... Tia Cezaro, kompreneble, povas esti nur pulĉinele puŝata de la okazoj kaj neniel memkree aktiva! Kiu do miros, ke sian Cezaron Shakespeare mortponardas jam en tria akto estante satlaca por lin ŝnurtiri ĝis la kvina...!

Kaj vere la sento, kiun en ni vekas Cezaro de Shakespeare estas komponaĵo el kompatato kaj indigno. Ni ne povas kompreni, ke tia etmensulo supervenkis la tutan mondimperion, kroninte sian kapon per nevelkontaj laŭroj de l' gloro...

Jelusiĉ bildas Cezaron alie, pli fidele al la historio. Li ellaboris lian gigantan personecon, figurante neforgesebla la cezaran volpovon, el kiu abunde fontis dinamiko, propraplaĉe knedanta la historian ritmon. Ĉiĉage Cezaro estas nur ag-impulso, vol-apliko kaj nenia mediuo aŭ turbo, laŭvole turnata de la eksteraj cirkonstancoj. Cezaro de Jelusiĉ estas potenca aganto, eĉ pli — la majesta kreanto de la tuthoma historio! Kaj, dum ĉe Shakespeare la tragika pereado de Cezaro estas motivata per eksteraj konfliktoj de la monarĥisma koncepto kontraŭ la respublikanisma, aŭ pli ĝuste: de la tiraneco kontraŭ la libereco, ĉe Jelusiĉ tiu pereado estas natura konsekvenco de la spirita langvoriĝo, post kiam Cezaro, atinginte siajn idealojn, konvinkiĝis, ke ili estas nur himero. En la lastaj ĉapitroj en grandioza simfonio bruakordas la temo: vantaĵo de vantaĵoj...

Aparte oni devas substreki, ke Jelusiĉ majstre prezentis la antikvan medion de la roma imperio, la karakterizojn de la tiamaj gvidantoj-luktantoj, precipe de Sulo, Mario, Cicero, Kato, Kraso, Pompeo, Antonio, Cino, Bruto, Kleopatra k. t. p. Tuta galerio de la vivaj, nerve moviĝemaj tipoj, kiujn ambicioj puŝis al la plej subtilaj kaj rafinitaj intrigoj. Kaj super ili ĉiuj flugŝvebas la agla genio de Cezaro, implikante kaj distordante fadenojn de la tiamaj mondpolitikoj. Oni devas konfesi, ke Jelusiĉ suverenas la tutan epokon mirakolerte. Li ne uzas »vervain« sentencojn, kiujn ni en la lernejo bekmanĝis kiel altan spritecon: »Alea jacta est«, »Aut Caesar aut nihil« k. t. p. Tiaj banalaĵoj forestas, sed anstataŭ ili Jelusiĉ sciis doni pli senafektajn kaj impresajn parolturnojn...

Ĉiu verko estas realo plus intuicio. La realo en nia romano estas grandioza, sed verfidela. Kaj la intuicio estas ĝuste tio, kio donis al la romano la kvaliton de majstroverko. Estas interese, ke multaj kritikistoj asertas, ke ĉirilate la aŭtoro ne sukcesas kaŝi sian slavan animon. En la tuta personeco de Cezaro — laŭ ili — pulsas filozofio, alnaskita nur al slavo. Precipe montriĝas tiuj trajtoj ĉe la fino de la libro, kiam la ambicio de Cezaro

elsuferis plej akran krizon kaj lia spirita memo langvorigas. Eble ĝuste pro sia aparta, kvazaŭ tiu de Dostojevski, vivfilozofio, lia Cezaro estas alia: pli homa, pli natura kaj ĉefe pli giganta ol ĉe Shakespeare.

Kiam Cezaro estas ĉe l' apogeo de sia potenco, lia spirito en febra konvulsio jene filozofas:

... »La tutan vivon mi nur erarvadis, senĉese erarvadis. Dum la tuta vivo mi aspiris idealojn, sed atinginte mi ekkonis, ke ili estas falsaj... Por kio utilas miaj klopodoj, por kio mia senripoza agado, por kio tiu sentima cerbopeno, zorgoj kaj interpacigoj, kiuj antaŭtempe min maljunigis kaj elĉerpis?... Memoru, ho Antonio: donu al la homoj ĉion, kion vi havas, tranĉu viajn vejnojn kaj donacu al ili sangon de via koro, tamen vi ne ŝanĝos ilin eĉ plej eĉ! Meze de ĉio nova ili restos ĉiam la samaj. Ĉio vana! Ĉio vana!...«

Cu tiuj ĉi vortoj, flustrataj tradente, ne estas jam delirado de agonianto, antaŭ ol lin morttrafis la ponardo de Bruto...?

Kiam eliris la romano, naskiĝis tre interesa diskuto. La originalo estas verkita en la germana lingvo, ĉar la aŭtoro vivas en Vieno, sed samtempe li sin sentas kaj proklamas kroato. Cu la verko do apartenas al la germana aŭ kroata literaturo?

Estis donitaj interesaj argumentoj por ambaŭ vidpunktoj. Sed ĉu fakte tiom gravas la lingvo de la originalo? Cu D' Annunzio apartenas al la franca literaturo, ĉar li verkis ankaŭ france? Aŭ eble pli gravas aliaj kvalitoj, kiuj karakterizas la aŭtoron?!

Ivo Rotkvič.

FREDERIKO VAN EEDEN †.



Van Eeden, nederlanda aŭtoro de unua rango, el kies verkoj aperis tradukoj en Esperanto kaj en la germana, angla, franca, itala, sveda, dana, ĉeĥa kaj rusa lingvoj, sendube meritas nekrologon en Literatura Mondo. Estus neeble pritrakti en konciza artikolo la multflankajn laborojn de la aŭtoro, do mi devas min limigi je lia literatura kariero, post kiam mi estos doninta kelkajn detalojn el lia vivo.

Frederiko van Eeden naskiĝis la 3-an de aprilo 1860, kiel filo de florkulturisto en regiono apuda al Haarlem. Ĉi tiu urbo situas proksime al la dunorando de la Norda Maro, kaj evidente la duno-naturaj »pentraĵoj« el la ĉefa verko de Van Eeden, »La malgranda Johano«, estas la rememoroj de la eta Frederiko, kiu kun sia patro jam frue ekamis la naturan belecon ĉirkaŭ si. Verdire, lia patro ne amis la florkulturadon, sed lin allogis la pristudado de la plantoj. Kaj kiam la patro faris siajn botanikajn esplorskursojn, tre ofte lin akompanis la revema filo. Cetere la patro okupis sin verkante librojn pri botaniko kaj filozofio.

Intence mi donas ĉi tiujn detalojn el la vivo de la patro, ĉar en ili ni ekvidas bazon por la posta disvolvigo de la filo. Ke ankaŭ la mortinta aŭtoro origine estis filozofo, ja preskaŭ ĉiu scias; ke li ankaŭ amis la naturon... pri tio oni nur legu liajn verkojn.

Pri la junaĝo de Van Eeden mi povas esti konciza. Kiel ofte talentajn infanojn, liaj kamaradoj lin tre amis, sed tio ne tuŝis Frederikon supermezure. Lia filozofema patro kompreneble ne tre edukis lin en la religio, sed, ĉar lia patrino estis filino de protestanta pastro, la gepatroj lasis lin, laŭ la kutimo de tiuj tagoj, sekvi la katehizadon. Tamen, kiam Van Eeden atingis la aĝon por esti konfirmata (kio okazas en la nederlanda protestanta eklezio ĉirkaŭ la 20-a jaro), Frederiko rifuzis aliĝi al la nomita eklezio. Tio montras, ke lia religia edukado ne estis tre profunda, aŭ pli vere, ĝi estis iom libera.

En 1878 Van Eeden iris al Amsterdam por studi

en la tiea universitato la medicinon. Eble oni miras, ke la literaturisto studis natursciencojn, kaj ne beletristikon. Nu, tiun ĉi studon li ne tre ŝatis. »La laborado de kuracisto ne ĉiam estas altnivela«, li poste skribis. »Neniu studento finas la promenadon tra la hospitaloj kaj sekejoj, ne perdante iom el siaj plej bonaj kvalitoj. Li suferas procezon de stultigo, de bestigo, kio estas necesa por igi lin daŭrigi siajn laborojn, sed kio morale malpurigas lin.«

Malgraŭ ĉi tiu malamo, li finis sian studadon kaj en la aprilo de 1886 li promociiĝis doktoro medicina per disertacio »La artefarita nutrado dum tuberkulozo«.

En Parizo, kien li iris dum sia studado, li aŭskultis la prelegojn de Charcot pri hipnotismo kaj sugestio, kiuj tratis lin tiamaniere, ke li decidis, pli funde esplori tiun ĉi kampon. Tion li faris en Nancy sub gvidado de Liébault, kaj tie li ankaŭ fariĝis adepto de la psiko-terapio. Reveninte en Nederlando, li ankoraŭ unu jaron praktikis en malgranda urbo, Bussum, sed en 1888 li fondas kune kun sia kolego doktoro Van Renterghem, psiko-terapian klinikon en Amsterdam. Tie li restas 7 jarojn, sed pro malamo al la urba vivado, li reiras al Bussum kiel ordinara kuracisto.

Ĉirkaŭ 1900 Van Eeden komencas realigi siajn socialajn ideojn, provante, laŭ ekzemplo de Thoreau, la »enlandan koloniigon«, kio tute malprosperis.

Lia facile movata sentimento kaj lia maltrankvila animo pelis lin en multajn direktojn. Van Eeden ne povis sin limigi je certa tereno de la spirita vivo, nur malofte li restis fidela al fiksita vidpunkto, trovante post longa pripensado ĝian neteneblecon. Li ne rigardis la mondon ĉiam de la sama flanko, sed ofte translokis sin, kaj tiel, pasie konfesante, sed poste same malkonfesante, lia spirito fariĝis vagulo; tiel liaj samideanoj poste fariĝis liaj kontraŭuloj; ĝis kiam, al lia maltrankvila vagado de animo kaj spirito, al liaj sopirado kaj hezitado inter konfeso kaj malkonfeso, malfermis sian sinon la Sankta Katolika Eklezio, kie li povis forjeti ĉiujn konfliktojn de la mondo. Je la 22-a de februaro 1922 Van Eeden eniris la Katolikan Eklezion.


Al Van Eeden la poeteco estis etika kaj sociala funkcio, li malakceptis la »arton pro la arto«. Tia ankaŭ aperas en 1885 »La malgranda Johano«, kiu en fabela formo pritraktas la psike-filozofian disvolvigon de sentema knabo tre riĉfantazia kaj amanta la naturon, de junulo, kiu trovis sian vivcelon en la levado de »la homaro kun ĉiu ĝia«. Nur poste (1905/06) aperis la 2-a kaj 3-a volumoj de ĉi tiu verko.

Same ankaŭ liaj unuaj poemoj ne estas lirika elverŝo de l' koro. La poemo, kiu malfermas lian unuan poemokolekton: »Kelkaj Poemoj« (1898), estas »La Akvolilio«, kaj ties bildo: la blanka floro, kiu el la malluma lago-fundo kreskas al la lumo kaj tiam sendezire, blanka kaj kvieta, ripozas sur la akvospegulo, sendube estas simbola. La akvolilio fariĝis la simbolo de Van Eeden kaj li presigis ĝin vinjeto sur ĉiujn siajn verkojn. Multaj ili estas, liaj verkoj, kaj kvankam, precipe lian poezion, malklarigas la religiaj aŭ etikaj tendencoj, oni malgraŭ ĉio ĉi facile trovas fragmentojn de belega pureco, atestantaj pri lia tre granda spirita vasteco kaj donontaj al li lokon inter la plej grandaj poetoj el lia tempo.

Longtempe Van Eeden suferis korpan kadukiĝon, ĝis la morto, pri kiu li skribis tiel ofte, kiun li atendis jam delonge, liberigis lin de la teraj katenoj kaj Van Eeden endormiĝis (16. junio 1932).

Joh. Hartog.

LA HEJMENIRO DE CASANOVA. (Laŭ duonoficialaj sciigoj, oni nun preparas la hejmenporton de la teraj restaĵoj de Casanova el Ĉeĥoslovakio en Venezion.) Ĉi tiu titolo estas plagiato, el teatraĵo de la maljuna Arthur Schnitzler. Delikata, saĝa, ofte profunda estis tiu ĉi teatraĵo. En multaj direktoj ĝi redonis la reputacion al la multe kalumniita figuro de Casanova. Sed eĉ Schnitzler neniam pensis pri tio, ke Casanova, kiel nacia heroo, reiros hejmen en sian naskurbon. El la malgranda kampa urbo Dux.



Titolpaĝprojekto I.

Casanova venis ĉi tien en sia sesdeka jaro, kiel falinta »Don Juan« kaj kiel bibliotekisto de grafo Waldstein. La lastaj dek tri jaroj de lia vivo pasis en la soleco de la Duxa biblioteko. Casanova kiel bibliotekisto... En Dux mortis Casanova, atinginte sian sepdek-kvaran jaron kaj de tie ĉi nun oni volas triumfe hejmenporti liajn cindrojn. Kiel tiun de granda nacia mortinto. Dum ĵa Hispanujo ne retrovis la teran restaĵon de Don Juan Tenorio.

Mil kaj tri virinoj... Jen la nombro de la viktimoj de Don Juan, laŭ la tradicioj. Sed krom la preciza cifero de mil kaj tri ni havas nenian aŭtentikan noton pri tio, ĉu vere vivis Don Juan kaj tiu certa Sevila guberniestro, kun kiu skermis Don Juan sian faman duelon. Se Don Juan vivis kaj konkeris, li devis vivi en la dua duono de la XIV.-a centjaro. Proportio eĉ ne antaŭ longe. Sed la historiaj spuroj estas amorfaj kaj necertaj. Corneille kaj Molière, Goldoni kaj Mozart, Gluck kaj lordo Byron, Lenau, Zorilla, Heyse, kaj antaŭhieraŭ Shaw — jen mal-longa, fragmenta kolekto de nomoj, kiuj promociis scen- eja, eĉ ofte tragika heroo la figuron de Don Juan. Tre imponis tiuj certaj 1003 virinoj. Kvankam se ni dividus ĉi tiun ciferon per 30 jaroj, ni ne ricevas eĉ 3 por unu monato. Tri por monato? Ĉi tio povis esti bela rekordo tiam. Sed hodiaŭ? Hodiaŭ la tuto estas demando de iom da burĝa diligento, iom da burĝa bonhavo, iom da per- sisto. Se iu nepre celas superi rekordon sur tiu ĉi kampo.

Ĉetere ne nur pro tiuj certaj 1003 virinoj fariĝis Don Juan simbolo kaj legendo. Kaj ankaŭ Casanova, la heroo de kelkaj centoj da efemeraj am-aventuroj.

Domage fari la demandon: kiom estas vera, kiom ne vera el tiuj dekdu volumoj, en kiuj Giovanni Jacopo Casanova de Seingalt rakontas la historion de siaj amaj aventuroj. (Chevalier de Seingalt: en Konstantinoplo, Londono, Berlino, Parizo, Sanktpeterburgo, Madrido, Varsovio, — oni konis lin pleje laŭ tiu ĉi nomo. Ĉar sufiĉe multloke akiris vastan konatecan rondon tiu ĉi Venezia — ĉarlatano.) Li estis soldato, violonartisto, mirakla kur- acisto, akiris grandan riĉecon kiel loteri-direktoro, prez- entis sin kelkfoje kiel ĵonglisto, Frederiko la Granda volis lin elekti profesoro por la prusa soldata akademio, oni neniam kontestis lian verkistan talenton, ofte kaj ne en unu lando oni konsideris liajn politikajn konsilojn... Sekve li estis iu. Malgraŭ tuta lia nefidebleco, tuta lia ĉarlataneco, li estis iu. Sendepende de tio, ĉu li troigis la nombron de siaj am-aventuroj, aŭ ne. Kaj eĉ se li troigis (verŝajne multe, eĉ tre multe), almenaŭ en mod- esta tono li troigis siajn sukcesojn ĉe la virinoj. Tre


malofte li fanfaronis: jen kiel grandioza viro mi estas... Prefere li parolis pri tio: jen kiel malfortaj, pekemaj estas la virinoj. Aŭ almenaŭ tiu parto de la virinoj, kiu »servis« kavaliron Casanova.

Kaj verki li sciis. Vere kaj perfekte. Simple kaj karese. Kolore kaj interese. Verŝajne tre multloke men- sogas la memorskriboj. Tamen — ili estas profunde veraj. El kvin am-aventuroj eble nur unu travivis Casanova. Aŭ eĉ ne unu. Sed ĉiu ama aventuro entenas psikologian kaj fiziologian probablon. Eĉ trans la bravajo de la rakonta maniero. Sekve Casanova estis ne sole genia ĉar- latano. Antaŭ ol fermis lin Venetio en la plumbokamer- ojn, kaj post ol li saviĝis el la plumbokameroj. Sed krom la ĉarlatana genio li havis tute altkvalitan verkistan tal- enton. Sendepende de tio: kiu el liaj amaj aventuroj estas aŭtentika kaj kiu la ludo de l' fantazio. Eĉ, eble la eltrovitaj am-aventuroj estas — pli veraj, ol tiuj, kiuj efektive okazis.

Jen spiono, jen mirakla kuracisto. Jen skermomaj- stro, jen financa fakulo. Jen scienculo, jen violonartisto... Sufiĉe interesa estas la kariero de Casanova. Li ofte trompis, multe mensogis. Sed neniam li trompis, kiam li prenis plumon en la manon. Kaj tiam li trovis la plej grandajn verojn, kiam li kredis: ke nun li skribas la plej grandajn mensogojn.

K. B.

(X.) SUKCESO DE BONA TEATRAJO. Post la amerikaj scenejoj nun en Londona teatro oni prezentas kun granda sukceso la novan teatraĵon de Elmer Rice, kies titolo estas: *La maldekstra bordo*. Tiu ĉi delikata kaj interesa amerika verkisto ekparolas, oni povas diri, alivoe en ĉiu sia teatraĵo. Post la simbolisma tragikom- edio de la *Kalkulmaŝino*, la kruda realismo de la *Strata sceno*, la ekspresionismo de l' *Subtera tramo* kaj la kruela Newyorka mediodesegno de la *Advokato* nun li verkis tipan »intelektulan« teatraĵon. La maldekstra bordo, pri kiu temas en la teatraĵo, estas la maldekstra bordo de Parizo. En malgranda hotelo okazas la teatraĵo en Mont- parnasse-a kvartalo, la rolantoj estas amerikaj artistoj, intelektuloj kaj snoboj. Liaj spritaj dialogoj, kun mal- laŭta ironio, estas ofte tiaj, kvazaŭ la herooj de la ro- manoj de Aldous Huxley estus amerikanigintaj kaj babil- adus en Pariza hotelĉambro. La teatraĵo estas tipa kazo de tio, kiam la centprocente intelekta verkisto ribelas kontraŭ la intelektismo. Estas eble vivi ankaŭ ne en Parizo, — diras la verkisto — estas eble edukigi la infan-



Titolpaĝprojekto II.

ojn ankaŭ ne en psiĥoanalitika sanatorio, estas eble vivi ankaŭ simplan ĉiutagan vivon. Strange estas en la tuta afero nur, ke ankaŭ tia teatraĵo, konsistanta el nuraj subtilaj, facilaj meditoj kaj altnivelaj diskutoj, povis rikolti grandan sukceson en la teatroj de Ameriko kaj Britujo. La kaŭzo estas verŝajne ne nur tio, ke Rice brile konas la scenejon kaj scias esti amuza eĉ kiam li diras la plej altnivelajn aferojn. La ĝenerala okcident-eŭropa sukceso de tiu ĉi kaj de la similaj pensigaj intelektaj teatraĵoj povas esti klarigebla per tio, ke la publikon jam tedas la malkara kiĉo, aŭ almenaŭ ĝi ne serĉas ĝin en la teatro. Foje *André Gide* skribis, ke la kino la literaturon liberigas de la taskoj de la foira literaturo. Kaj efektive, kiu ŝatas la tro akve diluitajn amajn pseŭdoproblemojn kaj la sentimentalajn aŭ pikantajn okazajojn, tiu trovas ilin en la kino, kie oni estas multe pli kompetenta pri tiaj aferoj, ol sur la scenejo. La scenejo nun jam povus rezervi la lokon por la vere homaj aferoj, la gravegaj vivproblemoj kaj por la ne marĉandema arto. Sajnas ke la teatro jam komencas rekoni multloke ĉi tiun novan taskon.

RECENZO



KALOCSAY—WARINGHIEN: Parnasa Gvidlibro. Eldonis Literatura Mondo, Budapest. 176 paĝoj. Prezo: broŝ. 0.70, bind. 1.— dolaro.

Kiam kunagas du eminentaj kapoj, kiaj estas Kalocsay kaj Waringhien, por verki sur kampo, kiun ili ĉiutage kulturas — ĉu iu dubos, ke rezultos io atentinda? Nu, la ĵus eldonita Parnasa Gvidlibro de la du aŭtoroj, per kiu bonhumore ili promesas doni la rimedojn al ĉiu, por fariĝi poeto — tiu libro meritas la atenton de l' esperantistoj, ne nur de la verkantaj, sed ankaŭ de la legantaj. Ĝi meritas tiun atenton malgraŭ aŭ ĝuste pro la kontraŭaj opinioj, kiujn eble kelkaj havos pri tiu aŭ tiu ĉapitro. Mi konfesas, ke dum studado de la verketo maltrankvilo kaj zorgo kaptis min. Tamen, petita de la eldonejo, »plene kaj tute sincere« diri mian opinion, mi skribas ĉi tiun recenzon — lojale, sed ne kun serena animo.

La pripoezian prelegaron antaŭparolas Kalocsay per balado, en kiu li akcentas la celon de la libro: »Ni donas ĉion krom genio« — poemo majstra laŭ la formo, klara, bonhumora, apartenanta al la plej bonaj strofoj de l' poeto.

Sekvas »Skizo de la Esperanta Metriko«, de G. Waringhien verkita lerte, elfundamente, detala kaj sistema studaĵo pri la interesa temo. En 54 paragrafoj la aŭtoro diras multon utilan pri akcento, verspiedoj, versformoj kaj strofoj. Kelkfoje mi sentis min iom frapita, ekz. (§ 4) ke en la frazo: »Mi ne volas« la »ne« devas esti neakcentita. Nu, tio estas malgravajoj. Sed se la aŭtoro, »ĝuante la modernajn liberojn« (nome stumblon kaj gliton) transformas la versojn de Zamenhof:

La diojn mi ne juĝas; tamen vere
plendinda estas stato de virino

jene:

Diojn mi ja ne juĝas; tamen vere
plendinda estas la stat' de virino

tiam mia germana sento por versmuziko ribelas kaj ĵetas al la diablo tian stumbladon kaj reiras al la majstro.


Ne malgrava estas ankaŭ la fakto, ke W. traktas nur pri parolataj versoj. Se lian teorion oni volas uzi por kantataj strofoj, ĝi ne ĉiuloke taŭgas. Ekz. (§ 14) en la traduko de Zamenhof:

Supre staras sur la monto / la silenta kapeleto;
en la valo, ĉe la fonto / ĝoje kantas paŝtisteto

la silaboj »la« kaj »ĝo-« (komence de la dua kaj de la kvara verso) laŭ W. »havas malĉefan akcenton, kiu povas malfortiĝi aŭ tute malaperi«. Sed la melodio metas la ĉefajn akcentojn ĝuste sur tiujn du silabojn. (Cetere tiuj strofoj de Zamenhof, kiel ankaŭ aliaj, ne estas kanteblaj laŭ la melodio, ĉar ili havas troajn silabojn).

Post tiu laŭnature iom seka traktajo sekvas la sprita »Arto Poetika« de Kalocsay, versforma, eleganta, okaze sarkasma, ĉiam trafa kaj klarvida. K. en amuza forino ripetas parte la enhavon de la antaŭa artikolo kaj aldonas la plej gravajn principojn pri elekto de la poeziaj objektoj, pri stilo, epitetoj, komparo, apostrofado, hiato, licencoj ktp. Li uzas por tiu poezia prelego la fluan, por Esperanto speciale konvenan kvinjamban verson kun ina finiĝo. Bedaŭrinde mankas — en la eseo de W. tute, ĉe K. preskaŭ tute — pritrakto de unu el la fundamentaj malfacilaĵoj en la Esperanta poezio: la problemoj de l' viraj versfinajoj. Ili estas necesaj tiel por viviĝi la originalajn poemojn kiel por ĝuste traduki multajn naciajn ritmojn. Sed por vire fini verson, ni povas pro la konstruo de Esperanto meti finloken nur unu el la malmultaj unusilabaj vortoj (kiuj krome portas neniam la ĉefan sencion de la frazo) aŭ apostrofitan substantivon. Jen unu el la faktoj, kial Esperanto ne estas predestinita verslingvo.

Studante pli detale la rimedojn, kiuj faras la versojn de K. tiel fluaĵ kaj glataj, oni rimarkas kun miro, ke la belaj formoj, la vortoj vigle plaŭdantaj kaj donantaj simplan komprenon — ke ili iam kaj iam kaŝas difektetojn de la lingva ĝusteco! Tio okazas ankaŭ en naciaj literaturoj; sed estas certaj limoj; kaj en Esperanto — kiel artefarita kaj nun ankoraŭ ĉefe skribata kaj legata lingvo — ili devas esti kiel eble plej malvastaj. Oni legu ekz. jenajn citaĵojn (kelkaj ankaŭ el la teksto de W.): tiom da torento, traponti la astrojn, kuri post fantomon, taski ŝarĝon al la cerbo, bruli en kaŝo, duopu, mankaĵ (t. e. malperfektaj) rimoj; oni trovas: apostrofa (anstataŭ apostrofitita) artikolo, neakcenta (anstataŭ neakcentita aŭ senakcenta) rimo, kvinjamb (anstataŭ jambokvino), fluido (anstataŭ fluidaĵo). La interesa kaj utila diferenco inter *krom* kaj *escepte* de estas neatentata (krom estas unusilaba!); la transitiva vorto »hoki« estas intransitive uzata ktp. Jam antaŭe K. juĝas tiujn kritikulojn, kiuj volas gardi »la principojn«: »De nia lingvo for la trudkitelon« (nome de la logiko); kio vivas kaj



Titolpaĝprojekto III.

estas uzata, tio estas ĝusta. Bone, tio estas opinio tute klare esprimita. Sed mi esperas, ke la plimulto decidis: kio estas malĝuste uzata, tio neniel rajtas resti vivanta kaj fariĝi kutimo. Ĉu oni povas nomi tion »subtilkapa ambicio«? Ĉu Zamenhof, kiu ne uzis tiujn licencojn, »povis paroli nur balbute«? Mi bone scias, ke unu el la piej belaj ĉarmoj de la poezio estas ia necerta ŝvebo de l' sento, elvokata de sama ŝvebo en la esprimoj; kaj al perfektuloj en la lingvo ne malutilas, se tiu ŝvebo eĉ kondukas iom trans la limojn inter ĝusto kaj malĝusto. Sed K. estas legata de la tuta esperantista mondo, ankaŭ de neperfektuloj; kion li skribas, tion ili rigardos ĝusta kaj modela; kaj tiamaniere tiaj dubindaj formoj povas esti ĝi burĝoj en la ordinara lingvo kaj difekti ĝian logikan strukturon; sed tiun mi rigardas principo nepre neŝancelenda!

El ĉio ĉi levigas la malnova demando: Ĉu Esperanto estas verslingvo aŭ ne? Mi opinias, ke la klasika Esperanto estas malfacile uzebla por versoj. Ankaŭ Kalocsay kaj liaj poeto-kunuloj scias tion; kaj ĉar ili havas la principon: Esperanto *devas* esti verslingvol tial li serĉas rimedojn, for fari ĝin pli taŭga por tio. Li generaligas ritmajn licencojn*), uzas gramatike dubajn aŭ eĉ malĝustajn formojn kaj fine — pro la ĝena multisilabeco de Esperanto — li serĉas mallongajn vortojn; kaj ĉar tiaj estas maloftaj pro la konstruo de la lingvo, li enkondukas novajn (vidu poste). Estas konsiderende, ĉu la utilo kompensas la malutilon.

Trioloke sekvas Esperanta Rimaro, kompilita de Waringhien. Ĝi enhavas ĉirkaŭ 7000 vortojn kaj estas tre taŭge aranĝita.

La libron finas »Poezia Fakvortaro«, en kiu ambaŭ aŭtoroj kune kolektis »post zorga kribro« 600 vortojn netroveblajn en SAT-vortaro. Multaj el ili, estas vortoj jam sufiĉe ofte uzataj (eĉ Zamenhofaj), ekz. adaga, ambono, Cezaro, dekalogo, eseo, kiosko, nikso, zeloto k. m. a. Aliaj estas internaciaj vortoj, kontraŭ kies akcepto neniu protestos, ekz. altruismo, aŭtoktona, begino, libido, mestizo, pikniko ktp. Kelkaj vortoj estas prezentataj en alia formo ol la jam nun uzata, ekz. geŝo (gejŝo), ĉardaso (ĉardaso), hozana (hosana), koktaĵlo (kokteito). Mi opinias la kreon de tiaj duoblaj formoj por la sama vorto neaprobinda; ni havas jam sufiĉe da ili. Tolerablaj estas la enkonduko de onomatopeaj vortoj kiel: hop, pum, ruk, knaki, knali, kviki, meki, trampli. Ili ja estas kvazaŭ nur literigo de sonoj.

Sed nun la restajo, laŭtakse 300 vortoj! Ili estas »neologismoj, kiuj aŭ esprimas nuancon ĝis nun konfuzatan kun alia aŭ anstataŭas kunmetitajon«. Jes — kiu iam provis verki aŭ traduki versojn, tiu scias, kiom necesaj estas por la esperanta poezio nuancoriĉaj kaj mallongaj vortoj. Do, jen abundo da ili, pli multaj ol la lingva komitato post komuna subtila pripenso allasis por la kvara aldono al U. V.! Jen kion ni nepre bezonas por la poezio: ĉuro (spermo), devanci (antaŭiĝi), fajna (4 signifoj), febla (malforta), fiki (familia esprimo por sekskuniĝi!), frida (malvarma), giri (rondiri), ĝartero (ŝtrumpligilo), kaco (familia nomo por la peniso), kurta (mallonga), lanta (malrapida), olda (maljuna), stulo (feksego) ktp. ktp. — poezia fakvortaro!

Ne, sinjoroj, ĉi tie estas limo, almenaŭ por mi. Vi diras, ke la malvortoj estas erarigaj. Nu, por mi estas »maldekstra, maljuna, malofta« jam de longe same simplaj nocioj kiel estus sinistra, olda, rara; la konscio pri la deriviteco de tiuj vortoj jam longe foriĝis. Kaj pri la multaj vortoj kun »un-« en la germana lingvo, kiuj estas tute same formitaj kiel la mal-vortoj en Esperanto, neniam iu ekpensis plendi pri malfacila kompreneblo aŭ pro la danĝero de erarigo.

Vi diras, ke tiuj vortoj sin turnas nur al perfektig-

*) Sub la skemo: o-/o-/o-/o-/o-/o-/o troviĝas de Kalocsay ekz. jenaj versoj:

L' uzo de l' artikolo apostrofa —
Tiun version kun amfibrak-glitemo —
Zamenhof verkis per ĝermanaj skemoj —

intoj. Sinjoroj, vi kaj la rondo de poetoj ĉirkaŭ Literatura Mondo verkas librojn kaj artikolojn. Vi deziras, ke oni legu ilin — kaj ili estas legataj; ĉar kiu volus nelegi ion de Kalocsay aŭ Waringhien! En tiuj verkoj vi uzas tiujn neologismojn. Ĉu vi vere kredas, ke ĉiu leganto zorge distingos ilin de la ordinara vortrezoro? Ĉu ili ne baldaŭ eksvarmos ankaŭ en la ĝenerala lingvo, komplikos kaj malfaciligos ĝin?

Oni povus eble toleri tiun amasan invadon de neologismoj, se per ĝi la afero estus finita unufoje por ĉiam. Sed tio ne estas verŝajna; ĉar la nuancoj estas sennombraj, kaj mallongaj vortoj ankaŭ estas troveblaj ankoraŭ amase. Kaj venos la literaturistoj de la plej diversaj nacioj — kial ne? Ĉu ili ne havas la saman rajton? — kaj »pli-riĉigos« la lingvon per siaj specialaj nuancoj. Kie estos la fino? Kaj kion diros pri tio ekz. niaj orientlandaj samideanoj, kiuj ne havas la avantaĝon kiel ni, nome ke almenaŭ parto de la neologismoj estas konata al ni?

Plue: la tekniko kaj scienco postulas ankaŭ siajn fakvortojn kaj nuancojn, laŭ mia opinio kun pli granda rajto ol la poetoj kaj certe kun malpli granda endanĝerigo de la ĝenerala lingvo. Ĉu do estonte ni havu tri Esperantojn anstataŭ unu?

Resume: nek la penso pri la libereco de l' poeto, nek la atestoj de Grabowski aŭ de aliaj, nek la montrado al la lingva instinkto de l' publiko (?) povos trankviligi en mi la timon, ke jen danĝero minacas al nia lingvo. Se do perfekta Esperanta poezio ne estas ebla sen la preparolitaj helpiloj — nu, en nomo de Dio! ni lasu ĝin en ĝia stato, almenaŭ nun. La internacia lingvo havas ankoraŭ aliajn, pli gravajn taskojn; kaj ĉar por tiuj mi flaras endanĝerigon, mi preferus rezigni nun perfektajn versojn — kion belaj kaj dezirindaj cetero ili estas.

La aŭtoroj jam antaŭrifuzis ankaŭ ĉiujn argumentojn kontraŭ la neologismoj per la vortoj: »Neutile estas koleriĝi kontraŭ ili, nek krude admoni ilin« (la novemulojn). Do miaj vortoj verŝajne estos vanaj kaj perdita la tempo, dum kiu mi skribis ilin. Sed la esperanta afero estas al mi tiom kara kaj tiom intime ligita kun mia vivo, ke mi devis diri mian opinion »plene kaj tute sincere«. Mi esperas, ke ĝi estos akceptata kiel parto de objektiva diskuto inter honestaj sinceraj viroj. Mia persona respekto al la du aŭtoroj kompreneble restas tute neŝanĝiganta same kiel la bedaŭro ke ĉi-foje mi ne povas kun ili akordiĝi.

Paul Bennemann.

NE PUBLIKOTAJ MANUSKRIPTOJ

Noveloj: Rakontoj el la Blua Vista; Sklavino (Koralov); Latvaj noveloj: Austrino, Kazoks, Veisbergs; Hase: Aprilo, La enigmeto, Kristnaska fabelo; Fabelo laŭ Dostojevskij; Riulet: La monto; Belgis: La artisto; L. G.: La ĝemelino; N. G.: Petro Paulo ĉe la bordo de Sejno; F. H.: La nuntempa rivalo; M. M.: Petolajo de la sorto; Szini: Tien; Janspa: Febro.

Poemoj: Ovidius: La kvar epokoj; H. S.: Kruelej manoj, Tagiĝo, Falas folioj; Aŭsano: Aŭstralio; Steen: In memoriam; P. M. B.: Estas feliĉo; Rathaus: La amo; Z. R.: Havi vin, Nokturno.

Pri la plujaj ni donos sciigon en iu venonta numero.

NIA TITOLPAĜO DE 1933

En tiu ĉi numero oni trovas tri titolpaĝ-projektojn por la jaro 1933. Bonvolu voĉdoni per la ĉemetitaj voĉdoniloj, kiujn se oni nenion krom la voĉdono surkribas, oni povas ekspedigi kiel presajon. Templimo de ekspedo: 15. decembro 1932.

Vortoj netroveblaj en la Plena Vortaro

Fatraso: aĉajaro; *finto:* luda ruzajo; *kiĉo:* malkara artfuŝajo; *moroz:* grumb'eme malgajhumora; *tenaca:* elaste altenigema; *torpori* sensentiĝi (pri membroj).

Biblioteko tuta
Por prezo liliputa:
AELA!

LA PLEJ JUNAJ ĈEĤOSLOVAKAJ POETOJ

— H. B. KVĚTOŇ —

La plej nova ĉeĥoslovaka lirikista generacio — poetoj naskiĝintaj en la kuranta jarcento kaj komencintaj verki post la monda milito — tute ŝanĝis la karakteron de ĉeĥoslovaka poezio. La milita tempo de malsato, malsano kaj morto, la postmilita tempo de grandegaj teknikaj progresoj kaj social-ekonomiaj reformoj kaj revolucioj inspiris ne sole novajn opiniojn kaj sentojn, sed ankaŭ novajn esprimojn kaj esprimilojn, ne sole aliajn rigardojn, sed ankaŭ aliajn ilojn de la liriko. Kompreneble la studo de antaŭmilitaj hejmaj kaj modernaj fremdaj — precipe francaj — poetoj (Rimbaud, Apollinaire, Cocteau k. a.) ne restis sen influo je tiu ĉi grupo de junaj verkistoj, kiuj per sia propra formo bildigis idealon kaj haoson de la postmilita tempo.

Ilia poezio respondas tiom fidele al sia tempo, ke kun la situacio en la mondo ŝanĝiĝis ankaŭ la vojoj de la senteme kaj rapide reagantaj poetoj. En la unuaj postmilitaj jaroj de terura laciĝo la verkoj de Wolker montras kristanan humilecon, laŭdon pri simplaj ĝojoj de la vivo, plezuron kaj dankon pro la libereco, pro la sola vivo. Sed tre baldaŭ en la jaroj de socialistaj reformoj kaj kolektivistaj provoj, la verkoj de Wolker, Seifert kaj Biebl reprezentas revolucionan proletan poezion, kiu neas ĉian individualismon kaj fariĝas ilo de klasa batalo por la kolektivismo. Tiun ĉi vojon la junaj lirikistoj forlasis, kiam venis dumtempa, relativa reordigo de sociaj rilatoj. Tiam Seifert, Biebl kaj Nezval ekiris — ŝajne ne logike — tute kontraŭan vojon: tiun de sentendenca kaj

senideologia, idilia kaj ludema poetismo, vojon de fuĝo el la mondo de problemoj al la pura arto de vorto. Fine venis reveno al la socia poezio, kompreneble kun ŝanĝita esprimaro, poezio, kiu nun regas la ĉeĥoslovakon lirikon, kies motivo ne estas ekstera »mi«, sed sociitaj »ni«. Komuna bazo de ĉiuj ĉi tendencoj estas internacia — standardon de nacionalismo portas lirikuloj el la antaŭmilita epoko (Dyk, Medek); fakto rimarkinda ĉe nacio reakirinta sian liberecon kaj renoviginta sian ŝtaton.

La spaco de la tie ĉi rezervita loko ne permesas priparoli la fruktojn de la nova ĉeĥoslovaka poezio, ĉu de la poetoj jam nomitaj, ĉu ne nomitaj (Píša, Kalista, Halas, Zahradníček, Závada k. a.) Tamen decas aludi almenaŭ la plej rimarkindajn:

Reprezentanto de la ĉeĥoslovaka proleta poezio kaj la plej talenta kaj populara ano de tiu ĉi postmilita generacio estas *Jiří Wolker* (1900—24), kies verkaro estas senĉese reeldonata kaj kiu trovis multajn epigonojn. Lia unua libro de poemoj »Gasto en la domon« (1921) apartenas al tiuj kristane humilaj verkoj, sed jam la dua libro de lirikaĵoj kaj baladoj »Peza horo« (1922) estas bela verko de la socia patoso. Lia plej ŝatata poemo estas »Balado pri okuloj de hejtisto«, kies laboro en elektrozino donas al la homoj lumon, sed al li mem forprenas la vidon.

Sur la unua loko, kiel reprezentanto de ĉeĥoslovaka poetismo, nun staras la plej produktema el tiu grupo *Vítězslav Nezval* (1900), kies lirikaĵoj cikloj »Ponto«



Otto Gutfreund: Monumento al Avinjo (ĉefa figuro de plej populara romano de Božena Němcová)

Li al matenmango venas,
La edzinon ĉirkaŭprenas:
»Edzinet', vi estas bona,
Tre sincera kaj sindona —

Nur koncerne ĉi aferon
Vi ne volas diri veron.

Jam la dua jaro pasas,
Dum min tio embarasas.

Aŭdu: strange estas por mi,
Kiel vi kutimas dormi.

Vi — dumtage vigla, forta —
Nokte kuŝas kvazaŭ morta,

Sen ekspiro, sen ekmovo,
Sen signet' de vivipovo ...

Via korpo, krom ĉi tio,
Pli malvarmas ol glacio.

Por vin vekĵi, estas vana
Eĉ la laŭta plor' infana!

Edzinet' — ĉu ne vere? —
Vi malsanas tre dangere?!

Kontraŭ tio scias oni
Sagan ja konsilon doni.

Herbojn vi sur kampo trovos,
Kiuj vin sanigi povos.

Se en herboj mankas forto,
Nepre helpos sorĉa vorto.

Sorĉa vorto nubojn sendas,
Ŝipojn dum venteg' defendas,

Gi eĉ fajron estingigas,
Rokon rompas, drakon ligas!

Stelojn movas vort' magia —
Fidu do al povo ĝia!«

»Mia edzo kaj sinjoro,
Vana estus la esploro!

Kontraŭ Sorto — sen utilo
Restas ĉia kuracilo.

Kion Parco ja aranĝas,
Tion homa vort' ne ŝanĝas.

Se mi kuŝas sen konscio,
Tamen min protektas Dio.

Ciam min — mi kredas firme —
Dia mano gardas ŝirme:

Post la mortsimila sveno
Mi vivigas en mateno.

Nun mi sana estas, vidu —
Tial nur al Dio fidu!«

Sinjorino, vi eraris:
La sinjor' alion faris ...

Sorĉistin' ĉe fajro sidas,
Verŝe akvon ŝi dividas.

Unu, du ... dekdna plado —
Jam finita la verŝado.

»Multon konas vi, patrino,
Pri la homa vivdestino,

Pri malsanoj, pri malĝojoj,
Pri la Mort' kaj ties vojoj.

Diru vi, la multescia,
Veron pri edzino mia!

Ŝi — dumtage vigla, forta —
Nokte kuŝas kvazaŭ morta, —

Sen ekspiro, sen ekmovo,
Sen signet' de vivipovo.

Sia korpo, krom ĉi tio,
Pli malvarmas ol glacio.«

»Tion mi komprenas bone,
Ĉar ŝi vivas nur duone:

La anim' — vi miras pri ĝi?! —
Nokte devas enarbiĝi.

Ĉe l' rivero arbarflanka,
Jen salik' kun ŝelo blanka —

Kaj al ĝi kun ŝi, la juna,
Estas la anim' komuna!« « —

»Ne! Edzinon mi ne ŝatas,
Se kun arbo ŝi rilatas;

Nur kun mi ŝi vivon ĝuos,
La salikon mi detruos!« —

Iris li al la saliko,
Ĝin dehakis ĉe l' radiko;

Kaj la arbo river-meze
En la akvon falis peze,

Sed muĝeto ĝia fina
Sonis kvazaŭ ĝem' patrina —

Kiel se patrin' mortanta
Idon estus forlasanta ... —

»Hom-amas' ĉe domo mia!?
Sonorado!? — Kaŭzo kia?«

»Mortis, kvazaŭ defalĉite,
Via edzinet' subite!

Falis ŝi — ve, mir-afero! —
Kiel arba trunk al tero:

Nur ekĝemis ŝi mortante,
De l' infano disiĝante.« « —

»Ve al mi, la senkonsola
Mortiginto kontraŭvola!

La edzinon mi mortigis,
La infanon mi orfigis!

Ho, saĵko blankaŝela,
Puno trafis min kruela!

Kion fari nun? Por ĉiam
Viduonon perdis mi jam.« —

»El la akvo min eltiru,
Flavajn vergojn vi deŝiru;

Mian lignon lertaj uloj
Sege tranĉu je tabuloj,

Kaj pretigu vi lulilon,
En ĝin metu nian filon:

Kiam ajn en ĝi li kuŝos,
Panjo lin karese tuŝos ...

Vergojn ŝirmu de dangero:
Plantu ilin ĉe l' rivero.

Vi instruos nian filon
Fari el la ŝel' fajfilon,

Kaj ludante — povos do li
Kun la patrinet' paroli ... « «

Divenado de homa sorto laŭ akvo estas antikva slava kutimo. — La en ĉi-supra balado prilaborita mito devenas el la ĉirkaŭaĵo de Bydžov (pron.: *biĝof*) en Bohemio. La poeto K. J. Erben (1811—1870), fervora kolektanto de popola poezio kaj specialisto pri la slava

mitologio, mem atentigas pri la malordinareco de ĝia suĵeto: vivokomuneco inter homo kaj arbo. — Lasttempe la saman poemon tradukis Marie *Under* en la lingvon estonan («Looming», decembro 1931, pĝ. 1098 ss.).

Rim. de la trad.

(1922), »Pantomima«, »Mirinda sorĉisto«, »Malgranda rozuja ĝardeno«, »Diabolo«, »Epitaĵoj«, »Poemoj sur poŝtkartoj« (1926), »Ĝemeloj«, »Akrobato«, »Hebrea tombejo«, »Matenmango en herbo«, »Poemoj de nokto«, »Johano en funebro«, »Vitra haveloko« (1932) montras neordinaran talenton por ĉiuj formoj de la moderna poezio. Lia plej valora poemo estas »Edison«.

Tipa verkisto de ĉeĥoslovaka poetismo kaj samtempe de proleta poezio estas *Jaroslav Seifert* (1901), majstra jonglisto de vortoj en la kolektoj: »Urbo en larmoj« (1920), »Ĉia amo« (1923), »Sur ondoj de senfadena telegrafio« (1925), »Najtingalo kantas malbone« (1926), »Poŝta kolombo« (1929).

Originala poetisto estas *František Halas* (1901), kies lirikaj libroj »Sepio« (1927), »Koko forpelas la mor-

ton« (1930), »Belega malfeliĉo« (1931) kaj »Vizaĝo« (1932) penas solvi problemon de neelparoleblo.

Poetismon plenan de malĝojoj, soleco, nokto, dormo kaj morto reprezentas verkoj de *Jan Zahradníček* (1905), »Tento de la morto« (1930) kaj »Reveno« (1931).

Virtuozan forman lertecon montras kelkaj verkoj de *Konstantin Biebl* »Vojo al homoj« (1923), »Fidela voĉo«, »Rompo«, »Stelisto el Bagdad« (1925), »Per oraj katenoj« (1926), »Kun ŝipo, portanta teon kaj kafon«, »Nova Ikaros« (1929), »Ĉielo, infero, paradizo«.

Kun tiuj kaj multaj aliaj verkoj la ĉeĥoslovaka literaturo aliĝas al la plej moderna literaturo tutmonda ne kiel sekvanto, sed kiel kunlaboranto.

Venko de Lumo

— Zdeněk Rón —

La venko de la armeo de Lumo super la vilaĝo Počátky ne estis akceptita de ties loĝantoj spontane, kio cetere estis supozebla pri komunumo, en kiu kelkaj jam malfermis la fenestrojn en la mondon, sed la aliaj ankoraŭ ne. Eĉ male; tiu maljuna kirilisto el la kabano ĉe la ŝoseo al Vysokov, eĉ nun grumbblas kontraŭ petrolo kaj laŭdas seban kandelon, olean lumilon kaj kenon.

Ili ekmarŝis, la bravuloj, en vicoj severe regulaj, trans monton kaj valon, de la elektrejo en Počíc — kaj en la ĉirkaŭaĵo de unutaga marŝo rapide malmultiĝis tiuj urboj, vilaĝoj, solejoj, kiujn ili ankoraŭ ne invadis. Kaj tiel, la kvietan linion de la horizonto de Počátkyvalo, nur tie ĉi kaj tie modere ondantan per beŭlo aŭ arbusto, rompis vico de nigraj mastoj de elektra konduko. Ĝi alkuris de okcidento, diskuris sur la montetoj, flankiris en la kampojn, kaj ĝuste antaŭ la dometo de Ryzek ĝi atingis la ŝoseon al Vysokov por disiri tra la tuta vilaĝo, ne esceptante la plej kaŝitajn angulojn.

La tagon, en kiu la dupieda masto lokiĝis antaŭ la fenestroj de la dometo de Ryzek, nova gasto, obstina, trudema, ekloĝis en la kirilista polva mondo. La malamo.

Ĝis nun, Ryzek elpeladis el sia senedzina solejo

ĉiun novaĵon per amara ignorado, ĝi estu freŝa ideo movado aŭ objekto eĉ plej eta, kiun la aliaj akceptis kiel helpanton kaj amikon.

Jen — la balotado. Se iu balotiĉo estis nevalida, certe estis tiu de Ryzek, ĉar lia konvinko estis, ke estas tute egale, ĉu en la komunumo aŭ en la ŝtato regos la ruĝaj, verdaj, nigraj, nigra-flavaj aŭ ruĝa-blankaj. Ryzek donos siajn kelkajn kronojn da impostoj eĉ al la diablo, se nur li havos trankvilon en sia kaŝejo, kie li kaj la maljuna virkato kaj hordo da araneoj malamis freŝan aeron.

Generacioj plendadis pro la malfavora sorto de la vilaĝo, kaŝita malproksime de la mondo, en la montaro. Mankis taŭga vojo — kaj dum la Vysokov-anoj kaj aliaj esprimadis sian kontenton pri la vivado ĉe la ŝoseoj kaj ĉe la fervojo, la Počátky-anoj vegetis kaj vegetadis. Ili ricevis almenaŭ belan, elegantan ŝoseeton, ĉar en tiu montetaro ne estis sufiĉe da spireblo kaj nutro por fervojo. En viglaj serpentumoj ĝi eksaltis de Vysokov sur deklivo, kaj per unu el la graciaj serpentumoj ĝi rondpasis la dometon de Ryzek tiel perfekte, ke, elirante tra la antaŭa aŭ malantaŭa antaŭĉambro, vi senpere kuŝus en ĝia blanka, junfreŝa ĉirkaŭpreno.

Estis stranga kuntuŝo de cirkonstancoj, ke oni



Max Svabinský

Caso de tigroj.

tiel zorge havigis oportunan elirejon en la mondon ĝuste al tiu, kiu plej malŝate el la tuta vilaĝo turnis al ĝi la dorson.

Sur la ŝoseo la veturiloj veturas, senbrue, senpene kaj oportune. Cevalparo ludfacile veturigas tridek kvintalojn, dufoje dum la tago vi atingas la fervojon. Al Vysokov vi povas iri en lakŝuoj dum tempo, kiam en la koto de la malnovaj vojoj dronas eĉ kvinkilogramaj tibialtaj botoj. Sed Ryzek transportas siajn knediletojn al la magazeno de Werndt en Liberec per ŝovĉareto, same kiel antaŭe. Kaj la malnova, malglata vojo sekvu ja dum tuta horo la glatan ŝoseon, krucu ĝin dekfoje dum la tago, lia ĝi estis, lia! Por moko de homoj kaj por konsolo al malprogresemulo el la antaŭa jarcento.

Kiel alia estis ĉio, antaŭ ol la rabistoj el la Mal-supra Lando invadis ĉi tien, en la senventan silenton. Dum la tuta tago eĉ ne unu vivanto estis pasanta preter la fenestroj de la aranea reĝo. Kaj subite tiom da homaĉoj, fiornamitaj, elspezemaj kaj mallabor-emaj.

Se iu ekskursas tra Počátky supren, en la montaron, li pekus, se li ne haltus ĉi tie, ĉe la dometo de Ryzek. Ŝatantoj de malproksimaj perspektivoj longege, nesatigeble rendezuis ĉi tie. Kaj serĉantoj de bonanima popolo, se ili haltis, en la fenestron ekrigardis, eniris kaj alparolis, por plimultigi la amasigitan riĉaĵon, forradis sin konsolante, ke escepto konfirmas regulon. Al la ŝoseo kaj al ĉio, kio amikiĝis al ĝi, Ryzek pagis per dorso kaj per vortoj, kiuj, se ili ne estis malamaj, certe ne disdonis afablaĵojn.

Kaj li estus pasive amikiĝinta eĉ kun tiu ĉi novaĵo, jam pro tio, ke ne ekzistis eblaĵo, nek forto por batali kontraŭ ĝi alie ol per persista ignorado. Kion vi kapablas fari kontraŭ tia ŝoseo, dinamite traborita en roko, kun grandegaj ŝtonaj remparoj, firme kuŝanta sur la deklivo!

Estas amikoj, kiuj estas amikoj sole pro tio, ke ni ilin timas, aŭ ke ili ne timas nin.

Cetere — la nova ŝoseeto neniel venĝis al Ryzek pro lia ignorado. Ryzek daŭrigis fabriki siajn knediletojn kaj ne estis grava por li duontago, ŝparebla, se la ŝovĉareto ŝargita unufoje dum la monato por Werndt en Liberec, anstataŭ skuiĝi sur mizeregaj vojoj, estus gaje bruetanta sur la ŝoseo.

Sed venis fremdulo, kiu ne toleris la abstinecon de Ryzek.

— Aŭ vi plene amikiĝos kun mi — tiam mi servos vin. Aŭ vi ekbatalos — kiu venkos?

Kompreneble Ryzek akceptis la batalon, senpripensan kaj malsamŝancan.

Li malgajnis jam en la unua rondo. Masto de elektra konduko lokiĝis ĝuste antaŭ liaj fenestroj. Kaj la komisiono nur ridis, kiam li prezentis siajn bagatelajn kontraŭdirojn, ekzemple, ke la masto ombras al li.

— Elĵetu el la fenestroj ĉiun senbezonaĵon, liberigu ilin de la centjara polvo kaj malpuraĵo, turnu vin al la lumo vizaĝe anstataŭ dorse — kaj tuj estos ĉe vi lume.

Kaj por kompensi al li la iometon da forprenita taglumo, ili muntis sur la maston lampeton, kun ŝirmilo ĝuste kontraŭ la fenestroj. Kaj la forta lumo penetradis dum tutaj noktoj eĉ en la plej kaŝitajn angulojn de la ĉambro de Ryzek. Kaj se li volis konsoli sin, li devis ŝtopi la fenestrojn, kovri ilin per malnovaj surtutoj kaj plendi al sia seba kandelo.

Sed tio estis sole komenco de la malvenko de

Eklogo

— *Stefan Krčmery* —

*Nubvetero. Tutsemajna pluvo.
Varma pluvo — jen bonaĵo dia
Por la bonaj mastroj, pandonantoj —
— — — — —
Sed por ni hodiaŭ — suno ĉarma.*

*Suno, sun'! Pentristo admirinda,
Kuracis' mirakla, Di-okulo,
Di-ridet' por bonaj kaj malbonaj!*

Jus la mondo — cindre griza tuko.

*Jen la sun'! — pentristo admirinda —
Per peniko viŝas la grizaĵon
Kaj la mondon ŝanĝas je blulo:
Nudaj montoj jam smeralde brilas,
La arbarojn kouras vest' velura —
Sur herbejo nia mil floretoj!*

Jus la mondo — infanet' plorema.

*Jen la suno! — la patrin' afabla —
Super ĝi sin amoplene klinas,
Kaj ridet', apenaŭ vid' ĝinte,
Jam plenigas tute la luilon:
En okuloj, krom la resto rosa,
Klara bril' — ĝojtemas la manetoj.*

Jus la mondo — kapo doloranta.

*Jen la sun'! — mirakla kuracisto —
Frap-esploras pacienton sian,
Kies membro ĉiu tuj sanegas:
Jam sin levas la premita herbo,
En aero ludas la abeloj,
Turdo en arbaro flutas gaje.*

*Suno, sun' vi granda kaj mirakla!
Kiel la paŝtis' elmetis tie
La laktujojn, tiel mi — pardonu! —
Metas al sunlum' animon mian.
Same ja ĝi estas uĵ' valora,
Same estas ĝi mucida iom,
Kelkaloke eĉ aperas ŝimo:
Kiu ĝin ja (kiel nebulrestojn
En akseloj de l' montar') elsuĉos,
Por ke la anim' arĝente sonu,
Se ne vi, vi, plej mirakla suno,
Di-ridet' por bonaj kaj malbonaj?*

El la slovakaj: *Miloš Lukáš.*

Ryzek.

Okazis, kio neniam estis okazinta al Ryzek, kaj kio lin furiozigis ĝis frenezeco. Same kiel li veturigis la komercaĵon al Liberec, tiel same li ĝin retransportis hejmen, kaj plena de furiozo, li ĵetis la unumonatan laboraĵon en la fornon.

— Sinjoro Ryzek, malaltigu — kaj multe malaltigu la prezojn. Tornisto Havel, tiu unupieda, sciu, liveras por duona prezo.

Tornisto Havel estis jam el la nova generacio kaj la amikecon de la stranga fremdaĵo, li aĉetis al si por kelkaj centkronoj. La amikecon, kiu rentumiĝis.

Jen — invalido, al kiu la milito forglutis piedon, nekapabla ĉe tornilo piedmova, tornis tiel, ke li povis

oferti la komercaĵon por duono de la prezo de Ryzek kaj jam tiu prezo estis ege malalta. Kaj kian komercaĵon! Glatan, belaspektan — ĉu gravas unu plia sekundo? Vi ekfunkciigas la motoreton kaj la tornilo sin turnas kiel diablo.

Ankoraŭ estis tempo. Konkurencantaj firmoj ofertadis motoretojn — unu malplikosta ol alia. Sed tia estis Ryzek. Ne, ne, tute ne! Sed li jam apenaŭ spiris, tiel kaptis ĉe la gorĝo lin, malsatan kaj senfortan, tiu, kies amiko li ne volis esti. Ne plu estis eble ignori, turni la dorson, sin izoli.

Aŭ por, aŭ kontraŭ. Aŭ fali sur la genuojn, peti, sin submeti. Tio ne estis tiom malfacila. Sed li eljetis la agenton de elektroteknika firma, proponanta al li motoreton je partopagoj pli ol mizerikordaj.

Aŭ ĉerpi el la lastaj fortoj, eksvingi kaj la frapo falu kien ajn. Eble mi trafos la tempiojn, eble okazos miraklo.

Li ekprenis segilon kaj hakilon kaj, kaŝata de la nokto, li batis la unuan el la armeo de la Lumo. Kiam li subsegis la trian, li ekhenis pro ĝojo. Jen — la meza kuŝiĝis plene, kaj la du ceteraj senpove balanciĝis en la miksaĵo de dratoj kiel pendigitaj en ŝnurmaŝoj.

Li rapidis kun hakilo kontraŭ iliaj ridindaj kapetoj, ornamitaj per porcelanaj butonoj, similaj al tintilaj ĉapoj de mokemaj arlekenoj.


Mi montros al vi motoreton vi, lamul...

»Lamulo« Havel kaj ĉiuj loĝantoj de Počátky eksciis matene dimanĉe, kial iliaj lampetoj estingiĝis nokte kaj kial sur ĉiu masto troviĝas averta tabuleto:

!! Tuŝi la kondukon vivodangere !!

La karbigintaj restaĵoj de Ryzek diris tion al ili tro okulfrape.

El la ĉeĥa *Rud. Hromada*.



Jan Stursa :

La vundito

FICO

— J. Š. Baar —

Eĉ la maljuna vidvino de la vojriparisto eliris hodiaŭ el sia kabano kaj sidigis sur la deklivo, apud la areton de flavaj anseridoj, kiujn paŝtis ŝia plej juna nepino Marjanka. La arbaro bonodoris, la herbejoj floris kaj ĉefe la agrabla maja sunbrilo varme radiis, kaj ĉio ĉi ellogis ŝin eksteren el la ĉambro en la korton, el la korto en la kampojn, ĝis ŝi alvenis al la deklivo, surkreskita de herbaro kaj surplantita per junaj ĉerizarboj. Rivereto malsupre de la deklivo murmuris, la junaj arboj silente, flustre estis konfidantaj unu al la alia ian sekreton, birdoj kantis: sed ĉion ĉi la maljunulino ne aŭdis, ĉar ŝi surdigis en sia maljunago kaj per tio kvazaŭ orfigis. La vivo glitis preter ŝi silente kaj nenion ŝi eksciis pri ĝiaj ĝoj- kaj malĝoj-ajoj. Ankaŭ ŝiaj familianoj ne emis krii al ŝi kaj tiamaniere rakonti al ŝi novaĵojn kaj okazaĵojn de l' tago, kaj tial ŝi malproksimiĝis de la mondo, kutimiĝis al soleco kaj ĝojigis sin ĉefe nur per rememoroj.

Jen, ankaŭ nun, apenaŭ ŝi eksidis kaj la suno ekkisis ŝian kadukan, en tuko firme volvititan kapon, jam ĉio en ŝi svarmas kaj sin movas... Per la malfortigintaj okuloj ŝi ekrigardas la ĉielon kaj kiel sur la firmamento pasas delikataj, facilaj blankaj nubetoj, tiel en ŝia animo iras la okazaĵoj el ŝia malriĉa, simpla vivo. La kadukulina koro ekbatas pli forte, ke la avino vidas sin kiel infanon... Tie ĉi, sur la deklivo, same kiel nun Marjanka, kun vipo en la mano, ŝi paŝtadis anserojn, ludadis »blindan avinon«*) kaj antaŭ ol ŝi konsciis tion, la jaroj pasis kaj ŝi fariĝis vera avino.

*) Populara ludo de infanoj; unu el ili, kun tuko sur la okuloj, ne vidante la aliajn, klopodas kapti ilin.

surda kaj preskaŭ eĉ blinda...

Memkompreneble, la sepdek jaroj, kiuj kurbigas ŝian dorson, ne estas ludaĵo. Dum vivis la edzo, ĉio estis bona — sed poste la vivo ŝin ekpremis. Kun filo, orfo, ŝi akompanis la mortintan vojripariston al la tombo kaj restis sola en la mondo. Bovinon ŝi havis kaj seniĝi de ĝi ne deziris, ĉar »bovino estas duona vivpano«. La herbaron de la razenoj apudvojaj nun forfalĉadis la edzino de la nova vojriparisto, ŝi mem ne plu rajtis fari tion kaj devis sin treni laŭlonge de la kamporandoj kaj el tie, sur siaj ŝultroj, alportadi por la bovino herbaron kaj fojnnon, el la arbaro sternajon por ĝia stalo kaj lignaĵon, ofte sub la peza ŝarĝo faletante. La ŝnuraj ŝarĝteniloj sangvundis ŝiajn ŝultrojn, la kolo ŝveldikiĝis, sur la premkontuzita, kaloplena dorso kreskis ĝibo, en la oreloj komencis muĝi kvazaŭ ŝi starus apud kluzo, ĝis fine ŝi plene surdigis kaj profunda, muta silento ŝin ekĉirkaŭis...

Tamen, glor' al Dio, pro ĉio ĉi! La filon ŝi eldukis, vivpanon elpenis, la barakon ŝi povis transdoni al li sen ŝuldoj; kiom gravis, ke ŝi kripliĝis?

Vere, ne plu ŝi povas fari krudan laboron, sed vartistino en la familio de la filo ŝi estis dum longa tempo, kiam li estis edziĝinta kun Madla. Infano post infano naskiĝis, jam en vindaĵo ŝi ekzorgis pri ĉiu el ili, arde gardis pri la vivo de ĉiu, kaj apenaŭ unu komencis kuradi, jam alia nova ido kuŝis en lulilo.

Sed jen, nun ankaŭ jam Marjanka forlasis la avinon; knabineto lertmova kiel fiŝeto ŝi fariĝis. Post ŝi verŝajne neniu infano plu naskiĝos ĉe la gefiloj. La lulilon ili ja forigis jam el la ĉambro, do, komenciĝos por ŝi, maljunulino, fine silentaj, senzorgaj tagoj... Preĝejon karan kiam ajn ŝi povos viziti, dormeti, por la fila familio prizorgi kuiradon, ĝoji pri la infanoj kaj ĝui senpenan vivon...



Jakub
Obrovský:

Cigana
madono

Artemis

— Josef Svatopluk Macfar —

El la figuroj marmorecaj
De la homara infanaĝo
Min ĉiam interesis pleje

Artemis.

En ta lerneĵ' el dorma tedo
Min la belsona nomo vekis,
Se profesoro diris r' ŭke:

Artemis.

Zorgante nek rigardon lian
Nek la homerajn heksometrojn —
Mi vidis nur la gravan, grandan.

Artemis.

Tra mola herb' de l' Erimanto,
Kun roso brila sur piedoj,
Ĉashundojn kondukante, paŝis

Artemis.

Negblanka vest' la sveltajn flankojn
Kaj virgulinan bruston kovris,
Sagujon portis sur la ŝultro

Artemis.

En nigraj haroj — duonluno,
Severo en okuloj nigraj —
Al sorĉa somernokt' similis

Artemis. —

Ho, por rideto unusola,
Por ĉirkaŭpren' de l' sveltaj formoj
Mi riskus esti Akteono,

Nun certe je l' diar' ne kredas
Eĉ la malgrandaj liceanoj,
Kaj fabelaĵo estas ankaŭ

Artemis.

Sed unufoje mi ekkredis
Rigardi per okuloj propraj
La grandan, ĉarman kaj majestan

Artemis.

Mi en junio en arbaro
Sin vidis en kostum' moderna.
(Nun al la modo certe cedus

Artemis.)

En nigra, laŭtalia vesto,
Kun ĉapelet' sur nigraj haroj,
Jen sur ĉevalo blanka rajdis

Artemis.

Vizaĝo ŝia pala, grava,
En la okuloj — severeco,
Konvalojn portis sur la brusto

Artemis.

Kun vipo en maneto blanka
Galopis tra l' arbara ombro
Al sorĉa somernokt' simile

Artemis.

Artemis!

El la ĉeĥa: Miloš Lukáš

Tiel cerbumas la avino, feliĉa kaj kontenta ŝi rigardas de sur la deklivo la vastan mondon kaj sidas silente, en la suna brilo, kiel skarabeto.

Aha, Marjanka nun ekmemoris ŝin kaj kure venas al ŝi. La kitelo flirtas ĉirkaŭ ŝi kaj la blankaj kruroj fluge petolas, dum ŝi rapidas al la avino. Ŝi amas la avinon kaj per sia tuta koro de infano dependas de ŝi. La avino ŝin ja edukis, instruis preĝi, rakontis al ŝi fabelojn, ŝin vartis sur la brakoj, instruis nomi birdetojn kaj florojn. Ankaŭ la avino amas sian plej junan nepinon plej multe. Ŝia sulka vizaĝo de malproksime jam ridetas al ŝi kaj ŝia malplena, senkolora voĉo, kian havas la surduloj, vokas renkonte al ŝi: »Do venu, mia floreto, venu.«

Marjanka alkuris kiel vento, sidiĝis ĉe la piedoj de la avino, atente kaj longe rigardis ŝian vizaĝon kaj kvazaŭ eĉ ne sentante, ke la avino karesas ŝin kaj interplektas ŝian densan hararon, ŝi subite kaptas la avinon ĉirkaŭ la kolo, tiras ŝin al si kiel maljunan salikbranĉon kaj krias kun sia tuta forto: »Avinjo, kliniĝu, mi ion diros al vi.«

La avino volonte klinas sian grizan kapon tutproksime al la rozkoloraj vangoj de la infano kaj demandas kun gojplena rideto:

»Do, kion vi deziras diri al mi, knabinego ora?«

»Panjo tre kverelis kontraŭ vi,« subite elglitis el la infana buŝo senpere en la streĉitan oreilon de la maljunulino.

Kvazaŭ la maja suno ne brilus varme, kaj kvazaŭ ekfajfus akra frosta vento, tiel ektemis subite la maljunulino. La sendentaj makzeloj ekklakis, la okuloj ekpalpebrumis, la brakoj ĉirkaŭprenis konvulsie la

infanon, en la ŝvelinta, dika kolo gargaris dum momento malfacila spiro, kaj fine eliris tra ŝiaj lipoj:

»Ĉu vere? La panjo koleris je mi, kaj kial do?«

»Ĉar vi estas viva kaj ne volas morti. Panjo diris, ke ni ne plu bezonas vin, ke ni ĉiuj estas jam grandaj, mi mem scias jam kuradi kaj ni ne aĉetos por ni plu knabeton aŭ knabinegon, vi ne plu devos iun varti.«

Larmoj saltis en la okulojn de la avino. Ŝia harmonia humoro subite disiĝis, ŝafe blankaj nubetoj malaperis kaj nigra, pereoporta nubego grimpis sur la horizonton de ŝia animo.

»Kaj al kiu diris panjo tion?« ŝi demandas post momento kaj avide atendas.

»Al paĉjo!« elkriis la infano.

Sufoka, morta silento ekregis nun ĉirkaŭe, sed en la kaduka koro de patrino ekbolis kruda batalo.

»Paĉjo« estas ŝia filo. Kion li respondis? Kion li diris al sia edzino alvokanta morton al lia patrino? Ĉu ŝi demandu la infanon? Ne, prefere ne. Kio, se li konsentis kun la edzino? Ah, tio signifus morton — la perdon de amo de unusola filo ŝi ne povus suferi... Ŝi sentas, ke glacia mano etendas sin al ŝia koro, kaj premas ĝin tiom, ke elspiri ŝi ne povas. Ne — nenio en la mondo igos ŝin demandi, prefere ŝi volas daŭre vivi en necerteco — en muta silento... Sed ne, tio ja ne estas ebla, ke propra sango tiom fremdiĝu, tamen ŝi eldiros la demandon — ŝi demandos, okazu kio ajn, por havi certecon. Kvazaŭ sur turmentilo estas ŝia animo, la koro doloras, la kapo, la tuta korpo, ĉio — eble ŝi pliigos la doloron, sed ne estas helpo — ŝi devas demandi, eĉ se ŝi la respondon ne povus trans-

vivi... Si poste certe mortos pro doloro, tuj, tie ĉi, sur la deklivo verda ŝi mortos — sed aŭdi ŝi devas, kion la filo diris. La brakoj falis, ŝi liberigis Marjanka'n el sia ĉirkaŭprenado kaj pene, malrapide demandas:

»Muŝeto mia, diru al mi la veron: kion diris paĉjo?»

»Paĉjo?» Marjanka serĉas en sia memoro, pligante per tio la doloron de la avino, plilongigante la turmentojn, ĝis fine, per simpla voĉo, kiu ankoraŭ ne scias mensogi, ŝi klarigas al la avino:

»Paĉjo akre riproĉis panjon. Li diris: Silentu, panjo, tuj silentu! La avinjo meritas de ni la malmultan nutraĵon. Ŝi gardas la domon, kuiras la manĝojn, purigas tolaĵon; silentu, neniam plu mi aŭdu eĉ nur unu vorton kontraŭ la avinjo...»

»Infano, kara infano, ankoraŭ unu fojon, malrapide kaj klare ĉion ripetu al mi,« petas la maljunulino, forigante la kaptukon de sur sia orelo, premante la oreleon preskaŭ sur la buŝon de l'infano, malfermante sian buŝon, ŝi aŭskultas, ne — ne aŭskultas, sed preskaŭ suĉas la respondon, kiun la infano pli laŭte ol antaŭe estas elkrianta. Ŝi preskaŭ sufokiĝas, sed ne plu pro timo, sed pro ĝojo. Kapturna, ega ĝojo etendas sin en ŝia koro, en la oreloj muĝas, kvazaŭ sonoriloj ekjubilis, birdoj ekkantus, muziko ekludus. La koro

bategas, ĝoje bategas, preskaŭ volante krevi pro feliĉo, la okuloj larmas kaj la lipoj ridas. Subite kaj forte ŝi ekpremis la nepinon en siaj brakoj, premis ŝin sur sian velkan bruston kaj pasie ŝin kisas...

»Avinjo, kio okazis al vi? Kial vi ploras?« mire demandas la nepino.

»Diru al mi ankoraŭ, ĉu oni jam sonorigis por la maja anĝeluso?« anstataŭ respondi la avino redemandas.

»Guste sonoras,« respondas Marjanka.

»Do, iru jam hejmen kun la anseridoj«, ordonas ankoraŭ la avino kaj kvazaŭ junulino, rapidpaŝe ŝi iras en la kabanon. Ŝi metas sur sin nur pli bonan ĵupon kaj kun rozario en la mano ŝi rapidas al la preĝejo.

Neniu en la preĝejo preĝis hodiaŭ antaŭ la altaro de Sankta Maria pli fervore, ol la maljuna vidvino de la vojriparisto.

Ŝi preĝis por sia filo.

(Trad. *Tonĉka kaj Vuk Echtner.*)

Jindřich Simon Baar estas verkisto de Ĥodujo — regiono loĝata de kamparana popolo, la ĥodoj, antikva ĉeĥa tribo okupanta specialan lokon en historio kaj etnografio. La vivbatalo en malfavoraj cirkonstancoj naturaj kaj batalo por politika libereco (en la pasinteco) estas la temo de tiu ĉi verkisto, unu el la plej legataj nuntempe.



Svabinský:

Kunfando de animoj

Kristnaska arbeto

— Jan Vrba —

Post tre longa meditado Jirka Vaňkú fine kaptis kuragon kaj ekpaŝis al danĝera vojaĝo. Sola kaj sola, ĉar li sentis en sia infana koro, ke estas necesa iom da heroeco, por ke la afero sukcesu. Kvankam li timis eĉ nun, terure li timis, marŝetante tra la regiono, kiu estis superŝutita de alta neĝo, al la malproksima arbaro, malhele bluanta malantaŭ ebenaĵo de blankegaj kampoj, radiantaj en sunbrilo per amaseto da etaj gemoj.

Absolute li ne volis permesi, ke denove ripetigu la lastjara kaj antaŭlastjara ĉagrena historio. Nu jes, jam dufoje ne venis al ili Jesueto — li forgesis ilin, kaj nenion donacis al ili. Jirka estis ĉiam malgaja pro tio, kaj la fratineto, ankoraŭ pli malgranda ol li, ja eĉ ploris . . . Li ne estis tro certa, ĉu ili per io ne kolerigis Jesueton — ĉar la homo estas tiel malsaga, kiam li estas juna, kaj kvankam li jam vizitas la unuan klason de la popola lernejo, tamen multon li ankoraŭ ne scias . . . Tial li konfidencie, sed energie demandis la panjon.

Si ektimis iom, ekkaŭris sur malgrandan piedbenketon kaj tiris lin al si inter la genuojn. Poste ŝi diris al li, ke Jesueto tial ne haltis ĉe ili, ĉar li ne vidis ĉe la fenestro kristnaskan arbeton; li ja pensas, ke tie, kie oni ĝin ne preparas, oni ne deziras lian donacemon . . . Antaŭe paĉjo alportadis la arbeton el arbaro. Li foriris militservi — kaj ŝi ne havis tempon ĝin alporti. Ŝi devis perlabori, zorgi por ke estu io por manĝi — kaj tiel ĝi okazis . . .

La eta Jirka komprenis tion kaj sulkigis la frunton, ĉar ŝajnis al li, ke ĉion ĉi Jesueto jam delonge devus scii. Sed li kontentiĝis per la klarigo, kaj diris plu nenion.

Malrapidete pasis jaro, denove alproksimiĝis

Kristnasko, sed paĉjo ĝis nun ne revenis el la milito. Pasis la vico de la lastaj tagoj, dum kiuj la eta Jirka batalis en si pri granda decido. Li mem, pro timo, jam estus rezigninta je donacoj de Jesueto, sed li ne volis, ke la fratineto denove ploru, kiel pasintjare . . . Kaj kiam ŝi matene antaŭ li demandis la panjon, ĉu hodiaŭ venos Jesueto, li venkis la lastan timotremeton en sia simplena koro — kaj firme decidigis, ke posttagmeze li nepre ekiros en la arbaron kaj alportos arbeton, por ke la malfeliĉo ne ripetigu . . .

Baldaŭ post la tagmezo li ŝteliris el la domo kaj nun marŝetis tra alta neĝo al la arbaro. Sur la kapo li havis vilan peltan ĉapon kun orekovriloj, kunligitaj sub la mentono per galono, lia kolo estis ĉirkaŭvolvita per tuko — kaj la manoj profunde enŝovitaj en la poŝoj. Liaj piedoj frostetis kaj li tremis pro malvarmo, sed tion li ne atentis. Sur la maldekstra brako balanciĝis la manŝegilo de la paĉjo, kiun pene li elserĉis en la subtegmento el amaso da malnova formetaĵo. Li eĉ sciis, kiel granda devas esti la arbeto. Iun posttagmezon, kiam neniu estis hejme, li grimpis sur la tablon, stariĝis piedfingre kaj la brakon etendis al la plafono. Jes, ĝi povas esti ankoraŭ pli alta, ol li kapablas manetendi . . .

Li marŝis tra la neĝkovrita regiono kaj tre miris.

Ĉie estis blankaj surŝutaĵoj kaj sur la arbustoj plenpleno da neĝoflokoj. Sed kiel li miregis en la arbaro! La pintoj de l' arboj estis blankaj, de la branĉetoj pendis glacikonusoj kaj la trunkoj estis sukerigitaj de prujno. Li retenis la spiron kaj ŝajnis al li, kvazaŭ li marŝus en fabelo. La profunda kaj majesta silento, kiu ĉie etendiĝis, lin tuŝis nevideble kaj konsternis . . .

Fine li atingis junan arbetaron. Estis tie senfina



Max Svabinský:

Aŭgusta tagmezo

Sur la pont' d' Avignon

— Karel Toman —

Sur Avignona ponto
oni dancas,
pri Avignona ponto
oni kantas,
sed kanton nur mallongan,
mallongan eĉ danceton,
nur akvo zumas eterne.

Sur Avignona ponto
staris papo,
trans Avignona ponto
marŝis jaroj,
hodiaŭ sur ĝi adiaŭas
Provencon ĉeĉa poeto.
Nur akvo zumas eterne.

Sur Avignona ponto
— ho adiaŭ —
sur Avignona ponto
au revoir!
arboj cipresaj, o'ivoj
lar.do vi sorĉa kaj d'leĉa.
Nur akvo zumas eterne.

Sur Avignona ponto,
dankon, lando,
sur Avignona ponto
mi nun ŝmas
revante, ke sur ĝi paŝad's
Karolo Kvira, reĝo ĉeĉa.
Nur akvo zumas eterne.

Sur Avignona ponto
oni dancas
pri Avignona ponto
oni kantas
kvazaŭ sur ponto en Praha.
Kanto tre longa, tre longa.
Kaj akvo zumas eterne.

(«Centjara kalendaro», 1926.)

El la ĉeĉa: **Dr Stan. Kamaryl**

aro da arbetoj kaj ĉiuj estis belege superŝutilaj de neĝo. Li elektadis longe, kelkajn arbetojn li rigarde ankraesis — ĝis fine unu el ili plej multe ekplaĉis al li. Etendante alten la brakon, li stariĝis piedfingre kaj kontente ekspiris. La arbedo taŭgis ankaŭ laŭmezure...

Li genufleksis en la neĝon al sia elektito, alpremis segilon al la trunketo kaj komencis segi. Sed la arbedo havis tre mortrezistan vivon. Jirka estis jam tro laca kaj ŝvitanta, liaj manoj pro neĝo ruliĝis kiel kankro — kaj la arbedo ankoraŭ ne estis cedanta... Nur post ankoraŭ longa penado ĝi ruliĝis sur la vojeto.

Sed en la sama momento ekkrakitis la neĝo malantaŭ Jirka, eksonis insulto, kaj iu elŝiris la segilon el lia mano. Li ektimis, saltleviĝis kaj sin turnis — kaj vidis, ke malantaŭ li staras homo kun nigra ĉapo, kun flava, ronda metalplato sur la brusto kaj kun pafilo sur la ŝultro. La segilo ekkrakis en liaj manoj — kaj ĝi jam flugis en alta arko en arbustdensaĵon, rompita en du pecojn. Poste Jirka ricevis vangofrapon tiel, ke li falis en la neĝon. Kaj kiam li rapide levigis kaj kuris al la urbo, ankoraŭ longe flugis post li insultoj.

Dentklakante pro timo kaj malvarmo fine li kuratingis la urbon. Dumvoje li nekalkuleble multfoje faletis kaj falis en neĝblovaĵojn, multegfoje li glitis sur glacio kaj falante, dolorige li batvundiĝis. Sed li atentis nenion; denove li levigis kaj kuris kaj kuris, ĉar lia timo estis pli granda ol la doloroj. Nur inter la domoj de la urbo li trankviligis. En la vizaĝo li estis malpurigita, ĉar sur ĝi li disŝmiris ĉiujn larmojn; sed en la urbo li ne ploris plu...

Kiam li venis hejmen, jam krepuskiĝis kaj la panjo jam avide serĉis lin. Ŝi terurigis pro lia stranga aspekto; sed li honeste kaj fidele rakontis pri ĉio kaj ne povis reteni sin de esploro. De ŝi li eksciis, ke la homo, kiu lin forpelis el la arbaro, estas arbargardisto kaj ke li loĝas en la lasta dometo de la antaŭurbo flanke de la arbaro. Dum la vespermanĝo li ne povis ne demandi — kaj tiam li eksciis, ke la arbargardisto havas malgrandan knabineton...

Vespermanginte, la panjo lavis la vazojn kaj Jirka ekstaris ĉe la fenestro kaj ekrigardis sur la ĉielon. Brulis tie steletoj kaj ie, malantaŭ la tegmento, brilis la luno. Sed Jirka atendis. Jam delonge li sciis, ke Jesueto alveturas de la ĉielo teren sur argenta nubeto. Kaj tiun nubeton li atendis...

Fine li ĝisatendis. La nubeto elnaĝis super la tegmentosupro de la kontraŭa garbejo. Jirka tuj sciis,

ke ĝi estas la ĝusta, ĉar ĝi brilis argente kaj ĝiaj randoj estis disigantaj, kvazaŭ el punktoj — ĝi aspektis same tiel, kiel la blankaj kusenoj, kiuj estas en la preĝejo ambaŭflanke sur la altaro.

Apenaŭ la nubeto aperis, Jirka sin krucsignis rapide kaj jam preĝis kun la tuta ardo kiun kapablis lia infana koro. «Jesueto» — li diris, premante la kunplektitajn manojn sur la bruston — «mi petas vin, Jesueto, al la knabineto de la arbargardisto donaceniĝon, tute nenion, ĉar ŝia paĉjo forprenis de mi la arbedeton!» — Kaj denove sin krucsignante, li foriris de la fenestro.

Sed ne atinginte ankoraŭ la mezon de la ĉambro, li subite haltis kaj rapide revenis al la fenestro. Denove li krucsignis sin, ekrigardis la nubeton, kiu preskaŭ jam estis perdiĝanta en la alto kaj rapide ekpetis: «Jesueto, atendu, mi petas! Ili loĝas ĉe la fino de la antaŭurbo, flanke de la arbaro, kaj ŝia paĉjo havas nigran ĉapon, barbon kaj ruĝan nazon — kaj sur la jako li portas flavan, rondan metalplaton — kaj sur ŝultro rustigintan pafilon!» — — —

Poste, kiam la panjo metis lin en la liteton por dormo, li vidis, ke ŝi havas larmoplenajn okulojn. Li ekpensis, ke verŝajne ŝi aŭdis lin preĝi ĉe la fenestro. Iel li ekhontis kaj, por sin trankviligi, li diris virece kaj konvinke: «Nu, ne ploru, panjo, mi ne plu pensas pri tio! Mi ja iris tien nur pro Mařenka, por ke ŝi ne ploru kiel lastjare, kiam Jesueto nenion donacis al mi...»

Tiel li parolis kaj kontente ekdormis. — —

Sed kia surprizo estis matene por li! Jesueto estis ĉijare multe pli malavara ol lastfoje. Ne atentante, ke ili ne havas arbedeton, li donacis al ili laŭ la maniero de sankta Nikolao sur la teleretoj ĉe la fenestro. Estis tie kaŝtanoj, figoj, pomoj, estis tie eĉ sukeraĵo! Gojo plenigis la ĉambron kaj Jirka, de ĝi kaptita, eĉ ne rimarkis, ke la panjo malsanktigis la Kristnaskan feston kaj kudris diligente de la mateno ĝis la vespero...

Sed la postan tagon kaptis lin stranga malĝojo. Vekiĝis en li la konscienco. Li konsciigis, ke al la filineto de la arbaristo Jesueto nenion donacis, ĉar li plendis kontraŭ ŝia patro kaj ŝi nun certe ploras... Meditante tiel, li sidis horeton en anguleto, ĝis fine li malfacile decidiĝis. En la poŝojn de sia jako li metis kelkajn pecojn de ĉio el la telereto — kaj eliris el la domo.

Li iris al la arbargardisto...

Sur la korto de ilia dometo li subite renkontiĝis kun la gardisto de arbaroj. Ili rekonis unu la alian,

kaj je lia demando Jírka honeste diris, kial li venas: Kiel li plendis al Jesueto kaj kiel li nun kompatas la knabinecon, kiu pune ne ricevis donacojn pro tio, ke ŝia paĉjo forprenis de li la arbeton. La arbargardisto ekridis kaj kondukis lin en ĉambron.

Jírka ne povis kredi al siaj okuloj. En la ĉambro estis arbo -- sed arbo de planko ĝis plafono kaj plenplena de sukeraĵoj kaj frandaĵoj. Ĉiuj tie demandis lin pri paĉjo, panjo, fratineco -- kaj kiam li ĉion respondis, ili plenŝtopis liajn poŝojn per amaso da objektoj kaj aldonis ankoraŭ grandan paperan saketon plenplenan de dolĉa bonaĵo. Poste akompanis lin la arbargardisto ĝis la pordo kaj senĉese li ridis...

Sed Jírka ne emis ridi. Jesueto -- diroj de la panjo -- nubeto -- iliaj malgrandaj teleretoj kaj tia arbego ĉe la arbargardisto -- ĉio ĉi dancis en lia kapo. Certe io ne estis tie ĉi en ordo.

Kaj tiun tagon, antaŭ ol li venis hejmen, naskiĝis en lia koro kruela malkonfido, ekskuanta ĉion, kio ĝis nun estis certa kaj senduba...

Jes, nepre io ne estis tie ĉi en ordo. Jírka sentis doloron pro la homa maljusteco, doloris lin la dia maljusteco, doloris lin ĉio. Hejme li kaŝis sin en anguleton malantaŭ la lito, por ke li povu ĉion bone pripensi. Pro la alportitaj frandaĵoj li tute ne ĝojis. Kvankam li rigardis kontente, kiel la fratineco ludetas kun ili, kiel ŝi ĝojas pro ili kaj kiel ŝi frandas, li mem ne prenis eĉ unu peceton.

Li nubigiĝis, kelkfoje li faris ploreman mienon, ĉar lia ĉagreno ŝanĝiĝadis je korpa doloro. Ĝi komenĉiĝis, kvazaŭ oni premus lian koron, kaj poste stranga doloro etendiĝis tra la brusto. Antaŭvespere li jam ne

povis ne paroli pri tio al sia panjo.

Ŝi ektimis, karesis lian frunton kaj rapide enlitigis lin, aspektante tre zorgema. Ŝi eĉ insistis meti sur lian frunton vinagran kompreson. Li konsentis pri tio, sed li tamen deklaris, ke nenio helpos -- ke Jesueto devus esti pli justa...


La postan tagon matene estis ankoraŭ pli malbone. La panjo venigis sinjoron kun okulvitroj, kiu skribis malgrandan folieton, por kiu la panjo post momento alportis boteleton da flava kaj dolĉa akveto. Ŝi alportis por li ankaŭ grandan oranĝon kaj la tutan ŝi donis al li, kiam li promesis, ke li brave kaj frankvile kuŝos. Li formangiĝis peceton, sed ĝi ne ŝajnis al li bongusta. La doloro estis ĉiam pli kaj pli granda. Denove li enpensiĝis kaj vespere li diris al la panjo, ke la doloroj estas netolereblaj -- kaj ke li iros por plendi kontraŭ Jesueto en la ĉielon.

La tutan nokton li kriis dormante... Ke Jesueto ne estas bona, ĉar al la knabineco donacis grandan arbon kaj al li nur malgrandan telereton. Ke la arbargardisto forprenis de li la arbeton kaj ridis ankoraŭ. Ke li volas nek oranĝojn, nek sukeraĵojn...

Kaj efektive! La duan tagon antaŭ tagmezo foriris lia animeto... Jírka foriris en la ĉielon por aranĝi sian aferon kun Jesueto...

La panjo ploris kaj al la eta Maŝenka oni diris, ke Jírka mortis. -- Sed se ŝi nur kredus tion! -- Ŝi formangiĝis la restintan duonon de la oranĝo, formangiĝis la sukeraĵon -- kaj estis tre fiera pri la trato Jírka, kiu estis tiel kuraĝa, ke li sendis sian animon en la ĉielon, por ke ĝi tie ĉe Dio plendu kontraŭ Jesueto.

El »Libro el la naturo« tradukis B. Sklenĉková.



Preisler:

Adamo kaj Eva

La sekreto de la reĝino

— Edvard Valenta —

Kiel konduktoro de tramo mi travivis multe da etaj aventuroj. Iufoje estis arestita en mia vagono, ĝuste kiam ni ekveturis antaŭ la kafejo Kurtl, miliona defraudinto Alfred Baumann, kiu sin defendis kun revolvero en la mano. Mi estis en tiu afero ankaŭ vokita kiel atestanto kaj mia nomo tiam eĉ estis en ĵurnaloj. Aŭ alifoje veturis kun ni dika sinjoro en pelto kaj ne havis transirbileton, sed tamen li asertis, ke lia bileto estas ĝusta. Mi diris al li, ke li aŭ aĉetu novan bileton aŭ afable eliru, sed li ekscitiĝis kaj dufoje min forte batis en la vizaĝon. Li ricevis por tio ĉe la distrikta tribunalo kvardek horojn. Skudil estis lia nomo. Kaj iam, apud la jutfabrika de Kratochvíl, ni transveturis maljunan barbulon. Mi memoras, ke, kiam kamarado Cekl subite ekbremsis, mi flugis inerte tra l' malfermita pordo ĝis sur la platformon kaj tuj mi desaltis el la vagono. Mi vidis la maljunan viron, lia rompita kapo kuŝis sur bruna brakpape-rujo. La bedaŭrinda Cekl ricevis pro tiu malfeliĉo tri monatojn kaj estis maldungita, kvankam ĉe la esplora juĝisto mi respondadis favore por li laŭ mia tuta povo.

Sed mi pensas, ke la plej mirinda aventuro, kiun mi travivis kiel konduktoro, okazis la novembran sabaton sur la deksepa linio. Mi ne veturadis ofte sur tiu linio kaj pro tio mi iom dediĉis atenton al la homoj, kiuj tie eniradis kaj ree malaperadis. Estis ĉirkaŭ la sesa vespere, ni veturis el la finstacio ĉe la arsenalo, la vagono estis apenaŭ duonplena. Kiam ĉe la haltejo apud la kazerne de la 6-a infanteria regimento mi ekfajfis por veturo kaj eniris la vagonon, mi rimarkis, ke en la angulo ĉe la antaŭa platformo sidas junulino, sinjorino, kies admirinda aspekto min tuj en la unua momento iom konfuzis. Mi ne kredas la babiladon pri amo je la unua ekvido, precipe ne pri la mia, konduktora, al tiu ĉi sinjorino, sed marŝante al ŝi per balancantaj paŝoj, alkiuj mi alkutimiĝis en mia profesio, mi sentis profundan malĝojon, kia okupas la ordinaran, simplan homon ĉiam, kiam li haltas antaŭ io, kontraŭ kio li estas malgranda kaj mizera kaj je kio li ne rajtas pensi. Mi sciis, ke mi ne rajtas revii pri tiu virino alie ol tramvoja konduktoro, kiu iam vendis al ŝi bileton. Kaj efektive, kiam ŝi



Jaroslav
Čermák:

Rabo de
montenegra
virino

petis bileton al la finstacio en la parko apud la areno, ŝi prezentis al mi monon tiel kiel oni ĝin ŝovas en sen-vivan aŭtomaton. Komprenoble, mi nenion ja signifis por ŝi. Mi estis numero 437, kiu al ŝi vendis bileton por krono kvindek. Sed malgraŭ tio mi bedaŭris, ke hodiaŭ mi ne razis min.

Ni estis veturantaj el periferio en la urbon. Apud la kino Vitagraph envagoniĝis juna viro en griza malkara vintrosurtuto kaj restis sur la antaŭa platformo.

— Al la stacidomo! Al la stacidomo! Li diris rapide, poste transmetis sian paperujon de sub unu brako sub la alian, prenis el sia poŝo etan horlibron, ŝovis en ĝin la nazon, foliumis, balancis la kapon, elprenis la horloĝon kaj ekmenis timpreme. Certe li tre rapidis. Mi jam scias rekoni tiajn homojn!

Sed post kelkaj haltejoj mi rimarkis, ke la homo malantaŭ la vitro grandokule rigardas tiun sinjorinon. Tion mi konas. Kiam apud la teatro levigis de la seĝo kontraŭ ŝi ia dikulo, la senpacienculo sur la platformo iris internen, sidigis kaj komencis esplori la reklamajn gluafişetojn sur la vagonmuroj, kvazaŭ ne estus klare al ni ĉiuj, ke dum tio li rigardas al sia kontraŭulo kaj ke li estas tute konfuzita. Li eĉ surmetis la gantojn, rigarde glitis al siaj botoj kaj diskrete forigis blankan makulon sube sur la surtuto, per kiu li verŝajne ie ektuŝis muron.

Mi ne koleris tiun homon, kvankam iam similaj aferoj jam naŭzis min, estante ja tro oftaj kaj ĉiam egalaj. Ne pro tio mi diras, ke li donis al mi tridek helerojn trinkmone. Ne pro tio. Sed li aspektis tiel agreble, lia rigardo estis tiel sincera kaj lia nekaŝata admiro tiel infane naiva, ke mi tuj deziris lian sukceson; mi diris al mi, nun ŝi tamen povus ekrideti al li! Sed ŝi sidis kontraŭ li en sia griza pelto, kun flavaj sukcejoj ĉirkaŭ la kolo, kaj manoj grizgantaj, krucigitaj sur la genuoj super malgranda mansaketo. Ŝi ne elŝovis la genuojn en silkaj ŝtrumpoj, kiel iuj tion faras. Regino ne povis sidi pli bone dum festa revuo sur tribunon laŭre girlandita kaj ombrita de flagrantaj flagoj. Tion mi iam legis kaj nun ekrememoris. Mi absolvis kvar klasojn de realernejo kaj diligente mi prunteprenas librojn el la biblioteko por personaro de la urba tramo. Tiel mi legas pri diversaj aferoj kaj malsaĝulo mi ne estas. Tiu ĉi certe estis virino, pri kiu povus esti verkataj rakontoj kaj eĉ romanoj, tion mi ekkonis tuj.

Sed nun mi ne havis tempon por atenti tiujn homojn, la tramo veturis en la urbo kaj la vagono estis plena. Ĉe ĉi haltejo antaŭ la stacidomo mi vidis, ke la viro stariĝis, ektusetis kaj ree sidigis. Post kelke da haltejoj pliaj la vagono iom malpleniĝis, ĉar multe da laboristoj transiris al la linio sesa iranta al la laborista kolonio. Nur nun mi vidis, ke la viro ne eliris, sidas kontraŭ ŝi kaj rigardas.

La lumoj de neonreklamoj ĉesis fluze pasi preter niaj fenestroj, la klaksonoj de aŭtomobiloj maloftiĝis, ni veturis preter la stadionon kaj tra la kaŝtanarba aleo sub la Prezidenta Monteto, sursemita de vilaoj riĉulaj. Tie ĉi jam estis preskaŭ senhome. Kaj fine mi havis en la vagono ses-sep homojn, mi stariĝis sur la malantaŭa platformo kaj faris noton pri venditaĵoj biletoj. Kaj ree mi observis tiujn du. Subite min frapis io neordinara, neatendita, ia stranga malkvieto de la virino. Mi eĉ ne povis ne rimarki, ke ŝi kelkfoje rigardis lin kaj eltenis lian ekstazan rigardon, kvazaŭ komorenante. Kaj aŭfoje ŝi ekrigardis lin elsub sia ĉapelo embarase kaj klinis tuj la kapon, ĉar lia persista rigardo, peta, malfiera, malaŭdaca kaj senmensoga, ne cedis kaj konfuzis ŝin. Tiam amindumanton oni ne vidas ofte. La bedaŭrinda birdo estis tiel ravita, ke li ne kapablis sin regi. Nur nun mi ekpensis, ke li havis malgrandan bileton al la stacidomo kaj ke li jam daŭrigas proksimume dekkvin haltejojn.

— Pardonu, ĝis kie validas via bileto, sinjoro? Bouvolu montri al mi vian bileton, sinjoro!

— Li skuŝtis, palpis tra la poŝoj, poste deprenis la gantojn kaj palpis denove, montris al mi la horloĝon, sed kiam mi kapneis, li ruĝiĝis kaj ekridetis, fine li elprenis la bileton kaj malfaldis ĝin per tremantaj fingroj.



Josef Mānes:

Josefina

— Vi havas, permesu, bileton sole ĝis la stacidomo, bonvolu aĉeti novan bileton, mi petas! mi diris al li.

— Jes, jes, li elbalbutis kaj elprenis monon kiel en sonĝo.

Li dronas en tio ĝisorele, mi ekpensis. Nu bone, sed venas jam la antaŭlasta halto. Tiuj du rigardas unu la alian. Liaj okuloj pendas sur ŝia vizaĝo, sur ŝia sino, sur ŝiaj kruroj. Kvazaŭ li ne povus sin satigi. Kaj ŝi ne povas ne vidi lian ravitecon. Ŝi vidas, ke li estas sorĉita, ĉar ŝi, si konscias, ke ŝi ne povas lin koleri, ĉar li ne estas ordinara abomena danda amindumisto. Ho, mi havas bonajn okulojn por tiaj aferoj! Sia rigardo estas tiel mola kaj kvazaŭ iom petanta lin, ke li ne faru tion, kvazaŭ ŝi estus en granda embaraso.

Ŝi ekmoviĝis maltrankvile, ni jam estis inter vagonoj de la lasta haltejo. Subite tuta ŝi kaŭrigis en sia angulo, mordetis la lipojn, zorgomiene ekrigardis al ĉiuj direktoj kaj subite ekrigardis lin, sed konfuzo kaj senkonsile. Ŝi certe diras al si: nun ni elvagoniĝos kaj li aliĝos al mi. Pardonu, fraŭlino, ĉu vi permesos akompani vin? Tion ni konas, ankaŭ ni faris tiel! Sia rigardo diras, ke ŝi tion ne deziras. Kaj tamen, mi volus tion ĵuri, ŝi rigardas la junulon per okuloj tiel reĝece komprenemaj, estas en tio granda kompreno kaj pardono. Ne, ne, tion mi ne povis kompreni.

— Areno, mi vokas. — Ĉiuj eliru!

La aventuro finiĝas. Eble ĝi komenciĝos nun, certe jes. Sed el tio mi jam nenion havos. Mi deziris al tiu homo ĉion bonan, ĉion plej bonan. Tiu senenergia, petu rifuzo ŝia, tio estis komprenoble la lasta resto de la bona eduko, ŝi estas filino el iu vilao super la rivero. Sed tio cedos, tio cedos. La vojo tra la parko, preter la areno, plue preter la akvorezervujoj kaj Lunaparko, kaj de la akciza linio estas ankoraŭ bonaj dek minutoj, ho jes, tio sufiĉos plene! Ĉe lia pasio! Tiu bonega junulo meritas la bonan rezulton! Ĉu li ne lasis forpasi la vagonaron pro hazarda renkonto? Je ĉiuj diabloj, nun kiam ĝi plene ordiĝis en mia kapo kaj kiam ĝi komencas plaĉi al mi, estas fino.

Mi volvis al mi cigaredon kaj fumis promenante sur la flava pavimo de la perono. Estis jam preskaŭ la sepa horo, dise venadis homoj, kelke da ili envagoniĝis.

Kaj jen subite mi vidis, ke ankoraŭ ne estas la fino. La persekutanto promenas apud la vagono tien kaj reen, konsternita, kaj en la vagono sidas la persekutato plue en sia angulo. Ŝi ne elvagoniĝis.

Mi ensaltis en la vagonon.

— Ni estas en la finstacio, fraŭlino!
 Si ekrigardis min per trankvila, reĝina, sincera okulo.
 — Mi ne sentas min bone, ŝi diris.
 Mi klinis min. Mi rapidos por akvo en la oficejon de la administracio, aŭ se la fraŭlino loĝas malproksime, mi telefonos por takcio.

Ne, ne, ŝi dankas. Si veturos reen! Si preferas ankoraŭ iom veturi.

Denove mi klinis min. Do tamen ŝi nepre ne deziras esti akompanata. Mi ekrigardis la horloĝon. En tiu momento mi subite sentis, ke mi mem estas iom ebria per tiu virino. Mi donis signalon por forveturi, la akra sono de fajfilo sin portis al la malluma senfolia parko antaŭ la areno. La homo sur la perono saltis en la vagonon kaj sidigis peze en la angulo kontraŭ ŝi. La aventuro komenciĝis denove. Ili ambaŭ prenis grandan bileton unulinian.

Homoj veturantaj en teatrojn kaj kinojn plenigis en la urbo la vagonon, la lumreklamoj ree fandigis kun la penetrantaj tonoj de klaksonoj, denove ni interŝanĝis homojn apud la stacidomo kaj la okan fojon ni troviĝas inter la konstruaĵoj de forte lumigitaj vagonejoj apud la arsenalo.

Mi timis, ke mi faros ian sensecaĵon, tiel ekscitita mi estis la tutan vojon. Ĉi tie jam estis nur nemulte da homoj kaj tiuj du sidas kaj sidas kontraŭ si. Si komencis aspekti malespere. Si petis lin per okuloj, ke li lasu tion. Tio estis pli klara ol se ŝi estus pete plektinta la manojn. Sed en tiu rigardo estis ĉiam kaj ĉiam samtempe iom pli multe. Si diradis al li, ke ŝi havas nenion kontraŭ li, ke ŝi estas kortuŝita, ke ŝi lin ŝatas. Kaj tion ĉi mi ekkonis, mi, kiu povis dum mia laboro sole de tempo al tempo alstrabi al la stranga duo! Kaj kiu scias ĉion, kion ŝi tiel parolis al li, kiam mi ne rigardis!

Mi proponis min en la fina stacio apud la arsenalo, ke mi alportos refreŝigajn gutojn — tuj malantaŭ la angulo estas apoteko. Si dankis kaj malakceptis. Ŝia gardanto promenis sur la perono. Diversaj pensoj venis al mi en tiuj liberaj momentoj; eble li estas sekreta policano kaj li persekutas aventuristinojn de eŭropa formato. Sed tiam li povus aresti sin tuj. Estas do sensecaĵo.

Mi fajfas, la viro ensaltas kaj peze sin lokas en la angulon, mi veturas reen. Apud la infanteria kazerno eniras revizoro. Estas Brejcha, loĝanta en Strato de Paco kiel mi. Mi sentas, ke mi ion fuŝis en la registro de venditaĵoj biletoj, mi faris ja ĉion kiel en sonĝo. Li frapetas je ĝi per kraĵono, inspektas la biletojn, la biletojn de la pasaĝeroj, revenas al mi kaj diras flustre:

— Kaj tondigu viajn harojn malantaŭe sur la kolo kaj malantaŭ la oreloj. Kaj razu vin ĉiutage!

— Jes, jes, mi respondas rapide kaj estas dankema al li, ke li tion diris tiel flustre, ke neniu povis ĝin aŭdi.

Estas malfrue. La neonlampoj estingiĝis kaj la stratoj senhomiĝis.

Depost la stadiono ni estas tri en la vagono, ili du kaj mi. Si ekrigardas kelkfoje la horloĝeton kaj ĉiam eklimiĝo skuis ŝiajn lipojn. Kompreneble, virinoj kiuj iras je la sepa al vespermangxo, povas havi sufiĉe da timo post la naŭa, se ili ne estas jam hejme. Mi rimarkas, ke subite ŝi rigardas lin kun tia terura angoro, ke embarasite li stariĝis kaj konfuzite li balanciĝis al la malantaŭa platformo, tie sin apogis, plue rigardis, deprenis la ĉapelon, frotis al si la frunton, ree surmetis la ĉapelon kaj ektusis en eksterordinara ekscitiĝo. Tiam mi vidas, ke la fraŭlino, subite en ia senespera decidiĝo, mansignas al mi. Mi forlasas la viron sur la platformo kaj staras antaŭ ŝi.

— Vi bonvolas?

— Diru, mi petas, al la sinjoro, ke li foriru. Ke li foriru! Diru, mi petas, diru, ke li estu tiel afabla kaj foriru! Ke li estu tiel afabla kaj ke li foriru!

— Volonte, mi diris, kaj salutis ĉape. Mi foriras al li kaj flustras tion al li en la oreleon. Tuta li kvazaŭ kaŭriĝis en sin kaj paliĝis.

— Ĉu tion ŝi diris? li flustris. — Kiel ŝi tion diris?

— Si diris, ripetas mi, — ŝi diris, ke vi estu tiel

La vivo

— Jaroslav Drcĥlický —

Ĝin de l' dioj prenu vi nur donace,
 Ne fidante, ke ĝi promeso estas
 Pri plezuroj, ĝuoj; neniam ili
 Iĝos realaj.

Ne pretendu ĝojon, eĉ ne momentan,
 Nek el polvo penu al steloj flugi,
 Sentoj de feliĉo ja al vi fremdaj
 Restos por ĉiam.

Kiel ĵus stampitan moneron brilan
 Prenu vi la vivon, laŭ signo stranga
 Kaj mistera teksto, so'votaj eble
 Iam de Sfinkso.

La simbo! kaj skribo enigmaj restos
 Eble ĝis la fin' de migrado via.
 Kies kulp'? Ne vi la moneron stampis,
 Ĝin vi ricevis.

Kiel ĝin redoni? Por la respondo
 Nur la temp' liberos al vi ŝlosilon;
 Zorgu ĝin laŭ eblo konservi brila,
 Kiel komence.

Vian ĉenu volon! La koron ŝtonu!
 Skurĝu korpon vian ĝis senkarniĝo!
 Dubu, ĉu l' enigma eĉ super tomo
 Solvon atingos.

El la ĉeĥa: Miloš Lukáš

afabla kaj ke vi foriru. Kelkfoje ŝi ripetis tion.

— Jes, vere, li balbutis konfuzite — tiel ŝi diris tion, diru al ŝi afable, ke ŝi pardonu, ke mi tuj foriros, ŝi pardonu; diru al ŝi, ke ŝi senkulpigu min, ke mi estis tia maldelikatulo.

— Volonte, diris mi.

Li min kaptis je ŝultro, apenaŭ mi ekiris kaj trenis min reen. Mi vidas, ke lia viktimo rigardas al mi.

— Diru tion alie. Petu, ke ŝi tuj diru al vi, ĉu ŝi pardonis min. Mi elvagoniĝos tuj.

Mi iris, iom min klinis al ŝi kaj flustris tion al ŝi. Si fermis la okulojn, apogis sin peze kaj dankis al mi. Mi pensis, ke ŝi svenos. Sed ŝi refortiĝis. Mi diru al li, ke ŝi neniom koleras. Eĉ ne iomete. Sed ke li foriru.

Mi tion diras al li. Mi rifuzas la trinkmonon.

Ni haltas en la antaŭlasta haltejo. La viro elvagoniĝis rapide kaj staras en la densa mallumo de la kaŝtanealo, izole sola homo en la vasta regiono de tiu senhoma kvartalo. Mi fajfas kaj ni ekveturas. Kaj tiam, mi tion ĵuras, la virino sin turnas subite al la fenestro kaj rigardas en la mallumon. Ŝi deprenas rapide ganton, premas fingrojn al siaj lipoj kaj metas ilin firme al la fenestro.

Ĉu kison ŝi sendis al li?

Si vokas min. Ion ŝi diras al mi, ektuŝas mian manon. Superfluas min sento de silenta feliĉego kaj dankemo. Nur nun mi sentas, ke ŝi donas al mi banknoton. Mi malakceptas la monon tre ĝentile kaj profunde salutas. Mi revenas al la malantaŭa platformo. Ni estas ĉi tie solaj. Mi registras la venditaĵajn biletojn. Ne, ion tiam mi ne povas kompreni, ne, tion mi absolute ne komprenas. Dum tri horoj daŭris tiu ĉi frenezajo, por nenio. Mi sentis bedaŭron pri tiu frenezulo, kiu staris kiel kolono, tie sub la kaŝtanoj. Si estus nenion perdinta, ŝi reĝino, se ŝi estus lasinta al li iom da ebleco, la kelkajn paŝojn de la stacio al la vilao —

Kaj ree ni veturis la arkon inter la vagonejoj de la lasta stacio apud la areno. La vagonoj haltis kaj la reĝino stariĝis per fiera, majesta movo, elvagoniĝis kaj estis foriranta, tute sola. Kaj en tiu momento fariĝis videbla la sekreto de la reĝino.

Si estis lama.

El la ĉeĥa: Rud. Hromada.

T. G. Masaryk

— Emil Ludwig —

Amiko de homaro kaj Eŭropano: tie mi nomus la prezidanton Masaryk, se ambaŭ karakterizoj ne havus preskaŭ la saman sencon. Ĉar, kiel hodiaŭ sin povus nomi amiko de homaro tiu, kiu kredus je hegemonio de sia nacio, de siaj raso aŭ klaso, anstataŭ je Eŭropo; kaj ĉu Eŭropano, kiu en ĉiuj sociaj problemoj ne sentus pacigeme?

La prezidanto ĝisvivis en sia maljuneco la maloftan feliĉon, ke li vidas, kiel la revoj kaj ideoj fariĝas faktoj kaj ke li kulminaciigas evoluon de pensulo al ŝtatesto kaj reen de ŝtatesto al pensulo. Ĝi estas samtempe sorto kaj merito, ĉar la evoluo donis al li liberecon kaj necesecon, ke li — dum pluraj jardekoj dezirinta, verkinta kaj predikinta pri maniero, kiel oni devus en certa parto de Eŭropo agi ŝtatsaĝe — mem tiel agu; li faris tion kaj li venkis.

Sed li ne faris tion kiel diktatoro, kaj en tio kuŝas

lia forto, kiu povas utili kiel modelo. Mi vidas en Masaryk la solan ŝtateston eŭropan, kiu en tiu ĉi epoko ne difektis la demokratiajn agordojn, sed kondukis sian melodion trans ĉi tiu spaco.

Macdonald, kies portreton mi vidis sur la skribotablo de Masaryk, provas ion similan, sed li ne havas la feliĉon de la komenco, sed nur la feliĉon de la tradicio kaj ĉi tio ne estas tro favora por lia penado.


Kiam tiaj evolucianoj ekprenas la povon, ĉio okazas pli mallaŭte kaj pli malrapide, sed pro tio pli ĝenerale kaj pli daŭre ol dum supreniro de tiuj revoluciaj karakteroj, kies energio facile ŝanĝiĝas en aŭtokration, kaj kiuj eble nur tiel povas atingi siajn ŝtatajn celojn. Pater Patriae*) povas ja esti nomata nur pensulo, ne soldato; soldato devus esti tre maljuna kaj matura, aŭ li devus esti belega escepto kiel Washington. Popola deveno donos al li por tio pli da kapabloj, ol aneco al privilegiita klaso, kaj ke hodiaŭ en ĉiuj landoj de la tuta mondo, ankaŭ en la malnovaj, regas burĝoj, en multaj eĉ filoj de laboristoj, estas fakto same signifoplena, kiel la transformiĝo de la lastaj kvar monarĥioj en dek ses respublikojn.

Inter ĉiuj mi vidas Masaryk starantan sur ŝtupo morale plej alta: li estas vera popolgvidanto laŭ tipo de malnovaj amerikaj prezidantoj, kaj ne estas hazardo, ke li estimas kaj studis ilin. Kun Lincoln li havas la saman popoldevenon, bonhumoron kaj kuragecon, fortikan, longan korpon, moderecon, homan saĝon kaj bonecon; jes, oni oni ankaŭ povas pri li diri, ke li helpis gvidi civitanan militon kaj ke li venkis ĝin. Sed poste la sorto gardis lin antaŭ kugloj de liaj malamikoj kaj permesis al li fariĝi reganto de tio, kion li prirevis kaj kion li poste militakiris. Ni rajtas lin kompari ankaŭ kun Marcus Aurelius, kiu subigis la povon al la spirito, ĉar li estis unuavice filozofa kaj nur poste regnestro. »Agi estas facile, pensi estas malfacile, agi laŭ pripensio estas maloportune.« Ĉi tiuj vortoj el la lernatesto de Wilhelm Meister enhavas la spiritajn aventurojn de Masaryk.

El miaj germanaj samnacionoj, kiuj estis enigataj en lian ŝtaton, multaj certe estas liaj kontraŭuloj. Sed nia tasko ne estas taksati ŝtateston laŭ avantaĝoj, kiujn li havigas ĝuste al ni; alie ni germanoj devus taksati Nitti pli alte ol Mussolini, Caillaux pli alte ol Clemenceau, Casement pli alte ol Grey kaj Czernin pli alte ol Masaryk; ĉar ĉi tiuj malprofitigis la germanojn, dum tiuj volis utili al ili.

En la tempo, kiu iom post iom denove instruas kredi je la venko de l' spirito super la forto, ni havas la devon montri je viroj, kiuj estas spirite ligitaj kun la jarcento, kvankam ilia efikado restas nekompleta. Kiam mi demandis al Bernard Shaw, kiu povus fariĝi prezidanto de Unuiĝintaj Ŝtatoj Eŭropaj, li rediris: Masaryk.

Tradukis O. Sklenka.



Jan Stursa:

Prezidanto Masaryk

*) Patro de la Patrujo.

LA KUDRILLO

Karel Čapek

»Kun tribunaloj mi kontaktis neniam,« ekparolis sinjoro Kestelecký, »sed mi diras al vi, ke al mi plaĉas ĝuste la granda akurateco kaj la formalajoj kaj ceremonioj, kiujn la juĝistoj kutimas fari, eĉ se temas pri nura bagatelo. El tio ja rezultas certa fido al la justeco. Se la justeco havas pesilon, ĝi do estu pesilo apotekista, kaj se ĝi jam tenas glavon, estu do la glavo akra kiel razilo. Mi rememoras unu okazintaĵon el nia strato.

Iu pordistino, ŝia nomo estas Mašek, aĉetis en butikoj bulkojn, kaj maĉante unu bulkon ŝi eksentas pikdoloron en la palato; ŝi do palpas en la buŝo kaj elprenas kudrilon, kiu en la palato enpikiĝis. Nur post momento ŝi ektimis: Jesu-Kristo, mi povis ja la kudrilon englutii, kaj ĝi trapikus la stomakon! Jen danĝero kontraŭ mia vivo, tio ne estas ja pardonebla! Oni devas esplori, kiu kanajlo inside enmetis la kudrilon en la bulkon. — Ŝi do iris kaj alportis la kudrilon kaj la ne tutmangitan bulkon al la polico.

La polico ekzamenis la butikiston, ekzamenis ankaŭ la bakiston, kiu bakis tiujn bulkojn, sed kompreneble ambaŭ malagnoskis la kudrilon. Poste la polico transdonis la aferon al tribunalo, ĉar ja temis, komprenu min bone, pri lezo negrava. La esplorjuĝisto, tipo de konsciencia kaj ĝisosta burokrato, denove ekzamenis la butikiston kaj la bakiston; ili ambaŭ ĵure asertis, ke ĉe ili la kudrilo ne povis eniĝi en la bulkon. La esplorjuĝisto vizitis la butikiston kaj konstatis, ke en sia butikoj li ne havas kudrilojn. Poste li iris al la bakisto por vidi, kiel oni bakas bulkojn; li sidis en la bakejo tutan nokton kaj rigardis, kiel oni preparas paston, kiel oni lasas ĝin ŝveligi, kiel oni hejtas la fornon kaj plektas bulkojn kaj enforbigas ilin, ĝis kiam ili iĝas ore ruĝaj. Tiamaniere li konstatis, ke ĉe la bulkfarado oni efektive ne uzas kudrilojn. Vi eĉ ne kredus, kiel bela laboro estas la bakado de bulkoj, kaj precipe de pano. Mia karmemora avo posedis bakejon, mi do konas tion. Komprenu min bone, ĉe la panfarado ekzistas du aŭ tri pli grandaj kaj preskaŭ sanktaj misteroj. La unua mistero estas, kiam oni preparas la fermentaĵon; oni ĝin lasas en la knedujo, kaj tiam okazas sub la fermilo ia sekreta transsubstanciĝo: oni devas atendi, ĝis kiam el la faruno kaj akvo fariĝis vivanta fermentilo. Poste oni preparas paston kaj knedas ĝin per knedilo: tio do aspektas kiel religia danco aŭ io simila. Tiam oni kovras tion per tuko kaj lasas la paston ŝveli: tio estas la dua mistera transformiĝo, kiam la pasto majeste levigas kaj ŝvelas, kaj oni ne rajtas levi la tukon, por scivole ekrigardi — mi diras al vi, ke ĝi estas same bela kaj mirinda kiel la gravedeco. Mi ĉiam havis impreson, ke la pastujo estas io virina. Kaj la tria mistero estas la bakado mem, tio, kio el la mola kaj pala pasto fariĝas en la forno: Jesuo kaj Mario, se oni poste elprenas tian orkoloran kaj ruĝebrunan panbulton kaj ĝi aromas tiel, ke eĉ malgranda infano ne povas pli ĉarme odori, tio estas ega miraklo — mi opinias, ke oni devus dum la tri transformiĝoj en bakejoj sonorigi, same kiel oni sonorigas en preĝejo dum levado de hostio.

Sed kion mi volis diri? — la esplorjuĝisto do estis embarasita; sed cedi pri la afero li ne volis. Li prenis la kudrilon kaj sendis ĝin al la Ĥemia instituto, por ke oni konstata, ĉu la kudrilo estis en la bulko jam antaŭ la bakado, aŭ ĉu nur poste; sciu, ke tiu

juĝisto speciale ŝatis sciencajn ekspertizojn. Tiumtempo estis en la Ĥemia instituto iu profesoro, nomata Uher, tre klera sinjoro kun longa barbo. Ricevinte la kudrilon li komence terure insultis la tribunalojn pro ilia tropostulemo, ĉar antaŭ nelonge oni ankaŭ sendis al li inestaron tiel putran, ke eĉ la antaŭsekciisto ne povis elteni la fiordon; kaj kiam do komunecon havas la Ĥemia instituto kun ia kudrilaĉo? Sed poste li iom pripensis la aferon, kaj ĝi ekinteresis lin, komprenu min bone, laŭ scienca vidopunkto. Nu, li diris al si, eble do fakte kudrilo trapasas iajn ŝanĝojn, se ĝi eniĝas en paston aŭ se en pasto oni ĝin bakas: dum la fermentado estiĝas iaj acidoj aŭ io simila, kaj dum la bakado refoje, kaj la supraĵoj de la kudrilo tio povas iomete difekti, alivorte korodi: tion oni povus konstati mikroskope. Sekvi li sin ekokupis pri tio.

Antaŭ ĉio li aĉetis kelkcenton da kudriloj, ne sole da tute puraj, sed ankaŭ da pli aŭ malpli rustaj, kaj li komencis en la Ĥemia instituto baki bulkojn. Ĉe la unua eksperimento li metis la kudrilojn tuj en fermentilon, por konvinkiĝi, kiel ilin influas la fermenta procedo. Ĉe la dua provo li metis ilin en freŝe preparitan paston. Ĉe la tria en paston ŝvelintan. Ĉe la kvara en tute ŝvelintan. Poste li enigis ilin ĝuste antaŭ la bakado. Poste dum la bakiĝo. Plue li enpikis ilin en bulkojn ankoraŭ varmajn; kaj fine en bulkojn jam pretajn. Tiam la tutan serion da eksperimentoj li ankoraŭfoje ripetis, por fari kontrolon. Resume: dum du semajnoj oni faris en la Ĥemia instituto nenion alian ol baki kudrilhavaĵajn bulkojn: la profesoro, docento, kvar asistantoj kaj servisto ĉiutage preparis paston, bakis kaj pretigis bulkojn, kaj poste ili mikroskope esploris kaj komparis la rilatajn kudrilojn. Tiu laboro daŭris ankoraŭ pluan semajnon: sed lastfine oni precize konstatis, ke la koncerna kudrilo estis enpikita en bulkon jam finbakitan, ĉar sub la mikroskopo ĝi detale egalas al eksperimentaj kudriloj enmetitaj en pretajn bulkojn.

Laŭ tiu ĉi ekspertizo konkludis la esplorjuĝisto, ke la kudrilo estis enigita en la bulkon aŭ ĉe la butikisto, aŭ survoje inter la bakejo kaj la butikoj. Subite la bakisto rememoris, mil diabloj, ĝuste tiutage mi maldungis ja bubon-helpanton, kiu kolportadis bulkojn en korbaj! Oni do venigis la bubon, kaj li konfesis, ke la kudrilon li metis en la bulkon, por sin venĝi al la estro. La bubo, ne estante plenaĝa, ricevis nur admonon, sed la majstron oni kondamnis je kondiĉa puno de kvindek kronoj, ĉar li devas garanti pri sia dungitaro. Jen vi do vidas ekzemplon, kiel akurata kaj radikala estas la justeco.

Sed la afero havis ankoraŭ unu rezulton. Strange: en ni viroj enestas ia kurioza ambicio aŭ obstineco aŭ kio — unuvorte, kiam oni en la Ĥemia instituto jam ekbakis la eksperimentajn bulkojn, la kemiistoj decidis baki ilin bonaj. Komence ili estis ne tro taŭgaj, nesufiĉe ŝvelintaj kaj iom fuŝaspektaj; sed kredo: ju pli longe oni bakis, des pli bonaj ili estis. Poste oni jam surŝutis ilin per papavaĵo, salo kaj kumino — kaj kiel bele oni ilin plektis! — nu, vera plezuro! Fine tiuj scienculoj fanfaronis, ke tiel eminentajn, rompe-krakajn kaj perfektajn bulkojn kiel en la Ĥemia instituto oni bakas nenie en la tuta Praha.

El la ĉeĥa: Miloš Lukáš

Du poemoj per prozo

— Emanuel Lešehrad —

Dimanĉo de la koro

Mi staras ĉe malfermita fenestro. La strato
svarmas de homoj kaj veturiloj traŭrantaj; la koloroj
de la tegmentoj domaj brilas diverskoloro en kristala
aero, kaj en tera etaĝo momente eksonas raŭka mono-
logo de gramofono.

Estas somera antaŭtagmezo dimanĉa.

Baldakeno de la ĉielo flamas en koloro de hela
violo.

La turoj katedralaj kreskas al la nuboj.


Mi sopiras afliktite en la straton.

Post la pendantaj jaluzioj de kontraŭa fenestro
brilas du knabinetoj.

Ili legas el granda libro.

Ili havas blankan veston, orajn harojn kaj blu-
ajn okulojn.

El proksima ĝardeno fontas miela odoro de flor-
antaj olivoj.



Jan Stursa:

La donacoj de la ĉielo kaj tero

Mi estas feliĉega kvazaŭ mi estus nur dekdujara.
Kaj mi havis blankan veston, orajn harojn kaj
bluajn okulojn.

La sonĝo de mondcivitano

Kion vi farus, se vi estus milionulo? demandis
min foje amiko.

Mi aĉetus jakton kaj mi veturus en la maron: Mi
luprenus ĉambretojn kun rigardo al la maro en Ams-
terdam, en Leningrad, en Lisboa, en Napoli, en Is-
tanbul, en Alexandria, en Capetown, en New York, en
Rio de Janeiro, en Adalaide, en Bombay, en Nagasaki,
en Hong-Kong. La aranĝo de la ĉambretoj estus tute
simpla: tablo, seĝo, lito, apogseĝo, p'ano, bretaro kun
kelkaj libroj de poetoj al mi plej karaj. Se mi abvet-
urus al iu el la diritaj havenoj, mi forirus en mian
loĝejon kaj restus tie kiom longe al mi plaĉus. En iu
mi gastiĝus eble sole unufoje dum mia vivo. Mi estus
tiel en la vera senco de la vorto mondcivitano.

El la libro: Ponto super la mondo.

El la ĉeĥa: Geo

Sonetoj al Helena

— Bartoŝ Vlček —

I.

Ne estis ja perfid', ke vin mi iris for,
kaj mia silentad' ne estis fin' de l' am',
vi bone scias ĝin. Sed kiam venis hor',
en kiu svenis jam de nia amo flam'

kaj esti nur kutim' minacis nia sent',
rompiĝi devis ja la aranea ret'
pro kiu nia kor inklinis al la tent'
nur dormi en ripoz' post la komenca vet'.

Suferas ambaŭ ni nun dolĉe en solec'
kaj ĉiu duba sent' en ĝi reiĝas klara,
unuam amon ja revekos la sopir'.

Revenos tiam mi kun plena liberec'
en mia freŝa kor'. Sur via brusto kara
ripozos mia kap' sen iu plua dir'.

II.

Traviŝas jarojn mi en multa hor'
kaj vidas nur la ornuancan gemon
de via korp'. Ne sola estas mia kor':
ĵus via buŝ' sur mia vekis tremon,

kaj via zon' ĵus ondis sen riproĉ'
sub mia manolud' kaj kiel kordo
de violon' ĵus kantis via voĉ'
kaj via brust' al mia en konkordo

sin premas. Trinkas plena de avid'
mi fonton de forges' kaj rava sorĉo,
en kiu sidas ja eĉ svena tim'.

Sur vaga voj' de l' amsopir' sen brid'
perdita jam, mi scias, ke por dolĉo
de via korp' ne estas iu lim'.

El la ĉeĥa: Rud. Hromada

La tridektri savitoj

— Jarmila Hasková —

Profesoro Karlík ricevis la poŝtaĵojn. Li malfermis leteron laŭ aspekto tute decan, sed kun enhavo tre riproĉinda. »Vi, besto,« skribis al li la sekreta adoranto, »se vi kuragis rajdi sur Elektra tiel, kiel vi kutimas, anoncu vin ĝustatempe en la Kremacia Societo, por ke vi ne kaŭzu al via vidvino elspezojn.«

»Ha«, diris al si profesoro Karlík kaj liaj okuloj ekludis, »kiu do el tiuj tridektri tio estas?« Poste li ekmemoris, ke la verbon — kontraŭe al gramatika regulo de li instruata — li metis sur la finon de la frazo kaj li rapide sin korektis: »Kiu do estas el tiuj tridektri?«

Li etendis la manon en poŝon por la notlibro kaj elskribis ĉi tiujn nomojn:

Kadraba, Mokrý, Tuček, Hořina, Mander, Kaláš, Mašek, Král, Petřík, Chudoba, Kaucký, Pekuláš, Mikeš, Havlíček, Náhlovský, Rokytník, Černý, Čermák, Sýkora, Pavlík, Kokeš, Waraus, Malý, Pešák, Kratochvíl, Novotný, Novák, Nováček, Netolický, Lukáš, Franc, Adamíček, Kolařík.

Estis nomoj de tiuj, al kiuj li intencis doni plej malbonan klasifikon. Li kalkulis la nomojn kaj vidis, ke ili estas ĝuste tridektri.

»Ne domaĝas«, diris al si profesoro Karlík, »unu el ili estas li kaj mi lin trovas kaj punos.«

»Kolařík«, diris profesoro Karlík, »diru al mi, kion enhavas la *Eksodos* de Elektra.«

»*Eksodos*«, respondis Kolařík lerte kaj certe, »enhavas katastrofon, la efektivigon de la venĝo sur Klytaimnestra kaj sur Aigisthos.«

»Li ne estas tiu«, diris al si profesoro Karlík, manmovis, ke Kolařík sidiĝu, donis al li noton plej bonan kaj vokis lian najbaron Sýkora. Li rigardis lin kiel polica hundo kaj demandis ruze:

»Kion enhavas la prologo kaj la unua *episodio*?«

»La prologo«, respondis Sýkora be'e sonore, kiel tion ŝatis profesoro Karlík, »enhavas ampleksan kaj malrapide progresantan eksponon, kiu parte daŭras ankaŭ en la unua *episodio*.«

»Bone«, diris profesoro Karlík kaj skribis en la notlibron apud la nomo de Sýkora, ke Sýkora tion sciis tre bone.

»Ni plue serĉu,« li diris al si en spirito, »la cirklo mallargiĝas, el la suspektaj restas tridekunu. Čermák, diru al ni, kiel estis dividitaj la roloj en nia tragedio.«

»La roloj«, respondis Čermák fluege, »estis dividitaj inter tri aktorojn: *protagonistes* ludis Elektran, *deuteragonistes* Oreston kaj Klytaimnestron kaj la ceterajn rolojn ludis *tritagonistes*.«

»Sufiĉe,« ridetis profesoro Karlík. Mašek sciigos al ni, kiel estis konsistigita la horo.«

Li jetis sur Mašek rigardon, kiu penetras en la centron de la terglobo, sed Mašek ne evitis liajn okulojn.

»La horo,« sputis el si Mašek, »konsistas el dek kvin sinjorinoj *mykenaj*, amikinoj de Elektra, ankoraŭ ne edziĝinta. La lokoj de la agado estas...«

»Pri tio mi ne demandas vin,« interrompis lin profesoro Karlík. Li skribis al li la unuan klasifikon kaj demandis Novotný, kiel estas karakterizata Aigisthos.

Novotný, kiu neniam sopiris distingon, respondis kun admirinda certeco.

Vokis do profesoro Karlík studenton Mikeš, klakis

per la manoj, por voki la atenton de ĉiuj sur sian aperaĵon, kaj prononcis kun voĉo de esplorjuĝisto:

»Kion vi diros al ni, Mikeš, pri la kvara *episodio*?«

»Mi diros al vi,« ekparolis Mikeš tute familiare, »ke en la kvara *episodio* la agado turniĝas por avantaĝo de Elektra. Tio okazas per ŝia konatiĝo kun Orestes. Komenciĝas peripetio.«

»Kaj en la dua, kio okazas en la dua?« daŭrigis profesoro Karlík, signante, ke Mikeš sidiĝu kaj montrante per la mano sur Netolický.

»En la dua la agado kulminas, komenciĝas krizo.«

»Per kio?«

Tiu »per kio« estis destinita jam por Kaucký.

»Pro la sciigo pri la ŝajna morto de Orestes, Elektra estas pelata al decida ago. Si volas efektivigi la venĝon mem,« rapide parolis Kaucký.

Kvin minutojn antaŭ la fino de la leciono estis vokita Havlíček, la lasta el la tridektri.

»Ha,« pripensis profesoro Karlík, »nun vi ne eskapos de mi,« li diris ĝoje, frotante al si la manojn:

»Havlíček, respondu al mi skribe kaj tuj ĉi tiun demandon: Per kio rememorigas Elektra pri Antigone?«

Havlíček sidiĝis por skribi respondon kaj profesoro Karlík malrapide proksimiĝis. Lia rigardo ensorbis sin en la vizaĝon de Havlíček, kiu restis glacie trankvila.

»Mi montros al vi krematorion,« flustris al si profesoro Karlík.

Havlíček skribis.

»Elektra memorigas pri Antigone per sia heroeo, sento por rajto kaj justeco, delikata amo al patro kaj frato kaj per sia pasieco.«

Li sekigis la papereton kaj donis ĝin al la profesoro.

Tridektri paroj da malicaj okuloj rigardis profesoron Karlík.

Profesoro Karlík iris al la fenestro, turnis al la klaso la dorson, elprenis el la poŝo la minacan leteron kaj komparis la skribon.

»Ankaŭ li ne estas tiu«, li konstatis surprizite.

*

La Leterkesto

— Jiri Wolker —

*La leterkesto ĉe angul' de la strato
ne estas ia simpla aĵo nur.*

*Ĝi floras blue,
homoj ĝin traktas kun estimo kaj ŝato
kaj eĉ kun konfidenc',
de ambaŭ flankoj leterojn enmetas,
jen kun ĉagrena, kaj t'e kun ĝoja senc'.*

*La leteroj kiel poleno brilas blanke
kaj atendas vagonarojn, ŝipojn kaj homon,
por ke li kiel burdo kaj vent' dissemu ilin ĉiuflanke,*

— kie estas la koroj,

*stigmatoj ruĝaj,
kaŝitaj en roza ĉirkaŭflor'.*

*Se leter' aflugas al la kor',
kreskigas ĝi fruktojn
dolĉajn aŭ amarajn.*

El la ĉeĥa: Miloš Lukáš.

»Moŝta fraŭlino,«
skribis Tuček dum paŭzo, kiam profesoro Karlík for-
lasis la klason kun sia notlibro, plena de plej bonaj
klasifikoj kaj kun sopiro, ke li povu uzi la Roman-
leĝaron, kiu punis per morto ĉiujn sklavojn de la
mortigito, kiujn atingis la voĉo de la estro.

»Moŝta fraŭlino, tridektri savitoj kisas vian man-
eton. Sinjoro via kuratoro vokis nin pri Elektra ĉiujn
unu post la alia kaj ĉiuj estis plej bone klasifikitaj.

Moŝta fraŭlino, ni ĉiuj portas sur la koro vian koloron
kaj en la koro vian bildon.«

»Kaj tamen«, diris al si profesoro Karlík, rigard-
ante post la plej proksima skriba tasko la kajerojn de
la studentoj kaj komparante zorge la skribon de la
minaca letero kun la skribo de la tridektri savitoj, »kaj
tamen mi volus juri, ke ĉi tiun skribon mi jam vidis
iam.

El la ĉeĥa *Otto Ginz.*

Interparolo sub arbo

— M. Jensenová —

Ili kunvenis iun solenan vesperon sub la branĉoj
de duonsekiĝinta arbo, rememoriganta per malforteta rez-
ina odoro la freŝajn deklivojn de la kamparo. Sur la
branĉoj pendis vitraj aĵetoj, multkoloraj paperondetoj
kun restaĵoj de ĉokolado kaj malgajaj vaksaj larvoj.

»Kiel kortuŝa tio estis, la svarmo de la infanoj
ĉirkaŭ la lumigita arbeto!« ĝemetis libro, kiu kuŝis en
ombro post arba submetajo dezirinta dum la solena
momento ekludi per ploraj ladaĵoj »Dia nokt',
sankta nokt',« sed kies rusta risorto antaŭ mezo de la
kanto rompiĝis. »Kia ĝojo, kia feliĉo!«

»Mi miras pri vi,« anoncis sin dika, rozkolora in-
faneto, kun vizaĝo kudrita el ŝtofo kaj kun blondaj
haroj el brile ondigita stupo. »Estante de Kipling vi
havas tiajn antaŭdiluvaĵajn ideojn! Infanoj estas vipoj
de la hejmo, memoru, mia kara. Ekmemoru sole tiun
etan infanaĉon, ŝmiritan ĉie de salivo — kaj ĝi kuraĝis
min kisi! Al tia infano oni donas min — ekspozici-
aĵon!«

»Komprenu, fraŭlino,« tremigis rozkolora aŭto
sian kaleŝaĵon. »Sin hodiaŭ ankoraŭ neniu tuŝis, ŝi
havas ja ankoraŭ sian originalan kovrilon sur si. De
tie devenas tiu ĝemado de maljuna virgulino. Jes, kara
sinjorino Kipling,« ŝi moke elsputis, »por vi, libroj,
estas nun malbona tempo apud nia allogemo!«

»Allogemo!« eksusuris senzorge parfumo en fa-
cetitita boteleto. »Tia ligna plebo kuraĝas ĉi tie ĝeni
la kvieton, de mi traspiritan. Kaj entute — mi ne scias,
kiamaniere ni aperis en ĉi tiu familio, ĉu ne, kara
amikino?«

»Vere, vere,« plenblovis pluma pudriĉo sian molan
koleton super la opalo de pudra spiro. »Sinjorina
moŝto ne surhavis eĉ vesperan tualeton kaj la sinjoro
estis ja en pantofloj. Eĉ la hejman amikon mi vane
atendis. Ŝajnas, ke ĉi tie estos malmulta okazo por
flirto!«

Maldika eklumo de luno traŝovis sin tra la kurt-
eno kaj pendiĝis sur brilan stelon inter la verdaĵo koni-
fera. La flatita arbo tremigis siajn vitrajn juvel-
ojn kaj ekbalancis la oritajn sonoriletojn sur la ĉen-
finoj: »Mi aŭdis rakontojn pri la homoj, sed ili havas
maldelikatajn manojn kaj ili turmentas min per akraj
dratoj. La kisoj de la luno, mola neĝo kaj karesado
de la suno estis pli flataj ol aliaj malmolaj brilaĵoj,
kiujn ili ĉirkaŭpendigis volante gajni mian favoron.«

»Vi estas ĝuulo, kara sinjoro,« ekgrimacis denove
la ŝtofa infaneto. »Mi ne estas tiel absolute kontraŭ
tio, sed vestaĵon mi ĉiutempe pli ŝatis. Min ja incitas
tiu malĝentileco — mi mendis por mi koloron de hela
rozo, tiu pli bone taŭgas al mia vizaĝkoloro, kaj dume
tiuj knabinoj sen gusto liveris al mi tian flavan ĉif-
onon!« Kaj ŝi disjetis kolere ĉirkaŭ si la malpezan
silkon de la jupetoj.

»Ho, vestaĵo!« ekplendis malgaje simpla leda

pupo kun lada kapo, senmove kuŝanta sur skatolo kun
cigaroj.« La mondo malboniĝis. Mia dio, mia dio,
tiel terure malboniĝis! Se eĉ mia alloga nudo eĉ ne-
niu efikas...«

Sub vitra kloŝo balancis horloĝo sian noblan
oran pendolon: »Jen — viaj plendoj kaj viaj dis-
putoj — ĉu ili ne egalas disputojn homajn? Kio
estas via tuta senvalora vivo. vi pupoj de la homoj
kaj pupoj de la socio? Ĉi tie apude post la muro
vivas miraklo — infano dormas tie kaj ĝi estas trankvila
kaj ĝi songas pri dia amo kaj pri via perfekteco.
Kio estas via vegetado kompare kun la infana songo?
Kien vi pelas vin kun viaj zorgoj apud ĝia simpleco?
Sole mi rajtas mezuri ĝian profundon kaj interrompi
ĝian silkan fadenon! Pupoj de la homoj kaj pupoj
de la socio — kio vi estas kompare kun songo de in-
fano?«

La luna radio surglitis sur oran pendoleton, kiu
per malpezaj frapoj kalkulis la tempon.

Kaj estis silento sub la sekiganta arbo

El la ĉeĥa: *M. Ginzová.*



Otto Gutfreund:

Komercio



OBSERVO

MALLONGA KARAKTERIZO DE KELKAJ AUTOROJ REPREZENTITAJ.

Jaroslav Vrchlický estas plej granda novtempa poeto ĉeĥa, kies riĉega liriko kaj epiko ampleksas la mondon de antiko ĝis tempo moderna, li signifas la kulminon de romantika poezio ĉeĥa kaj li estas la pioniro de kosmopolitismo inter ĉeĥoj — kontraŭe Jan Svatopluk Machar estas reprezentanto de kuraĝa, konkera realismo, kies forto estas pli pensa ol arta — K. Toman ekŝatis kantan, mallargan noton, monotonan, sed sentojn tuŝantan — Emanuel Lešehrad komencis per intima kaj simbolista liriko, el kiu li alvenis en ĝojan prikantadon de la beloj de Universo kaj de la dia misio homa — Jan Vrba kulturadas en sia verko precipe la pejzaĝpentradon kaj la animon de Ĥodujo — Karel Čapek kombinas aventuro la ĉiutag-econ de la vivo kun romantismo de sortaj intervenoj, kiujn li lasas solvi de filozofio de sperta racio — bona rakontanto estas Zdeněk Rón — Jarmila Hašková estas verkistino de familia humoro — Štefán Kréméry estas delikata lirikisto.

FRANTISEK PODEŠVA,

la aŭtoro de nia kovrilo estas frapanta apero inter la modernaj artistoj, kiu ne maljuniĝis sur la unua stadio de sia evoluo, kiu sciis komplete liberigi de la regionismo same, kiel tion faris antaŭ li kaj apud li Filla, Kubín, Šima kaj Zamazal, devenantaj same kiel li el Moravio. Li sciis komplete rompi la feran ringon de la tradicio kaj ne timis enspiri la freŝan eŭropan aeron.


Lia ekspozicio, okazinta en la nuna aŭtuno en Praha, montras provizore la finan staton de lia interesa evoluo. La greka mitologio kaptis pense la pentriston Podešva, li vidas ĝin en feliĉa kamparo kaj li montras ĝin al ni per koloroj kaj en kompono laŭ maniero de la nuntempaj artistoj francaj. Figuroj kun mildaj gestoj fariĝis entute parto de la moderna figura pentroarto. Estis geamantoj, banantaj knabinoj, estis lavistinoj, ĝardenistinoj. Plian devenon oni povas dedukti de la Tahitaninoj de Gauguin, kiuj fariĝis iom post iom personoj sen hejmo kaj sen certa aparteno nacia aŭ rasa. Ke ilin Podešva metis en la antikvan Grekion, estas akraspirita trovo kaj inventa ago. Ni konvinkiĝas, ke ili trairis jam la antaŭajn etapojn evoluajn de Podešva, sed nur nun ili estas logike veraj kaj realaj en sia primitivismo kaj vivaj en sia multkoloro. Ĉi tie ili venis en la veran patrujon sub la profundan blumon de la ĉielo, al la blua maro, en la lumantan flavon kaj brunon de la suda lando. Ofte ni staras embarasitaj antaŭ la nedifineblo de tiuj estaĵoj, ili estu de Derain aŭ de Picasso: ĉi tie ni ilin plene komprenas. Ĉi tie ili estas en sia vera hejmo, hejme en la mitologie reala suda patrujo.

F. L.: SKIZO PRI ĈEĤA ARTO.

La ĉeĥa plastika arto, en sia moderna formo, datas de la komenco de la XIX-a jarcento. Ĝian reviviĝon en tiu epoko helpis grave la fondo, en la jaro 1800, de la Akademio de Plastikaj Artoj en Praha, kiu enkondukis la klasikismon en Bohemion. En la unuaj jardekoj de la jarcento, nek la arkitekturo ĉeĥa, nek la skulptarto apartiĝas de la stilo empira, en formo adaptita de Germanujo. La romantikismo de la epoko de nacia vekigo (kiu en la politika sfero finiĝis per la revolucioj de la jaro 1848) estis la instigo, ke la ĉeĥa animo ekdeziris manifesti sin ankaŭ per arto plastika. Filo de tiu romantika

epoko Josef Mánes (1820—1871) entuziasmis per grandaj monumentoj de la pasinteco, per studado de kamparano ĉeĥa, moravia kaj slovaka, en kiu li vidis gardanton de la tradicioj antaŭulaj, gardanton plej fidelan de la rasa trezoro. Josef Mánes havis videblan tendencan al stilizado dekoracia. Tio, kion oni hodiaŭ nomas »pura pentrado«, brilas eksterordinare kaj vive ĉe Josef Navrátil (1798—1865).

Dum la alveno de la pentrista realismo, kiu sin anoncas ĉirkaŭ la jaro 1860, komencas montriĝi memvola kaj daŭra celado por proksimiĝo al la franca arto. La historia pentrado estis kulturata de Jaroslav Čermák (1830—1878) kaj de Václav Brožík (1851—1901), la pejzaĝo de Antonín Chittussi (1847—1891), ĉiuj tri loĝantaj en Parizo. Kio koncernas talenton pentristan puran kaj simplan, neniu tiam superis la tro frue malaperintan Karel Purkyně (1834—1868). Kontraŭe en tiu direkto verkon finlaboritan postlasis Josef V. Myslbek (1848—1922), kiu sukcesis ekkompreni funde la principojn de la franca realismo laŭ propra maniero kaj laŭ ili krei formon grandiozan, kiu havigis al li la titolon de la fondinto de la moderna skulptista arto ĉeĥa. La patriota noto resonas pli forte kaj pli konvinke ol ĉe iu alia artisto en la verkoj de Mikoláš Aleš (1852—1913) kiu bildigis kun multe da emocio kaj delikateco okazintaĵojn el la pasinteco same kiel scenojn kamparajn. En tiu epoko la arto servis konscie al naciaj politikaj aspiroj. La sekvanta generacio, kiu komencis sian aktivecon ĉe la fino de la jarcento kaj unuiĝis en asocio sub la egido de la granda nomo de Mánes, havi okazon por koncepti la arton malpli tendence kaj sin dediĉi al serĉado de pura formo. Inter arkitektoj de tiu ĉi grupo fariĝis plej eminenta Jan Kotěra (1871—1923) la fondinto de la moderna




Jan Amos Komenský-Comenius
(1592—1670)

la Instruisto de la Nacioj, eminenta pedagogo ĉeĥa de tutmonda signifo, parolanta en siaj verkoj ofte pri la neceso de internacia lingvo.

ĉeĥa arkitekturo; riĉe talentita inter pentristoj estis Jan Slaviček (1870—1910), kiu aligis al sia eksterordinara talento scianta osciligi la koloron sub radioj de la lumo, alian ne malpli valoran kapablon: sintezigi la animon de la pejzaĝoj, kiujn li pentris, Max Svabinský (1873) akiris merititan famon kiel portretisto kaj gravuristo, dum Joža Úprka (1861) preferis bildigi kamparanojn slovakajn kaj iliajn kostumojn vivkolorajn. Dušan Jurkovič (1868) entuziasmiĝis per popolaj konstruaĵoj lignaj

por solvi la problemojn de la nuntempa arkitekturo. Tre esprimita senco ornama montriĝas ĉe Alfons Mucha (1860) kiu vivadis dum longaj jaroj en Parizo, kaj ĉe Jakub Obrovský (1882). La verko de Jan Stursa (1880—1925) pravas instinktan skulptistan talenton kunigitan kun eksterordinara forto kaj regulitan de nobla disciplino rilate formon. Flanke de tiu ĉi generacio la komenco de la 20-a jarcento vidis formiĝi grupon artistan orientitan al kubismo eltrovita antaŭ nelonge en Francujo.



Max Svabinský:

En paradizo

Arkitektoj Josef Gočár (1880) kaj Pavel Janák (1882), dekoristo František Kysela (1881), skulptisto Otto Gutfreund (1889—1927) eminentiĝis per laboroj plenaj de alta stilo kaj de daŭra arta valoro. Iliaj laboroj estis de la unua komenco modeloj al vico de junaj artistoj, kiuj en la arkitekturo esprimis sin per konstruktivismo de tre sobraj linioj, en la pentrado kulturis kubismon kaj superrealismon. Estas kompreneble, ke en ŝtato sendependa la artaj rilatoj kun fremdlando estas multe pli viglaj ol en la pasinteco, ke la artistoj havas multe pli da okazo sin konatigi ekster la limoj de sia lando.

En la respubliko la moderna arto estas bone reprezentita en kolektoj de la Moderna Galerio de Praha kaj en la Galerio de Brno. Ĉeĥoslovakaj artistoj, ankaŭ en siaj novaj generacioj, irantaj en direktoj plej diversaj, dediĉas sin serioze al fundamentaj problemoj de la arto, por atingi la komunan celon: esprimi per nova maniero plastikan rilaton inter homo kaj universo.

El la ĉeĥa: *Konst. Koutek.*

KAREL CAPEK.

Eble la plej forta spirito aŭ almenaŭ la plej signifa verkisto de la literatura generacio ĉeĥoslovaka maturiĝinta dum la lastaj jaroj de la Mondmilito. Per la politikaj renversoj, per sociala revolucio, per la disvolvo de tekniko kaj organizo li lasis sin ne sole intelekto instrui, sed ankaŭ sense kaj morale kapti. Ĉar li kun sia generacio pasie aliĝis al la problemoj de civitana realeco, kiujn li solvas ĉiam sole relative kaj praktike, li kun siaj kunuloj estas konsiderata spirito civila kaj pragmatika. En liaj verkoj, fidelaj infanoj de sia epoko, blovas revolucia humoro, aperas utopia deziro, volbigas pensa titanismo, sed Capek ne glorigas ĉi tiujn tendencojn, sed kritikas ilin skeptike kaj deduktas ilian neuzablaron, ja eĉ malutilon por la vivo per sprita dialektiko romana kaj drama. Al sia filozofia konvinko, kiu penetras tra ĉiuj liaj verkoj, donis Capek plejparte vivan, klaran kaj sugestan formon, kiujn li atingis post siaj junaĝaj provoj pri novklasikismo

kaj kubismo kaj en kiu oni povas konstati la influon de literaturo angla, precipe de Wells, Shaw kaj Chesterton. Lia esprimo stila alproksimiĝas efike al la interparolo de la ĉiutago, en kio li estas sekvanto de Jan Neruda kaj de aliaj realistoj. Pli forte ol iu alia el liaj samtempuloj li enportis la ĵurnalistan elementon en la romanon kaj novelon, sed la banalecon per tio kaŭzeblan li evitas per freŝa, sana, vireca bonhumoro.

Dum la unuaj tempoj aperis Karel Capek antaŭ la publiko kun sia pli aĝa frato Josef. Lia komuna laboro estas *La franca poezio de nova tempo* (1920), antologio de 52 francaj lirikistoj de Baudelaire ĝis H. Franck, la kolekto *Gardeno de Krakonoŝ* (1918) kaj la verko *El la brilantaj profundoj* (1916).

Memstara laboro de Karel Capek estas lia granda romano *Fabrika de Absoluto* (1922), en kiu li kaprice malkovras la danĝeron de religia Absoluto, liberigita el la materio per ĝia perfekta bruligo, en *Krakatit* (1924) li kritikas la titanismon, kiu per invento de fortega eksplodado starigas la mondon antaŭ katastrofo. La heroo-technikisto post tento de mono, amo, politika ambicio, sociala mesianismo trovas savon en la sindono antaŭ la Dio kaj en servo al la homaro. Liaj *Rakontoj el unu poŝo* kaj *Rakontoj el alia poŝo* (ambaŭ 1929) estas parte kriminalaj okazintaĵoj renversitaj laŭ maniero de Chesterton, parte spritaj aŭ kortuŝaj historietoj el la vivo de malgrandaj homoj. La felietona arto de Karel Capek kulminacias, kiel ĉe Jan Neruda, en la vojaĝpriskriboj. Famaj ankaŭ en eksterlando estas liaj *Leteroj italaj* (1923), *Leteroj anglaj* (1913) kaj *Ekskurso en Hispanion* (1930).

En la sceno aperas Capek en 1920 per la komedio *Rabisto*. Poste jam sekvas liaj grandaj verkoj teatraj, kiuj portis lian nomon malproksimen en la mondon, trans Germanio en Anglion, Usonon, Japanion, ankaŭ en Hungarion, Polion, Sovetunion, en nordajn landojn ktp. En *RUR (Rasion-Universal-Robotoj)*, 1920 li kritikas en kadro de utopio la maŝinan civilizon. Lia triakta revuo kun prologo kaj epilogo *El vivo de insektoj* (1921), far-



Josef Mánes:

Mateno

ita kun la frato Josef, diras nihilistan verdikton super la homa penado de seksa amo, privata posedaĵo, civitana kaj milita heroeco. La afero *Makropulos* (1922) estas tragikomedio de titana sopiro je senmorteco. Ambaŭ fratoj kunlaboris ankaŭ en *Adam, la kreinto* (1927), kiu tamen ne spegulas la genion de la aŭtoroj.

Studojn filozofiajn en amuza maniero prezentitajn enhavas la *Pragmatismo aŭ filozofio de praktika vivo* (1917), sprita analizo lingva estas *Kritiko de vortoj* (1920), en pluraj verkoj: *Pri aferoj plej proksimaj*, *Skandala afero de Jan Hotoušek*, *La jaro de la ĝardenisto* kaj en multaj aliaj li montras sin vera majstro de la lingvo, observanta akre la vivon, vive reaganta al la aktualaĵoj kaj ĉiam preta helpi la prematojn.

En Esperanta traduko aperis libroforme RUR, krome multnombraj rakontoj kaj noveletoj en la gazetaro.

Arne Novák

DISKUTO

LETERO AL S-RO BENNEMANN

koncerne lian recenzon pri la „Parnasa Gvidlibro“

Kara Samideano!

Aŭtoro toleru silente la batojn de recenzanto: mi rekonas ĉi tiun devon, se ne etikan, almenaŭ etiketan. Sed ĉi tie ne tenas pri batoj (kiujn cetere vi eĉ ne donis), sed pri diverseco de opinioj, kiujn oni certe povas pridis-kuti. Kaj mi konfesas, ke mi ambicias konvinki vin, unu el la plej kleraj kaj klarvidaj kolegoj, pri la ĝusteco de kelkaj niaj opinioj. Ne, ĉar ili apartenas al ni, sed ĉar ni akiris ilin post longa pripensoj kaj konsiderado kaj ni kredas, ke ili donas la solan solvon por nesolvitaj problemoj.

Unue, temas pri la ritmo. Ĉu vi ne vidas, ke ĉi-rilate regas anarkio? Germanoj kaj rusoj tenas sin al rigida ritma skemo, kiu evidente ne taŭgas al la lingvo, ĉar trudas al ĝi nedigesteblajn inversojn de vortordo. Latinidoj, precipe katalunoj, male, uzas tute liberan, silab-nombran metrikon, kiu same ne konvenas al la lingvo, ĉar estigas karambolojn de plenakcentaj silaboj, netoler-eblajn pro la peza forto de la esp-a akcento. Nu, ni faris — per la ĝeneraligo de la ritmaj permesoj uzitaj de Zamenhof — tre komfortan kompromison, kiu perfekte konformiĝas tiel al la frazkonstruo, kiel al la sonkarak-tero de la lingvo, kaj — ĝuste per ĉi tiu konformeco — mirinde faciligas la meton de elegantaj, lingve ne perfor-titaj versoj. Oni devas nur akcepti ĉi tiun sistemon, por ne plendi plu pri la netaŭgeco de esp-o por la poezio. Kaj se oni jam ĝenerale akceptis ĉi tiun metrikon — kion ni esperas — ĝi estos la esp-a metriko, al kiu oni same povas kaj devas alkitimiĝi, kiel al iu ajn nacilingva metriko. Ĉar, ĉu ne, se vi legas versojn en la itala aŭ franca lingvo, vi ne kritikos ilin laŭ germanaj metri-kaj reguloj? Vi parolas pri via »germana ritmosento«. Nu, vi devas ĝin formeti, kiam vi legas alilingvan — ankaŭ esp-an poemon. Same faros la franca, angla, rusa; itala, kataluna, hungara, japana esp-istoj, kaj tiel iom cedinte, multe gajninte, ili renkontiĝos en la bela ora mezo.

Dum nun, la afero statas tiel, ke ĉiu uzas sian nacilingvan metrikon kaj staras fremde antaŭ la alilingva. Tiel, ke ĉiu ĝuas nur la poemojn tradukitajn el lia propra lingvo, kiujn ja multe pli perfekte li povus ĝui en la originalo.

Facileco kaj unueco — ĉi tiuj du grandaj avantaĝoj, laŭ mia opinio, valoras tiom, ke oni estu malpli severa kaj rigida, precipe, se oni, kiel ankaŭ vi, tre klare rekonas, ke la severeco kaj rigideco starigas apenaŭ trair-eblajn malhelpaĵojn antaŭ la esp-a poezio.

Cetere tiuj severo kaj rigido tute ne havas ankoraŭ tiel firman tradicion, ke oni ne povu ilin iom moligi. Grabowski en Sinjoro Tadeo uzis la liberan polan met-rikon kaj Zamenhof, kvankam li klopodis sin teni al severa skemo, ofte permesis al si licencojn. Ĝuste tiujn ĉi



Jaroslav Cermák:

Virino el Montenegro kun infano

ni ĝeneraĵis, farante el ili permesregulojn. Ni opiniis: se Zamenhof, kiu laboris tiel zorge kaj konsciencie, tamen uzis ilin, ili nepre devas esti kelkfoje neeviteblaj. Kaj kio estas neevitebla en lingvo, tio devenas el la naturo de la lingvo, do oni ĝin ne hontu, oni prefere faru el ĝi regulon.

Due, mi volus respondi pri la afero de l' logiko. Nu, kompreneble mi ne volis senkulpigi gramatikajn erarojn. Mi volis nur emfazi, ke la poeto povas kaj devas libere uzi tiun flekseblecon, kiun havas nia lingvo, ĉar ja ĝuste tiu ĉi fleksebleco ĝin taŭgigas por poezio. Kaj kontraŭ tio oni neniel povas argumenti per la ekzemplo de Zamenhof. Jen, la esprimoj de vi stampitaj grandparte ja havas analogaĵojn en la zamenhafa lingvuzo. *Kvinjamba* estas pravigita per *centjaro*; *fluido* per *acido*; *apostrofa* (apostrofhava), *akcenta* (akcenthava), *manka* (mankhava) per *ĉagrena* (ĉagrenhava), *fiksa* (fikshava), *ŝtona* (ŝtonhava); *kaŝo* (kaŝiteco) per *embaraso* (embarasiteco). Pri *hoki*, mi atentigas, ke substantivradikaj verboj povas esti uzataj netransire, kiam ili signas ne laboron per la respek-tiva objekto, sed la funkcion de la objekto mem. Se oni diras: koro martelas (funkcias kiel martelo), ĉu oni ne povus diri: la fiŝosto hokas (funkcias kiel hoko)? *Taski*, *duopi*, *traponti* eble ŝajnas strangaj kaj dubaj en si mem, sed kun la teksto ili estas tute unusencaj kaj unua-vide klaraj, ili do tute respondas al la principo »sufiĉo kaj neceso« kaj krome ne pekas kontraŭ fundamenta aŭ tradicia regulo. Kaj se vi bonvolis honori miajn versojn per la laŭdo, ke ili »donas simplan komprenon«, tio estas sufiĉa pruvo, ke uzante la flekseblecon de esp-o, la poetoj marŝas sur tre bone irebla vojo. Kaj se vi timas, ke tiuj eraretoj kvazaŭ infektos la esperantistojn, mi devas diri, ke mi tre ĝojus, se en iliaj tekstoj oni trovus nur tiajn eraretojn.

Trie, parolante pri la neologismoj, mi tre ĝojas, ke antaŭ via klarvido mi ne devas min defendi kontraŭ la akuzo pri »infana vortfabrikemo« kaj »nekapablo preciz-igi ideon«. Vi ja mem konfesas, sciante tion el praktiko, ke »la klasika Esperanto estas tre malfacile uzebila por versoj«. Niaj opinioj diverĝas nur en tio, ke vi prefere rezignas pri la poezio, dum ni volas la lingvon por tio perfekte taŭgigi.

Nu, permesu diri, ke ĉi-rilate ni estas pli zamenhofaj

ol vi. Jen ekzemple citaĵo el la Lingvaj Respondoj: »Estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn, sed kontraŭe, ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos. Unu el la plej ĉefaj taskoj de nia verkistoj devas esti la ellaborado de nia lingvo.« Kaj ke Zamenhof ĉi tie ne aludis nur pri malfacilaj prozaj tekstoj, tion montras, krom liaj versaj tradukoj, ke estis li, kiu ne ĉesis kuragi la dubantan Grabowski por la traduko de Sinjoro Tadeo. Kaj mi estas certa, ke li ĝoje aŭdis, ke iu kuragiĝis ektraduki la Inferon de Dante.

Kaj kion signifas ja tiu ellaborado de la lingvo? Certe du aferojn: plifleksebligon kaj pliriĉigon.

Iom post iom — diris Zamenhof — kaj prave. Sed tiu iom ankaŭ ĉe li ne ĉiam signifis iomete. Grandaj taskoj certe postulas iom pli grandajn paŝojn ol malgrandaj. La Biblio pli, ol la Fabeloj de Andersen. Kaj Sinjoro Tadeo, Eterna Bukedo kaj Infero de Dante eĉ pli grandajn, ĉar ili ja estas en versoj. La neologismoj de mi revivigitaj aŭ enkondukitaj naskiĝis el ĉi tiuj du taskoj.

Vi diris, ke oni prefere lasu la poezion en ĝia stato, almenaŭ nun. Sed ĝis kiam do ni prokrastu? Kiu diros, kiam alvenis la tempo? Kaj, se esp-o, kiel vi diras, havas pli gravajn taskojn, ĝi ja certe havas aŭ havos taŭgajn homojn, kiuj ilin faros. Kion faru tiu, kiu sentas en si kapablon sole por la poezio? Ĉu li eksilentu, ĉu li ne faru la laboron, kiun li deziras kaj ankaŭ kapablas fari? Ĉu tio ne estus perdo por la lingvo? Ĉu Esperanto povas permesi al si la lukson, ke ĝi mortigu siajn poetojn, ĉar ankoraŭ ne alvenis ilia tempo?

Endanĝerigo! — jen la timo, kiu naskis en vi ĉi tiun Herodan postulon. Sed ĉu vere la pliriĉigo endanĝerigas Esperanton? Ĉu la literaturaj vortoj eksprese penetros en la ĉiutagan lingvon por ĝin konfuzi? Ĉu niaj komencantoj rapidos pleniĝi siajn leterojn per ĵusnaskitaj neologismoj por la senkomprena miro de ilia korespondanto?

Vi certe mem ridetos pri ĉi tiu supozo. Al ĉiu esp-isto plej familiaraj estas la vortoj, kiujn li lernis el sia lernolibro, el tiuj vortoj do li kunmetas sian ĉiutagan parolon, sian simplan skribon. Por uzi pli grandan, pli »altan« vortprovizon, oni bezonas jam certan forto-streĉon, kiam oni faras nur, kiam oni metas pri la stilo pli grandajn pretendojn. Interese estas ĉi-rilate rimarki, kiel malofte oni uzas en la ordinaraĵaj parolo kaj skribo eĉ tiujn oficialajn vortojn, kiuj troviĝas jam trans la sfero de la simpla stilo. Kaj tamen, ĉiu bona esp-isto konas, komprenas ilin.

Do, kompreno de vorto kaj uzo de vorto estas aferoj malsamaj. Multe pli facile oni lernas vorton kompreni ol uzi. Ekzemple mi komprenas preskaŭ la tutan germanan literaturan vorttrezoron, sed la vortprovizo, kiun mi povas senkaprompe uzi, estas tre mizera. Kaj same estas pri Esperanto kaj same estos ĝis tiu tempo, kiam ĝi fariĝos por ĉiu la dua lingvo, lernita jam infane kaj uzata senĉese. Sed tiam, ĉu ne, ne gravo plu, ke tiu lingvo estu tiel fabele facila.

La supre nomita cirkonstanco, laŭ mia opinio, perfekte certigas, ke la poeziaj vortoj ne invados la komunan lingvon, ili do ne tuŝos la cirklojn de la »simplistoj«. Same, kiel la francaj poeziaj vortoj neniam estas uzataj en simpla parolo aŭ en gazetartikolo. Same, kiel la arkaĝintaj vortoj de poetoj, kiujn oni studas en la lernejoj, neniam sin trudas sur la langon de la lernanto, kiam li babilas kun siaj amikoj. La propagandistoj kaj ignoristoj do povas esti tute trankvilaj, la poezio ilin lasas tiaj. Sed eble ankaŭ la poetoj povas peti reciproke, ke tiuj ne ekskomuniku ilin.

Ĉar nuntempe oni ofte faras tiajn ekskomunikaĵojn. Eĉ pli. Oni kvazaŭ penas konvinki la esp-istojn, ke ili nepre devas esti maldiligentaj, ignoremaj, eĉ stultaj, ili devas rifuzi lerni novajn vortojn, eĉ se la aŭtoro estas tiel kompleza, ke li listigas ilin je la fino de la libro, por ŝpari al ili kaprompon kaj serĉadon. Pri la kvindek ĝis-

nunaj neologismoj de Literatura Mondo (sur proksimume 1000 libropagoj) estigis tuta aparta literaturo, oni parolas pri »sufoka atmosfero«. Sed oni forgesas, ke ĝi estas literatura revuo kaj donas multajn poemojn, do ĝi uzas ne nur la komunan lingvon, kiel raporta aŭ propaganda gazeto.

Tio cetere ne estas nur nuntempa maŝano. En malnova recenzo (el 1914) mi legas averton kontraŭ verko, kiu enhavas la vortojn: aktiva, determini, miskompreni, aflikti, inverse, abunda, absorbi, heziti, akuzi, ekzakta, redukti, agnoski, trista, rara (ĉiuj oficialaj nun, escepte de lastaj tri). Aliflanke estas interese ke la sama severa recenzinto (Marie Hankel) skribas en la sama jaro: »Fanatismo estas la senindulga persekuto de novaj vortoj, la ĉasado, elspionado de ili. Povus ja okazi (jen hipotezo), ke ia verko, anonime prezentita de nia Majstro mem, pro kelkaj novaj vortoj estus mallaŭdata, ĉar la nekonata aŭtoro uzis »neaprobatajn« vortojn. El tiu ĉi hipotezo oni povas vidi, kien kondukas fanatismo.« Ĉi tiun citon ne al vi mi adresas, sed al sinjoro Fischer, kiu eltrovis la »evoluson sen evoluigo«, parencon al la hungara »ferringo el ligno«.

Jes! la ekzemplo de Zamenhof! Mi ne volas ree per ĝi argumenti. Mi diras nur, ke estas nedireble domage por nia poezia lingvo, ke li ne povis fini, aŭ almenaŭ parte fari tiun grandan vortaron german-esperantan, kiun li planis antaŭ sia morto, intencante per ĝi vere kompletigi la lingvon, donante proponojn por multaj ĝis tiam mankantaj nuancoj. Almenaŭ tion oni konjektas el lia letero skribita al sinjorino Hankel (14. II. 1917): »Mia vortaro kompreneble ne havos oficialan karakteron, ĝi estos nur provizora helpa vortaro por tiuj, kiuj por iu ajn ideoesprimo ne povas trovi pli bonan vorton.« Tiajn singardajn vortojn la Majstro uzis kutime antaŭ granda paŝo.

Sed mi ne povas senfine longigi ĉi tiun leteron, kaj tial mi volas diri kelkajn vortojn nur pri la mal-vortoj ankoraŭ. Dum la Parizo kongreso, en gaja kafeja societo sinjoro Warnier petis sinjoron Schwartz: »Bonvolu malfermi la fenestron!« Kaj Raymond Schwartz, certe ne malbona esp-isto (kaj krome franco, al kiu estas gepatra la radiko *ferm*) bele — fermis la duonfermitan fenestron. Ĉirkaŭ dekdu atestantoj estas je dispono.

Mi aldonas, ke la silabon *mal* ne forglutis la bruo, Raymond Schwartz ĝin tute klare aŭdis. Sed ankaŭ tiu eblo de forgluto estas konsiderinda, ĉar ĉe certaj vortoj (malsupre, maldekstre), en certaj cirkonstancoj, ĝi povas alporti danĝeron.

Mi devas fini, do mi ne povas paroli nun pri tio, kial bezonas nepre riĉan vortprovizon la literatura, precipe la poezia lingvo — cetere ĉi tion mi ne devas pruvadi al vi, kiu, laŭ la atesto de viaj vortoj, scias tion same bone kiel mi. Do ties preparolon mi prokrastas ĝin alia okazo, kiam mi intencas tuŝi la demandon pri l' orientanoj, diri mian opinion pri tio, kiom niaj proponoj estas rigardeblaj kiel definitive lastaj, kaj en kia direkto bezonas ankoraŭ prilaboradon la poezia vorttrezoro.

Mia ĉefa celo nuna estis vin konvinki pri tio, ke la riĉeco de la poezia lingvo tute ne endanĝerigas Esperanton. Sukcesinte tion fari, estus tre kontenta kaj feliĉa

samideane via:

K. Kalocsay

La nunan numeron dediĉitan ekskluzive al la

ĉeĥoslovaka numero

redaktis kaj prirespondas: S-ano Otto Ginz, Praha.

Al la januara numero ni aldonos detalan Enhavtabelon. Abonanto, kiu ne plu povas aŭ volas aboni ricevos ĝin sendinte neadresitan respondkarton.
